

MARJORIE BOULTON

Faktoj kaj
Fantazioj



uea

FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ

FAKTOJ

kaj

FANTAZIOJ

progresiga legolibro

Marjorie Boulton

Universala Esperanto-Asocio
Rotterdam
1984

ANTAŬKLARIGO

Ĉi tiun libron mi destinis, ĉefe, por legantoj, kiuj apartenas al la kategorio de 'progresantoj'. Ne eblas difini tiun kategorion kun zoologia precizeco; sed certe ĝi inkluzivas tiujn, kiuj finis unuan, elementan kurson pri Esperanto, kaj deziras plueniri: kiuj, do, posedas, espereble, sufiĉan gramatikon, por kompreni, kiel konstrui ordinarajn frazojn, kaj sufiĉajn vort-radikojn, por havi materialon, el kiu konstrui ion. Iliaj sekvaj taskoj estas: tiel ekzerci sin en sintakso, ke ili iĝos kapablaj legi, skribi kaj paroli sen konstanta koscia atento al reguloj, kiujn ili konstante aplikos; provizi sin per vortostoko, kiu liberigos ilin de lingva infaneco, permesante interŝanĝojn pli interesajn ol "Ĉu la libro estas sur la tablo?" — "Ne, sed sur la tablo estas du kajeroj kaj unu florvazo." — kaj informi sin pri la esperantista kultura komunumo kaj divers-celaj organizoj, por ke ili kiel eble plej multe profitu de sia nova lingvo-scio, kaj, espereble, ankaŭ iom servu tion, kio ilin servas.

Tamen, ne aperos ia dekreto, limiganta la uzon de ĉi tiu libro nur al novebakitoj, al tiuj, kiuj ĵus finis elementan kurson. Ekzistas en la mondo kelkaj esperantistoj, kiuj antaŭ sufiĉe longa tempo bakiĝis en la milda forno de elementa kurso, sed kiuj ankoraŭ ne... gratenis sin.

Simile: mi pensis pri la aĝogrupoj 12-jara ĝis 92-jara; sed tute ne volas definitive malrekomendi la libron ekster tiuj aĝolimoj.

Mi esperas, ke la gvidantoj de progresigaj kursoj trovos la libron utila, sed mi celas ankaŭ niajn multajn, ofte laŭdinde progresemajn, aŭtodidaktojn kaj izolitojn. La divido en 52 ĉapitrojn celas plejparte ĉi tiujn — jen ĉiusemajna tasko, por privata studojaro. Sed ĉiu instruisto aŭ memlernanto elpensos detalojn de praktika uzado laŭ sia bontrovo, en sia situacio.

En pedagogio, kiel en multaj aferoj, dogmema preskribado povas tre misgvidi nin. Tamen, mi verkis ĉi tiun libron, sekvante, laŭ miaj kapabloj, kelkajn ĝeneralajn, iom elastajn, principojn, kiujn mi konfesos.

Mi deziris verki legolibron universalan kaj neŭtralan.

Mi estas brita civitanino (denaska), kaj neeviteble ligita al eŭropa kulturo; mi pasigis nur dek kvin semajnojn el kvindek ses jaroj ekster Eŭropo. Mi ne povas tute senplumigi min de mia eŭropaneco, kaj, estante pirolo, prezenti min sinsekve ankaŭ kiel aron, buceron, haliaeton, kakatuon, pingvenon kaj struton. Ĉiu el ni restas limigita per individua vivospertado. Tio, kion mi tamen vere tre penadis fari, estas, verki libron laŭ miaj limigitaj kapabloj mond-rigardantan: almenaŭ ĉerpi fabelojn kaj mirindaĵojn, homajn atingojn kaj kuriozaĵojn, el ĉiuj kontinentoj kaj multaj landoj; respektu aludi plurajn religiojn; iom sugesti la multecon de diversaj bonintencaj vivostiloj en nia mondo. Mi esperas, ke, celante ian kulturan universalecon, mi ofendis aŭ vundis neniun. Miaj intencoj estas amikaj al ĉiuj.

Ĉi tiu libro estis komisiita de UEA, kaj mi tre forte subtenas la principon de neŭtraleco de UEA. Mi esperas, ke mi sukcesis eviti netaŭgan partiecon; certe mi ofte penis sugesti, ke pri diversaj aferoj ekzistas du vidpunktoj; certe mi penis verki nek kiel brito, nek kiel eŭropano, nek kiel blankulo, nek eĉ kiel virino, sed kiel ano de la homaro. Se iu sentas, ke ie mi iom misfaris kontraŭ laŭstatuta neŭtraleco, mi pardonpetas; tion mi ne faris konscie.

Tamen, oni apenaŭ povus verki ion legindan, kiu estus perfekte senopinia! kaj oni ja trovos ĉi tie kelkajn implicitajn aŭ eĉ eksplicitajn principojn, kiuj espereble estas sufiĉe komunaj al bonintenculoj de diversaj ideologioj, por ne esti atencoj kontraŭ nia neŭtraleco. Se iu ofendiĝas, ĉar mi sugestas, ke paco estas preferinda al milito; ke kompatado estas preferinda al krueleco; ke honesta laborado estas preferinda al krimado aŭ ekspluatado; ke lojala amo aŭ amikeco estas preferinda al nesentema senrespondado en homaj rilatoj; ke inteligenta sciamo kaj larĝa klerigado estas preferindaj al filistrismo kaj obskurantismo; kaj ke respekto al homaj rajtoj kaj al la alieco de aliaj estas preferindaj al privata aŭ publika tiranado — nu, pri tiaj indikoj de opinioj, mi ne pardonpetas.

Post universaleco kaj neŭtraleco venas pedagogiaj principoj. Mi penis verki libron varian kaj interesan, ĉar neniu multon lernas el libro, kies enhavo neniel instigas al legado. Mi demandis al mi, kion homoj plej ĝenerale deziras legi, kaj mia provizora respondo

estis: rakontojn, verajn aŭ fantaziajn, kiuj igas ilin streĉe atenti, miri, kortuŝiĝi aŭ ridi.

Mi ne garantias, ke ĉio, kion mi prezentas kiel fakton, estas vera: mi ne persone ĉeestis ĉion! sed ĉion mi vere trovis ie, plejparte en konsult-libroj, prezentitan kiel veran. Simile, mi esperas, ke ĉiuj fabeloj estas aŭtentikaj specimenoj el la folkloro de diversaj landoj.

Mi pasigis multajn semajnojn en entute ses grandaj bibliotekoj, serĉante materialon ne jam tro gurde cititan, esplorante kelkcentajn librojn kaj gazetojn, el kvar jarcentoj kaj en kvar lingvoj.

La fabeloj, kiujn oni legos tie ĉi, ne estas simplaj tradukoj de la verkoj, kiujn mi elfosis el multaj lokoj, eĉ el forgesitaj antropologiaj fak-gazetoj. Grandegaj estas miaj ŝuldoj, kaj la ŝuldoj de ĉiuj kulturamantoj, al tiuj folkloristoj, kiuj, ofte venkante grandajn malfacilaĵojn, surpaperigis naciajn aŭ tribajn fabelojn, antaŭ la perejo de buŝaj tradicioj. Mi penis respekti ĉiun fabelon kaj ne modifi la etoson; sed mi permesis al mi iom reverki, por iom klarigi ion al tutmonda legantaro; por aldoni lokajn detalojn kiel ekzemple nomojn de birdoj, plantoj, pladoj, vestoj; por krei pli konvinkajn konversaciojn. Ofte mi serĉis, por riĉigi la fabelojn, detalojn en aliaj konsultlibroj. Mi esperas, ke mi nur esperantigis kaj kvazaŭ tutmondigis la fabelojn; ne mistraktis ilin.

Intereso estas nepre necesa; sed per tiu intereso devas veni instruado. Miaj aliaj pedagogiaj principoj estas jenaj:

Prudenta patrino ne atendas, ke la bebo, kiu lunde nutriĝis nur per lakto, jam marde manĝos meleagraĵon kun majonezo, poste meringojn kaj marcipanon kun glaso da muskatvino. Perceptema instruisto rimarkos, ke la libro estas iom gradigita rilate al gramatiko; kaj ke mi penis plejparte uzi relative simplan stilon, almenaŭ sen kap-rompaj frazkonstruaj enigmoj; ankaŭ ke mi penis enkonduki, sisteme, multajn utilajn esprimrimedojn, kiujn postkomencantoj ofte ankoraŭ ne tute regas, kiel ekzemple ĉiujn korelativojn kaj ĉiujn participojn.

Sed prudenta patrino ankaŭ ne atendas, ke la bebo nutriĝu nur per lakto dum tri jaroj. Se neniu puŝas nin en la riĉe interesan mondon, estas tre facile, resti eĉ dum jaroj iaspeca apenaŭ-postkomencanto, rondirante en la kaĝo de sia minimumeco. Kun

mizere malgranda vortaro, ni ne povas preparoli ion ekster la plej banalaj rutinoj.

Mi do tute intence celis kiel eble plej multe pligrandigi por la postkomencantoj la vortostokon, kaj, ekzemple, montri, ke ekzistas multaj fak-terminoj en diversaj fakoj. Mi ankaŭ speciale penis, enmeti multajn vortojn pri ekster-eŭropaj fenomenoj.

Unu el la grandegaj meritoj de Esperanto estas, ke, kiam ni posedas la gramatikan bazon, ni povas tuj plene utiligi iun ajn novan vorton; ne necesas parkerigi ian idiotismon ligitan ĝuste al tiu vorto. Tial, pligrandigi nian esprimkapablon ne postulas tiom da memoro-ŝarĝado, kiel ĉe naciaj lingvoj.

La malamikoj de Esperanto ofte asertas, ke ĝi estas nur ia trosimpligita, minimuma lingvo, ekzemple ne taŭga por poezio, profunda romano aŭ intima konversacio. Superabundas atestaĵoj, ke tio estas absurda kalumnio. Sed estas bedaŭrinde, se novebakitoj daŭre kondutas, kvazaŭ tiu kalumnio estus vera; porkomencanta poŝvortaro tute ne indikas la veran kulturalan riĉecon de Esperanto. Mi do konscie penis puŝi la leganton ekster la poŝvortaran palisaron. Mi tamen uzis unu faciligilon: spertulo rimarkos, ke mi multe pli ofte dividis kunmetitajn vortojn per streketo, ol oni farus en pure beletra verko.

Mi esperas, ke ĉi tiu libro per plezuro puŝos al progreso.



Oni ne verkas tian libron sen helpo. Mi kore dankas multajn, kiuj helpis min diversmaniere: Hilda Cartlidge, Vlasta Uršič-Grdanoviĉ, Eileen Griffiths, d-ron Kathleen Hall, Daphne Hereward, Luis Hernandez, David Hill, d-ron J.P. Humberstet, IKUE, d-ron T.H. Kirk, William Leaf, Philippa Maddern, Sally Purcell, Reto Rossetti, Tibor Sekelj, Societon Sherlock Holmes de Londono, Lily Sherwin, informanton ĉe la Sovetia Ambasadorejo en Londono, Paul Ticher, d-ron John Walker, d-ron J.C. Wells, Muriel Woodward.

Mi dankas al la brita ĵurnalo *Guardian*, kiu permesis uzadon de la neordinara fotoĵo, farita de Denis Thorpe, kaj eĉ tre afable permesis tiun uzadon sen pago; kaj al la Muzeo Guimet, Parizo, kiu permesis uzadon de la fotoĵo de Harita Tara.

Fine, mi speciale dankas al la nelacigebla, ĉiam helpema personaro de la Bodleja Biblioteko, Oksfordo; kaj al d-ro Humphrey Tonkin, d-ro Ulrich Lins kaj d-ro Victor Sadler, kiuj en siaj diversaj funkcioj ĉe UEA konstante montris ekzemplan paciencon kaj inteligentan komprenemon al aŭtorino, kiu, kvankam kontraŭvole, dum du jaroj kaj duono ŝarĝis ilin per bela sortimento da promesoj, prokrastoj, problemoj kaj pardonpetoj.

Kaj mi dubas, ĉu mi estus venkinta miajn malfortecojn kaj finverkinta la libron, sen la fidela amikeco de tiu, al kiu mi dediĉas ĝin.

MARJORIE BOULTON

Oksfordo, septembro 1980.

TABELO DE ENHAVO

1.	Faktoj kaj fantazioj	17
	Versareto pri la akuzativo – Granda, malgranda – Loknomoj	
2.	Du fabeloj el Ganao	23
	Giganta floro – Limoj pri lingvokapablo	
	Versareto pri korelativoj [1] – Fonetika festo – Enigmo	
	Trafa riproĉo – Klaraj mesaĝoj	
3.	Proverboj	31
	Sango el provtuboj – Versareto kun du utilaj adverboj	
	Fruaj scioj – Miskompreno – Logiko	
4.	Fabelo el Tibeto	39
	Pli da proverboj – Versareto pri korelativoj [2]	
	Ne trovebla en la bestĝardeno! – Sur kolegia afiŝ-tabulo	
	Sur pordo en laboratoria komplekso	
5.	Kiel utila Esperanto jam estas!	47
	Kukoloj en la nesto – Versareto pri ‘ig’ kaj ‘iĝ’ – Takto	
	Kiel pastro sakras – Novaj proverboj	
6.	Geedza dialogo	55
	Versareto pri korelativoj [3] – Io pri loknomoj – Novaj proverboj	
7.	Fabelo el Etiopujo	63
	Festenoj – Novaj proverboj – Versareto pri la refleksivo	
	Mesaĝoj al aliaj planedoj	
8.	Unuaj plumamikoj [1]	71
	Versareto pri korelativoj [4] – Bela diro pri instruado	
	Ekster fabriko – Novaj proverboj – Kiel difini malsaĝon?	
9.	Fabeloj el Aŭstralio	79
	Novaj proverboj – Versareto pri la akuzativo de direkto	
	Bonhumoraj maljunulinoj	
10.	Unuaj plumamikoj [2]	87
	Versareto pri korelativoj [5] – Bestaj loknomoj – Novaj proverboj	
	La mirinda homo – Indaj por poemoj de Katulo	
11.	Fabelo el Nepalo	95
	Novaj proverboj – Valora penso – Versareto pri kvar	
	gramatikaj eroj – Mirinda naturo – Loknomoj – En restoracio	
	Magnetofona servo – Kiam oni rapide skribas	

12.	Testamentoj	103
	Versareto pri 'da', 'de' kaj 'el' – Novaj proverboj – Bela penso Nescio povas esti utila, se...	
13.	Fabelo el Albanujo	111
	Versareto pri 'se' – Lingvaj bariloj – Novaj proverboj Humana helpo – Modesteco – La arto reklami	
14.	El la buŝoj de infanoj	119
	Novaj proverboj – Versareto pri 'ejo', 'ujo', 'ingo' Helpema hundo – Pronoma problemo La obeema kanibalo – Nobla reklamo	
15.	Fabeloj de eskimoj	127
	Novaj proverboj – Malhonesta mediumo Versareto pri 'op', 'obl' kaj 'on' – Entreprenemo – Jen privilegio!	
16.	Parolantaj birdoj	135
	Novaj proverboj – Pensiga statistiko – Aliaj parolantaj birdoj Okulego – Epitafo	
17.	Fabelo el Turkujo	143
	Novaj proverboj – Preteco por krizo – Kiel la bestoj parolas Strangaj profesioj – Besta inteligenteco – Pensigaj vortoj Alte kaj malalte – Malnova viando! – Kelkaj enigmoj La zodiakaj konstelacioj	
18.	Penanto kaj plendanto	151
	Versareto pri 'ajn' – Novaj proverboj – Ĉu vi deziras multan oron?	
19.	Fabelo maoria el Nov-Zelando	159
	Novaj proverboj – Interpunkcio	
20.	Iom pri muziko kaj muzikistoj	167
	Novaj proverboj – Pensigaj vortoj – Pri kalkulado Avizo en stacidomo	
21.	Fabelo de indiana tribo en Usono	175
	Novaj proverboj – Versareto pri kunmetado de vortoj Strangaj pafaĵoj	
22.	El la historio kaj legendoj de la spunera tribo	183
	Novaj proverboj – Supersignoj – Lingvaj bariloj – Reklamoj Por memori la planedojn de nia sunsistemo – La naŭ planedoj	
23.	Fabelo el Kamboĝo	191
	Novaj proverboj – Versareto pri 'per' kaj 'kun' Problemo en internacia juro – Anonceto	
24.	Atingoj en alta aĝo	197
	Novaj proverboj – Versareto pri 'ind' kaj 'end' «Lingvaj Respondoj»	

25.	Fabelo de la vaskoj	205
	Pensigaj vortoj – Sur pordo de biblioteko	
26.	Juĝejaj komedioj [1]	213
	Novaj proverboj – Versareto pri ‘um’-vortoj	
	Alarmo pro troa varmo – Pensigaj vortoj – Menspreteco	
27.	Fabelo el Samoo	221
28.	Juĝejaj komedioj [2]	229
	Novaj proverboj – Versareto pri homaj afiksoj – Pensigaj vortoj	
	Ne mortu porko por rabena forko!	
29.	Fabelo el Maroko	237
30.	Vortaj sportoj	243
	Novaj proverboj – Versareto pri kvar vortoj	
	Reklamoj en butikaj fenestroj	
31.	Fabelo el Birmo	253
	Novaj proverboj – Por bird-amantoj – Pensigaj vortoj	
	La mirinda naturo – Semantiko	
	Versareto pri ses vortoj foje intermiksitaĵ	
32.	Interspeciaj amikecoj [1]	261
	Novaj proverboj – Versareto pri ‘kvazaŭ’	
	Kuracista takto – Jura problemo	
33.	Fabeloj el Nov-Hebridoj	269
	Novaj proverboj – Versareto pri frazoj kun participoj	
	Lingvaj bariloj – En la banko – Niaj infanoj	
34.	Interspeciaj amikecoj [2]	275
	Novaj proverboj – Parolis la lasta dido	
35.	Ciganoj kaj ciganaj fabeloj	281
36.	Interspeciaj amikecoj [3]	289
37.	Ekstravagancaj fabeloj	297
	Novaj proverboj – Versareto pri du vortoj	
38.	Monstroj de nia fantazio	303
	Grava averto! – Limeriko	
39.	Fabelo el Irlando	311
	Novaj proverboj – Lingvaj bariloj	
40.	Realaj monstroj de la pratempo	317
	Pensiga diro – Statistika strangajo – Novaj proverboj	
41.	Fabeloj el Rumanujo	325
	Novaj proverboj	

42.	Kio estas nia plej granda malŝparo?	331
	Novaj proverboj – Kelkaj kuriozaj vidindaĵoj En la granda kontoro	
43.	La ainoj kaj iliaj fabeloj	339
	Novaj proverboj – Limeriko – Ĉe la landlimo	
44.	Pli fortaj ol Fortuno	345
	Novaj proverboj – Helpema regulo – La nedetruenda kuniketo	
45.	Fabelo el Zanzibaro	353
	Novaj proverboj – Pensigaj vortoj – Takto Versareto pri 'je' – Virinoj kaj musoj – Niaj infanoj	
46.	Faktoj iĝas fantazioj, fantazioj iĝas faktoj	361
	Novaj proverboj – Noblaj mensoj de sciencistoj Lingvaj bariloj – Sur oficeja aviz-tabulo Lingva kuriozaĵo	
47.	Fabelo de la judoj	369
48.	Devizoj	377
	Serpenta histriono – Plumamika rekordo Novaj proverboj – Universala fabeleto: <i>Lango</i>	
49.	L.L. Zamenhof	385
	Novaj proverboj – Pensigaj vortoj – Iom pri krokodiloj	
50.	Serĉante la verdstelan diinon	393
	Novaj proverboj – Simio kun ŝparkaso – Lingvaj bariloj Pensigaj vortoj – Valoro de la vero – Avizo en banko	
51.	Diversaj stiloj	401
	Versareto, helpa pri 'po'	
52.	Kiel iri pluen?	409
	Lastaj novaj proverboj – Lastaj versoj	
	Glosaro	419
	Solvoj al enigmoj	429
	Marjorie Boulton	431

1. FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ

La homo estas besto. La homo havas la ĝeneralajn korpajn bezonojn de leono, ĉevalo, simio, rato.

La homo apartenas al la plej inteligenta klaso de bestoj, la mamuloj. La mamuloj estas la bestoj, kiuj nutras idojn per propra lakto. Ili havas varman sangon. La mamuloj estas tre diversaj: grandaj elefantoj kaj malgrandaj musoj; gepardoj, kiuj kuras rapide kiel vagonaroj, kaj bradipoj, kiuj piediras malpli rapide ol testudoj; balenoj, kiuj vivas en maroj, kaj kameloj, kiuj vivas en dezertoj; talpoj, kiuj vivas sub la tersurfaco, kaj estas preskaŭ blindaj, kaj vespertoj, kiuj flugas, kaj pendas kun la kapo malsupre, kiam ili dormas...

Multaj mamuloj estas eksterordinaraj, kaj ni miras pri ili.

Ni, kun niaj mallongaj nazoj, miras pri la rostro de la elefanto; kun niaj molaj haŭtoj, kiujn eĉ eta dorno aŭ moskito vundas, ni miras pri la dikega haŭto de la rinocero. Ni miras pri la saltoj de la kanguruo kaj pri la kanguruido en ĝia poŝo. Ni miras pri tiuj bestoj, kiuj nutras sin per formikoj kaj termitoj: ekzemple eĥidnoj en Aŭstralio aŭ manisoj en Afriko. Tia besto elpuŝas la tre longan langon, sur kiu estas natura gluo; la formikoj kovras la langon; la eĥidno aŭ maniso enprenas la langon kaj manĝas la formikojn. La dazipoj de Sud-Ameriko havas kirasojn. Tiu, kiu je la unua fojo rigardas dazipon, eble demandas, "Ĉu tio estas besto, aŭ maŝino?" Unu el la dazipoj de Paragvajo volvas la korpon, kaj tiam tiu besto estas malmola globo; eble tiu, kiu rigardas ĝin, nun demandas, "Ĉu tio estas besto, aŭ stranga maŝino, aŭ pilko por speciala ludo, kiun ludas la paragvajanoj?" Homoj en Paragvajo asertas, ke dazipo eĉ transiras riveron sub la akvo. Unu dazipa spiro daŭras ĝis ses minutojn, kaj tial ĝi povas piediri sur la grundo sub la rivero, ĝis la alia flanko, sen nova enspiro.

Delfenoj, kiuj estas ne fiŝoj, sed maraj mamuloj, uzas sistemon de sonaj signaloj. Balenoj kantas. Iliaj kantoj ne similas al homa muziko aŭ birdaj kantoj, sed ili kantas misterajn balenajn melo-

diojn en la oceano. Gibonoj, simioj de sud-orienta Azio, kun tre longaj brakoj, ankaŭ kantas: gibona familio de vir-gibono, gibonino, kaj du, tri aŭ kvar gibonidoj — komencas ĉiun tagon per matena kanto gibona!

Eble unu el la plej eksterordinaraj mamuloj en la mondo estas aŭstralia besto, la ornitorinko. Ĝi estas rivera besto, kiu naĝas. Sed ĝi estas ankaŭ subtera besto, kiu fosas tunelojn kaj faras neston sub la tero. La ornitorinkino ja nutras la idojn per propra lakto; sed ŝi ne naskas idojn, same kiel la aliaj mamuloj; ŝi demetas ovojn. La besto havas varman sangon, sed ne tiel varman, kiel la sango de ordinaraj mamuloj. Ĝi havas naĝhaŭton sur la piedoj, kiel anaso; kaj specialajn haŭtopecojn, per kiuj ĝi fermas la orelojn kaj okulojn, kiam ĝi plonĝas. Sed kiam la ornitorinko fosas tunelon, ĝi volvas la naĝhaŭton sur la platan parton de la antaŭaj piedoj. Tiam ĝi havas liberajn ungojn por la fosa laboro. Kaj tiu mamulo havas nek nazon nek rostron, sed grandan bekon.

Homo, kiu je la unua fojo vidas ornitorinkon aŭ dazipon, rinocon aŭ hipopotamon, ĝirafon aŭ zebbron, balenon aŭ bradipon, eble pensas aŭ eĉ diras, “Mi ne kredas tion!” Kaj ĉiuj tiuj bestoj estas mamuloj; ili apartenas al la sama granda besta klaso, kiel la homoj.

La homo miras antaŭ la bestoj. La homo primiras tiujn bestojn de multaj specioj malsimilaj; primiras grandecon, malgrandecon; rostrojn kaj vostojn, kolojn kaj muskolojn, gestojn kaj nestojn, striojn kaj kriojn.

Tamen, la plej stranga besto el ĉiuj strangaj bestoj en la mondo estas la besto, kiu miras pri la aliaj bestoj: la Homo.

Ni vidas, ke ni homoj similas al niaj parencaj bestoj, la simioj. Niaj formoj estas tre similaj. Ni ofte ridas, kiam ni rigardas simiojn, ĝuste ĉar ili similas al ni, sed ne estas samaj.

Simioj estas inteligentaj bestoj. Ili ne vivas nur per instinktoj. Ofte unu simio lernas ion novan, kion aliaj simioj ne scias. Kelkaj japanaj makakoj regule ĝuas banadon en varmaj fontoj apud vulkanoj, dum la vintro. Ne ĉiuj makakoj serĉas varman akvon, kiel ĉiuj manisoj serĉas formikojn. Ĉimpanzoj, kiuj vivas apud homoj, foje trinkas teon el tasoj, sidas kiel homoj sur seĝoj, fumas cigaredojn, surmetas ĉapelojn. Ili lernas per imitado. Ili havas simplajn konversaciojn, eĉ kun homoj, per diversaj sonoj kaj gestoj. Juna gorilo

kapablas lerni pli ol kvarcent diversajn signojn en la signo-lingvo de surd-mutaj homoj, kaj uzi ilin ĝuste.

Simio kapablas iasence pensi, ĉar simio, kiu deziras ion, ofte trovas aŭ eĉ faras ilon: uzas bastonon, aŭ staras sur kesto, kiam banano pendas en loko tro alta; eĉ fiksas bastonon al bastono kaj akiras pli longan bastonon, kaj tiam trafas la bananon.

Sed inter la Homo kaj eĉ la plej inteligentaj simioj, ekzemple la ĉimpanzo aŭ la orangutango, la distanco estas tre granda. Sur la Tero la Homo estas unika.

Tra la tuta Tero, nur la Homo argumentas, bakas, cizelas, ĉarpentas, distilas, eksportas, farbas, gladas, hejtas, ĥorkantas, impostas, jungas, ĵuras, kudras, legas, meblas, nombras, operacias, plugas, rajdas, semas, ŝaltas, tanas, uzuras, veturas aŭ zipas. Tiu ĉi listo enhavas nur kelkajn ekzemplojn. Nur la Homo inteligente faras fajron, radojn, metalojn. Eble plej grave, nur la Homo vere havas vortojn — parolas, skribas, legas. Kaj la Homo verkas, pentras, skulptas, muzikas, dancas; ankaŭ havas sportojn kaj amuzojn. La bestoj ofte konstruas proprajn hejmojn, sed nur laŭ la instinktoj de ĉiu specio: pasero konstruas neston, araneo teksas reton, kuniĝo fosas tunelon; nur la Homo konstruas multajn diversajn domojn el diversaj materialoj, kaj havas arkitekturan historion.

La Homo povas ankaŭ esti aparte malbona. Multaj bestoj foje batalas, sed nur per la propraj korpoj. Ili uzas dentojn, kornojn, ungojn. Nur homoj uzas pafilojn kaj bombojn, faras grandskalajn militojn. Ni diras grandajn mensogojn. Ni ekspluatas aliajn anojn de nia propra specio. Ĉar ni havas vortojn, ni facile instruas mil utilajn aferojn; sed foje ni instruas al infanoj malammon; kaj eĉ ne kontraŭ serpentoj aŭ moskitoj, sed kontraŭ aliaj homoj, bestoj de nia propra specio. Ofte ni misuzas aŭ difektas nian Teron. Homoj faras multajn malsaĝajn farojn pro vanteco aŭ envio, superstiĉo aŭ fanatikeco. Ĉar ni ne sekvas nur instinktojn, sed vere pensas, ni foje pensas erare. Homoj eĉ buĉas aliajn homojn, amase, senkompatate. Homoj torturas homojn, kaj elpensas la plej kruelajn metodojn. Tigroj kaj krotaloj, krokodiloj kaj lupoj, ne faras ion tiel lerte, longe, intence kaj sisteme kruelan.

Tamen, la Homo restas bele unika. Ni prave hontas pri homaj malbonfaroj, sed ni ankaŭ prave fieras pri niaj grandaj kapabloj.

Du el la unikaj homaj ecoj kreas por ni pli valorajn vivojn kaj ĉiujn librojn kaj artverkojn: nia scivolo pri faktoj kaj nia ĝuo de fantazioj.

La kato deziras scion pri la plej varma loko en la domo; la ŝafo deziras scion pri la plej bongustaj herboj; la ardeo aŭ la foko sentas intereson pri fiŝoj. Sed nur la homo deziras detalan scion, kiu ne rilatas al ordinaraj bezonoj. Li aŭ ŝi sentas intereson pri aliaj landoj, la fundo de la maro, la steloj; pri dinosaŭroj kaj spac-veturado. Li aŭ ŝi eble studas matematikon, filozofion, lingvojn, historion, geologion, zoologion...

La Homo estas la *Besto de la Lasta Korelativo*. Multaj bestoj montras intereson pri la aliaj demandovortoj: *kio* (ĉu viando?), *kia* (ĉu bona?), *kiu* (havas por mi viandon?), *kie* (estas la viando?), *kies* (ĉu ĝi apartenas al pli forta besto?), *kiom* (da viando estas sur mia telero?), *kiam?* (ni manĝas en ĉi tiu domo?), eĉ *kiel* (mi malfermas la pordon kaj iras al la viando?). Sed nur la Homo demandas kial? kaj per kial? ni havas sciencojn kaj progreson.

Eĉ pli stranga, kaj eble pli glora, ol nia apetito al faktoj, estas nia talento por fantazioj. Ni kreas en la cerbo mondon kiu ne ekzistas ekster nia kapo. Fantazioj konsolas nin; ni imagas nin en pli agrablaj aŭ interesaj situacioj. Sed per tiu fantazia talento homoj ankaŭ kreas grandajn artverkojn: epopeojn, dramojn, romanojn, bildojn, statuojn, simfoniojn, filmojn. Kiel mistera kaj unika estas la homa arta kreo-kapablo!

La nuna legolibro enhavas multajn faktojn kaj fantaziojn. La aŭtoro esperas, ke la faktoj estas interesaj. Legolibro ne estas serioza scienca lernolibro; ĝi havas spacon nur por malgrandaj pecoj, informoj ne en bareloj sed en boteloj. Sed faktoj iom neordinaraj ofte donas plezuron.

Grandaj modernaj fantazioj estas ofte longaj romanoj kun multaj kompleksaj karakteroj kaj malsimplaj intrigoj. Ili ofte estas tre malnaivaj; kaj romano, kiu donas grandan plezuron en unu lando, en alia lando ŝajnas malbona. Sed la mondo havas grandan trezoron fantazian, al kiu ĉiuj popoloj kontribuis: simplajn rakontojn de pli frua tempo aŭ pli primitiva vivo. Ni nomas ilin legendoj, mitoj, fabeloj kaj fabloj. Ili apartenas al la folkloro, la tradicia arto de la popoloj. Ili ofte donas ne nur miron kaj amuzon, sed multan simplan saĝon kaj spriton. La aŭtoro prezentas, plejparte, fabelojn,

kiuj apartenas al landoj, kie ankoraŭ ne estas multaj esperantistoj, kaj eble multaj el la historioj estos por esperantistoj novaj kaj freŝaj.

Per faktoj kaj per fantazioj niaj mensoj kreskas. Ankaŭ per nova lingvo kreskas la menso; kaj per Esperanto ĝi ofte kreskas multe.

Versareto pri la Akuzativo

[Vers-ar-eto, ĉar poemo kutime signifas ion arte valoran.]

Jen la papago manĝas fragon;
frago ne manĝas la papagon.
Se fragon manĝas la papago,
temas pri tute sama ago.
Sed se papagon frago manĝas,
Naturo ion misaranĝas.

Nun la studento legas libron,
kaj lia cerbo sentas vibron.
Libron studento daŭre legas
kaj pli kaj pli la taskon regas;
se legas libro la studenton,
la mondo perdas la prudenton.

Litero *No* malfermas pordon,
permesas pli liberan ordon;
se gramatiko vin ne ravas,
tiu litero tamen gravas;
sensenca fuŝo, klara vero,
dependas ofte de litero.

Granda, malgranda

La plej granda birdo en la mondo estas specio de struto, kiu vivas en Norda Afriko. Vir-struto eble pezas pli ol cent kvindek ses kilogramojn. La plej malgranda birdo en la mondo estas specio de

kolibro, kiu vivas ĉefe en Kubo. Tiu kolibro pezas ĉirkaŭ du gramojn! La granda struto neniam flugas; la kolibro tre bone flugas kaj ŝvebas.

Loknomoj

Ĉu kelkfoje vi sentas ĝenon, ĉar la elparolado de alilandaj loknomoj estas malfacila kaj nodas vian langon? Se jes, ĉu plaĉas al vi kelkaj vere simplaj mallongaj lok-nomoj el diversaj landoj?

Ekzistas rivero *Ak* en Turkujo kaj urbo *Ao* en Japanujo. Unu el la gravaj urboj de Sieraleono estas *Bo*; en Voltio ekzistas urboj *Fó*, *Po* kaj *To*, kaj en Ganao, urbo *Ho*. Finnlando fieras pri urbo *Ii* kaj en Norvegujo estas eĉ tri urboj *Mo*. Unu el la antikvaj urboj de Egiptujo estas *No*. En Ĉinujo ni trovas riverojn *Fu*, *Lo*, *Li* (Tibeto), *Nu*; Tajlando posedas riveron *Si* kaj insulon *Ma*; Birmo, riveron *Mu* kaj urbojn *An* kaj *Pe*. En Sovetio estas rivero *Ik*; en Niĝerio, rivero *Ka*. Insuleto inter la Lojaleca Insularo, grupo en la Pacifika Oceano, portas la nomon *Ró*. Se tiaj nomoj estas por vi tro longaj kaj malfacilaj, ĉu vi preferas insulon japanan, en la insularo sude de Tokio kaj Jokohamo? — ĝia nomo estas *O*.

2. DU FABELOJ EL GANAO

Ganao estas lando en okcidenta Afriko. Dum multaj jaroj ĝia nomo estis «Bordo Ora», kompreneble ĉar ĝi eksportas oron; sed ĝiaj plej gravaj eksportoj estas kakao, kaj baŭksito, la krudmaterialo, el kiu oni produktas aluminion. La ganaa popolo havas riĉan fabelaron. La heroo, ofte pli ĝuste la malheroo, de multaj ganaaj fabeloj estas Anansi. Anansi ne ĉiam havas la saman formon; en kelkaj fabeloj li estas granda araneo, sed en aliaj li estas homo.

Jen unu el la fabeloj pri Anansi. Tie ĉi li kredeble estas ne araneo, sed homo.

Kial Ĉiuj Homoj Povas Almenaŭ Ion Lerni

Tre frue en la historio de la mondo, Paĉjo Anansi vivis en Ganao, en la lando de la fantia popolo.

Tiam Paĉjo Anansi posedis la tutan stokon da scio kaj saĝo en la mondo. Tial, ĉiuj homoj, kiuj deziris informojn aŭ konsilojn, devis viziti lin kaj peti lian helpon. Dum multaj jaroj Anansi konsiladis la homojn, sed finfine iuj ofendis lin. Anansi estis tre kolera, kaj deziris puni ne nur tiujn, kiuj ofendis lin, sed ĉiujn homojn. Li planis punon vere severan: ne plu konsili la homojn, sed, male, kaŝi de ili la tutan mondan stokon da scio kaj saĝo.

Do, unue Anansi iris de homo al homo, kaj reprenis ĉiujn pecojn da scio aŭ saĝo, kiujn li iam donis. Li kolektis pecojn, ĝis li havis ĉiom. Tiam li metis tiun tutan kvanton en unu grandan poton. Li knedis argilon, kaj kovris tiun poton, kaj bakis ĝin, tiel ke la argilo firme sigelis la poton. Neniu povis elpreni eĉ etan pecon da scio aŭ saĝo.

Sed tio ĉi ne sufiĉis por Anansi. Li deziris meti tiun poton en lokon sekretan. Finfine li decidis meti ĝin inter la branĉojn de la plej alta arbo en arbaro malproksima.

Anansi havis etan filon; lia nomo estis Kveku-Cin. Kiam Anansi tiel multe iris de homo al homo, kaj kolektis, knedis, bakis, Kveku-Cin atente rigardis lin, ĉar li volis kompreni la sekretan planon de la patro. Kiam Anansi tre kviete forlasis la domon, kun la granda pototo, kiun li portis sur forta ŝnuro ĉirkaŭ la kolo, Kveku-Cin kaŝe sekvis lin.

Anansi piediris, piediris longan distancon de la fantia vilaĝo; piediris, piediris tra granda arbaro; finfine haltis ĉe tre alta arbo kaj komencis grimpi sur la arbon. Sed la pototo, kiu pendis sur la kola ŝnuro, antaŭ li, tre malhelpis lin; li ne povis bone grimpi. La peza pototo puŝis lian ventron, premis lian bruston kaj malhelpis ĉiujn liajn movojn. Li longe persistis, ĉar li forte deziris kaŝi scion kaj saĝon de la homoj, sed la pototo konstante malhelpis lin.

Juna Kveku-Cin longe rigardadis la patron, silente, sed venis momento, kiam la filo ne povis silenti plu. Laŭte kaj subite li demandis, "Paĉjo, kial vi ne ligis la pototon sur vian dorson? Grimpado kun io sur la dorso estas facila, sed kun io antaŭ la korpo estas tre malfacila."

La klara voĉo de la infano surprizis la patron.

Anansi staris ĉe la piedo de la arbo, kun la pototo, kaj diris, "Mi kredis, ke la tuta monda stoko da saĝo kaj scio estas en mia pototo. Sed jen, mia eta filo havas saĝon, kiun mi ne havas! Ĉiom da saĝo, kiun mi kolektis, ne montris al mi kion fari, kaj vi, knabeto, devis konsili min!"

Anansi, nun tre kolera pri la propra malsaĝo, ĵetis la pototon al la tero. La pototo frapis grandan rokon, kaj la roko tute frakasis la pototon. Ĉiuj pecoj da scio kaj saĝo kuris aŭ flugis en ĉiuj direktoj, tra la tuta mondo, ĝis la plej malproksimaj lokoj.

Kaj ĉiam, ekde tiu momento, iu ajn, ie ajn en la mondo, kiu deziras saĝon kaj scion, povas, se li aŭ ŝi vere serĉas, trovi almenaŭ malgrandan pecon.



Jen simpla ganaa fabelo, pri principo kredeble universala, kvankam la fabelo temas pri lando, en kiu la gepatroj trovas edzon por filino, kaj en multaj landoj la junaj homoj mem faras la elekton.

Kiu Vere Amis Ŝin?

Viro en afrika vilaĝo havis filinon vere belegan. Ŝiaj nigraj bukloj estis belegaj, ŝiaj grandaj okuloj brilis, ŝia nigra haŭto estis mola kaj glata, kaj brilis pro sano kaj pureco; ŝia korpo havis perfektan formon kaj ŝia vizaĝo donis ĝojon al ĉiuj. Ŝi estis tiel belega, kun la plej ĉarma rideto, ke la vilaĝanoj nomis ŝin «Frumatena Sunlumo».

Kompreneble, multaj junaj viroj deziris havi ŝin kiel edzinon. Tri junaj viroj, kies nomoj estis Saĝa, Sprita kaj Pripensa, ŝajnis sufiĉe taŭgaj, kaj tiuj tri persistis. Ĉiu diris, ke li sincere amas Frumatenan Sunlumon, kaj promesis esti bona edzo. La patro kompreneble deziris trovi la plej bonan el la tri, sed kiel elekti?

La decido ne estis facila, kaj la patro sentis bezonon de ia speciala ruzo. Dum kelkaj tagoj li ne permesis al la filino eliri, ĝis la vilaĝanoj suspektis, ke ŝi estas malsana. Poste li ordonis al ŝi kuŝi sur la lito kaj resti tie, senmova kaj silenta.

Tiam li sendis amikon al la tri junaj viroj, kun la sama mesaĝo: «Frumatena Sunlumo mortis. Mi petas iom da mona helpo por la lastaj ceremonioj kaj la morto-festo.»

Saĝa respondis, «Tiu patro vere tro postulas! La peto estas preskaŭ impertinenta! Mi ne havas monon por ŝia patro.»

Sprita respondis, «Mi bedaŭras, ke tiu bela kaj ĉarma junulino mortis. Sed ŝi tute ne estis mia edzino kaj nun mi ne sentas ian devon pri ŝi, aŭ devon helpi ŝian patron. La patro eĉ ne informis min, ke ŝi malsanas.»

Pripensa diris, «Ho ve! ĉu vere mortis bela Frumatena Sunlumo? Tiel belega, tiel ĉarma, tiel bonkora! Kia malĝojo! Kaj certe ŝia patro estas nun tre malfeliĉa. Jen mia mesaĝo al la patro: jen mono por helpi pri la lastaj ceremonioj kaj la mortofesto; mi havas iom pli da mono, se li bezonas ĝin. Mi tuj preparas min por viziti lin, kaj funebri, kaj lamenti kun li pri kara Frumatena Sunlumo, kiun mi deziris kiel mian edzinon.»

La amiko portis la tri respondojn al la domo de Frumatena Sunlumo. Baldaŭ Pripensa alvenis, kaj la patro kondukis lin en la domon, kie la belega juna filino kuŝis silenta sur la lito.

Kaj tiam la patro laŭte kriis, “Frumatena Sunlumo, kara filino, jen venas via edzo!” Frumatena Sunlumo ekstaris, tute sana kaj kun brila rideto.

“Nun mi scias, kiu el tiuj tri viroj estas taŭga edzo por vi, kaj jen li staras antaŭ vi.”

Tiun saman tagon, Frumatena Sunlumo jam estis la fianĉino de la tre ĝoja Pripensa, kaj post mallonga tempo ŝi estis lia edzino. Ili amis kaj estimis unu la alian, kaj bone traktis unu la alian, kaj longe kunvivis kiel geedzoj, tre trankvile kaj kontente.

Giganta Floro

En Bolivio ekzistas planto, kiu floras nur post proksimume cent kvindek jaroj; sed kiam ĝi floras, ĝi vere floregas: tiam ĝi produktas plurajn spikojn, kiuj estas altaj je pli ol dek metroj, kies diametroj estas pli ol du metroj; kaj ĉiu spiko portas ĝis okmil blankajn flo-rojn. Post tiu granda florado, la planto mortas.

Limoj pri Lingvokapablo

Ĉu klera poligloto bezonas internacian lingvon? Kompreneble li aŭ ŝi ne bezonas ĝin tiel ofte, kiel tiu, kiu ne kapablas lerni multajn lingvojn.

Mezzofanti, itala kardinalo, scipovis eble dudek sep lingvojn; J. Bowring, brita diplomato, iasence scipovis ducent; H. Williams, novzelandano, flue parolis dudek ok. G.H. Schmidt, franca lingv-isto, kiu dum ses jaroj estis ĉefo de la fako pri terminoj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, tiutempe flue parolis dek naŭ lingvojn, kaj perdis sian iaman fluecon en dudek aliaj, ĉar li ne sufiĉe uzis ilin.

Grandaj estas tiaj atingoj. Tamen, kvankam ne povas ekzisti perfekta kalkulo pri la nombro de lingvoj en la mondo, ĉar verŝajne ekzistas izolitaj triboj ankoraŭ ne konataj, kaj ankaŭ estas ofte mal-facile decidi, kio estas aparta lingvo, kio estas nur dialekto, certe ekzistas en la mondo proksimume kvinmil diversaj lingvoj kaj dia-lektoj. Do, eĉ la plej eksterordinara poligloto povas ofte sperti la malhelpon de lingvaj bariloj.

Versareto pri Korelativoj [1]

Ĉi-vespere havas ni aranĝon
specialan — kantojn kaj festmanĝon.
Multaj belaj pladoj sur bufedo
nin invitas al konsum-procedo.
Dum ni venas, vidas, venkas, frandas,
per demandaj vortoj ni demandas.
“Kiel sen kulero supon servi?”
“Jen kulero — kial ne observi?”
“Kiu puŝas?” “Al mi mankas forko.”
“Kiom prenas li? Ho, kia porko!”
“Kies ŝalo falis sur la plankon?”
“Kies? Ĉu la via?” “Multan dankon!”
“Kie estas salo?” “Kio estas
tio, kion majonezo vestas?”
“Ovoj.” “Kiam venos mia vico?”
“Kio bonodoras tie?” “Spico.”
“Kiu spic’?” “Kumino, plej probable.”
“Kial tiel puŝi min, ĉetable?”
“Kiom da kolbasoj vi deziras?”
“Kiel en amaso oni spiras?”
“Kiu bubo saŭcis mian jakon?”
“Kiel mi mistraktas la stomakon!”
“Kia plado — sala aŭ sukera?”
“Kia apetito malmodera!”
“Kien vi vin ŝovas ekstervice?”
“Kiel? Ĉu mallerte aŭ malice?”
“Kiom da salato restas nun?”
“Kio falis?” “Nur malgranda prun’.”
“Kiu ĉion tiel fuŝaranĝis?”
“Kial venis mi? ĉar mi ne manĝis!”

Fonetika Festo

En Koreujo oni ĉiujare havas ferion, kiu festas la alfabeton. La korea alfabeto, kiel tiu de Esperanto, estas scienca kaj klare indikas la ĝustan prononcon.

Enigmo

Ĉu vi povas trovi dek urbegojn, kiujn iu kaŝis en tiuj ĉi dek frazoj?

1. En la nuna jaro li vendis pli ol mil anorakojn al turistoj.
2. Ian inklinon peki noblaj homoj ankoraŭ ofte sentas.
3. Lia ideo pri Paradizo estas pana monto kun kolbasa arbaro, kun biera maro ĉirkaŭ ĝi.
4. Sur malfirma ŝtuparo, firma teno ĉe la balustrado estas prudenta.
5. En la komitato kunlaboris amike tri poloj, du germanoj, unu islandano, unu japano kaj unu usonano.
6. La plej kara kondimento en la mondo estas insekta sekrecio, kiun oni preparas nur en Vjetnamio.
7. Jen letero sur la mato! Kio estas la enhavo?
8. Li tro uzas dieton grasan. Tia gorgo-ŝmirado estas eble koroferado.
9. Ve, ve! Ho, Bartolomeo, kial vi batas vian fraton tiel kruele?
10. Mi tute ne scias, kie vojaĝas la Ministro nuntempe.

Trafa Riproĉo

Estas kelkaj homoj, tiel egoismaj, malnoblaj, eble envidemaj, ke ili inklinas difekti aŭ detrui ion belan, imponan aŭ edifan. Kiam, ekzemple, iu tia vidas sur iu aŝiŝo bildon de bela virino, li tuj deziras kraĵoni lipharojn kaj barbon sur la vizaĝo. Unu el tiuj stultaj buboj iam ricevis taŭgan riproĉon en teatro en Glasgovo, Skotlando.

Granda tragika aktoro brile ludis la ŝekspiran rolon de la reĝo Rikardo la Tria. En tre streĉa momento, la reĝo, kiun oni jam venkis, kaj kiu volas forkuri de la batalo, krias:

“Ĉeval’, ĉeval’! La reĝnon por ĉevalo!”

Ĝuste kiam aliaj en la teatro sentis multan emociion kaj admiron, unu el tiuj difektemaj knaboj laŭte kriis el la galerio:

“Ĉu azeno sufiĉas?”

La granda aktoro, kies grandan scenon li detruis, kriis responde:

“Jes, vi rajtas veni!”

(John Francis tradukis la dramon en Esperanton; ĝi aperis en 1980.)

Klaraj Mesaĝoj

Dom-mastrino lasis tiun ĉi noton por la laktisto:

LAKTO
Mi ne bezonas lakton hodiaŭ.
“Hodiaŭ” signifas “morgaŭ”,
ĉar mi skribis ĉi tiun noton
hieraŭ.

Tajpistino lasis noton sur la tablo de la estro:

“Se mi ne estas tie ĉi en la apuda ĉambro, estas ĉar mi eliris por nova pako da karbopapero, ĉar ni ne plu havas tion, kion ni havas nun.”

Ĉar la estro devis tuj eliri denove, li lasis por ŝi respondon, kun tasko:

“Bone, vi faris saĝe, kvankam vi ne esprimis vian intencon tre logike. Nun mi petas vin tajpi ĉi tiun raporton, dum mi manĝos mian lunĉon kun sinjoro Bruno sur la plej bonkvalita papero.”

3. PROVERBOJ

Proverbo estas konciza frazo, kiu prezentas ian konstaton aŭ konsilon pri la vivo. Kutime proverboj apartenas al la folkloro, al la tradicio de iu popolo. Ofte ili estas saĝaj, tre trafaj; ofte ili instruas utilan moralon; kelkfoje ili estas malpli noblaj, aŭ eĉ iom negativaj kaj cinikaj; sed ili ĉiam iom montras observadon pri la vivo, kia ĝi estas.

Ŝajnas, ke preskaŭ ĉiuj popoloj tra la mondo havas proverbojn. Ofte multaj popoloj, kun diversaj lingvoj, havas proverbojn samencajn. Estas al tiu ĉi fakto, ke ni ŝuldas la ĉarman libron *Proverbaro Esperanta*.

Marko Zamenhof, la patro de nia Ludoviko Lazaro, kolektis proverbojn, trovis multajn proverbojn similajn en kvar lingvoj, la rusa, la pola, la franca kaj la germana. En 1905 kaj 1906 aperis tri malgrandaj libroj liaj kun paralelaj proverboj. Li intencis verki kvaran libreton kun similaj proverboj hebreaĵ, grekaj, latinaj kaj esperantaj. Sed Marko mortis en 1907 kaj lia kolekto restis nekompleta. Tamen, Ludoviko Zamenhof preparis esperantajn proverbojn similajn al tiuj nacilingvaj proverboj, kiujn kolektis Marko; kaj ili aperis kiel aparta libro, *Proverbaro Esperanta*, en Parizo en 1910. En La Laguna, en 1961, aperis nova eldono, kun la proverboj en alfabeto ordo.

Proverbaro Esperanta estas tre valora leg-materialo por ĉiuj, kiuj studas Esperanton. Ĉiuj verkoj de Zamenhof estas gravaj modeloj de lingvo-uzado; sed liaj esperantaj proverboj tre helpas pri la parola lingvo. Ili donas al ni multajn frazojn kaj parolturnojn por la ĉiutaga vivo. Fakte, ne ĉiuj frazoj en la *Proverbaro* estas proverboj laŭ strikta difino; multaj estas nur tiuj ĉiutagaj frazoj, kiujn ni ĉiuj bezonas: “batadi la venton”, “en la tago de sankta Neniama”, “fordormi la okazon”, “li foriris kun longa nazo”, “maro da mizeroj”, “malsaĝa kiel ŝtupo”, “nutri per promesoj”, “propeka kapro”, “sidi sur pingloj”, “staris, ekfaris”, “venis fino al mia latino”, ekzemple.

La veraj proverboj de Zamenhof, kiuj imitas alilingvajn proverbojn, sonas tre nature, impresas kiel folkloro de Esperanto. La tipa zamenhova proverbo estas frazo kun du rimoj kaj ia interna ritmo ekvilibra:

- “Al kuko kaj kaso ĉiam venas amaso.”
- “Amo supermezura ne estas plezura.”
- “Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo.”
- “Fiŝo scias pri naĝo eĉ sen via saĝo.”
- “Hodiaŭ festene, morgaŭ malplene.”
- “Kio konvenas al sciuro, ne konvenas al vulturo.”
- “Komenco bona — laboro duona.”
- “Najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas.”
- “Per pacienco venas scienco.”
- “Vivu mizere, sed vivu libere!”

Ne ĉiuj rimas; ekzemple:

- “Al feliĉulo eĉ koko donas ovojn.”
- “Ĉiu medalo du flankojn posedas.”
- “Eĉ blinda kokino povas trovi grajnon.”
- “Hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo.”
- “Korniko vundita propran voston timas.”

La avantaĝo de rimo estas, ke ni pli facile memoras la proverbojn. Ĉiu serioza esperantisto devas, se eble, legi kaj kelkfoje relegi la *Proverbaron*.

Libro, konata al anoj de du el la gravaj mondreligioj, kristanismo kaj judismo, enhavas multajn proverbojn: la bela libro *La Sentencoj de Salomono*. Ĉar Zamenhof mem tradukis la tutan Malnovan Testamenton — kolosa kaj altkultura laboro! — ankaŭ ĉi tiu verko estas modelo de esperanta stilo. *La Sentencoj* enhavas multajn frazojn, kiuj estas veraj ne nur por judoj kaj kristanoj, sed por ĉiuj homoj:

- “Virtulo kompatas la vivon de sia bruto;
Sed la koro de malvirtuloj estas kruela.”
- “Trankvila koro estas vivo por la korpo;
Sed envio estas puso por la ostoj.”
- “Pli bona estas malmulto, sed kun justeco,
Ol granda profito, sed maljusta.”
- “Ornamo estas por la homo lia bonfaro.”

“Maldiligentulo estas en siaj okuloj pli saĝa,
Ol sep veraj saĝuloj.”

Tamen, la pli granda parto de tiu bela libro konsistas el frazoj tro longaj kaj komplikaj por esti veraj proverboj; kaj parto de ĝi estas alta poezio.

Estas interese, legi proverbojn el diversaj landoj. Ofte proverboj enhavas similajn ideojn, sed la bildoj, kiuj esprimas la ideojn, taŭgas al lokaj kondiĉoj. Ekzemple, en kelkaj eŭropaj lingvoj ni trovas ion similan al la zamenhofa: “Kiam kato promenas, la musoj festenas.” — Sed la zuluoj en Sud-Afriko diras samsence: “La mustelo estas kontenta, ĉar la mambo eliris.” (Mambo estas danĝera afrika serpento.)

La angloj diras: “Vi ne povas fari silkan monujon el orelo de porko.” Sed la japanoj esprimas tiun ideon alivorte: “Eĉ se vi metos serpenton en bambuan tubon, vi ne detruos ĝian inklinon tordi sin.”

La danoj diras: “Tiu, kiu konstruos laŭ la konsiloj de ĉiuj, havos malrektan domon.” — Sed la turkoj diras: “Ne tondu la voston de via azeno inter multaj homoj — unu diros ‘Tro longa!’ kaj alia diros ‘Tro mallonga!’.”

Multaj proverboj de diversaj popoloj prezentas memoreblajn, vivoplenajn, amuzajn bildojn. Jen kelkaj perloj:

— Itala: “Estas facile, minaci virbovon el fenestro.”

— Usona kreola: “Estas netaŭge, ligi la hundon per ŝnuro el kolbasoj.”

— Portugala: “Oni ne mortbatas erinacon per la pugno.”

— Joruba (lingvo de okcidenta Afriko): “Mi preskaŭ kaptis la birdon!” — “Neniu povas manĝi preskaŭon el la kaserolo.”

— Egipta: “Tro da maristoj sendas la ŝipon al la marfundo.”

— Skota: “Tiu, kiu ŝiris sian pantalonon, sidas tre senmova.”

— Araba: “La barbiro lernas sian metion sur la vizaĝo de orfo.”

— Franca: “Estas pli bone lasi la infanon kun nazo muka, ol fortiri lian nazon.”

— Hebrea: “Tiu, kiun mordis serpento, nun timas ŝnuron.”

— Angla: “Ĉiu laŭ sia propra gusto, kiel diris la maljunulino, kiam ŝi kisis sian bovinon.”

— Bulgara: “Ne metu erinacon en vian propran kalsonon.”

- Latina: “Leporo povas tiri la barbon de morta leono.”
- Ĉina: “Tiu, kiu rajdas sur tigro, ne povas degrimpi.”
- Hinda: “La santalarbo parfumas la hakilon, kiu ĝin dehakas.”

Eble iam iu esperantisto aŭ grupo de kleraj esperantistoj preparos grandan kolekton de interesaj proverboj el la tuta mondo? Jen valora, agrabla libro, ĉu ne? kvankam unu el la proverboj de la skotoj estas: “Saĝuloj kreas proverbojn kaj stultuloj ripetas ilin.”

Iasence, ni esperantistoj, kun nia propra lingvo, originala literaturo kaj kelkaj aliaj pecetoj de propra kulturo, estas popolo. Ni ne havas tradiciojn de multaj jarcentoj; sed ni rajtas kaj povas krei nian propran folkloron. Ni povas krei niajn proprajn proverbojn. Sed ĉar Esperanto estas lingvo, kies ĉefa celo estas internacia paco, amikeco, kaj interkompreno, ni devas havi proverbojn ne cinikajn, ne ŝovinismajn, ne malnoblajn, sed proverbojn pri espero, toleremo, paco kaj aliaj pozitivaj konceptoj.

Tra ĉi tiu legolibro vi trovos multajn novajn proverbojn. Se ili plaĉos al vi, eble vi memoros kaj foje uzos ilin. Se ili ne plaĉos al vi, eble iam vi mem kreas novajn pli belajn proverbojn?

Sango el Prov tuboj

En 1979, japanaj kuracistoj savis la vivon de malsana viro, kiu urĝe bezonis sangon, kvankam ili ne havis la ĝustan specon de sango. Ili uzis novan fluidon, komplikan kemian kombinaĵon, en kiu fluoro havis gravan rolon, kaj samtempe donis al la paciento multan oksigenon.

En Japanujo, Britujo kaj Kanado, esploroj pri fluidoj, kiuj povas anstataŭi sangon, daŭras. Sciencistoj serĉis ion tian dum proksimume kvindek jaroj. Nun ili esperas, ke post multa pacienca eksperimentado, baldaŭ hospitaloj havos adekvatan surrogatan sangon, kiun oni preparis en laboratorioj. Ĝi povos savi multajn vivojn, tre helpi en operacioj kaj kelkaj aliaj specialaj kuracadoj, kaj helpi sciencistojn solvi multajn gravajn medicinajn problemojn, kies solvoj donos novajn esperojn pri aliaj kurac-metodoj.

Kompreneble, nia propra homa sango, kiu nature fluas en niaj arterioj kaj vejnoj, ankoraŭ estos nia plej bona vivo-fluido. Sed ne

ĉiuj homoj ĉiam havas sanan aŭ sufiĉan sangon, kaj, kiam kuracistoj havos vere bonan kemian sangon, ili ja havos tre valoran helpon.

Versareto kun Du Utilaj Adverboj

Ju pli da kokinetoj, des pli da kortaj klukoj;
ju pli da etaj puloj, des pli da grandaj jukoj;
ju pli da tedaj taskoj, des pli da lacaj nervoj;
ju pli da Delegitoj, des pli da bonaj servoj.

Ju malpli da atento, des pli da akcidentoj;
ju malpli da penado, des malpli da poentoj;
ju pli da militŝipoj, des malpli da klinikoj;
ju pli da burokratoj, des pli da statistikoj.

Ju pli la hundo ĝojas, des pli ĝi voston svingas;
ju pli ni kvereladas, des malpli ni atingas.
Des pli la venko eblos, ju pli ni helpos mone;
ju pli da amikeco kaj amo, des pli bone!

Fruaj Scioj

Kio estas la plej malnova industrio en la mondo? Laŭ la ĝisnunaj scioj de arkeologoj, oni ne certas; sed la du plej malnovaj industrioj estas: la akrigo, per lertaj batoj, de silikoj por fari simplajn ilojn; kaj la preparado de salo el sala akvo, en kavoj sub la suno. Do, temas pri preparado de la unuaj iloj, kaj pri io, necesa al la vivo. Arkeologoj trovis indikojn, ke prahomoj praktikis tiujn ĉi praindustriojn antaŭ proksimume miliono sepcent kvindek mil jaroj.

La plej malnova boato, kiun arkeologoj trovis, estis en Egiptujo; oni konstruis ĝin ĉirkaŭ 2515 a.K. (antaŭ Kristo); sed arkeologoj trovis indikojn, ke la grekoj havis boatojn ĉirkaŭ 7250 a.K. kaj la danoj kaj angloj eble mil jarojn pli frue.

La plej malnova universitato en la mondo ne apartenas al unu el la plej riĉaj landoj; des pli ĝiaj anoj rajtas fieri. Ĝi estas la universitato de Karauiino (*Quaraouyine*) en Feso, Maroko. Noblaj pioniroj fondis ĝin jam en 859 p.K. (post Kristo). Ĝi ankoraŭ funkcias,

kvankam ĝi ne estas granda: ĝi instruas ĉirkaŭ naŭcent studentojn. Ĝiaj nunaj fakultatoj estas: islama juro, islama teologio, ĝenerala juro, literaturo kaj sociaj sciencoj.

Miskomprenoj

(La trafiko estas tre brua, dum diversaj homoj staras en vicinio ekster la vendejo de fiŝoj kaj kortbirdoj, kaj penas iom babili.)

“Hodiaŭ ili vendas trutojn.” — “Sed kia familio povus manĝi tutan struton?”

“Ĉu vi deziras salikokojn?” — “Oni devas sali kokojn, aŭ ili ne gustas bone.”

“Ĉu tie ĉi estas angilo? — “Ne, tiuj ne estas anglinoj, estas skotinoj.”

“Mi deziras soleon, sed ĝi probable estas tre kosta.”

“Jes, oleo nun estas terure kosta.” — “Ne, ŝi parolis pri soleo, sed timas, ke ĝi estos tro osta.”

“Eble por mia familio avida, platesoj?” — “Jes, ĉi tiu linio ja faras malrapidan progreson.”

“Aŭ kelkaj bonaj tranĉaĵoj el moruo?” — “Jes, estas tia bruo, ke oni preskaŭ sentas sin surda.” — “Kio? Kie okazis la murdo?”

Logiko

Familioj, kiuj loĝis en ruldomoj, koleris, ĉar la publikaj instancoj, kiuj faris regulojn pri la ruldom-tereno ekster unu angla urbo, malpermesis, ke oni havu tie siajn ordinarajn dorlot-bestojn. Kiom ajn la familiestroj petegadis modifon de tiu regulo, kiu al kelkaj vere kaŭzis dolorajn problemojn, tiuj lokaj burokratoj insiste malpermesis hundojn, katojn, hamstrojn, kuniklojn.

“Ĉu vi permesas birdojn?” — “Jes, ni permesas birdojn; vi rajtas daŭre havi viajn papagojn, kanariojn, kaj aliajn birdojn.”

La familiestroj finfine donis taŭgan lecionon al la burokratoj. Ili akiris struton, du metrojn altan...



En Skotlando, iom post la Dua Mondmilito, oni arestis fiŝiston, ĉar, kontraŭleĝe, li fiŝkaptis per longega ŝnuro, sur kiun li fiksis ducent tridek hokojn. La leĝo preskribas, ke por tiaspeca fiŝkaptado, oni rajtas uzi sur unu ŝnuro maksimume ses hokojn.

Antaŭ la loka juĝisto, la fiŝisto tute ne neis, ke li uzis ducent tridek hokojn. Sed li defendis sin tiel: “Mi fiŝkaptis dum la nokto, kaj en la mallumo mi ne bone vidis, por kalkuli la hokojn.”



4. FABELO EL TIBETO

Tibeto, tre alta lando, kiu situas norde de Himalajo, estas nun aŭtonoma regiono de Ĉinio. Lando pli granda ol Francujo, Svislando, Hispanujo kaj Portugalujo kune, ĝi subtenas malpli ol du milionojn da homoj. (La supraj kvar eŭropaj landoj kune subtenas pli ol naŭdek ses milionojn.) Sed la tibeta popolo, en sia montara, malvarma lando, havas propran lingvon, multajn interesajn tradiciojn kaj kutimojn, tre riĉan apartan folkloron.

La jena tibeta fabelo estas neordinara kaj amuza. Ĉu ĝi ankaŭ iom montras la absurdan flankon de milito, diplomatio kaj propagando?

La Musoj kaj la Reĝo

Iam, ie, en iu lando, regis reĝo; kaj en la lando estis multaj musoj.

Normale la musoj prosperis kaj manĝis sufiĉe; sed venis jaro de malbona rikolto. La musoj, kiuj kutime vivtenis sin grandparte per la greno, kiun la homoj lasis sur la tero post la rikolto, rimarkis, ke ĉi-jare la postrikolta greno ne sufiĉos por la tuta vintro. La Reĝo de la Musoj decidis peti helpon de la Reĝo de la Lando.

Kiam la palaca pordisto informis la Reĝon, ke muso deziras paroli kun li, la Reĝo ekridis, sed ordonis, ke oni enlasu la muson.

La muso venis respekteme kaj dece en la grandan Aŭdiencan Ĉambron. Ĉar tibetanoj, je formalaj renkontiĝoj al kiuj taŭgas ceremonioj, donacas elegantajn skarpojn, la eta muso portis silkan fadenon, kiun li per la ĝustaj ceremoniaj gestoj ĝentile proponis al la reĝo.

“Mi vin salutas, frato Muso,” diris la Reĝo. “Kion vi deziras?”

“Ho, Reĝa Moŝto,” respondis la Muso, “la rikolto estas malgranda; la homoj ne lasis multan grenon sur la tero; ni musoj mortos pro malsato, se ni ne povos pruntepreni stokon por la vintro. Mi petas vian helpon. Bonvolu prunti al ni sufiĉan grenon por la vintro;

kaj mi, la Reĝo de la Musoj, solene promesas, ke post la nova rikolto ni plene repagos vin. La enhavo de unu el viaj grenejoj sufiĉos.”

“Kiel vi etaj musoj forportos tiom da greno?”

“Via Reĝa Moŝto, se vi pruntos la grenon al ni, ni povos ĝin forporti.”

“Do, Frato Muso, mi pruntos al la musoj la grenon en unu grenejo, sub tiuj kondiĉoj.” Kaj li ordonis al la respondeca persono, malfermi unu grenejon, kaj permesis al la musoj forporti la grenon.

La Reĝo de la Musoj kunvokis ĉiujn musojn de la lando, centmilojn da musoj. Ĉiuj iris al la grenejo, metis grenon en la buŝon, sur la dorson, ligis iom da greno per la vosto; kaj tia laboro, de tiom da musoj kune, rapide malplenigis la grenejon. Kiam la Reĝo vidis, kio okazis, li komencis alte estimi la inteligentecon kaj kapablon de la musa popolo, kaj ĝian kunlaboremon.

Post la nova rikolto, la Reĝo de la Musoj plenumis sian promeson; la musoj reportis al la reĝa grenejo la tutan kvanton da greno, kiun ili antaŭe prunteprenis; kaj ankaŭ kun interezo. La Reĝo ne plu inklinis ridi je la etaj musoj, ĉar li konstatis, ke la musoj estas ne nur inteligentaj, sed honestaj kaj fidindaj.

Sed baldaŭ la Reĝo havis gravan problemon: milito komenciĝis inter lia regno, kaj najbara regno. Granda rivero fluis inter la du regnoj, kaj ĉe la bordo de la rivero la malamika reĝo jam metis sian tendaron, preta por invadi la landon.

La musoj ne deziris, ke fremda reĝo, eble malpli helpema, aŭ eĉ kruela, venku ilian Reĝon. La Reĝo de la Musoj tuj iris al la palaco kaj petis aŭdiencon. La Reĝo tuj invitis lin al la Aŭdienca Ĉambro.

“Via Reĝa Moŝto, mi venis denove, ĉi-foje por demandi, ĉu ni povas reciproki vian grandan helpon. Ni metas nin je via dispono.”

Eĉ meze de tiu grava krizo, la Reĝo ne povis kaŝi rideton. “Frato Muso,” li demandis, “kiel etaj musoj povos helpi min nun? La malamika armeo estas vasta, multe pli granda ol la mia. Mi nepre malvenkos. Mi dankas pro viaj bonaj intencoj, sed kiel musoj povos helpi min?”

“Via Reĝa Moŝto, ĉu tamen vi memoras, kiel vi dubis pri nia kapablo forporti la grenon el la grenejo? Kaj kiel vi surpriziĝis,

kiam ni repagis nian tutan pruntaĵon? Nur fidu al ni denove; kaj konsentu pri du servoj al nia popolo; kaj per specialaj musaj manovroj ni savos vian regnon.”

“Estas vere, ke vi sukcesis pri la du aliaj aferoj,” la Reĝo konsentis. “Do, kion mi faru?”

“Ordonu al viaj soldatoj, ke ili preparu por ni cent mil bastonetojn, longajn kiel via reĝa piedo, kaj kuŝigu ilin ĉe nia flanko de la rivero, antaŭ la sunsubiro. Ordonu tion ĉi — por tiom da soldatoj, la tasko estos malgranda — kaj ni nepre kreos konfuzon kaj panikon inter la malamikoj.”

“Tion mi ordonos,” la Reĝo promesis. “Kaj kion vi deziras por vi mem?”

“La du grandaj danĝeroj, kiuj minacas musojn en tiu ĉi lando, estas inundoj kaj katoj. Kiam la rivero iom plialtiĝas, la akvo envenas niajn nestojn. Ĉu vi konsentos, konstruigi fortan baraĵon laŭlonge de la rivera bordo, por ke la akvo ne povu plu plenigi niajn nestojn? Kaj katoj ĉiam ĉasas musojn; do, ni humile petas, ke vi ekzilu ilin de via regno.”

“Se vi savos la regnon, vi havos vian baraĵon kaj malhavos la katojn.”

La Reĝo de la Musoj faris la kutimajn ceremoniajn gestojn, kaj rapide reiris al sia musa popolo.

La suno subiris; kaj ĉiuj plenkreskaj musoj, centmiloj da musoj, sekvis sian reĝon al la rivera bordo. Tie ili trovis la cent mil bastonetojn en bona ordo. La musoj tuj puŝis la bastonetojn sur la riveron, eksidis sur ili, duope aŭ triope, padelis per la piedetoj kaj facile vojaĝis al la alia flanko. Ili kviete kuris tra densa mallumo, al la tendoj kie la malamika armeo dormis. La musoj mordis la kordojn de la pafarkoj kaj la portilojn de la pafiloj; dente detruis la ŝnurajn fuzeojn; difektis la vestaĵojn de la soldatoj kaj eĉ formordis la harplektaĵojn de tiuj, kiuj dormis plej profunde. Ili faris ĉion, kion centmiloj da musoj povas fari per la dentoj: ĉifonigis tendojn, formanĝis grenon, farunon kaj aliajn nutraĵojn, mordis kordojn, truis ŝuojn, kaj ĉie ion manĝis, kion homoj zorge aranĝis. Post du tri horoj da sabotado, la musoj reiris al la rivera bordo, residiĝis sur siaj bastonetoj kaj revojaĝis padele al la amika bordo. Neniu rimarkis ilin.

La suno leviĝis. Ankaŭ leviĝis multaj krioj kaj malbelaj vortoj el la tendaro de la malamika armeo. La soldatoj vekigis kaj trovis paf-arkojn neuzablajn, pafilojn nek uzablajn nek porteblajn, uniformojn truoplenajn, sen butonoj, sen insignoj. Baldaŭ ili ankaŭ konstatis, ke ili ne matenmanĝos, ke eĉ taso da teo kun butero ne estos havebla por varmigi kaj fortigi ilin.



Unue, ĉiu soldato akuzis la najbarajn kamaradojn; poste la kverelado iĝis pli grandskala; oficiroj akre riproĉis soldatojn, soldatoj eĉ ekakuzis oficirojn. Aŭdiĝis laŭtaj krioj de “Ŝtelo!”, “Perfido!”, “Sabotado!”, “Spionoj!” kaj multaj fiaj vortoj, ĉar soldatoj malsataj, malvarmaj, kaj sen uzablaj armiloj ne parolas tre elegante.

Ĝuste kiam en la frumatena lumo la tendaro estis en plena konfuzo, la malamika armeo ankaŭ aŭdis, de la alia bordo, klarionojn kaj kelkajn pafojn. Tute ne preta batali, la armeo forkuris malbonorde.

La Reĝo tre ĝojis, kaj ridegis pri la manovroj de la musoj. Li kore dankis la Reĝon de la Musoj kaj lian popolon. Kaj li tuj plenumis siajn du promesojn. Li ordonis al arkitektoj kaj konstruistoj, tuj plani kaj konstrui bonan, fortan barajon laŭlonge de la rivero, por ke ĝi neniam plu inundu la nestojn kaj dronigu la musojn. Kaj li dekretis ekzilon de ĉiuj katoj, kaj mortopunon por iu, kiu poste portos katon en la landon.

Li sendis heroldon al la malamika reĝo, kun la jena averto: “Ni en nia lando ne deziras militon. Milito suferigos vian popolon kaj mian popolon, kiu ajn venkos. Ni rajtas defendi nin kontraŭ iu, kiu nin atakas, kaj ni forte defendos nin. Sed ni deziris, se eble, eviti nenecesajn mortojn kaj vundojn. Do, unue ni sendis nian armeon de musoj, kiuj venkis viajn soldatojn sen elverŝo de sango. Ni proponas al vi pacon; sed, se vi denove ekatakos, ni sendos kontraŭ vi armeon de niaj dombestoj kaj kortbirdoj; se ili ne sukcesos, ni sendos niajn sovaĝajn bestojn; kaj finfine, se ni ne povos per moderaj diskutoj kaj prudentaj kompromisoj eviti plenan militon, mi mem kondukos al batalo miajn lertajn kaj kuraĝajn soldatojn.”

La malamika reĝo estis sufiĉe saĝa, por aŭskulti atente; kaj poste li komprenis, ke se la musa armeo povis tiom detruai, estos malsaĝe, riski pri la armeoj de dombestoj, sovaĝbestoj kaj soldatoj. Estos pli saĝe, tuj interkonsenti pri pac-traktato. Do, la du reĝoj facile preparis traktaton, kaj la du regnoj longe restis en amika rilato. Ankaŭ la musoj restis feliĉaj, ĉar la Reĝo protektis ilin kontraŭ inundoj kaj katoj; kaj, pro ilia meritplena servo al la patrolando, ili ĉiujare ricevis unu grenejo-plenon da greno.

Pli da Proverboj

- Tra verdaj okulvitroj, la mondo estas verda. (Japana)
- Vi devos longe piediri malantaŭ sovaĝa ansero, antaŭ ol vi trovos strutan plumon. (Dana)

- Pli bone foruziĝi, ol forrustiĝi. (Angla)
- La plezuro, fari ion bonan, estas la sola, kiu neniam eluziĝas. (Ĉina)
- La kribrilo diris al la kudrilo, “Vi havas truon.” (Bengala)
- Mirto, kiu staras inter urtikoj, tamen ankoraŭ nomiĝas mirto. (Hebrea)
- Pli bone rajdi sur azeno, kiu portas min, ol ĉevalo, kiu forĵetas min. (Hispana)
- Ne ligu viajn ŝu-laĉojn sur la melonkampo de la najbaro. (Ĉina)
[Ĉi tio signifas: ne agu, kvankam senkulpa, tiel ke vi suspektigos vin mem pri fia faro.]
- La vir-abelo suĉas la jasmeno-florojn, sed ne faras mielon. (Tatara)
- Estas pli bone, sidi en malliberejo kun saĝulo, ol en paradizo kun stultulo. (Rusa)
- Ne necesas sproni leporon, kiu jam kuras. (Itala)
- La kuniklo restis sen vosto, ĉar ĝi ordonis al la aliaj bestoj, alporti voston. (Zulua)
- Avido, avido, sufokiĝas la hundido. (Jamajka)
- Oni ne akiras renomon sur mola lito. (Turka)
- Sovaĝa ansero neniam demetis malsovaĝan ovon. (Irlanda)

Estas ofte amuze, konstati, kiel diversaj homoj esprimas la saman ideon. Ekzemple, ie ajn en la mondo, oni eble volas diri, ke iu alportas ion, kio jam abundas. La angloj diras, “Porti karbon al Novkastelo”, ĉar apud Novkastelo, urbego ĉe la rivero Tajno, estas granda karb-industrio. La hispanoj diras, kun simila ideo, “Porti feron al Bizkajo.” La francoj diras, pli ĝenerale, “Porti foliojn al la arbaro.” En antikva Romo oni diris, “Porti akvon al rano”, kaj en antikva Ateno, “Porti strigojn al Ateno.” En la zamenhofa *Proverbaro* ni trovas, “Leciono al profesoro estas vana laboro.” Ĉu ni povas pripensi ion por la esperantistoj? “Porti verdajn stelojn al mondkongreso”?



En la bestĝardeno

“Rigardu tiun belan beston!”
“Rigardu tiun ruĝan kreston!”
“Sed vidu ties kreston bluan!”
“Vidu la idon kanguruan!”
“Rigardu! kio estas tio?”
“Verŝajne estas agutio.”
“Tie pingvenoj, tre mallerte,
Marŝas al fiŝoj, buŝ-aperte.”
“Tion rigardos ni kun ĝu’,
Kaj tiam ni promenos plu.”
“Ne donu al la cikoni’ el
La nudaj fingroj! Faru tiel.”
“Ne per la fingroj, panjo? Kial?
Oj, ĝi min bekis!” “Ĝuste tial!”
“Venu ĉi tien! En spiraloj
Jen kobroj, mamboj kaj krotaloj;
Ankaŭ pitono kaj aspido!”
“Mi tremas pro la nura vido!
Ĉar tiajn bestojn mi malŝatas.”
“Jen la simioj sidas, gratas
Amike unu la alian.”
“Jes, mi preferas beston tian.”
“Jen vere stranga reptili’ —
Ne tie, vidu, tie ĉi —
Kvazaŭ flugiloj sur torako!”
“Nu, la avizo diras, *Drako*.”
“Tiel fabeloj realiĝas.”
“Tiu knabino nun paliĝas.”
“Jen la kolibroj, tiel belaj
Kun tiaj formoj hel-juvelaj.”
“Tiom da bestoj, plumaj, skvamaj,
Molharaj... tiom, tiel malsamaj!”

Ne Trovebla en la Bestĝardeno!

En Belurbo estas granda, bela parko, pri kiu la urbanoj fieras. Inter la vidindaĵoj de la parko estas granda lago, kun insuletoj, riveretoj kun ornamaj pontoj, anasoj, cignoj kaj fiŝoj. Dum kunveno de la Urbokonsilantaro, la Konsilantoj diskutis, kiel plibeligi la faman parkon. Unu konsilanto sugestis, “Mi proponas, ke ni aĉetu gondolon por la lago. Gondoloj sur akvo estas vere pitoreskaj.” Alia konsilanto subtenis la proponon.

Tiam tria konsilanto aldonis novan sugeston. “Se ni deziras gondolojn sur la lago, ĉu ne estos pli bone, aĉeti paron da gondoloj, kaj lasi ilin nature multobliĝi?”

Sur Kolegia Afiŝ-tabulo:

Malaperis el la kuirejo
**Unu tranĉilo de
kuiristo kun nigra tenilo.**
Se vi trovos ĝin ie,
bonvolu reporti ĝin.

Sur Pordo en Laboratoria Komplekso:

Danĝeraj radioj!
ENIRO STRIKTE MALPERMESITA!
Eniro sen speciala protekta vestaro
kaŭzos
RAPIDAN MORTON!
Oni severe monpunos ĉiun,
kiu eniros senpermesite.

5. KIEL UTILA ESPERANTO JAM ESTAS!

La fundamenta intenco, baza al Esperantismo, estas io tiel grandskala, tiel grandioza, tiel bele simpla, tiel humane nobla, ke ĝi povas momente senspirigi iun ajn, kiu vere pensas pri ĝi. Zamenhof kreis, kaj la esperantistaro dum praktikado pli evoluigis lingvon, kiu povas esti la dua lingvo de ĉiuj homoj tra la tuta mondo. Per ilo malpeza, malmultekosta, sufiĉe bela, kaj taŭga por ĉiuj, la popoloj povos malkonstrui ĉie kaj por ĉiam ĉiujn lingvajn barilojn.

Noble racia kaj justa estas la ideo de lingvo neŭtrala, kiu ne apartenas, kaj neniam apartenis, al unu nacio. Nenia imperiismo aŭ alispeca potenc-avido trudas nian lingvon al nacio, kiu ne deziras ĝin. Nenio ligas Esperanton al iu ajn aparta mond-regiono, raso, religio, ideologio, kulturo. Esperanto estas lingvo ne de privilegioj kaj avantaĝoj, kiuj necesigas por aliaj malprivilegiojn kaj malavantaĝojn, sed lingvo de egaleco kaj libereco.

La esperantistoj estas tro saĝaj kaj realismaj por kredi, ke Esperanto sola kreos tutmondan pacon kaj plenan toleremon inter la nacioj kaj rasoj. Preskaŭ ĉiuj el ni scias per sperto, ke samlandanoj, samstratanoj, eĉ samfamilianoj, kiuj denaske lernis la saman nacian lingvon, povas kvereli. Eĉ esperantistoj povas kvereli, eĉ insulti, en Esperanto! Ĉar eĉ la plej bonaj kaj saĝaj el ni homoj daŭre havas kelkajn malbonajn ecojn aŭ malsaĝajn pensojn. Kaj la plej grandaj, suferigaj problemoj de la monda politiko havas multajn kialojn tre komplikajn.

Tamen, neŭtrala, egaliga dua lingvo por la tuta homaro solvos multajn problemojn, mildigos aliajn problemojn, kaj evitos multajn eviteblajn miskomprenojn, mutigojn, surdigojn kaj sekvajn malamikigajn sentojn. Ĝi ŝparos grandajn monsumojn, kiujn registaroj povos dediĉi eble al hospitaloj, lernejoj, muzeoj kaj aliaj utilaj objektoj — aŭ malaltigi impostojn. Ĝi faciligos diplomation kaj kulturajn interŝanĝojn, internacian komercon kaj turismon, urĝan helpon dum krizoj kiel ekzemple ia tertremo aŭ inundo, kaj la laboron de ĉiuj el la nun multaj internaciaj organizoj, kiuj faras

ian laboron utilan al la tuta homaro. Eĉ tie, kie ia loka milito aŭ alia konflikto kaŭzas suferojn, neŭtrala komuna lingvo povas iom mildigi la mizerojn de tiuj, kiuj suferas, kaj faciligi la helpon de tiuj, kiuj kompatas.

En mondo ankoraŭ suferoplena, io ajn, kio povas kontribui almenaŭ ion por helpi la homaron, estas valora. En mondo, kie ankoraŭ abundas malamoj, antaŭjuĝoj kaj misinformoj, io ajn, kio iom kontribuas al senpera sincera komunikado kaj interkomprenado, estas valora.

Eĉ longe antaŭ ol la tuta homaro parolos Esperanton, la internacia lingvo povos detrui la lingvajn barilojn; ĉar, kiam ekzemple nur ĉiu kvina homo, en ĉiuj landoj, parolos Esperanton, tiu, kiu ankoraŭ bezonas interpretiston, povos facile trovi helpon. Malmultaj el ni konstante bezonas interpretadon.

Pensema homo povas tuj vidi kiajn miraklojn Esperanto faros por la homaro, kiam la homaro vere grandskale uzos ĝin. Laboro por Esperanto estas, klare, pozitiva, inteligenta, utila laboro. Kaj tamen — malhelpis du teruraj mondmilitoj; malhelpis kelkaj tiranaj registaroj, kiuj persekutis kaj viktimitigis senkulpajn esperantistojn. Esperanto multe progresis, sed iu fina venko, kiam la tuta mondo akceptos tiun valoran donacon, ne estas proksima.

Ĉiu serioza esperantisto devas do obei al la devizo, kiun Klara, la lojala edzino de Zamenhof, jam elektis el liaj verkoj kaj gravuris sur lian skribmaŝinon: “*Ni laboru kaj esperu*”. Kaj laboradi, esperadi dum jaroj estas ofte malfacile.

Sed, kvankam tiuj, kiuj lace kaj malrapide piediras al brila sed tre malproksima celo, ne-eviteble suferas per multaj seniluziigoj, kaj riskas plenan senesperigon ĉar la vojo ŝajnas tiel senfine longa kaj la vojirado tiel malrapida, tamen oni povas atesti pri la valoro de Esperanto eĉ jam en la nuna situacio.

Ne necesas ke ni daŭrigu nian laboron en izolo. Se ni instigas al aliaj, eklerni la lingvon, ne necesas postuli de ili nur longan sopiran rigardon al Lumurbo en Verda Valo, kiun rikanemaj malamikoj povas nomi “miraĝo”. Ĉar iasence Esperanto jam venkis. Ĝi tute ne restas ia teoria projekto, eleganta sur papero nur. Kredeble kelkaj milionoj jam uzas ĝin. Jam hodiaŭ, tiu, kiu bone scipovas Esperanton, vere posedas valoran, unikan ilon, kiun inteligenta homo povas multe utiligi por diversaj celoj.

Ne tre multaj, la esperantistoj tre multe organizas sin; tial, esperantisto facile trovas aliajn esperantistojn.

La plej grava el multaj organizoj esperantistaj estas Universala Esperanto-Asocio, UEA, kiu celas esti kiel eble plej tutmonda, neŭtrala kaj altnivela. Estas konsilinde, ke ĉiu serioza esperantisto, kiu povas, aniĝu al UEA. Tiu, kiu volas, sed ne povas, skribu al UEA, ĉar UEA disponas fonduson, por helpi kelkajn personojn en malriĉaj aŭ nepagipovaj landoj. (Sed tie, kie registaro tute malpermesas rilaton kun internaciaj organizoj, kompreneble oni ne havas devon detrui sin.)

Subteni la mondan organizon ne signifas nur oferon por subteni Esperanton. Kotizo al UEA rajtigas ĉiun anon al la helpo de la *Delegita Reto*. Tra la mondo flugas, konstante, en multaj direktoj, leteroj al Delegitoj; reflugas leteroj kun tre diversaj objektoj, tradukoj, konsiloj kaj informoj. Kiu nacia lingvo hodiaŭ rajtigas iun al konsilaj servoj en pli ol sesdek landoj? Kaj ĉiuj Delegitoj de UEA estas volontuloj, sensalajraj; oni repagas al ili nur bazajn elspezojn, kiel ekzemple afrankon. Oni trovas en la Jarlibro de UEA ne nur la adresojn de la Delegitoj, kaj simplan regularon por servopetoj, sed detalojn pri la fakoj de pli ol du mil fakdelegitoj, kiuj kapablas helpi el siaj specialistaj scioj.

UEA ankaŭ eldonas la gazeton *Esperanto* kaj multajn bonajn librojn, kaj prizorgas aŭ helpas multajn kulturajn laborojn. Por novaj esperantistoj, kredeble unu el la plej utilaj servoj estas la «Koresponda Servo Mondskala», kiu laŭeble kunrilatigas tiujn, kiuj deziras plum-amikojn. Utila al lernejoj estas la servo «Genkloj Esperantistaj», kiu aranĝas, ke bonkora sperta esperantisto korespondu kun knabo aŭ knabino, por kuraĝigi, helpi kaj amike instrui lin aŭ ŝin.

UEA havas viglan apartan sekcion por gejunuloj malpli ol 26-jaraj, «Tutmonda Esperantista Junulara Organizo» (TEJO), kun propra gazeto kaj apartaj kongresoj.

Jam ekzistas surprize multaj fakaj organizoj de esperantistoj. La listo ofte iom plilongiĝas; sed inter aliaj troviĝas organizoj por tiuj esperantistoj, kiujn interesas:

aŭtomobiloj, bahaismo, bibliaj kaj orientalistaj studoj, blindulaj aferoj, budhismo, fervojoj, filatelo, filologio, instruistaj aferoj, juro, ĵurnalismo, katolikismo, kristanismo, kvakerismo, matema-

tiko, medicino, muziko, naturismo, ornitologio, politiko, poŝto kaj telekomunikado, radio amatora, Rotario, scienco, skoltismo, ŝako aŭ turismo.

Pluraj sed ne ĉiuj aliĝis al UEA. (Kompreneble organizoj religie aŭ politike ne-neŭtralaj ne rajtas aliĝi al UEA.) Fak-delegitoj de UEA en diversaj landoj proponas sian helpon pri multaj aliaj specialaj interesoj, ekzemple pri:

abeloj, agrikulturo, arkeologio, arkitekturo, bibliotekoj, elektroniko, filozofio, fotografio, gimnastiko kaj multaj sportoj, industrioj tre diversaj, inĝenierado, komerco, konstruado, metaloj, numismatiko, vegetarismo, veterinaraj aferoj, virinaj aferoj kaj zoologio — inter tre multaj aliaj fakoj.

Pri lingvoj, ne nur multaj fakdelegitoj proponas ĝeneralan helpon, sed jam en 1979 fakuloj pri minimume dudek lingvoj estis konsulteblaj.

Bedaŭrinde, la membraro de UEA, tiel potenca, tiel utila, kaj kun profesieca altnivela administrataro, estas ankoraŭ malplimulto de la tuta esperantistaro, pro diversaj kialoj; inter ili nescio; temperamenta malinklino al organizoj; nesufiĉo da mono; kaj registaraj malpermesoj, precipe pri transpagoj internaciaj.

Sed ekzistas multaj aliaj eblecoj, por jam utiligi Esperanton. Tra la mondo ekzistas naciaj Esperanto-asocioj, regionaj asocioj, urbaj societoj; kutime esperantistoj povas almenaŭ trovi aliajn esperantistojn. Kaj ne nur en la propra urbo; esperantisto, kiu vojaĝas, ofte povas trovi samideanojn. (Loka grupo ofte entuziasme bonvenigas vizitanton el alia lando, se li aŭ ŝi antaŭanoncas sin; tia vizito povas ebligi interesan kunvenon.)

Tiu, kiu deziras alilandajn kontaktojn, povas trovi korespondantojn, ofte kolegojn, per la anoncetaj paĝoj de esperantaj gazetoj. Se unu gazeto ne taŭgas, eble alia taŭgos; ekzistas pli ol cent gazetoj divers-celaj. Tiel oni povas trovi novajn interesojn, amikecojn, helpon pri diversaj aferoj. Tiel kolektantoj trovas utilajn kontaktojn, eblecojn interŝanĝi diversajn objektojn. Tiel, ankaŭ, oni eble sukcesos aranĝi interŝanĝon de vizitoj, aŭ alian turisman aferon, malpli koste ol sen tia helpo. Foje esperantisto eĉ trovis edzinon, aŭ esperantistino edzon, pere de Esperanto! Kaj kredeble preskaŭ ĉiutage, ie en la mondo, ia bona amikeco fondiĝas inter du esperantistoj.

Per nia ankoraŭ minoritata lingvo, esperantistoj jam havigis al si medikamentojn, kiujn ili urĝe bezonis; trovis parencojn, kiuj perdiĝis dum milito aŭ alimaniere; sukcesis en fakaj esploroj; vojaĝis en plurnaciaj karavanoj sen lingvaj problemoj; servis siajn ŝatokupojn kaj kolektojn, dum ili samtempe servis aliajn kies ŝatokupoj estis similaj; trovis postenojn aŭ dungis helpantojn; vaste larĝigis siajn kulturajn sciojn kaj spertojn; pligrandigis siajn mensojn, pliplenis siajn korojn, pliriĉigis siajn vivojn.

Do ne demandu al serioza esperantisto, kiu praktikas sian esperantismon, “Ĉu vi kredas, ke Esperanto iam sukcesos?” Tiu spertulo deziras, ke Esperanto sukcesu multe pli grandskale; sed li aŭ ŝi jam scias per sperto, ke Esperanto sukcesas.

Kukoloj en la Nestoj

Kio, en ĉiu kvinopo, ne apartenas al la grupo?

(Ekzemple: en la kvinopo «helena – latina – kretena – sanskrita – kopta» la ‘kukolo’ estas *kretena*, kiu signifas “stultega”, ofte laŭ medicina senco, pro malsano; la aliaj kvar estas antikvaj lingvoj.)

1. asterisko – komato – punkto – krisigno – apostrofo
2. abio – acero – akacio – aŭkuparo – ardezo
3. gerilo – makako – ĉimpanzo – gibono – mandrilo
4. lieno – tibio – tonsilo – miogalo – hepato
5. opalo – smeraldo – safiro – rubuso – ametisto
6. orgio – hobojo – klariono – mandolino – tubjo
7. lupeo – mikroskopo – episkopo – binoklo – lenso
8. cilindro – tiroido – kubo – piramido – konuso
9. monedo – emuo – papago – mopso – pingveno
10. Tokio – Barcelono – Kairo – Ateno – Varsovio

Versareto – pri ‘ig’ kaj ‘iĝ’

Jakobo kaj Jana subite decidis
ordigi la hejmon; do, ek al laboro!
de seĝoj leviĝis kaj vikle rapidis,
dum vangoj ruĝiĝis per forta fervoro.

Dum Jana zumante purigis la plankojn
kaj per tuko briligis la meblojn reĝ-trone,
Jakobo riparis tri seĝojn, du ŝrankojn,
kaj sin kuraĝigis per kant' (baritone).
Kaj poste Jakobo plenigis sitelon,
ŝtupareton starigis por grimpi tre alte,
briligi fenestrojn, saluti ĉielon;
dum Jana sur seĝon starigis sin salte
por bretojn ordigi, vicigi la potojn,
araneon forigi, ĝustigi kovrilon —
Jakobo, ho ve, ne kontrolis la botojn,
kaj Jana ne provis la seĝan stabilon.
Ĉar pendis la laĉo — Jakobo ne ligis —
kaj salto de Jana renversis la seĝon —
jen Jana al tero sin alniveligis,
Jakobo flugigis sin rekte en heĝon.
Feliĉe rompiĝis nek vitro nek osto,
sed kanto ŝanĝiĝis al vortoj fiaĉaj,
kaj zumoj al laŭtaj lamentoj pri kosto
de fuŝoj pri-seĝaj kaj ankaŭ pri-laĉaj.
Ne plu tiun tagon la paro purigis,
ĉar ambaŭ ŝokiĝis, paliĝis, sidiĝis,
per kontuzoj plurloke sin tre purpurigis;
kaj pantalon-peco sur heĝo vidiĝis.

Takto

Oni sendis novan helpanton al sperta bestgardisto en bestĝardeno. Post diversaj konsiloj kaj avertoj, la spertulo ordonis al la novulo, helpi lin translokigi hienon de unu kaĝo al alia. La novulo iel venkis sian timon kaj eklaboris. Meze de la tasko, li diris: “Iru trankvile, leono... jam bonkonduta leono... nun iom pli antaŭen, leono...” ĝis la bestgardisto demandis — “Vi ne estas sperta, sed vi ne estas idiota; kial vi nomas hienon ‘leono?’” — “Ĉit!” kaj la novulo flustris malantaŭ la mano, “ĉu vi ne komprenas, ke mi *flatas* la beston?”

Kiel Pastro Sakras

De pastroj de ĉiuj religioj, kredeble, la publiko atendas kondu-ton modele bonan. Dum festvespero rilata al iu preĝejo, la pastro mem akcidente renversis tablon, kaj torto, ses glasoj kaj tuta biskvitaro disfalis en ĉiuj direktoj.

La granda frakasobruo atentigis ĉiujn. La pastro noble regis sin, glutis, kaj dum tuta minuto nur rigardis la katastrofon; poste li kviete komencis laŭeble ordigi la konfuzon, kaj kelkaj helpis lin. Sed unu sinjoro flustris al alia: “Mi neniam aŭdis tiel blasfeman silenton!”

Novaj Proverboj

Lernado era, era, era: kaj vi iam estos klera.

Malforta kandelete venas: mallumo jam ne tute plenas.

Ne avaru, ne malŝparu.

Pripensu la filojn, forigu pafilojn.

6. GEEDZA DIALOGO

Julia atendas la edzon, Arturon. La tablo estas aranĝita por simpla vespermanĝo.

Julia Jam estas tempo; ĉu la aŭtobuso malfruiĝis? Ho, se nur lia laborejo estus pli proksima! (*Aŭdiĝas la brueto de ŝlosilo en seruro.*) Ho, jen Arturo! Kaj ĉio estas preta.

(*Arturo envenas, kisas la edzinon, deprenas sian mantelon.*)

Arturo Kara mia! Jen, mi nur lavos la manojn, kaj mi estos preta...

Julia Mia kara! Mi esperas, ke vi havas bonan apetiton. Mi ĵus preparis grandan salaton, tian, kian vi preferas, kun multaj diversaj legomoj kaj herboj, kaj precipe tomatoj; kaj mi bakis freŝajn bulketojn; do, se vi nun donos al mi la pasteĉon, mi metos ĝin sur teleron, dum vi lavos vin...

Arturo Ho, Julia, la pasteĉon!

Julia Do, kara, kio pri la pasteĉo? Ĉu ĝi difektiĝis en la aŭtobuso?

Arturo Ne, ne, sed...

Julia Do, bone, donu ĝin — mi scias, ke vi estas malsata.

Arturo Ho, Julia, mi tre bedaŭras — mi tute forgesis aĉeti ĝin!

Julia Ho ve! Ho, Arturo, kiel vi povis forgesi? Mi penas ne tedi vin per tiaj komisioj ofte, sed tiu plej bona vendejo de pasteĉoj estas ĝuste apud via oficejo, kaj estus tiel helpe...

Arturo Estus nenia ĝeno. Fakte, mi eĉ preterpasis la vendejon sesfoje hodiaŭ!

Julia Sesfoje? Do, vi eĉ havis ses okazojn!

Arturo Jes. Mi vidis la vendejon, ne nur kiam mi alvenis kaj foriris — sed dufoje mi eliris por prizorgi specialajn aferojn iom komplikajn, pri kiuj personaj vizitoj estis necesaj. Kaj eĉ unufoje mi ne memoris en la ĝusta momento, ke ni bezonas tiun pasteĉon! Ho, Julia, mi vere bedaŭras.

Julia Se vi eĉ devis dufoje fari tiujn personajn vizitojn, verŝajne via tago estis tre plena. Eble pro tio vi forgesis. Nu, se ni nur havus la pasteĉon, la vespermanĝo estus jam preta. Sed ne alvenis la mondo-

fino; ni ne mortos pro malsato. Se mi havus viandon en skatolo... sed mi ne havas. Aŭ se la stratangula butikoj ankoraŭ funkcias... sed ĝi fermiĝis antaŭ duonhoron... Se... se..., sed se'oj kaj ve'oj ne nutros nin. Ho, nun mi scias kion fari. Se vi povos atendi kvaronhoron aŭ dudek minutojn...

Arturo Nu, se mi alportus la pastecon, mi ne devus atendi. Preparu ion ajn, kara, laŭ via bontrovo.

Julia Kiel danko mi estas, ke vi estas tiel pacienca. Mi vidis edzojn, kiuj en tia situacio iĝus tute malbonhumoraj.

Arturo Kaj mi vidis edzinojn, kiuj en tia situacio predikadus kaj prelegus al la edzo, kvazaŭ li forgesus medikamenton urĝe necesan por savi la vivon de la bopatrino. Feliĉe ni ambaŭ havas ian proporcion-senton.

Julia (*bonhumore, kantete*) Hej, hej, ho, estas li hero' ... ho, ho, hi, kiel bonaj estas ni! Nu... mi havas ion en la ŝranko ... mi kradrostos ĝin, kaj tio bezonos nur kelkajn minutojn ... ni manĝos tion varma, kun iom da saŭco, kaj kun la freŝaj bulkoj; kaj flanke aŭ poste ni manĝos la salaton ... kaj se ni ankoraŭ aŭdos kriojn el la abismo, ni plenigos ĝin per iom da fromaĝo. Ĉu en ordo?

Arturo Jes, tute bone.

(*Julia eliras, Arturo sidiĝas, trafoliumas gazeton, parolas pri io, kion li legas.*)

Arturo Se homoj pli atentus, tiaj akcidentoj ne okazus... Kion faras la ministro inter tiom da melonoj? Ho, mi komprenas...

(*Julia revenas.*)

Julia Do, mi metis ĉion sur la rostokradon, mi lasos ĝin sep minutojn kaj turnos ĝin; kaj la saŭco boletas en la eta kaserolo... Ho, nun mi bezonos alian kuleregon sur la tablo. (*Prizorgas tion.*) Estas tre interesa artikolo tie, pri kvarjara knabeto, kiu jam montras eksterordinaran matematikan talenton.

(*Eliras kaj tuj revenas kun la bulkoj.*)

Arturo Ĉu plaĉus al vi, havi infanon tiel supertalentan?

Julia Mi ne scias. Kompreneble, mi esperas, ke niaj infanoj estos inteligentaj... estus ja bone, se ili montrus belajn talentojn... sed mi ne scias, ĉu mi estus bona patrino al infano vere supertalenta, iom stranga, iom nenormala... mi sentus, ke mi ne scias, kiel eduki lin aŭ ŝin...

Arturo Jes, mi sentas preskaŭ same. Mi ne bone komprenus la bezonojn kaj sentojn de tia infano... kaj mi timus, ke li iel izoligŭs de ordinaraj homoj...

Julia Mi turnos la pecojn sur la krado. (*Eliras.*)

Arturo Mi ne diros, ĉar eble ĝenus Julian, sed mi estas ege malsata! (*Julia revenas.*)

Julia En ordo... nun nur kvin minutoj... Se ni nur havus frostujon, tiaj krizoj ne okazus.

Arturo Sed frostujo estas luksaĵo, kiun ni ankoraŭ ne povas havi.

Julia Jes, jes, tion mi komprenas.

Arturo Eble iam, tamen, ni povos.

Julia Eble... ĉiam ŝajnas, ke vi devas tiel longe labori, por tiel malmulton havi...

Arturo Jes; sed ĉu tio ne estas io, kion preskaŭ ĉiu homo en la mondo sentas?

Julia Ĉu ne estus bele, se ni gajnus la ĉefpremion en la nacia loterio?

Arturo Jes ja. Mi povus elekti postenon pli laŭ miaj preferoj.

Julia Sed se vi estus riĉa, ĉu vi dezirus daŭre labori?

Arturo Jes, mi kredas ke jes; mi ne daŭrigus la nunan laboron, sed mi volus havi ian postenon, aŭ eble mi farus ian senpagan laboron — helpus la blindulojn, helpus en la hospitalo, servus la Esperanto-Movadon... Mi ne volus vivi neutile, ĉu vi?

Julia Ne... mi povas foje pensi, ke mi volonte vivus sen taskoj, sed kredeble tia vivo baldaŭ iĝus enuiga. Kaj ne estus dece, fari nenion utilan. Sed ho... se ni gajnus la ĉefpremion, mi volus unue havi ian ekstazan elspezadon!

Arturo Ni povus aĉeti aŭtomobilon...

Julia Kaj frostujon...

Arturo Kaj vere bonan radioaparaton, ne nian nunan bleko-skaton...

Julia Kaj kolor-televidilon...

Arturo Kaj ni povus donaci al la loka Societo sufiĉan monon, por presigi vere videblan reklamon pri Esperanto en la loka ĵurnalo...

Julia Kaj mia fratino povus havi la biciklon, kiun ŝi tiel longe sopiradas...

Arturo Kaj vi povus aĉeti vere belajn robojn, kaj juvelojn, kaj ŝikajn ŝuojn, tiajn, kiajn viaj ĉarmaj piedetoj meritas...

Julia Ho, se mi povus elekti belajn robojn! Kaj vi povus havi tiun komplikan brak-horloĝon, kiun vi tiel ofte rigardis en la montrofenestro...

Arturo Kaj ni povus havi ian vere belan kaj ĉarman dorlotbeston...

Julia Ho, jes! Etan raskaton, de tiu speco turka, tiu, kiu havas longan silkan hararon, kaj ĝi naĝus en la bankuvo... granda bankuvo el marmoro...

Arturo Mi preferus belan rashundon, eble unu el tiuj mirindaj rusaj leporhundoj, tiel altaj kaj elegantaj...

Julia Ni povus aĉeti turkan katidon kaj rusan leporhundidon, kaj eduki ilin kune, en sankta harmonio!

Arturo Brave! Kaj la kato lernus boji, kaj la hundo lernus miaŭi...

Julia Sed kiam ili renkontus ĉevalon aŭ ŝafon, ili parolus Esperanton!

Arturo "Best-peranton"!

Julia Sed, Arturo, unue mi dezirus, ke ni havu vere eminentan libertempon. Mi dezirus vojaĝi en luksa aviadilo, kaj viziti alian kontinenton! Ho, kiel bone estus, kiel interese! vidi tute aliajn panoramojn, vidi homojn en pitoreskaj ekzotikaj kostumoj; ni aŭdus la kriojn de strangaj birdoj, ni flarus la ekzotikajn odorojn de fremdaj floroj, ni... Ho ve, kio estas tio!?

(Eliras kure al la kuirejo.)

Arturo Odoro, fakte, kiun mi ne nomus precize ekzotika...

(Julia revenas, preskaŭ preta plori.)

Julia Ho, Arturo, dum ni fantaziis, la vespermanĝo fuŝiĝis! Sur la rostokrado restas nur fumantaj cindroj, kaj mia bona saŭco iĝis nigra gluo sur la fundo de la kaserolo!

Arturo Ho ve, kaj mi tiel malsatas! Ho, se mi nur havus edzinon iom pli prudentan! Se mi nur havus edzinon, kiu posedas la elementan scion, ke io sub flamoj rapide brulas!

Julia Kaj ankaŭ mi povus diri: Se mi nur havus edzon, kies memoro estus fidinda! Se mia kunulo nur povus prizorgi la plej simplan komision! Se ni havus tiun pasteĉon, ni nun ne devus lamenti pri nia nigra, nemanĝebla vespermanĝaĉo!

Arturo Se vi ne donus al mi stultajn bagatelajn komisionojn, mi ne povus forgesi ilin!

Julia Sendube vi preferus, ke mi perdu du horojn en la tramoj — sendube vi preferus sklavinon!

Arturo Vi estas malsaĝa anserineto — vi estas absurda... vi... ho ve, Junjo, kion ni diras unu al la alia!?

Julia Ho ve, kial mi eksplodis tiel atombombe?

Arturo Vi estas laca, kaj mi estas laca; kaj temas nur pri du malgravaj fuŝoj. Ne valoras kvereli, ĉu?

Julia Ne. Mi pardonpetas, ĉar mi ekkoleris. Mi scias, ke vi estas malsata. Nu, se estus io pli bona, mi proponus ĝin; sed la pano estas bona, kaj ĉu ĉi-vespere ni povos kontentiĝi per pano, fromaĝo kaj salato? Kaj restas kelkaj kuketoj en la ujo.

Arturo Jes, certe; ni povos iel satigi nin... Ho, Julia, memoru ĉiam, eĉ kiam mi krias, “se mi havus edzinon nur pli tian, aŭ tian...” tamen estas ĉiam vere, ke se mi ne havus vin, mi estus multe malpli feliĉa.

Julia Kaj vi rajtas kelkfoje forgesi pasteĉon; se vi ne estus mia edzo, ankaŭ mi estus multe malpli feliĉa.

Piednotoj pri Kvar Piedetoj

Eble iu, kiu legis, pensas, ke kiam Julia fantazias pri riĉeco, ŝi estas pli malsaĝa ol ŝi estas; ĉar ni ĉiuj “scias certe”, ke katoj nature evitas akvon.

Tamen, ĉiuj katoj kapablas naĝi se necese, kvankam ĝenerale la hejmaj katoj, kiuj ĉiuj apartenas al unu specio, preferas ne malsekiĝi. Sed unu raso el tiu riĉe varia specio, la tielnomitaj ‘turkaj’ aŭ ‘ankaraj’ katoj, havas apartan inklinon; tiuj katoj, eĉ katidoj, vere naĝas volonte, kvazaŭ sporte, ne nur en kuvoj, sed eĉ en rapid-fluaj kamparaj riveretoj.

Versareto pri Korelativoj [3]

Neniu povas longe sidi
trankvile dum forbrulas barbo;
nenie povas iu vidi
rabistojn sur rabarbo.

Nenies nazo sur la tero
taŭgas por bori ŝtalajn platojn;
neniam taŭgos rinocero
por teksti zonojn kaj kravatojn.

Neniom ja da plutonio
estas la sola dozo ĝusta;
neniel povas cikonio
nesti sur unu pinglo rusta.

Nenia krabo verkas odojn
nek talpo kantas dum koncerto;
neniel sekvas novajn modojn
bufino, rano aŭ lacerto.

Nenial — pro nenia kaŭzo —
vi rajtas rosti bopatrinnon;
neniam sen pripensa paŭzo
ekpuŝu flamon en benzinon.

Nenio karbopecon spicas
tiel, ke iu ĝin englutos;
neniam, kie am' oficas,
disputos ni, sed nur diskutos.

Io pri Loknomoj

Se iuj, kiuj deziras organizi ian internacian Esperanto-Kongreson, iam ne povas elekti taŭgan urbon, rigardo al indekso de atlaso povas sugesti kelkajn lokojn, kies nomoj estas interesaj al esperantistoj. *Sola* en Argentino ne ŝajnas tre taŭga por aranĝo, kiu kunigos multajn personojn; *Fermo* en Italujo taŭgus nur por la lasta tago; *Bojo*, insuleto apud Sumatro, kredeble estus ne nur tro malgranda, sed tro brua. Kongreso en *Koto*, insuleto de Formozo (aŭ Tajvano) ne estus tre komforta, kaj *Kota Kota*, en Malavio, malgranda afrika lando, certe ŝajnas emfaze malkomforta. *Muta* en Etiopio tute ne taŭgus por la multaj diskutoj de Esperanto-Kongreso, sed eble *Domo* en la sama lando estus adekvata — se nur la Domo estas sufiĉe granda. Kredeble la vetero estus agrabla en *Somero* en Finnlando; sed certe *Malbon* en Aŭstralio ne aŭgurus tre favore. *Emo* en Kanado almenaŭ sugestas pozitivan inklinon, kaj *Plano* en Usono (Teksaso) ian sisteman organizadon. Ni ne scius, ĉu akcepti inviton al *Okarito* en Nov-Zelando, ĝis ni scius, kiaj estus la sep antaŭaj ritoj. *Provo* en Usono (Utaho) eble donus taŭgan etoson

de serioza eksperimentado; kaj *Au*, urbeto en Aŭstrujo, almenaŭ memorigus nin, ke al multaj problemoj ekzistas pli ol unu solvo, kaj ni devas diskuti libere antaŭ elekto.

Kongresanoj ofte havas financajn problemojn, pro malfaciligaj leĝoj pri valuto, aŭ simpla manko de mono; tial *Kara* en Sovetio kreus ekstrajn problemojn; certe pli favora financa situacio estus en *Malkara*, en Turkujo.

Aŭ ĉu ni elektu lokon, kies nomo rekte instigas al io? En Indonezio troviĝas insulo *Savu* — sed kiun, kaj de kio? Nepre maltaŭgus la insularo *Batu* apud Sumatro! sed eble *Bolu*, en Turkujo, instigus nin al varmega fervoro? Varmon ankaŭ sugestas la sovetia urbo *Baku* en Azerbajĝano. La urbeto *Paku* sur la insulo Celebeso utile memorigus nin pri unu el la lastaj taskoj, sed alie ne multe gvidus nin.

Sed eble multaj esperantistoj opinius, ke pli taŭgus la urbeto *Ama* en Usono, apud Misisipo, aŭ *Ama* en Malio, Okcidenta Afriko; aŭ ĉu estus ia taŭga urbo apud la rivero eĉ pli klare instiga, *Amu* en la sovetia respubliko Kazaĥujo?

Aŭ ĉu ni iru al Japanujo? La mondkongreso en Tokio ja estis tre sukcesa; ĉu iam ni kongresos en Japanujo apud la *Kiso*-rivero, sub la bela influo de unika panoramo de la *Kiso*-montoj?

Novaj Proverboj

Kiam fiŝo konsilas, al bird' ne utilas.

Ne nur diru, "Bone, bone!" sed ankaŭ iom helpu mone.

Ĉenoj estas ĉenoj, eĉ el oro kun rubenoj.

Malsato aŭ amoro kreas tigron el leporo.

7. FABELO EL ETIOPUJO

Etiopujo estas lando de orienta Afriko; ĝia historio estas tre interesa, sed ĝia popolo estas ĝenerale malriĉa, kaj pro diversaj kaŭzoj multe suferis. Multaj montoj troviĝas en la lando. La iama dinastio havis tradicion, ke ĝi devenas de la biblia reĝo Salomono; ekzistas alia tradicio, ke en tiu lando la homoj unufoje eltrovis kafon. En 1974 sciencistoj trovis tie fosiliojn de prahomoj, kiuj vivis antaŭ kvar milionoj da jaroj. La Blua Nilo fontas ĉe la lago Tana en Etiopujo. La etiopoj dolore spertas lingvajn barilojn; kvankam ili havas oficialan nacian lingvon, la amharan, la popolo, malpli ol tridek milionoj, sed kun multaj diversaj triboj, havas preskaŭ cent diversajn lingvojn. Jen fabelo el Etiopujo.

Fajro sur Alia Monto

Arho estis kuraĝa, laborema kampara knabo, sed li posedis nenion. Tial li piediris al la ĉefurbo, Adisabebo, kaj iĝis servanto de riĉa komercisto, Haptom-Haseo. La ĉefurbo situas inter malvarmaj montoj, sed la domo de la riĉulo estis varma. Estis Arho, kiu devis porti la lignon por la fajro.

Tiu riĉa Haptom-Haseo emis enui, kaj konstante deziris sperti ion novan; la sorto dorlotis lin, kaj li iĝis tre kaprica. Li ofte amuzis sin per strangaj ordonoj al la servantoj. Unu vesperon, kiam Arho alportis lignon kaj ordigis la fajron, Haptom-Haseo petis lian opinionon.

“Ĉu iu viro povus pasigi tutan nokton sur la monto Intoto, inter la frostigaj ventoj, sen vestoj aŭ kovriloj, kaj ne morti?”

“Eble,” respondis Arho. “Sed estus tre malprudente.”

“Mi volonte vetos, ke neniu povus tion toleri.”

“Mi kredas, ke vere kuraĝa viro povus unufoje stari dum tuta nokto sur la monto Intoto, eĉ nuda, kaj postvivi,” diris Arho. “Sed veti mi ne povas — nenion mi posedas.”

“Nu, mi proponas al vi specon de veto. Se vi sukcesos stari sur la monto dum tuta nokto, sen vestoj, aŭ kovriloj, aŭ io por manĝi aŭ trinki, kaj postvivi — mi donacos al vi kvar hektarojn da fekunda tero, bovon, dek bovinojn, kapron, ses kaprinojn, kaj ĉion, kion vi tuj bezonos, por vivi kiel sendependa bienulo. Jen!”

Arho miregis; la kaprica riĉulo proponis al li eblecon gajni feliĉon, pri kiu li ofte revis, sed neniel esperis.

“Ĉu vi ne ŝercas, sinjoro?”

“Mi plenumas promesojn. Se vi postvivos unu nokton tian, vi ricevos vian bienon.”

“Do, sinjoro, morgaŭ vespere mi iros sur la monton.”

Haptom-Haseo ridis. Estis amuza kaprico!

Arho estis preta suferi kaj riski sian vivon, pro la deziro, vivi sendepende kaj digne. Malfacila vivo hardis lin; sed li konis la krue-lajn ventojn de la monto. Li vizitis maljunulon, malnovan amikon, kaj petis konsilojn.

La maljunulo havis ideon.

“Kiam vi staros nuda sur la monto Intoto, rigardu tiun altan rokon ĉe la alia flanko de la valo, tiun rokon, kun plata supro; ĉu vi komprenas?”

“Jes.”

“Do, morgaŭ mi portos lignon al tiu roko, kaj vespere mi ekbruligos fajron tie. Dum la tuta nokto mi prizorgos tiun fajron, kaj de via malvarma monto vi vidos ĝin. Rigardu ĝian flavan lumon, kaj pensadu pri ĝia varmeco, kaj pri mi, kiu pro amikeco bruligas tiun grandan fajron por vi. Tio tre helpos vin rezisti la malvarmajn ventojn.”

Arho komprenis la saĝon de la maljunulo, kaj la sincerecon de lia amikeco, kaj iom malpli timis, kvankam nenio povos varmigi la malamikan monton.

Venis la nova tago; posttagmeze, Haptom-Haseo sendis Arhon al la supro de la monto Intoto, kun kvar aliaj servantoj. Laŭ ordonoj, ĉe la supro, kiam la suno subiris, la servantoj kontrolis, ke Arho havas nenion por manĝi, trinki aŭ ŝirmi sin; ili forportis liajn vestojn kaj lasis lin sur la supro.

Arho staris sur la nuda roko, nuda en la mallumo, en la vojo de la forta, malvarma, malseka vento. Li frostotremis. Li rigardis la malproksiman rokon ĉe la alia flanko de la valo. Estis tro mallume,

por ke li vidu la rokon mem; sed meze de la mallumo li vidis flavan lumon; kaj li sciis, ke la fidela amiko ekbruligis la fajron, ĝuste tiel, kiel li promesis.

Tiu flava lumo sur la nigra nokto iom helpis lin; li sentis sin ne tiel sola, kaj la fajro ŝajnis iomete varmigi lian spiriton.

Terura estis tiu nokto. Arho staradis, staradis: la forta, malvarma, malseka vento senkompate turmentis lin, forportis la varmon de lia sango; en la mallumo ĝi ŝajnis malamike minaci lin, per sovaĝa siblado aŭ moka muĝado; la malvarmega roko, sur kiu li staris, ŝajnis ataki liajn piedojn per akraj doloroj. Lia spirado iĝis dolora; li tuis, ĉiuj ostoj kaj artikoj doloris. Tamen, dum Arho staradis, staradis, antaŭ liaj okuloj la flava fajro, ne multe pli ol punkto, sed konstanta, briladis, briladis. Lia fidela maljuna amiko deĵoradis ĉe la fajro tra la tuta nokto. Kaj iel tiu amika fajro fortigis la volon de Arho.

Finfine la suno leviĝis. Arho malsupreniris, malrapide. Li stumblis, ŝanceliĝis, kelkfoje falis; sed finfine li estis denove antaŭ Haptom-Haseo.

Haptom-Haseo miris. Li venigis la kvar servantojn, kaj demandadis al ili tre detale pri ĉio. Sed la servantoj konfirmis, ke vere ili forportis ĉiujn vestojn, ke vere Arho staradis sur la monto sen vestoj, kovriloj, manĝaĵoj, trinkaĵo aŭ fajro.

Haptom-Haseo ne povis ne admiri la kuraĝon kaj fortan volon de Arho.

“Nu, vi vere estas bravulo! Diru al mi, kiel vi sukcesis?”

“Mi rigardis la lumon de fajro sur alia monto.”

“Do, vi havis fajron! La kondiĉoj de la veto malpermesis fajron! Do, vi malvenkis, kaj vi devos daŭre vivi kiel servanto.”

“Sed la fajro brulis ĉe la alia flanko de la valo — ĝi tute ne povis varmigi min.”

“Fajron vi havis.”

Arho do trasuferis tiun preskaŭ mortigan nokton vane. La kapricema mastro eĉ ne proponis al li varman trinkaĵon aŭ ian etan donacon. Li revizitis sian fidelan amikon.

“Iru al nia juĝisto,” la amiko konsilis.

Tion Arho faris. La juĝisto vokis Haptom-Haseon kaj postulis klarigon. Sed, kvankam la juĝisto estis honesta, kaj intencis esti justa, li kutimis pensi laŭ jurista maniero, kaj verdiktis, ke

Haptom-Haseo pravis; inter la kondiĉoj de la veto estis la manko de fajro; Arho rigardis fajron; tial li ne tute plenumis la kondiĉojn.

La maljunulo konsolis Arhon.

“Ekzistas saĝo ekster la juĝejo. Eble mi povos fari ion por vi.”

Dum Arho laboris kiel servanto, kun membroj ankoraŭ dolorplenaj, la maljunulo vizitis bonkoran riĉulon, kiun li konis; ties nomo estis Hailo. Ili interkonsiliĝis, kaj Hailo promesis, ke baldaŭ io okazos, kio probable bone efikos.

Poste Hailo sendis invitojn al diversaj eminentuloj, veni al festeno ĉe li. Inter la gastoj estis Haptom-Haseo kaj la juĝisto.

Tagmeze, la riĉaj gastoj alvenis por festeno. Ili rajdis sur muloj; iliaj servantoj akompanis ilin piede kaj konstante prizorgis ilin. La riĉuloj havis luksajn vestojn, orajn ĉenojn, multkolorajn juvelojn; eĉ la muloj havis selojn el la plej bona ledο, kun oraj ornamaĵoj. Haptom-Haseo havis la plej multajn servantojn — du-dek; unu el ili ŝirmis la mastron per silka ceremonia sunombrelo. Tamburistoj per komplikaj ritmoj anoncis lian alvenon.

Hailo bonvenigis ilin ĉarme kaj sidigis ilin en la granda ĉambro. Molaj estis la tapiŝoj; ĝentila kaj interesa estis la konversacio; belaj estis la multaj ornamaĵoj. El la kuirejo venis apetitveaj aromoj de spicoj, kaj multaj aliaj agrablaj odoroj. La gastoj atendis la pladojn, kiujn ili flaris: kapridojn, kiujn oni rostis kun riĉaj farĉoj; maizon, kiun oni preparis laŭ diversaj luksaj stiloj; sorgo-kaĉon; specialajn adisabebajn patkukojn; kaj multajn bonegajn saŭcojn el kostaj spicoj kaj delikataj herboj.

Sed la gastoj longe atendis.

Pasis du horoj, tri horoj; daŭre venis el la kuirejo la apetitveaj odoroj.

La gastoj estis eminentaj personoj, kiuj kutime kondutis laŭ ĝentila etiketo; unue, ili nur iom flustris unu al la alia; sed pasis kvara horo kaj kvina, kaj finfine unu el la tre malplenaj eminentuloj, kiu sciis nenion pri la afero de Arho, permesis al si demandon.

“Honorinda Hailo,” li demandis, “kial vi traktas viajn gastojn tiel strange? Kial vi invitis nin al festeno, sed proponas al ni nenion por manĝi?”

“Nenion por manĝi? Ho, honorindaj sinjoroj, kiel terure! Sed ĉu miaj kuiristoj ne kreis konstantan fluon de la plej luksaj odoroj? Ĉu vere vi ne flaras la multajn bonajn odorojn?”

“Jes ja, honorinda Hailo; sed flari tute ne estas manĝi. Ni ne povas nutri nin per odoroj!”

“Do,” respondis Hailo, “ĉu iu povas varmigi sin ĉe fajro, kiun li nur vidas malproksime? Se fajro sur alia monto varmigis Arhon dum li staris nuda sur la monto Intoto, odoroj el mia kuirejo nutras miajn gastojn.” Kaj li rakontis la tutan historion.

Ĉiuj gastoj konsentis, ke Arho plenumis la kondiĉojn. La juĝisto konfesis, ke li eraris, Haptom-Haseo sentis honton pro sia kruela kaprico, dankis Hailon pro valora leciono, kaj tuj donacis al Arho terenon, domon, bestojn kaj ilojn.

Arho ege ĝojis. Ankaŭ ĝojis ĉiuj gastoj, ĉar Hailo vokis siajn servantojn, kaj ili portis al la gastoj ĉiujn pladojn de neforgesebla festeno.

Festenoj

La plej grandskala festeno, pri kiu fakuloj havas fidindajn informojn, okazis en 1900, kiam la tiama prezidento de Francujo invitis al Parizo ĉiujn francajn urbestrojn kaj vicurbestrojn. Entute 22 295 gastoj ĉeestis.

Oni kredas, ke en 1730 ĉirkaŭ 30 000 gastoj ĉeestis armean festenon, kiun aranĝis la tiama reĝo de Pollando, Aŭgusto la Dua.

La plej granda festena plado en la mondo estas beduena fest-kamelo. La beduenaĵoj metas malmolajn ovojn en fiŝojn; tiujn fiŝojn en kokinojn; poste la plurajn kokinojn en la tutan korpon (kiun ili jam rostis) de ŝafo; kaj finfine puŝas la ŝafon en la kamelon, kiun ili antaŭpreparis, kaj rostas la kamelon. Ne ĉiutaga recepto!

En Usono, por diversaj specialaj aranĝoj, oni iam bakis kukon, kiu pezis 31,69 tunojn metrajn, kaj enhavis ĉirkaŭ 120 000 ovojn (1976); fritis patkukon kies diametro estis 3,65 metroj (1975); kaj preparis salamon 5,74 metrojn longan (1978). En Anglujo dudek unu kuiristoj kune fritis gigantan omleton, kiu enhavis 11 145 ovojn (1979); kaj en Aŭstralio oni bakis panon 208,6 metrojn longan (1978).

Ankoraŭ ekzistas multaj mondopartoj, kie neniu vivas longe, pro manko de adekvataj nutraĵoj.

Pli bone baki rekordajn kukojn ol fabriki rekordajn kanonojn; kaj omletojn eĉ gigantajn neniujn preparas pro malico. Tamen, ĉiu, kiu havas superfluan, eble havas ankaŭ devon, pripensi, kion li aŭ ŝi povas fari, por helpi tiujn, kiuj ne havas sufiĉon. Jen temo por diskutado.

Novaj Proverboj

La terglobon bone ĝuu; sed respektu, ne detruu.
Ne gravas haŭtkoloro; gravas manoj, cerbo, koro.
Pli glorie sekigi vangon, ol fluigi sangon.
Vi ne disponas oron; donu almenaŭ floron.
Eĉ libero ne benas, dum ventro malplenas.

Versareto — pri la Refleksivo

Li lavas sin facile, en izolo.
Li lavas lin; sed nur laŭ ties volo.
Ŝi manĝas sian pomon — nu, anĝele;
Ŝi manĝas ŝian pomon — hu, ĉu ŝtele?
Trankvile sian manĝon ŝi digestas.
Digesti ŝian — la eblec' malestas!
Li pinĉas sin — eble vigligas sangon.
Li pinĉas ŝin — ŝi frapas lian vangon!
Sin regi estas ofte tre necese.
Aliajn ofte regas ni ekscese.
Noblecon de la sinofero vidu:
Lin ne oferu; li por si decidu.
Al ni ni gravas; sciu ni sen ĝem'
Ke ankaŭ ĉiu gravas al si mem.

Mesaĝoj al Aliaj Planedoj

Homoj sur la Tero jam sendis mallongajn mesaĝojn, kiuj eble iam atingos iajn *iojn*, kiuj loĝas sur alia planedo ekster nia propra suna sistemo.

Kvankam ni esperantistoj jam scias, ke la problemoj pri komunikado inter homoj diverslingvaj havas tre simplan solvon, la problemoj pri komunikado inter teraj homoj kaj aliplanedanoj eble neimageble malsimilaj al ni estas multe pli malfacila. Kvankam Esperanto, pro sia logikeco, ŝajnus la plej taŭga lingvo, eble tiuj *ioj* tute ne havos la koncepton de vorta lingvo. Sciencistoj do pripensas simbolojn ne-vortajn.

En marto 1972, usonaj sciencistoj lanĉis spacveturilon, *Pioniron-10*, kiu neniam revenos al nia suna sistemo; ĝi ekveturis je rapideco de po 51 682 kilometroj ĉiuhore. Sekvis ĝin *Pioniro-11*; ambaŭ direktiĝis al Jupitero. Post Jupitero, tiuj du spacveturiloj eble vagos ie en la universo, dum milionoj da jaroj. Se iam iu inteligenta estaĵo trovos unu el tiuj veturiloj, li, ŝi, ĝi, "gei", "x-i" — ĉar ni ne povas koncepti, kia ĝi estos — trovos sur ĝi kelkajn diagramojn, kiuj iom klarigos pri nia suna sistemo kaj la vojaĝo de tiu Pioniro, kaj du desegnojn — pri teraj viro kaj virino.

En 1974 sciencistoj sendis tri-minutan radiomesaĝon en la direkto de stelaro, kiu konsistas el ĉirkaŭ tricent mil steloj, en la konstelacio Herkulo. La sendilo estis la granda radioteleskopo en Portoriko. Per speciala aranĝo de radiopulsoj, la sciencistoj sendis mesaĝon, per kiu, espereble, inteligenta eksterterano povos krei piktogramon, kiu donos kelkajn bazajn informojn pri la Tero: niaj ciferoj, la kemio de la tera vivo, formo de homo, nia suna sistemo kaj nia loko en ĝi, kaj la portorika radioteleskopo mem. Ordinara tera homo, kiu vidus tiun piktogramon, ne komprenus, pri kio temas; kredeble nur eksterterano, kiu estus mem sciencisto sia-speca, komprenos ĝin.

Ĉu iam teranoj kaj eksterteranoj povos do ĝui ian korespondadon, per diagramoj, radiopulsaj piktogramoj, aŭ alimaniere?

Laŭ niaj ĝisnunaj scioj, verŝajne ne. La konstelacio de Herkulo estas distanca de la Tero je dudek kvar mil lumojaroj. Nur per lumojaroj astronomoj povas preparoli tiajn distancojn; kaj lumojaro estas la distanco, kiun lumo trairas dum unu jaro. Tio estas

9 460 530 milionoj da kilometroj. Se la portorika mesaĝo atingos
ian eksterteran inteligentulon, estos post dudek kvar mil jaroj. Se
li, ŝi, ĝi, x-i respondos tuj, la respondo alvenos ĉirkaŭ la tera dato...
50 000 p.K.

8. UNUJAJ PLUMAMIKOJ [1]

Por multaj, kiuj studas Esperanton, la unua praktika uzado, kaj la unua plezuro post la intelekta plezuro de lernado, estas korespondado. Esperantisto povas, relative frue, ĝui la plezurojn de “plum-amikeco”, kaj trovi amikojn en multaj landoj, kun kiuj personaj kontaktoj estus alie neeblaj.

Kelkaj konsiletoj eble helpos.

Estas bone, ekkorespondu frue; korespondado estas ekzercado lerniga; en natura situacio, ĝi tre bone atestas la efikan funkciadon de Esperanto, ne nur al la post-komencanto, kiu ricevas la leterojn, sed al ties parencoj, geamikoj, kolegoj — eble al mokintoj kiuj devos tiam konstati, ke la ridinda lingvo fakte meritas seriozan atenton.

Tamen, ne ekkorespondu tro frue. Pomo tute nematura ne gustas bone. Foje, du komencantoj interŝanĝas kelkajn leterojn, en ‘Esperanto’ tiel malbona, kripla, konfuza, ke ili apenaŭ komprenas unu la alian. La tipaj eraroj de, ekzemple, francaj lernantoj ne similas al la tipaj eraroj de japanaj, tiel ke unu fuŝanto ne facile divenas la intencon de la alia. Leteraĉoj en ia ‘Fuŝperanto’ tre eble seniluziigos la korespondantojn. Kaj se nur unu el la du korespondantoj estas nekompetenta — nu, eble iu aparte afabla kaj ankaŭ instruema ricevinto pacience kaj amike helpos la fuŝinton ellerni la novan lingvon; sed pli probable, la letero tre agacos la ricevinton, aŭ eĉ fornaŭzos lin de Esperanto.

Do, se vi deziras korespondu, unue lernu Esperanton! Lingvo-lernado neniam finiĝas; ni ĉiam povas plibonigi nian scion, eĉ de la propra nacia lingvo; sed tiom lernu, ke vi plene posedas la bazan gramatikon kaj ĉiutagan vortostokon, kaj ĝuste konstruas viajn frazojn. Ne timu, ĉar via stilo devas esti tre simpla ankoraŭ; pli bone skribi naive simple, ol tiel komplike, ke la alia ne komprenas vin! sed via simpla stilo estu normala Esperanto. Ekzemple, korespondemulo, kiu ankoraŭ ne regas *ke*, aŭ *kiu*, aŭ *igi* kaj *iĝi*, aŭ la ordina-

ran objektan akuzativon, pasigu ankoraŭ kelkajn horojn, ne skribante leterojn apenaŭ kompreneblajn, sed studante la lingvon.

Kompare kun kredeble ĉiuj aliaj lingvoj, Esperanto estas mirinde facila kaj fleksebla. Sed ni devas serioze lerni ĝin! Ĝuste tiuj reguloj, kiuj limigas ĝian flekseblecon, ebligas ĝin.

Sed vi sentas vin preta, korespondi. La unua problemo estas: kiel trovi taŭgan korespondanton?

Ofte, instruisto helpas siajn lernantojn aŭ ekslernantojn trovi taŭgajn plum-amikojn, aŭ iu aranĝas ion en la kadro de loka societo. Se ne, la ĉefaj eblecoj estas: la *Koresponda Servo Mondskala* de UEA, kaj la anoncetoj en gazetoj.

La Korespondan Servon oni nepre uzu nur laŭ la reguloj, kiujn vi trovas en la Jarlibro de UEA. Ne estas afero de pedantaj burokratoj; sed saĝaj administrantoj normigas procedojn por pli efike kaj ekonomie helpi.

Neniam petu ordinaran plumamikan korespondadon, aŭ serĉadon de korespondanto, de iu konata esperantisto, kiu faras gravajn laborojn por Esperanto: de komitatano de UEA, nacia asocio, aŭ alia organizo, eĉ de delegito de UEA; de akademiano, verkisto, vojaĝanta preleganto, eminenta fakulo, aŭ de aliaspecaj personoj kun similaj altnivelaj devoj. Iliaj okupoj estas jam sufiĉaj (kaj plej ofte senpagaj). Ili bone konas siajn proprajn laborkampojn, sed tre eble ne tiun kampon, sur kiu vi deziras rikolti; kaj eĉ se pro bonkora komplezemo ili helpos vin, tiu helpo uzos tempon, kiun ili pli utile dediĉus al specialistaj taskoj, kiujn nur ili povas fari.

Kaj, kompreneble, neniam trudu korespondadon al tiuj, kiuj ne deziras ĝin. Ekzemple, iu, kiu anoncas en gazeto, ke li kolektas informojn pri la vitro-industrio en diversaj landoj, ne serĉas plum-amikojn; li serĉas fakajn informojn.

Elektante korespondanton inter la anoncetoj en gazetoj, ne atendu, ke ĉiu pafo perfekte trafos. Nespertaj plum-amikoj, precipe inter lernejoj, ofte ne persistas; du bonintencaj homoj povas post kelkaj leteroj konstati, ke ili ne taŭgas unu por la alia; iu verŝajne deziras korespondi, nur por propagandi pri io, aŭ ekspluateti iun. Atendu kelkajn etajn fiaskojn; la sukcesoj povas tamen esti tre kontentigaj. Kaj se vi mem trovas, ke vi preferas ĉesigi ian korespondadon, normale la ĝentileco postulas, ke vi pri tio informu vian korespondanton, por ke li aŭ ŝi ne demandadu al si kio okazis,

aŭ perdu tempon kaj poŝmarkojn, plurfoje reskribante al vi. Oni ne havas absolutan devon skribi pri la kialo; ekzemple, ne necesas skribi, “Viaj leteroj estas tute tedaj kaj ofte fuŝaj...” sed estas dece, almenaŭ skribi ian ekskuzon.

Plum-amikeco inter du esperantistoj tamen ofte evoluas en vere firman, belan, vivriĉigantan amikecon; eĉ foje en intiman amon, kiu kondukas du geesperantistojn al geedziĝa ceremonio. Pri la evoluado de amikeco kaj amo, neniu povas aŭ rajtas multe instrui; ni homoj multe varias, niaj kriterioj kaj personaj bezonoj varias. Estas nur pri la komencaj stadioj de plum-amikeco, ke oni povas konsili.

Ne forgesu, ke via nova korespondanto probable ne scipovas vian nacian lingvon, kaj ne komprenas adreson, kiel samlandano tuj komprenas ĝin. Por multaj, ekzemple arabo, birmano, ĉino, greko, ruso, eĉ la facila esperanta alfabeto estas, komence, tre fremda. Do, se vi deziras respondon, skribu vian adreson perfekte klare, ankaŭ vian nomon. (Kredeble la plimulto el ni ordinare subskribas niajn nomojn malpli legeble ol iun ajn alian vorton!) Kaj zorgu, ke la tuta letero estu facile legebla. Maŝinskribado estas tre bona; sed ne ĉiu posedas skribmaŝinon; kaj ne estas tre malfacile, akiri manskribon klaran.

Estas, kutime, saĝe, meti daton sur ĉiun leteron; datoj helpas nin decidi, kiam estas taŭge, respondi, kaj ankaŭ indikas, kiom da tempo letero bezonas, por vojaĝi de unu lando al la alia.

Estas ĉiam saĝe, relegi leteron, antaŭ ol vi metos ĝin en koverton. Ni homoj tre kapablas erari; eble vi ellasis iun “ne” kaj tiel skribis ĝuste la malon de tio, kion vi intencis; eble komo igos frazon pli klara; eble vi ellasis akuzativon.

Skribmaŝino skribas tre klare, sed ne ĉiuj el ni estas modelaj tajpistoj. Tre facile, sub nelertaj aŭ nur lacaj manoj, “baroj” iĝas “batoj”, “paco” iĝas “pavo”, “bazo” iĝas “nazo” kaj “helpu” iĝas “jelpu”. Ni ellasis esencan literon, tiel ke “poeto” iĝas “poto”, “ministro” iĝas “ministo” kaj “parto” iĝas “pato”; aŭ enmetas superfluan literon kaj skribas pri la greka “insultaro”, aŭ asertas, ke ni havas iom da mono en la “branko”, aŭ ke ni ĵus evitis akcidenton per longa kaj rapida “salato”. Ankaŭ forgeso pri supersigno povas lasi tre perpleksigajn frazojn, same kiel erara aldono de supersigno: registara kampanjo kontraŭ ŝtelistoj estas racia kaj utila, sed kon-

traŭ “stelistoj” sugestas, ke oni persekutas esperantistojn; deziri al iu saĝon en la kapo kaj senlaci iradon sur la vivovojo estas bona beno, sed “saĝon” en la kapo kaj “senlaci” iradon pli similas al malbeno nepre enhospitaliga.

Estas ankaŭ konsilinde, ofte kontroli pri la vortoj, kiujn ni uzas. Tre eta mismemoro povas kaŭzi konfuzon. Ĉu vere estis *avokado*, kiun via patro devis konsulti? Ĉu hieraŭ vespere vi vere vidis en la urba teatro amuzan *farçon*? Ĉu vere vi vidas *platenon* de via fenestro?

Konstante tenu en la menso bildon pri tiu malproksima korespondanto, kiu, male al samlanda instruisto aŭ grupano, ne povos el scio de via nacia lingvo diagnozi viajn erarojn. Do, nun estas pli grave, ne fari erarojn.

Vi certe devos foje uzi vortaron, ne nur por kontroli, kiel ekzemple pri *advokato*, *farso* kaj *platano*, sed por serĉi vorton, kiun vi ankoraŭ ne konas en Esperanto. Memoru, ke vortaroj povas misgvidi nin, se ni uzas ilin senpense. En multaj lingvoj ekzistas vortoj, kiuj havas plurajn signifojn; elektu la tradukon, kiu estas ekvivalenta al tiu senco, kiun vi celas. Ekzemple, en diversaj situacioj la ĝusta esperanta ekvivalento por la ĉiutaga angla vorto *mean* povas esti: “signifi – intenci – avari – malestiminda – meza – mezo – malaltranga – malica” kaj havas aliajn specialistajn aŭ arkaikajn sencojn. Videble, la elekto de la ĝusta senco gravas.

Zorgu ankaŭ pri tiel nomitaj «falsaj amikoj»: vortoj, kiuj sonas aŭ aspektas tre similaj al esperantaj vortoj, sed ne signifas same. Al franco *napo* eble sugestas “tablotuko” (*nappe*); al anglo “dormeto” (*nap*); al italo “pokalo” (*nappo*); al hungaro “tago” (*nap*); sed esperante, *napo* estas planto, kies radikon oni manĝas. Do, ni ne konjektu; ni kontrolu. Tiu ruso, kiu skribis al anglino, “Gladu vian katon por mi”, faris tre strangan impreson; ĉu li vere estas tiel kruela? Sed li intencis skribi “Karesu”; la rusa vorto *гладить* signifas *gladi* kaj *karesi*.

Alia kaŭzo de miskompreno estas, ke la alilandano eble ne kaptas kelkajn aludojn, kiuj dependas pli ol ni mem konscias, de la kulturo kaj kutimoj de nia lando. *Sabato*, kvankam ĝi havas la saman kalendaran signifon ĉie, enhavas tre malsamajn bildojn por hebreo (sankta tago), brito (ferio, eble kun ia matĉo aŭ drinka festo) kaj orienteŭropano (eble specialaj kolektivaj civitanaj krom-

laboroj). Hispano, kiu plendas al japano, “kaj ni devis sidi sur la planko...” ne multe sugestos la mallukson kaj mankon de gastamo, kiun li volas sugesti, ĉar japanoj multe malpli ol eŭropanoj uzas seĝojn. Ĉiu minimume klera anglo scias ion pri la angla reĝo Henriko la Oka, ĉiu minimume klera peruano scias ion pri Simon Bolívar; sed aludo al Bolívar eble ne signifas multon al la anglo, kaj komparo al Henriko la Oka eble ne signifas multon al la peruano; dum nek unu nek alia tre helpus klarigi ion al simpatia ĉino, kiu eble estas la sola el la tri, kiu komprenas aludon al Li Po.

Memoru ankaŭ, ke ĉar moroj malsimilas en diversaj landoj, tio, kio al skribanto en unu lando estas normala, eble ŝokos leganton en alia. “Mi kisas viajn manojn” estas por hungaro ordinara ĝentilaĵo, normala ĉe la fino de letero; en alia lando ricevintino povas kompreni ĝin kiel am-deklaron; kaj en kelkaj landoj ĝi ŝajnus eĉ maldeca. Tra la mondo sintenoj povas tre varii pri, ekzemple, ŝercoj pri seksaj situacioj; aludoj al drinkado; la devoj de familianoj kaj sankteco de la familio; religiaj kaj politikaj konceptoj; kriterioj pri necesaj kaj luksaj, riĉeco kaj mizero. Ni celas interkomprenadon; ne nur nia lingva lerteco, sed nia takto, helpu ĝin.

Necesas lasta averto; kaj hontiga al ni homoj estas tia neceso. Ekzistas ŝtatoj en la mondo, kie homoj ne rajtas kritiki ŝtatestrojn, aŭ interŝanĝi kun alilandanoj informojn, kiuj al la plimulto da registaroj ŝajnas tute neŭtralaj kaj malgravaj; aŭ diskuti pri diversaj aferoj religiaj, aŭ kontraŭreligiaj, aŭ politikaj, aŭ filozofiaj, aŭ seksaj; aŭ ricevi presitaĵojn, kiuj en aliaj landoj ŝajnus senofendaj. Sub unu registaro, ricevinto de modera teoria studaĵo pri marksismo tuj iĝas suspektinda persono, kaj eble ege suferas. Sub alia, oni ne enlasas komercan katalogon pri ordinaraj vestoj kaj mastrumiloj, ĉar ĝiaj indikoj pri viv-nivelo ebligus malkontentigajn komparojn; aliaj registaroj malpermesas ion ajn, kio kontraŭas la instruojn de la Biblio aŭ la Korano (laŭ ies interpreto, ne ĉiam ĉies); bildoj, kiuj laŭ la opinioj de multaj estas noblaj artverkoj, ne rajtas eniri certan landon, kie la regantoj kredas, ke tiaj bildoj venenos kaj dekadencigos nacian kulturon ... kaj tiel plu.

Kion ajn ni opinias pri tiaj aferoj, estas nepre nia devo, ne kaŭzi ĝenojn, kaj eble katastrofon, al alia persono. Kia tragedio, se naiva, bonintenca, nur senkulpe senatenta korespondanto, per eta

ago en si mem ne malbona, puŝus alian senkulpan homon el posteno, aŭ en malliberejon, aŭ eĉ en ĉerkon, tre eble pro opinioj kiujn li aŭ ŝi eĉ ne havas!

Do, se vi trovos korespondanton en lando, kies registaro lasas al siaj ŝtatanoj kelkriate malpli da libereco, ol via registaro permesas, vere zorgu, ke vi ne kompromitu tiun amikon per viaj opinioj aŭ per netaŭgaj sendaĵoj. Tiu devo de singardo ja limigas niajn eblecojn de profunda interkompreno; sed ĉiu amika kontakto espereble faras ion, por malpliigi la malamon kaj suspektojn en la mondo; kaj neniu registaro daŭros poreterne.

La supraj konsiloj ŝajnos plejparte nur negativaj avertoj. Baldaŭ sekvos pli interesaj konsiloj.

Versareto pri Korelativoj [4]

Malvarma estas ĉia neĝo;
homoj bezonas akvon, ĉie;
kaj ĉiam, laŭ natura leĝo,
iom eraras ni, nescie.

Ĉiom da mono en ĉiuj bankoj
ne kontentigus avarulon;
Modesta hom' pri etaj mankoj
evitas plendon kaj postulon.

Ne ĉies haroj brilas kupre;
ne ĉies frazoj estas fortaj;
sed ĉies kap' situas supre,
ĉies paroloj estas vortaj.

Pro amo, mono, aŭ renomo,
Ĉial, ni penas, pelas, puŝas,
sed ion, iam, ĉiu homo,
ĉiel strebante, iom fuŝas.

Ĉiu ne povas ĉion fari,
nek ĉiam gajni, venki ĉie;
ne provu ĉion akapari,
sed vivu ne tro ambicie.

Bela Diro pri Instruado

“Tiu, kiu lernas de iu ankoraŭ lernanta, trinkas el rivereto fluanta. Tiu, kiu lernas de iu, jam lerninta ĉion, kion li instruos, trinkas la verdan kovraĵon de stagna lageto.”

A.J. SCOTT (brito), unua direktoro de la kolegio, kiu poste iĝis la universitato de Manĉestro.

Ekster Fabriko

Ni deziras dungi plurajn JUNULINOJN por paki fiŝojn (ĉ. 16-jarajn)

Novaj Proverboj

Kiu tro certas pri sia vero, kreas inferon sur la tero.

Timigu min, kaj mi obeos honte; konvinku min, kaj mi obeos volonte.

Ne portu sablon al Saharo aŭ kariofilojn al Zanzibaro.

Vizitante poluson, ne serĉu lotuson.

Kiel Difini Malsaĝon?

Multaj popoloj havas amuzajn frazojn, kiuj indikas, ke iu ne estas tre saĝa aŭ inteligenta. Zuluoj diras, “Oni sendis lin por tabako kaj li revenis kun medikamentoj.” Bengaloj diras, “Havante buŝon, li manĝas rizon per la nazo.” Angloj diras, “Li ne havas sufiĉan saĝon, por enveni el la pluvo.” Inter malnovaj eŭropaj fantazioj troviĝas: “Li tajloras vestojn por fiŝoj.” – “Li metas ĉapelon sur kokino.” – “Li serĉas lanon sur azeno.” aŭ “Li tenas spegulon por talpo.”

Oni povas pripensi novajn esprimojn tiajn; jen kelkaj specimenoj: “Li irus al la Centra Oficejo de UEA por aĉeti gantojn por simio.” – “Ŝi ne scias la diferencon inter akuzativo kaj akuŝistino.”

– “Li premas testudojn por fari limonadon.” – “Tiu familio kurtenus siajn fenestrojn per patkukoj.”

Jen konkurso por distra horo ĉe loka societo. Oni povas havi malmultekostan premion, kiel ekzemple saketon da dolĉaj punktoj, aŭ kuleron el gelateno...

9. FABELOJ EL AŬSTRALIO

Aŭstralio estas la plej granda insulo de la mondo; sed preskaŭ la duono de la lando estas pli-malpli dezerta kaj subtenas malpli ol dudek mil el la preskaŭ dek kvar milionoj da aŭstralianoj. Aŭstralio estis unu el la lastaj teritorioj, kiujn blankuloj koloniis; nun la aŭstralia nacio havas prosperajn industrion kaj agrikulturon. La lando havas aparte interesajn bestojn kaj plantojn; inter bestoj indiĝenaj nur en Aŭstralio estas la kanguruo, la koalo kaj la ornitorinko; inter la plantoj estas multaj specioj de eŭkalipto kaj akacio.

La aŭstraliaj indiĝenoj tragike pereis en Tasmanio (sud-orienta insulo) dum pioniris koloniado de la deknaŭa jarcento; aliloke en Aŭstralio restas ĉirkaŭ cent mil. La plimulto ankoraŭ vivas laŭ primitiva vivostilo, plejparte en la mezlandaj veprejoj, aŭ protektitaj en rezervejoj. Sed inter ili jam aperis unu renoma artisto, Albert Namatjira (1902–59), tre estimata pentristo kaj lignoskulptisto, kaj nobla, sentema homo, kiu multe suferis inter du tre malsimilaj vivostiloj, kaj verŝajne multe helpis vekti la konsciencojn de la blankuloj pri la problemoj de la indiĝenoj. Ĉirkaŭ li aperis tuta skolo de indiĝenaj artistoj, inter kiuj Corduba Abaratinja estis la unua indiĝenino, kiun oni rekonis kiel meritplenan artistinon.

Alia indiĝenino, kiu gajnis mondfamon, estas Evonne Goolagong, s-ino Cawley, brila tenisa ĉampionino. Lionel Rose estis mondĉampiono boksa je sia pezoklaso en 1968. Douglas Ralph Nicholls iam estis fama indiĝena atleto, poste turnis sin al politiko kaj iĝis ŝtatestro de Suda Aŭstralio.

Tiuj aŭstraliaj indiĝenoj, kiuj preferas pli primitivan vivostilon, havas propran interesan folkloron, kaj multajn fabelojn, kiuj spegulas ilian vivon tre proksiman al la naturo. Inter ĉi tiuj fabeloj troviĝas kelkaj kortuŝaj kun poeziaj ecoj, kaj kelkaj humuraj, kvankam la humuro estas iom nigra. Jen ekzemploj:

La Ruĝflugila Papago

La gepatroj promesis Bilai al Gubi, kiu estis aĝa kaj malafabla. Bilai amis junulon; ankaŭ li amis ŝin. Bilai insistis, ke ŝi ne volas aparteni al Gubi. La gepatroj insistis, ke laŭ la promeso ŝi devos iri al ties arboŝela ŝirmejo.

Finfine ŝi devis diri al la amanto, ke morgaŭ oni donos ŝin al Gubi, kaj ŝi devos iri al lia arboŝela ŝirmejo.

Ŝia amanto kuraĝigis ŝin.

“Diru nenion al la gepatroj; atendu, ĝis ĉiuj dormos; tiam, venu sekrete al mi kaj ni forkuros kune. Mi mem diros baldaŭ, ke mi iras por ĉasi kaj ne revenos ĉi-nokte. Ni forkuros kune, sub la lumo de la luno, malproksimen tra la veprejo, kie Gubi neniam trovos nin.”

Bilai konsentis. Dum ĉiuj aliaj profunde dormis, ŝi ŝteliris al la sekreta rendevuo; kaj la junaj geamantoj tuj forkuris kune, eĉ tra la plej nigra mallumo, ne atendante la levigon de la luno. Dum la nokto, dum tuta tago poste, ili rapide foriris. La duan nokton, ili trovis larĝan riveron, kaj forlasitan kanuon; do, ili facile transiris la riveron, kaj pensis, ke iu, kiu sekvas ilin, ne facile transiros.

Ili ĝojis; ili ekripozis; ili manĝis. Sed venis subita ŝtormo; granda muĝanta vento, timigaj fulmoj. Gubi estis konata kiel potenca sorĉisto, kaj Bilai tre timis, dirante, ke li sendis tiun ŝtormon por ŝin mortigi; sed ŝia amanto ridis, kaj diris, ke la veprejoj spiritoj kreis ŝtormon, kiu forlavis iliajn spurojn.

Meze de fulmoflavo aperis du okuloj plenaj de malamo. Tondregis.

“Ni mortos!” Bilai kriis; “la fulmego mortfrapos nin!”

Sed la amanto konsolis ŝin: “Ni estas sekurigitaj kontraŭ fulmo; kiam ni estis etaj, niaj patrinoj metis sanktan glacieron sub niajn brakojn kaj ĉe niajn artikojn, ĉu ne?”

La fulmo ne mortigis ilin; sed meze de la fulmoflavo staris Gubi kun sia lanco; kaj per la lumo de la fulmo li pikmortigis la junan amanton. Bilai, ferminte la okulojn kontraŭ la fulmo, ne tuj komprenis, kio okazis; kaj dum ŝi hezitis, Gubi kaptis ŝin. Li forte tenis ŝin ĝis la ŝtormo forpasis; li piedbatis la kadavron de la amanto; li perforte devigis Bilai'n piediri al lia arboŝela ŝirmejo. Bilai ploris kaj lamentis, ĝis li senkonsciigis ŝin per granda bastonbato. Kiam ŝi

rekonsciiĝis, ŝi kuŝis jam en la ŝirmejo de Gubi, kaj li kuŝis apud ŝi, dormanta.

Bilai leviĝis senbrue. Ŝi eliris. Ŝi piediris al la sankta arbo de sia tribo. Tie ŝi derompis branĉetojn, kaj ligis ilin al la manradikoj, al la kubutoj, al la maleoloj, al la genuoj, ĉirkaŭ la talion, kaj ĉirkaŭ la kolon; kaj finfine puŝis malgrandan branĉeton en truon tra la naza dividilo. Kaj per sia ŝtona tranĉilo ŝi vundis la frunton kaj ŝultrojn. La sango fluis abunde sur ŝiajn brakojn. Tiel pretigite, ŝi kantis la mortokanton por sia amato.

La plorokrioj de Bilai baldaŭ vekis Gubi'n, kiu alvenis, kolera.

“Kiel mia edzino aŭdacas kanti kanton de vidvino por alia viro?”

“Mi ne estas via edzino; mi estas la vidvino de mia karulo, kiun vi mortigis.”

Kompreneble ni kutime neniam diras la nomojn de mortintoj; ili estas tabuaj, ĉar tiu, kiu diras nomon de mortinto, alvokas la mortinton. Sed nun Bilai pli kaj pli laŭte lamentis, kaj vokis per nomo la amaton, ke lia spirito venu al ŝi.

Ŝi lamentadis, ŝi laŭte vokis kaj vokadis. Gubi ege koleris, minacis ŝin, ordonis: “Demetu tiujn branĉetojn kaj revenu kun mi!”

Bilai levis la sangstrekitajn brakojn: “Preferu min mortigi.”

“Ne! mi nepre ne mortigos vin! Tiam via spirito retrovus la lian. Ne, vi devas vivi, vivadi kiel mia edzino. Mi trenos vin al mia ŝirmejo. Vi estas mia, kaj mi devigos vin ĝismorte vivadi kiel mia.”

Li etendis la manon por kapti ŝin; sed Bilai evitis lin. Subite malestis ia ajn virino. Ĉirkaŭflugis verda papago kun ruĝajflugiloj; kaj Gubi aŭdis spiritajn voĉojn, kiuj konsilis: “Flugu orienten; flugu rapide, kaj trafu vian amaton, antaŭ ol li atingos la sanktan monton de la mortintoj. Ankaŭ li alprenos papagan korpon, sed liaj plumoj estos eĉ pli brilkoloraj. Tiam vi povos vivi kaj ami sur via konata triba tero, sed vi naskos novan tribon, kiu portos vian nomon.”

Gubi muĝe kriegis pro kolero, sed Bilai tuj forflugis, super la sala veprejo, super la grizaj arbustoj, al la sankta monto. Pro timo, ke ŝi venos tro malfrue, ŝi angore kriis; kaj tiu raŭka krio ekde tiam restas la krio de la papaga tribo. Tamen, ŝi venis ĝustatempe; vok-

ite, la spirito de la amanto revenis; kaj ankaŭ li iĝis ruĝflugila papago.

Kiam ili revenis ĝoje al la triba tereno, la homaj tribanoj ne rekonis ilin, sed kredis, ke ili estas belaj birdoj el alia lando. Nur Gubi komprenis, kaj malĝoje kriis: "Jen Bilai!"

Tiel venis al nia lando la ruĝflugilaj papagoj, kaj tial ni nomas ilin *Bilai*.

Mokita Sorĉisto

Juna virino rifuzis edziniĝi kun potenca sorĉisto, sed edziniĝis al alia, kaj naskis plurajn filinojn. Sed kiam la filinoj estis jam viglaj knabinoj, venis tago, kiam ili vidis tiun saman sorĉiston; kaj ili mokis lin: "Via dorso estas kurba, kurba kiel la dorso de la emuo, kiu estas via totemo! Kiel malbela vi estas!"

La sorĉisto estis tiel ofendita, ke li sorĉe aliformigis ilin en ranojn.

Kiam ili ne revenis hejmen, la patrino timis, ke ili eble estas forŝtelitaj; sed pluvo forlavis ĉiujn spurojn. Tamen la patrino ekserĉis la knabinojn; eble ili konstruis ian ŝirmejon kaj intencis resti ŝirmitaj, ĝis la pluvo ĉesos. La patrino piediris longan distancon, kaj konstante vokadis la filinojn. Sed parolis al ŝi nur la oranĝ-kolora-kaj-blua skarabo, kaj nur per skaraba bleko.

Ŝi laciĝis, kaj iĝis malsata, do serĉis ion por manĝi. Ŝi sekvis spurojn de tunelo-ranoj, trovis iliajn tunelojn kaj elfosis kelkajn: belajn, grandajn ranojn, vere apetitigajn.

"Ha," ŝi diris, "mi manĝos tre bone."

La ranoj fiksrigardis ŝin kvazaŭ pete, kaj blekis kvazaŭ plore.

La virino decidis tuj manĝi ilin surloke; ĉar se ŝi portus ilin al la triba ŝirmejaro, aliaj dezirus partopreni. Do, ŝi komencis preni la ranojn; sed la ploraj blekoj kaj fiksaj rigardoj maltrankviligis ŝin.

"Estus freneze, forlasi tiel bonan manĝon. Kion signifas rana bleko?"

Sed kiam ŝi denove ekprenis ranojn, iel la blekoj ekŝajnis kiel vortoj: "Ne manĝu nin. Vi estas nia patrino. Ni estas viaj perditaj filinoj. La maljuna sorĉisto ŝanĝis nin en ranojn, ĉar ni mokis lin, kaj diris, ke lia dorso estas kurba kiel la dorso de emuo. Ho, vere vi devas ne manĝi nin!"

La virino kuris hejmen kaj trovis la sorĉiston.

“Ĉu vi ŝanĝis miajn filinojn en tiujn ranojn, kiuj nun blekas sur la veprejo?”

“Jes ja!” li respondis fiere.

“Ho, kial vi faris ion tiel kruelan? Kial vi lasos min maljuniĝi, sen filino, kiu prizorgus min?”

“Ĉu vi ne elektis ilian patron, preferinte lin al mi? Kiel ĝenu min via malfeliĉo? Petu al tiu, kiun vi preferis al mi, rehomigi ilin. Kiel diris viaj filinoj, mi estas kurbdorsa, kiel mia totemo la emuo. Nu, eĉ pro insulto al mia totemo, kiu estas motivo por milito, mi ne atakos vin. Mi nur ŝanĝis viajn filinojn en ranojn, kies voĉojn neniu atentis, tiel ke ili ne moku plu. Do, ino, manĝu ilin; ranoj estas frandaĵo.”

“Ho ve, ĉu patrino manĝu siajn idojn? Mi ne manĝos ilin — sed iu alia trovos ilin kaj manĝos ilin. Ho, savu ilin, savu ilin; resanigu ilin, tiel ke neniu povos manĝi ilin. Mi promesas, ke neniam plu ili mokos emuon. Kaj mi mem venos humile al via arboŝela ŝirmejo por ĉiam.”

“Fi! Kial mi konduku al mia ŝirmejo inon aĉan kaj maljunan, kiu ne venis al mi juna?”

“Ho, mi petegas vin, reŝanĝu ilin, ho, ŝanĝu ilin tiel ke neniu manĝu ilin. Mi donos al vi la sorĉoŝtonon de mia prapatro; mi fordonacos ĝin por ĉiam. Se mi fordonos ĝin al vi, nur vi povos sorĉi per ĝi, ĉar kiam alia persono tuŝos ĝin, ĝi gruntos. Tre valora ĝi estas, la sola ŝtono, kiu havas voĉon.”

“Donu al mi tiun sorĉoŝtonon, do, kaj mi sincere promesas, ke mi ŝanĝos viajn knabinojn, tiel ke neniu manĝos ilin.”

La patrino alportis la prapatran sorĉoŝtonon kaj demetis ĝin antaŭ la piedoj de la sorĉisto. Ĝi gruntis. Poste ĝi ĉesis grunti, ĉar ĝi iĝis lia.

“Bone!” diris la sorĉisto. “Iru, kaj trovu viajn filinojn. Mia promeso estas jam plenumita. Jam ili estas tiaj, ke neniu manĝos ilin.”

Ĝoje la patrino foriris. La sorĉisto sidis tie, kun la sorĉoŝtono en sia sako, kaj daŭrigis sian taskon; li skulptis ion sur bumerango, per akra dento de didelfo. Kaj li silente ridetis.

La patrino sekvis siajn proprajn spurojn al la loko, kie ŝi elfosis la ranojn; sed kiam ŝi atendis revidi siajn filinojn, ŝi vidis nur... ankoraŭ, grandajn ranojn.

“Ho, ve, ve, ve! Filinoj, ĉu mi ne revidos vin en homa formo?
— Sed ĉi-foje la ranoj neniel blekis aŭ reagis.

Ŝi prenis unu el ili en la mano.

Peza kaj malvarma estis la rano, kaj ja neniue manĝus ĝin; ĝi estis ŝtono. Ĉiuj filinoj estis ŝanĝitaj en ŝtonajn ranojn, kelkajn tute grizajn, la ceterajn kun verdaj strioj; sed ĉiuj en ŝtonojn. Iam filinoj; nun por ĉiam ŝtonaj ranoj.

Novaj Proverboj

Malfacila amiko estas histriko.

Pli valoras sana fingro ol eĉ diamanta ringo.

Dum Petro pri malriĉo plendas, Paŭlo serĉitajn nuksojn vendas.

Li ne haltigis la militon; sed lerte pansis li vunditon.

Versareto pri la Akuzativo de Direkto

En la ĝardeno reve sidis ŝi,
en unu mano tenis timianon;
en la ĝardenon arde kuris li,
kaj premis florojn en l'alian manon.

Dum birdoj sur la arboj kantis trile,
orfiŝoj ĉirkaŭ la fontano naĝis,
la ĉapon sur arbeton li humile
demetis, al la kara li omaĝis;
fiksitis kolĉenon ĉirkaŭ ŝian kolon;
sur tiu ĉeno pendis gemo blua;
“Ne de sklavigo montras mi simbolon,
sed de geedza unuopo dua.”

Inter la rozarbustoj ili vagis,
ambaŭ parolis ame kun sincer' en
la koroj; estontecon ekimagis;
la spica timiano falis teren.

Nur najbarin' klaĉema ŝovis kapon
inter kurtenojn, pala pro envio,
por ili deziregis sortofrapon,
ĉar ŝin ofendis ĉia ĝojradio.

Bonhumoraj Maljunulinoj

(1) En la urbo, kultura organizo volis aranĝi ekspozicion pri diversaj objektoj de la deknaŭa jarcento. La aranĝantoj do anoncis, ke je certa tago iu ajn kiu havas valoran, interesan objekton, kiu datiĝas de tiu jarcento, rajtos montri ĝin, kun klariga karto, en halo en la ekspoziciejo. Premion ricevos tiu, kies objekto estas la plej interesa.

Multaj alportis arĝentaĵojn, florvazojn, broditajn tukojn, interesajn malgrandajn meblojn, malnovajn ĵurnalojn, rarajn librojn, dokumentojn, antikvajn ilojn; sed la premion, unuanime, la aranĝantoj aljuĝis al tiu ĉarma sinjorino, iom artrita, arĝenthara, kies inteligentan vizaĝon liniis multaj sulketoj, kaj sur kies brusto troviĝis karto kun nur unu klariga vorto:

MI

(2) Alia arĝenthara bravulino sukcesis en 1935 ĉe festo, kien oni invitis ĉiujn veni en kostumoj, kiuj reprezentos la titolon de konata libro. Neniu divenis, kiun reprezentis la okdekjara ĉarmulino, kiu portis sur la brusto grandan fotiĝon de pluraj beboj. Ŝi mem devis klarigi, ke temis pri tiutempe furora kontraŭ-faŝisma romano de la usona romanisto Sinclair Lewis, *Ne Povas Okazi Tie Ĉi*.

10. UNUJAJ PLUMAMIKOJ [2]

Leteroj de plumamikoj estas samtempe la periloj kaj la fruktoj de homa rilato, kiu enhavas, iasence, iaspecan amon. Tiu ĉi amo kutime estas emocio ne tre intensa aŭ profunda; verŝajne ĝi restas relative flanka afero en la vivo. Ĝi similas al kandelo, ne al ia vasta suno; tamen, ameto, same kiel amego, enhavas ian deziron, plifeliĉigi alian personon.

Neniu povas detale preskribi, kiel starigi kaj daŭrigi bonan homan rilaton; homoj kaj rilatoj tro varias, kaj niaj emocioj kaj motivoj restas grandparte misteraj. Tamen, se ni deziras, ke perletera amikeco sukcesu kaj daŭru, ia tia ĝenerala principo helpas. Ni penu plifeliĉigi la alian; do ni konsideru la alian. De tiu principo povas sekvi almenaŭ kelkaj konsiloj.

Celu pli helpi ol melki! Amiko ofte petas de amiko ian servon; reciprokaj servoj kontribuas al amikeco; sed ne tro frue petu ion de nova plumamiko; kaj ne petu tre komplikajn servojn aŭ kostajn objektojn. Foje naiva persono, kiu loĝas en relative malriĉa lando, ŝajne kredas, ke korespondanto, en relative prospera lando, povas facile sendi al li vestojn, diskojn, fontoplumon, eĉ magnetofonon aŭ fotoaparaton! kaj la vasta plimulto da homoj ankaŭ en la plej prosperaj landoj ne disponas monrimedojn, por tiel multekostajn objektojn donaci al ne-intimuloj. Sed ankaŭ iu, kies vivnivelo en prospera lando estas relative alta, povas forgesi, ke lia korespondanto en malriĉa lando eble povus nur per suferiga ofero sendi al li ion — serion da poŝtmarkoj, ekzemple — kiu por li, la bonŝanculo, estas bagatelo. Ankaŭ estas multe pli facile sendi ion de unu lando al alia, aŭ ricevi pakaĵon el eksterlando, en iuj landoj, ol en kelkaj aliaj. Do, ne petu senpripense.

Kompreneble, multaj esperantistoj starigas korespondajn rilatojn, kies ĉefa celo estas interŝanĝoj de ŝatokupaj objektoj. Tiam, ambaŭ atendas petojn kaj donacojn; ili nur zorgu, ke la interŝanĝoj estu pli-malpli justaj kaj vere reciprokaj.

Por respondi al letero, unue relegu ĝin atente. Estas nur dece, gratuli pri iu sukceso, kondolenci pri iu malfeliĉo, komenti pri iu interesa novaĵo. Kaj nepre ne forgesu danki la amikon pro iu komplezo — donaceto, informo, io ajn kio kostis al li aŭ ŝi monon aŭ klopodon.

Ankaŭ respondu al demandoj; kial la korespondanto faris demandon, se li ne deziras informiĝi? Kutime eblas respondi al demandoj; sed en kazo malfacila, almenaŭ klarigu, ke vi ne povas respondi; tiam la korespondanto scias, ke vi almenaŭ rigardis lian demandon. (Eble vi ne scias, kaj ne povas facile informiĝi; eble la demando tuŝas ion, kion vi ne rajtas diskuti; aŭ eĉ temas pri io, kio laŭ la moroj de via lando estas tro privata.)

Simile, ne tuj faru demandojn, kiuj povas ŝajni, al via korespondanto, ĝenaj... kaj ne forgesu, ke en multaj landoj ne-amika cenzuristo eble legos leteron el eksterlando.

Penu ĉiam meti oleon kaj ne sablon inter la radojn de rilato. Laŭdu ion laŭdindan; trovu ion afablan por diri. Hezitu kritiki; se vi vere devas ion kritiki, serĉu modestan, taktan, kiel eble malplej vundan metodon fari tion. Kritiko povas esti utila; aroganta, sarkasma aŭ senproportia kritiko ofte havas efikon malan al la intenco. Se vi plenigas miajn okulojn per larmoj de humiliĝo, ĝustetial mi ne povas vidi ion, kion eble mi devus vidi.

Ofte, du korespondantoj en tre diversaj landoj havos tre malsimilajn konceptojn pri diversaj gravaj aferoj. Amika diskutado pri tiaj aferoj povas pli bone informi ambaŭ homojn, kaj larĝigi du mensojn. Sed ne kredu, ke vi modifos la vidpunkton de aliideano, per longa akra polemikeca atako kontraŭ ĝi, precipe frue en via korespondado. La ricevinto pli probable koleros, aŭ ŝultrotiros, aŭ atribuos al vi malestimindajn motivojn; eble kredos vin nur senkonsciencia ilo de iu registaro, eklezio, partio, minoritata grupo k.t.p. Kaj neniu el ni vere scias absolute certe, ke nia opinio estas perfekte prava ĉiurilate; ĉar kiu povas scii ĉion en la mondo, ĉiujn faktorojn en ĉio?

Se ni malsamopiniis pri io grava, tio ne necese detruas amikecon. Tiuj, kiuj celas tutmondajn amikajn rilatojn, nepre devos ofte akcepti la principon “amikece konsenti, daŭre malsamopinii”, sinteno grava ankaŭ en la etoso de ‘neŭtraleco’ kiu mem estas centre grava koncepto de la tuta funkciado de UEA.

Dume, kiam ni diskutas, ni memoru, ke ni letterskribantoj similas ne al generaloj, sed al diplomatoj.

Pli bone skribi, “Ŝajnas al mi, ke ...” ol “Ĉiuj scias, ke ...” — pli bone, “Ĉu estas eble, ke ...” ol “Estas certe, ke ...” — pli bone, “Eble estos interesa al vi alia opinio ...” ol “Vi tute malpravas pri ...” — pli bone, “En mia lando tamen oni sukcesis aranĝi, ke ...” ol “En via lando oni daŭre praktikas la abomenan ...” Ĝenerale ni pli probable konvinkos per “Ĉu?” ol per “Fi!”

Kaj nia suferoplena mondo estas tiel dividita, ke ofte unu el la vere valoraj funkcioj de Esperanto, kaj de esperanta korespondado kiu ŝajnus, unua-vide, nur bagatela, estas, ke amikecoj eĉ iom banalaj kontribuas al monda konscio, ke neniu popolo konsistas el vosthavaj demonoj aŭ el kruelaj militemuloj; iu ajn amika rilato kontribuas ion al sanaj sintenoj.

Ĉiukaze, plumamika letero devas havi unu kvaliton, por ke la amikeco daŭru kaj fortiĝu: ĝi estu interesa.

Kaj oni skribas interesan leteron, strebante igi ĝin interesa, ne nur al la skribanto, sed ankaŭ al la ricevonto.

Do, ne tro detaligu ion pri manieroj, kiuj tre interesas vin, al iu, kiun manieroj ne interesas kaj kies pasia intereso estas pri metalografio. (Eble vi du ne tro sukcese elektis unu la alian, sed tio estas alia problemo. Kaj eble forte ligas vin viaj komunaj interesoj pri pentraĵoj kaj florigardenoj.)

Kvankam kompreneble unu el la funkcioj de amikeco estas, ke ni havu iujn, al kiuj ni povas iom konfidi niajn malĝojojn, ni memoru, ke estas tre facile tro longe priskribi niajn malĝojojn, malsanojn kaj plendojn. Kaj, escepte en maloftaj kaj specialaj situacioj, ni ne penu treni aliajn en niajn kverelojn; prefere ni penu interpacigi aliajn.

Oni ofte povas multon aldoni al la intereso de letero per ia skizo, eltondaĵo el gazeto, bildkartoj, fotoj, karikaturo. Eble io el via landa esperanta gazeto aŭ loka esperanta bulteno estos interesa, eble donos ideon por nova agado aliloke?

Kredeble tio, kio estas plej interesa al via korespondanto, estas ĝuste tio, kio ne ekzistas en ties lando, kaj do por li aŭ ŝi estas ekzotika. Via folkloro, viaj naciaj receptoj, kostumoj, kantoj, proverboj, indiĝenaj floroj kaj bestoj, tradicioj, lokaj moroj kaj kutimoj eble ŝajnas al vi banalaj, sed al alilandano estos novaj, stimulaĵoj,

interesaj. Demandu kiaj temoj estos interesaj al via korespondanto; menciu viajn proprajn interesojn.

Kelkaj el la plej plezurigaj leteroj, tamen, povas esti pri tre simplaj aferoj, eĉ nur de la hejmo, ĉiutaga laboro, aŭ via vilaĝa strato: du el la grandaj interesiloj estas emocio kaj humuro. Se vi povas — eble foje pli efike per simplaj frazoj de postkomencanto, ol per ege elpensitaj komplikaj lingvo-lertaĵoj — vere kortuŝe priskribi iun eventon, kiu kortuŝis vin, vi eble partoprenigos vian korespondanton en la evento; kaj tio estas valora travivaĵo. Se vi povas vere ridige priskribi ion tute negravan (kiel, ekzemple, la najbara hundo ŝtelis oston, kiun via avino destinis al supo; vi, kurante post la hundo, koliziis kontraŭ la lokan grumblulon, kaj dum vi pardonpetadis kaj li plendadis, dua hundo forportis kiel bataltrufeon la oston ...) vi probable amuzos vian korespondanton, kaj bonaj ridoj helpas kunligi amikojn — kaj plisanigi la mondon. Skribi bonan leteron postulas pensadon kaj etan penadon: iom elektu viajn vortojn, pensante pri klareco, takto, intereso, kortuŝo, amuzo.

Du lastaj konsiletoj: oni povas skribi tiel ofte, ke korespondado komence agrabla, finfine iĝas tro ŝarĝa; aŭ tiel malofte, ke via korespondanto sentas sin forgesita; provu trovi korespondadan ritmon, kiu taŭgas al ambaŭ; kaj memoru, ke foje, kiam letero ne eblas, poŝtkarto indikas, ke ni daŭre pensas pri malproksima amiko. Kaj, se vi mencias, ke vi enmetas ion — fotoĵon, traduketon, ion ajn — nepre ne forgesu lastmomente enmeti ĝin. Cenzuristoj ne estas la plej amataj profesiuloj; sed ne estas juste, ke iu kulpigu la cenzuriston pri stulta, nenecesa, impertinenta, malafabla konfisko de io... kio neniam estis en la koverto.

Versareto pri Korelativoj [5]

“Iu ŝtelis mian ĉerizorton!
Mi nur iris al la kaf-maŝin’, –
iu iel faris la forporton,
iu ien iel portis ĝin!

Ies mano estas malhonestaj!
 Iom mankas konscienco, ie!
 Iu prenis ĝin, fiulo pesta,
 ial — ĉu malsate, ĉu envie?
 Se mi iam trovos tiun ulon
 kiu mian torton ie manĝos,
 rompos mi tibion kaj fibulon,
 kaj la formon de la nazo ŝanĝos!

Kia ulo ion ŝtelas; kia
 besto? — ia varo por katenoj...
 ia bubo... ia... ia... ia...”
 “Tamen, ia-adu nur azenoj.”

Bestaj Loknomoj

Ĉiuj scias, ke elefantoj troviĝas en Afriko kaj Hindujo, blankaj ursoj en la Arkto kaj kanguroj en Aŭstralio. Sed ĉu vi scias pri tiu *Bovino*, kiu estas en Italujo — kiel urbo? Estas urbo *Kato* en Tajvano, sed *Hundon* vi trovos en Anglujo. Granda estas la *Rano*, kiu estas urbo en Niĝerio; kaj bestamanto povus viziti *Raton* en Usono (Nova Meksikio), aŭ, se li speciale volas vidi birdojn, *Neston* en Anglujo.

Ankaŭ anatomiisto povus fari fakajn esplorvojaĝojn: de la rivero *Mano* en Liberio al la urbo *Koro* en Eburbordo kaj poste al la urbo *Kolo* en Tanzanio. Aŭ en Eŭropo li povus inspekti *Langon*, kiu estas urbo en Francujo, kaj poste iri al *Lipa*, urbo en Jugoslavio.

Inter lango kaj lipo estas granda salto, ĉu ne? Sed alia granda *Salto* situas en Urugvajo, kie ĝi estas urbo.

Novaj Proverboj

Pli facile kritiki ol mem bone praktiki.
 Doloregojn amo kostas; sed kio kreskas, kie frostas?
 Valora restas scio eĉ dum inflacio.
 Ne helpas anatemo kontraŭ tertremo.
 Unue kontrolu, poste parolu.

La Mirinda Homo

Mirindaj estas la limoj de la homaj eblecoj. Ne laŭ dubaj asertoj, sed laŭ science faritaj observoj, ekzemple:

- japano atingis la aĝon de 114 jaroj, ankoraŭ kapabla iom ĝui la vivon;
- usonanino atingis la aĝon de 100 jaroj, kvankam ŝi estis nur 96 cm alta;
- rusino dum la vivo naskis 69 infanojn: dek ses duopojn, sep triopojn, kvar kvaropojn;
- koreaneto, malpli ol kvinjara, jam parolis kvar lingvojn (angle, germane, japane, koree), verkis poemojn kaj faris altgradajn matematikajn kalkulojn;
- usonanino donacis dum la vivo 499,66 litrojn da propra sango, por helpi malsanulojn;
- usonanino postvivis korpan temperaturon de nur 16 °C post kolapso surstrata dum vintro;
- kanadanino postvivis korpan temperaturon de 44,4 °C post ne-normala reago tre rara al anestezilo post operacio; ŝi finfine tute resaniĝis;
- skoto, kiu urĝe bezonis malplipeziĝi, vivis sen ia ajn solida nutraĵo, uzante nur akvon, sodakvon, kafon, teon kaj vitaminojn, dum 382 tagoj, en hospitalo sub konstanta observado de fakuloj;
- juna aŭstro, enĉeligite, ne pro malico sed pro ies eraro, kaj forgesite, postvivis dek ok tagojn absolute sen nutraĵo aŭ akvo.
Do, oni ne senesperigu tro frue...

Indaj por Poemoj de Katulo

(1) La kato de usona bienulo donis al li silentan, grandaniman lecionon pri lojaleco.

Ial li deziris senigi sin de sia kato, iam kara, kiu al kutimiĝis al komforta hejmo kaj homa societo. Anstataŭ fari taŭgan aranĝon, li veturis longdistance en arbaro, ĵetis la katon inter la arbojn kaj rapide forveturis. Sed post kelkaj tagoj la kato retrovis la hejmon. Denove la bienulo veturis en la arbaron kaj forĵetis la beston; kaj

duan fojon ĝi revenis. La bienulo veturis pli longan distancon kaj forĵetis la katon — kiu trian fojon retrovis sian hejmon.

La bienulo vere koleris. Li veturis en la arbaron eĉ pli longan distancon, veturis laŭ diversaj flankvojoj, forĵetis la katon, kaj nur tiam konstatis, ke en la vasta arbaro li estas tute perdita.

Li savis sin, nur ĉar li sekvis la katon al la hejmo.

Poste, li reamikiĝis kun la lojala kato, kaj lasis ĝin resti en la hejmo.



(2) Ie en Eŭropo, iam, riĉa kaj kapricema maljuna sinjorino komisiis sian portreton al talenta artisto. Ŝi estis preta bone pagi lin, se la portreto plaĉos al ŝi; la problemo estis, ĉu plaĉos?

Kiam la portreto estis preta, la kaduka kapriculino rigardadis kaj hezitadis, kaj finfine diris, ke ŝi ne scias, ĉu ŝi deziras la portreton, ĝis ankaŭ ŝia kato vidos ĝin. Se la kato aprobos, ŝi aĉetos la portreton. Ĉu ŝi rajtas porti sian karegan katon al la ateliero?

“Certe, sinjorino,” respondis la artisto.

Dum la sinjorino estis for, li frotis la portreton per fiŝo.

Kiam la kato alvenis, ĝi tuj iris al la portreto, flaris ĝin, ŝajnis kisi ĝin, lekis ĝin kaj ronronis. Kompreneble la sinjorino aĉetis la portreton.



(3) Dum la dekkvina jarcento, sub la angla reĝo Rikardo la Tria, kavaliro, Henry Wyat, multe suferis en malliberejo pro sia lojaleco al rivala dinastio. Li estis torturita; li loĝis ankaŭ en tura ĉelo, mallarĝa, malvarma, kaj li ne havis sufiĉajn vestojn aŭ nutraĵojn. Sed senhejma kato vizitis lin; li karesis ĝin; ĝi iom varmigis liajn manojn kaj bruston, kaj ekamis lin. Poste ĝi komencis regule kapti kaj porti al li kolombojn, kiujn la gardisto, iom pli kompatema ol la reĝo, kuiris por li. La kata varmo kaj la kolombaj manĝoj verŝajne savis lian vivon. Liberigite kiam Henriko la Sepa iĝis reĝo en 1485, Wyat ĉiam amike traktis katojn. Lia vivo estis ja savinda; li poste iĝis patro de la poeto Thomas (Tomaso) Wyat(t), kiu por la angla poezio estis grava pioniro de renesancaj metodoj.

Ĉi tiu historio estas tre eble aŭtentika; oni trovis ĝin en familia dokumento, kaj tre malnova bildo de la kavaliro kun la kato ekzistas.

11. FABELO EL NEPALO

Nepalo situas inter Hindujo kaj Ĉinujo; ĉirkaŭ du trionoj de la lando estas montaro. Ĝi estas la lando de Himalajo, kaj do de la plej alta montopinto de la terglobo, Everesto (8 848 metrojn alta). La altaj montoj restas ĉiam kovritaj per glacio kaj neĝo. La lando, bela kaj interesa, kun riĉa folkloro kaj valoraj artoj, havas gravajn problemojn, parte pro kaprica klimato. La plimulto de la nepalanoj estas terkultivistoj, kvankam industrio ankaŭ iom evoluis.

Ekzistas interesa libro pri Nepalo en Esperanto: *Nepalo Malfermas la Pordon* (1959), de Tibor Sekelj — kiu eĉ instruis Esperanton tie!

Ĉi tiu tre simpla fabelo uzas metodon, kiun ni foje trovas en fabeloj — ofte tre ŝatatan de infanoj — en multaj landoj: oni kva-zaŭ volvas fadenon, kaj poste malvolvas ĝin, strikte observante la inversan ordon.

La Paserino kaj la Pizo

Paserino trovis grandan pizon. Ŝi metis ĝin sur lignan ponton, kaj flugis al rivero por lavi sian bekon antaŭ la matenmanĝo. Kiam ŝi revenis, ŝi ne trovis la pizon.

Venis ĉarpentisto, kun segilo.

“Kvivit! kvivit!” kriis la paserino. “Sinjoro Ĉarpentisto, bonvolu helpi min trovi mian matenmanĝan pizon! Mi perdis ĝin sur la ponto.”

“Huŝ, huŝ! Kial mi atentu mizeran paserinion?” mokis la ĉarpentisto.

Sekvis la ĉarpentiston soldato, klak! klak! klak! vikle marŝante.

“Kvivit, kvivit, soldato! Mi petas vin, bonvolu puni tiun malĝentilan ĉarpentiston. Mi mortas pro malsato, kaj li rifuzas helpi min.”

“Tju!” forpelis ŝin la soldato. “Pasereto ne gravas!” Kaj li formarŝis sen eta provo helpi.

Poste venis armea kapitano, sur bela ĉevalo, hot! hot! trot! trot! Jen, li aspektis tre digna kaj devosenta; kaj la paserino atendis de li bonan konduton.

“Kvivit, kvivit, kapitana moŝto! Tiu soldato malĝentile rifuzis helpi min trovi mian matenmanĝon. Vi prizorgos la aferon, ĉu ne, nobla kapitana moŝto?”

“Haha!” ridis la kapitano. “Paserinetaĉo petas mian helpon! Kiel absurde!” — kaj hot! hot! li rajdis pluen.

La pasero atendis, ĝis ŝi vidis ministron alveni en siaj brilantaj vestoj kun siaj servantoj. “Kvivit, kvivit, kvivit!” pepis la pasero. “Via Ministra Moŝto, aŭskultu min. Tiu kapitano, kiu ĵus transiris la ponton, meritas esti pendumita. Li tute rifuzis helpi min trovi mian matenmanĝan pizon. Vi punos lin kaj prizorgos min, ĉu ne, Ministra Moŝto?”

“Haha, haha, haha!” La ministro ridegis, transiris la ponton, kaj diris eĉ ne unu vorton al la paserino.

La paserino preskaŭ senesperigis; sed subite ŝi vidis grandiozan spektaklon. Bum! bum! bum! bum! sur la lignan ponton venis bele vestita elefanto, kaj sur la elefanto sidis la reĝo mem sur trona selo; la mahuto sidis sur la kapo de la elefanto, kaj la oficiala ombrelisto ŝirmis la reĝon de la suno. Oro kaj juveloj brilis sur la reĝo kaj la elefantaj kovriloj, kaj servantoj eskortis la ŝtatestron. Jen la plej altranga persono de la lando.

“Kvivit! kvivit! Ho, honorinda estimata Reĝa Moŝto!” vokis la paserino. “Pardonu min, se mi ĝenas vin. Sed mi petas vin, ordigi malordon en via regno. Mi perdis mian matenmanĝan pizon sur ĉi tiu ponto. Nek ĉarpentisto, nek soldato, nek via kapitano, nek via ministro, konsentis helpi min kiam mi petis helpon. Ho, Reĝa Moŝto, helpu vian etan paseron ricevi decan traktadon!”

Sed la reĝo sidis alte supre, kaj eĉ ne aŭdis la pepadon de la paserino.

Nun la paserino vidis formikon sur la ponto.

“Ts! ts! formiketo, venu ĉi tien! Formiketo, mi petas vin turmenti tiun elefanton, ĝis ĝi ĵetos teren tiun reĝon, kiu ne prizorgas justecon en sia lando. Se vi ne helpos min, mi bekos vin!”

“Ne, ne, paserino, ne beku min — mi ja helpos vin.” La formiko kuris post la elefanto, grimpis sur ĝian kruron, kaj sidiĝis sur la rando de ĝia orelo, por paroli al ĝi.

“Elefanto,” kriis la formiko, “diru al la reĝo, ke li helpu tiun paserinon, kiu perdis la matenmanĝon. Alie, mi rampos en vian oreilon, kaj esplorados kaj rondirados, ĝis vi preskaŭ frenezigos. Kaj se la reĝo rifuzos helpi la paserinon, vi devos ĵeti lin teren.”

La elefanto diris al la reĝo, “Via Reĝa Moŝto, mi petas vin, helpu la petantan paserinon. Se neniu helpos ŝin retrovi sian matenmanĝan pizon, ŝia alianculo, la formiko, kiu jam sidas sur la rando de mia orelo, eniros ĝin, kaj turmentos min, ĝis mi neeviteble ĵetos vin teren.”

Nun la reĝo devis atenti!

Li alvokis la ministron, kaj avertis lin, ke baldaŭ li estos eksministro, se li ne tuj ordigos la aferon. Li punu tiun armean oficeron, kiu neglektis sian devon ordigi malordon sur ŝtata ponto.

La ministro postsekvis la kapitanon kaj alvokis lin. Li demandis la kapitanon, kial li tiel neglektis sian devon, prizorgi la civitanojn; kaj minacis, ke se li ne tuj ekpaŝos por rebonigi la aferon, li tre baldaŭ estos ekskapitano.

La kapitano pardonpetis. Li tuj trovis la soldaton, kaj riproĉis lin, ĉar li neniel helpis sinjorinon paserinon, kiu petis helpon. Se li ne tuj prizorgos la perditan matenmanĝan pizon de la paserino, li tre baldaŭ estos ekssoldato kaj trovos sin en ege malagrabla situacio.

La soldato tuj serĉis la ĉarpentiston, kaj avertis lin, ke se li ne tuj revenos al la ponto, kaj serĉos la pizon de la paserino, li tre tre baldaŭ sidos sur la malvarma planko de la malliberejo.

La ĉarpentisto kuris al la ponto kaj serĉis, serĉadis inter la tabuloj, ĝis li trovis la grandan pizon kaj redonis ĝin al la paserino.

“Kvivit! kvivit!” ĉirpis la paserino. “Bela kaj bona estas mia matenmanĝo!”

Novaj Proverboj

Ĉiam pekulo aperas en spegulo.

Kiu falas en panikon, kredas kobro eĉ lumbrikon.

Motivoj de aliaj ne estas ĉiam fiaj.

Ne montru diamanton por allogi elefanton.

Valora Penso

Vivo sen malsukcesoj estas tero sen sterko.

Marcel Massin, belga poeto.

Versareto — pri Kvar Gramatikaj Eroj

Dormonto al la lito iras;
skribonto serĉas la kajeron;
Kantonta vir' profunde spiras;
scionta, serĉas ian veron.

Batota bub' petolas multe;
Ĉifajojn montras bluz' gladota;
Ŝokoto aŭdas kaŝaŭskulte,
Banoto kuŝas, aĉe kota.

Kisonto serĉas la kisoton;
Helpoto serĉas la helponton;
Trinkonto serĉas akvopoton,
kaj aŭskultonto la rakonton.

Mirinda Naturo

En landoj, kie frostas vintre, nuntempaj aŭtomobilistoj pro-
tektas siajn aŭtomobilojn per kontraŭfrostaj substancoj, ekzemple
glikolo aŭ glicerolo. Jam de jarmiloj pluraj insektoj en la sama kli-
mato havas naturan kontraŭfrostan sistemon: glicerolo estiĝas en
iliaj korpoj je la komenco de la vintro.

Ekzistas pluraj plantoj, inter ili la stapelio en Afriko kaj la
arumo en Eŭropo, kiuj eligas odoron de putra viando. Ĉi tiu odora-
aĉo allogas muŝojn, kiuj sekve portas polenon fekundigan de floro
al floro.

Usona pego tre orde konservas nutraĵojn por la vintro; ĝi boras
ĉiuaŭtune milojn da truetoj en arbotrunko, kaj en ĉiun truon metas
unu glanon. Eŭropa birdo, lanio aŭ 'greka pigo', kaptinte pli da
insektoj, vermoj k.t.p. ol ĝi bezonas por manĝi tuj, fiksas ilin sur la
dornojn de dorna arbusto kaj tiel aranĝas provizejon.

Loknomoj

Kien iru esperantisto, kiu deziras serioze studi la ses partipojn?

En Ĉinujo li povas viziti *Anta*, urbo en la norda parto de la lando; kaj li trovos lagon *Onto* en Finnlando; ĉu eble en la urbo *Intae* en Borneo li trovos iom da helpo?

Proksime al la Tropiko de Kaprikorno li trovos *Ata*, kvankam tie li kredeble ne havus tre taŭgan domon por seminario aŭ konferenco, ĉar *Ata* estas tre malgranda insulo, unu el la Tonga-insularo sur la Pacifika Oceano. Sed li povas iom pli facile viziti la urbon *Ita* en Paragvajo, aŭ en Japanujo elekti inter eĉ du urboj kun la nomo *Ota*.

En Restoracio

“Kelnero! Estas hontinde! Mi preskaŭ rompis denton! Vidu, jen metala objekto en unu el miaj viandbuloj!”

“Ho, mi vere tre dankas vin, sinjoro! La kuiristo estos tre ĝoja! Ni perdis ĝin de nia muelilo, kaj ni ne povas aĉeti vicpartojn.”

Magnetofona Servo

UEA havas Magnetofonan Servon, kies sidejo estas en Kanado. De la Centra Oficejo de UEA oni povas ricevi informojn kaj liston de aĉeteblaj sonbendoj. Oni povas aĉeti sonbendojn sur bobenoj aŭ en kasetoj, laŭ la bezonoj de ies magnetofono; estas eble pagi en kontojn en Kanado, Germanujo (okcidenta) aŭ Nederlando. Ekzistas ankaŭ sistemo por interŝanĝi sonbendojn; sed, kompreneble, la organizantoj de la Magnetofona Servo devas konsenti pri la utilo de la sonbendo proponita interŝanĝe.

Jam en 1979 pli ol kvarcent diversaj sonbendoj estis aĉeteblaj; la stoko pligrandiĝas ĉiujare.

Per tiu servo, eĉ plurajn mortajn esperantistojn oni povas ankoraŭ aŭskulti: Andreo Cseh detale demonstras la Ĉe-metodon, rektmetodan kurson por instrui Esperanton; Edmond Privat prelegas pri “Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado”; Hideo Yagi pri “La influo de Okcidento sur la pensmaniero de japanoj”; W.E.

Collinson pri loknomoj; Giorgio Canuto pri stratakcidentoj; kaj ekzistas eĉ bendo, preparita pere de vakscilindro de 1909, de la aŭtentika voĉo de L.L. Zamenhof, kvankam ĉi tiu lasta, neeviteble, ne estas teknike bonkvalita.

Per la Magnetofona Servo, esperantistoj, kiuj disponas pri taŭgaj aparatoj, povas en lokaj grupoj aŭ eble eĉ en la propraj hejmoj aŭskulti kaj reaŭskulti elstarajn oratorojn kaj klerajn prelegantojn: brilajn kongresajn festparoladojn de Ivo Lapenna kaj Humphrey Tonkin; aŭ somer-universitatajn prelegojn de tre kleraj fakuloj pri tre diversaj fakoj. Inter tiuj ĉi lastaj nur kelkaj ekzemploj el multaj eblaj estas Auld (esperanta literaturo), Aŝvinikumar (matematiko), Chiussi (islamo), Dupuis (muziko), Hauptenthal (historio aŭ bibliografio de Esperanto), Kawamura (dietistiko), Merrick (muziko), Neergaard (agronomio), Régulo Pérez (lingvistiko), Sekelj (antropologio), Støp-Bowitz (biologio), Thorsen (literaturo), aŭ Waringhien (literaturo, esperantologio).

Ne temas pri prelegoj nur, sed pri vere varia menuo. Oni povas aĉeti diversajn programojn por lernantoj, ekzemple parolan tekston de *Esperanto por Infanoj*, aŭ ekzercojn rilatajn al lernolibro de Auld; aŭ sonbendojn, kiuj registris eventojn interesajn en la detala historio de Esperanto, precipe dumkongresajn; sed oni povas aĉeti ankaŭ riĉe variajn kulturajn programojn.

Troviĝas multaj dramoj, ofte prezentitaj de vere spertaj geaktoroj; oni povas elekti (inter multaj) *Okuni kaj Gohei* (malnovan japanan dramon); *La Homa Voĉo* (mirindan unurolan tragedion de Cocteau, franco, brile aktoritan de Jana Ravselj); *Vilhelmo la Konkeranto* (tragikomedion de Kljaković, jugoslavo); *Ĉasantoj de oficoj* (komedion de Vazov, bulgaro); aŭ elekti inter multaj malpezaj skeĉoj, humuraj rakontoj kaj aliaj distraj programoj. (Oni eĉ povas aŭdi la voĉojn de la du hungaraj verkistoj, kiuj siatempe eminente plialtigis la nivelon kaj kriteriojn de la esperanta literaturo — Kalocsay kaj Baghy.)

Aŭ oni povas elekti programon, pri la kulturo de iu lando malproksima; troviĝas programoj ekzemple aŭstralia, brita, dana, estona, islanda... kaj multaj miksitaj programoj de kulturaj specimenoj el diversaj landoj. Se oni deziras eskiman poezion, maoriajn kantojn el Nov-Zelando, argentinan aŭ japanan muzikon, io taŭga troviĝas en la listo de la Magnetofona Servo.

Eĉ tiu kiu ne disponas pri magnetofono, aŭ ne povas aĉeti eĉ unu sonbendon, povas trovi intereson en la katalogo de tiu Servo; ĝi multilate montras, kion oni povas fari per Esperanto.

Kiam Oni Rapide Skribas...

Edzino, kiu devis subite eliri, lasis mesaĝon por la alvenonta edzo: “*Vi trovos vian vespermanĝon sidante en la bakforno.*”

Ĉefflegistino, multe tro okupita, lasis instrukciojn por ankoraŭ novica flegistino. Inter ili troviĝis: “Je la kvina matene, kontrolu la temperamenton de ĉiu paciento... Se tiu en lito n-ro 7 plendas pri doloroj en la kruroj, fritu ilin kelkajn minutojn, uzante varman oleon... Ne pre ne lasu tiun en lito n-ro 9 malvermiĝi...”

Sur la fermita pordo de butikio:

LA BUTIKISTO NUR ELIRIS POR KAFO KIU REVENOS POST KELKAJ MINUTOJ.

En montrofenestro, antaŭ aro da mastrumaj maŝinoj:

NE MORTIGU VIN PER PEZA LABORO! TION NI FAROS PLI RAPIDE.
--

12. TESTAMENTOJ

Kredeble en la plimulto da civilizacioj, homoj, aŭ almenaŭ viroj, atendis, ke ili mem decidu, kio okazos al iliaj havaĵoj post la morto.

En multaj fruaj civilizacioj, oni enterigis aŭ bruligis valorajn objektojn kun mortinto, por ke li havu ilin en la postmorta vivo; ni pensu ekzemple pri la piramidoj de Egiptujo, trezorplenaj reĝaj tomboj. Riĉuloj volis forporti, en regnon de mortintoj, konceptitan kiel tre similan al la surtera vivo, armilojn, vestojn, juvelojn, kuirilojn, boatojn, ludilojn, ĉevalojn, hundojn, sklavojn, gardistojn, eĉ edzinojn. Tre helpe al arkeologoj, sed verŝajne ne al la mortintoj...

Eĉ hodiaŭ kelkaj primitivaj triboj havas similajn kutimojn. Kiam homoj progresis al malpli naivaj konceptoj pri postmorta vivo, kaj almenaŭ komprenis, ke ni neniel povos kunporti niajn materiajn trezorojn, ili turnis sin al la konsolo, heredigi ilin al familianoj aŭ amikoj.

Heredado povas krei gravajn sociajn maljustaĵojn; tamen la ebleco testamenti ion al amataj personoj ofte utile instigas homojn al diligenta laborado, modera vivostilo, sinrega ŝparado, iniciatemo. Multaj registaroj penas moderigi la maljustaĵojn sed konservi la utilajn instigojn, per impostoj, ofte gradigitaj, sur heredaĵoj; aŭ permesas heredadon de personaj valoraĵoj kiel domo, aŭtomobilo, ringo, pentraĵo, ŝparkonta monsumo, sed ne de kapitalo laŭ la strikta ekonomika senco, ekzemple fabriko.

Leĝoj kaj kutimoj pri testamentoj tre varias de lando al lando. Iam kaj ie, la plej aĝa filo ĉiam heredis la tutan havaĵon de la patro; iam kaj ie, virinoj ne rajtis posedi ion sendepende; aŭ frato eĉ heredis kiel objekton la edzinon de morta frato. Tiu lasta kutimo, nomita *levirato*, por multaj el ni ŝajnas kruela disponigo de virino senatente al ŝiaj preferoj, sed celis protekti ŝin en patriarka socio. En pluraj socioj, ĉio devis esti dividita egale inter ĉiuj filoj. Tia leĝo estis ĉefa kialo de la troa malgrandeco de terpecoj, kiujn nun kultivas multaj malriĉaj hindoj; sed oni celis justecon. Leĝoj en multaj

socioj devigis testamentanton heredigi almenaŭ ian minimuman porcion al vidvino (aŭ vidvo) kaj gefiloj. Ĝenerale, ŝajnas ke homoj deziras testamenti ion unue al vidvino aŭ vidvo, poste al la propraj infanoj; poste, verŝajne, al nepoj, nepinoj, aŭ plej proksimaj parencoj, eble genevoj aŭ gefratoj; kaj poste, al personaj amikoj, aŭ societoj, kies celojn ni aprobas. Esperantistoj ofte testamentas ion al la Esperanto-Movado. Oni povas testamenti monsumon (aŭ ion valoran, ekzemple ian kolekton da pentraĵoj) al UEA, aŭ al nacia Esperanto-asocio, al faka, regiona aŭ urba societo; al ia esperanta fonduso aŭ eldonejo; eĉ al meritplena esperantisto, por liberigi tiun personon de zorgoj, kiuj malebligas ian valoran laboron.

La nobla Hector Hodler, kiu estis la ĉefa fondinto de UEA, testamentis grandan parton de sia havaĵo al UEA, kiam li tragike mortis en 1920, nur tridek-trijara, post multa suferado; lia kapitalo estis siatempe ege grava helpo al la juna organizo.

Ne ĉiuj pripensas siajn testamentojn tiel altruisme. Ĝismorta vanteco, persista malico aŭ strangaj originalaĵoj sufiĉe ofte troviĝas en testamentoj.

Franca dukino, kiu mortis en 1776, preskribis detale sian ege multekostan enterigan ceremonion: inter aliaj ekscesoĵ, ŝi ordonis, ke oni portu ŝian kadavron, per solena procesio, kvarcent kilometrojn al la enteriga loko, kun ĉiutaga diservo ĉe survoja haltejo, kaj ducent torĉportantoj oficantaj tra la tuta vojo.

La dukino tamen testamentis tre bonajn mondonacojn kaj pensiojn al siaj geservantoj — sed sub la kondiĉo, ke ĉiu loĝu aparte de ĉiuj aliaj; kaj ŝi detale preskribis la loĝlokojn. Kial? Ĉar ŝi deziris, ke ili ne klaŭdu kune pri ŝi post ŝia morto!

Koleraj testamentantoj ofte simple ne mencias ofendinton en testamento; sed foje vundas tiun personon per ia humilige eta heredaĵo — unu monero, malnova lambastono, leda kruĉo, aŭ eĉ ŝnurpeco por ke la viktimo pendigu sin se li volas. Mikson de afableco kaj vundemo ni trovas ĉe franca komercisto, kiu en 1910 testamentis grandan monsumon al sinjorino, kiu antaŭ dudek jaroj rifuzis lian edziĝo-proponon, “danke pro ŝia kompatato kaj admire pro ŝia saĝo, ĉar ŝi ebligis al li feliĉan fraŭlan vivon liberan kaj sendependan...”

Strangaĵoj abundas. Usonano, kiu dum kvardek kvar jaroj plenumis sian oficon de lampisto en teatro en Filadelfio, tre akurate

kaj atente, petis en sia testamento, ke oni detranĉu lian kapon, dece enterigu la ceteran kadavron, senkarnigu kaj science preparu lian kranion kaj donacu ĝin al la teatro, kie, kiam oni prezentos *Hamleto*, ĝi servu kiel la kranio, super kiu la heroo meditas.

Riĉa franco en 1878 testamentis monon, por ĉiujare vere havinda premio, kiun oni aljuĝu al la venkinto, dum la vilaĝa festo, je konkurso por rajdantoj sur porkoj. La dua kondiĉo, eble pli facile plenumebla, estis ke la sukcesa rajdinto memore portu funebrajn vestojn dum du jaroj.

Anglino, kiu mortis en 1776, ordonis testamente, ke oni metu ŝin en ĉerkon alie plenan de flartabako; kaj ses pasiaj flartabakuzantoj portu la ĉerkon; ses virgulinoj portu flartabakon por konsoli la funebrantojn; kaj ŝia servantino antaŭiru la procesion, disdonante flartabakon al rigardantoj kaj ŝutante ĝin sur la teron.

Irlanda riĉulo mortis en 1769; notario kunvokis la heredontojn. Li komencis laŭtlegi: "... Al mia bofratino la kvar malnovajn ŝtrumpojn sub mia matraco dekstre; al mia nevo Miĥaelo du neparajn ŝtrumpetojn kaj verdan noktan ĉapon; al leŭtenanto Johano Ŝtono unu bluan ŝtrumpon kun mia ruĝa mantelo; al mia kuzino Barbara malnovan boton kaj poŝon el ruĝa flanelo; al Anna mia mastrumistino mian difektitan akvokruĉon..." La diversaj personoj ekkoleris, ne nur pro seniluziigoj post esperoj, sed pro la superflujaj humiligoj... ĝis Anna indigne piedbatis tiun difektitan kruĉon, kaj elfalis or-moneroj. Tiam ĉiuj esploris, kaj trovis, ke la ŝajne ofendaj objektoj estas plenaj de mono.

Notarioj ofte vidas la malpli belajn flankojn de la homoj; sed jen vera grandanimeco: en 1772 pola princino, vojaĝante en Francujo, hazarde vundis la maĝnon. La kirurgo, kiu kuracis la vundon, akcidente faris novan vundon, kiu gangreniĝis. Eĉ amputo de la brako ne savis la principon, kiu, bela, inteligenta, altranga, riĉa, trovis sin subite mortanta frue, kun teruraj suferoj. En tiu situacio, ŝi venigis notarion kaj diktis etan suplementon al sia testamento: "Ĉar mi kredas, ke oni misjuĝos la malfeliĉan kirurgon, kiu kaŭzis mian morton, mi testamentas al li ĉiujaran pagon de ducent dukatoj; kaj mi tutkore pardonas al li lian eraron. Mi sincere esperas, ke tiu ĉi eta kompenso parte protektos lin kontraŭ eventualaj malbonaj rezultoj de tiu fatala eraro."

Juristoj havis belan problemon, kiam riĉa italino, vidvino, testamentis grandan havaĵon al sia kato Bibi, kaj du kanarioj, Jojo kaj Mimi, kaj al la mastrumistino, por ke ŝi bone prizorgu la bestojn. La genepoj, kiuj dum longa tempo neniam vizitis ŝin, protestis, sed juĝisto decidis, ke la testamento validas. Pli komplika problemo tamen estiĝis en 1979, kiam Bibi kaptis kaj manĝis Jojo. Tiam la parencoj pledis, ke la kato perdis siajn rajtojn de heredinto, ĉar ĝi murdis alian heredinton, kaj ankaŭ demandis, kiu heredos la havaĵon de la mortinta birdo. La juĝisto decidis, ke oni ne rajtas kondamni katon, kiu nur sekvis naturan instinkton, kaj ke Bibi kaj Mimi rajtas dividi la havaĵon de Jojo. Homaj parencoj heredos nur kiam la kato kaj la kanario mortos.

La lasta anekdoto devenas el Flandrujo de la dekkvina jarcento, do verŝajne ĝi nun estas fabelo belga. Ĉu ĝi estas pli ol fabelo, oni nun ne scias.

Vilaĝa pastro tre amis sian hundon, kiu estis obeema, fidela kaj inteligenta. Kiam tiu hundo mortis, la pastro deziris enterigi sian bonan amikon dece; tial li enterigis ĝin proksime al la pastra domo. Kvankam li ne faris ian nepermeseblan eklezian riton, tamen la hundo kuŝis en tero konsekrita, kaj kiam la episkopo sciigis pri la afero, li tuj alvokis la pastron. Nur post tiu alvoko la naiva pastro komencis konscii, ke li faris ion kontraŭ la reguloj; kaj li timis, ke la episkopo, kiu estis monavida, kaptos la okazon severe monpuni lin. Li do kunportis monsumon espereble sufiĉan.

Kiam li staris antaŭ la episkopo, hajlis riproĉoj.

“Ho fia, pekoputra, malinda pastro, ĉu ne estas vere, ke vi enterigis mizeran, senaniman, malpuran hundon en konsekrita tero, kie vi devas enterigi nur kristanojn kaj kristaninojn?”

“J... j... jes, episkopa moŝto, mi ja enterigis mian hu...”

“Kaj ĉu vi tiel ne profanis la sanktan teron de la enterigejo?”

“V... v... verŝajne jes, episkopa moŝto, sed mia inten...”

“Mizera pastro, kruda vilaĝano, kiu hontigis la Eklezion kaj profanis preĝejon!” Kaj, ne permesante al la tremanta pastro eĉ peti pardonon aŭ esprimi penton, la episkopo tondradis, riproĉadis, preskaŭ anatemis, ĝis la pekinto preskaŭ kolapsis sub la pezo de malaprobo. Kiam la episkopo venis al la fino de sia oratorado, li tuj, sen paŭzo, ordonis, ke du gardistoj konduku la pastron al mallibereja ĉelo.

Kvankam la pastro estis humila kaj obeema, li ne povis en mal-luma, malvarma kaj malseka ĉelo ne demandi sin, kial la episkopo punas lin, kvazaŭ pro ia abomena herezo aŭ malnobla krimego, pro senmalica naiva eraro, kies motivo estis amo. Li ankaŭ timis, kio povos sekvi. Tial li respektete petis, kiel li rajtis peti, aŭdiencon, kie antaŭ atestantoj li povos defendi sin, kaj almenaŭ peti ian mildigon de la puno.

Aŭdiencon la episkopo devis aranĝi. Kaj tie staris en malnova, kaj nun ne tre pura sutano, la vilaĝa pastro, antaŭ la riĉe vestita episkopo; en la ĉambro sidis advokatoj, notarioj, aktistoj kaj diversaj funkciuloj en talaroj kaj veluro kaj peltaĵoj; kaj tre amuzis ilin la embaraso de la naiva pastro.

Oni invitis lin laŭeble ekskuzi sin.

“Vere, via episkopa moŝto,” li diris, “se vi konus mian fidelan hundon, vi ne tiel ŝokiĝus pro mia eraro, ke mi enterigis ĝin en tero konsekrita. Tiu hundo — kiun Dio benu kaj pardonu! — vere estis unika hundo, preskaŭ same inteligenta kiel homo, mirinde saĝa kaj prudenta, kaj posedante ĉiujn naturajn virtojn pli abunde ol multaj kristanoj, kvankam la teologiajn virtojn li ne povis posedi. Mia hundo tre penetre taksis la homojn, bone komprenis iliajn meritojn kaj mankojn. Serene kaj humile li mortis, kaj sur la mortolito li diktis tre taŭgan kaj pian testamenton. Mi ne volas malŝpari vian valoran tempon, via episkopa moŝto, sed mi volas, se mi rajtas, menciigi unu detalon: li tiel alte estimis viajn grandajn meritojn, ke li testamentis al vi kvindek kronojn; kaj fakte, kiam vi ordonis al mi viziti vin, mi decidis tuj kunporti ilin. Jen ili estas.”

La episkopo akceptis la pezan saketon kaj tuj deklaris, ke en tiel esceptaj cirkonstancoj, ĉar temis pri besto tiel saĝa kaj nobla, tiel proksima al animohavantoj, la pastro ne nur ne pekis, sed laŭdirinde agis, enterigante ĝin tiel honore.

Versareto — pri ‘da’, ‘de’ kaj ‘el’

Da soldatoj surstrate ekmarŝis taĉmento.

(Do, temis pri kelkaj kaj ne regimento.)

De soldatoj surstrate rimarkis mi grupon.

(Do, ne de anseroj rimarkis mi trupon.)

Du tasojn da kafo Rikardo englutis,
de la kafo brazila, de li elektita;
Da sukero cent gramojn sur maton li ŝutis,
sur maton el pajlo, pro stumblo subita.

En sonĝo mi vidis principon el vakso,
pri spertoj ekstremaj malsaĝe avida;
Ŝi sidiĝis sur tuno da ruĝa koakso,
kaj iĝis kvin litroj da vakso fluida.

Mi tranĉis cent gramojn de ĉiu fromaĝo;
per cent da butero la nazon mi ŝmiris;
ne juĝu la kvanton de mia malsaĝo
per deksesoj da rimoj — mi iom deliris.

Novaj Proverboj

Ofte rideto helpas al peto.

Por unu servo li ne dankis; dua servo longe mankis.

Ke knabo ŝtelis prunon, ne nigrigos la sunon.

Ne konsolu el Korano, se ploras kristano.

Bela Penso

Kiam homoj vin kalumnias, tiel vivu, ke neniu kredos ilin.

Platono, helena filozofo.

Nescio povas esti utila, se ĝi ne estas nia propra.

Butikisto en Novjorko koleris pro multaj butikaj ŝtelistoj. Ili kaŭzis al li gravajn perdojn. Li fiksitis sur la muron grandan afiŝon, kiu anoncis nur:

BUTIKAJ ŜTELISTOJ ESTOS DEFROSNITAJ !

Post kelkaj semajnoj, iu demandis al li, “Kion signifas tiu *defrosniita*?” Li respondis, “Mi tute ne scias; sed ekde la ekmonro de

tiu aŝiŝo, ŝtelado el mia butikoj malpliigis sesdek-procente.”

Ĉu li iel aŭdis pri simila blago, kiu tre sukcesis antaŭ eble sesdek jaroj, laŭ iom nebulaj informoj verŝajne en Anglujo? Sinjoro, kiu posedis belan parkon, finfine perdis paciencon pri la tro multaj homoj, kiuj senrajte eniris ĝin. Se nur ili kontentigus sin per ĉirkaŭrigardado! sed multaj el la entrudiĝantoj plukis florojn, eĉ elŝiris ilin kun radikoj, difektis arbojn, timigis birdojn kaj diversmaniere miskondutis. La posedanto ne deziris konstantajn konfliktojn kaj bruajn scenojn. Post pripensado, li metis sur arbojn kaj fostojn, en diversaj lokoj apud la limoj de la parko, avizojn ne multvortajn:

AVERTO
Ni avertas ĉiujn,
kiuj envenas ĉi tiun parkon
sen permeso,
ke ili tion faras absolute
proprariske
kaj ke ni neniel respondos
pri iuj ajn sekvoj!
La *quercus pedunculata*
en la *plej frua stadio*
abundas sur la arboj kaj la herbaroj.

Senrajtaj esplorantoj neniam plu ĝenis lin. Kredeble ĉar neniu el la entrudiĝemuloj sciis, ke *quercus pedunculata* estas la botanika (latina) nomo por ordinara kverko; do la danĝeraj bestoj, plantoj aŭ mikroboj estis... glanoj.

13. FABELO EL ALBANUJO

Albanujo estas eŭropa lando, kiu situas ĉe Adriatiko. Ĝi restas eĉ hodiaŭ pli izolita ol aliaj eŭropaj ŝtatoj, kaj la malplej riĉa. Ĝi estas plejparte montara lando, multloke belega, kaj havas riĉan folkloron. Lastatempe ĝi komencis pli prosperi materie, per ekspluatado de siaj valoraj mineraloj kaj grandskala konstruado por hidroelektro.

La malgranda lando havas propran lingvon, la albanan, de kiu ekzistas du dialektoj, la norda kaj la suda. La albana nomo de la lando, *Shqiptar*, signifas “La Lando de la Aglo”.

Esperanto jam ekpenetris Albanujon en 1913, kvankam ankoraŭ ne estas granda Esperanto-movado tie. Ekzistas unu esperanta lernolibro albana, kaj du biografioj de la nacia heroo Skanderbeg aperis en Esperanto.

Mosko kaj Tosko

Mosko kaj Tosko estis fratoj, gajaj kuraĝaj rabistoj. Longe ili serĉadis simpatian bravulon, kiel edzon por sia fratino. Finfine ili trovis sur la vojo viron, kiu plaĉis al ili. Al li ili edzinigis la fratinojn; kaj li forkondukis ŝin al sia domo.

Post kelkaj monatoj, Mosko kaj Tosko decidis, ke estos bone, viziti la fratinojn. Do, ili piediris al la domo de la edzo. Hazarde, la edzo ne estis hejme; li portis grenon al la muelejo.

Mosko diris al la fratino, “Franjo, ni longe piediris; mi soifas; donu al mi iom da akvo.” La fratino alportis akvon en la ligna cilindra akvujo, kiun la edzo, kiam li rajdis, kutime portis ĉe la selo. Kiam Mosko levis sian kapon por verŝi akvon en la gorĝon, li rimarkis grandan pecon da fumaĵita viando, kiu pendis en la tegmenta interspaco.

“Tosko,” li demandis, “ĉu ankaŭ vi soifas? Ĉu vi deziras trinki, fraĉjo?” Tosko prenis la akvujojn, kaj kompreneble ankaŭ levis la kapon.

“Ĉu vi vidas ĝin?” demandis Mosko. — “Jes, mi vidas ĝin,” respondis Tosko. — “Tion, vi vere vidas ĝin?” Mosko insistis. — “Jes, jes, mi ja vidas ĝin!” Tosko persistis.

La fratoj iom parolis kun la fratino, kiu diris, ke ŝi vivas bone kun la brava edzo; poste ili foriris.

Kiam la edzo revenis el la muelejo, li demandis al ŝi, ĉu iu vizitis la domon.

“Jes,” ŝi diris, “miaj fratoj mallonge vizitis min, ĉar ili ne vidis min dum longa tempo.” — “Ĉu ili petis de vi ion?” — “Nur iom da trinkakvo.” — “Kaj tion vi certe donis al ili?” — “Jes, kompreneble.” — “Ĉu ili diris ion neatenditan?” — “Ne, ni nur interŝanĝis niajn salutojn kaj hejmajn novaĵojn... Nur unu diro ŝajnis stranga; kiam ili trinkis la akvon, Mosko demandis al Tosko, ‘Ĉu vi vidas ĝin?’ kaj Tosko respondis, ‘Jes, mi vidas ĝin.’ Mi ne scias, pri kio temis.”

Noktiĝis, kaj la geedzoj enlitiĝis.

Noktomeze, Mosko kaj Tosko revenis. Mosko staris apud la pordo, kaj miaŭsis, dum, protektita per la atentiga bruoj tie, Tosko ŝteliris en la domon.

“Edzinjo,” diris la edzo, “ia kato miaŭsas ie. Ĉu vi metis la fumajitan viandon en sekuran lokon?” — “Jes, Eĉjo,” respondis la edzino, “ĝi pendas alte, en la tegmenta interspaco.” — “Bone.”

Dume, Tosko rapide grimpis sub la tegmenton, deprenis la viandon, portis ĝin eksteren al la lojale miaŭanta Mosko; kaj la du fratoj forkuris.

Sed ilia bofrato, kiu tamen aŭdis ian strangan bruon, ellitiĝis por kontroli, ĉu la viando estas sekura. Kiam li trovis, ke ĝi ne plu pendas sub la tegmento, li kiel eble plej rapide eliris, por ĉasi la ŝtelinton.

Dume, Tosko donis la viandon al Mosko, kiu dum tempo portis ĝin; poste, kiam la ŝarĝo laciĝis lin, li redonis ĝin al Tosko. Estis do Tosko, kiu portis ĝin, kaj tial piediris malpli rapide, kiun la bofrato atingis. Komprenante, kiel estas, la bofrato diris al Tosko, “Nu, vi laciĝis; estas mia vico, porti la viandon.” Li prenis ĝin, foriris en la mallumo, kvazaŭ antaŭen, poste turnis sin kaj iris hejmen, dum Tosko daŭre iris antaŭen. Malŝarĝite, Tosko rapide atingis Moskon, kaj tiam okazis belaj miskomprenoj: “Mi donis la viandon

al vi!” — “Ne, mi redonis ĝin al vi!”, ĝis finfine ambaŭ komprenis, ke iu trompis ilin, verŝajne la bofrato.

“Do, mi trompiĝis, mi rebonigos!” kriis Tosko, “atendu min!” Kaj li tiel rapide reiris al la domo, ke li alvenis antaŭ la bofrato. Tiam, ĉe la pordo en la mallumo, li tiel bone imitis la konatan voĉon de sia fratino, ke la kelkmonata edzo trompiĝis, kaj metis la viandon en liajn manojn. Tosko forkuris per sia tuta forto, kaj malaperis en la mallumon, kie li post laciga portado retrovis Moskon.

La du fratoj preparis fajron el branĉoj, trapikis la viandon per taŭga branĉopeco, kaj komencis rosti ĝin. Dume, la bofrato kaj lia edzino bele miskomprenadis unu la alian, ĝis ili fine komprenis, ke iu trompis ilin, kaj la bofrato denove serĉis la du rabistojn. Laodoro de la viando helpis lin trovi ilin. Li ankaŭ trovis arbon, kiun fulmo frapis kaj duone bruligis; do, li nigrigis sian vizaĝon per la braĝo, kaj subite aperis el inter du arboj, nigrega, kun la haroj malbonordaj, kaj kiel eble plej mordeme montrante la dentojn.

Mosko kaj Tosko, tiel surprizite, kredis sian bofraton albana luphara vampiro, kiu certe strangolos ilin. Ili tuj forlasis la viandon, forgesis sian lacecon kaj forkuris kiel du leporoj.

La nigravizaĝa bofrato reprenis sian viandon kaj reportis ĝin hejmen, kie, finfine, ĝi restis.

Matene, li diris al la edzino, “Edzinjo, iru kaj invitu viajn fratinojn tagmanĝi kun ni.” Ŝi iris, invitis la fratinojn, kaj akompanis ilin ree al la domo. Tie la geedzoj proponis al ili la fumajitan viandon, kiel rostajon. Ili penis manĝi ĝin, sed ili povis nek mordi nek maĉi ĝin; ĝi estis preskaŭ kruda kaj ege malmola.

“Franjo,” demandis Mosko finfine, “ĉu vi forgesis vian iaman kuir-arton?” — “Bofraĉjo,” demandis Tosko, “kial vi regalas nin per viando preskaŭ kruda?”

“Sed, bofratoj karaj,” respondis la edzo, “mi esperis, ke ĝi estos ĝuste laŭ via gusto, ĉar mi proponas ĝin, rostitan ĝuste tiel, kiel vi mem rostis ĝin.”

La du fratoj ekridis. “Ĉu vere estis vi, kiu fortimigis nin?” — “Jes, vere! Tamen, ni ne kverelu; ni estas tri ruzaj ŝtelistoj, kaj ni ĉiam estu bonaj kamaradoj!” — “Jes, vere vi estas inda edzo por nia fratino, inda ano de nia familio!”



Versareto — pri 'se'

Se morgaŭ ne ekpluvos, ni iros al la plaĝo.
Se supon ni ne havas, sufiĉas la fromaĝo.
Atentu pri la kerno, se manĝas vi daktilon.
Se daŭre vi petolos, mi batos la sidilon.

Se dento doloregas, do al dentisto iru;
Se celas vin pafonto, ne staru nur kaj miru;
Se tio estas raŭpo, ĝi iĝos papilio;
Se akvo solidiĝas, ni nomas ĝin glacio.

Se talpoj flugus alte, ĉu cignoj ektunelus?
Se elefantoj ŝrumpus, ĉu kampomusoj ŝvelus?
Se havus vi du buŝojn kaj ankaŭ nazojn tri,
Ĉu vin mem vi akompanus je ĉiu melodi'?

Se la ĉielo brilos, ni iros al la plaĝo.
Se la ĉielo falus, ne helpus la kuraĝo.
Se tio estas piro, ni manĝos ĝin kun kremo;
Se estus ĝi tapiro, malsamus la problemo.

Lingvaj Bariloj

Oni kredas, ke la granda duoninsulo en suda Meksikio, Jukatano, ricevis sian nomon pro miskompreno. Kiam la unuaj hispanaj konkerantoj alvenis en 1518, ili demandis al kelkaj indiĝenoj, hispane, "Kiel vi nomas ĉi tiun regionon?" La indiĝenoj, kiuj neniam antaŭe aŭdis la hispanan, kaj eble eĉ ne sciis, ke ekzistas aliaj popoloj, tuj respondis, "*Jukatan?*" kio en ilia lingvo signifas, "Kion vi volas diri?"

Novaj Proverboj

Azeno kun ora kolĉeno estas ankoraŭ azeno.
Ĉion beligas arda amo; hipopotaminon por hipopotamo.
Ĉu la sama regulo por tigro kaj mulo?
Prudento ektimas, se promesoj senlimas.

Humana Helpo

Kvankam neŭtraleco kiel eble plej strikta, pri politiko kaj religio, devas esti baza principo de UEA, tiu organizo funkcias ne nur por kunligi esperantistojn kaj propagandi la lingvon. Ĝi konstante difuzas internacian amikecon, aranĝas kulturajn interŝanĝojn kaj diversmaniere kontribuas al la solidareco de la tuthoma familio.

La malavareco de multaj esperantistoj, kune kun la organizaj funkcioj de UEA, ebligis diversajn helpojn al multaj individuaj esperantistoj malriĉaj; ankaŭ al tiuj, kiuj pro registaraj reguloj neniel povas sendi ian pagon eksterlanden. (Ekzistas landoj, kie oni ne povas eĉ aĉeti internaciajn poŝtajn respondkuponojn!) UEA aranĝas por elektitaj esperantistoj senpagan membrecon, vizitojn al Universalaj Kongresoj, provizon de klerigaj kaj propagandaj materialoj, aliajn helpojn.

Sed UEA helpas ne nur esperantistojn. Dum la Unua Mondmilito, 1914–1918, kruelaj cirkonstancoj disigis familiojn, disigis gamikojn, tranĉis tre diversajn rilatojn. Hector Hodler, la fondinto de UEA, kies sidejo, feliĉe, tiam situis en Ĝenevo, en neŭtrala Svislando, proponis, per anoncoj en centoj da gazetoj, ĝeneralan servon por rekontaktigi disigitajn familianojn, perante privatajn korespondaĵojn tra Svislando. UEA faris sistemajn helplaborojn ne nur pri perado de korespondaĵoj, sed pri serĉado de perditoj; sendado de bezonataj objektoj al suferantoj; helpo al civiluloj, kiuj, subite trovinte sin ‘malamikoj’ en fremdaj landoj, estis puŝitaj en koncentrejojn; rehejmigo de infanoj kaj gejunuloj, kiujn militaj konfuzoj disigis de la familioj; helpo al militkaptitoj. UEA multe kunlaboris tiutempe kun la Ruĝa Kruco; sed estis UEA mem, kiu prizorgis disigitajn civilulojn.

Tiu humana helpo komenciĝis malgrandskale, sed iĝis vere grandskala. Antaŭ la fino de la milito, meze 400 informpetoj ĉiutage atingis UEA; en unu jaro UEA plenumis pli ol 100 000 servojn. Tiu vasta laboro, kiu mildigis la suferojn de certe almenaŭ 500 000 homoj, estis tute senpaga; UEA postulis de ĉiu helpoto du respondkuponojn, kontribuaĵon al afrankokostoj, sed UEA-delegitoj kaj aliaj helpantoj serĉadis, peradis, informadis, ofte tre sinofere, sen materia kompenso.

Dum la Dua Mondmilito, 1939–1945, militaj cirkonstancoj estis eĉ pli kruelaj; sed la servo «Esperantista Interhelpo» savis multajn viktimojn de la nazia teroro; peris korespondaĵojn kaj nutraĵojn al suferantoj — inter ili membroj de la familio Zamenhof; kaj laŭeble daŭrigis helpon al milit-viktimoj ĝis longe post la fino de la milito. Kompreneble la sistema nazia persekutado de esperantistoj kaj malamo kontraŭ Esperanto ege malhelpis tiajn servojn.

Daŭras humana helpo tre divers-specca; la Delegitoj de UEA ofte faras unuopajn servojn, pri kiuj aliaj ne scias, sed kiuj en diversaj situacioj solvas problemojn aŭ mildigas suferojn.

Modesteco

Junulara opero-societo planis prezenti la faman operon de Puccini, *Sinjorino Papilio*. Sed kelkaj plenkreskuloj penis mal-kuraĝigi la gejunulojn: “Estas tro malfacila verko por vi” ... “Vi ne estas sufiĉe maturaj” ... “Junulara societo ne indas por prezenti *Sinjorino Papilio*” ... kaj tiel plu, kaj tiel plu.

Finfine la juna prezidanto demandis unu el la deadmonantoj: “Ĉu vi estos kontenta, se ni prezentos *Fraŭlino Raŭpo*?”

La Arto Reklami

Usonano volis vendi salmo-karnon en skatoloj, sed temis pri specio de salmo, kies karno estas blanka. Homoj, kiuj atendis, ke salmo-karno estu rozkolora, ne volis aĉeti. Ĉu kolorigi la karnon? ĉu presigi sur la etikedo sciencan klarigon? ĉu bankroti?

La komercisto presigis sur la etikedo: “*Aŭtentika blanka salmokarno. Ni garantias, ke ĝi ne ruĝiĝos en la skatolo.*” Ĉiuj miloj da skatoloj rapide disvendiĝis.

Du bakistoj havis butikojn en unu strato. Unu metis grandan afiŝon sur sian fenestron: “*Ni vendas la plej bonan panon en la mondo.*” La rivalo momente koleris — poste metis sur sian fenestron afiŝon malpli grandan, malpli laŭtkoloran: “*Ni vendas la plej bonan panon en ĉi tiu strato.*”

En la montrofenestro de ladaĵisto, inter kaseroloj, patoj kaj diversaj iloj kaj utilaj objektoj, staris tableto kun la vortoj:

JUS ALVENIS
TRE BONKVALITAJ
TERMASOJ
por via kafo,
por labortago
aŭ libertempo.
Tri grandecoj.
Malaltaj prezoj.

Hazarda pasanto rimarkis la eraron, ridis, kaj eniris la butikon. — “Pardonu min, sinjoro, sed eraro en via fenestro estas nepre korektenda!” — “Ĉu?” — “Vi misliterumis vorton, kaj la rezulto estas vere komika. Anstataŭ *termoso* vi skribis *termaso*; kaj ĉiuj diros, ke ili ja ne deziras ter-mason en la kafo!” — “Ho, vere korektenda eraro! Mi dankas vin!” — “Ne dankinde... nu, dum mi staras en via butiko... fakte mi bezonas novan kribrilon... ĉu vi havas?... iom malpli grandan?... jes, tiu ĉi ĝuste taŭgas... jen la mono... dankon.”

Kiam la aĉetinto estis preta foriri, la ladaĵisto mallaŭte diris: “Ĉar vi estas bonhumora sinjoro, mi flustros ion al vi... sed bonvolu ne menci tiun ekstere. Mi ne korektis mian eraron; nur hodiaŭ matene dek du personoj envenis, por atentigi min pri ĝi... kaj dek unu el ili, dum ili troviĝis en mia butiko, rimarkis ion, kion ili deziras aĉeti.”

14. EL LA BUŜOJ DE INFANOJ

Infanoj ofte ridigas plenkreskulojn, per demandoj, konjektoj aŭ miskomprenoj, kiuj ŝajnas ege komikaj.

Ni ne pensu arogante, ke la komikaj eraroj de infanoj pruvas ian intelektan malsuperecon. Infanoj ja ne estas aparte stultaj homoj; ili estas nur homoj relative senspertaj kaj sensciaj. En preskaŭ ĉiu elementa lernejo, kredeble troviĝas nunmomente almenaŭ unu infano, kiu estas pli inteligenta ol la lernejestro. Ni ne forgesu, ke iam eta Ejnstejno ne sciis kio estas kvar aŭ naŭ; iam eta Ŝekspiro ne sciis kiel skribi sian Patro-Nian; iam eta Markso ne sciis, kio estas banko; iam eta Hokusajo ne sciis, kiel desegni eĉ unu folion.

Ofte iu ŝajne absurda diro de infano fakte atestas pri inteligenteco; ĉar ĝi rezultas de ia analogio, kiu estas same racia kiel multaj aliaj analogioj, sed maltrafas pro ia faktoro, pri kiu la infano ne povas scii. Multaj miskomprenoj, multaj eraroj, precipe lingvaj, fontas el atendo, ke lingvoj, kutimoj, homaj procedoj, estas pli logikaj ol ili estas. Infano, kies eraro dum lernado de la nacia lingvo amuzas la plenkreskulojn, eble diras ion, kio en Esperanto estus tute ĝusta; naiva demando de infano foje implicas profundan nekonscian kritikon de ia socia maljustaĵo aŭ malsaĝaĵo.

Hans Andersen, dano, kies fabelojn Zamenhof tradukis, plurfoje sugestas en ili kiel la naivaj diroj de infanoj ofte atestas pri inteligenteco aŭ bonkoreco. Proverba en multaj landoj iĝis aludo al la Andersena fabelo pri la novaj vestoj de la imperiestro, pri kies nudeco ĉiuj pro malnoblaj motivoj mensogas, ĝis infano, tro juna por hipokriteco, diras, ke la imperiestro estas nuda.

Ni ne malestimu la infanojn; infano estas homo, kiu almenaŭ ankoraŭ ne fuŝis sian vivon; sed tio ne signifas, ke ni ne ĉerpu amuzon el diroj, kiuj al pli maturaj oreloj estas komikaj.

Kelkfoje la manko de adekvataj esprim-rimedoĵoj kaŭzas strangajn difinojn, kiel ĉe la knabineto, kiu respondis al la demando "Kio estas salo?" per "Ĝi estas tio, kio igas terpomojn gusti tre aĉaj, kiam ĝi malestas." Aŭ tiu knabo, kiu kredeble jam konceptis

pri aĝo laŭ naskiĝdatrevenoj, sed ne pri pli precizaj detaloj; kiam oni demandis lin pri la aĝo de la nova bebo, li respondis, “Nul.” Peto al tre junaj lernejoj, difini avinon, elvokis difinon iom konfuzan biologie: “Avino estas sinjorino, kiu ne havas proprajn infanojn, do ŝatas la etajn geknabojn de aliaj.” — “Ili ne devas esti tre lertaj, nur respondi al demandoj kiel, ekzemple, kial hundoj malamas katojn aŭ kial Dio neniam edziĝis.” Jen difino, kiu eble enhavas etan riproĉon al ni aliaj: “Avino estas io, kion ĉiu bezonas, precipe se vi ne havas televidilon, ĉar avinoj estas la solaj plenkreskuloj, kiuj havas tempon.”

Patrino kaŝaŭskultis sian kvinjaran knabineton, kiu konversaciis kun la fenestro-purigisto. “Ĉu vi havas fratinojn?” — “Unu etan fratino.” — “Ĉu vi havas fratojn?” — “Ne. Unu granda knabo loĝas ĉe ni, sed lin ni devas nomi Paĉjo.”

Ĝemeloj foje perpleksigas infanojn. Knabineto, nove alveninte en lernejon, iom ludis kun unu el du ĝemelinoj identaj. Poste ŝi rimarkis la duan ĝemelinon en alia parto de la ĉambro; kaj demandis al la instruistino, “Ĉu vi scias, ke tie troviĝas pli da ŝi?” Nove alveninta najbarino penis amikiĝi kun knabeto: “Oni diris al mi, ke viaj gepatroj havas du parojn da ĝemeloj. Kiel bele! Ĉu vi estas unu el la ĝemeloj?” — “Ne, mi estas nur rezerva parto.”

Infano vidis elefanton, kaj kriis, “Paĉjo, rigardu la bovinegon, kiu portas siajn kornojn en la buŝo kaj manĝas fojnon per la vosto!” Alia infano vidis junan bovidon, kaj ĝoje konjektis, “Vidu, panjo, certe tio estas unu el tiuj bovinetoj, kiuj donas lakton densigitan!”

Kaj estis iom da poezio en la difinoj de knabeto, kiu rigardis la noktajn ĉielon kaj diris, “Ho, rigardu la orajn najletojn en la ĉiela tapiŝo!” aŭ de tiu, kiu vidis en la aŭtomobila parko flakojn, kolorigitajn per benzino aŭ oleo, kaj atentigis sian patrinon: “Rigardu la mortajn ĉielarkojn.”

Misprononcoj aŭ komikaj uzoj de neĝustaj vortoj estas malofte tradukeblaj, sed jen kelkaj esperantigitaj: “Vulkano estas monto, kiu elverŝas *lavon*.” — “La osto antaŭ mia ŝultro estas mia *kuniklo*.”¹ — “Ĉiu voĉdonis per *balado*.”² — “Tentis Evan la *serĝento*.” — “Paĉjo *rosta* bedojn en la ĝardeno.”³ Sed tiaj eraroj ne venas el la buŝoj nur de infanoj; ĉiu, kiu ne sufiĉe kontrolas en vortaro, pli-

1. klaviklo; 2. baloto; 3. rastas.

malpli frue regalas nin per io simila, invitante nin vidi la *fosilon* de pterodaktilo en la muzeo, anstataŭ la *fosilion* — jen epokfara scienca revolucio, ilojn uzanta besto antaŭ la Homo; aŭ peti *lupon* por legi tiujn malgrandajn literojn, kvankam *lupeo* estus pli utila.

Knabeto, gastigante ĉe la avino, skribis al la gepatroj: “Avinjo tiel multe suferas pro artrito, ke ŝi ne povas levi la brakojn super la kapon — simile pri la kruroj.” Sed jen tri respondoj tute inteligen-taj, kvankam komikaj:

La kuracisto ordonis al knabeto, “Montru la langon.” La knabeto elmetis nur la langopinton. “Ne tiel; plene elmetu ĝin.” — “Mi ne povas; ĝi estas fiksita.”

“Kiam estas la favora tempo, por pluki fruktojn?” — “Kiam neniu rigardas kaj la hundo dormas.”

Vizitanto tre maljuna, kiu eĉ juna neniam estis bela, demandis infanon, “Kion vi pensas pri mi?” — Silento. — “Nu, do diru, kion vi pensas pri mi?” — Silento. — “Ej, knabeto, kial vi ne respondas al demando, kion vi pensas pri mi?” — “Ĉar mi ne deziras esti vergita.”

Kaj infano ofte faras demandon, kiun plenkreskulo ne povas solvi; kiel ekzemple, kiam panjo insistis, ke seĝoj estas por homoj, korbo aŭ la planko por hundoj, do Rufulo la hundo ne rajtas sidi sur seĝo; kaj la filo demandis, “Jes, mi komprenas, ke seĝoj estas por homoj; sed kiel Rufulo scias, ke li estas hundo?”

Certe multaj patrinoj ridetos pri tiu knabeto, kiun kutime Panjo tre malfacile ellitigis matene; unu tagon li tamen leviĝis frue, vidis belegan sunleviĝon, kaj demandis Panjon, “Ĉu ĝi iam faris tion antaŭe?”

Eble ne ĉiuj panjoj estas sufiĉe fortanimaj por same rideti pri tiu knabino, kiu, pro granda eksciteco kiam ŝi vestis sin por iri al sia unua balo, senpense demandis, “Panjo, ĉu vi iris al similaj eventoj, kiam vi estis vivanta?”

Komika sed iom kortuŝa estis la eraro de du jamajkaj infanoj, unu dekjara, la alia okjara, antaŭ multaj jaroj. Ili estis kutime sufiĉe bonkondutaj, sed iam, kiam la patro, simpla laboristo, negro, profunde dormis, ili prenis sitelon da kalkaĵo kaj kalkis lin. Li bridis sian koleron, por unue demandi la knabojn, kial ili, kutime ne tro petolemaj, faris ion tiel malsaĝan. Ili volis nur helpi: pluraj

homoj diris al ili, ke blankaj homoj kutime perlaboras pli da mono, ol nigraj homoj.

Infano, leginte multajn epitafojn en tombejo, demandis la tombejestron, “Kie do oni enterigas la malbonajn homojn?”

Kredeble la plej ĉarmaj eraroj de infanoj estas tiuj, kiuj rezultas el ia analogio, kiel tiu de la knabeto, al kutimiĝinte al televidaj reklamoj, kiu, kiam li por la unua fojo vidis ĉielarkon, demandis, “Kion ĝi reklamas?”

Iam, dum la lasta jarcento, knabeto perdis la blankan muson, kiu estis lia amata dorlotbesto. Sed li konsolis sin, “Ĉu ĝi ne iros al la brunaj musoj kiel misiista muso, same kiel blankaj homoj iras al la nigraj kaj brunaj homoj?”

Dum libertempo, panjo permesis al knabineto la specialan regalon de rajdado sur plaĝa azeno; sed kiam la knabineto sidis preta sur la azena dorso, la besto rifuzis ekiri. “Do, Panjo,” petis la knabineto, “nun enmetu la moneron.”

Infanoj rigardis, kun granda intereso, televidan programon pri fama kurĉevalo; kaj poste kun granda intereso demandis, “Kiam Avo emeritiĝos, ĉu tiam oni uzos lin por bredado?”

Knabino, jam sufiĉe aĝa por fari difinitajn tasketojn ĉe la lernejo, entuziasmiĝis pri la nova trezoro de la familio — griza papago. La gepatroj klarigis al ŝi, ke se ŝi deziras, ke ĝi lernu diri ian frazon, ŝi devos ripeti kaj ripetadi tiun frazon al la papago. Unu matenon, Panjo vidis la knabinon instrui la papagon, ripetante al ĝi, “Saluton, Liliana!” Venis la horo, kiam Liliana devis ekiri al la lernejo. Ŝi skribis «*Saluton, Liliana!*» sur karton, tre klare, metis la karton en la kaĝon, kaj ordonis, “Nu, parkerigu tion, antaŭ ol mi revenos el la lernejo!”

Novaj Proverboj

Pardonu facile, por vivi trankvile.

De la pasero ne postulu, ke kafotasiojn ĝi kalkulu.

Per la kri’, “Mi, mi, mi!” — tiel ni komencas krimi.

Jes, se iel flugus talpoj, ili flugus super Alpoj.

Tiu, kiu multe klaĉas, korojn en la buŝo maĉas.

Versareto — pri 'eĵo', 'ujo' kaj 'ingo'

Se ĉesas la elektro pro fuŝo ĉe centralo,
kaj ĉio malaperas sub la mallum-vualo,
ne helpas blasfemado; saĝulo palpas tuj
por trovi la kandelojn en hejma kandeluj'.

Kandelon li starigas en ia kandelingo,
kaj jam revenas eblo de scio kaj distingo;
sin prepari por preĝejo aŭ drinkejo oni povas,
kaj karbon en karbujo per kandela lumo trovas.

Se iu kudris vestojn por haremo de la bejo,
ŝi kudradis ĉiutage en palaco en kudrejo.
Bonorde ŝiaj iloj en la kudriluj' aspektis;
kaj fingron per fingringo prudente ŝi protektis.

Helpema Hundo [fakto]

Aŭstralia atleto, kies hejmo estis en Brisbane, brile sukcesis, kaj dum kelkaj jaroj ricevis multajn sportajn trofeojn: pokalojn, statuetojn, medalojn, ŝildojn. La plimulto estis el arĝento, kelkaj el oro. Li komprenis, ke tiu brila kaj valora kolekto estas forta tento por ŝtelistoj, kaj estos prudente, iom gardi ĝin.

Viro ema al liberaeraĵoj, li ŝatis hundojn; do li aĉetis grandan, fortan, inteligentan germanan ŝafhundon. Neniu ŝtelisto tre deziras renkonti koleran hundegon kun lupeca dentaro!

Tri tagojn post la aĉeto de la hundo, okazis io stranga. Unu arĝenta pokalo malaperis. Ĉio alia restis tute en ordo.

Poste, dua pokalo same mistere forvaporigis.

Dum la atleto penis elpensi ian klarigon pri la du pokaloj, bela arĝenta statueto malaperis.

En la daŭro de du semajnoj, alia statueto kaj kvin valoraj medaloj sekvis la pokalojn kaj unuan statueton, verŝajne al la nevidebla flanko de la luno, aŭ en Nigran Neniejon. Nenio alia en la domo estis difektita; la hundego restis trankvila; estis nenia signo, ke iu eĉ tuŝis la restantajn trofeojn.

La perpleksigita atleto, al kiu ne mankis kuraĝo, nur naŭ trofeoj, kaj kiu fidis al siaj forto kaj lerteco kontraŭ ŝtelisto, decidis pasigi nokton en la ĉambro, apud la restantaj trofeoj kaj la hundo.

Meze de la nokto, la hundo prenis medalon de la meblo, kaj senbrue kuris en la ĝardenon, kie ĝi enterigis la medalon.

La atleto bezonis tri semajnojn, por elfosi ĉiujn aliajn trofeojn. La hundon li vendis.

Pronoma Problemo

Iam en la deknaŭa jarcento, angla policano eskortis antaŭ la juĝiston junan ŝteliston. Li devis klarigi, ke temas pri junulino en viraj vestoj. Petite paroli kiel eble plej koncize, li komencis: “Se plaĉas al Via Juĝista Moŝto, li estas knabino; pli klare, ŝi estas ne knabo.”

La Obeema Kanibalo [fantazio]

En ĝangalo ankoraŭ ne esplorita, heroe sindediĉa misiisto trovis malgrandan tribon, kiu neniam antaŭe vidis misiiston. Dum tempo li estis en grava danĝero, ĉar tiuj sovaĝuloj estis kanibaloj. Sed, per siaj kuraĝo, afableco kaj kelkaj bone elpensitaj interesaj surprizoj, li baldaŭ gajnis ilian estimon kaj eĉ amikecon. Ili instruis lin pri multaj sekretoj de la ĝangalo; li donis al ili multajn novajn sciojn; kaj ili iom lernis la lingvon unu de la alia. La misiisto trovis, ke fakte pluraj el la tribanoj estas tre inteligentaj, tre kapablaj multe evolui. Kvankam li ne tute konvertis ilin al sia religio, li sukcesis iom modifi ilian sintenon pri diversaj aferoj; kaj li tre ĝojis, ĉar ili jam forlasis kanibalismen. Li decidis instrui al ili Esperanton.

Ili bonege progresis, kaj baldaŭ ili pli bone regis la akuzativon ol la misiisto regis la blovpafilon. La afero grandioze evoluis, kaj post tri jaroj, en la vilaĝo troviĝis Delegito de UEA, Vic-Delegito, kaj Fak-Delegitoj pri: Ĝangala Kuirarto; Simioj; Sorĉ-kuracado; Minimumaj Modoj; Tranazaj Ornamaĵoj. Post kvar jaroj, la plej inteligenta viro, Papag Falastuj (tielnomita pro sia brila pafado)

deziris iri al Universala Kongreso. UEA iom helpis lin mone, la Centra Oficejo sendis utilajn konsilojn, kaj la tuta tribo festis lian gloran foriron, preparante elitan festenon kun simioj, lacertoj, serpentoj, fruktoj, salatoj, kaj eĉ (ĉar vere estis okazo speciala) luksaj vermoj.

La misiisto ĝenerale tre fidis, ke Papag Falastuj, tiel inteligenta, lernema kaj observema, kondutos tute dece en Universala Kongreso kaj reportos multajn valorajn sciojn kaj pli bonan prononcon... Tamen, dum la lasta vespero li delikate menciis al li unu eblan tenton.

“Vi nepre memoros, ĉu ne, ke al eŭropanoj kanibalismo estas io tute abomena? Ili ankaŭ ne rajtas mortigi unu la alian, escepte tiam, kiam registaro faras specialajn grandskalajn aranĝojn; sed eĉ post tiaj organizitaj mortigoj, oni ne rajtas manĝi la viandon. Nu, kara Papag, vi tre zorgos, ke vi ne falu en vian iaman kutimon, ĉu ne? Vi trovos multajn bongustajn nutraĵojn — se iam dum la Kongreso vi trovos tempon por manĝi; do, neniam pensu pri peka manĝkutimo.”

Papag tre amike, kun multaj ĉirkaŭbrakoj kaj estimaj vortoj, adiaŭis sian noblan ekstertriban amikon, kaj turnis sian boateton en la direkton de la plej proksima urbo.

Li revenis entuziasme, kun multaj donacoj, memoriloj, bildkartoj, verdaj steloj, harbukloj, glumarkoj kaj cirkuleroj.

La misiisto estis tre kontenta pri liaj progreso kaj sukceso; sed unu tagon li hezite demandis: “Kaj kion vi manĝis eksterlande?” — “Vi pravas, ke dum Universala Kongreso estas malfacile trovi tempon por manĝi; do, mi plejparte manĝis en mia ĉambro, private. Mi nutris min precipe per panoj kaj bananoj, kvankam mi ankaŭ iom maĉis kanon.”

La misiisto sentis sin kontenta. La sovaĝuloj tre alkitimiĝis al sukerkano kiel frandaĵo, kaj malgraŭ iom asketa dieto, Papago aspektis ege forta kaj granda.

Sed la Loka Kongresa Komitato neniam trovis la hispanon, la du japanojn, du libananojn kaj irakanon, kiuj post la fino de la Universala Kongreso mistere mankis.



Nobla Reklamo

Instruisto en mezgrada lernejo metis en la klasĉambro afiŝon:

SENPAGE RICEVEBLA
ĉiusemajne,
lunde ĝis vendrede,
ŜCIO.
Alportu
viajn proprajn ujojn.

15. FABELOJ DE LA ESKIMOJ

Ekzistas eskima popolo, ĉirkaŭ 55 000; ekzistas eskima kulturo, kelkrilate unika kaj tre interesa; sed ne ekzistas aparta regno, 'Eskimujo'. La eskimaj triboj loĝas en Groenlando (dana teritorio), arktaj marbordoj, Labradoro, kaj la insulo Novlando (kanadaj teritorioj), Alasko (usona teritorio) kaj partoj de Siberio (sovetia teritorio). Fakuloj opinias, ke la eskimoj devenis de la insuloj Aleutaj, sude de Alasko; iliaj lingvoj apartenas al speciala, malgranda lingvo-grupo, la eskima-aleuta grupo. Iu, kies lingvaj konoj ebligas almenaŭ rekonon de la dana, la angla kaj la rusa, trovos sur mapoj kelkajn strange ekzotikajn nomojn en eskimaj regionoj: eskimajn aŭ parte eskimajn nomojn.

La eskimoj montris, probable dum ĉirkaŭ tri mil jaroj, mirindan kapablon vivteni sin en kondiĉoj de mortige malvarmega klimato, relativaj mankoj de arboj, plantoj kaj uzeblaj krudmaterialoj. Ilia tradicia kulturo estas vilaĝa; ofte ili loĝas somere en tendoj faritaj el feloj, kaj vintre konstruas kupolformajn neĝdometojn (iglojn); ili subtenas sin ĉefe per ĉasado, plejparte de fokoj, blankaj ursoj, rosmaroj, vulpoj arktikaj kaj karibuoj. Pro la ekstrema malvarmeco, ili povas vivadi sanaj, manĝante preskaŭ ekskluzive viandon kaj abundan grason. Ili havas tre detalajn, vivnecesajn konojn pri neĝo, glacio, la vetero kaj regionaj bestoj. Ili konstruas boatojn el fokfeloj, la unikajn eskimajn kajakojn, kiujn ili manipulas tre lerte; ili havas diversajn metiojn kaj riĉan folkloron.

Iliaj kontaktoj kun pli kompleksaj civilizacioj ne estis ĉiam kun la plej estimindaj ecoj de tiuj civilizacioj aŭ kun iliaj plej konsiderindaj reprezentantoj, kaj tiaj kontaktoj ofte difektis ilian propran primitivan kulturon sen havindaj kompensoj. Kvankam oni dezirus por la eskimoj ekzemple pli bonajn medicinajn servojn, aŭ okazojn por plikleriĝi, tamen estos bedaŭrinde, se eksterordinaraj kulturoj de kuraĝaj, memdisciplinitaj kaj interesaj triboj devos pereii.

Multajn detalojn pri la eskima folkloro savis dana esploristo kaj etnologo, Knud J.V. Rasmussen (1879–1933), kies patrino estis parte eskima. Li multe esploris kelkajn eskimajn regionojn kaj surpaperigis multajn detalojn pri la eskimaj vivmanieroj kaj folkloro.

La esperantistaro iomete atentis tiun eskiman kulturon: Poul Thorsen, en sia *Rozoj kaj Urtikoj*, poemaro aperinta en 1954, donis al ni sep vere interesajn kaj kortuŝajn tradukojn el la eskima poezio, sekvante tradukojn de Rasmussen. Kaj elstara ero de la Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko, en 1977, estis brila prezentado de teatraĵo *Inuk* (eskime, “homo”), kolektiva verko de Haraldur Olafsson kaj geaktoroj de la islanda nacia teatro: verko neordinara kaj tre potenca, kiu simbole prezentas la grandparte detruan influon de okcidentlanda kulturo sur la primitivan sed antaŭe ekvilibrantan eskiman socion.

Laŭ la specimenoj, kiujn kolektis Knud Rasmussen, ŝajnas, ke la eskimaj fabeloj estas inter la plej naivaj kaj senornamaj; sed ili restas interesaj kreitaĵoj el simplaj, malfacilaj vivoj tre proksimaj al la natura mondo.

La Virino, kiu Adoptis Ursidon kiel Filon

Maljunulino iam loĝis en eskima vilaĝo, en la dometo plej proksima al la marbordo. Kiam la junuloj ĉasis sukcese, ili portis al ŝi viandon kaj grason, por ke ŝi bone manĝu kaj plenigu sian lampo. Foje ili mortigis urson kaj alportis al ŝi porcion da ursa viando. Sed ŝi ne plu havis kunulon en la dometo.

Unu tagon, la junuloj portis hejmen grandan ursinon, kaj la maljunulino ricevis grandan viandopecon el la ripa regiono. Baldaŭ la edzino de tiu, kiu mortigis la urson, vizitis ŝin kaj demandis ŝin, “Kara maljunulino, ĉu plaĉas al vi la ido?” — Kaj donis al ŝi la malgrandan, malvarman ursidon, kredeble samtempe mortigitan. Estas por maljuna dentaro tre bone, havi tiel junan viandon.

La maljunulino ĝoje akceptis la afablan donacon, kaj, ĉar ŝi estis frostigita, metis ĝin sur la sekigan kradon por senglaciigi ĝin. Post iom da tempo — ĝi moviĝis iomete!

La maljunulino fandis pecon da graso kaj donis ĝin al la ursido, kiu trinkis ĝin. Ekde tiam la maljunulino adoptis la ursidon. La urs-

ido manĝis riĉan grasofeĉon kaj trinkis fanditan grason; tiel la maljunulino regule nutris ĝin; kaj ĝi rapide kreskis. Nokte ĝi kuŝadis apud ŝi, kaj varmigis ŝin; kaj ŝi havis amikon; kaj ĉar ŝi multe parolis home al ĝi, ĝi iom akiris homan menson. Kiam ĝi deziris manĝi, ĝi snufis. Kiam la najbaroj portis manĝaĵon al la maljunulino, ili ne forgesis pri la ursido.

Ĝi komencis ludi kun la eskimaj infanoj. La maljunulino instruis ĝin tiel, ke ĝi neniam uzis la ungegojn dum la ludado kun la infanoj, eĉ kiam ĝi deziris forpuŝi unu el ili. Tamen ĝi baldaŭ estis tiel forta, ke ofte ĝi rompis la lud-harpunon de iu infano, aŭ tro puŝis iun kaj plorigis lin. Tiam la junuloj komencis ludi kun la juna urso. Ĝi ĉiam kaŝis siajn ungegojn kaj neniam intence malbonfaris al iu ajn, sed baldaŭ ĝi iĝis tiel peza kaj forta, ke eĉ la plej fortaj junuloj ne volis ludi kun ĝi. Tiam ili ekpensis, ke ĝi povos helpi, kiam ili ĉasas fokojn. Ili staris ekster la dometo kaj vokis ĝin: “Urseto, urseto, venu kaj perlaboru vian porcion; venu kaj helpu nin ĉasi, uĉjo.”

La urso snufis al la maljunulino kaj eliris. La viroj instruis ĝin, resti tie, kie la vento ne portos ĝian odoron al la ĉasataj bestoj fortimige. Kaj ĝi bone komprenis, kaj multe helpis; ĉar ĝi estis pli forta ol la plej fortaj ĉasantoj, por ataki kaj mortigi; kaj pro la densega blanka hararo ĝi toleris veteron eĉ pli malvarman, ol toleris la plej eltenemaj ĉasistoj.

Sed unu tagon, la junaj ĉasistoj avertis la maljunulinon: “Ni renkontis nekonatajn tribanojn el la nordo, ĉasantajn. Ili ne sciis, ke Uĉjo estas nia amiko, kaj ili preskaŭ mortigis ĝin. Ni devos pripensi ian signon, kiu sciigos, ke ĝi estas nia frat-urso.”

La maljunulino plektis fokajn tendenojn, kaj lerte faris kolumon, kaj ekde tiam la urso ĉiam portis tiun kolumon. Baldaŭ ĉiuj eskimoj de la najbaraj vilaĝoj konis la amikan urson, kaj se ili erare ekĉasis ĝin, tuj kiam ili rimarkis la kolumon, ili lasis ĝin trankvila.

Sed estis tribo malproksima, kies vilaĝo situis norde eĉ de Angmagssalik¹; tiuj tribanoj aŭdis pri la urso, kiun oni ne rajtas ĉasi, kaj iu juna tribano fanfaronis, “Se mi vidos ĝin, ha! mi ĝin

1. **Angmagssalik**: urbo sur la orienta marbordo de Groenlando, ĉirkaŭ 50 km sude de la Arkta Cirklo. Inter la pli nordaj regionoj troviĝas, laŭ meritita omaĝ-gesto, «Knud-Rasmussen-Lando».

mortigos!” Tiuj, kiuj pli bone komprenis, deadmonis lin: “Ne, ne; ĝi loĝas kun maljuna adopta patrino, kiu bezonas ĝian helpon. Se iam vi vidos urson kun kolumo, nepre lasu ĝin trankvila.”

Kaj la maljunulino instruis la urson tiel: “Iam ajn, se vi renkontos nekonatajn homojn, kondu tu kvazaŭ ili estus viaj parencoj. Neniam misfaru kontraŭ ili, escepte se ili vin atakos senprovoke.” Kaj la urso obeis ŝin; kaj daŭre loĝadis kun la maljunulino; kaj helpis ĉasantojn, somere en la maro, vintre sur la glacio; kaj dividis sian kaptajn kun la eskimoj...



Sed venis ŝtorma, malluma vespero. Kiam la urso revenis, ĝi snufis al la maljunulino, kaj saltis sur la benkon, kaj gestis, ĝis ŝi eliris. Ekster la domo kuŝis homa kadavro, kiun la urso trenis tien.

La maljunulino kiel eble plej rapide lam-iris al la aliaj domoj, kriante, “Ĉu ĉiuj bone revenis? Mia urso trenis kadavron tien ĉi.” Sed ĉiuj triĉanoj ripozis hejme en bona ordo.

Matene, la viroj rigardis la kadavron, kaj rekonis tiun fanfaron-inton el la nordo. Kiam ili pli esploris la aferon, ili sciigis, ke li tiel ĉasis kaj turmentis la urson, ignorante ĉiujn konsilojn, ke finfine liaj propraj samtribanoj instigis la urson rezisti.

Iom poste, la maljunulino diris al la urso, “Vi devos forlasi min. Se vi restos ĉe mi, pli-malpli frue iu mortigos vin. Estus tre malĝojige.” Ŝi ploris kun multaj grandaj larmoj; kaj ankaŭ la kara urso metis sian nazon al la planko, kaj siamaniere ploregis.

Ĉiumatene, tuj post la sunleviĝo, la maljunulino eliris kaj rigardis la ĉielon; kaj dum restis nuboj, ŝi diris nenion plu pri foriro. Tamen, venis mateno, kiam la ĉielo estis tute sennuba; kaj tiam ŝi diris: “Urseto mia, bona uĉjo, estas taŭga tago por foriri. Iru kaj trouvi viajn malproksimajn parencojn.”

Ŝi ploris kaj ploris. Sed kiam la urso estis preta foriri, ŝi metis manon en fanditan grason, kaj kovris ĝin poste per fulgo. Kaj dum ŝi adiaŭis la urson, kun multaj larmoj, kaj la urso snufis al ŝi, ŝi karesis la blankan flankon de la urso.

La urso foriris. La maljunulino ploradis dum la tuta tago. Lamentis ankaŭ la junaj ĉasistoj, ĉar ilia kamarado devis foriri.

Sed estas homoj, kiuj diras, ke en la fora nordo, kie multaj ursoj vagas, kelkfoje ili vidas grandegan urson, grandan kiel glacimonto; kaj sur ĝia blanka flanko troviĝas granda nigra makulo.

Kial la Korvo Estas Nigra

La korvo estas nigra, ĉar ĝi estas tiel malbonhumora kaj obstina. Antaŭ longa tempo, la birdoj estis senkoloraj, kvazaŭ pecoj el ia nebulo; sed ili ricevis kolorilojn, por mem kolorigi sin.

La korvo kaj la ansero renkontiĝis, kaj interkonsentis, ke ili kolorigos unu la alian. Unue la korvo kolorigis la anseron. Li kolorigis lin plejparte blanka, sed kun elegantaj nigraj strioj kaj strekoj. La ansero estis tre kontenta kaj multe dankis. Ĝi prenis la penikojn de la korvo, kaj komencis kolorigi la korvon laŭ ĝuste la sama bela desegno.

Sed nun la korvo diris, ke la desegno estas malbela, aĉa, naŭza; la ansero estas tre mallerta, malbone faras la taskon. La ansero penis, la korvo plendis; la ansero daŭre penadis, la korvo pli laŭte plendadis kaj finfine tute koleriĝis, kvankam la ansero lerte laboris; grake kaj bekoklake la korvo insultis la anseron.

Tiam la pacienca ansero finfine tre ofendiĝis, prenis la poton de nigra farbo, kaj plaŭd'! ĵetis la tuton sur la korvon kaj lasis ĝin ĉie nigra.

Novaj Proverboj

Unu glaseto — vespera beno: multaj glasoj — ve-spira veneno.

Se vi ne volas helpi, ne staru tie por jelpi.

Pripensu takton, ŝparu barakton.

Magistro ŝatu mebliston, kiu ne povas legi; ĉar eble tiu, tamen, povas pli lerte segi.

Mankas taso kaj glaso; ĉu troviĝas kalabaso?

Malhonesta Mediumo

Ekzistas multaj spiritistoj, kiuj sincere strebas al sanktaj scioj kaj virta vivo, sed ĉiu grego ie havas nigran ŝafon...

Knabeto akompanis sian patrinnon al spiritista seanco. La mediumino vidis naivan infanon, kaj miele demandis, "Al kiu vi deziras paroli, knabeto?"

"Al Avo."

La mediumino eksilentis; ĉiuj atendis; subite el la buŝo de la mediumino vira voĉo klare demandis: "Kion vi deziras do scii, kara eta nepo?"

"Kiel vi eniris ĉi tiun ĉambron, Avo, ĉar mi lasis vin sidanta en la aŭtomobilo?"

Versareto pri 'op', 'obl' kaj 'on'

Pensu vi pri kilogramo
da butero (ne da amo).
Triobligu ĝin, kaj tri

kilogramojn havas vi.
Se subite, post futbalo —
oni kredus, post batalo —
jen la knaboj, dekduope,
venas kun la pan' galope,
kaj sesonon ekdigestas,
du mil kvincent gramoj restas.
Vi pripensas bak-bezonojn,
flankenmetas kvar kvinonojn;
kvincent gramojn nun vi havas.
Se venonta festo gravas,
kaj por cent (dekoble dek) vi
devas nutroplanojn sekvi,
kaj sandviĉajn dudekopojn
fari por plenŝtopi kropojn
(jes, po dudek sur telero),
kvinoniĝos la butero;
nun cent gramojn vi disponas.
Tiam iu telefonas.
Vi revenas post moment',
sed jam mankas tiuj cent,
kaj vi veas, sakras, blekas,
dum la kato lipojn lekas.

Entreprenemo

Juna belgo, en Bruselo, entuziasmiĝis pri siaj kolomboj, kiuj ofte gajnis premiojn je flugokonkursoj. Sed li trovis sin en embaraso, kiam unu el liaj kolomboj subite ŝtelis nilonan ŝtrumpon de ies sekiga ŝnuro, kaj forflugis super la urbeĝo kun la rabaĝo en la beko. Pardonpetoj sekvis.

Sekvis ankaŭ prospera komerco: pro tiu embaraso, ĝermis en la juna belgo ideo: kaj li sukcesis dresi siajn kolombojn, tiel ke ili komencis porti super la urbeĝo pagitajn reklamojn, tenante en la bekoj malpezajn ŝtofostriojn.

Jen Privilegio!

En pluraj landoj, oni ofte proponas servojn “dum vi atendas” aŭ “en via ĉeesto”. Ĉi tio allogas klientojn, ĉar, ekzemple, estas malpli tede porti flikendajn ŝuojn al la ŝu-flikisto kaj samtage reporti ilin, ol fari du vizitojn.

Tamen, pasantoj iom miris, kiam ili vidis en la montrofenestro de juvelisto, apud belaj orelingoj sur velurkovrita montrotabulo:

NI BOROS VIAJN ORELOJN EN VIA ĈEESTO

16. PAROLANTAJ BIRDOJ

Multaj birdoj kapablas prononci kelkajn vortojn; eĉ, foje, vortojn taŭgajn al situacio, kiel ekzemple tiu kakatuo kiu, ĉiutage, aŭdante la preparojn por la temanĝo, ekkriis: “Koĉjo ŝatas teon!” kaj ripetis la diron ĝis ĝi ricevis sian pelveton. Sed neniu birdo vere konversacias, konscie interŝanĝante signifohavajn vortojn kun alia vivanta estaĵo.

Laŭ ĝisnunaj scioj, vera lingvo estas trezoro nur homa. Eĉ tre simplaj bestoj iom signalas unu al la alia; abeloj per danco informas aliajn abelojn, kie troviĝas mielo; noktpapilioj per odoroj vokas edzojn; sed tiaj signaloj restas instinktaj, senpensaj. Verŝajne plej alproksimiĝas al vera parolkapablo la simioj, ekzemple ĉimpanzoj, kaj la delfenoj. Parolantaj birdoj ne komprenas, kion ili diras; ili nur imitas. Tamen tiu imitado povas esti amuza, ofte ĝuste pro la netaŭgeco de la vortoj, kiel ekzemple kiam papago diras al iu severmora sinjoro, “Hej, fripona bubo!”

Pluraj specioj de birdoj kapablas paroli. Pacienca dresisto povas instrui kelkajn vortojn al birdo de la korva genro: korniko, korako, monedo. Pli bonaj parolantoj estas la aziaj majnoj, kiuj apartenas al la sama familio kiel la eŭropaj-nordamerikaj sturnoj. Sturnoj ofte imitas kantojn de aliaj birdoj, sed majnoj brile imitas homan paroladon. La plej lerta el ĉiuj parolkapablaj birdoj estas la hinda ‘monta majno’, granda nigra birdo kun orangkolora beko, flavaj kruroj kaj kapornamaĵoj. Foje oni renkontas en publikaj parkoj aŭ bestĝardenoj majnojn, kiuj multe amuzas la publikon per taŭgaj aŭ netaŭgaj vortoj; ekzemple, tiu nekonscie impertinenta majno, kiu kutime respondis al “Bonan tagon!” per “Bonan tagon!”, sed al ia dua konversaciero per “Idioto!” La aŭtoro renkontis majnon en londona apartamento; kiam sonoris la telefono, la birdo ekparolis: “Ha lo! Ha lo! Jes!... Jes!... Jes!” Ĉi tiu birdo travivis la bombadon de Londono dum la dua mondmilito; kaj se io falis brue, la majno avertis, “Aer-atakojn, Johano!” Dano en Kopenhago posedis majnon, kiu iel lernis krei insultajn vortojn al

policianoj, kiuj pasis surstrate. Finfine juĝisto ordonis oficiale, ke la posedanto devas aŭ instrui la majnon paroli ĝentile, aŭ teni ĝin en la domo, for de la strato.

Kvankam montaj majnoj plej perfekte imitas la homan voĉon, la plej ĝenerale konata parolanta birdo estas la papago, precipe la griza papago de Afriko¹, unu el la plej multekostaj birdoj, kiujn oni trovas en privataj hejmoj. Ankaŭ la flavkapa amazona papago² de Sud-Ameriko bone parolas. La papagoj apartenas al la zoologia ordo de la *psitakoformaj* birdoj, al kiu apartenas ankaŭ la ĉarmaj malgrandaj aŭstraliaj papagetoj aŭ melopsitakoj³, kiuj nun estas inter la plej popularaj kaĝbirdoj, estante inteligentaj kaj amikecaj sed ne multekostaj; la longvostaj sudamerikaj araoj, grandaj birdoj kun brilaj koloroj; kaj la diversaj kakatuoj de Aŭstralazio kaj Malajzio.

La imitemo de papagoj amuzadis homojn dum jarcentoj, probable dum jarmiloj. Tre primitivaj popoloj dresis ilin kiel dorlotbestojn; verkoj de la helena kaj la romia civilizacioj jam aludas la parolkapablon de la afrika griza papago. En multaj lingvoj oni uzas papagon kiel simbolon de malinteligenta ripetado: “lernejo ne devas esti papagejo” — “li nur papage ripetas tion, kion asertis la oficiala bulteno” — “oni daŭre papagumas argumentojn kontraŭ Esperanto, jam milfoje refutitajn.” Ankaŭ *psitakismo*, kvazaŭ ‘papaga malsano’, estas malsano, kiu devigas la viktimon sence ripeti la lastan aŭditan silabon.

Papagoj povas longe vivi en kaĝoj; ofte pli ol kvindek jarojn; la probable fidinda rekordo estas ĝis nun sepdek du jarojn, kvankam se iu papago, kiu mortis en Anglujo en 1975, vere naskiĝis (jam en kaĝo) en 1870, ĝi vivis 104 jarojn. Do papagoj vere povas iom iĝi kvazaŭ familianoj. Ili amuzas homojn ankaŭ per kutimo, kiun neniu alia birdo havas: ili uzas la piedojn preskaŭ kiel manojn, ekzemple povas teni panpecojn per la ungoj kaj formordi pecojn, simile al homo, kiu manĝas sandviĉon.

Sovaĝaj papagoj en ĝangaloj ne imitas eksterajn sonojn; ili nur grakas, kriĉas, pepadas. Enkaĝigite, ili komencas imiti — ne nur homajn vortojn, sed ridojn, plorojn, segilojn, fajfilojn k.t.p.

1. *Psittacus erithacus*

2. *Amazona ochrocephala*

3. *Melopsittacus undulatus*

Foje tiu imitemo estas praktike utila. Iam sveda pastro instruis al sia papago etan porinfanan preĝon, kaj ĝi helpis en diservoj por infanoj. Verŝisto en drinkejo en Paragvajo dum unu jaro enspezis 15 000 dolarojn, ĉar li instruis al sia papago diri “Dio benu Usnon,” kaj la usonaj turistoj lasis monerojn en eta ujo “Por mia greno”. Dum multaj jaroj, ĝis 1965, allogaĵo en drinkejo en Oksfordo, Anglujo, estis verda papago, kiu konstante sidadis sur la bufedo vintre, sed somere, ekstere en sia kaĝo. Somere, vizitantoj instruis al ĝi multajn fiajn vortojn, per kiuj ĝi poste kaŭzis multajn ridojn.

Anglino savis sian sanon pro la imitemo de sia papago. La birdo komencis tusi. Ŝi metis la kaĝon pli proksime al la kameno, sed la birdo daŭre tusadis. La veterinaro trovis la birdon tute sana, sed demandis al la virino, kiom da cigaredoj ŝi fumas ĉiutage. Per fumado, ŝi tusadigis sin mem, kaj la papago nur imitis ŝin. La virino ŝokiĝis kaj ekde tiam ne plu fumis. Malaperis baldaŭ ŝia tusado kaj la tusado de la papago.

En 1979, japano rricevis sian amatan melopsitakon, Piiko Ĉan, ĉar la eskapinta birdo flugis en oficejon kaj konstante ripetadis: “Naŭ, kvarcent-unu.” Sekretariino portis ĝin al la urbodomo, kie tre inteligenta funkciulo konstatis, ke ĉi tiuj numeroj devas esti parto de adreso en nur unu loĝbloka komplekso en Tokio. Kaj ĉe la pordo de apartamento sur la kvara etaĝo de la naŭa bloko, la mastro ege ĝojis, rehavi sian birdon.

Malpli utila estis la ripetemo de papago, kiu apartenis al argentinano, Luizo, kiu portis ĝin en aŭtobuso en Buenos-Ajreso. La birdo diris laŭte, “Donu kison, mi amas vin!” Ruĝiĝanta kaj kolera sinjorino protestis; kelkaj viroj volis ĵeti Luizon — supozitan kulpulon — el la aŭtobuso; iu vokis policanon. Akuzite pri ‘insulta konduto’, Luizo ne sukcesis konvinki la juĝiston, ke li neniel kulpas, sed ke nur la papago diris ion netaŭgan. La juĝisto pretiĝis por ordoni punon, kiam subite la papago, en la juĝejo, denove laŭte kriis, “Donu kison, mi amas vin!” Do, lastmomente la juĝisto deklaris Luizon senkulpa; sed ordonis al li, ke li ne plu portu la papagon en aŭtobusoj.

En 1980 la papago de italo subite komencis diri, “Karulino!” — vorteton, kiun la italo, tajloro, ne kutimis uzi en la hejmo. Li suspektis, ke io nebona okazas, komencis kaŝrigardi sian hejmon, kaj

sciigis, ke la bakisto vizitas lian edzinon, kredeble ne por interŝanĝi receptojn por kukoj. La ĵaluza tajloro pafis al sia edzino kaj al la bakisto, vundante ambaŭ; la papago komentis nur, “Karulino! Karulino! Karulino!” — ĝis la tajloro tordis ĝian kolon. Li poste konfesis al la policanoj, ke la malfideleco de la edzino estis sufiĉe humiliga, “sed ankaŭ tiu malbenita papago ŝajnis moki min!”

Oni rakontas ankaŭ anekdoton, eble pli tradician ol aŭtentikan, ĉar ĝi aŭdiĝis pri papagoposedantoj en tre divers-stilaj diktatoraj ŝtatoj. Ies papago iel forflugis, kaj aperis anonceto en la ĵurnalo: “Perdita – valora griza papago, de 158, Longstrato, Grandurbo, la 10-an de julio. Bona rekompenco atendas reportonton. Politikaj opinioj de papago ne samaj kiel tiuj de posedanto.”

Ankaŭ melopsitakoj povas iomete paroli, diri ekzemple: “Bela mi!” aŭ “Saluton!” Esperantistoj foje instruas al melopsitakoj, precipe verdaj, esperantajn frazojn. Amiko de la granda esperanta poeto Kalocsay iam rakontis, ke dum periodo, kiam Kalocsay intense suferadis, lia melopsitako komencis kortuŝe diradi hungare, “Ve, Dio mia!”

Kakatuoj ofte bone parolas. Kiam usonaj soldatoj troviĝis sur la Salomon-insuloj dum la dua mondmilito, ili foje aĉetis blankajn kakatuojn de la indiĝenoj kaj instruis la birdojn paroli. Unu kakatuo lernis ripetadi “Ordono de Bledsono, ordono de Bledsono” (la anglaj vortoj simile rimas), kaj tiel iom ridindigis iom tro ordoneman oficiron.

Oni rakontas pri kakatuo kiu, iam dum la deknaŭa jarcento, loĝis apud la biletvendejo de bestĝardeno. La edzino de la estro, kiu vendis biletojn, tiel ofte kriis, kiam multaj aĉetontoj alvenis samtempe kaj ekpuŝis anstataŭ orde vicliniigi, “Nur unuope, sinjoroj, mi petas!”, ke la kakatuo lernis la frazon. Kompreneble, kiam komenciĝis interpuŝado kaj la kakatuo ekkriis, “Nur unuope, sinjoroj, mi petas!” la aĉetontoj ekridis, bonhumoriĝis kaj pli ĝentile kondutis. Sed venis tago, kiam la kakatuo forflugis, kaj alteriĝis apud arba kolonio de frugilegoj.

Frugilegoj, same kiel multaj aliaj birdoj, ankaŭ kiel homoj, kiuj devus esti pli saĝaj, emas turmenti tiun, kiu iel malsimilas al ili; dum la bestĝardenestro serĉis sian amatan birdon, la frugilegoj amase atakis la kakatuojn, kaj kruele bekis ĝin. Feliĉe la estro alvenis sufiĉe frue, por savi la vivon de sia amiko; kortuŝite pro ĝiaj

vundoj, li tamen ne povis ne rideti, kiam li memoris, kiel la kaka-tuo, inter la atakantaj frugilegoj, plurfoje provis sian taŭgan frazon, “Nur unuope, sinjoroj, mi petas!”

La parolkapablo de pluraj birdoj iom stimulis la homajn fantaziojn; jen mallonga, iom malgaja fabelo el Tajlando, en sud-orienta Azio, pri tiu temo. (Tajlando, la sola lando de sia regiono, kiun eŭropa ŝtato neniam koloniigis, estis nomita Siamo, ĝis 1939.)

Kial Papagoj Nur Ripetas Homajn Parolojn

Antaŭ multaj jarcentoj, la birdo kiu loĝis ĉe homoj, kaj lernis paroli, estis ne la papago, sed la lorieta, kiu estis tiel inteligenta, ke ĝi vere konversaciis, dirante siajn proprajn opiniojn...

... ĝis venis tago, kiam terkultivisto vidis bubalon sur sia rizkampo. Kvankam li sciis, ke la bubalo apartenas al la najbaro, la kultivisto kaptis ĝin, mortigis kaj distranĉis ĝin, rostis parton de la viando kaj manĝis tion; kaj kaŝis la ceteron duone sur la tegmento de la rizejo, duone en la granda rizujo.

Kiam la najbaro demandis pri sia bubalo, la kultivisto respondis, “Mi tute ne vidis ĝin.” Sed la lorieta diris, “La mastro kaptis, kuiris, kaŝis. Li manĝis parton kaj flankenmetis parton. Li kaŝis parton sur la rizejo kaj parton en la rizujo.”

La kultivisto diris, “Jes ja, vi vidis viandon sur la rizejo kaj en la rizujo; sed estas mia propra viandostoko.”

“Li kaŝis parton sur la rizejo kaj parton en la rizujo,” insistis la lorieta.

Ĉar la kazo estis duba, la najbaro aranĝis, ke ili prezentu sin antaŭ la juĝisto morgaŭ.

La kultivisto decidis trompi la birdon. Kiam la lorieta dormis, li prenis ĝin el la kaĝo kaj metis ĝin en grandan kuirpoton, kiun li kovris per tuko. Li batadis, unue laŭte, poste mallaŭte, sur la poton, por fari bruon similan al tondro. Li ŝutis akvon multfoje sur la poton per kulerego, por fari bruon similan al pluvo. Frumatene, li remetis la dormantan lorieton en la kaĝon; kaj kiam li devis iri al la juĝejo, li kunportis la birdon.

La najbaro plendis pri la perdo de sia bubalo, kaj citis la atestaĵon de la birdo. La juĝisto petis la lorieton, ripeti sian atestaĵon.

“Li mortigis la bubalon, manĝis parton, kaŝis parton sur la riz-
ejo kaj parton en la rizujo.”

Sin defendis la terkultivisto: “Estas ja viando en mia domo, sed
ne de la bubalo de mia najbaro. Ĉu vi kredos stultan birdon, pli
facile, ol vi kredos homon?”

La juĝisto hezitis.

“Tiu birdo diras multajn sensencaĵojn. Nu, juĝista moŝto,
demandu ĝin pri io alia; demandu, kia estis la nokta vetero.”

La juĝisto demandis la lorieton pri tiu temo.

La lorieto respondis, “Estis mallume; pluvegis; multe tondris.”

“Aŭdu,” diris la terkultivisto, “la stulta birdo tute ne kompre-
nas ordinarajn aferojn. Ni ĉiuj scias, ke nokte la luno bele brilis,
tute ne estis tondroŝtormo, kaj eĉ unu pluvoguto ne falis. Ĉu la
atestaĵo de tia birdo estas utila?”

La argumento ŝajnis bona, kaj konvinkis la juĝiston kaj ĉiujn
ĉeestantojn. La juĝisto deklaris la terkultiviston senkulpa, kaj
ordonis, ke la homoj ne plu gastigu la mensogemajn lorietojn en la
hejmoj.

Do la lorieto reflugiĝis en la arbaron, kaj vivis laŭ sia unua vivo-
stilo, sen homa helpo.

Venis mateno, kiam la lorieto ekvidis sur arbo birdon grandan,
belan, kun plumoj verdaj kaj ruĝaj.

“Kiu vi estas?”

“Mi estas la papago. Mi venis el la suda lando, kaj nun mi
intencas loĝi en via lando. Mi parolas la homan lingvon.”

“Bonvenon! Estu feliĉa! Sed aŭskultu averton, ĉar havis mi
sperton. Kiam mi mem loĝis inter la homoj, mi diris miajn proprajn
opiniojn; sed la homoj forsendis min. Do, mi konsilas al vi, neniam
sincere diru vian propran opinion. Nur ripetu tion, kion homoj
diras. Ne diru la veron. La Homo deziras nur reaŭdi siajn proprajn
pensojn; li ne serĉas veron. Li ne deziras ricevi scion aŭ saĝon el
ekstere.”

La papago dankis la lorieton kaj sekvis ĝian konsilon. La
homoj bone nutris kaj prizorgis la papagon: sed ĝi ĉiam kaŝas la
proprajn opiniojn, kaj nur ripetas frazojn, kiujn homoj diras.

Tial la papagoj ankoraŭ restas dorlotitaj en homaj hejmoj.



Novaj Proverboj

Nesciemulo nesciu, sed sciantojn ne envidu.
Kutimojn ni respektu; konscienco nin direktu.
Majoritato gravas, tamen ne ĉiam pravas.
Remaĉu koleron, ricevu ulceron.

Pensiga Statistiko

Serioza medicina esploristo, post longa studado de statistiko el Usono, venis al jena konkludo: el ĉiuj mil junaj geusonanoj, kiuj persiste fumadas, probable unu mortos murdita; ses mortos pro strat-akcidentoj; kaj ĉirkaŭ 250 mortos pro malsanoj, kiujn kaŭzas tabako.

Aliaj Parolantaj Birdoj?

Iu bienulo aŭdis strangan bruon en la kokinejo noktomeze. Kun pafilo en la mano, li tuj iris al la kokinejo kaj malfermis la pordon. Ne estis lumo, sed li forte suspektis, ke iu ŝtelisto sin kaŝas.

“Kiu estas tie ĉi?” — Silento.

“Kiu estas tie ĉi? Respondu, aŭ mi pafos!”

Kaj iu balbutis el la plej malluma angulo: “V... v... vere, n... n... neniu estas t... t... tie ĉi, sinjoro; nur ni kokinoj.”

Okulego

La plej grandaj okuloj, kiujn sciencistoj ĝis nun vidis, apartenis al tre granda loligo, trovita en la maro de Nov-Zelando. La besto estis 21 metrojn longa, kaj la diametro de unu el ĝiaj vastaj okuloj estis 40 centimetroj.

Epitafo

Sube Gustavo Graso devas por ĉiam resti.
Li manĝis grandan manĝon, kaj ne povis ĝin digesti.

17. FABELOJ EL TURKUJO

Turkujo estas lando parte eŭropa, parte azia; ĝia civilizacio estas plejparte islama. La ĉefurbo estas Ankaro, kiu situas en Azio; sed la eŭropa urbo Istanbul, iam Konstantinopolo, antaŭe Bizanco, iam estis la ĉefurbo de la granda Bizanca Imperio, kaj poste de la Otomana Imperio; ĝi restas ege interesa, plena de historiaj memoriloj. Ankaŭ en Turkujo situas la antikva urbo Trojo, temo de la *Iliado* de Homero, poemo, kiu ege influis la eŭropan kulturon; kaj Hatusaso, iama ĉefurbo de la Hitita Imperio. Modernigita lando kun modernaj aktualaj problemoj, Turkujo estas vere kultura trezorejo por historiistoj kaj arkeologoj.

Tre dankinda kontribuado de Turkujo al la monda kulturo estas ĝia kuirarto tre bona, kiu influis la kuirarton de pluraj landoj.

La turkoj havas multajn fabeletojn pri folkloro heroo, Nasr-ed-din Hodja. Tiu sprita heroo aperas en similaj anekdotoj, sed kun diversaj nomoj, en diversaj landoj islamaj; ekzemple, li estas Goha en Egiptujo, aliloke Joha aŭ Abba Naŭŭas; foje li estas imamo, foje kadio, foje simpla kamparano aŭ azenkondukisto; sed la karaktero restas sama; Hodja estas naiva sed ruza; li venkas aliajn ne per forto, sed per sprito kaj elturniĝemo.

Hodja kiel Imamo

Venis la horo, vendrede, kiam Hodja devis prediki el la katedro en la moskeo.

Li laŭte demandis al la piaj islamanoj, “Ho fratoj! Ho noblaj kredantoj! Diru al mi sincere — ĉu tio, kion mi intencas diri al vi, estas jam konata al vi?”

Kvazaŭ unuvoĉe, la ĉeestantaro respondis, “Ne! ni ne scias; estas tute neeble, ke ni sciu, kion vi intencas nun diri al ni!”

“Nu, do,” diris Hodja, “kiel povas utili al vi aŭ al mi temo, pri kiu vi scias nenion?” Li venis malsupren kaj forlasis la moskeon.

La duan vendredon, la ĉeestantaro estis pli granda. Ĉiuj kun granda intereso atendis la predikon. Ili kredis, ke ili nun scias, kion diri.

Hodja supreniris, kaj diris el la katedro, “Ho fratoj! Ho noblaj kredantoj! Diru al mi sincere — ĉu tio, kion mi intencas diri al vi, estas jam konata al vi?”

“Jes,” ili ĉiuj kriis, “jes, imamo, tio, kion vi intencas diri, estas jam konata al ni.”

“Nu, do,” diris Hodja, “se tiel estas, ne valoras ke vi aŭ mi perdu la tempon.” Li malsupreniris kaj foriris. La ĉeestantaro preĝis kaj foriris.

La trian vendredon, ĉeestantoj plenigis la moskeon; kaj multaj el ili elpensis planon, finfine devigi la mallaboreman imamon prediki edife.

Denove Hodja demandis, “Ho fratoj! Ho noblaj kredantoj! Diru al mi sincere — ĉu tio, kion mi intencas diri al vi, estas jam konata al vi?”

Duono de la ĉeestantaro leviĝis kaj diris, “Jes, imamo, ni ja scias, kion vi intencas diri al ni.” Tuj poste la alia duono leviĝis kaj diris, “Ho, Hodja, klera imamo, kiel ni, kompatindaj malkleruloj, povus scii, kion vi intencas diri al ni?”

“Bone kaj sincere vi respondis,” diris Hodja, “kaj mi nun estos dankema, se tiu duono de la noblaj kredantoj, kiuj scias, kion mi intencas diri, afable klarigos ĝin al la alia duono.”

Kaj li malsupreniris, kaj foriris el la moskeo.

Hodja kiel Simpla Kamparano

Hodja breidis kokojn, kaj venis al la urbo por vendi siajn kokojn en la urba bazono. Ĉe la urbopordo, policano haltigis lin.

“Per kio vi nutris tiujn vendotajn kokojn?”

“Per tritiko.”

“Montru al mi la oficialan kvitancon, kiu pruvas, ke vi pagis la imposton super la tritiko.”

Hodja sciis nenion pri tiu imposto; do la policano kondukis lin antaŭ la kadion, kiu monpulis lin, deprenante preskaŭ la duonon de la profito, kiun li atendis ricevi per vendado de la kokoj.

Venontfoje, li respondis, ke li nutris siajn vendotajn kokojn per hordeo; sed ankaŭ super hordeo estis imposto, kaj la kadio de-nove monpunis lin.

Ĉiufoje kiam li devis porti vendotajn kokojn al la urbo, li provis novan deklaron pri la nutraĵo: milio, sezamo, rizo, faboj, kiker-roj; sed ĉiufoje la policano informis lin, ke ankaŭ ĉi tiu nutraĵo estas impostita; sekvis monpuno kaj duonigo de la profito.

Finfine Hodja trovis novan respondon al la policano: “Per kio vi nutris tiujn vendotajn kokojn?”

“Mi donis al ĉiu koko ĉiutage unu kupran moneron, kaj ordonis al ĝi, aĉeti tion, kion ĝi preferas.”

Hodja kiel Simpla Urbano

Hodja bezonis grandan kaserolon. Li vizitis najbaron, kaj prunteprenis grandan, belan, fortikan kupran kaserolon, por sia kuira tasko. Sed la granda kupra kaserolo tiel multe plaĉis al li, ke li deziris ne redoni ĝin.

Baldaŭ venis tiu tago, je kiu li, laŭ antaŭa promeso, devis redoni la kaserolon; sed li vizitis la najbaron, portante bonan sed tre malgrandan kaserolon, kies formo tute similis al tiu de la prunteprenita kaserolego.

“Kaj kio estas tio?” demandis la najbaro.

“Via kaserolino, kiun vi afable pruntis al mi, ĵus naskis ĉi tiun kaserolidon. Hodiaŭ ŝi estas ankoraŭ multe tro malforta post la akuŝo, por eliri mian domon. Mi do petas vin, hodiaŭ akcepti la idon, kaj la kaserolpatrino revenos, tuj kiam ŝi povos sendanĝere eliri.”

La najbaro iom miris, sed li volonte akceptis novan kaserol-eton, kaj kiam la edzino laŭte protestis, ke Hodja montris sin nefidinda kaj ekspluatas lian paciencon, li iom akratone ordonis al ŝi fermi la buŝon.

Post kelkaj tagoj, Hodja, kiu dume faris per la kaserolego diversajn utilajn kuirlaborojn, reportis ĝin, puran kaj sendifektan.

“Jen, mi rekondukis vian estimatan kaserolinon; ŝi nun fartas tute bone.” La najbaro kaj lia edzino ĝojis pro la bela profito.

Post kelkaj semajnoj, Hodja denove bezonis grandan kaserolon; do li vizitis la saman najbaron, kiu varme bonvenigis lin, facile konsentis pruntedoni la kaserolegon kaj ĝentile helpis Hodjan porti ĝin hejmen.

Pasis sep tagoj. – Pasis dua semajno. – Pasis tria semajno. – Nenio pri ia kaserolido!

Post monato, la najbaro vizitis la domon de Hodja kaj, kun multaj komplimentoj kaj ĝentilaj pardonpetoj, demandis, kiam la kupra kaserolego revenos. La edzino vere bezonis ĝin, por kuiri pilafon por pluraj gastoj.

“Ho ve, estiminda najbaro! Kara frato! ĉu neniu informis vin pri la malgaja evento?”

“Pri kio? mi aŭdis nenion pri via familio, kara Hodja.”

“Ho ve! via bela kaserolego mortis antaŭ du semajnoj!”

“Kion vi diras? Kaserolo mortis? Fi, mensogisto! trompisto! friponaĉo! malislama hundo!” Kaj la najbaro tiel kriis, insultis, piedfrapis kaj pugne minacis ekster la domo, ke scivolema homamaso rapide kolektiĝis kaj policano demandis, kio okazis.

Hodja klarigis, “Vere, via bela kupra kaserolo mortis dum ŝi estis ĉe mi. Estis la volo de Alaho, kaj ni devas tion akcepti, same kiel vi akceptis la kaserolidon, kiun via kaserolino naskis. Estas laŭ la leĝoj de la vivo, ĉu ne? ke io ajn, kio povas naski, ankaŭ devas morti. Do, penu kiel eble plej takte klarigi al la orfa kaserolido, ke la patrino forpasis.”

La amaso tuj konsentis, ke la klarigo estas bona, kaj la najbaro devis foriri, ja kun mieno tute taŭga por funebra tago.

Novaj Proverboj

Farinte akuzon, aŭskultu ekskuzon.

Nomu min “hundo” dudekfoje, finfine mi parolos boje.

Riparu etan truon, evitu grandan detruon.

Al ĉiu horo ĝia valoro.

Ne donis rigardon, sursidis do kardon.

Preteco por Krizo

Ĝuste ĉar li estis dediĉita patrioto kaj profesie ege kompetenta, brita vicadmiralato de la dua mondmilito estis timige rigora kaj provema. Li ofte subite improvizis fantaziajn krizojn, por provi la personojn kaj krizorutinojn sur la militŝipoj. Ĉiuj timis, kiam ili atendis lian viziton. Subite, meze de la kutima tre formala akcepto, li eble forĵetos sian kepon sur la ferdekon kaj diros al la plej juna maristo, “Jen bombo — kion vi faros?”

Unufoje lia provemo havis rezulton, pri kiu li apenaŭ rajtus koleri, sed kiun li ne antaŭvidis.

Maristoj en brile puraj uniformoj staris rigide sur brile pura ferdeko dum la vicadmiralato alvenis sur la ŝipon. Subite li deprenis sian vicadmiralatan kepon, riĉe ornamitan per orgalono, kaj ĵetis ĝin sur la ferdekon.

“Jen! Brulbombo ĵus falis tie! Vi! Kion vi faros?”

Juna maristo sciis kiel tuj agi pri brulbombo. Li senhezite piedbatis ĝin en la oceanon.

Kiel la Bestoj Parolas

Birdetoj kvivitas, aŭ pepas, aŭ kvikas;
klukas kokinoj, sed kok' kokerikas;
zumas abeloj kaj ĉirpas cikadoj,
sed hurlas la lupoj dum stepaj vagadoj;
vortojn prononcas papago (nur prunte),
sed porko plej princa parolas nur grunte.
Pro ies alveno, pro amo aŭ ĝojo,
la hundo esprimas la sentojn per bojo.
Pro vundo ĝi jelpas, ĝi grumblas minace,
kaj tiam ĝi montras la dentojn grimace.
Antaŭ jarmiloj kaj same hodiaŭ
la kata protesto aŭ plend' estas “miaŭ!”
Sed se lertaj karesoj kaj sino tre bonas
la kat' malmiaŭas — ĝi ĉarme ronronas.
Siblas serpento (kaj klakas krotalo)
sed henas sur kampo la nobla ĉevalo.

Homo perdita blasfemas aŭ veas;
perdita ŝafido nur staras kaj beas.
Kaj muĝas la reĝa leono afrika,
sed muĝas pli milde bovino amika.
Azeno iaas, kaj strigo ululas,
kaj par' de kolomboj pro amo rukulas;
aŭ pri la kolomboj — vi eble preferas
la vorton samsencan — pro am' ili kveras.
Kaj kantas kantbirdoj, kaj fajfas aliaj,
kaj kriĉas aliaj, sovaĝe laŭtkriaaj,
sed ĉiam anasoj (kaj ranoj) nur kvakas,
kaj gakas anseroj, kaj korvoj nur grakas.
Sed se el la cerboj forfalis tra truoj
la vortoj precizaj pri krioj kaj bruoj,
kutime vi pravas, malofte vi pekas,
se vi ĝeneraligas, kaj diras, “ĝi blekas.”

Strangaj Profesioj

En Francujo, antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj, oni vokis belan, ŝike vestitan junulinon al kortumo por atesti en iu proceso. Kiam la juĝisto demandis ŝin, “Ĉu vi havas profesion?” la junulino respondis, “Mi svenas.”

“Nu, ne timu, fraŭlino; vi devas nur atesti. Ĉu vi laboras ie?”

“Mi svenas.”

“Pedelo, donu al la fraŭlino glason da akvo!”

“Mi tre dankas vin, sinjoro juĝisto.”

“Nu, fraŭlino, ĉu vi sentas vin pli trankvila? Kio estas via profesio?”

“Pardonu min, sinjoro juĝisto; mi jam informis vin pri mia profesio. Mi svenas; mi estas teatra svenistino.”

Finfine la juna belulino komprenigis al la juĝisto, ke ŝi profesie ĉeestas sensaciajn dramojn, kaj reklamas ilin per siaj bele aranĝitaj svenoj en la plej emociaj momentoj.

En nia propra jarcento, en Ĉikago, Usono, mezaĝulino vizitis noktoklubon, kaj iu komediisto tiel ridigis ŝin, ke ŝia laŭta, daŭra, ĝoja ridado instigis aliajn ĉeestantojn ridi. La vespero tiel bone

sukcesis, ke la estro invitis la sinjorinon viziti la noktoklubon duan fojon, kiel nepagideva gastino. Ŝia ridkapablo tiel helpis krei gajan etoson, ke la estro dungis ŝin kiel profesion ridistinon; kaj dum longa tempo ŝi tiel perlaboris bonan salajron.

Besta Inteligenteco

Termitoj, insektoj iom similaj al formikoj, kolektive konstruas strangajn domojn, termitejojn, du aŭ eĉ tri metrojn altajn.

Ĉimpanzoj, kiuj tre volonte manĝas termitojn, inventis simplan ilon por havigi al si tiujn frandaĵojn. Ĉimpanzo ĉe termitaro trovas branĉeton; derompas ĝin, netigas ĝin ĝis ĝi estas taŭga stangeto senfolia, kaj puŝas ĝin en termitejon. La ĉimpanzo atendas kelkajn momentojn, dum multaj termitoj mordas tiun stangeton, kiu atakas ilian kastelon. Tiam la ĉimpanzo subite eltiras la stangeton kaj trenas ĝin inter siajn lipojn, plezure manĝante la termitojn.

Pensigaj Vortoj

“Antaŭ ol mi edziĝis, mi haviŝ ses teoriojn pri la edukado de infanoj. Nun mi havas ses infanojn kaj neniom da teorioj.”

Atribuita al Johano Wilmot, grafo de Roĉestro (1647–1680), angla poeto.

Alte kaj Malalte

Montgrimpano sur la plej alta monto de la mondo, Everesto, trovis araneojn tie sur alteco de ĉirkaŭ 6 770 metroj super la nivelo de la maro. Sur la sama monto oni trovis specion de stelario sur alteco de 6 135 metroj. Sciencisto en rusa sciencesplora ŝipo, en 1962, trovis asterion (“mar-stelon”) 7 584 metrojn sub la marsurfaco, en la Pacifika Oceano.

Malnova Viando!

Sovetiaj sciencistoj trovis kadavron de mamuto profunde sub la glacitavolo de arkta Siberio. Inter pli gravaj sciencaj esploroj, ili

tranĉis stekojn el tiu vasta viandomonto, preparis kaj kuiris ilin, kaj — sufiĉe kuraĝe — manĝis ilin. La mamutostekoj estis tute manĝeblaj kaj neniel malsanigis la manĝintojn.

Laŭ sciencaj kalkuloj, tiu viando devis esti ĉirkaŭ 50 000 jarojn aĝa!

Kelkaj Enigmoj

[Ĉiuj dependas de vortludoj. Ekzemple: “Kia sukeraĵo estas amata besto? = *Karamelo* («Kara melo».)]

1. Kiu gemo estas la plej religiema?
2. Kiu scienca esprimo ordonas al obstina besto malproksimiĝi?
3. Kiuj ordonoj plej taŭgas por kapti multajn homojn?
4. Kiu arterio estas infano de legomo?
5. Kiu konkfiŝo estas homo el tradicia rakonto?
6. Kiu vojaĝanto preferas altajn konstruaĵojn?
7. Kiu azia tribano plej taŭgas por friti fiŝojn?
8. Kiu besto (ja parenca al porko!) havas kanton pri miskonduto?
9. Kiu malfeliĉa evento estas miaŭa versaro?
10. Kiaj latitudoj ekscese vundas?

La Zodiakaj Konstelacioj

Jen *Ŝafo*, *Taŭro* kaj *Ĝemeloj*;
Senakva *Kankro* de la steloj;
Leono kun potenco vasta;
Virgo, la virgulino ĉasta;
Jen la *Pesilo* ekvilibra,
Skorpio kun vostaĉo vibra;
Sagitario en la listo
estas la alta Arkpafisto;
Jen *Kaprikorno*, kapro, egas.
(*Kankro* kaj li tropikojn regas.)
Jen brilas en ĉiela gloro,
Akvoportisto kun *Amforo*;
Kaj laste naĝas du trankvilaj
Fiŝoj kun vosto ore brilaj.

18. PENANTO KAJ PLENDANTO

[La du rolantoj povas esti du viroj, aŭ du virinoj, aŭ viro kaj virino.]

Sekretario de malgranda loka Esperanto-societo penas fari kelkajn taskojn en la «oficejo de la loka societo», tre eble anguleto en ies hejmo. Telefono; kelkaj dosierujoj kaj konsultlibroj; diversaj esperantaĵoj; skribpapero. Multaj leteroj atendas respondojn; pluraj leteroj sidas pretaj por enpoŝtiĝi. La sekretario, kiu aspektas laca, skribas leteron.

Sekretario "... kaj se vi povos ĉeesti almenaŭ ĉi tiun vere specialan kunvenon, ni tre varme bonvenigos vin denove. Samideane via..." (*Subskribas la leteron, metas ĝin en koverton, lekas kaj fermas la koverton kaj aldonas poŝtmarkon; flankenmetas la leteron sur la aliajn pretajn leterojn. Tuj komencas skribi alian leteron.*) "Kara sinjoro Zumakap, mi bedaŭras, ke vi perdis vian membrokarton, sed estas facila afero, sendi al vi novan." (*Trovas membrokarton en skatolo, aldonas detalojn; skribas adreson sur koverto.*) Jen la kvara fojo ĉi-jare, ke sinjoro Zumakap perdis ion. Mi estus danka, se li sendus afrankitan koverton. Nu, mi kaptu la okazon por iaj kuraĝigaj vortoj... "Ni tre ĝojos revidi vin, se eble, ĉe nia kunveno la dekan de marto, pri kiu mi jam sendis cirkuleron. Kun bondeziroj, samideane via..." (*Subskribas la leteron, pretigas ĝin por enpoŝtigo, flankenmetas ĝin sur la aliajn. Eklaboras pri nova letero.*) "Kara sinjorino Maksimiks, mi hezitas denove peti ion de vi, sed ĉu eble vi povos, por la kunveno la dekan de marto, denove baki aron de viaj bonegaj spicitaj biskvitoj? Fraŭlino Potopeto jam konsentis prizorgi la kafon. Mi estos tre danka, se vi afable respondos antaŭ la kvara de marto." Mi forgesas, ĉu ŝi loĝas ĉe numero 36 aŭ 63. (*Serĉas en dosierujo aŭ sliparo.*) Jen, fakte estas 163 — feliĉe, ke mi kontrolis. (*La telefono sonoras.*) Ha lo! Jes, jen mi kiu parolas. Ho, Karlo Kretenman! Ha lo, Karlo, kiel vi? Ho ve! Ne, vi nepre ne povos instrui viajn kursanojn morgaŭ vespere, se vi havas tiel fortan gripon. Jes, mi ja aŭdas ĝin je via voĉo. Mi tre dankas,

ĉar vi informis min — estas ege malbone, se lernantoj alvenas kaj trovas neniun ... nu, kion ni faru, Karlo? Helena ofte povas anstataŭi en krizo ... kaj vi scias, ke ŝi bone instruas ... sed mi scias, ke ĝuste ĉi-semajne ŝi vizitas la ĉefurbon ... kredeble la plej simpla solvo estas, ke mi mem anstataŭu vin. Ne, ne, estas tute eble; mi intencis vespermanĝi kun Aleksandro, sed mi povos telefoni al li; li komprenos. Do, je la oka, en la Popollernejo, ĉu ne? ... bone ... kaj pri kio? vi intencis enkonduki la aktivajn participojn ... do, bone, mi komencos tion kaj raportos al vi poste ... nu, Karlo, mi ne devigos vin longe paroli, kiam vi fartas malbone ... (*Iu sonorigas, longe kaj laŭte, ĉe la pordo.*) Mi deziras al vi kiel eble plej rapidan resaniĝon, kaj estu trankvila pri viaj kursanoj. (*Iu resonorigas malpacience, pli longe kaj laŭte.*) Fakte, mi devas tuj demeti ... iu sonorigas ĉe la pordo. Resaniĝu! Bondezirojn! Ĝis! (*Demetas la telefonon kaj iras al la pordo.*) Ho ve, jen nia bela vespero falis en la puton. Sed ne estas la kulpo de Karlo. (*Revenas kun la Societano.*)

Sekretario Mi bedaŭras, ke mi iomete atendigis vin; mi ĵus parolis telefone; povra Karlo Kretenman estas malsana.

Societano Jes, homoj malsanaj ofte pensas, ke gravas nur iliaj malsanoj.

Sekretario Sed Karlo...

Societano Mi vizitas ĉi tiun kvartalon, ĉar mi iros al la kinejo, do mi kaptas la okazon, viziti vin.

Sekretario Sidiĝu, mi petas. (*Ambaŭ eksidas.*) Ĉu vi deziras tason da kafo?

Societano Dankon, ne. Mi nur volis atentigi vin pri io, kio ĝenos la membrojn. (*Elprenas cirkuleron.*) Vi ne korektis la tajperarojn en la lasta cirkulero, kaj vidu! estas ja ses eraroj en nur tri paĝoj! Mi korektis ilin ruĝe, por ke vi facile vidu.

Sekretario (*Rigardas*) Jes, vi pravas: s sen ĉapelo — jes, “helpanoj” anstataŭ “helpantoj” — nu, tamen tio faras sencon — jes, ho ve, la “deka” de marto devus tie esti la “dekan” — do, tri eraroj — jes, “interesa-a” — mi dufoje frapis — **cr** anstataŭ **ĉe** ja aspektas groteska, kvankam neniu dubos pri la intenco — kaj kie estas la sesa? — jes, pro ekstra spaco “ĉambro” iĝis “ĉam bro”...

Societano Tiaj fuŝoj faras tre malbonan impreson.

Sekretario Nu, mi penos perfekte tajpi la venontan cirkuleron. Sed mi tajpis tion per manoj malvarmaj kaj devis rapide labori. Kaj ni ne disponas pri profesia tajpisto, kiu farus pli bone.

Societano Vi devus peti al sinjorino Maksimiks. Ĉiuj scias, ke ŝi estis profesia sekretario, ĝis ŝi kaptis edzon.

Sekretario Ŝi jam multe helpas la societeton, per bakado de biskvitoj, distribuado de cirkuleroj, gastigado de vizitantoj... vere estas limoj... kaj kun siaj kvar infanoj ŝi estas tre okupita.

Societano Do, mi tre forte konsilas vin, ne dissendu fuŝajn cirkulerojn!

Sekretario Mi penos fari pli bone... tamen, mi vere ne kredas, ke tiel malgrandaj eraroj grave ĝenas la legantojn.

Societano Ili ĝenas min. Kaj jen alia afero. La societo ne sufiĉe reklamas. Nur mane preparitaj anoncoj en la biblioteko, en la leĝejo, en la lernejoj kaj tiel plu... Ni nepre bezonas bonan reklamon en la loka ĵurnalo.

Sekretario Estus tre bone! Grandparte por tiaj aferoj ni bezonas pli da mono. Vi scias, ke nuntempe sinjorino Maksimiks, sinjoro Piedeg kaj mi distribuas multajn cirkulerojn piedirante, por ŝpari afrankon. Dum la lasta kunveno, kiun vi ne ĉeestis, mi eĉ diskutis pri ĝuste tiu ebleco. Ĉar la ideo interesas vin, ĉu vi povas kontribui ion al la Reklama Fonduso?

Societano Hm, ne... la esperantistoj konstante petadas monon; ankaŭ tio agacas la homojn.

Sekretario Eble vi povos helpi per kolektado de mono por tiu celo?

Societano Ne, ne, neniam postulu de mi tiajn taskojn; ili tro ĝenas min.

Sekretario Pri unu afereto mi permesas al mi atentigi vin: Laŭra, la kasistino, menciis, ke vi ankoraŭ ne pagis vian kotizon al la Societo, por la nova jaro.

Societano Mi pagos, mi pagos... ne estu tiel senpacienca. Mi ne estas milionulo. Kaj ĉu vere neniu rimarkis, kiel tede estas, ke sinjoro Langul prelegis en novembro, kaj tri tagojn antaŭ la Nova Jaro, kaj jam denove prelegos je la dudeka de marto? La programo devus esti pli varia.

Sekretario Sinjoro Langul ĉiam prelegas interese, kaj en bona Esperanto; sed estus ja bone, havi pli da diversaj prelegantoj; mi konstante serĉas ilin. Sed la kaso estas preskaŭ malplena — dudek

kvar anoj ankoraŭ ne pagis siajn kotizojn — do, ni ne povas inviti iun de ekster la urbo. Sed la dekan de marto okazos tiu speciala prelego de Horacio Helpem, kiu pasigis du jarojn en malriĉa Voltio kaj alportos tre nebanalajn diapozitivojn el Afriko...

Societano Malriĉa Afriko tedas la homojn!

Sekretario Ĉu do vi ne venos eĉ al tiu kunveno? Almenaŭ ĝi estos io nova kaj neordinara!

Societano Mi verŝajne ne trovos tempon.

Sekretario Nu, mi konsentas, ke nia programo estas ne tiel varia, kiel mi volus; kaj ni vere tro ekspluatas la servemon de sinjoro Langul. Ĉu vi volas prelegi al ni unufoje? eble pri via faka temo? aŭ pri unu el viaj multaj libertempaj vojaĝoj? ... aŭ ĉu eble vi dezirus kunmeti instigan prelegon el viaj kritikoj?

Societano Ne, ne, mi ne prelegos; mi ne povas longe antaŭaranĝi pri tiaj aferoj. Kaj temas ne nur pri la vespero, sed pri la preparado. Ne valoras, se malmultaj venos. Sed ne forgesu, ke ni bezonas pli varian programon. Do, bone, mi devas foriri por trafi la komencon de la filmo.

Sekretario Momenton! nur momenteton! Ĉar nek mi nek la kastino havas aŭtomobilon, ĉu vi povos, kiam Horacio Helpem alvenos, afable renkonti lin ĉe la stacidomo? Tia homo vere meritas, ke ni ...

Societano Ho, ne, ne... petu al iu alia... pardonu, mi devas nun rapidi, por ne maltrafi la filmon... (*Foriras. La sekretario finfine eksplodas, jetante libron sur la plankon por malŝarĝi la nervojn.*)

Sekretario Anakondoj kaj akuzativoj! Formikoj kaj forfikuloj! Do, unu kritikis, alia efikas; unu deĵoras, alia torporas. Kluk-kluk-kluk! Aĥ! (*Regas sin kaj revenas al la leteroj.*) Kaj nun pro interrompoj mi denove forgesis la numeron de sinjorino Maksimiks — (*ree kontrolas*) — ha, jes, 163... do, mi ne havas tempon por vei kaj bei pri tiuj, kiuj neniam trovas tempon por la plej eta helpo... (*Daŭrigas la laboron.*)



Versareto — pri ‘ajjn’

Al Vizitonto

Mi povos vin renkonti iam ajn,
de la matena aŭ vespera trajn’;
mi manĝas ion ajn; sed mi esperas,
ke vi klarigos, kion vi preferas.
Ĉu vi deziras, dum vizit-semajn’,
Ekskursi al la lag’, aŭ ien ajn?
(Estas videbla de la Nigra Turo
vasta vidaĵ’, por iu ajn, plezuro.)
Kaj jen promes’, ke — kiom ajn ĝi kostos —
mi multe bakos kaj mi iom rostos,
kaj, kiel ajn mi povos ĝin aranĝi,
amikoj tiam venos por festmanĝi.
Nu, kian ajn problemon ni du trovos,
ni iel solvos ĝin, se homoj povos;
kaj kiu ajn vin vundos, eĉ per frazo,
tuj riskos pugnobaton sur la nazo!

Novaj Proverboj

La koro povas iom sin ripari; sed tion ne senfine povas fari.
Gravas akuzativo; pli gravas uz-aktivo.
Ĉiu devas erareti; sed ne forgesu pardonpeti.
Ne ŝanĝos vi doloran sorton; sed diru vi konsolan vorton.

Ĉu Vi Deziras Multan Oron?

Oro, ekde pracivilizacioj, vekis avidecon kaj fantaziejon. La pastroj de la malnova egipta religio nomis ĝin “karno de la dioj”; en budhismo, kristanismo kaj hinduismo ĝi estas simbolo de lumo, spirita scio, spiritaĵoj; tre ĝenerale tra la mondo ĝi estas simbolo de la suno, kaj homoj emas uzi ĝin por objektoj sanktaj en religiaj ritoj, aŭ objektoj imponaj en ŝtataj kaj aliaj nereligiaj ceremonioj. Ekde almenaŭ la dekoka jarcento, sciencistoj nomis ĝin unu el la ‘noblaĵ’ metaloj (kun arĝento, kupro, kaj foje hidrargo kaj plateno)

ĉar ĝi ne rustas kaj malmultaj kemiaĵoj korodas ĝin. En multaj lingvoj ĝi signifas “plej valora”: *koro el oro – orbuŝa oratoro – mallonga verko, sed pura oro – unu ora tago en mia vivo*, kaj simile.

La nobla metalo ne ĉiam nobligris homojn. Homoj ofte montris noblan persistemon pro ĝi: la alĥemiistoj inter la dua kaj dekseca jarcentoj serĉis metodon por ŝanĝi aliajn metalojn en oron — vane, sed dum siaj esploroj ili malkovris multajn utilajn faktojn. Dum la deknaŭa jarcento, orserĉantoj en Aŭstralio, Usono kaj aliloke montris grandan kuraĝon kaj persistemon. Sed pro avideco al oro homoj ankaŭ ofte intrigis, vendis principojn, parencojn, patrujojn; militis, konkeris, torturis kaptitojn, ekspluatis multajn por riĉigi kelkajn.

Oro ne estas tiel praktike utila kiel, ekzemple, fero, aluminio aŭ stano. Dum jarcentoj ĝi estis metalo por altvaloraj moneroj, sed ni nun uzas monbiletojn. Dentistoj uzas ĝin, sed povas anstataŭigi ĝin; alie ĝi estas uzebla plejparte por juveloj kaj luksaj ornamaĵoj. Juveloj estas belega parto de arta kulturo, sed pli malhaveblaj ol, ekzemple, kaseroloj aŭ fosiloj.

Ĝi allogas per belaj koloro kaj brilo, sed estas valora ĉar ĝi estas rara. Sciencisto kalkulis, ke la tuta kvanto da oro, produktita ekde 1493 ĝis nun, estus nur sufiĉa por fari kubon 15,2 metrojn larĝa.

Restas oro abunda, por tiu, kiu solvos strangajn problemojn. Eble dek mil milionoj da tunoj da oro restas solvitaj en la akvo de la oceanoj! sed tiel maldense, ke la produktaĵo valorus multe malpli ol la kosto de filtrado. Fizikistoj nun povas plenumi la revon de la alĥemiistoj kaj, per atomfizikaj reagoj, krei oron el plumbo — sed kostus milionojn da dolaroj por tiel krei pinglokapan peceton da oro.

Oni kredas, ke ie en la centra dezerto de Aŭstralio restas riĉega ora vejno, kiun esploristo trovis en 1897; li perdis sian vivon, penante ĝin trovi. Pli certe, ekzistas granda orminejo ie inter la montoj de Arizono, Usono. Apaĉoj unue trovis ĝin; hispana reĝo atribuis ĝin al hispana familio en Meksikio; en la deknaŭa jarcento, dankemaj apaĉoj gvidis usonan kuraciston al oro, sed ne en la minejon mem; poste, ano de la meksikia familio vendis mapon kaj rajtojn al du germanoj; sed preskaŭ ĉiuj, kiuj serĉis tiun oron, pereis, ĝis la apaĉoj decidis kaŝi por ĉiam la sangverŝigan trezoron.

Ili plenŝtopis la funelforman truon, kaj poste tertremo tute modifis la terenon. Ĝis nun neniu retrovis la tielnomitan “Minejon de la Nederlandanoj” — la titolo erare aludas tiujn du germanojn.

Oni kredas, ke kolosa trezoro de oro kaj juveloj kuŝas sur la fundo de la lago Guatavita en Kolombio: dum multaj jaroj la inkaoj de tiu regiono ŝetadis oraĵojn en la sanktan lagon dum religiaj ceremonioj. Sed la lago situas tre alte inter montoj kaj estas pli ol 300 metrojn larĝa ĉe la plej mallarĝa parto, maksimume pli ol 300 metrojn profunda, kaj minimume 15 metrojn; kaj la trezoro kaŝiĝas sub dika, densa tavolo da koto, sedimento kaj putrintaj akvo-plantoj.

Sciencistoj scias, kie troviĝas orbulo, kiu pezas ĉirkaŭ mil milionojn da tunoj. Bonan Vojaĝon! — Estas planedo, kiun oni analizis per modernaj lum-analizaj metodoj... kaj situas je distanco de 175 lumojaroj.

19. FABELO MAORIA EL NOV-ZELANDO

La maorioj estas la indiĝena gento de Nov-Zelando, kaj nun konsistigas ĉirkaŭ ok centonojn de la popolo. Ili suferadis kaj bataladis dum la frua koloniisma epoko, sed nun vivas libere kaj egalrajte en la alte evoluinta socio de Nov-Zelando, kaj konservas siajn lingvon kaj kulturon. Ekde 1876 ili havas siajn reprezentantojn en la parlamento.

La maorioj mem venis al Nov-Zelando el alia mondoparto, probable el la kvar mil kilometroj distanca Societa Insularo sur la Pacifika Oceano.

Nuntempe la maorioj plimultiĝas; ili kutime parolas maorie kaj angle kaj oni rajtas studi la maorian en lernejoj; ilia literaturo evoluas, kaj speciala instituto instruas kelkajn tradiciajn maoriajn metiojn, kiuj ofte estas artisme interesaj. Inter la antikvaj artoj de la maorioj estis tajlado de verda ŝtono por fari ornamaĵojn kaj armilojn; kaj eksterordinare komplika rita tatuado, kiu kovris la vizaĝon de altranguloj per desegnoj de simetriaj arkoj kaj volvaĵoj. Ĉi tiu tatuado estis ege dolora kaj ofte danĝera; sed la maorioj ja gajnis la respekton eĉ de malamikoj per sia kuraĝo. Modernaj ne-tatuitaj maorioj estas ofte tre belaj homoj. Inter iliaj tradiciaj artoj ankoraŭ praktikataj estas lignoskulptado, ofte por ornami domojn; rita dancado; kantataj eposoj; konstruado de riĉe ornamitaj kanuoj, origine pormilitaj; teksado de ŝtofoj kun belaj desegnoj, kaj de jupej el linotigoj.

Kiel ĉe la eskimoj, la kiseca saluto inter maorioj kutime estas kunfrotado de la nazoj.

Multaj nov-zelandaj loknomoj estas en la maoria lingvo.

La maorioj havas riĉan legendokulturon. Jen malnova legendo, kiu surprize similas al kelkaj aliaj, ekzemple al la belega helena legendo pri Orfeo kaj Eŭridica. Eble inter ĉiuj popoloj ni homoj deziras, spite ĉiujn kontraŭatestojn de teraj cirkonstancoj, atesti, ke iasence amo estas pli forta ol eĉ morto.

Pare kaj Hutu

Belega estis Pare; alta, atlete maldika, sed kun belaj virinaj molecoj; longa kaj brila estis ŝia nigra hararo, kiun ŝi ornamis per vostonplumo de sankta birdo; larĝa estis ŝia frunto, helbruna ŝia haŭto; plej belaj estis ŝiaj grandaj, profundaj, nigraj okuloj. Ili fulme brilis kiam ŝi aŭskultis historion pri la kuraĝaj faroj de ŝiaj tribanoj; kaj pluve brilis, kiam noblaj oferoj aŭ grandaj malĝojoj kortuŝis ŝin. Ŝi vestis sin per la plej belaj teksaĵoj kaj linotigaj matoj; kaj ĉarma estis ŝia rideto meze de ŝiaj elegantaj tatuaj arkoj kaj volvaĵoj.

Multaj kuraĝaj viroj dezirus edzinigi tian virinon; sed neniu povis paroli al Pare pri amo, ĉar ŝi estis la ĉefino de la tribo. Ŝi loĝis, kun kelkaj servantinoj, aparte, en tribestra kabano, kies traboj kaj dikaj pordofostoj estis kovritaj per skulptaĵoj, kie folioj, muskoj kaj floroj tre bone odoris. La provizejon oni konstruis inter la sudo kaj nordo, por ke la ĵus-mortintoj, irante al la Spiritolando, okcidenten, ne difektu la nutraĵojn. Pare estis tiel altranga, ke ŝi estis tabua kaj ne rajtis prepari manĝojn; la servantinoj devis tion fari.

Ŝi ĉiam kondutis digne kaj estis sincera ĉefino. Ŝia kutima konsilo al la tribo estis: "Popolo mia, estu paciencaj, kaj kuraĝaj, kaj fortaj, por ke vi daŭre vivu." Ŝi kutime observis la junulojn kiam ili praktikis sportojn, kaj kuraĝigis ilin per trafaj laŭdoj. La tribo amis Pare'n, kaj fieris pri ŝia senrivala beleco; sed neniam aprobis iun, kiel indan por esti ŝia edzo; kaj ŝi mem, digna, ridetanta kaj kuraĝa, neniam ridetis ame al junulo.

Ĝis ĉefo de alia tribo vizitis la vilaĝon, por partopteni iliajn sportojn. La junaj viroj kuris, kaj luktis, kaj ĵetis la linotigon; kaj en ĉiu sporto la vizitanto venkis. Ankaŭ li estis alta kaj forta, digna kaj vigla; kaj spirito ĉiam aktiva brilis tra liaj okuloj.

Li vidis Pare'n, kiu rigardis la sportistojn; kaj lia koro ekbatis pli rapide; sed eĉ li hezitis paroli ame al ĉefino tiel altranga.

Sed post kelkaj tagoj, ŝi demandis siajn junajn militistojn, "Kio estas la nomo de nia vizitanto?"

"Li estas Hutu la Silenta, kiu ĉiam trafe ĵetas la lancon, kaj taŭgas por paco aŭ milito."

Venis vespero, kiam Hutu bele ĵetis sian linotigon dum la ludo, kaj ĝi haltis ĉe la piedoj de Pare. Nenion ŝi diris; sed ŝi rigardis ĝin,

prenis ĝin de la tero, kaj, rapide kaj malpeze kiel flugas vesperto vespere, ŝi portis ĝin en sian kabanon kaj fermis la pordon.

Hutu frapis sur la pordon kaj demandis, “Ho, Pare, ĉu vi ne volas redoni mian linotigon?”

Ŝi silentis. Li frapis kaj petis denove.

Mallaŭte Pare vokis lin: “Venu en mian kabanon, kaj ni interparolos.”

“Bela Pare,” diris Hutu, “se mi venos sub vian tegmenton, via tribo postulos venĝon. Via rango, nobla ĉefino, estas multe supera.”

Mallaŭte Pare respondis, “Venu en mian kabanon, kaj ni interparolos.” Eĉ pli mallaŭte, sed kun digna mieno kaj fiere lumoplenaj okuloj, ŝi aldonis, “Kaj mi amas vin, Hutu.”

Hutu kaŝis sian ĝojon kaj fieron, kaj respondis, “Pare, tre bela, mi ne kolerigu vian tribon. Granda estas via tribo, kaj mi estas nur vizitanto. Mi venis ĉi tien nur por vidi vian belecon, pri kiu multaj alitribanoj parolas. Vidinte ĝin, mi devas forlasi ĝin.”

“Ĉu vi ne estas renoma pro via lerteco kun la lanco, kaj renoma kiel granda, kuraĝa ĉefo, kun manoj senhezitaj kaj kruroj tre rapidaj? Mi komprenas, ke vi ne rajtas unue paroli al mi pri amo, sed mi amas vin. Venu en mian kabanon.”

Hutu sentis sin tute amoplena. La doloro estis tiel granda, ke li deturnis sian vizaĝon, kaj rapide foriris, eĉ sen adiaŭa vorto. Dum la nokto li piediris al sia malproksima tribo, kun koro pro sopirego tre peza.

Pare ne plu venis en la sunlumon aŭ rigardis la sportojn; nek ornamis la hararon, nek vagis en la arbaro, nek kantis, nek pagajis en sia kanuo; sed nur meditis en sia kabano, silente.

Hutu nek revenis mem, nek sendis iun kun ia mesaĝo.

Pare ne plu manĝis aŭ trinkis; kaj post kelkaj tagoj de plena silento, ŝi denove ekordonis al siaj servantinoj: “Aranĝu mian hejmon dece. Ne parolu al aliaj, sed iru kaj dormu aliloke.”

Ili obeis, kvankam maltrankvile.

Pare fermis sian pordon, prenis kordon plektitan, kaj pendigis sin de trabo en la kabano. Ŝia spirito foriris okcidenten.

Matene, la tuta tribo lamentis; kaj la servantinoj rakontis, kiel Pare finfine amis Hutu'n. Ŝiaj tribanoj koleris, kaj decidis, ke Hutu, kiu kaŭzis ŝian morton, devos morti. Dum la virinoj ame pre-

paris ŝian kadavron, ornamante ĝin per skarlataj floroj kaj blankaj plumoj, kaj metante apud ŝin nutraĵojn por ŝia vojaĝo al la Spiritolando, rapide kurantaj junaj militistoj sekvis Hutu'n.

La tribanoj ploradis kaj veadis, kaj kunfrotis kamarade la nazojn, kaj la servantinoj kantis mortokanton:

Pare kuŝas nun silenta,
Pare ne parolos plu,
Per la vojo okcidenta
kiel iras riverflu',
Pare iris, iris for;
falas nia bela flor'.

Luno lume reserenas,
grimpas el la nigra tru',
sed mortintoj ne revenas,
venas nun neniam plu.
Bela Pare iris for,
ĉiam restos la dolor'.

Ili ame portis la kadavron al branĉara kuŝejo en la arbaro.

La junaj militistoj atingis Hutu'n kaj diris, "Pare mortis. Vi kulpas. Vi revenos kun ni." Li tuj turnis sin kaj revenis, silenta, kun vizaĝo senlarma sed senluma.

Reveninte al la vilaĝo, la militistoj demandis "Ĉu vi volas viziti la kadavron sur la kuŝejo en la arbaro?"

"Kial mi rigardu ŝian kadavron? Foriris ŝia spirito."

Hutu staris antaŭ la tribo, silenta, dum ĉiuj kriis kaj kriadis, "Mortu Hutu! Hutu mortu!"

"Vi pravas, vi kiuj amis vian ĉefinon. Sed ankaŭ mi amis ŝin. Eble per mia granda amo mi revenigos ŝin. Lasu min serĉi ŝin en la Spiritolando. Mi revenos. Se mi revenos sen Pare, faru kun mi laŭ via deziro."

La tribanoj konsentis, kaj Hutu piediris okcidenten, kaj tra la arbaro, preĝante, li sekvis la vojon de la spiritoj, kiuj indikas sian vojon per nodoj en la herboj. Sed la nobla Pare, fiero ĉefino, iris tiun vojon sen timhezitoj, kaj Hutu ne trovis ŝin survoje. Li do vizitis la domon de Hine, diino de la morto, kaj diris al ŝi, "Mi serĉas amatan mortintinon; montru al mi la vojon al la Spiritolando." Li

donacis al ŝi tre belan klabon, skulptitan kaj poluritan, faritan el verda ŝtono.

Hine montris al li truon inter grandaj rokoj, kaj donis al li saketon kun preparitaj filiko-radikoj. “Manĝu nur ĉi tion; ĉar se vi manĝos ion preparitan en la Spiritolando, vi ne revenos al la lumo. Iru sen timo.”

Hutu klinis sin, kaj sen timo iris en la malaltan, nigregan truon; kaj vento blovis lin antaŭen en la landon ombroplenan. Li iris tra densa arbaro, kie nek kantis birdo, nek ĉirpis insekto. Finfine li atingis vilaĝon, similan al tera vilaĝo, kie gejunuloj ludis, kaj aliaj manĝis kune.

Ili proponis al li manĝon, sed li rifuzis, kaj serĉadis Pare'n. Post longa serĉado, li demandis pri ŝi.

“Pare loĝas tie ĉi, sed nur silentas kaj malĝojas; ŝi restas en sia kabano kaj nek manĝas, nek ludas, nek parolas.”

Hutu invitis kelkajn junulojn ludi kun li; ili ĵetis linotigojn kaj vipis turbojn, kaj ĉiuj ridis kaj aplaudis pro la lerteco de Hutu. Sed Pare ne venis al sia pordo por rigardi.

Diris Hutu, “Mi montros al vi novan ludon tre amuzan. Portu al mi arbon — altan kaj fortan, sed ankoraŭ flekseblan.” Tion ili faris, kaj atendis. Hutu fortranĉis la branĉojn, kaj ili firme replantis la arbon meze de sufiĉe granda spaco.

“Mi bezonas fortajn ŝnurojn.” Fortajn ŝnurojn la junuloj alportis. Hutu ligis la ŝnurojn al la supra parto de la arbo, kaj ĉiuj tiris, ĝis la arbo kliniĝis al la tero. Tiam Hutu sidiĝis sur la supro, kaj invitis junulon sidiĝi sur lia dorso.

“Tenu forte... Amikoj, liberigu la ŝnurojn!” La arbopinto resaltis kun Hutu kaj la lud-kamarado. Ili ripetis tiun ludon, kaj ĝojis kaj ridis; la junuloj kriis kaj hurais gaje; ĝis finfine Pare rimarkis la ĝojkriojn kaj venis el sia kabano.

Ŝi vidis Hutu'n kaj forgesis ĉian doloron; ŝi ridetis. Kaj Hutu ĝojegis, sed li silentis, por ke neniu suspektu pri lia plano.

Baldaŭ Pare venis al li, kaj diris mallaŭte, “Portu min en tiu ludo.”

“Venu... Tenu forte mian dorson... Liberigu la ŝnurojn!”

La arbopinto resaltis tiel forte, ke ĝi ĵetis la geamantojn ĝis la ombra enirejo al tiu silenta arbaro inter la mondoj. Kaj tiel Hutu gvidis Pare'n al la mondo, kie la floroj havas kolorojn, kaj la birdoj

kantas, kaj la insektoj zumas kaj ĉirpas. Man-en-mane ili retrovis la vilaĝon de Pare.

La tribanoj alkuris, kaj kriis, "Pare apartenas al vi! Via granda amo rekondukis ŝin el la Spiritolando."

Pare prenis sian parfumitan skatolon, ornamitan per skulptaĵoj kaj inkrustitan per blua perlamoto; el ĝi ŝi prenis siajn sanktajn plumojn, kaj ŝi fiksitis ilin en la hararon de Hutu.

Hutu salutis la tribon, "Mi estas ĝoja hodiaŭ; via ĉefino min akceptis. Mi, Hutu, la Silenta, amas ŝin per amo tia, ke ne povas esti vortoj pri ĝi. Tamen la edzino de mia juneco loĝas ĉe mia tribo; ĉu mi alkonduku ŝin ĉi tien, aŭ forkonduku Pare'n al mia tribo?"

"Alkonduku vian fremdulinon, kaj ni bonvenigos ŝin! Restu ĉe ni kaj nia ĉefino, kiu amas vin!"

Pare staris antaŭ ĉiuj, kaj fiere tenis la manon de Hutu, kaj li gvidis ŝin en ŝian domon.

Novaj Proverboj

Ne protestu pri 'rajto' dum vi dronas en tajdo.

Rekonu necesojn, ne faru ekscesojn.

Kiu rapidos en akcidenton ne frue atingos la eventon.

Ĝojas ekstera malamiko pro interna polemiko.

Interpunkcio

Punkto por kompleta fino.

"Mortis li per gilotino."

Komo por la paŭzo eta.

"Manjo, Petro estas preta."

Punktokomo estas gvido

al pli grava fraz-divido;

"La slogano estas loga;

tamen, estas ĝi mensoga."

Kaj dupunkto ĝenerale,

enkondukas ion formale:

“La landeto ne tre fortas;
tamen, nun ĝi jam eksportas:
kafon, krabojn kaj katunon,
alfon, algojn kaj alunon.”

*Nepre la demandosigno
estas de demand’, insigno:*
“Ĉu la fakto vin surprizas?
«Grizharul’» kutime grizas.”

*Jen krisigno por la frazo
laŭtlegota kun emfazo:*
“Ve, la lakto superbolis!”
“Tiu bufo ĵus parolis!”
(Ne tro uzu tiun signon,
aŭ la stilo perdas dignon.)

**Haltostreko aŭ tripunkto
truoj en la stila punto:**
*ilin uzu plenintence,
ne senzorge kaj sence.*
“Li strebadis, spitis sorton,
serĉis oron, trovis – morton.”
“Kuris li de hundo hurla,
kaj ricevis vundon sur la...”

*La dividostrek’ dividas
(kiel vi sen ŝoko vidas):*
«pale-verda», «dank-kutimo»,
«am-soif’», «provoko-krimo».

*Apostrofo por formorto
de vokalo en la vorto:*
“Iris trup’ al tiu trajn’
antaŭ fin’ de l’ pask-semajn’.”

*La citiloj — iom variaj,
tiaj « », tiaj › ‹, tiaj “ ”, tiaj ‘ ’...
estas por diraj’ senpera —
“Diris li, ‹Jen drak’ papera›.”*

**Krampoj eĉ en frazo-mezo
estas pro la parentezo.
“Ili finis la disputon,
ĵetis lin en (sekan) puton.”**

***La stelet’ en nia roto
signas pri la piednoto
aŭ simile — aŭ kelkfoje,
kiam iu tre malĝoje
montras koleregon bruan,
vorton signas ĝi tabuan.
“Mil diabloj! Porkaj pletoj!
Sanktaj skombroj! ****!
(Ni legu: «Kvar steletoj!»)***

20. IOM PRI MUZIKO KAJ MUZIKISTOJ

Multaj naturaj sonoj plaĉas al niaj oreloj: kantoj de birdoj, plaŭdetoj kaj murmuroj de trankvila maro, lirlado de riveretoj, zumado de abeloj, susurado de arboj; sed vera muziko estas arto; kaj nur ni homoj konscie kreas ĝin.

Normala homa orelo povas distingi inter ĉirkaŭ 400 000 sonoj. Nia delikata aŭdkapablo dependas de korp parto nur kvar centimetrojn longa, sed havanta ĉirkaŭ 7 500 partetojn — la «organo de Corti»; ĝin identigis itala sciencisto, Corti, en 1851; scion pri ĝi evoluigis germana sciencisto Helmholtz kaj hungara sciencisto Békésy — kiu iam esploris eĉ la orelegon de morta elefanto! La videbla parto de la homa orelo, tiu eta anso de la kapo, estas la plej ne-grava parto; interne la orelo estas unu el niaj plej kompleksaj organoj. Ni ja bezonas ion kompleksan, por aŭskulti la mirinde multajn specojn de muziko, de kiuj estas nur ekzemploj: opero, madrigalo, menueto, gregoria ĉanto, ĵazo, fugo, simfonio... eĉ muzikaj parodioj.

Oni ofte diras, ke muziko estas internacia lingvo. Ĉi tio estas parte vera. Franco, polo, islandano, hispano, ĉeĥo, usonano, urugvajano kaj aŭstraliano ja povas kune aŭskulti simfonion de la germana van Beethoven aŭ operon de la itala Verdi, kun interna plezuro, kaj eble senti sin portempe unuigitaj per la bela travivaĵo.

Tamen, muziko estas nur parte internacia komunikilo. Ni bezonas tradukojn de kantotaj vortoj; kaj traduki tiajn tekstojn estas aparte malfacila, ĉar la vortoj devas taŭgi ne nur al poezia metriko, sed al muziko.

Pli grave: eŭropaj muzikaj tradicioj tre disvastiĝis tra la mondo, pro kelkjarcenta koloniado; kaj ili entute prezentas unu el la kolosaj, plej gloraj atingoj de la homaro; sed la eŭropaj muzikaj tradicioj ne estas la solaj.

Misiisto rakontis, ke kiam li aŭdigis diskon de verko de van Beethoven, afrikaj aŭskultantoj ne nur ne montris ravitecon, sed

rideksplodis, kaj falis gaje ĉiudirekten pro la ekstrema komikeco de tiuj fremdaj sonoj!

Hindoj, ĉinoj, japanoj kaj aliaj havas proprajn muzikajn tradiciojn malsamajn al la eŭropaj. Ili uzas aliajn bazajn skalojn, aliajn instrumentojn.

Esperanto, vera internacia lingvo, evoluas konstante en la direkto de lingvo por vere tutmonda kulturo. Ni delonge posedas multajn vortojn por muzikiloj de eŭropa muziko: *violono, aldo, violonĉelo, kontrabaso; fluto, hobojo, klarneto, fagoto, tubjo, trumpeto, trombono; tamburo, timpanoj, cimbaloj; fortepiano, orgeno, gitaro, banĝo, saksofono, akordiono, citro, harpo*. Ni posedas vortojn eĉ por pluraj muzikiloj jam antikvaj, ekzemple: *liro, liuto, sistro, klaviceno*. Ni jam registris: *balalajko* el Rusujo, *guzlo* el la balkanaj landoj, *tamtamo* el Azio aŭ Afriko, *ukulelo* el Havajo, ĉar iu bezonis mencii ilin. Sed por traduki kelkajn bengalajn poemojn, Probal Daŝgupto bezonis *rago*, terminon pri klasika hinda muziko, kaj *ŝanajo, vinao*, hindajn muzikilojn¹; grandskala traduka aŭ originala verkado el Hindujo kredeble bezonigus aliajn muzikilajn nomojn, ekzemple *sitaro*. La tre interesa *Enciklopedieto Japana*² devis prezenti japanajn muzikilojn: *bivo, kotoo, ŝamiseno*, kaj kelkajn terminojn pri japana muziko. Kredeble ni iam havos ĉiujn bezonatajn vortojn, en diversaj fakoj, por la tuta mondo; en la fako de muziko, eĉ ĝis la primitiva, konsterne longa, blovinstrumento de la aŭstraliaj indiĝenoj — supozeble «didĝeriduo»?

Laŭ ĝisnunaj scioj, la plej fruaj muzikiloj probable estis primitivaj tamburoj; sed arkeologoj trovis en Hungarujo kaj Sovetio specojn de fajfiloj kaj flutoj faritaj el truitaj ostoj, datiĝantaj verŝajne de 25 000 – 22 000 a.K. La plej fruaj muziknotoj ĝis nun trovitaj datiĝas de ĉ. 1800 a.K. Arkeologoj trovis ilin sur argila tabulo, en Irako.

Muzik-amantoj trovos jam ian muzikan kulturon esperantistan. La lingvo tre taŭgas por kantado kaj esperantistoj tradukis multajn kanto-tekstojn; altnivelajn sol-kantojn, himnojn, popolkantojn, operajn ariojn, protest-kantojn, kanzonojn. Koncerto estas ero de

1. Vidu *Primico*, poemoj de Robindronath Tagor, Kopenhago, 1977.

2. Osaka, 1964.

ĉiu Universala Kongreso de Esperanto, ekde la unua en Bulonjo; komuna kantado kaj koncertaj prezentadoj ofte eniras la programojn ankaŭ de naciaj kaj regionaj kongresoj.

En la katalogo de UEA, 1977 – 78, troviĝis kvindek kantlibroj divers-specaj, plus kelkaj aliaj primuzikaj eldonaĵoj; inter la tiutempe haveblaj gramofondiskoj, 18 prezentis kantarajn. Ekde 1963 ekzistas Muzika Esperanto-Ligo, por ĉiuj el ni kiuj profesie aŭ amatore okupiĝas pri muziko. Ĝi eldonas fakan gazeton *Muziko*.

Ekzistas faka *Muzika Terminaro*, verkita de Frank Merrick kaj Montagu Butler, ankoraŭ utila, kvankam preskaŭ tute eŭropa; D.C. Hill preparis indikojn al ĝi. En 1978 aperis *Esperanto-lingva Muzika Leksikono* de G.B. Briano, en Esperanto kaj la itala.

Plurajn poemojn de esperantaj verkistoj, inter ili Kalocsay kaj Baghy, muzikigis seriozaj komponistoj. Inter konataj muzikistoj, kiuj kontribuis al la esperanta kulturo, troviĝis Barono Félicien Menu de Ménil, franco, kiu ne nur muzikigis *La Espero*, sed preparis nian unuan muzikan terminareton kaj dum preskaŭ tridek jaroj multe laboris por Esperanto; Mihály Saróssy, hungara kantisto, kiu kunlaboradis kun la budapeŝtaj poetoj; Frank Merrick, angla komponisto kaj fortepianisto, kiu muzikigis multajn esperantajn poemojn, pianludis ĉe multaj kongresoj kaj diversmaniere helpis la movadon; sed ankaŭ multaj diversnaciaj kantistoj ĝojigis la esperantistaron, multaj lertaj ludantoj de la fortepiano aŭ orgeno, multaj esperantaj ĥoroj. La fama esperanta poeto, Reto Rossetti, brile tradukis la tekston de la farsa opero *La Piratoj de Penzanco*.³

Ĝis nun la valoraj esperantistaj muzikistoj kredeble ne kontribuis al la konata anekdotaro pri eminentaj muzikistoj.

Ekzemple: gas-kompanio iam procesis kontraŭ la germana komponisto Hindemith, ĉar en lia satira opero *Hodiaŭaj Novaĵoj* la heroino kantis pri la plezuro, bani sin en elektre varmigita akvo. La gasvendistoj plendis, ke ĉi tio malhelpas ilin komerce.

Oni rakontas multajn anekdotojn pri la germana-angla komponisto Händel. Li havis grandan apetiton kaj oni rakontis ke iam, en krea ekstazo, li komponadis dum kelkaj tagoj, preskaŭ ne manĝante. Fininte la verkon, li kompreneble estis tre malsata, do li sendis noton al restoracio, mendante bonan vespermanĝon por

3. Manĉestro, 1979.

kvar personoj. Li alvenis akurate, sidiĝis, atendis; vokis kelneron, kaj petis la unuan pladon.

“La manĝo estas preta, sinjoro,” diris la kelnero, “sed ĉu vi ne deziras atendi viajn gastojn?”

“Mi estas miaj gastoj,” Händel respondis koncize.

Iam, en angla provinca urbo, Händel serĉis taŭgajn personojn, por ludi aŭ kanti en oratorio. Grupo da kandidatoj sin prezentis; parolis por ili maljunulo kun violonĉelo, kiu fiere deklaris, “Ni ludas en la preĝejo!” Händel do distribuis partiturojn; sed la grupo ludis plorinde fuŝe. Händel levis la pugnon kaj kriis, “Vi ludas en la preĝejo! nu, do, bone, vi ludu en la preĝejo, ĉar ni legas, ke Dio estas tre kompatema, tre pacienca, tre pardonema! Ludu do en la preĝejo — sed vi ne ludos por mi!”

En la unua akto de *Lohengrin* de Wagner, la heroo devas eniri boaton, kiun tiras granda cigno. Jozef Tichatschek, bohemo, la unua tenorulo kiu ludis la rolon de Lohengrin, dum unu prezentado staris akurate sur la ‘bordo’, sed iu forpuŝis la cignan boaton antaŭ ol li povus enpaŝi. Anstataŭ montri koleron, Tichatschek, kvazaŭ li ĵus maltrafus vagonaron, milde demandis, “Je kioma horo foriros la venonta cigno?”

Tiu cigna sceno postulas multon de teatra teknikisto; dum iu amatora prezentado en norda Anglujo, Lohengrin kaj teknikisto tiel bele miskomprenis unu la alian, ke la heroo staris en heroeca pozo ĉe unu flanko de la scenejo, kaj rigardis en la kulisojn, de kie la cigno devis veni, dum la teknikisto naĝigis la cignon el la kontraŭaj kulisoj, tiel ke ĝi ne nur ege surprizis Lohengrin, sed ŝajnis al la aŭdantaro — beki lian sidilon.

La renoma sopranulino Adelina Patti, italino, iam kantis somere, kun Charles Santley, angla baritonulo, kun la nobla celo akiri monon por hospitalo en Kimrujo. Subite, Patti tute fermis la buŝon, kaj daŭre staris kun kunpremitaj lipoj. Santley, post hezito, ekridis kaj foriris; Patti sekvis. La aŭdantaro miris. Baldaŭ la gekantistoj revenis, klinis sin, kaj Patti klarigis, “Vespo insiste penadis eniri mian buŝon!”

Kiel devas konduti artisto, pri politiko? La problemo ne estas simpla, sed interese kontribuas la firmaj vortoj de itala violonisto, Giuseppe Puppò. En Parizo, en 1793, oni vokis lin antaŭ terora tri-

bunalo, de kiu, en kriza epoko, oni ne povis atendi skrupulan justecon.

“Kiel vi nomiĝas?”

“Puppo.”

“Kion vi faris dum la epoko de la tirano?” (t.e. la reĝo Ludoviko la 16-a, ekzekutita en januaro 1793.)

“Mi ludis la violonon.”

“Kion vi nun faras?”

“Mi ludas la violonon.”

“Kaj kion vi estontece faros por servi la popolon?”

“Mi ludos la violonon.”

Fakte, Puppo savis sin, restis en Parizo ĝis 1811 kaj mortis nur en 1827, 76-jara.

Ankaŭ la hungara komponisto kaj virtuoza fortepianisto, Franz Liszt, iam kuraĝe asertis la valoron kaj dignon de artisto, kiam en malnova Rusujo li ludis la fortepianon en la imperiestra kortego, antaŭ la caro mem. Dum unu el la plej grandaj virtuozoj de la epoko strebis por brile interpreti malfacilan muzikon kaj ĝojigi ĉies orelojn, pluraj korteganoj babiladis pri bagateloj; finfine la caro mem, Nikolao la 1-a, partoprenis tiun sencelan babiladon. Tiam Liszt deprenis siajn manojn de la klavaro.

La caro demandis lin, “Kial vi ne ludas?”

“Imperiestra Moŝto,” respondis Liszt, kun respektoplena mieno, sed ironio, kiun ĉiu inteligentulo certe komprenis, “dum parolas la caro, ĉiuj malpli altrangaj homoj devas silenti.”

Tamen, eĉ pli bela anekdoto pri Liszt temas ne pri nobla rigoro, sed pri nobla malrigoro. Junulino, orfa, malriĉa, dotita nur per muzika talento, frontis tiom da malhelpoj, ke ŝi cedis al tento mensogi, kaj prezentis sin, en reklamoj por koncertoj, kiel «Ekslernantino de Liszt». Tiam la homoj aĉetis biletojn, kaj, ĉar ŝi vere havis talenton kaj diligentecon, ŝi sukcesis vivteni sin — ĝis la tago, kiam ŝi alvenis en germana urbeto, kie jam sur la muroj afiŝoj anoncis ŝian morgaŭan koncerton, kaj ŝi sciigis, ke Liszt mem ĵus alvenis, kaj eĉ loĝas en la hotelo, kie okazos ŝia koncerto. Oni malkovros ŝian mensogon; ŝi estos plene malhonorigita; finita estos ŝia kariero!

Ŝi vizitis Liszt en la hotelĉambro, genuis ĉe liaj piedoj, kun multaj larmoj konfesis sian misfaron kaj klarigis pri la senespero, kiu pelis ŝin al tiu mensogo. Liszt restarigis ŝin.

“Nu, infano mia, eble la situacio ne estas tro malbona. Jen fortepiano; sidiĝu; ludu por mi unu el viaj morgaŭaj muzikaĵoj.” Tion la junulino faris; dum ŝi ludis, Liszt — kiu konstatis, ke ŝi havas sufiĉe estimindan talenton — iom komentis, kaj donis al ŝi kelkajn konsilojn. La tremanta junulino ludis la lastajn tonojn; kaj Liszt diris, “Kaj nun, infano mia, mi ja iom instruis vin; do vi sen mensogo estas ekslernantino de Liszt.”

La junulino ekbalbutis dankon tra larmoj, sed Liszt demandis, “Ĉu viaj programoj estas jam presitaj?” — “N... n... ne, sinjoro.” — “Do, aldonu al via programo por morgaŭ, ke via instruisto helpos vin, kaj ke Liszt mem ludos la lastan muzikaĵon.”

Novaj Proverboj

Ke bonan havas vi principon ne sensangigas vian vipon.

Ne sendu vian fumon en najbaran pulmonon.

Karlo ne manĝu riĉan torton, kie Petro frontas malsat-morton.

Mil taskoj! Konsterno, kapdoloro! — Faru la unuan en la nuna horo.

Pensigaj Vortoj

“Digno ne estas afero de la akirado de honoroj, sed de la meritado de honoroj.”

Aristotelo, helena filozofo

“Ne ekzistas en la mondo kuraĝuloj kaj malkuraĝuloj. Ekzistas nur kuraĝuloj. Naskiĝi, vivi, morti — postulas en si mem sufiĉan kuraĝon, pli ol sufiĉan. Ĉiuj el ni estas kuraĝaj kaj ĉiuj malkuraĝaj; kaj tiu, kiun la mondo nomas kuraĝulo, estas ankaŭ kuraĝa kaj malkuraĝa kiel ni ceteraj. Sed li restas kuraĝa kvin minutojn pli longe.”

Alistair Maclean, skota verkisto de sensaciaj romanoj

Pri Kalkulado

Sep plus dudek unu faras dudek ok;
Dudek ok pingvenoj staris sur la rok'.
Kvardek minus tridek certe faras dek.
Unu la alian pikis per la bek'.
Dudekoble kvin (multiplike) faras cent;
Protestis la pikito sub la sudpolusa vent'.
Okcent dividita per ducent faras kvar;
Kvakis ĝi indigne, "Ho peka beka far'!"

Avizo en Stacidomo

(Laŭdire, ie en Kaŭkazo.)

NI AVERTAS ĈIUJN TRANSPORTISTOJN KAJ CIVITANOJN KIUJ PRIZORGAS BOVOJN KE ESTAS MALPERMESITE AL ILI RESTI EN STACIDOMOJ AŬ VAGONAROJ EBRIAJ
--

21. FABELOJ DE INDIANA TRIBO EN USONO

La unua nomo de ambaŭ Amerikoj estis “Indioj”; pro tio blankuloj uzas la nomon *indianoj* por la ruĝhaŭtaj indiĝenoj de norda, centra aŭ suda Ameriko. Tiuj triboj ankoraŭ havas proprajn kulturojn kaj lingvojn, kostumojn, metiojn, religiojn, kaj multajn legendojn, mitojn kaj fabelojn.

La du subaj fabeloj apartenas al la fabelaro de la indiana tribo Ŭiĉita, kiu troviĝas en la usonaj ŝtatoj Kansaso kaj Oklahomo. Ni vidas, ke la kojoto, sovaĝbesto parenca al hundoj kaj lupoj, iĝis por indianaj fabelistoj reprezentanto de diversaj malvirtoj, kiuj dum tempo ŝajnas sukcesi, sed pli-malpli frue ricevas punon.

Kitikovi kaj la Kojoto

Kitikovi estis saĝa viro; lia nomo signifas “Okulo-direktita-alla-akvo”, ĉar li estis tre lerta fiŝkaptisto.

Ketokso estis kojoto, kiu vagadis, serĉante predon por nutri sin kaj sian familion.

Unu tagon, tiu ĉi kojoto serĉis predon, laŭlonge de la rivereto, kaj rimarkis viron, kiu sidis sur la bordo, kun ia longa ŝnureto, ligita al lia kapkovraĵo. Ĉi tiun ŝnureton li ŝajne uzis, por kapti fiŝojn. Li diris, “Venu, kelkaj grandaj fiŝoj — ekmordu!” — poste movis sian kapon, kaj tiris la ŝnureton, kaj jen, fiŝo falis sur la riverbordon.

Ketokso la kojoto proksimiĝis, kaj diris, “Mi estas Ketokso. Kaj mi estas malsata.”

La fiŝkaptisto diris, “Mi estas Kitikovi. Mi kaptis jam multajn fiŝojn; vi forportu kelkajn por vi kaj via familio.”

Ketokso prenis la fiŝojn, sed li ne estis kontenta; li diris, “Vi havas bonan viv-rimedon tie. Ĉu vi ne povas doni al mi la saman potencon, por ke mi mem kaptu multajn fiŝojn por mia familio?”

“Ne estus tre facile,” respondis Kitikovi. “Vi devus tre atente sekvi ĉiujn instrukciojn; alie, io malbona okazos al vi; kaj vi devus trovi alian lokon, tute similan al mia loko tie ĉi.”

“Ho, estos facile, estos ege facile!” kriis la kojoto. “Mi ne faros erarojn! Ne post klaraj instrukcioj! Mi estas multe tro aĝa, por esti malsaĝa! Mi longe serĉadis ion tian; kaj vi estas tiu, kiun mi longe serĉadis.” (Fakte, li neniam antaŭe pripensis ion tian.)



“Do,” Kitikovi ekinstrukciis lin, “unue, trovu riveran lokon, tute similan al ĉi tiu loko. Tiam, metu ĉi tiun fortan ligilon sur vian kapon, kaj ĵetu ĉi tiun ŝnureton en la riveron... Sed, amiko kojoto, nun vi havos la potencon; vi povos voki fiŝojn al la ŝnuro; sed neniam voku la plej grandan fiŝon en la rivero. Vi rajtos voki kiom ajn da fiŝoj vi deziras, kaj de ĉiuj aliaj grandecoj; sed ne la plej grandan; memoru!”

“Ta ta ta!” diris senpacience Ketokso. “Mi estas tro aĝa, por forgesi ion! Mi ne kutimas erari! Nun mi kaj mia familio neniam malsatos!”

Baldaŭ li trovis taŭgan lokon, kaj komencis fiŝkapti. Li kaptis multajn fiŝojn kaj ĝoje portis ilin hejmen, kie la edzino rostis ilin. Kiam ĉi tiu stoko estis elĉerpita, la kojoto eliris denove, kaj facile kaptis novajn fiŝojn. Ankaŭ la familio foje fiŝkaptis kun li.

Ili prosperis. Ofte Ketokso kaptis tiom da fiŝoj, ke li devis tri-foje iri tien-reen por porti ĉion hejmen; kaj la familio multe manĝis. Sed li ne estis kontenta. Estis tro da laboro, kapti fiŝojn hodiaŭ kaj morgaŭ reiri al la rivero.

Li diris al si mem, “Eble tiu viro, kiu transdonis al mi la potencon, trompis min. Li volis rezervi la plej grandan fiŝon por si mem. Kiel avare! Nun mi malkovros lian trompon kaj kaptos ion havindan.”

Ketokso sidiĝis sur la rivera bordo kaj ĵetis sian ŝnureton en la akvon.

“Venu, grandaj fiŝoj, ekmordu! Venu, plej granda fiŝo en la rivero, ekmordu!”

Io pezega mordis lian logaĵon. Li movis sian kapon; tiris; vane! ekstaris por tiri; vane! kaj subite li sentis, ke la plej granda fiŝo en la rivero tiras lin en la akvon.

Post vana tirado per sia plena forto, Ketokso kriis al la granda fiŝo.

“Lasu mian logaĵon! Mi nur ŝercis pri la plej granda fiŝo! Aj, aj! Ho, lasu mian logaĵon kaj fornaĝu libera!”

Sed la plej granda fiŝo tiris tiel forte, ke, antaŭ ol Ketokso povus malligi la ligilon de ĉirkaŭ sia kapo, lia tuta skalpo estis forŝirita. La plej granda fiŝo malaperis kun granda plaŭdo, kun la skalpo de la kojoto ankoraŭ sur la fino de la ŝnureto. La skalpo naĝis momente sur la akvo, poste subiĝis.

Ketokso kriegis, kaj ploregis, kaj kuregis hejmen; sed, ĉar li ne plu havis harojn sur la kapo, kaj estis sangkovrita, la familio ne rekonis lin. Ili forkuris panike.

“Mi estas via familiestro! Haltu! Revenu! Mi estas Ketokso!”
— Sed la kojotino kaj la kojotidoj malaperis sur la horizonto.

Ketokso senesperigis, kaj baldaŭ li mortis, pro propra malsaĝeco.

Vidaŭ la Urso kaj Ketokso la Kojoto

Ketokso la Kojoto vivis kun sia familio, kaj vagadis, trovante manĝaĵojn per ĉasado aŭ trompado. Iam li iris longan distancon norden, kaj renkontis Vidaŭ la Urson. La Urso laŭte grumbliis.

“Kial vi trudas vin sur mian terenon? Neniu alia rajtas ĉasi ĉi tie. Mi mortigos vin,”

Ketokso tre timis, sed vidis, kiel aspektas la ĉielo, kaj elpensis ruzaĵon.

“Ho, haltu! Ne mortigu min, ĝis mia patro rigardos min!”

La Urso hezitis. La ĉielo pliheliĝis. Dum la Urso dubadis, pri kiu la Kojoto parolas, la suno leviĝis, kaj la Kojoto kuris rekte al la Urso.

“Jen mia patro, la Suno! Nun mortigu min; nun, dum mia patro rigardas! Estas gloro nun, morti kuraĝe antaŭ mia patro!”

Vidaŭ la Urso hezitis, kaj komencis retropaŝi, dum la Kojoto paŝis antaŭen. “Mortigu min nun tuj, antaŭ la okuloj de mia patro, aŭ mi mortigos vin!”

La granda Urso nun ektimis la malpli grandan Kojoton. La filo de la Suno certe havas grandan potencon kaj specialajn fortojn. Ketokso daŭre paŝis antaŭen, kaj laŭte insistis, ke la Urso mortigu lin, dum Vidaŭ pli kaj pli rapide retropaŝis.

“Vi ne evitos vian morton, eĉ se vi turnos vin kaj forgalopos! Ne gravas, kien vi kuros! La Suno rigardos ĉion, kaj vi estos trovita! Vi estos mortigita!”

“Lasu min vivi! Mi transdonos al vi parton de mia speciala potenco.”

“Mi havas pli grandan potencon ol vi. La vian mi malestimas.”

Finfine Vidaŭ la Urso decidis, ke nur per bela promeso li savos sian vivon de la nevenkebla Filo de la Suno.

“Se vi lasos min vivi, mi venos al via hejmo, kaj faros ĉion por helpi vin.”

“Do, jen bela promeso. Mi indulgos vin, urso. Kliniĝu antaŭ mi, por ke mi rajdu sur vi al mia hejmo.” Kaj Ketokso rajdis al sia hejmo. Survoje li ordonis al la urso ĉasi; la urso mortigis cervon, kaj alvenis kun kaj Ketokso kaj la cervo sur la dorso. Tamen Vidaŭ gratulis sin, pensante, “Nur mia bela promeso savis mian vivon.”

Ketokso fanfaronis al sia edzino, ke li kaptis grandegan Urson, kiu ekde tiam faros ĉiujn hejmajn taskojn; ŝi ne zorgu pri kuirado aŭ purigado, sed lasu al la Urso ĉion fari.

La vivo de Vidaŭ kiel servanto estis tre malfeliĉa. Kiam li revenis post ĉasado, portante pezan cervon, li ne rajtis sidi eĉ kelkajn momentojn; li devis tuj prepari la viandon. Dum la viando rostiĝis, li devis fari multajn hejmajn taskojn, poste servi la viandon al la familio. Eĉ kiam ĉiuj hejmaj taskoj estis finitaj, li ne rajtis ripozi; la kojotidoj rajdis sur li. Kaj Ketokso permesis al ĉiuj familianoj, ke se Vidaŭ laboras malrapide, aŭ eksidas, iu prenu brulantan lignopecon el la fajro, kaj puŝu lin. Ankaŭ Ketokso ofte mokis lin, dirante, ke li ĉasas tre mallerte kaj malrapide, aŭ li estas mallaborema, aŭ li kuiras tre malbone.

Tamen, post kelkaj malfeliĉaj semajnoj, Ketokso denove elpelis Vidaŭ por ĉasi, kaj Vidaŭ renkontis pli aĝan urson, kiu klarigis al li, ke la Kojoto tute ne estas filo de la Suno.

“Li trompas vin. Li havas neniun specialan potencon. Malsaĝe vi toleras vian malfeliĉan vivon. Uzu vian grandan forton, kaj liberigu vin.”

Vidaŭ ne plu ĉasis. Li rapide revenis al la hejmo de Ketokso, sen viando. La kojotidoj renkontis lin kun brulantaj lignopecoj, por turmenti lin denove; sed li tuj atakis ilin, kaj frakasis iliajn kapojn. Poste li mortigis Ketokson kaj lian edzinon, kaj trankvile foriris al sia blanka regno en la nordo.

Novaj Proverboj

Vivo sen laboro — vivo sen honoro; laboro sen ripozo — jen mortiga dozo.

Ne batu la hundon sur jam sangantan vundon.

Donacinte anseron, ne domaĝu paseron.

En regno de despoto, amflustro estas komploto.

Versareto — pri Kunmetado de Vortoj

Se kunmetitajn vortojn vi deziras, mi vin petas,

Atentu iom zorge, *kiel* vortojn vi kunmetas:

ĉar «fontoplum'» estas pluming', kun inkujet' interna;
 sed «plumofonto» estus font', kun fluo tre konsterna.
 En «bestodomo» loĝas best' — ne gravas nun la nomo;
 sed la «dombesto» estas best', amika al la homo.
 La «akvotubo» estas tub', al gasotub' malsama;
 Malsamas la «tubakvo» al flak-akvo malbonfama.
 Ni dece «vespermanĝas», kun pladetoj du aŭ tri;
 sed plena «manĝvespero» ŝajnas tro diboĉa; fi!
 Dum daŭro de la «labortag'», ni pensas pri la horo,
 kiam finiĝos nia task', la nuna «taglaboro»;
 «Ĉashundo» obeema kaj dresita sidas digne,
 dum kuras tra la strato iu dommastrin' indigne,
 ĉar iu hund' vaganta ĵus forkuris kun kolbaso,
 kaj ŝi swingas balailon dum kolera «hundoĉaso».

Strangaj Pafadoj

En multaj landoj ekzistas tradicio, ke oni ne povas mortigi vampiron per ordinara plumba kuglo; tiu, kiu deziras mortpafi vampiron, ŝargu sian pafilon per kuglo arĝenta, kiun pastro speciale benis. Ne tiom da homoj scias, ke antaŭ nelonge la militistoj de kelkaj aziaj triboj kutimis, kiam eble, uzi grenatojn kiel kuglojn. Ilia rezonado verŝajne estis, ke tiuj ŝtonoj jam sang-koloraj plej facile trempiĝos en sango, kvazaŭ allogus freŝan sangon.

Oni rakontis pri usona kuracisto, de la deknaŭa jarcento, ke iam, noktomeze, li vekigis kaj konstatis, ke ŝtelisto envenis la domon. Lia pistolo kuŝis apud lia lito, sed kugloj mankis. La kuracisto ŝargis sian pistolon per la plej sekaj, grandaj kaj malmolaj piloj, ĉasis la ŝteliston, kaj, laŭ ironia tiutempa ĵurnalisto, “kuracis lin per preskribo, kiu liaopinie multe kontribuis al resanigo de la paciento de tre malbona malsano.”

Eĉ pli strangan municion iam improvizis profesia militisto. En 1866 malgranda usona militŝipo, *Arakwe*, krozis sur Pacifiko, proksime al Valparaiso; la celo estis, indiki subtenon al la tiama registaro de Ĉilio. Post iom pli ol jaro, sen ia ajn pafado, la ŝipestro ricevis permeson reveni al la hejmlando. Sed, la saman tagon, okazis neatendita submara tertremo. La maro tiel malaltiĝis, ke ĝi

ŝajnis malaperi; la ŝipestro tuj ordonis, turni la ŝipon; sed ĝi fiksiĝis sur la malkovrita marfundo. Post nur minutoj, la maro reaperis en terura formo; giganta ondo de tertrema flusego kurbiĝis super la ŝipo, muro de minacanta akvo. Ĝi mergis la senhelpan ŝipon; dronigis tri maristojn; poste portis la multloke difektitan ŝipon sur la inunditan marbordon, ĝis klifo, normale pli ol tri kilometrojn for de la maro, haltigis ĝin kun orelfenda frakaso.

Feliĉe, la ŝipo havis platan karenon kaj ne bezonis profundan akvon; tial la kuraĝa, lerta maristaro iel sukcesis teni ĝin preskaŭ rekta. Post nokto de timoj kaj duboj, la matena lumo montris marbordan regionon plenan de rompitaĵoj ŝipoj, kargoj disĵetitaj, kadavroj, fragmentoj.

Kiam okazas ia grandskala katastrofo, kiu suferigas multajn, kutime kelkaj noblaj homoj alvenas por mildigi suferojn; kaj malofte mankas ankaŭ kanajloj, kiuj pliamarigas suferojn, profitante el ili. Tiukaze, alvenis kun la lumo centoj da rabemuloj, kiuj avide ŝtelis ĉion eblan de la jam afliktitaj marbordanoj kaj ŝipanoj.

Estis la devo de la maristoj, defendi sian ŝipon; sur *Arakwe*, bravuloj jam lacegaj batalis sur la difektitaj ferdekoj kontraŭ la rabistoj. La rabistoj desaltis, sed amasiĝis por tuj reataki kaj superforti la maristojn. La ŝipestro ordonis, ke oni ŝargu la kanonojn. Ve — sufiĉis pulvo, sed la kuglegoj estis neatingeblaj en la frakasita holdo.

La ŝipestro pensis rapide. Li ordonis, ke oni alportu la multajn fromaĝbulojn el la kuirejo, kaj ŝargu la kanonojn.

Hurlantaj rabistoj amase alkuris por sturmi la ŝipon; kaj multaj falis sub hajlo de fromaĝbuloj. Ili ne faris duan provon.

La ŝipo neniam plu vojaĝis, sed ĝia nomo restas en arkivo kiel “perdita en batalo” — kredeble la sola batalo en la mondhistorio, en kiu la decidigaj armiloj estis fromaĝbuloj.

22. EL LA HISTORIO KAJ LEGENDOJ DE LA SPUNERA TRIBO

La *spunera* tribo ne estas indiĝena nur al iu apenaŭ mapita parto de iu azia montara regiono, aŭ sudamerika ĝangalo, aŭ afrika dezerto; ĝi estas larĝe distribuita sur la terglobo, tiel ke kredeble *spuneroj*, aŭ almenaŭ, ni diru, *spunerojdoj*, aŭtentike indiĝenaj, naskiĝis en ĉiuj mondopartoj. Kredeble en la vejnoj de preskaŭ ĉiu homo nun vivanta fluas kelkaj gutoj da *spunera* sango.

Ĉi tiu tribo konsistas el ĉiuj el ni, kiuj foje intermiksas niajn vortojn, pensojn aŭ agojn tiel, ke malica persono povus sugesti, ke eble ne ĉio estas en ordo en nia subsegmenta regiono.

Ĉe mondkongreso de esperantistoj, unu el ni, rigardante kongresaninon, kiu portas pitoreskan nacian kostumon, intencas diri ĝentile, “Vi havas belan kufon!” sed iel la vortoj forlasas la buŝon kiel, “Vi havas kelan bufon!” — Alia demandas, “Kie mi trovos moŝtparkon?” kaj oni direktas lin al la palaco, dum fakte li volas aĉeti nur poŝtmarkon. — Ni esperu, ke neniu policano aŭdas la junulinon, kiu, respondante al invito kun entuziasmo, diras ne, kiel ŝi kredas, “Mi nur kombos la harojn, kaj poste al la balo!” sed “Mi nur bombos la parojn, kaj koste al la halo!” — Eble “Mi gratulas vin pro la aĉeto!” iĝas “Mi gratetas vin pro la aĉulo!” — kaj estas bedaŭrinde, se sur la podio aludo al “la forpaso de amikoj” rearanĝas sin kiel, ŝajne, “la amaso de formikoj.”

Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro*, oni povas en Esperanto nomi tiajn inversigojn de literoj aŭ silaboj «kontraŭknaĵoj»; ĝia ekzemplo estas “labori fiŝe kaj muse” anstataŭ “fuŝe kaj mise”. La humoristo Louis Beaucaire nomas ilin «bervalajoj», sed temas nur pri ŝercoj rilate al amoro. Kredeble la plej bona termino estas tiu, elpensita de Gaston Waringhien, «sonalturno» (en *Lingvo kaj Vivo*, p. 36).

Ano de la *spunera* tribo povas ankaŭ foje misaranĝi tutajn vortojn, ekzemple, “Li donis kison al la hundo, kaj oston al la edzino, poste foriris.” — “Rapidu, Joĉjo! Finmanĝu viajn ŝuojn kaj surmetu viajn sandviĉojn!” — “Ĉu mi plantu la fenestrojn sub la dian-

toj?” — “Jen fotoĵo de mia kvincentjaraĝa filino, ĉe la ĉefpordo de la studenta kastelo.”

Okazas ankaŭ konkretaj agoj spunerecaj. Estas pri la mondfama sciencisto Neŭtono, ke oni rakontas, ke iam li metis sian poŝhorloĝon en bolantan akvon, kaj rigardis la ovon en sia mano por kontroli la daŭron de la kuirado. La patrino de la aŭtoro iam trovis sin, nokte, meze de la dormoĉambro, kun malplena lakto-botelo en la mano. “Kiel distriĝema mi estas! mi devas tion meti ekster la pordon por la laktisto.” Ŝi malfermis la pordon, kaj trovis la vekhorloĝon sidanta sur la sojlo...

Kredeble preskaŭ ĉiu, kiu ofte senŝeligas legomojn, iam metis ian preparitan legomopecon en la ŝelujon kaj ŝelopecon inter la kurotajn legomojn? kaj preskaŭ ĉiu fumanto, kiu laboras ĉe skribotablo, iam aŭ penis bruligi sian globkrajonon, aŭ skribi per sia cigaredo? La aŭtoro, kiu kutime uzas fontoplumon por serioza verkado, plurfoje ekprovis replenigi sian fontoplumon el ia apuda trinkaĵo; feliĉe, ĝis nun ne komencis trinki la inkon. Se vi multe korespondas, ĉu vi neniam gluis propagandan glumarkon, kie devus esti la poŝtmarko, aŭ sigelis koverton, lasante la leteron ekstere?

Kolegiestro en la universitato de Oksfordo, d-ro W.A. Spooner (1844–1930), akiris nacian reputacion pro tiaj inversigoj, tiel ke por britoj eraroj, kiel “porko kun granda fezo” anstataŭ “forko kun granda pezo” estas *spunerismoj*; pro tio lia nomo povus esti la nomo de nia distriĝema, konfuziĝema tribo.

Ŝajnas, ke fakte Spooner ne multe diris tiajn sonalternojn; tiuj, kiuj certe estas aŭtentike liaj, ne estas tre amuzaj, ĉar la eraroj ne kreis aliajn vortojn. Tiuepoke, estis lia devo, gvidi diservojn en la kolegia kapelo, kaj iam li anoncis himnon “Renkantaj veĝoj...” anstataŭ “Venkantaj reĝoj...” Klerulo, kies nomo (ofta en Britujo), estas tradukebla “d-ro Infano” prezentis amikon, kaj d-ro Spooner devis prezenti ambaŭ al tria persono. En epoko, kiam tiaj kolegiaj kleruloj devis resti fraŭloj, li prezentis ne “la amikon de d-ro Infano” sed “la infanon de d-ro Amiko”! Sed la vere ridigaj *spunerismoj* estis, verŝajne, legendo-faraj elpensadoj de studentoj. La vastiĝanta legendo pri ili iom tedis la kolegiestron, kiu foje diris, agacite, al studentoj, “Vi nur esperas, ke mi diros unu el *tiuĵ* tiaĵoj.”

Li ja foje konfuzis ideojn, parolante; en komitato: “La kazon de ĉi tiu studento, kiel vi memoras, ni jam diskutis en nia venonta kunveno.” Dum promeno en Oksfordo, ĝentile levante sian ĉapelon por saluti vidvinon nigre vestitan, li mallaŭte klarigis al kolego, “Kompatinda virino!... perdis la edzon... tragika afero... *misiistoj* manĝis lin... kompatindulino!” Biografo opiniis, ke eble li vere havis ian cerban difekton, kiu, kvankam ne grava malhelpo, kaŭzis tiajn konfuzojn.

Estas iom nejuste, ke oni memoras lin pro tiaj eraretoj, ĉar Spooner estis homo sufiĉe nobla. Li venkis malfacilaĵojn: krom la ebla cerba difekteto, li estis albino kaj ege miopa. Jam kiel studento li estis tute blankhara. Li studis tre konsciencie kaj sukcese; kiel lektoro kaj kolegiestro li diligente laboradis, krome helpis plurajn bonfarajn organizojn; ankaŭ faris erudiciajn esplorojn pri diversaj temoj. Li estis modesta, kaj dubis pri la valoro de siaj propraj prelegoj kaj predikoj. Kiam en 1877 la regulo pri deviga fraŭleco estis nuligita, li edziĝis al bonkorulino, kiu mem faris pionirajn laborojn pri rekapabligo kaj rehejmigo de kronike malsanaj hospitalaj pacientoj.

Ili havis sep infanojn; Spooner verŝajne estis bona edzo, patro, kaj kolegiestro. Kvankam li opiniis, same kiel multaj samtempuloj, ke virinoj ne rajtas ricevi universitatajn diplomojn, li helpis starigi la unuan kolegion por virinoj en Oksfordo.

Oni multe rakontis pri liaj bonkoreco kaj saĝo rilate al studentoj. Kvankam pro sia difekto li foje faris komikajn erarojn — riproĉis studenton, kiun li devus gratuli, kaj inverse; interŝanĝis nomojn aŭ faris nekompreneblajn aludojn, parolante al la malĝusta persono, kiam *spunereco* regis lin; tamen li kutime tre bone komprenis kolegiajn aferojn kaj ofte eĉ profunde perceptis pri siaj studentoj. Estis Spooner, kiu konsilis al Leonard Woolley, iĝi arkeologo; Woolley iĝis mondfama en sia fako kaj dum dek du jaroj faris la tre gravajn esplorojn ĉe Ur en (nuna) Irako, kiuj multe pligrandigis sciojn pri fruaj civilizacioj. Spooner estis ankaŭ afabla: oni rakontas, ekzemple, ke kiam juna egipto ekstudis ĉe lia kolegio, Spooner multe zorgis pro la suferoj, en malvarma, malseka angla vintro, de junulo, kiu kutimis al varma klimato; la kolegiestro mem okupis sin pri ekstrap litkovriloj kaj varmaj vestoj.

Por esperantistoj, eble la plej bela anekdoto pri Spooner temas pri lia konduto, dum la unua mondmilito, 1914–18. Dum la dua mondmilito la britaj registaro kaj popolo kutime pli inteligente distingis inter nazia registaro kaj grandparte mem viktima germana popolo; dum la unua ekzistis multe pli da ŝaŭma, malracia malamo. Oni nomis la germanojn “hunoj”, vere propagandis malamon, kaj iu, kiu sugestis, ke ekzistas ankaŭ multaj senkulpaj germanoj, riskis akuzojn pri manko de patriotismo.

Tiutempe, kiam, tragike ofte, la oksfordaj kolegiestroj metis sur anonctabulojn, kun kelkaj respektaj vortoj, funebrajn avizojn pri militaj mortoj de eks-studentoj — britoj, kanadanoj; novzelandanoj, hindoj kaj aliaj — estis tiu Spooner, tiu, pri kiu ridantoj kreis komikan legendon, kiu metis funebrajn avizojn ankaŭ pri germanaj eksstudentoj.

Oni protestis. Spooner firme insistis, “Ankaŭ ili estas anoj de nia kolegio, kaj ankaŭ ili oferis siajn vivojn pro sia patrujo.”

Kaj post la fino de la milito, estis Spooner, kiu insistis, ke tiuj germanaj nomoj aperu kun ĉiuj aliaj, sur la memortabulo en la antaŭĉambro de la kolegia kapelo.

Novaj Proverboj

Vera agado pli valoras ol flagado.

Eĉ malgranda regalo helpas en hospitalo.

Prifieru vian aŭton — sed prizorgu ĉies haŭton.

Ne forviŝu guton da suko per kotoplana tuko.

Supersignoj

Ni kaŭzas ridon, eĉ indignon,

se ni forgesas supersignon.

Vorto efikas nur sence

aŭ tre netaŭge, senintence;

sed supersigno superflua

estas simile sencdetrua.

Per sinksandviĉoj hom' freneza
sin nutrus per dieto peza.
Ĉu vere inter ĝardenfloroj
necesas kelkaj ŝarklaboroj?
Ĉu belulino por la balo
sin vestas supre per la salo?

Vi havas malbanalan kazon
se muso flugas sur la nazon.
Saĝo en koro pli utilas
ol sago kiu koron spilas!
La elektrist' laboras ŝalte;
nur pro difekt' li saltas alte!

Se nun avidas vi pasteĉon,
ne diru, "Mi deziras peĉon."
Ke "multaj plagoj vin atendas..."
la urbon ne tre rekomendas.
Jes, pri leteroj ja kontrolu —
sed pri 'postaĵo' ne parolu!

Lingvaj Bariloj

En 1979, meksikia aviadilo perdiĝis en densega nebulo, ie super la landlimo inter Meksikio kaj Usono; sed la ekipaĵo bone funkciis kaj la piloto estis kompetenta.

La meksikia piloto do petis, per sia radioaparato, gvidadon de la usonaj aviadil-direktistoj surteraj, ankaŭ tute kompetentaj, konsciencaj teknikistoj.

Estis frua mateno, dimanĉe; tial, deĵoris neniu direktisto, kiu komprenis la hispanan.

La meksikia piloto pli kaj pli urĝe petis helpon. La usonaj direktistoj pli kaj pli urĝe penis helpi lin.

La aviadilo kraŝis.

Mortis ses meksikianoj kaj kvar usonanoj: dek homoj, ne-necese.

Reklamoj

Anonco en broŝuro de vojaĝ-agentejo:

Hotelo «Palaco»

Post la grava incendio, kiu necesigis grandajn riparojn, ni aranĝis provizore gastigi niajn altestimatajn klientojn en la hotelo «Marborda Parko». Ni promesas al vi akcepton eĉ pli varman.

En butika montrofenestro:

Ni interŝanĝas ĉiujn varojn!

Biciklojn, lavmaŝinojn, televidilojn, muelilojn,
horloĝojn, magnetofonojn, k.t.p., k.t.p.
Alkonduku vian edzinon kaj ni aranĝos
plej kontentigan interŝanĝon!

Inter la ĵurnalaj anoncetoj: “**Perdita** – Preskaŭ tuta blanka kato.”

Por Memori la Planedojn de Nia Sunsistemo

Jen frazo mnemonika (memorhelpa) pri la naŭ planedoj, komencante plej proksime al la Suno: **Miranto Vidas Teleskope Multajn Juvelecajn Stelojn, Universon Neniam Palpeblan.**

Kaj jen sekvas rima helpilo:

La Naŭ Planedoj

Plej proksime al la Suno, kun la plej mallonga kuro,
malfacile observebla, ne loĝebla, jen **Merkuro**.
Tagoj duonjare longaj; fluas plumbo, fluas stano;
klifoj tri mil metrojn altaj; fora nigro sur safrano.

Plej proksima al la homoj, kvazaŭ al la Ter' ĝemela,
Jen **Venuso** brilas glore, amreĝino noktĉiela;
Ege varma, nubkovrita, globo sub kolosaj premoj;
kaj roladis dum jarcentoj por poetoj en poemoj.

Trie Tero nun orbitas, kun miraklaj multoblecoj,
kun multmilaj, tre diversaj, interdependantaj specoj;
kaj scivolas kaj sciiĝas pri la kosmo kaj atomo,
glora kaj terura kaj unika — nur la HOMO.

Marso brilas varme-ruĝe, tamen ĝin glacio tegas,
kaj ventegoj polvoplenaj la surfacon ŝtorme regas;
Nitrogeno, akvo, estas; eble iam vivis io,
sed marsanoj penskapablaj estas, ve! nur fantazio.

La gigantan Jupiteron kovras nub-tavol' opaka,
hidrogena, heliuma, akva kaj amoniaka;
malvarmego, radiado kreas vastan spac-gehenon;
kaj premejoj en la koro solidigas hidrogenon.

Sesa, ĉe la limo de la vidopov' sen-lensa,
Meze de la brilaj ringoj, jen Saturno, plej maldensa;
ringoj kvar el rokfragmentoj, eble eroj satelitaj;
vaka globo malvarmega, pluraj gasoj likvigitaj.

Per rigardo teleskopa, verda montras sin Urano;
ne pro ia planta vivo, nur pro nuboj el metano;
malvarmeg' neimagebla por malgranda menso tera;
kaj Urano pro distanco restas fremda kaj mistera.

Sed orbitas pli distance de la Tero kaj la Suno
oka mondo pli mistera, pli malvarma — jen Neptuno;
sub neptunaj nuboj eble roka aŭ glacia koro
estas, sed eĉ nun ne eblas granda certo, aŭ esploro.

Pro kalkuloj kaj konjektoj astronomo kredis lastan
planedeton laŭ logiko; traserĉadis volbon vastan...
kaj troviĝis, nur per movoj sur fotita stela fono,
eta, fora, frosta, fremda, glaciglobo — jen Plutono.

23. FABELO EL KAMBOĜO

Kamboĝo estas malgranda lando azia, plejparte agrikultura; ĝi grandparte dependas de la longa rivero Mekongo, kaj havas centran lagon ĉ. 150 km longan. La ĉefurbo estas Pnompeno. Kiam la lando estas trankvila, ĝi povas abunde produkti rizon, tropikajn fruktojn, legomojn, bonegajn fiŝojn kaj aliajn marbestojn de multaj specioj. Ekzistas interesa nacia kulinara tradicio kun pladoj indaj de internacia uzado.

En Kamboĝo troviĝas ankaŭ unu el la plej imponaj kaj belaj temploj de Azio, la mirinda Angkor Vat. Ĉi tiu kolosa konstruaĵo kun klostroj, ŝtuparoj, librejoj, galerioj, sanktejoj, atingas arkitekturan klimakson kie, meze de kvar malpli grandaj turoj kaj grandioza muro, la centra piramida turo staras pli ol 65 metrojn alta. Ĉirkaŭ la templo brilas trankvilaj lagetoj, kiuj spegulas la altajn palmojn, kies verdec kontrastas kun la ŝtonoj. Sur la muroj, pordegoj, parapetoj kaj terasoj, riĉe kaj varie abundas statuoj kaj skulptaĵoj, kun temoj el hinduaj sanktaj libroj. La tuta strukturo de la templo estas plena de kosmaj kaj religiaj simboloj, kun multaj detaloj, kiuj iam kontribuis al la soleneco de ritoj. La belega templo estis parto de perdita urbo, Angkor Tom, iam la ĉefurbo de la antikva Kmer-Imperio.

La popolo de Kamboĝo ankoraŭ konsistas plejparte el kmeroj; sed tiu unua ĉefurbo, kiun hindua imperiestro fondis dum la naŭa jarcento p.K., kaj, post militoj, budhana imperiestro rekonstruis dum la dekdua jarcento, estis tute forlasita en 1434. La ĝangalo parte kovris ĝin, ĝis en 1861 franca naturesploranto, Henri Mouhot, retrovis ĝin. Ankoraŭ iom vivas tradicio, ke iu Dia Arkitekto konstruis tiun templon.

Do, la naturo dotis Kamboĝon per eblecoj nutri sian popolon kaj eĉ eksporti superfluan; kaj anonimaj artistoj dotis ĝin per senspiriga vidindaĵo, kiu povus esti la centro de digna kultura turismo. Estas frostiga ironio, ke tiu bela lando, kie la granda templo estis dediĉita unue al la hindua dio Viŝnuo, la «Konservanto de la

Mondo», kaj poste al budhisma bodhisatvo Avalokiteŝvaro, sankta personigo de Kompato, kun serena vizaĝo, kun multaj brakoj por helpi suferantojn, troviĝis en la vojo de pluraj sangaj konfliktoj, kiuj ekde 1976 igis Kamboĝon kredeble unu el la plej suferoplenaj landoj de la mondo.

Pluraj registaroj eksteraj, kaj ekstremismaj fanatikuloj interne, detruis multan naturan kaj kulturen riĉecon, kaŭzis mortojn milionope, kaj lasis la popolon, en 1979, ĉe la rando de fina pereado pro malsato. La ĉefa lumeto en tiu noktomezo de nacio estis, ke kiam la tutmonda homaro plene sciigis pri la krizaj suferoj, helpo komencis alveni — kvazaŭ el la multaj diversmaniere ornamitaj brakoj de Avalokiteŝvaro — el landoj kun tre diversaj reĝimoj kaj diversaj rasoj, religioj, ideologioj.

Ĝis nun ne ekzistis organizita Esperanto-movado en Kamboĝo, sed kelkaj esperantistoj iam laboris tie kaj korespondadis. Oni ne scias, ĉu ili ankoraŭ vivas...

La kamboĝaj fabeloj, en Eŭropo troveblaj, ĝenerale estas bonhumoraj, mildaj, kaj enhavas ian humuran justeco-senton. Jen unu el ili.

Ili Volis Sekigi la Maron

Du viroj, malriĉaj kaj ne tre saĝaj, estis fidelaj amikoj. Kiam ili komencis pensi pri edzinoj, ili faris promeson unu al la alia: “Se mi iam riĉiĝos, mi helpos mian amikon.”

Unu el ili baldaŭ edziĝis kun virino, kiu havis multajn bonajn kvalitojn. Ŝi intencis esti lojala kaj fidela; ŝi sciis kiel kuiri kaj fari ĉiujn hejmajn taskojn; kaj ŝi estis pacienca, takta kaj serena. La alia amiko edziĝis al virino multe malpli taŭga; ŝi ne estis kompetenta pri hejmaj taskoj; ŝi ne multe komprenis pri lojaleco; kaj ŝi estis malpacienca kaj kritikema.

La viro kun la bona edzino iam ekdiskutis kun ŝi, kiel ili povos pliriĉiĝi. Ŝi tuj diris, “Mi kunlaboros en iu ajn ekstra laboro; aŭ, se vi deziras, mi povos ŝpinadi kaj teksadi, kaj ni vendos bonkvalitajn ŝtofojn.”

La edzo daŭre pripensadis la problemon, kaj, la postan vesperon, sugestis solvon:

“Edzino, mi havas bonan ideon. Dum la jarcentoj, multaj ŝipoj pereis en la maro. Imagu, kiom da oro, arĝento, juveloj kaj aliaj valoraj objektoj devas nun kuŝi sur la fundo de la maro!”

“Certe.”

“Do, ni estas viglaj kaj laboremaj; ni iru al la marbordo kun niaj korboj kaŭĉuk-tegitaj, kaj ni sekigu la maron ĝis ni povos vidi la fundon. Tiam ni povos forporti multajn trezorojn kaj iĝi riĉaj.

La inteligenta edzino tre dubis pri tiu propono, sed ne mokis la edzon. Ŝi takte diris:

“Do, kara mia, ni provu. Kaj se ni ne sukcesos malkovri la fundon kaj havigi al ni oron kaj arĝenton, certe ni povos almenaŭ kapti multajn fiŝojn. Kaj ni povos malplenigi tiujn fiŝojn, sali kaj sekigi ilin, aŭ prepari el ili kmeran fiŝosaŭcon; kaj ni almenaŭ havos ion por vendi.”

Matene, la edzino leviĝis frue, kaj bone kuiris multan rizon, purigis legomojn, preparis arekonuksojn en betelfolioj por trankviliga maĉado, pakis ĉion bonorde en korboj, kaj pretigis la kaŭĉuk-tegitajn korbojn por ŝoveli akvon. La geedzoj do povis frue piediri al la marbordo, kun taŭga provianto por pluraj tagoj.

Ili trovis taŭgan kaŝejon por sia provianto, kaj dum tuta tago diligente ŝovelis marakvon, paŭzante nur por manĝi. Tiel ili daŭre laboradis dum kvin tagoj.

La sesan tagon, hazarde estis granda malfluso, kaj la edzo ĝoje rigardis la maron: “Vidu, edzino! ni jam komencas sukcesi! La maro estas videble malpli alta!”

“Ni do klopodu daŭre,” diris la lojala edzino. “Ni penadu dum almenaŭ duono da lun-vojaĝo. Almenaŭ ni tiam kaptos multajn fiŝojn, kiujn mi scias prepari tre bone; kaj tiel ni gajnos tre utilan monsumon. Kaj eble ni atingos ankaŭ la malnovajn ŝipojn kaj iliajn trezorojn!”

Ili daŭre laboradis dum pluraj tagoj; kaj la lojala edzino multfoje kuraĝigis sian edzon, prizorgante la fiŝojn, kiujn ili dumlabore kaptis, parolante pri multaj kaptotaj fiŝoj, grandaj gajnoj per fiŝosaŭco, tutaj rakoj plenaj de sekiĝantaj fiŝoj. La edzo aŭskultis kun plezuro; sed ankaŭ multaj fiŝoj en la maro aŭdis tiujn vortojn, kun malplezuro. Tiu paro ŝajnis vere persistema.

Kredante la danĝeron serioza, la fiŝoj naĝis al la Reĝo de la Fiŝoj.

“Reĝa Moŝto!” ili lamente kriis. “Ni pereos! Du homoj intencas sekigi la maron kaj kapti nin centope. Kaj ili laboras tre persiste. Ili jam ŝoveladis akvon dum dek tagoj.”

La Reĝo de la Fiŝoj pripensis la aferon.

“Tian persiston ni ja prenu serioze. Fiŝetoj! Naĝu profunden, naĝu al la malnovaj pereintaj ŝipoj. Plenigu kvin potegojn per ormoneroj, kaj kvin potegojn per arĝentaj moneroj; kaj vi dudek fiŝegoj, portu ilin supren! Vi fiŝegoj tie! Serĉu inter la ŝiprompaĵoj arĝentajn pletojn, pezajn pokalojn, aliajn objektojn el oro, arĝento aŭ gemoj, kaj portu ilin supren en viaj buŝoj. Iru al la marbordo, kaj petu al tiu paro, ke ili kontentiĝu per tiu donaco, kaj ne suferigu la tutan fiŝan popolon.”

La fiŝoj obeis, kaj baldaŭ naĝis amase al la marbordo, kie la gedzoz daŭre ŝoveladis akvon. Ili malfermis siajn faŭkojn, kaj faligis sur la malsekan sablon potojn plenajn de moneroj, pletojn, pokalojn, telerojn, ornamaĵojn. Per sia bobeleca parolado ili petis kompaton.

La geedzoz ĉirkaŭbrakis unu la alian kaj dancis pro ĝojo. Ili bezonis plurfoje iri kaj reveni, por porti ĉion al la hejmo. Ili iĝis riĉaj, vivis tre agrable, kaj ĉiuj respektis ilin.

Iom poste, la amiko decidis viziti ilin, kaj kunkondukis sian edzinon. Li miris, kiam li trovis, ne barakon, sed belan domon kun belaj mebloj. Sed la riĉa amiko varme bonvenigis la geedzoz kaj invitis ilin tagmanĝi. La edzino, bele vestita, kun multaj juveloj, ĝoje kuiris por la gastoj. Ili manĝis ne nur rizon kun legomoj, kaj fiŝaĵojn, sed frititan kokaĵon kun zingibro, fungojn kaj porkaĵon; salaton el grandaj vinberoj kun koka, porka kaj omara viandoj; kaj rizon kun multaj belaj pecoj da porkaĵo.

La ankoraŭ malriĉa viro, post kelkaj komplimentoj, finfine demandis:

“Kiel vi tiel riĉiĝis? Ni du ankoraŭ vivas mizere.”

“Amiko, mi plenumos mian malnovan promeson, kaj metos ankaŭ vin sur la vojdon al prospero. Vi devas diligente ŝoveli la markvon, ĝis la fiŝoj ektimos.” Kaj li rakontis la tutan historion.

Tiun nokton, en ilia malriĉa hejmo, la amiko diris al sia edzino:

“Do, morgaŭ matene vi frue preparu por ni provianton, kaj ni tuj post sunleviĝo iros al la maro kun niaj korboj. Baldaŭ ni estos riĉaj.”

La edzino leviĝis iom frue, ne tre frue; kaj kuiris rizon, sed ne lerte aŭ ŝpareme. Kiam ŝi prenis ĝin el la rizujo, ŝi faligis manplenon; kiam ŝi lavis ĝin, ŝi perdis alian manplenon; kaj kiam ŝi ŝutis ĝin en la kaserolon, ŝi ŝutis manplenon sur la plankon. Pri legomoj, aŭ arekonuksoj, ŝi tute ne pensis.

Finfine tiu dua paro staris sur la marbordo, kaj komencis ŝoveli la akvon. Kelkaj fiŝoj rimarkis ilin, kaj raportis tion al la Reĝo, kiu ordonis al kelkaj spionoj, deĵori proksime kaj observi ĉion diligente.

La geedzoj ŝoveladis dum kvin tagoj, sed ili ne helpis kaj kuraĝigis unu la alian. Ili kritikis unu la alian, malafable riproĉis unu la alian pri nesufiĉa parto de la laboro aŭ tro granda porcio de la rizo; kaj iĝis pli kaj pli malbonhumoraj.

La sesan tagon, la edzino ĵetis sian korbon sur la sablon.

“Ne hieraŭ vespere mi naskiĝis!” ŝi kriaĉis. “Ni ŝoveladaĉis dum kvin tagoj, kaj ankoraŭ nenio okazis! Stulta ideo! Mi ne plu ŝovelos!”

Tiam eksplodis vera kverelo. La edzino insultis la edzon, kaj eĉ diris, ke lia patrino estis hundino. Tiam la edzo koleriĝis, kaj nomis la edzinon per tre malbelaj nomoj. Ŝi vangofrapis lin. Li tiris al ŝi la harojn. Baldaŭ ili vere interbatalis, kun multaj batoj kaj fiaj vortoj. Ili tiel senbride luktis, ke iliaj lumbotukoj malnodiĝis, kaj finfine ili staris sur la sablo tute nudaj.

Finfine ili estis lacaj, kaj konstatis, ke ili montras sin maldece al iu ajn preterpasanto; do ili ruĝiĝis, kaj ĉesigis tiun luktadon.

“Ni estas mizeruloj, kaj ni restos mizeruloj! Ni ne plu lacigos nin!”

La fiŝaj spionoj jam konkludis, ke paro, kiu pli kverelas ol kunlaboras, ne prezentas grandan danĝeron; ili konsilis al la Reĝo, ke ne necesas denove proponi valorajn objektojn. Ili aŭdis nur frapojn kaj insultojn. Tamen, por finkontroli, ili metis la kapojn super la akvon; kaj ili vidis la malsaĝajn geedzojn tute nudaj. Tiam, la fiŝoj saltis el la akvo pro gajeco, refalis plaŭde, kaj ridegis. Ili tiel ekstaze ridegis, ke la fiŝo kiun la kmero nomas *Sandaj* ŝiris sian buŝon.

Estas pro tio, ke, ankoraŭ hodiaŭ, la fiŝo *sandaj* havas grandan faŭkon, kvazaŭ ŝiritan de unu flanko de la kapo al la alia.

Novaj Proverboj

Faru viajn planojn, sed uzu viajn manojn.
Vartu eĉ brulmeduzon, sed ne vartu ĵaluzon.
Testudon vi ne urĝos, eĉ se vi ĝin skurĝos.
Ne uzu martelon por rompi ovoŝelon.

Versareto — pri 'per' kaj 'kun'

Li iris el la domo **kun** ombrelo,
sed **per** ĝi ŝirmis sin, kiam ekpluvis;
Li iris al kunveno **kun** tabelo,
sed **per** tabelo sian punkton pruvis.

Pro komitata tedo, je la fino
foriras li **kun** kapdoloro forta;
kuracas sin **per** te' kaj aspirino,
kaj sin konsolas **per** tranĉaĵo torta.

Problemo en Internacia Juro

Landlimoj ofte ĝenas la homojn; sed mezaĝa venezuelano trovis la landlimon inter Venezuelo kaj Kolombio sufiĉe utila. Lia domo situis sur tiu landlimo. Ne tre grava misfaro lia estis krimo laŭ venezuela leĝo, sed ne laŭ kolombia leĝo.

Ĉiufoje, kiam venezuelaj policanoj alvenis por lin aresti, li rapide forkuris el ĉambro en Venezuelo, en sian dormoĉambron, kiu situis en Kolombio.

Anonceto

Sub la rubriko «Vakaj Oficoj»:

Bona salajro – Ni volas dungi diligentan virinon, kiu lavos, glados kaj melkos tri bovinojn.

24. ATINGOJ EN ALTA AĜO

Ĉiu el ni aŭ mortos frue, aŭ spertos maljunecon, kiu ofte alportas malfortojn kaj dolorojn. La *Proverbaro Esperanta* nin avertas: “Aĝo maljuna ne estas oportuna.” — “Aĝo tro matura ne estas plezura.” — “En juneco logas, en maljuneco tedas.”

Poeto Julio Baghy, kiu dum jaroj suferadis pro kora kaj aliaj malsanoj; plurfoje priskribis maljunecon amare, ekzemple:

“Domaĝe estas maljuniĝi
por putri sub la propraj ruboj.”

aŭ

“Ho ve, la jaroj — amikino kara —
similas al malicaj gnomoj.

Jen ili venas... iras kun barbara

kruelo ŝtele al ni, homoj,

el zorgfadenoj teksas sulkan reton,

al brunaj haroj neĝon ŝutas,

al buŝanguloj ĉizas amareton,

al brusto pezan spiron trudas.”¹

Oni rakontas pri maljunulino, ankoraŭ ne sperta esperantistino, kiu, en kunveno, aŭdis, “Ni batalu kontraŭ diletantismo!” — “Ni devas elsarki francismojn!” — “Pli grave, elsarki neologismojn!” — “Ni rezistu la tenton al anarkiismo!” Finfine ŝi ekstaris, “Kaj kiu faros ion pri reŭmatismo?”

De la multaj eblaj suferoj de maljuneco sekvas tri konsiloj. Individuoj, lokaj komunumoj, kaj la ŝtato, traktu maljunajn homojn kiel eble plej dece, kun inteligenta kompatato kaj sufiĉa helpo; la homaro helpu sciencajn esplorojn, kiuj celas mildigi suferojn kaj redoni kapablojn al maljunaj homoj; kaj ni ĉiuj iom prizorgu nin mem, almenaŭ penante konservi nian korpan sanon kaj, eble eĉ pli grave, nian mensan vigecon. Ne ekzistas magia formulo, por resti

1. «Dum sunsubiro» kaj «Amara konsolo» el *Aŭtuna Foliaro* de Julio Baghy, Librejo Pirato, Ōsaka 1970; p. 72 kaj p. 106.

sanaj kaj penskapablaj, kaj la sama vivostilo ne taŭgas por ĉiuj; sed ni almenaŭ iom pripensu la vivostilon.

Meze de malgajaj pensoj pri neeviteblaj degeneroj de korpo kaj menso, ni tamen povas trovi multajn atestaĵojn, ke ne estas nepre necese, iĝi mizeraj kiam ni iĝas maljunaj.

Geriatro, la scienco pri maljuneco, nun estas grava medicina fako; en laboratorioj kaj hospitaloj multloke en la mondo, fakuloj faras multajn esplorojn, kiuj celas plibonigi la lastajn jarojn de la vivo. Tial, tiuj, kiuj nun estas junaj aŭ mezaĝaj, eble ne devos atendi ĉiujn afliktojn, kiuj pezis sur la geavoj. Jen slogano por la homaro: "Pli da geriatristoj, malpli da generaloj!" Ĉar estas tre malŝpareme, savi nin de maljuneco, per frua morto sub bombado.

Sed multaj homoj jam montris, ke jam ekzistas ebleco, fari ion farindan, en alta aĝo.

Pablo Picasso, hispana artisto, daŭre kreadis, tre originale kaj varie, dum 75 jaroj. Nur unu ekzemplo el multaj, de lia persista krea energio, estas, ke en 1968 li verkis serion de 347 gravuraĵoj. Tiam li estis 87-jara.

Thomas Mann, germana verkisto, devis lasi nefinita sian *Felix Krull*, kiun multaj taksas la plej granda komika romano en la germana lingvo, kiam li mortis en 1955, 80-jara.

Charlie Chaplin, genia komika aktoro, verkis kaj direktis filmon kiam li estis 77-jara; 68-jara li verkis kaj direktis la satiran filmon «Reĝo en Novjorko», en kiu li ankaŭ brile rolis. Chaplin estis brito, sed deklaris, "Mi estas civitano de la mondo."

Albert Einstein, judo, civitano unue germana, poste svisa, fine usona, verŝajne eksterdube la plej granda sciencisto de nia jarcento, eldonis novajn teoriojn, kredeble ankoraŭ ne plene taksablajn, kiam li estis 71-jara. Iom antaŭ sia morto, 76-jara, li postlasis fragmenton, en kiu li difinis sian vivocelon: "Tio, kion mi deziras atingi, estas simple, servi, per miaj malfortaj kapabloj, veron kaj justecon, riskante, ke mi plaĉos al neniu."

G.B. Shaw, irlanda verkisto, tre influe pensiga, verkis kvaraktan komedion kiam li estis 91-jara kaj sesaktan fabelkomedion kiam li estis 92-jara. Tiuj lastaj dramoj ne estas tiel bonaj, kiel liaj majstroverkoj, sed ili ankoraŭ disŝutas multajn sparkojn de sprito kaj originala pensado, komikajn surprizojn kaj koncizajn epigramojn.

Pablo Casals, hispana (kataluna) violonĉelista virtuozo kaj fama kondukisto, fondis muzikan festivalon ĉiujaran kiam li estis jam 74-jara, kaj daŭre rolis en ĝi kaj faris aliajn muzikajn laborojn ĝis li estis pli ol 80-jara.

Giovanni Martinelli, itala tenorulo, kantis la rolon de la imperiestro en la opero *Turandot* kiam li estis 81-jara.

Kirurgo devis amputi unu kruron de la granda tragika aktorino Sarah Bernhardt, francino, kiam ŝi estis 71-jara; sed ŝi daŭre aktoradis brile, ĝis nelonge antaŭ sia morto, kiam ŝi estis 79-jara.

Katsuŝika Hokusaj, japana artisto mondfama, diris, ke ĝis la sepdeka jaro li estis mallerta; “okdekjara, mi havos konsiderindan talenton; centjara, mi estos sublima” — kaj kiam li estis mortanta, 89-jara, post vivo de senĉesa sindediĉo al sia arto, li diris, “Se mi havus nur kvin aldonajn jarojn, mi povus iĝi granda pentristo.”

En la antikva mondo: Firdaŭsi, persa poeto, finis sian ĉefverkon, nacian epepeon, *La Libro de Reĝoj*, en 1008 p.K., kiam li estis, probable, 68-jara. Cicerono rakontis, ke la helena dramverkisto Sofoklo, vokita en kortumon ĉar liaj filoj asertis, ke li ne plu kapablas prizorgi sian havaĵon, refutis la akuzon, deklamante odon el sia verkata tragedio *Edipo en Kolono*. La bela anekdoto ne estas certe vera; sed ŝajnas certe, ke Sofoklo verkis tiun tragedion, kiam li estis 90-jara.

Oni povus tamen protesti, ke geniuloj estas eksterordinaraj, kaj atingoj de tiaj elstaraj homoj en alta aĝo ne kuraĝigas nin ceterajn. Do, sekvos kelkaj faroj de pli ordinaraj homoj, kiuj ne cedis facile al la tiraneco de la jaroj.

En 1977 usonano sukcesis en ekzameno por fariĝi aviadila piloto, estante 82-jara; sed li ne estis la plej aĝa piloto ankoraŭ fluganta, kiu estis alia usonano, 92-jara. En 1978 74-jara anglino faris sportan paraŝutan descendon; sed en la antaŭa jaro angla viro faris same, 85-jara, kaj rompis nur — siajn okulvitrojn. En 1980, 81-jara anglino komencis amuzi sin per la sporto de balona flugado.

En nuntempa Britujo ekzistas universitato, tielnomite ‘aperta’, kiu instruas plejparte per radio, televido kaj specialaj libroj; ĝi ebligas seriozan studadon al multaj, kiuj, junaj, ne havis tiajn eblecojn. Ĝis nun la plej aĝa studento ĉe tiu universitato estis 93-jara; antaŭ nelonge, anglino 80-jara diplomigis, poste alia, 81-jara, kiu

devis forlasi lernejon kiam ŝi estis 13-jara, do antaŭ 68 jaroj. Aniĝis en 1980 82-jara vidvino.

Malpli saĝa estis svedino, kiu festis la 88-an naskiĝdatrevenon, manĝante okdek ok kremkukojn dum tridek ses horoj. Tiu orgio kostis al ŝi (ne mirinde) tri tagojn en hospitalo; sed estas io, kapabla tian orgion, tiuaĝe!

Enketo en Usono trovis du milionojn da emerituloj, kiuj deziris fari ian socie utilan senpagan help-laboron. En 14 lernejoj en Miĉigano oni tre sukcese utiligis 85 gemaljunulojn, eĉ kelkajn en radseĝoj, kiuj ne nur pacience helpis infanojn malrapide lernantajn, sed instruis pri multaj malnovaj artoj kaj metioj, ekzemple puntofarado, teksado, kudrado de multpecaj kovriloj. Kvar maljunaj ĉinaj enmigrintoj, kiuj eĉ ne scipovis la anglan, sukcese gvidis etan kurson pri la ĉinaj lingvo kaj kulturo. Interese, ke ĉe tiaj maljunaj helpantoj oni ofte rimarkis pliboniĝon de la sano.

Usona juĝisto emeritiĝis en 1965, 105-jara.

Alia usonano, E.K. Gaylord, eklaboris, 11-jara, kiel fragrikoltisto. Per laboro kaj entreprenemo li tamen riĉiĝis, kaj mortis kiel prezidanto de eldonejo, kaj milionulo. En tiu posteno li laboradis ĝis li estis 101-jara, iomete antaŭ sia morto.

En 1980, aŭtobusa ŝoforo subite mortis ĉe la stirilo, en Anglujo. Estis 76-jarulo, kies rapidegaj pensado kaj ago savis multajn vivojn, kiam li tuj haltigis la aŭtobuson.

Inter la plej malestimindaj krimuloj estas tiuj, kiuj rabas kaj mistraktas homojn, tro maljunajn por defendi sin. Ni ĝoju do pri norvega monaĥino, 70-jara. Ŝi vidis du junulojn, kiuj komencis ŝteli la monkolktan keston de la preĝejo. Tiu brava sankta fratino regalis unu el ili per tia pugnobato, ke li koliziis kun la dua, kaj ambaŭ forkuris. Kaj en 1979 multaj civitanoj de Fredericia, Danlando, admiris tiun 86-jaran daninon, kiu trovis brutan krimulon, kiu atakis ŝian servantinon. Kion faris la fragila vikingidino? Senkonsciigis la 32-jarulon, frapante lian kapon per bierbotelo.

Ofta simptomo de maljuniĝo estas kreskanta malinklino, provi ion novan. Sed angla avo, en 1980, indigniĝis ĉar li plezure provis la sporton de subglisila pendflugado en Sud-Afriko, sed en Anglujo oni ĉesigis liajn lecionojn, kiam oni sciigis, ke li estas 89-jara. 75-jara anglino deziris, kiel naskiĝdatrevenan regalon, flugon en aviadilo, kiu lopus por ŝi; kaj urba bonfara asocio plenumis ŝian

deziron. Anglino prenis sian rabat-bileton de pensiulino, kaj dum la 81-a vivojaro vojaĝis 6 449 km, vizitis multajn vidindaĵojn, kaj verkis pri siaj spertoj por nacia ĵurnalo. Alia anglino, 101-jara, konfesis tri dezirojn: vojaĝi al Francujo per teraplano (plenumitan); descendi subteren kaj esplori karbminejon (plenumitan, kun la helpo de ĝojplenaj karbministoj); kaj veturi en la fama rapidega aviadilo «Konkordo» (ankoraŭ plenumotan, kiam ĉi tiu ĉapitro estis verkata).

Neniu surpriziĝos, ĉar la sportoj, precipe rapidaj sportoj kaj tiuj postulantaj grandan muskolan forton, ne estas la ĉefa kampo por sukcesoj aŭ entuziasmoj de tre maljunaj personoj. Niaj muskolaj fortoj; rapid-movkapabloj kaj sensaj perceptoj velkas, normale, multe pli rapide ol niaj intelektaj. Tamen, en unu el la plej danĝeraj sportoj, boksado, 63-jara usonano, en 1916, eĉ knokaŭtis sian 45-jaran kontraŭulon. Svedo 65-jara gajnis olimpikan oran medalon por pafsporto, en 1912. Anglino iĝis brita nacia ĉampionino je arkpafado, por la 23-a fojo, kiam ŝi estis 67-jara, en 1922.

Maljunaj kruroj foje atingis rekordojn, kiuj certe bezonis ankaŭ maljunan kuraĝon. Precize kiom aĝa estis la sovetia emeritulo, Georgo Buŝujev, kiu en 1979 piediris, dum sep monatoj, de Rigo al Vladivostoko, t.e. 10 147 km, brita informfonto ne menciis, sed emerituloj ne estas molbekaj kokidoj. Skoto, Duncan MacLean, en 1977 kuris 100 metrojn dum 21,7 sekundoj. Ne tre eminenta rapideco, ĉar la mondrekordo, en 1979, estis 9,95 sekundoj; sed MacLean estis 92-jara.

Sed pri fizikaj kapabloj eble la plej esperiga atingo estis tiu de greko, Dimitrion Jordanidis, kiu en 1976 provis la antik-devenan maratonan vetkuron, distancon de 42,2 kilometroj. Ĝisnunaj ĉampionoj bezonis inter du kaj tri horojn. Jordanidis finis la maratonaĵon post 7 horoj 33 minutoj. Li estis 98-jara.

Novaj Proverboj

Maristo pri kablo, verkisto pri fablo, sed ĉiu laboru laŭ sia kapablo.
Ĉiu homo estas peco de la sama bestospeco.

Bona intenco! Fervora komenco! Kaj nun necesas pacienco.
Neniu scias plenan veron; ĉiu praktiku do moderon.

Versareto — pri 'ind' kaj 'end'

“La hejma tasko estas ja farenda,
Aŭ morgaŭ venos puno;
sed ne farinda!” veis Vilĉjo plenda;
“Ekstere brilas suno!

La tasko estas forĵetinda, teda!
Mi kuros al futbalo;
mi ne sidados stulta kaj osceda,
sed ludos post la stalo!”

Revenis li kun tuta korpo tre
lavenda tuje, kaj
al la patrino *oj!* kaj *fi!* kaj *ve!*,
malridoj kaj malgaj’;

flikendaj estis pantalon’ kaj jako;
la ŝuoj ŝajnis rubo;
kolera patro kaptis lin per brako:
“Batinda, bava bubo!”

“Lingvaj Respondoj”

Riĉulo havis hundon tiel ege inteligentan, ke li sendis ĝin al universitato.

Kiam ĝi revenis hejmen post la unua trimestro, la riĉulo demandis, pri ĝia progreso.

“Mi ne tre bone progresis en mondhistorio, ekonomiko aŭ sociologio, sed mi jam povas iom konversacii en fremdaj lingvoj.”

“Do, diru al mi ion en fremda lingvo.”

“Miaŭ!”



Granda hundaĉo trovis en grenejo katinon kun kvar katidoj.
Ĝi sukcesis peli ilin en angulon kaj la danĝero estis grava.

Subite la katino ĉesis sibli, ekstaris sur la malantaŭaj piedoj kaj komencis alterne grumbli kaj boji.

Bojanta, grumblanta katino tiel perpleksigis la hundon, ke post hezito ĝi metis la voston inter la krurojn, jelpis, kaj forkuris.

La katino turnis sin al la katidoj kaj diris, "Nun vi scias, kiel utile estas, scipovi duan lingvon!"

25. FABELO DE LA VASKOJ

La vaskoj estas minoritata popolo, loĝanta ambaŭflanke de la okcidentaj Pireneoj, do parte en nordorienta Hispanujo, parte en sudokcidenta Francujo. Etnologoj kredas ilin la plej malnova popolo, kiu ankoraŭ vivas en Eŭropo.

La vaska lingvo, kiun la vaskoj mem nomas la *eŭskera*, estas unu el la plej antikvaj de Eŭropo; ĝi ne apartenas al la hindeŭropa lingva familio, kaj ĝis nun oni trovis nenium parencon lingvon. Inter miliono kaj du milionoj da vaskoj nun parolas ĝin. Ĝi estas, kiel Esperanto, aglutina lingvo, sed havas tre malfacilan kaj komplikan verbo-sistemon, kaj ok dialektojn, kiuj sufiĉe grave malsimilas en elparolado, gramatiko kaj eĉ vortaroj. La vaskoj havas pitoreskajn naciajn kostumojn.

Dum la pionira epoko de Esperanto en Hispanujo, vaskaj esperantistoj faris valoran laboron, kaj ekzistis Vaska Esperanto-Federacio, kredeble inter ĉ. 1910–1926; vaskaj Esperanto-grupoj ekzistadis pli longe, sed nuntempe la vaskaj esperantistoj aniĝas al la Hispana Esperanto-Federacio.

La vaskoj estas, kiel aliaj hispanoj, plejparte katolikoj, kaj iliaj fabeloj spegulas ilian religion, ofte en iom primitiva formo, aŭ kun superstiĉaj aldonoj de popolo, kies vivo estas malfacila kaj kies montara regiono estas impona kaj danĝera. La monto de la fabelo suba estas en la vaska *Akelarre*, kio signifas “paŝtejo de la kapro”; kaj laŭ longedaŭra tradicio oni asocias kaprojn kun Satano.

Izaro kaj Lanjoo sur la Monto Akelaro

Izaro kaj Lanjoo estis knaboj. Lanjoo estis naŭjara; li estis alta, forta, kun nigraj haroj kaj okuloj; lia mieno estis jam virece fiero! Izaro estis sepjara; liaj haroj estis blondaj, liaj okuloj bluaj; kaj liaj lipoj estis ruĝaj kiel granatoj; lia voĉo estis rave dolĉa. La du belaj, bravaj knaboj estis orfoj, preskaŭ senhavaj.

Ili vivtenis sin per kantado. Ili vagadis sur la montaro, kaj en diversaj vilaĝoj kantadis tiel ĉarme, ke ili ĉiam gajnis almenaŭ pajlan liton kaj simplan manĝon. Ili trovis la vivon tolerebla — ĝis ili disiĝis.

Tiel okazis. Ili piediris trans la montaro, vizitonte Aranazon; sed venis nebulo kaj neĝo. Eta Izaro tre laciĝis, sed ne kuraĝis peti la helpon de sia frato; li timis riproĉon pri malkuraĝo; kaj granda Lanjoo sekrete kompatis lin, sed ne volis eble ofendi lin, proponante ne-petitan helpon. Eĉ tiuj persistemaj knaboj devis halti, kiam ventego preskaŭ kovris ilin per abunda neĝo malseka kaj peza. Pro la malvarmo kaj malfacileco, Lanjoo iĝis malbonhumora. Amema eta Izaro volis ŝirmi lin sub sia larĝa mantelo kun granda kapuĉo.

“Ne, ne! Mi estas vera viro; la malvarmo ne timigas min!”

“Sed, Lanjoo, nur iom pli protekti vin...”

“Ne, ne!”

“Sed vere, vi estus pli varma...”

Izaro tiel persistis, ke Lanjoo perdis paciencon, kaj tiel malafable puŝis Izaron, ke la frato falis en la neĝon. Lanjoo daŭrigis la vojon per grandaj paŝoj.

Ne estis la intenco de Lanjoo, forlasi sian frateton; sed pro la momenta kolero, li foriris tiel rapide, ke dum Izaro restarigis sin, Lanjoo malaperis el lia vid-distanco en la neĝo kaj nebulo.

Izaro iom sekvis liajn spurojn, sed la neĝo rapide kovris ilin; li vokis, vane; kaj baldaŭ li konstatis, ke li estas perdita kaj sola. Feliĉe, la luno leviĝis, kvankam apenaŭ videbla; kaj per la pala transnebula lumeto, Izaro trovis malnovan arbon kun granda kavo. Li decidis ŝirmi sin en la arbo tie sur la monto Akelaro, ĝis mateno.

Li eniris la arbokavon, laŭeble iĝis sin komforta en sia mantelo, ripetis siajn noktajn preĝojn kaj ekdormis.

Noktomeze, bruego vekis lin. Li ŝovis sian kapon el la arbo, kaj rigardis. El kvar direktoj venis sorĉistinoj, harstarige malbelegaj maljunulinoj, kun siblaj bruoj sur la vento, kaj ekzaltaj krioj. Unu rajdis sur la skeleto de mamuto, alia sur giganta strigo, aliaj sur flugilhavaj serpentoj... Ankaŭ multaj rajdis sur balailoj. Alveninte sur la monto Akelaro, ĉiuj sorĉistinoj aranĝis sin en vasta ringo, kaj ekdancis. La ronda danco iĝis pli kaj pli rapida kaj sovaĝa, la krioj pli kaj pli laŭtaj. Izaro svenis.

Kiam li rekonsciiĝis, feliĉe li estis ankoraŭ en la arbo. Hezite li elrigardis. Regis plena silento, kaj senluna mallumo; nur per lumo de kelkaj odoraĉaj torĉoj li povis vidi. La sorĉistinoj sidis en vicoj, ĉirkaŭ monstra virkapro sur ebura trono!

Nur dum momenteto, io luma kaj blanka brilis en la arbo.

“Izaro! Mi estas via gardaĝelo. Vi estas protektata. Ne timu.”
Ĝi malaperis.

Vice, ĉiuj sorĉistinoj salutis la virkapron, kisante ĝian hufon, kaj respekte rakontis ian faron abomenan. Ili velkigis ĝardenojn, senlaktigis bovinojn, mortigis homojn, vundis bebojn, faris sakrilegiojn, elfosis kadavrojn el tomboj por ŝteli karnopecojn; Izaro tremis, kaj flustris preĝojn.

Jen unu el la sorĉistinoj kisis la hufon kaj ekrakontis fiere:

“Mi atakis unu el viaj malamikoj, ĝuste tie, kie li estas plej molaĉa, Kaproreĝa Moŝto. Tiu Duko de Feraro, tiel pia, tiel preĝopreta, aĉ! tiel bonfarema, bas!”

“Do, kaj kion vi faris, filino?”

“Tiu Duko havas junan, belan filineton. Sed li ne havos ŝin longe, haha! Mi sorĉis pufan, verukoriĉan bufon, kaj kaŝis ĝin sub rompita statuo, en forgesita angulo de la ĝardeno. Pro tiu bufo, mistera malsano trafis tiun filinon. Haha, lia amata floro velkas! La kuracistoj ne helpas. Ŝi jam paliĝas, maldikiĝas: kaj post kiel eble plej longa suferado ŝi nepre mortos, malbela pro marasmo. Haha-ho! Kaj tiam, kiam la gepatroj funebros, venos via okazo. Ili preĝadis vane, haha! ili senhelpe vidis la idinon velkadi dum monatoj; Via Moŝto tiam povos flustradi al ili, esti konstante ĉe iliaj oreloj; ĉu vi ne povos peli ilin ambaŭ al senespero kaj eĉ al sinmortigo?”

“Brave, brile, brule, filino mia!” Tre laŭdinda plano. Hodiaŭ la premio estos via!”

Tondris. La virkapro malaperis. La sorĉistinoj malaperis sible.

Dum Izaro ankoraŭ tremis, lia gardaĝelo momente reaparis.

“Mi faris mian devon; vi faru nun la vian!”

Iel Izaro iris al Italujo. Li piediradis multajn kilometrojn; li foje ricevis helpon de iu afabla vojaĝanto, kiu sidigis lin sur ĉevalo; unufoje sinjorino portis la belan, ĝentilan knabon en sia kaleŝo, longan distancon; kaj finfine li atingis Feraron. Sed kiel malriĉa orfo prezentu sin al la duko?

Izaro trovis la ĉefpreĝejon, kaj atendis. Kiam la dukino eliris post la meso, Izaro kliniĝis antaŭ ŝi.

Ŝi kredis, ke li petis almozon, kaj donis al li monerojn.

“Bona knabeto, jen por vi; kaj mi petas vin, preĝu por mia filineto, kiu estas malsana.”

“Sinjorino Dukino, mi venas por sanigi vian filinon.”

Eta Izaro parolis tiel memfide kaj samtempe tiel digne kaj ĝentile, ke la dukino aŭskultis lin serioze. Ŝi kondukis lin al la palaco, kaj en la ĉambron, kie la duko sidis apud la lito de la kara filineto, nur okjara, kaj mortanta. La dukino komencis paroli pri la stranga renkontiĝo. Izaro, tuj sentanta grandan simpatian al la preskaŭ samaĝa, sed delikata kaj perle pala knabino, kortuŝite kriis, “Ho, jen la amata floro, kiu devas velki!”

La knabino tuj ridetis, post pluraj senridetaj semajnoj. La dukino petegis Izaron, savi la filinon; la duko tuj promesis, ke se li savos ŝin, li estos ŝia adoptita frato.

“Ĉu vi permesas, ke mi serĉu ion en la palaca ĝardeno?”, Izaro demandis.

“Certe. Iru tra tiu koridoro, poste turnu vin dekstren en la promenejon, kaj eliru tra la malgranda pordo. De tie vi povos aliri la tutan ĝardenon.”

Izaro kliniĝis, ridetis al la knabino, kiu reridetis, kaj tuj eliris.

Li ne multe atentis la roz-arbustojn, la elegantajn bedojn, la fontanojn; li serĉis la plej neglektitan parton de la ĝardeno; kaj baldaŭ, en malhela angulo, inter herbaĉoj, dornaĵoj kaj rubaĵoj, li trovis rompitan statuon. Eta Izaro devis pene puŝi la statuon por ekmovi ĝin; sed finfine li forrulis ĝin.

Granda, pufa bufo fiksrigardis lin, per sulfure flavaj okuloj, el kiuj flagris senfina malico.

Izaro ne hezitis; li saltis sur la bufon, kaj neniigis ĝin.

Jam kiam li reatingis ŝian ĉambron, la knabineto, sana, ridanta, kaj tre malsata, staris inter la ĝojplenaj gepatroj.

La duko adoptis Izaron kiel filon; kaj Izaro neniam hontigis la nobelan kaj noblan familion. Poetoj verkis episojn kaj kantojn pri liaj kuraĝaj agoj. Kaj post kelkaj monatoj, kelkaj kantoj, flugante de buŝo al buŝo, iris de Italujo al Hispanujo, kaj eĉ al la oreloj de vaskaj bardoj apud la monto Akelaro.

Ni reiru al Lanjoo.

Lia kolero ne longe daŭris; tuj kiam li konstatis, ke Izaro ne sekvas lin, li haltis, atendis, vokis, serĉadis; sed vane.

Dum kvin monatoj, li serĉis Izaron, aŭ lian kadavron. Konscienciproĉoj paligis kaj maldikigis lin. Li restis abisme malgaja, ĝis en iu vilaĝo li renkontis vaskan bardon, kiu kantis pri brava Izaro, kiu iĝis dukido en Feraro. Tiam li pligajiĝis. Li ankaŭ penadis, iĝi pli pacienca kaj ĉiam regi siajn kolerojn.

Kvankam li tre deziris iri al Italujo kaj revidi Izaron, li ne tuj ekiris.

“Ne estus dece,” li diris. “Vera viro ne farus tion. Mi kruele forlasis lin en la neĝo, etan, senhavan, orfan fraton. Ĉu mi tuj serĉu lin nun, kiam li estas riĉa, bonstata dukido en palaco? Ne; unue mi montru min inda de li; ankaŭ mi faros ion noblan kaj grandaniman; nur poste mi trovos lin kaj petos lian pardonon. Certe li pardonos min, ĉar li ĉiam estis bonkora.”

Tial Lanjoo reiris sur la timigan monton Akelaron, de kie foje levigas misteraj nigraj fumokolonoj; trovis la kavan arbon; kaj sin kaŝis antaŭ la nokto. Eble ankaŭ li kaŝ-aŭdos valoran sekreton.

El sia kaŝejo li baldaŭ vidis la alvenon de la sorĉistinoj kaj la abomenan dancon. Tondregis. Mallumegis; eklumis denove. Lanjoo vidis Satanon, ĉi-foje kiel monstran giganton, sur la ebura trono. Nigra fumo venis el lia buŝo; liaj oreloj pendis ĝis la ŝultroj; liaj dentoj estis longaj, pintaj, flavaj; liaj fingroj finiĝis kiel longaj, kurbaj ungoj. Per terura voĉo li vokis unu el la sorĉistinoj.

“Fuŝulino! la bufo mortis, la dukidino vivas! Vi estas senutila al mi sur la tero; do atendu min en la infero!” Satano stampfis. La tero fendigis kaj la sorĉistino malaperis en la fumantan faŭkon. Iu sorĉistino vidis movon en la arbo, kaj fingromontris. Pluraj el la aĉaj maljunulinoj kuris al la arbo, eltiris Lanjoon, kaj trenis lin antaŭ Satanon.

Lanjoo ne montris sian timegon, sed devigis sin rigardi Satanon moke kaj defie.

“Ha, knabo! Do, ŝajnas, ke vi ne timas min?”

Lanjoo ŝultrotiris.

“Kion vi faris, en tiu arbo?”

“Mi defiis vin.”

“Ĉu vi kredas, ke iu ajn senpune defias min?”

“Jes. Mia frato tion faris, tre sukcese.”

“Ha! Do, vi estas la frato de tiu fiaskigulo, kiu savis la vivon de tiu itala dukidino?”

Lanjoo silentis. Sorĉistino puŝis lin kaj kriaĉis, “Respondu al Lia Moŝto tuj, malbenito!”

Lanjoo tiris ŝiajn harojn, ĵetis ŝin teren, tenis ŝin tie per piedo sur la gorĝo, krucigis la brakojn kaj fiksrigardis Satanon.

“Nu, vaska knabo, vi meritas mian intereson.”

“Vi meritas nur mian malestimon.”

“Vi defias min, nur ĉar vi ne konas min. Ĉu vi kuraĝas alproksimiĝi, kaj premi mian manon?”

Lanjoo alproksimiĝis kaj premis la manon de Satano. Li sentis la metalecajn ungopintojn; la varmego preskaŭ svenigis lin.

“Nu, ĉu brula?”

“Mi sentas nenian varmecon.”

“Strange!”

“Vi vidas, ke mi ne timas vin.”

Satano lasis lian manon. “Vere; sed tio ne pravas, ke vi min malestimas.”

“Se vi deziras pruvon — jen!”

Kaj Lanjoo kraĉis en la vizaĝon de Satano.

Furioza, Satano muĝegis kiel mil leonoj, kaptis la knabon per ambaŭ manoj, kaj ĵetegis lin en la aeron tiel forte, ke li falis kvin kilometrojn for de tiu loko.

Lanjoo mortis ĉe la piedo de alta krutegaĵo; sed lia animo estis tute purigita per pento, penado kaj tiu granda provo. Ĝi flugis tuj al Paradizo.

Pensigaj Vortoj

“Neniu povas plibonigi sin mem, kaj ne samtempe iom plibonigi aliajn.”

Charles Dickens, angla romanisto

“Ĉu estas eble, ke kiam azeno deziras riproĉi aŭ averti alian azenon, ĝi diras, ‘Ne kondu tu kiel homo?’”

E. V. Lucas, angla eseisto

Sur Pordo de Biblioteko:

**LA BIBLIOTEKO
RESTOS FERMITA
inter la 3-a kaj 10-a
de aŭgusto
por purigado kaj libertempo
de la bibliotekistoj.**

26. JUĜEJAJ KOMEDIOJ [1]

Neniu juĝejo, de la plej simpla vilaĝa tribunalo kiu prizorgas ŝtelon de kokino aŭ pugnobato inter ebruloj, ĝis la plej alta kortumo en regna ĉefurbo, estas loko, kie spektanto atendas precipe amuzon.

Tro ofte en la mond-historio, potenc-aviduloj aŭ fanatikaj ismanoj misuzis juron kaj juĝejojn por servi tre divers-specajn tirancojn. Sed eĉ tie, kie registoj sincere intencas, ke justico servu justecon, neeviteble temas pri neperfektaj homoj, kiuj penas decidi pri la neperfektaĵoj de aliaj neperfektaj homoj; do, kredeble ĉiu juĝejo sur la ter globo estas, plejparte, scenejo por tragedioj.

En juĝejoj sin prezentas la grandaj suferoj, kiujn krimuloj kaŭzas, kaj sin preparas la suferoj, kiuj trafos krimulojn; evidentigas la mizeraj fiaskoj de multaj iam promesoplenaj geedzaj rilatoj; la teruraĵoj de torditaj psikoj kaj malraciaj obsedoj; niaj avidaj pasioj, kompleksaj malĝojoj, febra venĝemo aŭ sepsa malico, intencaj mensogoj kaj naivaj konfuzoj. Ni vidas, kiel ofte ni homoj ne povas solvi eĉ malgravajn konfliktojn private per iom da diskutado kaj afableco, sed devas treni ilin antaŭ profesiajn juĝantojn, koste kaj humilige.

Tamen, juro kaj juĝejoj montras flankon pli esperigan pri ni neperfektaj homoj: ili rilatas almenaŭ al ia koncepto pri konstantaj reguloj, nekapricaj proceduroj, ekvilibra ordo, kolektiva prizorgado pri ĉies sekureco. Se ni ne havus juĝejojn, ni havus privatajn venĝojn, senlimajn konfliktojn sen reguloj aŭ arbitraciantoj, senbridajn misfarojn de fortuloj, senĉesajn timojn kaj necertecojn, mizeran haoson.

Grandaj krimoj, pezaj punoj, longaj konfliktoj, estas kredeble ĉiam tragikaj; kaj, kiel solenaj ceremonioj ofte atestas, la esperiga aspekto de justico estas io serioza; sed juĝejoj foje prezentas ankaŭ komediojn, kiam temas pri krimoj ne tre gravaj, kiuj ekzempligas la mirindan variecon de nia homa naturo.

Ni pensu, ekzemple, pri la strangaj ŝtelistoj. Ĉiutage homoj ŝtelas monon, juvelojn, aŭtomobilojn, biciklojn, radioaparatojn — objektojn ĝenerale deziratajn kaj facile vendeblajn; infanoj ŝtelas fruktojn, bombonojn, kukojn, ludilojn, siajn dezirindaĵojn. Pri tiaj ŝteloj ni indigniĝas, riproĉas, sed ne miras.

Sed en 1979 londonano staris en akuzitejo pro la jena akuzo: “ke li ŝtelis sud-afrikan lemuron el la best-ĝardeno, kaj havas en la hejmo ankaŭ du kontraŭleĝajn krotalojn.” En Koreujo en 1980, iu ŝtelis ducent serpentojn el butikoj, kredeble por revendi al tiuj, kiuj kredas, ke ili estas medicine utilaj por la seksa vivo. Tri irlandaj junuloj ŝtelis buldozon, kredeble nur kun la intenco iom ludi per ĝi; sed ili ekfunkciigis ĝin, ne sciis, kiel direkti ĝin, kaj lasis ĝin forkuri en lernejon, kie ĝi malkonstruis klasĉambbron. En Usono en 1980, kvar viroj ŝtelis straton: ili venis, kvazaŭ riparistoj, forprenis milojn da malnovaj rondaj pavimŝtonetoj kaj forportis ilin en ŝarĝ-veturiloj. Ankaŭ en Usono, tri viroj ŝtelis salvadoran aviadilon kaj flugis al Haitio. Kiel diris la administranto de la salvadora kompanio, “Oni ne ŝlosas aviadilon kiel aŭtomobilon.” Afgano ŝtelis 127 ĉevalojn. Li sciis kiel paroli ‘ĉevale’; li tiel lerte kaj ĉevalece henis, ke ĉevaloj sekvis lin, kaj tiamaniere li kolektis valoran ĉevalaron.

Anglo iam aperis antaŭ juĝisto, ĉar li ŝtelis 173 virinajn kalsonetojn — unuope. En Havajo, iu ŝtelisto deziris ŝnuregojn, do li ŝtelis ĉirkaŭ kvin kilometrojn; kaj, poste, dekoj da boatoj, ne plu ligitaj en la haveno, drivis sur la oceanon. Oni ofte ŝtelas valorajn peltajn mantelojn, sed malofte faras tiel, kiel faris urugvaja turistino, kiu cedis al tento ŝteli peltan mantelon el londona magazeno kaj, kiam oni haltigis ŝin... manĝis la prez-etikedon. Alian rimedon por akiri mantelon provis anglo: oni akuzis lin pri ŝtelo, sed fine de la proceso deklaris lin senkulpa. Survoje el la kortumo, li... ŝtelis la mantelon de ĵuriano, kaj oni tuj rearestis lin.

Oni ankaŭ facile arestis tiun tajlandanon, kiu ŝtelis grandan sakon da rizo, ne rimarkante, ke en la sako estas eta truo. La policano, kiu simple sekvis rizlinion de la grenejo al la ŝtelisto, ne bezonis supernormalan intelekton. Okazis stranga proceso sur pacifika insulo, Tongo. Tongano ŝtelis la plej valoran robon de najbaro, ne por paradi sur la plaĝo, sed por fiŝkapti: li klarigis, ke la brilaj koloroj allogas multajn fiŝojn. La tribunalo gvidis ŝteliston kaj viktimon

al interkonsento: Kiva estontece rajtos prunti la robon, kiam li iros fiŝkapti, sed la najbaro ricevos trionon de la kaptitaj fiŝoj.

Eĉ pli strangan ŝteladon oni raportis en Anglujo en 1979. Granda hundo, alie bonkondata, kostis al la geedzoj, kiuj posedis ĝin, multajn kompenso-pagojn. Tiu hundo persiste ŝteladis spegulojn de la flankoj de aŭtomobiloj. Ĝi deŝiris ilin, dismaĉis ilin kaj forĵetis ilin. Dufoje ĝi malprudente ŝtelis la spegulojn de policaĵ aŭtomobiloj. Iu konjektis, ke eble ĝi vidis sian propran vizaĝon en la speguloj, kaj atakis rivalan hundon mistere kaŝitan tie.

Kristanaj teologoj parolas pri «origina peko», sed kelkaj krimuloj elpensis pekojn ankaŭ *originalajn*.

Oni monpunis germanon, ĉar li plurfoje verŝis nigran inkon en naĝejojn de privataj domoj. Li konfesis, ke tion li faris pro envio. Alia tribunalo monpunis sud-afrikan bienulon, kiu dum tri semajnoj nutris sian filinon nur per akvo kaj tero. Li pledis, ke li punis la knabinon pro tro avida manĝado! Etiopo estis arestita, ĉar li persiste staradis ekster la pordoj de preĝejoj, kaj antaŭ geedziĝaj ceremonioj disdonis broŝuretojn, kiuj konsilis, "Ne geedziĝu." Iam tro sentema sud-afrika patro frakasis dudek du fenestrojn de lernejo, leginte la trimestran raporton pri sia filo! Portugalgo en Lisbono ŝtelis kaj detruis la biciklojn de tridek homoj, kiuj neniel mistraktis lin, ĉar alia biciklisto akcidente vundis lin. Oni vokis ĉilian junulon antaŭ tribunalon, ĉar li dresis sian hundon, forŝiri la juojn de belulinoj surstrate. Kontraste, gardisto de granda oficejaro en Kanado muntis en lifto kaŝitan aparaton, kiu ofte diris per virina voĉo, "Fi, ne tuŝu min!" Sed la bulgaro, kiun oni arestis pro ofendo kontraŭ publikaj moroj, ne intencis miskonduki. Li amis siajn ses serpentojn, kaj ofte kunportis ilin, kiam li vojaĝis. Estis malbonŝanco, ke serpento, kiun li uzis por zoni sian pantalonon, subite forglitis en aŭtobuso, kun faliga rezulto... almenaŭ laŭ raporto.

En Brazilo, en 1967, tribunalo monpunis sinjoron, kiu kaŝis laŭtparolilon sub la planko de la bopatrino dormoĉambro, kaj interrompis ŝian dormon per surbendigitaj hundaj hurloj. Japana teatroposedanto malkvietiĝis, kiam iu starigis alian teatron tro proksime. Por forpersvadi la spektantojn de la rivalaj prezentadoj, li enŝteliĝis en la teatron kaj kaŝis, sub foteloj, interne de lampoj, super pordoj, kaj aliloke, pecojn de malfreŝaj fiŝoj. Oni monpunis lin pro 'malhonesto komerco'.

Aĉa ago; sed multaj el ni — same kiel la juĝisto, kiu ne punis lin — iom simpatios kun aŭstra terkultivisto. Tiel turmentis lin piknikantoj, kiuj venis el Vieno kaj lasis post-piknikajn fatrasojn sur lia bone prizorgata bieno, ke li komencis sekvi iliajn aŭtomobilojn, trovi la hejmojn, kaj nokte 'redoni' la fatrasojn sur iliajn gazonojn. Li konfesis 48 tiajn redonojn.

Oni faris tre strangan akuzon kontraŭ angla konstruisto, kvankam la tribunalo, post eksterordinara proceso, deklaris lin ne kulpa. La akuzo estis, ke, post kverelo kun iama amatino, li aĉetis dudek ratojn de amiko, kiu laboris en kloaka sistemo; metis la ratojn en la domon de la sinjorino dum ŝi vojaĝis; kaj samtempe ŝtelis ŝian katon, por ke la ratoj sen malhelpo multobliĝu, kaj kiel eble plej multe difektu la hejmon. La ratoj kaj la difektado estis objektive realaj, sed kio vere okazis, restis dube.

Oni alvokis svedon al militservo. En Svedujo, kiel en multaj landoj, estas aranĝoj por sincera konscienca militrifuzado, sed oni devas prezenti laŭeblajn pruvojn, ke vere temas pri konscienco. La juna svedo vizitis preĝejon, kaj petis de la paroĥestro atestilon, ke temas pri konscienco. Sed la pastro, kiu ne konis lin bone, rifuzis. Tiam la 'pacifisto' foriris, kaj post kelkaj minutoj revenis, furioza, kun ĉaspafilo kaj abunda municio; li komencis pafi, kaj la pastro devis kaŝi sin en la horloĝa turo ĝis alvenis policianoj. La pafinto devis militservi, post mallibereja periodo.

En ĉiuj landoj, oni devas ne malhelpi policianojn aŭ juĝistojn. Ĉirkaŭ 1860, anglino devis pagi monpunon, ĉar kiam policano volis aresti ŝian edzon pro tiutempe kontraŭleĝa "ŝnursaltado en publika parko", ŝi "malhelpis la policon, tirante la lipharojn de policano." Juĝistoj ignoris, kredeble pro konvinko, ke li estas mense malsana, la konduton de anglo, kiun ili eksedzigis pro bruta mistraktado de la edzino. Antaŭ ol pedeloj povis subigi lin, tiu koleremulo prenis el la poŝo sakon da nekuirita viando, kaj ĵetis ĝin al la juĝistoj, kriante, "Jen novaj cerboj por vi!" Sed kredeble unu el la plej strangaj provoj malhelpi justicon okazis, ankaŭ en Anglujo, dum eksterordinara proceso en 1979, kiu temis pri okultaj eksperimentoj, sorĉado kaj nigra magio. La ĉefrolanto "neis, ke li provis timigi policianojn, minacante, ke li transformos ilin en ranojn."



Novaj Proverboj

Ĉiu el miloj estas “nur mi”, sed miloj povas urbon sturmi.
Tro longa monologo estas dormiga drogo.
Kiom ajn vi frapos spongon, tiel vi ne sonigos gongon.
Pro ekstrema neceso, neo ofte iĝas jeso.

Versaro — pri ‘um’-vortoj

-*UM* estas vortopec’ sufiksa,
utila, sed sen senco fiksa.
Do (ne necesas nin konsterni!)
Vortojn kun -um ni devas lerni.
Kolumo estas vesto kola;
brakumon mi ne provas sola;
laktumo estas fiŝa semo;
kortumo parto de l’ sistemo
justica; se ni tre *cerbumos*,
eble kompreno fine lumos.
Plandum’ kaj *kalkanumo*, du,
ambaŭ situas sur la ŝu’.
En ĉambro ne *aerumita*,
spritulo trovas sin malsprita.
Ventumas ni, se estas varme —
eble per *ventumilo* — ĉarme!
Vera saĝulo ne *saĝumas*;
frandaĵojn ni kun ĝoj’ *gustumas*;
nazumo dum surnaza sido
helpas okulojn pri la vido.
Buŝumo hundan buŝon tenas,
sed kvin *sentumoj* hundon benas.
(La flaro plej por hundo gravas,
sed vido por la hom’ pli ravas.)
Postumo estas sur pafilo;
ni *palpebrumas* pro sunbrilo,
sed *okulumas* pli intence
(kaj, foje, kontraŭ-konscience!)...
Eble pro vintra *malvarmumo*

en gorg' doloras la *brulumo*.
Sur *mondumanoj* dum la baloj
manumoj, ruŝoj kaj falbaloj
el punto montras sin orname.
Kolomboj *kolombumas* ame.
Se iu en la dom' *mastrumas*,
objektojn ofte ŝi *sapumas*;
lotumas ŝi la kuko-kvantojn,
eble *akvumas* ĉambrajn plantojn,
aŭ ŝirmas de filet' torakon,
butonumante lian jakon.
Jen bela am'; sed ve! malbelo
de homa venĝo kaj kruelo;
venĝemon ofte ni *plenumis*,
radumis kaj *ŝtonumis* kaj
pendumis — kaj *dekumis*. Aj!
Ni ne *nigrumas* dum la paco,
sed nur pro nokta bomb-minaco.
La *spikumanto* spikojn ĉasas,
kiun la rikoltist' postlasas.
Nu, *proksimuma* estas io
se mankas pli preciza scio.
("Tun', *proksimume*, de la humo
jam forportiĝis en *ĉarumo*."
La *faldumad'* orname rolas —
sed diru "plisi" se vi volas.
Kaj *komunumo* estas grupo,
ĉu urbanar', aktora trupo,
preĝeja greg', aŭ io ajn,
ligita pro komuna gajn'.
Se ies menson io lezas
kaj tiu vere ekfrenezas,
estas terure, tre malĝoje;
sed ĉiu *frenezumas* foje!
Ĉu restas nun el nia kohorto
utila kaj necesa vorto?
Se *pasumadis* vi sublune,
pri *amindum'* vi scias, ĉu ne?

Alarmo pro Troa Varmo

Nuntempe, multaj institucioj kaj firmoj uzas magnetofonojn tiel aranĝitajn, ke, kiam neniu deĵoras, iu, kiu telefonas, almenaŭ ricevas ian informon, kaj eble inviton dikti mesaĝon. Oni rakontas, ke iam bonkora maljunulo, kiu ne al kutimiĝis al tiaj aparatoj, vespere telefonis firmon kaj ekfunkciigis magnetofonon. Malrapide, tre klare, la bendo diris:

“Saluton! Ĉi tio estas surbenda mesaĝo. Oni deĵoros denove morgaŭ je la naŭa. Se vi deziras dikti mesaĝon, bonvolu unue dikti tre klare viajn nomon kaj adreson, kaj poste koncize difinu vian problemon. Dankon.”

La bonkorulo do diktis tre klare kaj precize:

“Dankon. Mi estas Johano Bruno. Mi loĝas ĉe Platano-Strato 22. Mi telefonas por informi vin, ke via fabriko brulas.”

Pensigaj Vortoj

“Vivi sian vivon ne estas tiel simple, kiel transiri kampon.”

Rusa proverbo

Menspreteco

En Anglujo, ĉirkaŭ 1970, ŝarĝveturilo, pro fuŝo dum retroirado, tiel forte frapis gas-lampo-stangon, ke la gastubo rompiĝis kaj gaso sible ekŝprucis. Granda estis la danĝero de eksplodo kaj incendio. Iu ĉeestanto eble savis multajn vivojn, kiam li saltis al la apuda legomvendejo, kaj puŝis kukumon en la tubon, kiun ĝi sufiĉe bone ŝtopis, ĝis alvenis riparistoj.

En Usono, en 1958, krotalo mordis knabeton. La patro tuj mortigis la serpenton, torde ligis la serpenton mem ĉirkaŭ la vunditan kruron, por malhelpi la sangcirkuladon, kaj tiel atingis kuraciston sufiĉe frue, por savi la vivon de la infano.

Samjare, maskita rabisto ricevis merititan surprizon, ie en Germanujo. Li eniris bakejon, kie deĵoris nur malforta junulino. Unue, ŝi kriegis; sed tuj poste, ŝi prenis sakon da faruno, kaj ĵetis la farunon en lian vizaĝon. Dum li restis portempe blinda, ŝi tiris la

sakon sur lian kapon, samtempe regaligis lin per genua frapigo en la ventron, kaj tordis la sakon strikte ĉirkaŭ lian kolon. Tiumomente alkuris la administranto kaj policanoj sekvis.

27. FABELO EL SAMOO

Samoo, ekde 1962 sendependa ŝtato, kiu en 1970 aniĝis al la Brita Komunumo, estas insularo sur la suda Pacifiko; ĝi konsistas el naŭ insuloj. La plej granda, Savaii, havas danĝeran vulkanon; sur la dua, Upolu, loĝas tri kvaronoj de la popolo; restas du loĝataj insuloj, Manono kaj Apolima, kaj kvin neloĝataj insuletoj. La tuta insularo kovras nur 2842 kvadratajn kilometrojn. La samoanoj parolas la samoan lingvon kaj ofte la anglan. Ili havas parlamenton, kun 45 samoanoj kaj 2 ne-samoanoj.

La insuloj estas belaj; la klimato ĉiam varma sed ne turmente varmega, kun multa pluvo; uraganoj estas danĝeraj sed ne oftaj. Korala rifo, kun laguno, ornamas ĉiun insulon, ringe. La arboj, kiuj beligas la landon, ankaŭ donas nutraĵojn kaj materialojn. La indiĝenaj mamuloj estas vespertoj, sed nuntempe troviĝas ankaŭ sovaĝaj bovoj, ratoj, kaj, tre utile, porkoj; fiŝoj kaj aliaj marbestoj abundas; la serpentoj estas nedanĝeraj, kvankam evitendaj estas kelkaj skorpioj, skolopendroj kaj malagrablaj insektoj.

La samoanoj, plejparte, ankoraŭ vivas en tribaj vilaĝoj, kun vivostilo primitive kolektiva kaj fortaj, kompleksaj familiaj interligoj. Privateco iom mankas: la tipa domo estas granda ovala konstruaĵo, konsistanta el tegmento tegita per kokosarbaj folioj, sur pluraj fortaj lignaj kolonoj, do tute aperta. La muroj estas nur matoj, el folioj teksitaj, fiksitaj al la tegmento-rando, tiel ke oni povas disvolvi ilin kiel kurtenojn kiam oni deziras ĉambron pli ŝirmitan.

Dum jarcentoj, la samoanoj ne konis metalon; en ilia senmetala kulturo ili evoluigis mirinde lertajn, ofte kompleksajn, manlaborajn teknikojn pri ligno, ŝtono, ostoj, plantaj fibroj kaj konkoj. Ili estas ankaŭ kuraĝaj, lertegaj maristoj kaj fiŝkaptistoj. Ili kultivas kokosojn, kakaon, bananojn, pan-arbojn kaj la nutraĵ-radikon taro, specon de kolokasio; nuntempe ili eksportas kakaon, bananojn kaj kopron. Ili nun havas kelkajn malgrandskalajn industriojn, inter ili turismon.

La samoa lingvo havas riĉegan vortaron mult-nuancan pri steloj, marofluoj kaj direktoj. (Ni komparu la eskimojn, kies lingvo havas multajn vortojn pri neĝaj fenomenoj.) Ĝi kutime ne uzas du sinsekvajn konsonantojn, sed ofte sinsekvajn vokalojn; ekzemple, la samoa “ĝis-revido”, “dormu! longan vivon!” estas *tofa! soifua!*” (En la fabelo, la versoj iom imitas tiun trajton en Esperanto.)

Ne estas mirinde, ke multaj homoj el landoj tielnomite civilizaj sopiris al Samoo kaj aliaj pacifikaj insuloj, kie virinoj ofte belegaj piediras inter koralo, konkoj kaj kokosarboj; kie en domoj el ligno kaj folioj la lampoj estas torĉoj el la ‘kandel-nuksoj’ de la aleŭrito; kie la simpla vivostilo kaj relativa psika saneco estas laŭditaj de antropologoj. Tamen, ĉiuj homoj havas siajn problemojn; ankaŭ la historio de Samoo havis sian porcion de perforto kaj krueleco.

Skota verkisto, R.L. Stevenson, ekloĝis en Samoo, pro malsano, kaj tie pasigis siajn lastajn jarojn, 1889-94. Samoo inspiris kelkajn malfruajn verkojn liajn. En imperiisma epoko, Stevenson vere amikiĝis kun multaj samoanoj, lernis ilian lingvon, kaj pli bone ol multaj komprenis ilin, pro similecoj inter ilia triba sistemo, kaj la malnova skota klana sistemo! Li ne nur havis kvazaŭ propran klaneton de samoaj geservistoj, sed festis kun tribestroj, festigis ilin, kaj kuraĝe defendis ilin kontraŭ diversaj maljustaĵoj. Tiu-tempe Samoo estis regata (post traktato de 1889) de germanoj, britoj kaj usonanoj kune. Stevenson, konstante malsana, kaj tre okupita ne nur super verkoj, sed pri terkultivaj kaj dommastraj taskoj, tiel vigle batalis por la rajtoj de la samoanoj, ke iam la instancoj eĉ planis elpeli lin. Li penegis, por interpacigi ĉefojn, kaj kiam okazis grava intertriba milito, li prizorgis hospitalon, persone helpis flegi vunditojn, kaj nutris malliberigitajn samoanojn. La samoanoj konstruis vojon al lia domo, angle “la vojon de dankemo”, sed samoe “la vojon de amantaj koroj” kaj donis al li altrangajn samoajn titolojn. Estis samoanoj, kiuj ame portis sian skotan amikon al la tombo.

Ili tre ŝatis liajn rakontojn, kaj, ĉar lia nomo estis por ili neprononcebla, nomis lin *Tusitala*, “skribisto de rakontoj”. Sed laŭ letero lia, la samoanoj ne havis koncepton pri fikcio: por ili liaj rakontoj, aŭ novelo de Conan Doyle kiun li tradukis por ili, estis veraj interesaj historioj.

Multaj verkoj de Stevenson estas haveblaj en Esperanto: *Forkaptita, Trezorinsulo, Doktoro Jekyll kaj Sinjoro Hyde*, kaj multaj poemoj kaj mallongaj pecoj, el kiuj pluraj troviĝas en *Skota Antologio*.

Sed ni turnu nin al io pli naiva — ĉarma samao fabelo.

Kiel Porkoj Venis al Samoo

Post la tempo, kiam la teraj rokoj, kiuj disfalis de la ĉielaj rokoj, ricevis siajn plantojn el la ĉielo; kaj kiam la ĉielinfanoj, la suno kaj la luno, ekdeĵoris en la ĉielo; post la tempo, kiam la homoj aperis el la granda vermo, kaj la fajro kaj akvo aperis el la granda polpo, kaj venis la granda inundo, sed sufiĉaj homoj saviĝis sur la insularo, ni ankoraŭ ne havis porkojn sur Samoo.

Ne, en la frua tempo, ni havis nek porkojn, nek kokojn, nek anasojn; ni manĝis fiŝojn el la lagunoj kaj la maro, kaj kokosojn, kaj taron, kaj aliajn kreskaĵojn; sed viandon ni ne havis. Kelkfoje ni treege deziris vere pleniĝi nin per viando. Tiam ni vojaĝis en niaj boatoj, kaj militis; kaj poste ni manĝis niajn kaptitojn. Fiera estis tia festeno.

Iam venis malbona tempo; la samoanoj ne plu povis kapti fiŝojn. Iu monstro de la oceano venis proksime al la rifoj, kaj manĝis multajn fiŝojn; kaj ĉiuj aliaj fiŝoj tre timis, kaj fornaĝis al aliaj insularoj. La kokosoj kaj taro-radikoj kaj flavaj bananoj ne kontentigis la stomakojn, kaj la viroj kaj virinoj ofte sentis sin malfortaj kaj malsataj.

Tiutempe, en Samoo, estis unu tribestro tre potenca, tre timata. Kiam tiu malsatado turmentis la tribon, li sendis siajn kurierojn al diversaj familioj, kaj postulis infanojn, kiujn li manĝis. Ĉie aŭdiĝis ploroj, ĉie premeĝis kor-doloroj. La tribestro manĝis tiom da infanoj, ke la tribanoj komencis lamenti, “Ni finfine tute pereos kaj malplenigos la insulon; nia ĉefo formangas nin.”

Unu el la tribanoj estis viro, kies nomo estis Kalufahe-tuugau, “Feliĉulo”, kaj li kun sia edzino Faei-puaka havis ok infanojn. Tamen, kiam venis al ili kuriero, kun balenodonto, kaj peris la ordonon, “Donu infanon vian, por ke la tribestro manĝu ĝin,” ili sentis kruelan doloron, kaj ploregis amare. Sed tribestro estas obenda; alie ĉio malligiĝus. Faei-puaka speciale amegis la plej junan

infanon, filon, ĉar ŝi ne povos naski novajn idojn; kaj do la gepatroj decidis oferi ne tiun okan, sed la sepan infanon, ankaŭ knabon. Ili pretigis lin dece: oleis lian korpon, kombis kaj plektis liajn harojn, ligis longan bendon el blanka ŝtofo al lia brako; sed kiam li devis foriri kun la kuriero, multaj larmoj intermiksiĝis; kaj ili multfoje kisis la fileton; kaj dum ili rigardis lin forirantan, la patro kaj patrino senĉese ploris.

Finfine ili reiris en la domon, kaj longe sidadis kun klinitaj kapoj, silentaj, kun vundoj en la koroj. Post longa sidado, la patrino sentis ian malmolan, malgrandan objekton sub sia mano, kaj levis ĝin de la planko. Estis eta fajfilo; estis la fajfilo de la fileto oferita. Ŝi montris ĝin al la edzo, kaj ili ambaŭ ploris kaj kriis amare, kaj ĵetis sin vizaĝ-al-teren, kaj lamentis eĉ pli laŭte.

Ilia lamentado vekis la subtegmentan koboldon, kiu kutime dormis sub la tegmento, super la fajrokavaĵo, dum la tago, kaj nokte gardis la domon kontraŭ malbonaj spiritoj kaj ŝtelistoj. Antaŭ ol enlitiĝi, la patrino ĉiam metis manĝaĵojn por li sur la breton super la fajrokavaĵo. Neniu vidis lin; sed foje, ne dormante iam dum la nokto, unu el la geedzoj aŭ unu el la infanoj aŭdis lin kiam li maĉis sian manĝon kaj kontente ridadis. Foje, post la fino de la manĝo, la koboldo kantis:

“Belaj la bananoj, kaj bona estas taro;
Belaj venas fiŝoj el la sala maro;
Bela bona amo de viro tigo-haka;
Bela la kuro de Faei-puaka!”

Sed nun ne estis okazo por gajaj kantetoj. Vekite, la koboldo demandis, “Kio ĝenas vin? Kial vi ploras?”

Unue ili tre timis, ĉar li neniam rekte parolis al ili antaŭe.

Ilia silento senpaciencigis la koboldon, kiu frapetis en la subtegmentejo, kaj vokis: “Ĉu vi aŭdas, Feliĉulo? Ĉu vi aŭdas, Feliĉulino? Kial vi tiel amare ploras? Diru al mi; mi estas via amiko, kaj mi estas ruza.”

“Ve, ni ploras, ĉar ni perdis nian filon, nian sepan idon.”

“Kio okazis? Ĉu li falis el kokosarbo?”

“Ve, ve, la tribestro manĝis lin. Kaj baldaŭ li denove sendos kurierojn, kaj postulos aliajn infanojn. Ho, malfeliĉa patro!”

“Kaj mi, malfeliĉa patrino! Kial naski infanojn? Ni havis ok; restas nun sep; sed nia estro malsatos denove, kaj li malplenigos nian hejmon.”

La koboldo vere kompatis ilin.

“Vi estas la Feliĉulo,” li diris, “vi denove estos feliĉa. Ne ploru plu! Ne ploru plu, Feliĉulino! Mi savos viajn infanojn. Eĉ tuj, hodiaŭ nokte, okazos io vere stranga. Mi estas ruza, kaj mi estas via amiko.”

La viro komencis iom konsoliĝi, kaj diris al la edzino, “Ne ploru plu, mia kara; via animo ne plu ŝrumpu; tiu ruza koboldo helpos nin.” La edzino daŭre lamentadis. “Kion li povos fari? La tribestro manĝos ĉiujn niajn gefilojn!”

Tiam la koboldo faris strangajn bruojn en la tegmentejo, kaj ekparolis iom kolere:

“Ne parolu tiel! La manĝito ja estas morta, kaj lin mi ne povas savi; sed la sep aliaj infanoj vivos. Ili ne estas manĝotaj. Ĉu tion mi ne diris jam?”

La edzino ne ploris plu, sed ŝi ne vere esperis. Venis la nokto; kiel kutime, ili kunvokis la sep restantajn infanojn, kaj metis manĝon en la subtegmentejon por la koboldo, kaj kuŝiĝis inter siaj infanoj, kaj penis endormiĝi.

Finfine ĉiuj dormis.

Subite, noktomeze, Faei-puaka vekigiĝis. Grandaj doloroj tordis ŝin. Ŝi vekis Kalufahe-tuugau.

“Edzo mia! Leviĝu! Kuru, venigu la akuŝistino! Mi havas naskodolorojn!”

“Kvietiĝu, mia kara. Vi sonĝis!”

“Ne, iru, iru! Tuj!”

“Sed, mia kara, ne eblas. Vi estas multe, multe tro maljuna. Eble la multa plorado kaŭzis al vi ian doloron.”

“Kara edzo, mi naskis ok infanojn, kaj mi scias, pri kio mi parolas. Mi petegas, tuj venigu la akuŝistino!”

Kalufahe-tuugau leviĝis kaj eliris. Li ne volis ŝajni kruela, sed li ne iris tuj al la akuŝistino. Li hontis kaj sentis sin tre ĝenita, ĉar ŝi kaj ĉiuj vilaĝanoj ridos je li. Li iom paŝis tien-reen; ĝis la vortoj de la koboldo revenis en lian animon: “okazos io vere stranga”.

“Nu, estos ja io stranga, se mia maljuna edzino naskos... mi iros al la akuŝistino.”

Kiam li vekis la vilaĝan akuŝistinon, ŝi iom koleris, kaj mokis lin.

“Nur aŭskultu momenton...” li petis, kaj rakontis ĉion.

Tiam la akuŝistino diris, “Do, jes, mi venos, kaj helpos vian edzinon.”

Ili reiris al la domo. Kiam la akuŝistino vidis Faei-puakan sur la matoj, ŝi tuj diris, “Ha, vi ne ŝercis!” Ŝi komencis ordoni al la junulinoj, kion fari utilan, kaj al la junuloj kaj etaj geknaboj, ke ili foriru el la vojo. Kaj, malantaŭ ŝirmilo el matoj, dum Kalufahe-tuugau sidis ekstere kaj atendis, la akuŝistino helpis Faei-puakan. Subite ĉiuj aŭdis la koboldon kanti en la subtegmentejo:

“Faei-puaka veis en doloro;
ĉasis la doloron ĝojo en la koro;
palos la doloroj, ĉar venos ĝojoj veraj;
unu filo iris, sed vivos la ceteraj;
ho-a-o! Ha, kio venas nun al vi,
unu bela ido, unu, du, kaj tri,
venas nun alia, kaj alia ha-lo! la okopo!”

Malantaŭ la matoj aŭdiĝis tre stranga blekado — pepoj kaj krietoj — kaj la akuŝistino kriis, “Hu, mi ektimas! Ok el ili! Hu, kiaj vangoj! kiaj longaj rondaj nazoj! kiaj etaj okuloj! Kaj grandaj oreloj! Kaj ve, la manoj! Sen fingroj!”

La koboldo ridegis en la subtegmentejo.

“Ne timu, helpantino de la virinoj. Mi plenumis mian promeson. La infanoj ne estos manĝitaj. Feliĉulo! leviĝu; konstruu barilojn, kiuj entenos tiujn bestojn, kiujn vi ricevis. Ilia nomo estas ‘porko’. Ili rapide kreskos kaj grasiĝos, kaj vi povos sendi ilin, porkojn, ne infanojn, al la tribestro. Ili multobliĝos tre rapide. Ne estu avaraj, sed kiam vi havigos multajn porkojn, disdonu ilin. Kaj ne disdonu ilin nur al viaj tribanoj, kaj ne nur al la samoanoj. Se fremduloj venos el aliaj insuloj, donu ankaŭ al ili porkojn. Ili forportu ilin, kaj multobligu ilin sur la propraj insuloj, por ke la homoj ne pereu, manĝante unu la alian.”

Kalufahe-tuugau kaj Faei-puaka atentis la vortojn de la koboldo, kaj ĉio okazis laŭ la promeso: la porkoj kreskis, kaj tre grasiĝis, kaj multobligis. Kaj kiam la tribestro rostis kaj gustumis la

unuan porkon, li estis ĝoja, kaj forte aprobis, kaj ne plu postulis ies infanojn. Ĉiuj samoanoj ekĝojis. “Niaj infanoj ne plu estos rostitaj. Niaj stomakoj ne plu grumblos pro sopiro al viando.”

La feliĉa paro obeis ankaŭ la ordonon, malavare helpi fremdulojn, kaj donacis porkojn al vizitantoj el Tongo, kaj Fiĝioj, kaj Tokelaŭo, kaj Niuo, kaj aliaj insuloj. Kaj nun en multaj partoj de la mondo troviĝas porkoj, kaj multaj homoj ĝojas pro ili.

28. JUĜEJAJ KOMEDIOJ [2]

Kompreneble, homo, kiu staras en la akuzitejo, kaj ne povas nei, ke li aŭ ŝi faris la faron, ofte penas sin ekskuzi, prezentante iun akcepteblan motivon aŭ specialan cirkonstancon.

Kie ajn justico vere celas justecon, oni devas almenaŭ aŭskulti tiajn klarigojn, kaj ofte akcepti ilin. Se, ekzemple, kuracisto veturis multe tro rapide, sed ĉar li portis serumon al paciento, kiu sen ĝi mortos post horo, la motivo almenaŭ grandparte pardonigas la misfaron.

Tamen, parto de la komika flanko de la justico estas la eksterordinaraj ekskuzoj, kiujn kelkaj misfarintoj, sincere aŭ mensoge, foje proponas.

Ĉiliano, akuzita pri kruela batado de siaj lernantoj, per sia ŝuo, pledis, ke ili mokadis lian grandan nazon. Usonano, kiu mortbatis anseron per golfluda bastono, konfesis, ke kiam li sensukcese penadis forbati sian pilkon el malglata herbejo, la kvazaŭ komenta, ironia gakado de la ansero furiozigis lin. En 1967 turisto en Havajo devis pagi kompenson al hotelo, ĉar li disŝiris la ĉambrajn lit-tolojn; sed nur kompenson, ĉar la juĝisto kredis lian ekskuzon: li songis, ke li estas meze de fervoja katastrofo, kaj dum dormo disŝiris la tolaĵon por prepari bandaĝojn.

Sveda aktorino, kiu bankrotis, atribuis sian monomankon al la elspezado por nutri dudek tri nigrajn katojn, kiujn diversaj admirantoj donacis al ŝi kiel talismanojn. Alia kompatinda monperdinto estis hungaro, arestita ĉar li promenis tute nuda en Budapeŝto. Li pledis, ke lia komerco iris tiel malbone, ke li devis vendi ĉion, escepte de unu vesto ĉiuspeca, kaj tiun tagon la unika vestaro estas lavata. La skota turisto, kiun nederlandaj policianoj iom malfacile arestis, ĉar li ĵetis ferdekseĝojn en kanalon, estis eĉ bonintenca kaj amis belan Amsterdamon; kiam li malebriiĝis, li klarigis, ke li vidis la faman "monstron de la (skota) lago Ness" en la kanalo, kaj volis protekti la urbon kontraŭ ĝia invado! Oni lasis lin iri libera.

Tragika, kiel estas ĉiu grava psika malsano, sed samtempe komika, estis la ekskuzo de brito, kiun oni arestis, ĉar en stacidomo li difektis diversajn meblojn kaj aparatojn; li pledis, insiste, "Sed la trajnoj konstante ĉasis min!" Kaj certe ne mensogis tiu franca terkultivisto, kiun oni monpunis, ĉar liaj anasoj kaptis trutojn en apuda rivero dum sezono, kiam neniu rajtas kapti trutojn; li pledis, ke la anasoj ne konas la regulojn.

Malpli konvinka estis la ekskuzo de sud-afrikano; en marto, 1979, sinjorino vekigis je la unua matene, kaj vidis lin staranta apud ŝia lito. Ŝi kriegis, li forkuris, kaj estis arestita. Li asertis, ke li serĉis sian forflugintan kolombon. (Eĉ ne plumo estis trovita en la dormoĉambro.) Sed oni deklaris senkulpa norveginon, kiu subite senvestis sin en aŭtobuso. Abelo eniris ŝiajn subvestojn.

Ŝajnas tre eble, ke, post militoj, maltoleremaj registaroj, gravaj malsanoj kaj vivokripliga malriĉeco, la plej ofta kaŭzo de homa malfeliĉo estas ĝuste tio, kio ankaŭ donas al ni niajn plej dankindajn ĝojojn: amo. Estus maldece, simple amuziĝi pri la malbelaj finoj de multaj geedzaj rilatoj, kaj aliaj seniluziigoj, amariĝoj, humiliĝoj kaj tordiĝoj de gea amo; realaj kaj intensaj estas la suferoj. Tamen, foje oni devas ekridi por ne konstante ploradi; kaj en juĝejoj ofte sin montras komike bizaraj simptomoj de la diversaj malsanoj, kiuj povas aflikti niajn korojn.

Pola juĝisto, en 1979, monpunis edzon kiu devigis sian edzinon manĝi la kravaton, tro laŭtkoloran, kiun ŝi por li aĉetis; la juĝisto ankaŭ tre saĝe ordonis, ke estontece la edzo aĉetu siajn proprajn vestojn. Israelaj policanoj, aŭdante ĝemojn kaj batojn el kelo, serĉis, kaj trovis virinon en granda kofro; la edzo tiel punis ŝin, ĉar ŝi bruligis lian tagmanĝan bifstekon. En Maŭricio, edzino vokis edzon antaŭ juĝiston, ĉar li insistis ke ŝi, jungite, tiru lian plugilon. Li kredis, ke la animo de lia patrino, mortinta antaŭ tri jaroj, eniris la bovon, kaj do ne estus dece, jungi ĝin. La juĝisto opiniis, kiel espereble ĉiuj legantoj, ke estas ankaŭ ne dece, jungi edzinon; li subtenis la konscienc-liberon de la edzo kaj ne ordonis, ke li jungu la bovon, sed malpermesis, ke li anstataŭigu ĝin per la edzino.

Greka juĝisto tre bone, kvazaŭ universale, resumis la ironion de ĵaluzo, kiam li kondamnis al malliberejo grekan edzon, kiu, kiam nekonata admiranto sendis florbukedon al lia edzino, tuj akuzis ŝin pri malfidelo, kaj kruele batis ŝin. La juĝisto reagis al lia

pledo: “Se vi tiel traktis vian edzinon ĉar vi *amas* ŝin, mi ne volas pensi pri tio, kion vi povus fari, se vi *malamus* ŝin!” Alia ĵaluzulo estis germano, kiu portis florbukedon, bedaŭrinde el rozoj, al sia fianĉino, sed, kiam ŝi konfesis ian malfidelaĵon, vergis ŝin per la florbukedo, tiel senbride, ke kuracisto devis tiri dudek sep dornojn el ŝia sidilo. Juĝisto monpunis lin kaj devigis lin pagi altan kompenson.

Studento en Ganao pagis bovinon por akiri edzinon; poste, petis nuligon de la aranĝo — ĉar li trovis la edzinon multe malpli kamaradeca, ol la bovinon. En 1958 filipinano en Manilo disponigis sian edzinon al vetperisto por nuligi grandan vetistan ŝuldon. Maria, en Majorko, kredeble sentis sin en ia koŝmaro, kiam nekonnata viro staris sur la sojlo, kun valizo, kaj diris, “Vi estas mia; mi aĉetis vin de via edzo.” La juna, bela edzino estis ankaŭ mensopreta; ŝi forkuris tra alia pordo kaj vokis policanojn, kiuj, juste, arestis kaj la aĉetinton, kaj la vendinton.

Ne estas nur viroj, mistraktinte virinojn, kiuj bezonas punon; ankaŭ virinoj foje mistraktas virojn. Kanadano, akuzite, ke li batis sian edzinon, pledis, ke dum ok jaroj li nur unufoje direktis eĉ kritikan frazon kontraŭ ŝi. “Kaj kion vi diris?” — “Demetu tiun fajroŝtangan!” Estas anekdoto pri eksedziĝa proceso, dum kiu la edzino priparolis kverelon: “Kaj baldaŭ li troviĝis antaŭ mi, sur siaj genuoj... Do, pentema... “Kaj kion vi diris al li, kiam vi vidis lin genuanta antaŭ vi?” “Elrampu de sub la lito, mizera malkuraĝulo!”

Portugalino, kiu ne volis, ke la edzo vizitu ilian filon en najbara domo, kutimis ligi la edzon al brakseĝo ĉiuvespere. Norvego volis eksedziĝi, ĉar lia edzino estis malafabla kaj malica — ekzemple, ŝi ofte ŝtelis kaj kaŝis pecojn de liaj puzloj. Eĉ katamantoj konsentis, ke iom ekscesa estis la konduto de usona edzino, kiu neniam servis tagmanĝon al la edzo, ĝis ĉiuj ŝiaj *sesdek* katoj ricevis sian manĝon; kaj la monon destinitan al mastrumado ŝi elspezis por kataj frandaĵoj.

Eble la plej bona verdikto, finfine, estis tiu de germana juĝisto, antaŭ kiun oni vokis junan geedzan paron, ĉar iliaj interbatadoj malkvietigis la tutan straton. Li ordonis al ili, viziti la bestĝardenon, kaj serioze observi, kiel afable geleonoj traktas siajn parulojn.

Eksterordinara estis la kazo de italo, kiun oni arestis pro ‘bigamio’, pli precize ‘okogamio’, kiam enviulo denunciis lin. Tiu edzo

sukcesis dum jaroj vivadi kun ok edzinoj kaj dek du infanoj. Mistraktinto de virinoj! — Sed, kiam li sidis en malliberejo, la ok edzinoj publike protestis. Ŝajnas ke, dum multaj el ni ne povas vivi harmonie kun eĉ unu parulo, tiuj dudek personoj kreis harmonian komunumon, relative feliĉan, en kiu laborema famiestro subtenis ĉiujn kaj ĉiuj justeme dividis la aliajn taskojn.

Multaj procesoj atestas pri la varieco kaj strangeco de nia homa naturo. Multaj ŝtelas; sed en Aŭstrujo en 1979, policianoj arestis viron, suspektitan pri ŝtelado en magazeno; trovis nenian kaŝitan poŝon aŭ sakon; sed finfine malkaŝis lian sekreton: li dum jaroj ŝteladis, puŝante objektojn tra truoj en la poŝoj, en sian kavan artefaritan gambon. Multaj murdas; sed en Aŭstralio, en la sama jaro, indiĝeno Longa Haĉjo murdis alian indiĝenon, Kevin Ranon, batante lian kapon per sia indiĝena muzikilo, *didĝeriduo*, ĉar ili malkonsentis pri la detaloj de tradicia ceremonio. Ordinara krimulo ŝajnis tiu belgo, kiun en 1977 oni arestis pro ŝteloj de diversaj mebloj kaj mastrumiloj — ĝis la policianoj trovis, ke li ŝtelis ilin por mebli la subteran familian enterigejon (ne de la propra familio) kie li ekloĝis.

Dum ok jaroj, angliano plurfoje devis stari en akuzitejo, pro troa scivolemo; ŝi konstante ŝtelrigardadis tra fenestroj, ŝlosiltruoj kaj pordaj letertruoj, eĉ prenis leterojn el leterkestoj, por vidi, de kie ili venis. Ŝi neniam ŝtelis ion, kaj ne estis malica, sed ne povis venki sian obsedan scivolemon. Ŝia malrespekto al ilia privateco turmentis najbarojn, kaj venĝemaj spionitoj kelkfoje ĵetis neĝbulojn al ŝi aŭ malplenigis sitelojn da akvo sur ŝin. Ŝi mem deziris renormaliĝi kaj submetiĝis al psikiatra kuracado. Ĉi tiu tragikakomika malsano komenciĝis pro ŝia bonkoreco: iam ŝi loĝis apud egoismaj gepatroj, kiuj ofte eliris por amuzi sin, lasante la infanojn ploradi, nokte. Ŝi rigardis tra fenestroj, pro kompato kaj zorgemo; kaj la bonintenca spionado degeneris en strangan miskonduton.

En 1978 anglo staris en akuzitejo ĉar li portis sian katon sur la posta selo de sia motorciklo, “kaŭzante al ĝi nenecesajn suferojn.” Li kaj la kato ĉiutage vizitis ian te-budon en arbaro por tetrinki kaj manĝeti. Li defendis sin, asertante — tute kredeble — ke la kato ne nur kunvojaĝis propravole, sed *insistis* pri sia ekskurso sur la posta selo.

Brile impertinenta japana ŝtelisto utiligis la kutimon de la japana polico, aranĝi ekzercojn, kiuj bezonas kunlaboradon de la publiko. Li telefonis grandan magazenon: “Jen la polico; ni aranĝas ekzercojn; rabisto, kiu portos verdan ĉemizon, bluan pantalonon kaj grandan tranĉilon venos en vian magazenon kaj postulos monon. Bonvolu havi pretaj por li du milionojn da enoj, kaj instrukciu vian stabon.”

La rabisto venis, kaj klarigis al butikumantoj, ke temas nur pri polica ekzerco, dum stabanoj bone aktoris krizon kaj timon; sed kiam la estro telefonis la policejon: “La ekzerca rabo ĵus plenumiĝis...” la policano respondis, “Kia ekzerca rabo?” Feliĉe, inteligenta stabano notis la numeron de la aŭtomobilo; tial oni kaptis la rabiston kaj reakiris la monon.

Eble eĉ pli senhonta krimo estis tiu de tribestro en Papuo. Li elfosis kraniojn el enterigejo, kaj vendis ĉiun kranion al iu turisto, kiel “la kranion de mia patro, nobla heroo militisto.”

Novaj Proverboj

Kiu mensogas, la propran langon brogas.

Stefano faris ŝrankon; Donaldlo diris, “Dankon”. Mario nur atentis mankon.

Ne sturmu krokodilon, portante nur trikilon.

Gravas digno kaj deco, sed pli gravas amikeco.

Versareto — pri Homaj Afiksoj

Unu el familio estas familiano;
La milanano loĝas kutime en Milano;
la islamano penas obei al Korano.

Artisto sin okupas pri arto serioze;
kaj kuracist’ laboras, unue diagnoze,
kaj poste eble pike, aŭ tranĉe, aŭ nur doze.

La kuraĝulo timas, kiam danĝer’ proksimas —
jes, kuraĝulo timas, sed pro kuraĝ’ kutimas
normalan timon venki; tial ni lin estimas.

Hontigas la hejmanojn la fia mensogulo;
la islaman' ne sidas kun brando en angulo;
la okulist' kuracas malsanojn de l' okulo.

Bopatro, bopatrino, plendema, malserena,
en la geedzan amon estas gutad' venena;
sed bona boparenco estas helpanto bona.

Jen, Zamenhof, noblulo, sin sentis homarano;
kaj kiel okulisto laboris por la pano;
bopatro lin tre helpis el malavara mano.

Pensigaj Vortoj

“Forgesu, plene kaj porĉiame, ĉiujn malgrandajn prudaĵojn, kaj memoru, ke vi ne povas ŝanĝi moralajn valorojn, de la prapatroj hereditajn, sen preskaŭ murdi animojn. Eĉ kiam kutimoj eble ŝajnas barbaraj, ĉiam aŭskultu pri ili pacience, taksu ilin kompreneme, ĉiam trovu en ili ian semon de bono; zorgu, por ke vi ĉiam evoluigu ilin; memoru, ke vi povas, maksimume, nur civilizati homon laŭ la direkto de lia propra civilizacio, tia, kia ĝi estas.”

R.L. Stevenson (vidu ĉap. 27) en letero al juna misiistino.

Ne Mortu Porko por Rabena Forko!

La porko estas tiel grava por la samoanoj, ke ili kreis specialan legendon pri ĝi; sed por hebreoj kaj islamanoj la porko estas malpura besto, kaj iliaj religioj malpermesas manĝadon de porkaĵoj. Hinduoj kutime ne manĝas bovaĵojn, kaj multaj hinduoj tute ne manĝas viandon. Ankaŭ multaj budhanoj ne manĝas viandon aŭ ian ajn bestan karnon, pro la principo, “ne kaŭzu suferon al io ajn vivanta.” Kaj al multaj ĉinoj, ne pro principo, sed pro kutimoj, fromaĝo kaj kelkaj aliaj laktaĵoj estas naŭze nemanĝeblaj.

Esperantistoj ofte gastigas gastojn alilandajn, eble alirasajn. Estas saĝe, demandi al gasto, ĉu ia nutraĵo ofendus lian aŭ ŝian konsciencon, aŭ ne taŭgas al la stomako aŭ palato. Simile, varias de lando al lando seksaj moroj, konceptoj pri deco, ĝentileco, aferoj

permesitaj kaj malpermesitaj, ekzemple pri kovrado de la korpo, fotado, higieno.

Ni penu ne trudi al alilanda gasto ion, kio malkvietigos ties konsciencon aŭ estos vere malagrabra; sed ni ankaŭ zorgu, ke la gasto ne havu malagrabraĵojn, ĉar li aŭ ŝi pro nescio ofendis kontraŭ niaj lokaj moroj. Kaj kiam ni estas gastoj eksterlande, ni modeste kaj milde klarigu pri veraj problemoj, sed kiel eble plej adaptiĝu al la eksterlandaj kutimoj.

Ofte ni pliproksimiĝas, ĝuste kiam ni respektas la aliecon de alia.

29. FABELO EL MAROKO

Maroko estas lando de norda Afriko, sendependa ekde 1956; granda parto de la lando estas dezerto kaj triono estas montara, kun la plej altaj pintoj kaj belaj pejzaĝoj de la Atlas-montaro. Ekde 1976, Maroko posedas la plej valoran amason da naturaj fosfatoj en la mondo, kaj granda fosfat-industrio kontribuas pli ol duonon de la eksportaĵoj. Tamen la plimulto de la marokanoj estas terkultivistoj aŭ paŝtistoj; ankaŭ fiŝkaptado estas grava; kaj jam evoluis granda turisma industrio.

La plimulto de la marokanoj estas islamanoj, kaj la ĉefa lingvo estas la araba; sed restas minoritato de eŭropanoj, kaj oni parolas ankaŭ france kaj hispane. Inter multaj pejzaĝoj kaj urbaj vidindaĵoj, troviĝas en Maroko la plej malnova universitato de la mondo, en Feso. [Vd. ĉap. 3].

Moderna Maroko ŝajnas iom bonvenigi esperantistojn, ĉar sur la maroka flago estas centra verda stelo kvinpinta, kaj la ĉefurbo estas Rabato! Bedaŭrinde, temas nur pri hazardaj koincidoj. Tamen, kelkaj francoj jam faris pioniran laboron pri Esperanto ekde 1906, kaj kelkaj esperantistoj kutime troviĝis en la lando. En 1955–1956 oni eĉ instruis nian lingvon en maroka lernejo... Esperanto estas tre malforta en Maroko, sed ni rajtas esperi.

La araboj estas semida gento; sed preskaŭ triono de la islamaj marokanoj estas berberoj, anoj de ĥamida gento. La berberoj havas proprajn lingvojn, Rif, Tamazigt kaj Ŝluh, parencajn al la antikva morta libia lingvo, la numida; sed ili uzas la araban alfabeton. Ili preskaŭ ne havas literaturon, sed havas interesan folkloron kun fabeloj.

Nia nuna fabelo estas berbera, kvankam diversaj paralelaj ideoj troviĝas en arabaj fabeloj. Modernaj legantoj eble trovas interesa la malsimplan koncepton pri virta virino: kvankam oni ŝajne postulas de nobla edzino abnegacion eĉ ekscesan — kaj tre malŝpareman! — oni ankaŭ laŭdas junan edzinon kiu, senigite de

sia protektanto, sendepende faras decidojn kaj vivtenas sin, montrante kuraĝon, entreprenemon kaj menspretecon.

Tiu, Kiu Serĉis Edzinon, Vere Bone Edukita

Berbero iom prospera deziris trovi edzinon; sed vere bonan edzinon; kaj en sia urbeto li ne trovis taŭgan junulinon. Do, li selis sian ĉevalon, kaj komencis rajdi de loko al loko, serĉante vere virtan virgulinon.

Post kelkaj tagoj, li alvenis urbopordon; ekster la pordo, pluraj viroj amuzis sin per rapida pilkludo. Li rimarkis, inter la maljunaj aŭ kriplaj rigardantoj, viron, kiu aspektis tute kaduka; iu alportis lin en granda korbo, por ke li iom distru sin, spektante la sporton. La ludo estis vere spektinda, do la rajdanto proksimiĝis al la kadukulo en la korbo, kaj diris, "Pacon al vi! Ĉu mi rajtas eksidi apud vi?"

"Pacon al vi! Certe! Estu bonvena!" La rajdanto deĉevaliĝis, metis sian ĉevalon en la ombron de la muro, kaj eksidis apud la kadukulo. Ambaŭ kun plezuro rigardis la pilkludon, sed la serĉanto miris, kiam plurfoje sonis ĝojkrio el la korbo, "Brave! Paĉjo kaptis la pilkon!"

"Ĉu vere, Oĉjo, via patro ankoraŭ kapablas pilkludi?"

"Jes, jen li — tie! Brave!... Denove! Ha, bela bato!"

"Kial via patro estas tiel vigla, kaj aspektas pli juna ol vi, dum vin oni devas porti en korbo?"

"Ho ve! mia patrino estas modela edzino, vere bone edukita, kaj al mia patro ŝi estas perfekta edzino! Sed mi, ve al mi, ricevis edzinon maldiligentan kaj malbonhumoran, kaj post nur unu jaro mi iĝis kvazaŭ maljunulo. Nur pro niaj du edzinoj, mia patro restas juneca en alta aĝo, kaj mi, junaĝa, jam kadukiĝis."

Kiam la ludo estis finita, la kadukulo prezentis al sia patro la serĉanton, kaj ili iom interparolis. La vigla, gaja patro invitis la serĉanton gastigi ĉe li, kaj ĉiuj iris al la hejmo, kiu estis tre pura kaj bonorda.

Estis la naŭa monato, Ramadanano, kiam islamanoj strikte fastas dum la taghoroj, kaj manĝas nur nokte; do eĉ al gasto la domastro ne tuj proponis manĝon. Li diris, "Ni du dormos iom en la dormoĉambro, kaj mia edzino preparos rizon kaj viandon, kaj ni

manĝos, kiam estos tro mallume, por distingi blankan fadenon de nigra.” Ambaŭ kuŝiĝis kaj iom dormis.

Noktomeze, la edzino alvenis, kun plado da rizo kun viando. Ŝi demetis ĝin, kaj delikate tintigis la latunan akvopoton, por ĝentile veki la dormantojn. Kiam la edzo streĉis siajn gambojn, li renversis la pladon. La edzino silente purigis la plankon kaj forportis la pladon. Baldaŭ ŝi revenis kun freŝe kuirita manĝo. Denove la edzo renversis ĝin; denove la edzino silente ordigis en la ĉambro kaj foriris por prepari freŝan manĝon. La gasto konstatis, ke ne temas pri akcidento. Sesfoje la edzino alportis pladon, kaj sesfoje la edzo renversis ĝin. Kiam la edzino revenis kun plado la sepan fojon, kaj la edzo ekmovis la gambojn, la gasto kaptis lian brakon kaj protestis, “Ho ve! Malbenita estu Satano! Mi tre petas vin, ne plu turmentu obeeman edzinon!”

“Mi povus daŭre renversi la manĝon ĝis la matena horo, kaj vi aŭdus de ŝi nenian plendon! Tamen, pro respekto al mia gasto, mi faros laŭ via deziro.” Kaj ili manĝis la bonan manĝon, kaj interparolis.

“Ĉu vi edukis vian filinon, esti same obeema, kiel la patrino?”

“Jes ja.”

“Sinjoro, mi deziras ŝin kiel mian edzinon, se estas al vi agrable.”

“Estus al mi honoro; sed mia filino ne plaĉus al vi. Ŝi estas malbela. Ŝi havas nur unu okulon, kaj vi trovus sur ŝi multajn skabiajn krustojn!”

“Pli gravas al mi virto, ol beleco; kaj mi ne postulos grandan doton.”

Finfine la patro konsentis, edzinigi la filinon al la serĉanto. Li venigis ŝin, kovrita per nigra vualo. Li donacis al la nov-edzo, kiel doton, bone dresitan mulon, sur kiu la nov-edzino povos rajdi; du sklavojn — negron kaj negrinon; kaj decan stokon da vestoj kaj ornamaĵoj por la filino. Post la taŭgaj ĝentilaĵoj kaj adiaŭoj, nia serĉanto, nun nia trovinto, ekrajdis hejmen kun sia nova kompanio.

Tagmeze, estis sufoke varme; do en oazo ili iom deviis de la vojo, por ripozi en la ombro de la palmarboj kaj granatarboj. Li metis la edzinon sub unu arbon, ligis la ĉevalon kaj la mulon en

taŭga loko, permesis al la du sklavoĵoj ankaŭ ripozi, kaj mem ekkuŝis sub alia arbo.

Post dormeto, li vekigis, kaj ideo envenis lian kapon: la laca junulino dormis profunde, do li momente rigardetos la difektitan vizaĝon, al kiu li devos alkitimiĝi. Li ŝteliris al ŝi kaj tre delikate levis ŝian vualon.

Li devis meti manon al la propra buŝo, por enfermi ravo-krion. Li vidis silkecajn nigrajn buklojn, larĝan frunton, ĉarman nazon, perfektajn brovojn, okulharojn kiel nigrajn papiliojn sur la petalaj palpebroj, videble egalajn vualitajn globojn de du okuloj; kaj sate ne glatan haŭton, sen la plej eta difekto. Eĉ kun fermitaj okuloj, la junulino estis belega kiel frumatena suno. Kaj la patro sekrete fiksis, ĉirkaŭ ŝian belforman kolon, indan kolieron de grandaj perloj — blankajn perlojn sur brunetan perlamoton.

Ĉiu povas imagi la ĝojon de la edzo. Li volis pli detale rigardi la pompan kolieron, do tre delikate deprenis ĝin, rekovris la belan vizaĝon kaj reiris al sia loko.

La perloj kaj oro brilegis en la suno; kaj, subite, pigo flugis malsupren, kaptis la kolieron kaj forflugis. La surprizita edzo tuj sekvis la birdon, kiu ne flugis alte. Li tiel atentis la birdon, ke li ne vidis unu el la oazaj putoj, kaj enfalis. Li sukcesis iel alkroĉi sin al la muro super la akvo, sed tiel malalte kaj tiel malkomforte, ke li ne povis eĉ laŭte voki helpon.

Kiam la juna edzino vekigis, ŝi ne vidis la edzon, kaj kiam ŝi demandis al la negro, li respondis nur, “Mi ne scias!”

Dum ŝi vane ĉirkaŭrigardis, ŝi iom malkovris la vizaĝon, kaj Satano tentis la negron, kiu estis pagano; li konis nek la leĝojn de Alaho kaj la Profeto, nek la leĝon de la kompatato, kiun konas eĉ iuj paganoj. Per krudaj vortoj kaj fiaj gestoj li ekatencis la edzinan purecon de la belulino. En granda danĝero, ŝi elpensis ruzaĵon; ĉe la rando de alia puto, ŝi demandis, “Kio estas tiu stranga ora brilo tie?” kaj, kiam la negro rigardis en la puton, kaptis liajn krurojn kaj enpuŝis lin. Tie, kun la kapo malsupre, li mortis.

La belulino longe, longe serĉis la edzon, sed ne trovis lin; ŝi ankaŭ rimarkis, ke iu ŝtelis ŝian kolieron; do, kredeble iu rabista bando faris ĉion.

Finfine, ŝi sidigis sur la ĉevalo de la edzo, sidigis la negrinon sur la mulo, kaj, nesciante kien iras la vojo, sekvis ĝin, ĝis ili atingis

urbon. Tie ŝi vendis la ĉevalon, la mulon kaj la negrinon. Kiel vivi dece kaj sekure? Ŝi aĉetis virajn vestojn, iris al la moskeo, kaj komencis studi kun junuloj en la moskea lernejo. Ŝi lernis diligente, kondutis modeste kaj obeeme, kaj baldaŭ iĝis kaligrafo tiel majstra, ke ŝiaj manuskriptoj superis eĉ tiujn de la instruistoj. Kreskis la famo de la silenta modesta junulo.

La reĝo de la urbo bezonis leter-skribiston. Aŭdinte ion pri la juna skribisto en la moskeo, li venigis lin en la palacon, kaj metis antaŭ lin paperon kaj inkon. La juna skribisto skribis leteron tian, ke la arabaj frazoj ŝajnis belaj floroj kaj folioj. La reĝo entuziasmiĝis.

“Junulo, nepre ne reiru al la moskeo. Mi bezonas sekretarion, kiu skribos miajn leterojn, kaj la aktojn de la regno, kaj de mia tribunalo. Neniu renoma sultano havis pli bonan kaligrafon. Mi edzigos vin al unu el miaj filinoj, kaj loĝigos vin en la palaco.”

La juna skribisto konsentis. Post la festo, kiam la skribisto kaj la princino estis solaj en la geedza ĉambro, la edzo konfesis al la edzino, “Princino — mi estas virino, kiel vi.” Ŝi klarigis la tutan malfacilan situacion, kaj la princino estis kortuŝita.

“Ĉu vi konsentas, ke dum tempo ni vivadu kune, kaj gardu mian sekreton, kaj restu paciencaj ĝis Alaho redonos mian edzon, aŭ montros solvon al mia problemoj? Ĉu vi konsentas, pacienci dum unu jaro?”

“Kompatinda fratino!” kriis la noblakora princino. “Se vi povas pacienci dum unu jaro, mi povas dum dek jaroj!”

La du virinoj vivadis en tre firma amikeco, kaj atendis la volon de Alaho.

☆ ☆ ☆ ☆

La edzo preskaŭ pereis en la puto; sed kiam vojaĝantoj venis por akvo, li sukcesis kapti ilian sitelon, kaj ili tiris lin supren. Kiam li aperis, ĉiuj kriis, surprizite.

“Kiu vi estas?” — “Estas puta demono!”

“Ĉu vi estas homo, aŭ fajra ĝinno?”

“Mi estas homo, kaj kredanto: *Li estas Alaho, la Unueco, Alaho la Sendependa, de kiu ĉio dependas. Li ne naskis, kaj ne estis naskita, kaj neniu estas simila al Li.*”¹

1. La citaĵo el *La Nobla Korano* estas laŭ traduko de d-ro Italo Chiussi, Kopenhago 1969, escepte ke mi uzas la nom-formon «Alaho», kiun legantoj trovos en PIV kaj aliaj vortaroj.

Kiam la vojaĝantoj konstatis, ke li estas nur homo, kaj islamano, ili prizorgis lin; sed li troviĝis sen edzino, gesklavoj, aŭ rajdbesto. Kun la helpo de siaj savintoj, li sukcesis iri al tiu urbo, kiun la edzino jam atingis, kaj li iris al la bazaro por trovi laboron, kaj perlabori sufiĉan monon, por iri hejmen kaj peni ordigi siajn aferojn.

Iu kristano dungis lin por fari purigan laboron, kaj inter aliaj taskoj li devis detrui bird-neston sur la balkono. En tiu nesto li vidis la kolieron el perloj!

Li trovis judon (ĉar la Profeto malpermesis al islamanoj, komerce pruntedoni monon kaj ricevi interezon); prenis unu perlon el la koliero, kaj petis, "Tenu tiun ĉi perlon kiel garantiaĵon, kaj pruntu al mi monon." La judo pruntis al li sufiĉan sumon; la serĉanto iris hejmen kaj laŭeble ordigis siajn aferojn, sed ne povis trovi spuron de la edzino.

Kiam li estis preta tion fari, li rajdis denove al la alia urbo, kaj reportis la monon al la judo, kiu rifuzis redoni la perlon, kaj eĉ mokis lin: "Ĉu ordinara homo kiel vi povas posedi perlon?"

Judoj estas kutime tre fidindaj pri garantiaĵoj, kaj la serĉanto ŝokiĝis kaj koleriĝis. Li vokis la judon antaŭ la reĝan tribunalon. Tie la reĝa sekretario tuj rekonis sian edzon; kaj la edzo pensis, ke tiu juna skribisto estas bela junulo, kun mieno plaĉe modesta, kvankam ĉiuj respektas lin.

Kiam la skribisto invitis la plendanton gastigi ĉe li nokte, li volonte akceptis, kaj rakontis siajn aventurojn.

"Jen," kriis la skribisto, "mi estas via edzino!" kaj ŝi klarigis ĉion.

Matene, la tribunalo devigis la judon redoni la perlon; kaj la skribisto genuis antaŭ la reĝo, kaj konfesis ĉion. "Ĉar mi estas virino, kaj ĉi tiu estas mia edzo, mi petas vian permeson, foriri kun li. Sed, se vi deziras doni vian filinon al li kiel duan edzinon, ŝi estos kiel eble plej bonvena kaj kara al ni ambaŭ."

La reĝo vidis, ke antaŭ li genuas du homoj, kies kvalitoj estas neordinaraj. Li volonte edzinigis sian filinon al vera edzo; kaj la festoj daŭris dum trifoje sep tagoj.

30. VORTAJ SPORTOJ

Sporto estas korpa ekzerco aŭ ludo, kiu pliigas la lertecon kaj forton de la korpo, kaj eble utilajn kvalitojn kiel kuraĝon, persiston kaj decidemon. Do, ĉu ni rajtas nomi «vortaj sportoj» tiujn amuzojn, kiuj iom stimulas nian observemon, eltrovemon kaj lertecon pri vortoj?

Vortludoj povas amuzi nin. “Kia frukto estas la plej pur-ema?” — “La *ban-ano*”. / “Kiun floron ĵurnalistoj prefere pri-traktas?” — “*Krizan-temon*” / “Mi havas *lup-inojn* en mia ĝardeno.” — “Mi havas nur unu *hundinon* en la mia.”

“*Karamelo* estas bongusta. — “Unu *melo*, jes, sed ne du, ĉar *mel-duo* ne povas esti *kara*.” / “Ĉiu patro nepre estas *av-ida*.” / “Kio estas *geranio*? — “Kredeble *lando*, kie *ranoj* de ambaŭ *seksoj* loĝas?” / “Kio estas la principo de sciencisto, se *mulo* eniras la ĝardenon?” — “*For-mulo!*”

Iu, kiu rigardas amason da nerazitaj junuloj, eble diras, “Ŝajnas, ke ni retroiras al *barb-ar-ismo*.” / Se la grek-ortodoksa pastro ne povas dormi, pro difektita *pop-lito*, ĉu li havas vundon malantaŭ la genuo aŭ truon en la dormo-meblo? / Ĉu ĉiu loĝanto en Bukareŝto estas drinkemulo, nur ĉar li aŭ ŝi estas *rum-ano*? kaj ĉu *kavi-aro* estas fiŝa frandaĵo aŭ kobaja kolekto?

Zamenhof, kaj ĉiuj post li, kiuj evoluigis la esperantan vortaron, penis eviti homonimojn, vortojn samformajn sed kun malsamaj sencoj; sed kelkaj tiaj vortoj ekzistas, eble pro du diversaj lingvofontoj (ekz. *koro*, kiun ni ĉiuj konas, el la latina, korpoparto, kaj la tre malofta vorto *koro*, foje literumita *kor'o*, el la hebrea, antikva mezurunuo biblia); aŭ, pli ofte, pro iom rilataj aŭ metaforaj sencoj (ekz. *folio* povas esti sur arbo, da papero, eĉ el oro aŭ kaŭĉuko; la lasta poemaro de Baghy estis *Aŭtuna Foliaro*.) Do, oni foje havas vortludojn eĉ en Esperanto pro homonimoj. “Li penis ŝteli peltan mantelon de la *hoko* (pendigilo), sed la gardisto haltigis lin per *hoko* (boksista frapo) al la makzelo.” / “Mi ne povas legi ĉi

tiun *kvarton* (libro kun kvaronfolia formato) sen la helpo de *kvarto* (mezurunuo en kelkaj landoj) da biero!”

Oni povas ankaŭ ŝerci pri vortoj, en kiuj parto povus esti gramatika finaĵo aŭ afikso. De *elefanto*, ŝerculo povus eble diri ke iu, kiu mallerte kaj brue iras, “*elefas sur la ŝtuparo.*” La kunveno iom fiaskis; ne restis tempo por la programa *prelego*, do la malfeliĉa parolonto konstatis, ke li devos limigi sian paroladon al *prelo* aŭ eĉ *preleto*. “Nia hundo estas *hibrido*; neniuj scias, kiu estis ĝia *hibro!*” / “*Ŝi ne rezistis la tenton — nu, ŝi eĉ ne zistis unufoje!*” Sed, kompreneble, ni ne faru tiajn ŝercojn inter komencantoj, aŭ ie, kie ili povos pli konfuzi ol amuzi...

Ekzistas ankaŭ multaj vortoj, kiuj povas esti kunmetitaj vortoj aŭ memstaraj vortoj; ĉu *dekalogo*, ordonaro diktita al Moseo, aŭ *deka logo* de ĉarma persono, kiu havas naŭ aliajn logojn?; ĉu *fonografo*, por reprodukti sonojn, aŭ *fono-grafo*, aristokrato, kiu ne antaŭen puŝas sin?; ĉu *komerco* estas interŝanĝo, aŭ *kom-erco*, mistera krudmaterialo, el kiu oni ekstraktas interpunkcion? Ni povas multe amuzi nin per tiaj absurdaĵoj.

Detala, kaj tre amuza, esejo pri “La Esperanta Vortludo” troviĝas en *El la Maniko* de Reto Rossetti.

Anagramo estas vorto farita el alia vorto per rearanĝo de la literoj, aŭ eble vorto el vortogrupo, vortogrupo el vorto, eĉ vortogrupo el vortogrupo. *Konkreta* iĝas *kat-korne*, *geografio* iĝas *fia Georgo*, *bambuo* iĝas *bub-amo*, *nia erco* iĝas *erinaco* k.t.p. Foje oni elpensas anagramon, en kiu la nova signifo estas kvazaŭ klarigo aŭ komento: *bataloj* iĝas *la batoj*; PIV ŝercis pri *l’Akademio* kaj *la komedia*; al *burokrato* plaĉas *karto-rubo*; kaj *parlamento* povas esti *ne tro lampa!*

Oni povas ankaŭ ŝerci pri sonsimileco, kiu ne estas perfekta anagramo: *tabako* estas *ekbato* kontraŭ ies sano; *dent-agaco* povas distri nin kaj kaŭzi *akcidenton*; Adamo kaj Eva estis feliĉaj en *Paradizo*, sed post peko komenciĝis geedzaj kvereloj, do ili iĝis *disa paro*.

Akrostikoj estas de diversaj specoj; sed la baza principo estas, ke la unua litero de ĉiu verso, frazeto aŭ eĉ nur vorto kontribuas al vertikala vorto:

Muso
Ungo
Limo
Ordo

Oni povas aranĝi du vertikalajn vortojn, per la unuaj kaj lastaj literoj de horizontalaj vortoj; sed tio ne estas facila en Esperanto, kie la vasta plimulto da vortoj finiĝas per vokalo.

Kiam en esperantaj vortospertoj ni nepre volas forigi la vokalan finaĵon, ni povas tion indiki per la signo (R) — por “radiko”. Do, “Preskaŭ blinda, fosanta besteto kun velureca felo (R)” estas ne “talpo” sed “talp”.

Akrostiko povas esti komplimento, komento, ŝerco, kiun oni presigas entute, do kiu ne estas enigmo; aŭ enigmo kiun oni penas solvi. Jen akrostika poemeto:

Zeloto, ne; sed vere celis celon;
Ame deziris venki la kruelon;
Miopa kaj malforta, sed titana
En la laboro justa kaj humana;
Neniam li soifis propran gloron;
Homan en ĉiu konis saman koron;
Obstina, pacienca en konstanto,
Fidela, jen Doktoro Esperanto.

Kaj jen akrostika ŝerco por instruistoj:

Kion fari pri la akuzativo?

Atentu ĝin!
Komprenu ĝin!
Uzu ĝin!
(Zorge!)
Akordigu ĝin!
Taŭge enmetu ĝin!
Inde ellasu ĝin!
Venku la regulojn!
Obeu la postulojn!

Jen enigma akrostiko: la unuaj literoj de ses vortoj kreas vertikalan vorton.

VERTIKALE: La ĉefa fondinto de UEA.

HORIZONTALE:

1. Besto pinglokovrita, pli granda ol erinaco.
2. Samprofesiulo de Zamenhof.
3. Tre inteligenta marbesto, ne fiŝo.
4. Hazardludo kun numeritaj biletoj.
5. Perfekte pereigi.
6. Kritika artikolo pri libro, filmo aŭ alia artverko.

Kaj jen duobla akrostiko, kun du vertikalaj:

VERTIKALE:

1. Lampo de nokto, reĝin' de l' ĉielo —
2. Ĝoj' por arabo kaj ĝoj' por kamelo.


HORIZONTALE:

1. Grimpas la planto, kaj belas la floro;
Sed ravas, freŝigas, bonegaodoro.
2. Taŭga por ĉiu surtera, suronda,
Malekskluziva, komuna, tutmonda.
3. Ekscitiĝema kaj tre maltrankvila,
Daŭre malgaja en viv' malfacila. (R)
4. Jen la direkto de l' dio Zefiro,
Ankaŭ de l' suno en hor' de subiro.

Krucvortenigmoj estas tre bonaj, por samtempe distri nin kaj iom ekzerci la menson. Ekzistas du ĉefaj specoj: simplaj, kiuj uzas klarajn difinojn; kaj enigmaj, aŭ kriptaj, kiuj uzas torditajn difinojn, kun vortludoj, anagramoj, aludoj kaj aliaj perpleksigiloj.

Se la solva vorto estus *karotido*, en simpla krucvortenigmo la difino povus esti: "Granda arterio en la kolo". Sed en kriptaj krucvortenigmo ĝi povus esti, ekzemple: "Sangoplena filo de radiko". Kaj, ĉar "radiko" povas havi signifon botanikan, fiziologian, etimologian, matematikan aŭ pli ĝeneralan, la solvanto povas iom vagi inter diversaj ideoj.

Nia nuna libro ne estas destinita al tiuj, kiuj jam kapablas solvi kriptajn krucvortenigmojn en Esperanto! Sed jen simpla krucvort-enigmo, malgranda kaj senpretenda:



HORIZONTALALE

1. Kolektiva orda organizo de la tuta socio. (11)
6. Movo de la maro. (R) (4)
7. Tuŝadi per la lango. (4)
8. Ŝtono kun variaj koloroj. (5)
11. Konduti laŭ ies ordonoj. (R) (3)
14. Ŝanĝi sian staton. (3)
16. Havanta altajn moralajn kvalitojn. (5)
17. Nea pronom-adjektivo. (5)

- | | |
|--|------|
| 18. Moviĝi malsupren subite. (R) | (3) |
| 19. Hepata sekrecio. (R) | (3) |
| 20. Signo kiu altigas muziknoton. | (5) |
| 23. Esti varmega aŭ fervora. | (4) |
| 24. La nia estas verda kun blanka parteto. (R) | (4) |
| 25. Komenciĝas per la sama litero kiel alia vorto. | (11) |

VERTIKALE


- | | |
|---|------|
| 1. De la koloro de frukto tre acida. | (11) |
| 2. Meritanta. | (4) |
| 3. Rilata al fluido, uzata por skribado. | (4) |
| 4. Granda rabobirdo. | (4) |
| 5. Sankciis. | (11) |
| 9. Vundeti per ungoj. | (5) |
| 10. Transformis felon en ledon. | (5) |
| 12. Granda serpento kiu sufokas sian predon. (R) | (3) |
| 13. Sufikso pri povo. | (3) |
| 14. Objekto, kiu parte kovras alian objekton. (R) | (3) |
| 15. Apartenanta al ĝi. | (3) |
| 20. Elparoli vortojn al skribonto. (R) | (4) |
| 21. Valora blanka substanco. (R) | (4) |
| 22. Okupo konsistanta en plenumo de ia servado. (R) | (4) |

Ekzistas diversaj krucvortenigmaj specialaĵoj, ekzemple krucvortenigoj pri apartaj temoj (plantoj, landoj, okupoj k.t.p.); kun kaŝitaj proverboj aŭ versoj; aŭ de specoj, kiujn oni solvas ne per difinoj.

Logogrifo estas malgranda enigmo, en kiu oni trovas difinitajn vortojn, kiuj aŭ havas la samajn literojn en diversaj aranĝoj (*tanko, kanto, konta*) aŭ diferencas inter si per po unu aldonita litero (*ano, rano, Irano, tirano...*).

Rebuso prezentas kelkajn desegnojn tiajn, ke se oni ĝuste nomas la objektojn kaj kunmetas la vortojn, oni trovas la solvon, ekzemple, bildoj de: *kolo, rato kaj uro* donus la muzikan terminon

“koloraturo”, aŭ *feo*, *muro* kaj *alo* donus la osto-nomon “femuralo”.



Ŝarado estas bonega ludo por progresemuloj en lingvistudoj, aŭ ĝenerale por improvizaj amuzvesperoj, ekzemple post loka konferenco de esperantistoj. Estas diversaj ŝaradaj procedoj, sed jen la plej konataj:

1. La prezentantoj aktoras scenetojn, aŭ eble nur mimas, tiel ke la aŭdantaro eble povas diveni taŭgajn silabojn: iu havas problemon kun *kulo*, gvidisto montras al turistoj *turon*, kaj iu divenas *kulturo*. (Oni kutime prezentas scenon kun la tuta vorto, sed ne ĉiuj faras tion.)

2. Por tre mallonga vorto, oni prezentas scenetojn, kiuj sugestas vortojn, kies komencliteroj finfine literumas la tutan vorton. *Stelo*, ekzemple, povas esti prezentita jene: **Suno, Teo, Entuziasmo, Libro, Ovo.**

3. Plej bone por lingvo-ekzercado, kaj probable por amuzo: oni prezentas sceneton por ĉiu silabo aŭ vorto-parto, kaj ie en la sceneto uzas la vorteton; en la lasta sceno oni uzas la tutan vorton. Ekzemple, por *paroksismo* oni povus prezenti fotografiston, kiu komikfuŝe penas fotografi la ĝojan *paron* post geedziĝo; lacan instruiston, kiu penas helpi infanojn kalkuli, do diras *ok*; kaj rivalajn ĵurnalistojn, en aviadilo, vizitontajn lokon, kie ĵus okazis *sismo* (tertremo). La lasta sceneto povus esti en hospitalo, kie flegist(in)o informas kuracist(in)on pri la stato de diversaj pacientoj, do facile mencias ies *paroksism*on. La arto de ŝarado estas, grandparte, elpensi sceneton iom amuzan, kun ia enhavo, kaj diri sufiĉajn vortojn, por ke la ŝlosila vorto ne tro elstaru! Oni povas iom blufi, elstarigante *alian* plursilaban vorton, tiel ke la spektantoj kredas, ke ili trovis la solvon, kiam fakte temas pri alia vorto!

Ĉar estas tiom da diversaj ŝaradaj metodoj, estas saĝe, unue kontroli, ke ĉiuj, prezentantoj kaj solvontoj, atendas ludi laŭ la samaj reguloj. Kaj la ludantoj interkonsentu, kiel severe oni interpretos: ekzemple, ĉu por “paroksismo” estas nepre necese, ke iu diru “ok”, aŭ ĉu “oka” estas akceptebla?

Almenaŭ unu alia speco de enigmo estas menciinda: tiu, kiun ni eble rajtus nomi la *vivmistera enigmo* por distingi ĝin de la pure vorta enigmo: la demando intence malklara. Tiaj enigmoj ofte rolas en folkloro, en fabeloj kaj baladoj. Kredeble la plej fama estis la demando, kiun, laŭ la helena mitologio, la Sfinkso faris al Edipo: “Kio iras sur kvar piedoj matene, sur du piedoj tagmeze, kaj sur tri piedoj vespere?” Por tiu, kies kulturon la helena kulturo ne influis, jen la solvo: “La HOMO”. Kiel infaneto, li rampas sur la planko; plenkreska, li piediras sur du piedoj; aĝa, li uzas ankaŭ bastonon.”

“Kiuj plenumas siajn oficojn dum unu semajno, informas multajn pri nur tri faktoj, poste vojaĝas al multaj landoj en ĉiuj kontinentoj?” — *Insignoj de Universala Kongreso de Esperanto* (sur kiuj troviĝas kongresnumero, nomo kaj lando).

“Kio havas du gambojn, povas porti monon, estas atente prizorgata por eviti falon, tamen oni ofte eksidas sur ĝi?” — *Pantalono*.

“Domo senporda, eliro nur morda, ora trezoro – konjektu, sinjoro!” — *Ovo*.

Foje oni elpensas ankaŭ tre ekscentrajn enigmojn, pli pro la amuzo de ekscentreco ol por inviti inteligentajn konjektojn: “Kio manĝis multan fromaĝon, sed pezas neniom, diras ‘pep-pep-pep’ meze de ‘vrumm-vrumm-vrumm’ kaj ne posedas poŝtranĉilon?” — *Muso, kaŝvojaĝanta en kosmoŝipo*.

Kredeble la plej malfacila, plej kulture valora kaj plej interesa el ĉiuj vortaj sportoj estas la tradukado. Iu ajn fuŝulo povas iel fuŝtraduki, sed vere bona traduko rezultas de la multe pripensita, kiel eble plej bona, solvado de multaj sinsekvaj enigmoj. Esperantistoj nepre ne entreprenu tradukajn taskojn por prezenti gravajn verkojn al la publiko, ĝis ili estas plene pretaj fari tiajn taskojn. (Se la tasko ŝajnas al vi tute facila, plej verŝajne vi ankoraŭ ne estas preta fari ĝin inde!) Sed tradukaj ekzercoj privataj, precipe kiam pluraj esperantistoj diskutas pri la problemoj, estas tre progresigaj kaj interesaj.

Ni ludu kun vortoj, kaj lingvo pli vere vivas por ni. Estas kun amikoj, ke ni deziras ludi.

Novaj Proverboj

Faru propran laboron, pretendu propran gloron.

Unu bakas, lavas, flikas; dua sidas kaj kritikis.

Ne floras la vero, kie mankas libero.

Vespo ne povas skurĝi — sed ne sidiĝu sur ĝi!

Versareto — pri kvar vortoj, kiujn oni foje intermiksas

La pomoj ne estas ankoraŭ maturaj;
anstataŭ la pomoj, la prunoj purpuraj
tre taŭgos al ni por saniga deserto —
pri utilo de fruktoj ni scias laŭ sperto.
Sidiĝu do, kara! tagmanĝu ni kune;
ni sentas kontenton, do vivas fortune;
laŭ kelkaj, ni havas *apenaŭ* sufiĉon,
sed *almenaŭ* de amo posedas ni riĉon.

Reklamoj en Butikaj Fenestroj:

NE IRU EN ALIAN BUTIKON
POR ESTI TROMPITA !
TUJ VENU ĈI TIEN

PLEJ PRESTIĜAJ PELTISTOJ

Ni tajloros belegan peltan mantelon,
aŭ jakon, aŭ skarpon, **laŭ via persona
gusto**. Ni ĉiam tenas tre varian stokon
da belaj peltoj.

**Ni ankaŭ volonte tanos kaj tranĉos
vian propran felon.**

31. FABELO EL BIRMO

Birmo estas azia lando, plejparte montara aŭ arbara, kiu situas inter Hindujo, Ĉinujo, Laoso kaj Tajlando, kun longa marbordo. La valo de la rivero Iravado estas unu el la plej gravaj riz-kultivejoj de la mondo. Inter aliaj gravaj eksportaĵoj estas kaŭĉuko, juto kaj tektono-ligno. Tektono-ligno estas arom-odora, tre malmola, kaj ne-putriĝema, do ege utila. Malpli gravaj por homa feliĉo ol rizo, tektono, juto aŭ kaŭĉuko, sed belegaj, estas la mondfamaj rubenoj de Birmo, kiuj estas tre valoraj. Inter la valoraj mineraloj de Birmo troviĝas ankaŭ arĝento.

La ĉefurbo estas la havenurbo Ranguno; la ĉefa lingvo estas la birma, sed ekzistas multaj minoritatoj, precipe en la montaraj regionoj, ĉiuj kun siaj folkloroj. La plimulto da birmanoj estas budhanoj.

La birma popolo havas reputacion de mildeco, kaj de sinteno amikeca kaj gastama; la plimulto estas terkultivistoj, sed ankaŭ fiŝkaptado grave kontribuas al la nacia nutrado.

Antaŭ la dua mondmilito, Birmo estis unu el la plej prosperaj aziaj landoj; sed ĝi kruele suferadis dum tiu milito, kaj poste pro internaj konfliktoj, kaj do malriĉiĝis. Feliĉe, ĝi havas propran petrolon kaj naturan gason, kaj espereble reprosperiĝas. Ĝi ankaŭ havas multajn vidindaĵojn, precipe mirinde grandskalajn pejzaĝojn, kaj budhismajn templojn; la urbo Pagano estas nomita "La Urbo de Mil Temploj".

Esperanto ankoraŭ ne enradikiĝis en Birmo, kvankam okazis jam en 1959 iom da pionira aktivado tie.

Ŝajnas, ke antaŭ longa tempo, eble dum la tempo de la dinastio Pagan, kiu enkondukis budhismon en Birmon kaj regis dum la 11-a ĝis la 13-a jarcento p.K., ekzistis kutimo, ke la reĝo distingis siajn plej erudiciajn klerulojn, indajn por instrui en universitato, per oraj kolumoj, kaj tiaj eminentaj kleruloj indikis siajn domojn per specialaj flagoj.

Nuntempe ekzistas subspecioj de katoj, tre belaj, kiujn bredistoj nomas «birmaj» (mallongharaj) kaj «sanktaj birmaj» (longharaj); sed estas tre dube, ĉu ili fakte devenas de Birmo. Tamen, dum frua epoko la birmanoj jam konis la ruzecon de tiu besto, kiel atestas amuza fabelo.

La Kato, kiu Kondutis kiel Universitata Profesoro

Iam, du maljunaj geedzoj kunvivis sufiĉe bone; sed infanojn ili ne havis, kaj la maljunulino tre amis kaj karesadis la hejman katon. Bone ŝi kuiris, kaj prudente ŝi observis ordan rutinon en la hejmo. Inter aliaj taskoj, ĉiumatene ŝi fritis spicitan kokidaĵon, kaj rostis viandopecon; ŝi disdonis porciojn al la edzo, la kato kaj si mem por la tagmanĝo, kaj rezervis parton por la vespermanĝo.

La kato havis bonan apetiton, kaj ne volis atendi la vespermanĝan horon. Unu tagon, kiam la geedzoj dormetis dum la plej varmega horo, la kato ŝteliris en la kuirejon kaj manĝis la tutan rostajaĵon kaj grandan parton de la fritajaĵo. Poste, ĝi zorge lavis la vizaĝon kaj piedojn, kaj kiam la geedzoj vekiĝis, la kato dormis trankvile en la ombro de bananarbo.

La maljunulino ve-spiris, kaj kuiris ion alian por la vespermanĝo. Sed tiu mistera ŝtelo okazis plurfoje, ĝis la maljuna viro eksuspektis, ke la kato, malgraŭ senkulpa mieno kaj amikaj ronroj, estas la ŝtelinto.

“Ho, ne, ne, neniam!” protestis la maljunulino. “Mia bela, bona, dolĉa kaĉjo neniam kondutus tiel fie!”

La edzo ne volis kvereli, sed kviete iris al la bazaro, kaj revenis kun du potoj, kiuj havis kolojn mallarĝajn.

“Pro kio vi aĉetis ekstrajn potojn?” demandis la edzino, skrapante kokosokarnon por prepari nuksolakton por la rizo. “Mi jam havas sufiĉajn.”

“Kara mia,” diris la edzo, “vi scias, kion mi suspektas; sed mi volas esti justa. Nu, mi petas vin, morgaŭ matene prezentu la kokidaĵon en unu el ĉi tiuj potoj, kaj la rostitan viandon en la alia; kaj iam dum la posttagmezo ni eble vidos ion interesan.”

La edzino volonte obeis, kaj post la tagmanĝo la paro, kiel kutime, iris iom dormeti — ĝis laŭtaj frapoj kaj panikaj miaŭegoj sonis subite el la kuirejo kaj vekis ilin.

La edzo kaptis bastonon kaj kuris al la kuirejo; la edzino sekvis. Jen la kato, kiu, puŝinte sian kapon en poton, kaj ekmanĝinte la rostitan viandon, ne povis eltiri sin, kaj batis la kapon de unu flanko al la alia sur la tablo, ĝis, retropaŝante, ĝi falis.

“Ho, kara! Ne mortigu la povran kaĉjon! La beata Budho ordonis, ke ni penu ne suferigi ion vivantan!”

“Jes, kaj unu el liaj Kvin Preceptoj estas, ‘Ne prenu ion, kion oni ne donis al vi.’ Mi nur batos la katon, por doni al ĝi valoran moralan lecionon! Fia kato!” Sed lia unua bato maltrafis la katon kaj frakasis la poton.

La kato nun vidis la pordon, kaj forkuris fulme rapide, kun la rando de la poto ankoraŭ ĉirkaŭ la kolo. Ĝi kuris, tute timoplena, ĝis ĝi estis du-tri kilometrojn distance de la domo, kaj proksime al la arbaro. Tiam ĝi plu ne rapidis kiel sago apenaŭ videbla, sed tro-tis. Kiam ĝi pasis la bikŝuejon, kelkaj junaj novicoj, en siaj safrankoloraj roboj, vidis ĝin; unu fingromontris ĝin, alia puŝis sian kamaradon, kaj unu diris, “Ha ha ha! vidu profesoron Katon, kun sia honor-kolumo!” La aliaj knaboj ridegis, kaj faris tian bruon, ke unu el la bonzoj elvenis, kaj riproĉis ilin, ĉar junaj bikŝuoj devas bridati sin. Dume, la kato daŭre kuris, sed tiuj vortoj restis en la kapo.

“Jes, profesoroj ja portas pezajn kolumojn. Nu, se nur mi havus profesoran flagon, kaj ian libron...” Ĝi kaŝis sin en la arbaro.

Noktomeze, ĝi revenis al la hejmo, kaj serĉis ion utilan. Ĝi trovis malnovan pergamenan libron, kaj inter la flikendaĵoj trovis pecon el malnova jupo de la dom-mastrino. Ĝi ankaŭ trovis iom da rostaĵo en pelvo, kaj purigis kaj poluris la pelvon, ne kun intenco helpi la dom-mastrinon. Poste ĝi foriris same silente kiel ĝi eniris, portante la libron kaj la ŝtofopecon.

Ĝi elektis grandan arbon, kun kava trunko, apud rivereto en la arbaro. Sur branĉon de la arbo ĝi pendigis la ŝtofopecon kiel profesoran flagon; la kavon ĝi aranĝis kiel komfortan hejmon.

Multaj birdoj loĝis sur la bordoj de la rivero; familioj de sovaĝaj anasoj, galinuloj, verdaj pigoj kaj birmaj fazanoj. Unue la alveno de la kato maltrankviligis la birdojn; sed, kiam ili rimarkis, ke ĝi tute ne sekvas aŭ gvatas ilin, sed nur kaptas fiŝojn foje en la rivero, ili retransviligis. Baldaŭ ili interkonsentis, ke estas honoro, havi erudician profesoron sur la bordo de la rivero.

Profesoro Kato konstante mienis tre digne. Ĉiutage li sidadis sub la arbo dum kelkaj horoj, ŝajne legante la malnovan pergamenan libron kaj recitante gravajn tekstojn. Tio tre imponis al la birdoj. Fakte profesoro Kato nur ronronadis siajn proprajn pensojn, ekzemple:

“Spic-fritaĵoj –
Ĝoj’ por mi;
Sed rostita
Karn’ eĉ pli.

Malaperis
Nur duono –
Venis mastro
Kun bastono...

Mi ne legas
Pergamenon;
Mi atendas
Birdan venon!

Fritu, rostu,
Ĉio ravas;
Spica, kruda,
Ja ne gravas!”

Post kelkaj tagoj la sovaĝaj anasoj montris sian plenan fidon al profesoro Kato, petante lin akcepti ilian solan filon kiel studenton. Baldaŭ ĉiuj birdfamilioj sendis junajn birdojn studi sub lia gvidado. Profesoro Kato asignis branĉon ĉe la arbopinto al studento Pigo, branĉon iom malpli altan al studento Fazano, mezaltan branĉon al studento Galinulo kaj branĉon preskaŭ sur la tero al studento Anaso, por ke ili multe studadu sub lia disciplino. Kaj li komencis ŝajnigi, ke li gvidas kursojn kaj faras kelkajn testojn.

Post kelkaj tagoj, profesoro Kato diris al la anasido, “Studento Anaso, vi tre bone progresas, kaj mi rimarkas en vi neordinarajn talentojn. Mi intencas specialigi vin, kaj vi povos iĝi vere eminenta fakulo pri medicino. Ĉi-vespere, venu al mia privata studejo en la arbokavo, kaj ni komencos studojn, kiuj tute ŝanĝos vian vivon.”

Studento Anaso sentis grandan ĝojon kaj fieron; venis vespere al la kavo; kaj baldaŭ sidis etan distancon sub la profesora kolumo.

Matene, profesoro Kato anoncis, ke studento Anaso montris brilan talenton por siaj medicinaj studoj. “Mi jam kuraĝigis lin, iom fari originalajn fakajn esplorojn; frumatene li ekiris en la arbaron, por serĉi certajn medicine valorajn foliojn kaj radikojn.” Antaŭ la vespero, profesoro Kato parolis serioze al studento Galinulo: “Vi, studento Galinulo, montras multan talenton, kaj mi opinias, ke la fako, en kiu vi rapide iĝos eminenta, estas juro. Ĉi-vespere, venu al mia privata studejo, kaj mi komencos gvidi viajn specialajn studojn.”

Kompatinda studento Galinulo iris en la arbo-kavon, kaj profesoro Kato formanĝis lin. Matene, profesoro Kato anoncis, ke studento Galinulo montris sin tiel promesplena kiel estonta juristo, ke li forsendis lin por viziti kelkajn tribunalojn kaj observi procedurojn kaj problemojn.

Baldaŭ profesoro Kato parolis serioze al studento Pigo: “Vi, studento Pigo, montras grandajn talentojn; sed mi ne konsilas al vi studi medicinon aŭ juron. Viaj talentoj taŭgas por beletristiko. Ĉi-vespere, venu al mia privata studejo, kaj mi komencos gvidi viajn specialajn studojn.”

Sed profesoro Kato malatentis ion. Kvankam ili ne estas sam-speciaj, pigoj kaj fazanoj ofte amikiĝas; kaj la du studentoj, la verda pigo kaj la longvosta, verdbrusta fazano, estiŝ intimaj amikoj, kaj konstante kunestis.

Tial, kiam studento Pigo eniris la privatan studejon de profesoro Kato, studento Fazano atendis ekstere, tre proksime. Baldaŭ la fazano aŭdis terurplenan “Gra-a-a-ak!” Li tuj flugis en la kavon, vidis la amikon en la buŝo de la kato, kaj atakis la katon de malantaŭe, per bekofrapoj kaj flugilaj batoj. La kato lasis la pigon forflugi, kaj turnis sin por sin defendi. La pigo per sia forta beko mordis lian dorson ĝis sango ekŝprucis. La du amikoj kune tiel bekis kaj batis, ke profesoro Kato saltis el la arbokavo kaj forkuris. Li kuris tiel panike, ke li kuris rekte en la riveron.

Katoj povas bone naĝi, sed profesoro Kato portis pezan kolumon. La kolumo tiris lin al la fundo, kaj li dronis.



Novaj Proverboj

Ĉiutaga sapo, aŭ ĉiusemajna skrapo!

Ne devigu vian gaston, partopreni vian faston.

Ne demandu al pulo, pri ĝia matrikulo.

Destinon parte ni heredas; sed parte nian propran knedas.

Por Bird-Amantoj

Inter la organizaĵoj kunlaborantaj kun UEA, ekzistas *Ornitologia Rondo Esperantlingva*, kiu havas gazeton, *La Mevo*, kaj en 1961 eldonis terminaron pri eŭropaj birdoj.

Pensigaj Vortoj

“Napoleono iam diris: ‘Mono, kaj denove mono!’ Sed mi diras, ke por ke ni estiĝu homoj, tri aĵoj estas necesaj al ni: libroj, libroj kaj denove libroj!”

Petko Slavejkov, bulgara poeto kaj sociaganto (1827–1895).

“Tiri la torturilon el la mano de torturisto servas ne nur la viktimon, sed ankaŭ la torturiston.”

Paul Oestreicher, germano, laboranta plejparte en Britujo, granda laboranto por viktimoj de maljustaĵoj, ankaŭ por pli bona interkompreno inter kristanoj kaj marksistoj.

“Vivu, kiel vi volas, ĉar vi estas mortanta. Amu kion ajn vi volas ami, ĉar vi estas disiĝonta de ĝi. Faru, kion vi volas; vi estas pagonta.”

Abu Mahometo al Gazali, araba teologo kaj filozofo (1058–1111).

La Mirinda Naturo

Nur de moluskoj, ekzistas ĉirkaŭ 60 000 diversaj specioj.

De insektoj, probable ekzistas trioble pli multaj specioj, ol de ĉiuj specioj de aliaj vivantaj estaĵoj sur la Tero. Ĝis nun sciencistoj

identigis 700 000 diversajn speciojn, kaj scias, ke multaj aliaj restas ne-esploritaj. Probable ekzistas, por ĉiu homo sur la terглоbo, miliono da insektoj, kiuj kune pezas dekduoble pli ol tiu homo!

Laŭ fosilioj, la plej granda insekto en la mondhistorio estis speco de libelo, kies larĝeco de flugilpinto al flugilpinto estis sepdek centimetroj! Tiu specio pereis antaŭ jarmiloj; nun la plej granda libelo estas sud-amerika libelo, dek naŭ centimetrojn larĝa.

La plej peza insekto nun vivanta estas la goliato, koleoptero de ekvatora Afriko; bona specimeno (vira) povas pezi cent gramojn.

Semantiko

Oni fotis en 1979 anoncon en butika fenestro en Aŭstralio:

ANTIKVAĴOJ FARITAJ LAŬ VIA MENDO (Modernaj metodoj)
--

Versareto – pri ses vortoj foje intermiksitaj

PLENDO

“Ĉiu dommastrino deziras finan solvon:
kiel plej facile mi forigu *polvon*?
Kun akvopelvo strebi, la dorson tre lacigas,
kaj ankaŭ la genuojn kaj *pelvon* dolorigas;
la purigado tedas; mi ofte pro klopodo
min sentas kiel *pulvo*, preta por la eksplodo!
Edzo atendas manĝon, ŝtrumpoj atendas kudron;
la bebo veas vigle kaj ne-atendas *pudron*;
bezonas ni *pulvoron* por lavi *puloverojn*,
alian kontraŭ puloj aŭ por lavi la telerojn.
Sed dum laboro troas, kaj tedas, io mankas:
neniu en la hejmo laŭdetas min aŭ dankas.”

32. INTERSPECIAJ AMIKECOJ [1]

Laŭ multaj proverboj, hundoj kaj katoj malamas unu la alian. “Katoj kaj hundoj ne kunestas sen vundoj”, diras germanoj; “kata kaj hunda vivo” estas por rusoj, judoj, italoj, angloj, usonanoj, germanoj, francoj, kaj eble aliaj, vivo kvereloplana. Por zuluoj, akra malamo estas “de hundo kaj kato”; por jamajkanoj, “kato kaj hundo neniam interkonsentas”. Bohemoj kaj poloj avertas nin, “Ne ŝercu kato kun hundo”. Ĉinoj diras, “Se la hundo foriros kiam la kato alvenos, ne okazos kverelo.”

Sed pli proksima al la vero estas la hungara proverbo, “Post tempo, eĉ hundo faras kompromison kun la kato”. Fakte, kvankam hundoj emas ĉasi nekonatajn katojn, kaj foje oni vidas katon, kiu ĉasas hundon, ekzistas miloj da hejmoj, en kiuj hundo kaj kato, aŭ eĉ hundoj kaj katoj, loĝas kune kamaradece kaj donas belan ekzemplon al ni homoj. Ne malofte ili dormas en la sama korbo. Ili defendas unu la alian kontraŭ la atakoj de aliaj bestoj. Kvankam preskaŭ ĉiuj bestoj pasie defendas siajn idojn, hundo kaj kato, edukite kune, povas fidi unu al la alia pri la idoj. Anglo raportis en 1979 pri hundo, kiu, kiam la hejma katino naskis katidojn, montris grandan ĝojon kaj intereson. Kiam la kato volis promeni en la ĝardeno, la hundo deĵoris kiel vartisto; ĝi ne nur kuŝis apud la katidoj kaj tenis ilin varmaj, sed leke lavis ilin laŭ katina stilo.

Katinoj ofte mamnutris orfajn hundidojn, kaj hundinoj orfajn katidojn. Venis el Usono raporto pri hundo, kiu grumblis, kiam iu karesis ĝin. Kial? Ĝi alvenis en la hejmon kiel eta hundido; la siama katino, kiu ĵus perdis sian katidaron, tuj komencis patrine varti la hundidon, kaj la du bestoj iĝis nedisigeblaj amikoj. Sed la hundo grumblis, karesite — ĉar ĝi lernis la katan kutimon, ronroni!

En la lasta jarcento angla ĵurnalo raportis pri hunda kuracisto! Kato, Riĉjo, iel glutis kudrilon kun fadeno, kun sia manĝo. Karlo, la hejma hundo, kuris al la suferanta kamarado, kaj iel ili iom komprenis unu la alian. Karlo komencis leki la kolon de Riĉjo. Riĉjo etendis la kolon kaj deturnis la kapon, por faciligi tiun kuracadon.

Dum preskaŭ 24 horoj la du bestoj restis kunĉ kaj la hundo, paŭzante foje nur por ripozeti, konstante lekadis la kolon de la kato, kaj foje forte premis ĝin per la lango, kvazaŭ serĉante la pinton. Finfine, la hundo tute skuiĝis pro ekscitiĝo, kaptis la kudrilon inter la dentoj, kaj sukcesis treni ĝin tra la kol-haŭto de la ankoraŭ trankvile permesanta kato. Post lasta sku-tiro, Karlo lasis la kudrilon pendi sur la kolo per la fadeno, kiun miranta apuda homo facile eltiris; kaj la suferoj de Riĉjo finiĝis.

Anglo raportis en 1980 pri familio, kie du hundoj, kvin katoj kaj erinaco kunvivas kamaradece. Kiam la sinjorino promeniĝas la hundojn, du el la katoj kaj la erinaco insistas akompani ŝin.

Sed multaj divers-speciaj bestoj povas amikiĝi. En 1958, oni raportis, kun fotoĵoj, pri damaino, kiu ame prizorgis katidaron, kiam ilia patrino ekskursis por ĉasi musojn; kaj pri granda ŝafhundino, en la bestĝardeno en Berlino, kiu patrinece amis tigridon. En bestĝardeno en Anglujo, rinocerino ame prizorgis kapreolidon, kiam la patrino vagis por manĝi. Samlande, oni raportis en 1980 pri hejma kato, kiu amikiĝis kun strigo. Vespere, la strigo alvenis kaj huis; la kato respondis al tiu alvoko, eliris, kaj verŝajne la du kamaradoj ekskursis kune por ĉasi musojn. Kaj en parko apud Londono, pigo kaj sciuro estis konstante kune; la pigo flugis iomete super la sciuro.

En 1958, terkultivisto en Rodezio (nun Zimbabvo) rimarkis, ke liaj du ŝafhundoj rilatas tre amike kun kaprino. Baldaŭ li rimarkis plu, ke unu hundo senmorde kaptis ŝin per kruro, tiel ke la alia hundo povu refreŝiĝi per lakto! Poste, la sensoifigita hundo siavice tenis la kaprion, por ke la kamarado suĉu; kaj ĉion la kaprino toleris tute amike. Kaj en Parizo samjare, iu havis en granda apartamento leonon kun hundido; ili kutime dormis en la sama korbo.

En bestĝardeno en Britujo, terhundo amikiĝis kun leopardido, kaj loĝis en ĝia kaĝo. Kiam la best-gardisto ektimis, ke eble la kreskanta leopardido ekagresos kontraŭ la kamarado, li forprenis la hundon. Sed ambaŭ bestoj tiel sopiregis unu al la alia, ke ili rifuzis manĝi kaj preskaŭ mortis; oni devis remeti la hundon en la kaĝon.

Similan kazon oni detale raportis en 1892, pri linko, kiu tre amikiĝis kun kuniklo. La kuniklo sidadis tute trankvila en kaĝo en bestĝardeno. Iu metis ilin en la saman kaĝon, kiam ili estis tre

junaj. La linko, kompreneble, estis karnmanĝanto; sed kiam oni donis al la kuniklo brasiko-foliojn, ofte la linko ŝajnis manĝeti foliojn, kvazaŭ pro kamaradeco. La du bestoj ludis kune; la linko speciale ŝatis la interese longajn, moviĝemajn orelojn de la kuniklo, kaj ofte ludis kun ili. Kiam la kuniklo mortis pro ia malsano, la linko tiel funebris, ke ĝi rifuzis manĝi kaj preskaŭ sekvis la amikon. Inteligenta best-gardisto savis ĝian vivon, translokigante ĝin al alia parto de la best-ĝardeno; tie, vidante novajn vidaĵojn kiuj stimulis scivolemon, ĝi revigliĝis.

Ĉirkaŭ 1842, kato nutris tri orfajn vulpidojn; en Svedujo en 1980, junulo edukis orfan lupidon kun sia hundo, kaj baldaŭ ili amikiĝis, kaj ĉiutage promenis kune. En 1967, oni raportis pri kato, kiu amikiĝis kun poneo en karb-minejo; la du bestoj manĝis kaj dormis kune en stalo, kaj kiam la poneo ekdeĵoris, la kato eksidis ĉe la stalo-pordo kaj atendis; ĉiuvespere ĝi kuris por renkonti sian kamaradon, ronronante ĝoje. En 1979, germana arbaristo savis kapreolidon, kiun hundo vundis en arbaro, kaj donacis ĝin al best-amanta amiko; ties granda skota ŝafhundo tuj ekvartis la kapreolidon, kaj la du bestoj firme amikiĝis. Angla katino vartis jaguaridon kune kun siaj tri katidoj; eĉ pli surprize, okjara ĉimpanzino, en Usono, adoptis kapridon kvazaŭ propran filon kaj tre ame prizorgis ĝin; eĉ nutris ĝin per laktobotelo, kaj, ĝis la kaprido iĝis tro granda, portadis ĝin surdorse dum grimrado inter la arboj. Usona hundo amikiĝis kun prociono, sud-afrika hundo kun pigo; oni raportis pri ambaŭ en 1980.

Ĵurnalo ĉirkaŭ 1860 rakontis pri besta grandanimeco, kiam ne temis pri daŭra amikeco: en Londono, kelkaj kruelaj buboj ĵetis katon en Tamizon. Sinjoro, kiu promenigis sian terhundon, rimarkis la baraktantan katon kaj atentigis sian hundon. La hundo tuj saltis en la riveron, naĝis al la kato kaj penis kapti ĝin; sed la panika dronanto kredis sin nun en duobla danĝero, kaj ungis la hundon plurfoje. La nobla hundo plurfoje revenis, finfine kaptis la katon per la dika parto de la vosto, kaj trenis ĝin al la bordo. Ne mirinde, ke la apudstarantoj tiumomente hurais.

Foje evoluas vere strangaj amikecoj inter karnmanĝantaj bestoj, kaj bestetoj, kiuj pli kutime estas ilia predo. Sufiĉe ofte, katoj vivas tute amike kun hejmaj bestoj kiel hamstroj, kunikloj aŭ eĉ musoj, se ili rekonas ilin kiel aliajn anojn de la familio. Tiaj amik-

ecoj ĝojigas ĵurnalajn fotografistojn; ekzemple, en Anglujo en 1979 aperis fotoĵoj pri kato, kies musa amiko rajtis grimpi sur la katan kapon; kiel iu ŝercis, “danĝera ŝajnas la Katerhorno”. En 1967, la posedantino de melopsitako ektimis, vidante sian katon apud la kaĝo; sed baldaŭ ŝi perceptis, ke la melopsitako metas la bekon tra la kaĝajn stangetojn kaj amike tiras harojn en la kataj oreloj; la kato intence premis sian kapon al la kaĝo por ĝui tiun neordinaran kareson.

Ĉirkaŭ 1870, kato savis la vivon de hejma birdo. La posedantino kutimis ellasi la birdon el la kaĝo ĉiumatene por pli bona ekzerciĝo. Ŝia kato montris amikecon al la birdo kaj neniam atakis ĝin. Sed unu matenon, kiam la birdo bekis panerojn sur la tapiŝo, la kato subite alkuris, kaptis la birdon en la buŝo kaj saltis sur altan meblon. La sinjorino estis konsternita, ĝis ŝi rimarkis, ke fremda kato estas en la ĉambro. “Huŝ, huŝ!” — ŝi elpelis la fremdan katon kaj fermis la pordon. Tuj la hejma kato resaltis al la planko, kaj liberigis la birdon, tute sendifektan kaj ŝajne sentiman.

En angla bestĝardeno, en 1958, okazis iu eta krizo, kaj iu metis du katojn en kaĝon de kolomboj. Oni iom timis pri la kolomboj, sed volis eviti pli gravan akcidenton, eble al iu rara birdo. La katoj kaj la kolomboj tamen amikiĝis tiel bele, ke finfine ili vartis siajn idojn kune.

Unu el la plej konataj tiaj amikecoj en la mondo de la sovaĝa naturo estas tiu inter la malgrandaj egiptaj pluvioj, kaj la grandaj krokodiloj. Tiuj pluvioj ne timas krokodilojn kaj la krokodiloj ne manĝas ilin, sed permesas al ili kuri en la vastajn faŭkojn kaj serĉi nutraĵojn tie. Multaj observantoj kredis, ke la birdetoj igas la krokodilojn pli komfortaj, purigante iliajn dentojn; sed nuntempe sciencistoj opinias, ke pli probable la pluvioj manĝas hirudojn, kiuj fiksiĝis al la krokodilaj langoj.

En oktobro 1976, ĵurnala fotoĵo montris junan ĉimpanzon, kaj leopardidon, kiuj ĉirkaŭbrakas unu la alian. Ial, ambaŭ patrinoj forlasis la idojn, kaj la du bestinfanoj tiel amikiĝis, ke ne estis eble disigi ilin.

Kelkfoje, oni povus preskaŭ suspekti, ke bestoj, kiel ni, sentas la ĉarmon de pli malgrandaj bestoj kaj kvazaŭ iniciatas amikan rilaton. Usona profesoro pri psikologio, d-ro Michael W. Fox, kiu estas ankaŭ veterinaro kaj konata specialisto pri besta psikologio,



Kiam la patrinoj forlasis la simieton kaj leopardidon, homoj prizorgis ilin, kaj ili iĝis neapartigeblaj amikoj en la bestĝardeno de Manĉestro, Britujo.

opinias, ke foje “dorlotbestoj bezonas dorlotbestojn”. Iam ĉe li mem loĝis samtempe du katoj kun kelkaj hundoj, lupoj kaj koĵoj. Sed li citis dommastrinon, kies kato portis en la hejmon junan sciuron, kaj ne manĝis ĝin, sed ludis kun ĝi. La sciuro vivadis, kun la kato, pli longe ol oni atendus por ĝi en la arbaro; post sep jaroj, la kato kaj la sciuro ankoraŭ ludis unu kun la alia. D-ro Fox mem fotis katojn, kiuj ludas amike kun musoj kaj ne vundas ilin.

Eĉ pli eksterordinaran amikecon oni raportis de la brita insulo Wight [ŭajt] ĉirkaŭ 1875. Sinjorino, promenante apud la marbordo, rimarkis belegan katidon, kiu dormis sur muska deklivo. Ŝi alproksimiĝis por karesi ĝin. Tinunkolo tuj fal-flugis, kaj ekstaris super la ankoraŭ dormanta katido, tute kaŝante ĝin. La sinjorino ŝokiĝis, kaj deziris savi la belan viktimon; sed tiu tinunkolo minace turnis la hokan bekon al ŝi, levis la grandajn flugilojn, aspektis furioza rabobirdo.

Pala, kun malsekaj okuloj, la sinjorino kuris al la plej proksima dometo — de fiŝistoj — kaj, anhelante, rakontis pri la kompatinda katido. La familio ekridis.

“Ĉiam okazas tiel! tiu «tur-falko» ĉiam alflugas, se iu proksimiĝas al la katido. Ĝi amas la katidon, kaj gardostaras, ĉiam, kiam la katido dormas.”

Ŝajnis tiel strange, ke la sinjorino iom esploris pri la historio. La patrino de la katido mortis, kaj la fiŝistoj intencis prizorgi la katidon, sed ĝi malaperis. Baldaŭ ili rimarkis, ke tinunkolo ofte ŝvebadas proksime al la dometo. Ili foje ĵetis al ĝi fragmentojn da viando, kiujn ĝi ne ĉiam tuj manĝis, sed foje forportis. Ili iom gvatis la rabobirdon, kaj finfine konstatis, ke ĝi regule portas viandopecojn sur la tegmenton de la dometo.

Iu supreniris sur ŝtuparo — kaj trovis sur la tegmento nestecan truon en la pajlo, kaj en la truo la katidon, bone nutritan kaj kontentan. La tinunkolo adoptis ĝin.

La grimpanto reportis la katidon en la hejmon; sed la tinunkolo daŭre montris amikan intereson pri ĝi, kaj tuj alflugis por protekti ĝin, se alvenis ia danĝero.

Novaj Proverboj

Envio vidas strabe, envio iras krabe.

Tro rigora cenzuro — en si mem, malpuro.

Pasie amata sune belas; amiko ofte pli fidelas.

Ĉiuj gepatroj ofte eraras; preskaŭ ĉiuj bonintence faras.

Versareto pri ‘kvazaŭ’

Poeto rajtas foje allasi *kvazaŭrimojn*,
kaj tamen tre artisme li verkas la poemojn;
Kvazaŭpoeto rimas per rimoj plej perfektaj
sed poemaĉoj restas banalaj aŭ afektaj.

Hometoj foje sidas sur burokrataj seĝoj,
kun plumoj kvazaŭ sceptroj, kvazaŭ malgrandaj reĝoj;
dum juste kaj ĝentile helpadas al publiko
alia burokrato, kvazaŭ popol-amiko.

Petro mienas ĉiam, kvazaŭ li estus pia;
Paŭlo priploras pekojn, kvazaŭ li estus fia;
Paŭlo konstante strebas al amo kaj al bono;
Petro aliajn juĝas, sed estas mem fripono.

Kuracista Takto

Pacientino, dolore konscia pri multaj indikoj de sia alta aĝo, timeme demandis al kuracisto: “Ĉu vi havas ion por grizaj haroj?”

Li respondis: “Sinjorino, nur la plej sinceran respekton.”

La sama kuracisto sugestis al alia paciento: “Vi certe fartos pli bone, se vi penos meti iom pli da sango en vian alkoholon.”

Jura Problemo

Doganistoj inter Federacia Respubliko Germanujo kaj Danlando havis belan problemon en 1978. Kamelino, kiu apartenis al sviso, sed estis importita el Azio, naskis kamelidon ĝuste sur la landlimo. La kamelido teorie ne ekzistis, ĉar ĝi ne troviĝis sur la doganaj dokumentoj; kaj ĝi ne ekestiĝis en iu ajn ŝtato.

Ĉu eble oni decidis, ke la kamelino rajtas kunporti ĝin kiel pakajon nur personan?

33. FABELO EL NOV-HEBRIDOJ

Nov-Hebridoj, kiuj plene sendependiĝis nur en 1980, estas insularo, parto de Melanezio: sepdeko da insuletoj, plejparte montaj kun multaj arboj, entute 14 763 kvadrataj kilometroj, sur la suda Pacifiko. La ĉefurbo estas Vila sur la insulo Efate. Preskaŭ ĉiuj loĝantoj estas melaneziaj indiĝenoj, plejparte terkultivistoj kaj fiŝistoj. Ili parolas diversajn melaneziajn dialektojn, kiuj apartenas al la lingvogrupo malaja-polinezia. Kiel la samoaj, la lingvoj uzas multajn vokalojn, kaj tre malofte du konsonantojn kune. La indiĝenoj parolas ankaŭ la francan aŭ la anglan, ĉar inter 1906 kaj 1980 francoj kaj angloj kune administradis la insularon.

Oni kultivas kokosarbojn kaj eksportas kopron; ankaŭ kultivas ignamojn, kolokasiojn, panarbojn kaj maniokon; kaj nuntempe eksportas multaj fiŝojn frostigitajn.

Ĝis 1980, Esperanto verŝajne tute ne atingis la insulojn.

La paganaj pacifikaj insulanoj havas apartajn religiojn, kiuj tre varias de insularo al insularo, eĉ de tribo al tribo. Ili kutime kredas je postmorta vivo (kelkloke nur por homoj, sed aliloke ankaŭ por porkoj kaj eĉ kokosoj) kaj je multaj dioj, aŭ herooj, aŭ spiritoj, kiuj rilatas al naturfenomenoj. La ĉefaj diecaj estaĵoj estas Tanga-roa kaj Quat. Verŝajne la melanezianoj plejparte kredas, ke la ĉielo, maro kaj tero ĉiam ekzistis. Sed multloke oni trovas ideon, ke en la pratempo la ĉielo estis multe pli proksima al la tero, kaj ial malproksimiĝis. Iu dio kreis la unuajn homojn el argilo, kaj enspiris en ili la vivon.

La nov-hebridanoj havas sian arton, precipe lignoskulptadon; foje ili starigas stiligitajn homajn statuojn, ĝis du- aŭ trioble pli altajn ol homoj. La arto kaj folkloro de la melanezianoj ŝajnas tre fremdaj al la plimulto de alilandanoj, eĉ tiuj, kiuj kutime pensas iom internaciece; sed ĝuste tial, ili povas esti freŝe interesaj. Jen unu el la fabeloj de la nov-hebridanoj.

La Edzino de la Suno

La Suno havis multajn edzinojn. La plej bela estis Banihi-mamata, kaj ŝi havis fileton.

Banihi-mamata kaj ĉiuj edzinoj de la Suno iam deziris ĉerpi akvon el la maro. Ili flugis per siaj flugiloj al la tero, kaj ĉerpis sufiĉan mar-akvon. Poste ili deziris naĝi en la maro; do ili deprenis siajn flugilojn, demetis ilin sub arbon, kaj kuris en la maron.

Dum ili banis sin, la granda Takaro, reganto de la Mallumo, aŭdis la ĝojkriojn kaj plaŭdojn, ŝteliris por kaŝrigardi, kaj konstatis, ke Banihi-mamata estas la plej bela. Li rampis al la flugiloj, ŝtelis la flugilojn de Banihi-mamata, forrampis kaj poste kuris hejmen. Li kaŝis la flugilojn en la tero, apud la pordo-fosto.

La edzinoj de la Suno, naĝinte, kuris el la maro kaj reprenis siajn flugilojn; sed Banihi-mamata ne trovis la siajn. La aliaj edzinoj forflugis al la Suno, dum Banihi-mamata sidis sur la strando kaj amare ploris; ploris ankaŭ la infano.

Nun Takaro alkuris, mienis kvazaŭ helpeme, kaj demandis, “Kial vi ploras?”

“Miaj flugiloj malaperis!”

“Ho, ve! Ni serĉu ilin!”

Li ŝajnis, ke li helpas ŝin serĉi, ĝis la suno subiris. Tiam li invitis la virinon alkonduki sian knabeton al lia hejmo. “Vi povos loĝi ĉe mi, kaj helpi mian patrino.” Banihi-mamata devis konsenti. Ili akompanis Takaron al lia hejmo; li prezentis ilin al la patrino.

“Jen, ĉi tiu virino, kaj ŝia infano, povos helpi en mia ĝardeno; kaj ni povos nutri kaj ŝirmi ilin. Morgaŭ mi devos viziti la okcidentan marbordon; do, vi klarigu al ili, kion fari en la ĝardeno.”

Matene la patrino donis al la malgaja Banihi-mamata kaj ŝia fileto ion por manĝi, kaj kondukis ilin al la ĝardeno.

“Unue ni sarku la ignamo-bedojn.”

Ĉiuj tri eklaboris sur la ignamo-bedoj.

Sed la fileto de la Suno baldaŭ deziris ludi. Li plukis ignamofoliojn, premis ilin inter la fingroj, kaj diris al ĉiu:

“Kresku, kresku, peco eta,

kresku al ignamo preta!”

Tuj la folioj ekkreskis, kaj iĝis malgrandaj ignamoj. Ili kreskus plu; sed ĝuste kiam la knabeto tenis malgrandajn ignamojn en la mano, la patrino de Takaro turnis sin kaj vidis ilin. Ŝi ekkoleris.

“Stulta knabo! Vi malŝparas la ignamojn! Ili ne estas maturaj!”
“Sed mia fileto...”

“Ankaŭ vi, malsaĝa fuŝulino! Kial vi ne atentis vian stultan fian filaĉon? Vi povos pluki ignamojn kiam Takaro ĉeestos kaj povos instrui vin; sed nun vi kaj la bubo ŝiras ilin kiel rabistoj el alia insulo.”

“Mia filo estas sunido, kaj nur...”

“Kaj ne levu vian kapon kontraŭ mi, fremdulino! Detenu la manojn de ignamoj, kiuj ne estas viaj!”

Kaj la patrino de Takaro tiel riproĉadis kaj insultadis, ke finfine Banihi-mamata prenis la manon de la fileto, kaj ili kuris al la domo. Tie Banihi-mamata sidiĝis sur la tero, apogis sian kapon sur la pordo-foston, kaj ploregis. Kaj la knabeto ploregis kun ŝi.

Iliaj larmoj faladis sur la teron, kaj faris truon, tian, ke subite Banihi-mamata vidis belajn brilantajn plumojn. Ŝi ekfosis per la manoj, kaj retrovis siajn flugilojn.

“Niaj flugiloj, niaj flugiloj! Ni tuj flugu for al la Suno!”

Ili prenis la flugilojn, kuris al la marbordo, refiksis la flugilojn kaj forflugis tuj, supren, supren al la Suno.

Kiam Takaro revenis de la okcidenta marbordo, kaj ne vidis ilin, li demandis al la patrino, “Kie estas tiuj virino kaj fileto, kiujn mi lasis ĉe vi?” — “Ili tre fuŝe laboris en la ĝardeno, kaj kiam mi riproĉis ilin, ili ploraĉis kaj reiris al la domo.” Takaro kuris al la domo; kiam li trovis, ke la flugiloj malaperis, li laŭte lamentis.

“Mi ne povas sekvi ilin; mi ne havas flugilojn. Kiu helpos min?”
— Li vokis la alcionon.

“Alciono, vi havas flugilojn; flugu al la Suno, kaj serĉu la belan Banihi-mamatan tie.”

La alciono flugis tre alten, ĝis ĝi atingis la Sunon, kaj eksidis sur migdalarbo. De tie ĝi baldaŭ vidis Banihi-mamatan, kiu kolorigis folio-matojn. La alciono plukis migdalon kaj bekis sur ĝin bildetojn de Takaro, alciono, Banihi-mamata kaj la fileto. Ĝi superflugis la matojn kaj faligis la nukson.

La knabeto prenis la migdalon, kaj montris ĝin al la patrino. Ŝi komprenis, pri kio temas. “Alciono!” — La alciono flugis al ŝi. “Kial vi venis al mi?” — “Takaro deziras, ke vi revenu.”

“Ne, mi ne revenos al li; sed li venu al ni. Vi kaj li venu ĉi tien, kaj tiam ni iros kun li al lia hejmo.”

La alciono portis tiun mesaĝon al Takaro. Unue li nur lamentis. “Kiel iri al la suno sen flugiloj?” Sed finfine li konsultis sian ventron, kaj elpensis planon. La vojo, per kiu la edzino de la Suno reflugis, ankoraŭ brilis en la aero.

Takaro laboris rapide. Li ordigis sian paf-arkon; li tranĉis kaj pintigis cent kanojn kaj lerte enmetis en ilin pecojn da filik-arbaj folioj. Poste li portis ĉi tiujn cent sagojn al la marbordo, staris ĝuste sur la loko, de kie Banihi-mamata flugis for, kaj kiel eble plej forte pafis laŭ la brila vojo en la aero. La sago fiksiĝis en la Suno. Li tiel pafis, ke la dua sago fiksiĝis ĝuste en la unuan sagon, kaj la tria en la duan; finfine la centa sago fiksiĝis en la naŭdek-naŭan, kaj tuta maldika stango el sagoj staris inter la Suno kaj la Tero.

Tiam Takaro metis peceton da banjanarba radik-branĉo inter la marbordajn ŝtonetojn, ĉe la piedo de la saga stango, kaj diris al ĝi:

“Kresku, kresku, pec’ radika,
longe longa, dike dika.”

La banjanopeco ŝvelis kaj longiĝis, kreskis kaj kreskis flanke de la sagoj, ĝis ĝi atingis la Sunon, kaj la alia finaĵo enradikiĝis en la tero de la Suno.

“Ha,” kriis Takaro, “jen mia ŝtuparo! Mi venas por forpreni vin, Banihi-mamata!”

Li surmetis siajn plej belajn konko-bidojn, ŝmiris sin per bonodora unĝento, kaj grimpis supren, supren, ĝis li atingis la Sunon.

“Do, mi ja venis por vi; nun vi devas veni kun mi.”

“Prenu la malgrandajn matojn, fileto, kaj mi portos la grandajn,” diris Banihi-mamata senproteste. Kaj ĉiuj kvar staris ĉe la supro de la banjan-ŝtuparo.

“Do,” diris Takaro, “ek, malsupren!”

“Ne,” diris Banihi-mamata, “vi kaj la birdo iru unue, kaj mi kaj mia knabo sekvos.” Ĉar ŝi havis hakilon kaŝitan sub la robo.

Do, la alciono eksidis sur la ŝultro de Takaro (ĉar ĝi jam flugis lacigan distancon), kaj Takaro unue prenis la banjanon kaj komencis malsupreniri. Tute bone Banihi-mamata sekvis lin, kaj la fileto venis laste.

Malsupren, malsupren, kaj la Suno iĝis malpli granda kaj varma, kaj la Tero iĝis pli granda kaj verda, ĝis la tri grimpantoj kaj la alciono troviĝis ĝuste sur la mezo de la banjano.

Subite, *hak!* Banihi-mamata tranĉis la banjanon kaj la apudan sagon per unu bato. Takaro falis al la Tero kaj tre kontuzis sin. La alciono etendis la flugilojn kaj bone alteriĝis. Kaj Banihi-mamata kaptis la manon de la fileto, kaj ambaŭ reflugis tuj al la Suno, de kie ili ĵetis la restantan radikopecon.

Takaro rigardis supren; sed la brila vojo jam malaperis, kaj li neniam plu povos pafi sagojn ĝuste en la Sunon.

Se Banihi-mamata ne estus tranĉinta la banjanon, eĉ hodiaŭ ni povus grimpi al la Suno kaj reveni.

Novaj Proverboj

Ne difektu skalpelon, spilante barelon.

Tirana arogo instruas pri mensogo.

Ne venos la venko al dormanto sur benko.

Amo povas esti duonblinda kaj absurda; malamo tute blinda kaj ankaŭ tute surda.

Realo por Johano — iluzio por Stefano.

Versareto – pri Frazoj kun Participoj

Uzu la participojn serene kaj kuraĝe,
sed *loku* participojn atente, iom saĝe!

“Rajdante sur la kampo, mia ĉevalo henis.”

Sur kiu best’ rajdante via ĉevalo venis?

“Ĉe la mortint’ preĝanta la monaĥin’ genuis.”

Mortint’ preĝanta vere iom surprize bruis.

“Batonte, miaj ovoĵ jam pretaj en pelveto...”

Kiun la ovoĵ batos? diru, aŭ ĉu sekreto?

Zorgu ke ĉiu vorto lokiĝu kun la sia

propra rilata vorto, kaj ne kun vort’ alia.

Lingvaj Bariloj

En 1977, geedza paro decidis vendi sian butikon en Sajgono, kaj forlasi Vjetnamujon por pasigi la restantajn jarojn en Francujo, kie ilia filino jam estis studentino.

Esperoplenaj, kuraĝe intencante adaptiĝi al fremda vivostilo, ili bone atingis Parizon; la filino loĝigis ilin kaj ili komencis lerni la francan lingvon. Ili estis laboremaj, kaj esperis denove prosperigi sin mem.

La edzo estis 48-jara, la edzino 44-jara. La filino, kvankam ŝi penis helpi ilin, estis ofte aliloke kaj ne povis konstante gvidi ilin tra Parizo aŭ tra la nova lingvo.

La geedzoj brave persistis dum dek ok monatoj, sed apenaŭ progresis. La franca lingvo tro malsimilis al la vjetnama. Kredeble multaj francoj estus montrintaj ian afablecon al ili, sed ne estis eble...

Tiuj malfacilaj verboj... tiuj prononcaj problemoj... tiuj tiel malsimilaj fraz-strukturoj...

En 1979, ili konstatis, ke malgraŭ grandaj penado kaj persisto, kvankam ili venkis dum la vivo tiom da aliaj malfacilaĵoj, ili ne kapablas lerni la francan.

Iel ili tamen sukcesis trovi la ĝustan stacidomon, kaj trafi vagonaron al Clermont-Ferrand. Vizitinda urbo: belaj ĉirkaŭaj pejzaĝoj; katedralo, universitato, longa historio. La du vjetnamoj ne bezonis peti informojn france, por trovi la faman ponton; ĝi estis 21 metrojn alta. Ili piediris al la pinto de la ponto; rigardis unu la alian; kaj man-en-mane saltis al sia morto.

En la Banko

Junulino prezentas ĉekon.

“Ĉu vi povas identigi vin?”

Ŝi rigardas sin en la speguleto el la man-saketo.

“Jes ja; nepre estas mi.”

Niaj infanoj

Knabeto diris, “Kiel malsaĝaj estas la arboj! Ili deprenas siajn vestojn vintre kaj surmetas ilin somere!”

Ĉe la tablo, panjo donis al la knabineto flugilon de la rostita koko. Post iom da tranĉila-forka baraktado, la etulino ĝentile demandis, “Panjo, ĉu mi rajtas ricevi alian pecon? Ĉi tiu peco konsistas nur el *ĉarniroj*.”

34. INTERSPECIAJ AMIKECOJ [2]

Eble la plej stranga fakto pri interspeciaj amikecoj estas la kapablo de la multrilate unika Homo, amikiĝi kun tre diversaj specioj.

Ni povas konduki hontinde malbone kontraŭ aliaj bestoj. Certe ni devas almenaŭ estimi la principojn de tiuj, kiuj volas nenion mortigi; tion preskribas almenaŭ tri gravaj religioj, por almenaŭ parto de la sekvantaro: hinduismo kaj budhismo, kaj, plej rigore, ĝainismo, kiu malpermesas mortigon eĉ de insekto. Multaj homoj estas vegetaranoj, kiuj ne manĝas iajn ajn animalajn produktaĵojn, eĉ ne lakton aŭ ovojn.

Tiu, kiu opinias, ke bonaj rilatoj kun la aliaj specioj postulas tian abstinadon, povas trovi samideanojn en la Esperanto-movado; ligo de esperantistaj vegetaranoj fondiĝis jam en 1908, kaj ekde 1914 havas propran gazeton, *Esperantista Vegetarano*; la ligo estas nun *Tutmonda Esperanta Vegetarana Asocio*.

Tamen, ŝajnas dubinde, ĉu estas per karnomanĝado, ke ni kva-zaŭ perdas nian senkulpecon kaj apartigas nin de la natura mondo. Multaj bestoj manĝas aliajn: rabobestoj, rabobirdoj, rabofiŝoj, eĉ rabinsektoj. Araneoj kaptas muŝojn; aktinioj manĝas fiŝojn; eĉ kelkaj plantoj, ekzemple la dioneo, manĝas insektojn. Ŝajnas, ke predado havas grandan rolon en la natura mondo.

Unikaj ecoj de la Homo, kiu nature estas nek karnomanĝanto, nek plantmanĝanto, sed ĉionmanĝanto, kaj kredeble la besto plej adaptiĝema, rilate al dieto, estas, ke li kapablas elpensi sisteman, organizitan, ne nur instinktan, utiligadon de multaj aliaj specioj; kaj ke li kapablas havi konsciencan pri tiu utiligado.

Kredeble la plimulto de karnomanĝantaj homoj konsentus ke, minimume, bestoj bredataj por viando aŭ feloj estu bone traktataj ĝis ili devos morti; kaj ke tiu morto alvenu rapide, sen eviteblaj suferoj.

Simile, la homo tre progresis, kiam li lernis utiligi bestojn — bovojn, ĉevalojn, hundojn, elefantojn, poefagojn, kamelojn kaj

aliajn — por porti aŭ treni ŝarĝojn; sed estas abomene, turmenti ŝarĝbestojn per kruela vipado aŭ tro pezaj ŝarĝoj, aŭ neglekti ilian sanon kaj iliajn bezonojn. Bestĝardeno povas esti nobla sciencejo, kie fakuloj bonege prizorgas bestojn kaj studadas ilin, kaj la publiko povas vidi multajn interesaĵojn, aŭ hontida ekspluatejo de turmentataj bestoj, kies bezonojn oni ne sufiĉe atentis. Luksa pelta mantelo povas deveni de bone organizita best-bredejo, aŭ — de bestoj, kiuj mortis torturitaj en kruelaj kaptiloj. (Nuntempe, ekzistas multaj belaj, malpli kostaj, tre praktikaj «peltoj» el sintezaj fibroj — eble la plej bona solvo.)

Ekzistas vera morala dilemo pri sciencaj eksperimentoj, kiuj celas venki ege suferigajn homajn malsanojn; sed oni postulu, minimume, ke sciencistoj faru nur eksperimentojn nepre necesajn rilate al medicinaj esploroj, kaj minimume suferigu, laŭ strikta regularo. Kaj, ekzemple, blindigi kuniklojn por testi novajn kosmetikaĵojn, kvankam jam ekzistas multaj bonegaj kosmetikaĵoj, ŝajnas defendebla facilanima kruelaĵo. Ni tamen ne kredu, ke ĉiuj sciencaj eksperimentoj torturas prov-bestojn; multaj eksperimentoj temas nur pri dietoj, lernoprocedoj, preferoj, genetikaj problemoj k.t.p. Foje bestoj eĉ entuziasme kunlaboras, ekzemple se ili ricevas ian 'pagon' kontraŭ ĝuste farita tasketo.

Oni povas dresi bestojn per timo kaj turmentoj, aŭ per aprob-indaj metodoj, plejparte laŭdoj, karesoj kaj rekompencoj; transporti ilin neglekte kaj turmente, aŭ zorge kaj kompateme; kapti sovaĝbestojn en vundantaj kaptiloj, aŭ per, ekzemple, anestezaĵoj. Unu prestiĝemulo per kuglo mortpafas belan, raran beston kaj metas la kapon sur la muron de sia salono; alia, same prestiĝema, armas sin per fotoaparato kaj poste fanfaronas pri siaj neordinaraj fotoĵoj, dum la besto ankoraŭ vivas kaj eble naskos aŭ naskigos idojn ankoraŭ.

Kredeble la plej ĝenerale akceptebla minimuma principo estus: **Uzu la aliajn bestojn, sed ne misuzu ilin.**

En nia epoko, la homa konscienco rilate al bestoj maturiĝis al nova, grava koncepto; ke ni ne rajtas ekstermi speciojn. Ni homoj, ne kun konscia intenco tia, sed pro manko de respondeco-sento, jam malaperigis, inter aliaj specioj kaj subspecioj, la eksterordinarajn didon de Maŭricio kaj dinorniton de Nov-Zelando; la grizan balenon atlantikan; la nord-pacifikan sirenon; la uron; la iam

tre abundan migrantan kolombon (*Ectopistes migratorius*); la grandan aŭkon. Ni riskas ekstermi ĉiujn balenojn — inteligentajn, mirindajn mamulojn; la unike strangajn rinocerojn; la tigron de Javo; subspeciojn de foko, antilopo kaj testudo; du igvanojn kiuj troviĝas nur sur la Galapagoj; la science tre interesan, kvazaŭ arkaiĉan, varanon de Komodo; la amerikan grupon; la ĉarman koalonojn; plurajn aliajn bestojn, kun diversaj fiŝoj, papilioj kaj plantoj. Ni riskas detrui speciojn ne nur per ĉasado; se ni malpurigas riverojn kaj marojn, ni eble ekstermas birdojn kaj insektojn; se ni, eble bonmotive, ebenigas ian arbaron aŭ veprejon, ni eble detruas la hejmon de rara specio, kaj do ekstermas ĝin tiuregione...

Iu planto ne estas speciale interesa; sed, detruante la planton, ni ekstermas la insekton, kies nutraĵo ĝi estas; kaj pereas tiu bela, rara birdo, kiu dependas de tiu insekto... Ni ankaŭ ne forgesu, ke grandskala milito kun atomkernaj armiloj kaj aliaj nuntempaj abomenaj eltrovaĵoj povus ekstermi ne nur nin, homojn, sed milojn da specioj, kredeble same kiel ni unikaj en la universo, kiuj ne kulpas.

Unu el la plej tragikaj ekzemploj de nia homa senpripensa detruemo estas la ekstermo de la vastaj bizonaroj de la grandaj ebenaĵoj en Usono. La tuta vivostilo de multaj indianaj triboj dependis de la bizono: ne nur por viando, sed por tendoj, vestaĵoj, kovriloj, kaj eĉ kuiriloj el la feloj; kaj iloj el la kornoj, hufoj, ostoj kaj tendenoj. La ŝildo de la batalanto estis el bizona ledo; kaj la Bizona Danco estis unu el la grandaj ritoj. La indianoj havis religion respekton antaŭ la naturo, kaj mortigis la bizonojn nur laŭ veraj necesoj; kutime ili ankaŭ obeis principon, doni al la nesukcesintoj, aĝaj aŭ malriĉaj tribanoj parton de la viando. En 1860, ĉirkaŭ cent milionoj da bizonoj vagis sur la ebenaĵoj.

Dum la nigraj, sangmakulitaj jaroj 1870–74, blankhaŭtaj, monavidaj ĉasistoj masakris la bizonojn. Plejparte ili nur deprenis la felojn por vendi ilin, kaj lasis la kadavrojn putri. En 1900, restis ĉirkaŭ mil bizonoj sur la ebenaĵoj. Afliktis la indianojn ne nur malsato, sed la disfalo de tuta kulturo, primitiva sed ekvilibra, digna kaj kohera. Tiu katastrofo estis granda faktoro en la kreskanta malamo, kiun indianoj sentis kontraŭ blankuloj, kaj en la longa suferado de la indianoj. Eĉ hodiaŭ, dum siaj ritoj, indianoj foje ricevas viziojn pri bela postmorta lando, feliĉa ĉastereno, kie vagas la fantomaj, vastaj bizonaroj...

La Homo, kiu povas esti tiel brute senrespondeca pri aliaj specioj kaj eĉ pri la propra, ankaŭ havas intelekton por pripensi tiajn aferojn. Preskaŭ lastmomente, en 1905 fondiĝis la Usona Bizona Societo, kies celo estis, savi la specion. Ĝia laboro prosperis, kaj nun denove dekmiloj da bizonoj vivas en Usono kaj Kanado. Ekzistas en multaj landoj, eĉ internacie, asocioj por protekti speciojn kontraŭ ekstermado, ekzemple oni multe kampanjas por savi la balenojn.

Dum la konscienco de la homaro evoluas al tia respekto al la speciaro, kaj konservemo de la mirinda varieco de la naturo, individuoj tra la tuta mondo jam havas personajn rilatojn amikajn kun multaj bestoj: bestoj utilaj, kiel fortikaj sled-hundoj, aŭ bestoj nur estetike aŭ amuze plaĉaj, kiel silkharaj pekinaj hundoj.

Milionoj da homoj utiligis la inteligenton kaj sekvan dreseblecon de bestoj por praktikaj celoj. Ni pensas tuj pri hundoj, kiuj gardas hejmojn aŭ aliajn domojn, helpas montarajn sav-trupojn, arbaristojn, doganistojn, policianojn; hundoj, kiuj tiras ĉaretojn aŭ sledojn; kiuj helpas dum ĉasado, aŭ vetkuras por amuzi la homojn. Jen bovinoj, kaprinoj, ŝafinoj, kamelinoj, bubalinoj, kiuj donas lakton ne nur al la propraj idoj, sed al ni kaj niaj idoj, kaj lernas niajn rutinojn. Jen porkoj, kiujn ni grasigas nur por mortigi ilin; tamen ne ĉiam sen ia provizora amikeca rilato. Kokoj, anasoj, anseroj, meleagroj, numidoj kaj aliaj kortbirdoj donas al ni ovojn, karnon kaj plumojn; ŝafoj divers-speciaj lanon; kolomboj portas leterojn; de kunikloj ni prenas viandon kaj felojn. Multaj bestuzantoj kreas vere respektajn kaj amikajn rilatojn kun siaj utilaj dresitaj bestoj: rajdanto kun sia ĉevalo aŭ kamelo; paŝtisto kun sia hundo. Bovinoj ofte ricevas personajn nomojn; kaj tiuj, kiuj malgrandskale bredas kortbirdojn ofte rekonas ĉe ili diversajn temperamentojn. Speciale, anseroj povas iom rilati kun homoj, amuze inteligente. Kaj, kvankam katoj kaptas musojn kaj aliajn damaĝajn bestojn, eble ili pli ekspluatas nin, ol ni ilin!

Kaj katoj, hundetoj, amataj birdoj, multaj amikaj bestoj, kiujn ni ne povas multe ekspluati, kapablas doni sufiĉan amikecon kaj almenaŭ ion, kio ŝajnas persona amo, por konsoli milionojn, aldoni ian ekstran varmon kaj dolĉon al la vivo. Ni neniam diru, ke io estas 'senutila', se ĝi estas utila al la psiko.

Kvankam foje iu devas rezigni pri dorlotbesto pro ia alergio, sciencistoj komencas kredi, ke dorlotbestoj povas vere helpi nian sanon. Antaŭ nelonge, ekzemple, serioza esploranto trovis fortajn statistikajn indikojn, ke tiuj kor-malsanuloj, kiuj havas dorlotbeston (katon, hundon, birdon, eĉ fiŝojn kaj, unufoje, igvanon!) vivas pli longe. Psikiatroj plurfoje trovis, ke dorlotbestoj en mensmalsanulejoj helpis resaniĝon, kaj plibonigis la etoson.

En 1972 oni raportis, pri brita krimulo, kiu pro kato finfine iĝis bonkondata civitano. Kiel ofte dum la malutila vivo, li denove estis en malliberejo pro ŝtelado. Senhejma katido aperis el ie. La ŝtelisto petis permeson, prizorgi la katidon; la malliberejestro donis permeson, sed avertis, ke ne povos esti ekstraj manĝaĵoj. Tiu ŝtelisto oferis el siaj propraj manĝoj por nutri la katidon, kiu iĝis lia amiko. Liberigite, li post kelkaj formalaj ricevis permeson, forporti la katon — nun diketan kaj brile belharan. La viro, jam maljuna, pri kiu juĝistoj kaj pastroj senesperigis, trovis konstantan loĝejon, ordigis sian vivon, kaj neniam plu krimis. Li iam diris al demandanto, “Se mi devus denove iri en malliberejon, kiu prizorgus mian katon?” Finfine li maturiĝis al ia sento, ke li respondecas pri io, ekster si mem.

Aliaj homoj, malliberigite eble eĉ sen krimo, aŭ en pli kruelaj malliberejoj, trovis konsolon kaj eble savis sian mensan ekvilibron, apud sekretaj dorlotbestoj. La aŭtoro persone konis iun, kiu en senluma ĉelo amikigis raton, ĝis ĝi eĉ lasis ŝin karesi ĝin; tiu rato savis psikon, kiun homoj penis detrui. En la lasta jarcento, oni presis longan raporton pri franca krimulo en malliberejo, kiu tiel amikiĝis kun rato, ke tiu amikeco tute modifis lian karakteron kaj iel kreis sufiĉe bonan kaj sinoferan homon el fripono.

La poeto Byron [Bajron] verkis pri Francisko de Bonivard (1493–1570), svisa patrioto, kiun la duko de Savojo malliberigis dum entute ok jaroj, kaj emfazis, kiel konsolis la malliberulon sovaĝa birdo, musoj kaj araneoj.

En sia *Aŭtobiografio* (1936) Jawaharlal Nehru, ĉefa batalanto por la aŭtonomeco de Hindujo (aŭ Baratio, la hinda nomo de la nuna Hinda Respubliko), kaj la unua post-imperia ĉefministro, rakontis ĉarme kaj kortuŝe pri la konsoloj, kiujn bestoj donis al malliberuloj. Li mem iam flegis kaj savis malsanan orfan hundidon, kaj trovis amuzon je la aktivoj de lacertoj, sciuroj, kolomboj, papa-

goj kaj simioj en diversaj malliberejoj. Li vidis inter siaj kamaradoj malliberulon kiu savis la vivon de tri orfaj sciuridoj, nutrante ilin per fontoplumo; kaj multajn, kiuj amis sciurojn aŭ mungotojn.

Kaj multaj, kies nelibereco ne estas inter altaj muroj, pro krimo aŭ konscienco, sed iel ie en si mem, pro neŭrozo aŭ cirkonstancoj — la multaj izoluloj en la mondo — trovis, ke amo al ia besto donas almenaŭ ian emocian nutraĵon.

Inter la plej interesaj rilatoj inter bestoj kaj homoj estas la ne-atenditaj rilatoj, kun bestoj, kiujn multaj abomenas, aŭ kiujn oni ĝenerale rigardas kiel tute sovaĝajn. Sed tiaj amikecoj meritas apartan ĉapitron.

Novaj Proverboj

Plezuro estas fia, se torturo por alia.

Plej longa vivosperto ne kondukas al tutcerto.

Nek leono nek kverko estas homa verko.

Parolis la Lasta Dido

“Estaĵo kun pafil’ senhonta,
ekpensu pri la hom’ estonta!
Rigardu min momente frate,
kaj parulinon, pli komplate.
Se nun pereos ni sen ido,
neniam plu aperos dido;
stulta vi kredas min, mallerta;
kredu blekadon, pled’ averta:
se viaj kugloj nin nun sternos,
la manko sur la ter’ eternos.”
Okuloj pledis: unu! du!
Pafis la hom’ kun gaja ĝu’
Kaj dido ne ekzistas plu.

35. CIGANOJ KAJ CIGANAJ FABELOJ

Kvankam ne ekzistas lando, Ciganujo, la ciganoj estas popolo kun propra lingvo, folkloro kaj unika vivostilo. Ili estas nomadoj, kiuj ne havas naciecon; kaj kvankam ekzistas multaj kliŝaj, rasismaj aŭ sentimentalaj fantazioj pri ili, ili estas ĝenerale sekretemaj pri siaj kutimoj al ne-ciganoj, kaj nur kelkaj taktaj, paciencaj kaj sciencemaj antropologoj malrapide kunmetadis informojn plimalpli aŭtentikajn. Tamen, ĉar la kutimoj varias de grupo al grupo kaj en diversaj landoj, neniu povas fari plene fidindajn ĝeneralajn asertojn.

La ciganoj probable devenas el Hindujo. Ciganoj troviĝis en Irano jam en 1000 p.K.; tiutempe ili disiĝis en du nomadarojn: unu vagadis ĝis Egiptujo kaj norda Afriko, la alia tra Eŭropo. Nuntempe ili troviĝas sur ĉiuj kontinentoj, eĉ, ekzemple, en Meksikio kaj Aŭstralio. Oni rekonas plurajn tribojn, de kiuj la ĉefaj estas *kalderaŝa* en centra kaj orienta Eŭropo; *gitana* en suda Francujo, Hispanujo, Portugalujo kaj norda Afriko, kaj *sintia* en Germanujo. La ciganoj estas plej ofte brunhaŭtaj (de helbruna ĝis preskaŭ nigra) kaj brunokulaj, kun nigraj aŭ brunaj hararoj.

En diversaj landoj la indiĝenoj nomis la ciganojn laŭ la lando, el kiu ili supozeble venis: «egiptoj, bohemoj, grekoj, tataroj, saracenoj» k.t.p., aŭ, malame, «paganoj». La ciganoj mem nomas ciganon *Rom*, kies signifo estas simple “viro”; ciganinon *Romni*, “virino”; kaj reciproke la malŝaton de alirasanoj per la nomo *godje* (la preciza formo de la vorto varias de lando al lando), kiu signifas proksimume “barbaroj”.

La ciganoj, aparta popolo, havas sian propran lingvon, kiun parolas inter miliono kaj tri miliono da ciganoj tra la tuta mondo, kvankam tiu lingvo estas tre malofte jure agnoskita. Ĝi devenas de la sanskrita. Multaj vortoj similas al tiuj de la hindia, ekzemple *pani*, “akvo”; *rani* “sinjorino, reĝino”; *kalo*, “nigra”; *nak*, “nazo”, kaj la gramatiko similas al tiu de kelkaj lingvoj de norda Hindujo.

La ciganoj nomas sian lingvon *romani*; sed, almenaŭ ĝis vera fakulo proponos ion pli definitivan, estas kredeble pli bone en Esperanto uzi *cigana*, por eviti konfuzojn kun *romana*, *romanika*, *romanĉa* kaj *rumana*. La ciganoj uzas ĝin ne nur kiel ni ĉiuj uzas niajn lingvojn, sed parte kiel sekretan lingvon, kiu malhelpas persekutantojn.

Kvankam ili ja havas lingvon internacian, ĝi ne funkcias tiel bone kiel Esperanto, ĉar ĝi iom disfalas en dialektojn; ciganoj en diversaj landoj pruntis multajn vortojn kaj eĉ gramatikajn rimezojn, el la naciaj lingvoj.

Ilia historio estis sufiĉe tragika. Dum la mezepoko ili ne estis senprestigaj. En Bizanco ili estis la metiistoj pri metaloj. Reĝoj, ekzemple en Hungarujo kaj Polujo, nomis indiĝenajn nobelojn ĉefoj de landaj aŭ regionaj ciganaroj; pro tio, hodiaŭa cigana ĉefo ankoraŭ ofte portas la titolon *vojevodo*! Tiutempe la ciganoj multe vagadis kiel pilgrimantoj, sub speciala protektado de la papo, kaj uzis la kristanan krucon ankaŭ kiel emblemon de cigana unueco. Ekstis legendo ke kiam la gepatroj portis la infanan Jesuon en Egiptujon, ciganino gastigis la familion kaj divenis la diecon kaj karieron de la bebo; ciganoj ofte rolis en tiuj religiaj dramoj, kiuj estis la pradramoj de Eŭropo: ili dancis, rolis kiel divenistoj kiuj antaŭdiras pri Jesuo, aŭ kantis.

Sed la pilgrimantaj ciganoj, kiuj rajtis survoje postuli monon kaj manĝojn, iĝis tro multnombraj; armitaj bandoj de vagantoj, kiuj per minacoj emfazis siajn postulojn, timigis kaj indignigis la naciojn, kaj diversaj registaroj komencis elpeli aŭ subpremi la ciganojn. Dum la 15-a kaj 16-a jarcentoj, ili ne nur perdis siajn privilegiojn, sed iĝis persekutitaj. Oni ekzilis, malliberigis, skurĝis aŭ eĉ mortigis milojn da ciganoj.

Ilij malamikoj frue diskonatigis legendon, des pli konvinkan por naivuloj ĉar tiom da ciganoj estis metallaboristoj, ke la ciganoj estas malbenitaj, ĉar ili faris la najlojn por krucumi Jesuon. La ciganoj penis defendi sin per alia legendo: ke oni devigis ciganon fari tiujn najlojn, sed la metallaboristo deziris savi Jesuon, do englutis unu el la najloj, aŭ iu ciganino ŝtelis ĝin. Pro la nobla provo, Dio benis la ciganojn, kaj permesis al ili vojaĝi ien ajn — kaj ŝteli por siaj bezonoj. Tiu legendo eble aperis jam en la 12-a jarcento, kaj antropologo plurfoje aŭdis ĝin inter ciganoj en 1974. Estas interese,

ke la plej fruaj krucifiksoj montris kvar najlojn, sed dum la 12-a kaj 13-a jarcentoj aperis nova kutimo montri nur tri; fakuloj suspektas, ke estis tiuj bizancaj ciganaj metallaboristoj, kiuj unue faris tiun modifon por subteni favoran legendon.

Ciganoj estas ofte malamataj, aŭ pro misfaroj, aŭ pro sia aparteco.

Ili devas perlabori sian panon per metioj taŭgaj al nomadoj. Ili devas vojaĝadi restas tre forta. Vojaĝado rilatas kun sano, bonŝanco kaj feliĉo; restado sur unu loko rilatas kun malsano, malbonŝanco, malfeliĉo. Nuntempaj ciganoj malofte interbatalas dum ili vojaĝas, sed ofte se ili malbonhumoriĝas sur ia kampadejo. Ciganoj ofte montras lertecon en okupoj taŭgaj al nomada vivo, ekzemple kiel metallaboristoj, metalriparistoj, forĝistoj, fiŝkaptistoj, vendistoj de ĉevaloj kaj porkoj, ŝu-faristoj; en kelkaj regionoj ili havas specialajn metiojn; ekzemple, hungaraj ciganinoj faris belegajn brodaĵojn; skotaj ciganoj belajn kulerojn el korno; ciganoj en pluraj landoj bonajn lignajn ilojn kaj lignoskulptaĵojn. Utilaj okupoj. Ili ankaŭ multe laboras kiel amuzistoj, ekzemple en foiroj: kiel muzikistoj, akrobatoj, ŝnurdancistoj, pupteatristoj, fabelistoj, divenistoj, dresistoj de ursoj aŭ simioj. Plezurdonaj okupoj. Sed kelkaj ankaŭ estas almozetantoj, trompistoj, ĉarlatanoj, eĉ ŝtelistoj: okupoj, kiuj ne gajnas la simpatian de la regionaj loĝantoj; kaj en kelkaj landoj, dum kelkaj epokoj, ili faris taskojn kvazaŭ pariajn — kiel hundkaptistoj, pendigistoj, sklav-komercistoj.

Nuntempe iliaj misfaroj ne estas pli gravaj ol trompoj aŭ ŝteloj malgrandskalaj, trafikaj deliktoj aŭ malbeliga postlasado de fatraso; ili ne inklinas al perfortaj krimoj, kiujn ili ĝenerale abomenas, kaj ili normale ne endanĝerigas la homojn. Ili rilatoj kun ne-ciganoj tamen ne estas tre facilaj. Laŭ ciganaj vivkonceptoj, ili devas tre lojale kunlabori kaj interhelpi unu la alian, kaj ofte tion faras ĝis nivelo kiu hontigus multajn ne-ciganojn; sed malofte amikiĝas kun ne-ciganoj, kaj de ili volas nur profiti. Sed kiom da homoj vere celas amon, justecon kaj helpemon universalajn?

Oni ofte kulpigis 'ciganojn' pro krimoj de vagantaj sentaŭguloj tute ne ciganaj, aŭ eĉ de lokaj krimuloj; ili ofte estis propekaj kaproj, pli ol propra-pekuloj. Unu el iliaj plej vastaj tragedioj okazis dum nia nuna jarcento, kiam Hitlero penis ekstermi ilin same kiel la judojn, kaj pli ol 400 000 ciganoj pereis.

Dum la historio, rasistoj kaj bigotoj ofte pretekstis ilian pagancon. Aŭtentikaj scioj pri iliaj religiaj opinioj ankoraŭ ne sufiĉas por permesi firmajn ĝeneraligojn; sed kutime ili estas, almenaŭ formale, kristanoj; plej ofte katolikaj, kelkloke ortodoksaj, kaj ofte montras en siaj ruldomej krucifiksojn kaj bildojn pri la Dipatrino. Multaj kutimoj kaj tradicioj ŝajnas kristan-devenaj. Restas ĉe ili ankaŭ kelkaj kutimoj, kiuj eble devenas de Mitraismo, kun ĝia adorado de fajro kaj akvo, aŭ de praa adorado de sanktaj arboj; sed ankaŭ pask-ovoj aŭ kristnaskaj arboj devenas de paganismo.

Ili ankaŭ havas kutimojn tre interesajn al antropologoj. Ili akceptas proprajn leĝaron, kutimaron, ritaron kaj internan justicon, kiuj grandparte funkcias sufiĉe bone; la *kris romani* estas tribunalo, konsistanta el kelkaj respektataj pliaĝuloj; kaj ĉiu cigana komunumo (de dek ĝis eble cent familioj) havas ĉefon, tiun *vojevodon*, kaj ankaŭ *phuri dai*, iasence ĉefinon, kiu ankaŭ forte influas decidojn. Inter si, ili alte taksas fidelecon, lojalecon, kunlaboremon, kaj konstantan reciprokan helpon; kaj vere prizorgas siajn aĝulojn, orfojn aŭ kriplulojn.

Kvankam ne-ciganoj ofte kredas ciganojn malpuruloj, precipe pro iliaj ofte vere bedaŭrindaj malpurigadoj de la ĉirkaŭaĵo per fatraso, ciganoj kutime kredas *godĵe* malpuraj kaj preferas ne manĝi kun ili. Tre gravas en iliaj moroj la koncepto pri *marime* — rita malpurigo; ili havas multajn ritojn pri lavado; ne uzas la samajn pelvojn por lavi korpojn, vestaĵojn kaj vazojn; kaj laŭeble evitas kontaktojn inter la supra kaj malsupra partoj de la korpo. Kontraŭe al ofta populara fantazio, ili estas ofte tre pudoraj, kaj eĉ preferas ne diri, “Kie vi naskiĝis?” sed “Kie vi troviĝis?” Inter multaj tabuoj, tiu kontraŭ manĝado de ĉevala viando estas speciale forta. “Vi manĝas ĉeval-viandon!” estas terure humiliga insulto.

Ili tre timas fantomojn, kaj havas kompleksajn ritojn pri morto kaj funebrado. Ies mortoloko estas poreterne malpura; oni neniam plu loĝos tie; ili bruligas tendon, en kiu iu mortis, kaj vestaĵojn portitajn ĉe enterigo.

Ĉar multaj ciganoj ankoraŭ estas analfabetaj, ili ofte ne posedas la dokumentojn, kiujn la nuntempaj homoj tiel forte bezonas por senĝena vivado. Ili ankaŭ ne povas havi grandan literaturon skribitan; kvankam lastatempe oni presigis, en orienta Eŭropo, kelkajn ciganajn poemojn kaj fabelojn en la originala lingvo

(uzante la alfabeton de la eldoneja lando); multe pli riĉa estas ilia buŝa tradicio, kiu prezentas studindan kulturon.

Jen cigana enigmo iom poezia: “Kiam ĝi kreskis, ĝi havis foliojn; kiam ĝi vivis, ĝi havis harojn; nun, mortinte, ĝi enhavas vivantajn ostojn.” — La solvo estas: *lignoŝuo* (t.e. kun ledaj rimenoj).

Verŝajne iliaj fabeloj estas kutime mallongaj kaj iom naivaj, sed ofte ĉarmaj. Jen unu serioza fabelo, kaj unu komika.

La Mistera Amanto

Bela junulino havis nek edzon, nek patron, nek patrion, nek fratojn, nek fratinojn, nek iun ajn parencon. Ĉiuj mortis. Do ŝi loĝis en kabano, ekster vilaĝo, proksime al la arbaro; kaj neniu vizitis ŝin.

Unu vesperon, bel-aspekta vaganto frapis sur ŝian pordon. “Mi estas vaganto. Mi vojaĝadis longtempe en multaj landoj. Lasu min ripozi ĉi tie; mi vere ne povas piediri plu.” La junulino diris, “Nu, ripozu. Mi povas disponigi al vi matracon; kaj ĉu vi deziras manĝi aŭ trinki ion?”

Li manĝis kaj trinkis, kaj baldaŭ li kuŝiĝis sur la matraco, dirante, “Nun vere mi dormos denove; mi ne dormis dum longa tempo.”

“Kiom longe?”

“Ĉarmulino, mi dormas nur unu semajnon dum jarmilo.”

La junulino ridis. “Kia ŝerco! Vi vere estas amuza blagulo!... He, li jam endormiĝis.”

Leviĝinte matene, la vaganto diris, “Vi estas tre bela junulino. Se vi permesos, mi povos resti kun vi ĉi tie dum la tuta semajno.”

Ŝi jam amis lin, tiel belaspektan kaj bonhumoran, kaj volonte konsentis.

Pasis tago, kaj nokto, kaj tago.

Meze de la nokto, la junulino vekiĝis kun krio, kaj vekis la karulon.

“Ho, mia kara! Mi havis tre malbonan sonĝon. Mi sonĝis, ke vi estas malvarma kaj blanka, kaj ni veturas kune, en belega kaleŝo. Sed trenis ĝin ne ĉevaloj, sed ses blankaj birdoj. Vi prenis grandan

kornon, kaj ludis strangan melodion; kaj alvenis trupo da mortintoj, kaj ili akompanis nin. Vi estis ilia reĝo.”

Li diris nur, “Estis tre malbona songo.” Sed baldaŭ li leviĝis.

“Kara knabino, mi devas foriri. Dum longa tempo neniu mortis tra la tuta mondo. Adiaŭu min.”

La junulino ekploris. “Kial? Ne, kara, ne foriru; restu kun mi.”

“Dio vin protektu; mi nepre devas foriri.”

Li etendis sian manon por adiaŭi, sed ŝi kaptis ĝin, ploregante. “Kara, kara viro, kiu vi estas?”

“Tion scii, estas morti.”

“Diru al mi, kiu vi estas!”

“Vane vi demandas; mi ne diros al vi, kiu mi estas.”

“Kara, mi estas preta suferi kun vi, sed nur diru al mi vian nomon.”

“Do, bone; vi venos kun mi. Mi estas la Morto.”

La junulino unufoje tremegis, kaj mortis.

Preĝejo el Fromaĝo

Antaŭ longa tempo, la ciganoj havis propran preĝejon, belan, el griza ŝtono; kaj la serboj havis preĝejon el fromaĝo.

Serbo vizitis la ciganan ĉefon: “Kial ni ne interŝanĝu niajn preĝejojn? Vi prenu nian fromaĝan preĝejon, kaj ni havu vian ŝtonan preĝejon.”

“Sed estus interŝanĝo malbona por ni ciganoj. Ni ne volas fordoni nian ŝtonan preĝejon, por ricevi preĝejon nur el fromaĝo!”

“Sed ni povos doni monon, multan monon, kompenso pro la malpli alta valoro de nia fromaĝa preĝejo.”

Aŭdinte la vorton *mono*, la cigano estis preta negoci. La serbo iom marĉandis, sed finfine ili interkonsentis pri kompenso. La serbo kolektis multan monon, sed ankoraŭ mankis tridek dinaroj. Sed la cigana ĉefo konsentis, ke, ĉar ne estas granda sumo, la ciganoj povos iomete atendi ĝin.

Do, la serboj alproprigis al si la belan ŝtonan preĝejon de la ciganoj, kaj la ciganoj iris al la fromaĝa preĝejo.

Kiam ili staris tie kaj ĉirkaŭrigardis, unu malsata cigano derompis peceton da fromaĝo kaj komencis manĝi ĝin. La aliaj tre koleris, kaj komencis tiri kaj bati lin.

“Ne... ne... fratoj! kial ataki min? Mi prenis nur peceton por gustumi ĝin! — kaj li proponis pecetojn al aliaj.

Kiam la ciganoj gustumis la fromaĝon, ĝi gustis tiel bonege, ke ili ĉiuj rompis pecojn, rompadis... kaj post la tempo bezonata por kunfrapi la manojn — la preĝejo malestis!

Manĝinte sian preĝejon, la ciganoj ne sciis, kie preĝi. Ili iris do al la serboj: “Donu al ni la restantan monon.” Sed la serboj ne havis ĝin.

Tial la serba ĉefo sugestis: “Ni interkonsentu; ni ne havas monon kaj vi ne havas preĝejon. Vi rajtas preĝi en nia preĝejo, ĝis ni pagos la lastajn dinarojn.”

Sed ankoraŭ nun la serboj neniam pagis sian ŝuldon. Tial, la ciganoj ankoraŭ rajtas preĝi en serbaj preĝejoj... kaj la ciganinoj almozpetas de domo al domo!

36. INTERSPECIAJ AMIKECOJ [3]

Anekdotoj pri homoj, kiuj amikiĝis kun bestoj, kies amikeco al homoj ne estas kutima, troviĝis tre frue.

Latina verkisto rakontis pri Androklo, romiana sklavo, kiu forkuris de kruela mastro; rifuĝis en kaverno en Afriko, kaj kompatis leonon, kiu lamis. Li sukcesis tiri dornegon el la piedo de la leono. Oni rekaptis Androklon, kaj punis lin, sendante lin en la arenon, kie sovaĝbestoj disŝiros lin por amuzi spektantojn, inter ili la imperiestron Tiberio (regis 14–37 p.K.). Sed leono tuj kuris al Androklo, frotis sin kontraŭ li, lekis lian manon kaj montris ĉiujn signojn de amikeco. Estis tiu leono, kies piedon li sanigis! La dankemo de la besto tiel impresis la imperiestron, ke li liberigis Androklon, kiu foriris kun la ronronanta leono. Bernard Shaw [Ŝo] verkis surbaze de tiu anekdoto tre amuzan kaj pensigan dramon, *Androklo kaj la Leono* (1916), kies ĉefa temo estis konscienc-libereco kaj martiriĝo.

Estas tre dube, ĉu la ĉarma anekdoto estas vera; tamen ne estas certe, ke ĝi ne estas. Eble ĝi havas almenaŭ malpli dramecan faktan kernon.

Ekzistas ankaŭ multaj fruaj anekdotoj pri kristanaj sanktuloj kaj sovaĝaj bestoj. Multaj el ili estas nur naivaj legendoj, same kiel multaj anekdotoj pri bizaraj pentofaroj, aŭ pri senutilaj mirakloj pli taŭgaj por foiraj iluziistoj ol por spiritaj gvidantoj. Tamen, kelkaj eble estas almenaŭ parte veraj.

Ke, en la kvina jarcento p.K., ermito amikiĝis kun lupino, kiu ĉiutage vizitis lin, akceptis fragmentojn post lia manĝo, kaj lekis lian manon; ke iam, kiam li eliris por montri al vizitanto la ĝustan direkton al la urbo, la lupino ŝtelis panbulon; kaj ke post kelkaj tagoj ŝi revenis kun honta mieno kaj klinita kapo, malfeliĉa ĝis la ermito karesis ŝin, donis panon kaj konvinkis ŝin, ke li pardonas la pekon — ne ŝajnas tute absurde, al iu, kiu iom konas hundojn, kaj memoras, ke lupo estas parenca al hundo.

Simile, oni povas racie kredi, ke la irlanda sanktulo Kolumbano, dum la sesa jarcento, kiam li laboris kiel misiisto, en Francujo, amikiĝis kun lupoj, urso, birdoj kaj sciuroj, kaj ke “li kutimis preni unu sciuron per la mano, kaj meti ĝin sur sian ŝultron, kaj ĝi kuradis tien-reen inter la faldoj de lia kapuĉo.” Angla verkistino de nia nuna jarcento, Doreen Tovey, longe gastigis sciuron, kiu ĉiunokte dormis sur breto en la familia vestoŝranko.

Ekzistas ĉarma anekdoto pri irlanda sanktulo, abato kaj episkopo, Moling, kiu amikiĝis kun pluraj bestoj. Inter ili estis vulpo. Kiam la vulpo ŝtelis unu el la kokinoj de la monaĥoj, ĉi tiuj, kaj Moling mem, severe riproĉis ĝin. La vulpo kuris al najbara monaĥinejo, ŝtelis kokinon, kaj portis ĝin al la abato kompanse! La plej neprobabla parto de anekdoto eble bazita sur vera epizodo estas, ke Moling ordonis al la vulpo reporti la kokinon, kaj ke ĝi obeis.

Ke la irlanda sanktulo Kolumbo, sur la malvarma okcident-skota insuleto Iona, profetis la alvenon de ŝtorm-batita, malsatmorta gruo, oni dubu; sed ke migranta gruo alvenis, ŝtorm-batita kaj tre malsata, kaj ke Kolumbo kaj liaj kunuloj ĝin flegis ĝis ĝi povis flugi pluen al Irlando, similas al multaj bonfaroj de kompatemaj homoj dum multaj jarcentoj.

Bildoj pri sankta Hieronimo, la rigora, kolerema, polemikema dalmata sanktulo de la kvina jarcento, kiu tradukis la Biblion en la latinan, ofte montras lin kun leono. Frua legendo rakontas, ke Hieronimo, simile al Androklo, gajnis la amikecon de leono, kiam li tiris dornojn el ĝia piedo kaj lavis la vundojn. La leono komencis gardi la monaĥejon, kaj, inter aliaj posedaĵoj, la azenon, kiu regule portis lignon por la monaĥoj. Iun tagon, pasis karavano de komercistoj; la leono dormis; la komercistoj ŝtelis la azenon. La monaĥoj suspektis, ke la leono manĝis sian kamaradon, sed ne plene konvinkiĝis, ĉar ne estis sango sur la herbo.

Hieronimo ordonis, ke la leono plenumu la azenan devon, junĝis ĝin kaj devigis ĝin tiri la ligno-ĉareton. Post tempo, la karavano denove intencis preterpasi; sed la leono rekonis la azenon, kuris muĝante al la ŝtelintoj, kaj, ne mordante ilin, sed tre timigante ilin, pelis ĉiujn ŝarĝitajn kamelojn al la monaĥejo. Tie ĝi platis sin antaŭ ĉiu monaĥo, svingis sian voston, montris grandan ĝojon, ĉar nun ĝi povas plene pruvi sian senkulpecon. La komercistoj, nun

pentemaj, sekvis siajn kamelojn kaj donacis al la monaĥoj grandan provizon da oleo. Precize kiom, se iom, de tiu bele simetria detektiv-novelo, vere okazis, ĉiu povas por si mem konjekti; sed ke leono vivadis amike kun la monaĥoj estas sufiĉe kredebla. En nia propra jarcento, aŭstrino, Joy Adamson, famiĝis per siaj libroj pri leonoj, leopardo kaj gepardoj, kun kiuj ŝi amikiĝis, tiel ke ŝi povis ĉirkaŭbraki ilin aŭ ludi kun ili. Kiam ŝi liberigis siajn bestojn por natura vivo for de la homoj, ili ĉiam revenis por viziti ŝin kaj montri la novajn idojn!

Kutberto, angla sanktulo, ĝenerale emis amikiĝi kun bestoj. Ĉu vere lutroj venis kaj blovis sur liajn piedojn plenintence, por varmigi lin, aŭ penis viŝi ilin per siaj haroj, kiam Kutberto genuis sur la sablo post pentofara starado en la maro? kredu tion kiu povas! sed ke lutroj amikiĝis kun li (kaj eble iliaj snufado kaj frotado konsolis lin) ŝajnas tute eble. Skota verkisto de nia nuna jarcento famiĝis per sia bela libro pri amikeco kun lutro.

La plej konata tia anekdoto estas pri la mondfama itala sanktulo Francisko de Asizo, kiu ne nur predikis al la birdoj, kaj liberigis de kaptinto kolombojn, por kiuj li preparis nestojn, sed 'konvertis' sovaĝan lupon, hom-manĝantan, kiu teruris la civitanojn de Agobio.

Modernaj homoj apenaŭ povas kredi ĉiujn detalojn de la bela mez-epoka rakonto, laŭ kiu sankta Francisko tuj kvietigis la lupon per krucosigno, predikis al ĝi, kaj aranĝis publikan pac-traktaton kun la civitanoj, kiun la lupo promesis observi, klinante sian kapon kaj movante la voston kaj orelojn, kaj metante sian dekstran antaŭan piedon en la manon de sankta Francisko. Sed, denove, eĉ absoluta ateisto povus kredi ian kernon da vero en tiu legendo.

Ekzistas multaj nuntempaj atestaĵoj, ke lupoj kaj homoj povas interamikiĝi, kaj ke lupoj atakas homojn nur pro ekstrema malsato aŭ alia escepte kriza situacio. Estas do tute eble (kaj eble pli bela morala leciono ol troigita legendo!) ke Francisko, homo mirinde malegoisma, perceptema, amoplena kaj kompatema, sukcesis gajni la fidon kaj amon de lupo, ĝis tioma grado, ke la besto akompanis lin publike kaj eĉ obeis kiel hundo al "Donu piedon!" Kiam, laŭ la pactraktato, la agobianoj regule nutris la lupon, ne mirinde, ke ĝi ne plu atakis ilin. Kaj ke tiu lupo, sciante, ke la civitanoj donos manĝaĵojn kaj nek ŝetos ŝtonojn nek batos per bastonoj, "vizitadis

la hejmojn, irante de pordo al pordo” tiel amike, ke finfine la agobianoj priploris ĝian morton, ŝajnas tute kredeble.

Bone dokumentitaj estas multaj same mirindaj amikecoj de nia propra jarcento. La familio de Jane Davis, anglino, al kutimiĝis al neordinaraj dombestoj, inter aliaj, serpentoj, sciuroj, mefito kaj eĉ kajmano; kiam ili loĝis en Hindujo, ili akiris leopardidino, kiu plenkreskis en la familia hejmo, promenis kun la gefiloj, ludis kun la familianoj, lekis iliajn vizaĝojn, dormis kun ili, veturis en la aŭtomobilo, ludis kaj dormis kun la familia hundo, manĝis el la sama granda telero kun la familiaj katoj kaj leke lavis ilin. Same peza kiel la homoj, ŝi restis amika, dependa, karesema; ŝi petolis tre simile al hejma kato, sed, estante tiel granda, kvankam senmalica, pli difektis diversajn objektojn. Ŝia favorata frandaĵo, kiun ŝi prenis el la fingroj de familianoj aŭ gastoj, estis... fromaĝo.

Multaj bonaj sciencaj konsultlibroj emfazas, ke, kvankam homoj sukcesis malsovaĝigi leonojn, leopardojn, gepardojn, pumojn, ocelotojn, karakalojn kaj la nord-amerikajn rufajn linojn, la eŭropa sovaĝa kato (*Felis sylvestris*) estas “absolute sovaĝa” kaj neniam amikiĝis kun homoj. Sed en 1974 aperis angla libro, kun fotoĵoj kaj multaj detaloj, pri orfa katidino tiuspecia, kiun geedza paro flegis; ŝi baldaŭ komencis ronroni, ludi kun la geedzoj kaj la hejma hundo, kaj amike leki ilin, aŭ frapeti la vizaĝojn per piedetoj kaj ungoj retirataj. Baldaŭ ŝi montris amikan sintenon al vizitantaj infanoj. Ŝi perdiĝis dum ŝtormo, kaj kiam la geedzoj retrovis ŝin, ŝi estis en ŝirmejo, kun eta orfa cervido, kiun ŝi amike lekis. Cervoj kutime estas ĉefa predo por tiuj sovaĝaj katoj. Baldaŭ ŝi komencis salti sur homojn, sed tute ne atakeme; nur por ronroni kaj karesi. Finfine la geedzoj liberigis ŝin en rezervejo, kie ŝi povos vivi pli nature, eble trovi parulon kaj naski katidojn; sed ŝi ankoraŭ kapablis reveni kaj rekoni la amikojn, salti sur ilin kaj ronroni.

Unika dokumento; kvankam ekzistas almenaŭ unu alia historio, multe malpli detala, pri kato tiuspecia, kiu antaŭ eble jarcento loĝis ĉe skoto kaj liaj multaj ordinaraj katoj; kaj, kiel li diris laŭ skota frazo, “ĝi neniam mordis, ĝi neniam elpuŝis pinglon.”

Ĉirkaŭ 1935, tre populara prelegisto vojaĝis tra pluraj landoj kun sia konstanta kamarado, aglo, kiu sidis apud li dum li prelegis, aŭ foje sur lia ŝultro. Homoj dum jarcentoj dresis akcipitrojn,

falkojn, nizojn kaj tinunkolojn por ĉas-sporto; la dresado postulas multan paciencon, sed la rezulta rilato povas esti tre bela. Konstruisto angla, en 1980, faris siajn normalajn taskojn kun amata tinunkolo, kiu gardostaris; se nekonato provis tuŝi liajn ilojn aŭ monon, la rabobirdo tuj minacis per beko, ungegoj, kaj atentigaj kriĉoj. Sed por Johano, la birdo restis tiel milda, ke li povis porti ĝin en la



lokan drinkejon kiam li deziris postlaboran bieron. Ankaŭ strigoj ofte amikiĝas kun homoj kaj eĉ konsentis sidi sur la ŝultro de amiko. Japanaj fiŝistoj tre sukcese dresas kormoranojn, por helpi en fiŝkaptado.

La nordamerika bruna urso estas tiel sovaĝa kaj danĝera, ke eĉ trankvilaj sciencistoj nomas ĝin la 'horora urso' (*Ursus horribilis*);

sed en 1979 unu horora urso, Heraklo, loĝis en skota drinkejo kiel familiano. Heraklo, kiu pezis 296 kg, manĝadis ĉefe salikokojn, supon, viandon, terpomojn kaj vinberojn; li trinkis bieron aŭ teon. Li kutime sidis en la salono kun la drinkantoj, kaj, kiam la mastro estis for, gardostaris apud la mastrino! Kredeble oni malofte miskondutis en tiu drinkejo.

Multaj homoj sentas timegon antaŭ serpentoj eĉ ne danĝeraj; sed kelkaj amikiĝis kun ili; pitonoj sufiĉe ofte loĝas en hejmoj, kaj eĉ foje estas utilaj dombestoj, ĉar ili kaptas ratojn. Multaj lerneknaboj kaj kelkaj lerneknabinoj amikiĝas kun malgrandaj ne danĝeraj serpentoj kaj lacertoj. Kelkaj specioj de delfenoj kaj focenoj ŝajne facile eksimpatias kun homoj kaj ludas kun naĝantoj; oni povas dresi ilin por amuzi spektantojn, kaj iasence komuniki kun ili.

Estas sufiĉe kompreneble, ke homoj kaj simioj ofte amikiĝas. En Malajsio, botanikistoj sukcesis instrui makakojn, preni valorajn specimenojn el lokoj, kiujn homoj malfacile atingas; en Sumatro oni instruas ilin grimpi arbojn, pluki kokosojn kaj faligi ilin. Tamen iam okazis akcidento preskaŭ rekorde stranga: dresita makako vidis, apud kokosarbo, viron, kies kapo iel similis al kokoso; la besto saltis sur lin kaj obeeme penis fortordi lian kapon, kaj la viktimo enhospitaliĝis, feliĉe nur pro forte dolorantaj kol-muskoloj. En Tajlando oni foje instruis makakon aktori en speciala 'simia teatro'.

Goriloj, kiuj povas pezi ĝis 290 kg, aspektas al homaj okuloj timigaj, kaj povas ataki homojn, kiuj, laŭ gorilaj kompreno, minacas ilin; sed ne estas ĝenerale agresemaj, kaj povas ludi amike kun homoj, kiujn ili fidas. Antaŭ kelkaj jaroj, gorilo en la bestĝardeno de Zuriko, kiu alkutimiĝis al homaj ludkamaradoj kaj karesantoj, iĝis tro granda, kaj oni izolis lin en kaĝo. Per ruzo li kaptis junan bestgardistinon kaj dum tuta nokto tenis ŝin en siaj brakoj. Li tute ne malbonfaris al ŝi, dezirante nur amikan kontakton; sed sendube la nokto ŝajnis al ŝi longa. En Kalifornio, inter 1972 kaj 1979, juna gorilo lernis signo-lingvon kun pli ol kvarcent 'vortoj', per kiuj ĝi konversaciis kaj eĉ foje 'mensogis'.

Junaj orangutangoj volonte amikiĝas kun homoj kaj lernas interŝanĝi diversajn signojn kun ili. Eĉ pli proksimaj al ni estas ĉimpanzoj, kiuj ofte imitas homojn kaj amikiĝas kun ili. En homaj rila-

toj ili ofte ĉirkaŭbrakas, kisas, defendas amikon, aŭ ŝaluzas; ili kapablas siamaniere respondi al diversaj vortoj, kvankam iliaj organoj ne taŭgas por paroli.

Kvankam rilatoj de homoj kun aliaj specioj estas belaj, interesaj kaj kortuŝaj, homaj rilatoj kun aliaj homoj pli gravas.

En la scienca muzeo de Oksfordo oni povas vidi konstantan ekspozicion, kiu entenas la esencan fakton kaj sekvajn principojn por la feliĉo kaj estonteco de la mondo. Oni bele aranĝis serion de primataj skeletoj, pozigitaj laŭ simiaj kapabloj — grim pantaj, kaŭrantaj, pendantaj... Atingante la finon de la serio, oni vidas unu skeleton, ridetantan, rektan, kun la titolo:

<p>HOMO NUR UNU SPECIO</p>
--

37. EKSTRAVAGANCAJ FABELOJ

Amuza parto de la cigana kulturo estas la ekstravaganca fabelo, mensogegaro aŭ sensenca rakonto. Ciganoj rakontas ilin por distri aŭskultantojn, kaj mensopreta cigano povas eble turni la lastajn vortojn por takte celi sian propran profiton. Jen mallonga specimeno:

“Dum mi veturigis mian ruldomon sur la vojo tien ĉi, mi renkontis surd-mutulon, kaj demandis lin, ‘Kiom distanca estas la plej proksima vilaĝo?’ — Li tuj respondis, ‘Sufiĉe longa distanco – eble kvin kilometrojn.’ Mi do plueniris, ĝis mi renkontis blindulon, kaj mi demandis lin, ‘Sinjoro, kioma horo estas?’ Li rigardis sian brakhorloĝon kaj respondis, ‘Estas la dua kaj kvardek minutoj.’ Mi do plueniris, ĝis mi renkontis viron tute nudan. ‘Sinjoro,’ mi diris, ‘mi ege deziras fumi, kaj ne havas tabakon. Ĉu eble vi povas amike favori min per unu pipoplenu?’ — ‘Jes,’ li respondis, ‘pipoplenon da tabako mi ja ne domaĝas.’ — Kaj li prenis sian tabakosakon el sia poŝo, kaj proponis ĝin al mi, tre afable.

Do, mi plueniris, fumante mian pipon, ĝis mi venis al via vilaĝo. Tuj mi vidis viron, kiu ne havas brakojn, kaj li tre rapide puŝis tra la strato ĉarumon, en kiu li portis grandan sakon da terpomoj. Post li kuregis viro sen kruroj, kiu kriegis, ‘Haltu, ŝtelisto! haltu, fripono! jen miaj terpomoj!’ — Ne estis mia afero, do mi plueniris, kaj renkontis maljunulon, certe pli ol cent jarojn aĝan. Li ploris.

Mi karesis lian ŝultron. ‘Kio estas, oĉjo?’ mi demandis. ‘Estas mia avo,’ li diris, ‘mi loĝis kun li, sed li ĵus edziĝis al nova edzino, kaj puŝis min el la domo.’ — Mi vere kompatis lin, sed post kelkaj amikaj vortoj mi plueniris al la preĝejo; kaj tie renkontis ĉerkon, kiun ses viroj portis al la enterigejo. Kiam mi alvenis, la mortinto eksidis tre rekte, kaj rekonis min. ‘Jen,’ li diris, ‘jen estas iu, kiu tre volonte trinkus duonlitron da biero.’ Kaj li diris la veron. Ne povus esti paroloj pli veraj.”

Ni vidas, ke temas pri speciala ĝenro de fabelo, de la fikcia arto. Unusence, ĉiuj fabeloj estas ‘mensogaj’, ĉar ili ne rakontas pri okazintaj eventoj; sed plej ofte ili celas ian kredeblecon. Ili havas internan logikon, konsekvencon; la eventoj iel similas al tiuj de la reala mondo. Eĉ en rakontoj pri vojaĝoj tra la tempo, vojaĝoj ekster nia galaksio, pri sorĉistoj aŭ fantomoj, la rakontanto povas tiel miksi mirindaĵojn kaj ĉiutagajn normalaĵojn, ke la tuto ŝajnas, dum ni legas, kredebla. La spacvojaĝanto, proksimiĝante al Aldebarano en sia gravito-venka, neebbla ŝipo, tamen rigardas sian komputeron kaj reagis al ĝi per emocioj, kiujn ni rekonas en ni mem: soifas, malsatas, timas, venkas sian timon, miras, rigardas per okuloj kaj manipulas per fingroj. La speciala ekstravaganca fabelo celas amuzi nin per asertoj, kiujn ni tuj rekonas kiel absolute neebblajn, kontraŭ nia ĉiutaga logiko: surd-mutulo respondas al demando, mortinto parolas k.t.p. Foje pluraj homoj konkuras pri mensogoj, ne malbonintence, sed nur por amuzi ĉiujn; kiu povas elpensi la plej krie nekredeblan mensogon?

“Mi pafis bluan sciuron sub la trono de la reĝino.”

“Ha, sed mi per ĵetita pinglo pik-mortigis pulon sur la kolo de la reĝino.”

“Brave; sed la reĝino petis min kapti la fiŝeton, kiun ŝi englutis en glaso da akvo. Kaj mi ligis paneron sur silkan fadenon, kaj fiŝkaptis en ŝia gorgo, kaj jen, mi kaptis la fiŝon, kaj nun mi estas lordo!”

Kompreneble, tute ne temas pri malrespekto al la reĝino, aŭ pri trompema fanfaronado; estas nur cerba sporto.

Kvankam la ciganoj estas majstroj pri ekstravagancaj fabeloj, simila tradicio ekzistas en multaj kulturoj. Ekzistas fabelo el Sirio, pri kalifo, kiu postulis rakonton, kiu “enhavos eĉ ne unu veran vorton”; kiel li prave diris, “Estas malfacile, paroladi longe kaj ne diri ion veran.” La turkmenoj havas fabelon pri ĥano, kiu promesis edzigi al sia filino tiun, kiu rakontos kvardek sinsekvajn mensogojn. Multaj pereis, rakontinte nur kvin, dek, aŭ dek kvin mensogojn, sed simpla malriĉa knabo finfine venkis, per fabelo en kiu — nur ekzemple — “Mi paŝtis la ŝafojn de mia avo, ĉar mi naskiĝis pli frue ol mia patro” — li vidas ĉevalidon trans la Kaspio, botoj parolas, kaj kamelo forbatis la supron de planto kvardek klaftojn alta.

Ankaŭ en Usono ekzistas granda tradicio de ekstravagancaj rakontoj iom alispecaj. Estas arto pli buŝa ol skriba, kvankam la konataj verkistoj Washington Irving kaj Mark Twain iom verkis tiumaniere. La usonaj ekstravagancaĵoj kutime temas pri aventuroj de folkloraj herooj, kiuj eble ekzistis, sed kies atingojn oni komike troigas: Kapitano Stormalong [«Ŝtorme antaŭen»] kies ŝipo fosis la kanalon de Panamo; Johnny Appleseed [«Joĉjo Pomosemo»], kiu semis pomujojn ĉie tra Usono; David Crockett kaj Annie Oakley, mirindaj pafisto kaj pafistino; Paul Bunyan, giganta arbohakisto; kaj multaj usonaj vakeroj.

En la okcident-eŭropa kulturo ni trovas ian tradicion tian sufiĉe frue, en kelkaj verkoj de la ĉarma heleno Luciano; la plej ĝenerale konataj specimenoj estas kredeble la aventuroj de la germana Barono Münchhausen, kiuj estas tiel famaj, ke ankaŭ en medicino oni parolas pri la Münchhausen-sindromo, psika malsano, kiu devigas la viktimojn krei eksterordinarajn fikciojn pri la propra korpo, postuli enhospitaliĝon kaj kaŭzi por si mem eĉ suferigajn, necesajn operaciojn.

Ekzistis aŭtentika (kaj rakontema) germana barono Münchhausen, sed la aŭtoro de kelkaj amuzaj ekstravagancaj fikcioj pri li estis Rudolf Raspe, germano, kiu tamen verkis ilin angle por enspezi monon kiam li loĝis en Anglujo, rifuĝinte tien ĉar li ŝtelis el numismatika kolekto en Germanujo. Raspe mem estis sufiĉe stranga homo: ŝtelisto, aventuristo, trompisto, kiu ankaŭ kapablis labori utile, erudicie, honeste; verkis unu vere amatan libron, kaj kelkajn aliajn verkojn siatempe estimindajn; tradukis kulturajn verkojn, konsciencie katalogis gemojn kaj kameojn kaj serioze studis natursciencan, mineralogian kaj arkeologian. Raspe kapablis gajni la amikecon de eminentaj kulturhomoj — kaj trompi senkulpajn aĉetontojn, semante esperigajn ercojn en senvalorajn mino-terenojn. Unu el liaj rimarkindaj verkoj estis frua eseoj pri la iama ekzisto de grandaj elefantoj, aŭ mamutoj, en tre nordaj regionoj.

Liaj propraj rakontoj pri Münchhausen aperis en 1785; la poeto Gottfried Bürger tradukis ilin en la germanan en 1786. Inter la mensogoj de la barono: li per ĉerizkerno pafis cervon, sed ĝi forkuris; la venontan jaron, li retrovis ĝin kun ĉerizarbo inter la kornoj, tiel ke la nova pafo “disponigis al mi la femuron kaj ankaŭ la

ĉerizan saŭcon.” Li savis sin de atakanta lupo, puŝante sian manon profunde en ĝian gorgon kaj tiel tirante, ke li tute eksterigis la internon kaj internigis la felon; li faligis sian peltan mantelon, forkurante de rabia hundo, kaj la reprenita mantelo en la vestoŝranko rabiigis kaj atakis la aliajn vestojn. Barokrado ĉe la kastela pordo falis kaj duonigis lian ĉevalon; do la barono rekunkudris la ĉevalon per laŭrobranĉetoj; la ĉevalo ne nur resaniĝis, sed baldaŭ portis sur la dorso verdan laŭro-laŭbeton, kiu agrable ŝirmis la rajdanton.

Ne ĉiuj el la riĉe variaj kaj neordinaraj mensogoj de la barono fontis el la cerbo de Raspe, kiu iom pruntis el forgesitaj verkoj germanaj aŭ latinaj, kaj eĉ el la kimra folkloro. Aliaj verkis daŭrigojn de la fabelaro pri la barono, sed tute ne same amuzajn; kutime enestis tro da nura satiro efemera.

Nu, ni homoj multe mensogas: politikistoj, reklamistoj, vendistoj, fanatikuloj kaj fariseoj; privatuloj en privata situacio por servi siajn apetitojn, prestiĝon, envion aŭ malamon. Multaj mensogas pri Esperanto, ofte sen motivoj facile kompreneblaj: ĝi estas jam morta; ĝi ne havas literaturon; ĝi estas internacia lingvo, kiun neniuj parolas; ĝi ne taŭgas por poezio; ĝi estas ilo ĉefe por spionado; kaj aliaj senbazaj elpensaj, kiuj eĉ pli distancas de la vero, ol ĉerizarbo sur la kapo de cervo. (En 1979, unu kirurgo devis fosi el la palato de virino malgrandan fruktoŝemon, kiu enradikiĝis kaj kies ekkresko kaŭzis doloran lezon; kaj alia kirurgo savis okulon de knabo, elprenante herbosemon, kiu ĵus komencis enradikiĝi.) Se nur ni ĉiuj mensogus nur por praktiki amuzan arton, kiu 'trompus neniun kaj neniel intencus trompi! Jen ludo por la distraĵ vesperoj de malgrandaj kunvenoj.

Jen nove elpensita rakonto tiaspeca, kun kelkaj eroj da speciala verda spico.

Survoje al Universala Kongreso de Esperanto, mi devis iri norden de Rejkjaviko al Lusako. Ĉar mi havas nur tri manojn mi ne portis ĉiujn miajn pakaĵojn, kaj precipe miaj silkaj poŝtukoj estis ege pezaj. Do mi petis unu el la tre inteligentaj islandaj leopardoj, ke ĝi flugu en la maro kaj naĝu sur la tero, kaj portu kvin el la kvar pakaĵoj ĝis la haveno en Lusako. La leopardo konsentis tion fari kontraŭ kolumo ornamita per verdaj steloj el marcipano (kolorigitaj verdaj per beto-suko), dek kilogramoj da ĉina grujero, kaj

kelkaj bagateloj kiel karba spegulo, kombilo el ŝinko kaj peniko por foje rebonigi ĝiajn belajn makulojn.

Mi trafis ekspres-vagonaron en Rejkjaviko, kaj de tie vojaĝis komforte sur la mara fervojo ĝis Parizo, kie, kompreneble, mi devis trafi la ŝipon ĝis Marsejlo. Dum mi atendis en la haveno, mi kaptis la okazon por reprovizi min per serpent-sandviĉoj, trombo-pomoj kaj malmole kuiritaj drak-ovoj. Mi ankaŭ aĉetis ĵurnalon, kie mi legis, inter aliaj aferoj, ke la polico de UEA ĵus arestis sep samideanojn pro atencoj kontraŭ la akuzativo; ke sciencistoj en Aŭstralio eltrovis metodon por fabriki ŝtrumpojn el la dezerta varmega glacio; kaj ke la ĉefministro de Divenukie kverelis publike kun la prezidanto de la Iaalia Respubliko kaj frapis lian nazon per blua karoto, tiel, ke melaso elfluis.

De Marsejlo mi veturis en aŭtobuso (purpura kun flavaj makuloj) ĝis Tanĝero. Dum la aŭtobuso iris iom malrapide sur la flava maro, kelkaj pasaĝeroj kaptis, per fiŝ-fadenoj el la fenestroj, marmitojn, marmotojn, martelojn, marabuojn kaj aliajn mar-bestojn. Sed mi preferis daŭre triki la puloveron el testudaj haroj, kiun mi preparis por unu el miaj plum-amikoj.

Mi pasigis unu nokton en hotelo en Tanĝero, kie mi kaptis la okazon viziti la famajn mielofontojn (vidindajn, sed oni nepre portu bastonon por forpuŝi la iom bekemajn pingvenojn), kaj iom ripozi. La aviadilo ekflugis du horojn malfrue — pro la neceso, elpeli la cikonion, kiu nestis en unu el la motoroj — sed la flugo al Lusako estis tolereble komforta.

Mi trovis la leopardon en la flug-haveno kaj ĝi redonis miajn pakaĵojn en bona ordo, antaŭ ol mi finfine trafis la aŭtobuson de la karavano al la Kongreso. Estis tre agrable, sidi en la aŭtobuso kaj finfine aŭdi nur Esperanton, sen nacilingvaj frazoj kaj tute perfekte sen eraroj...



La kreado de mensogaj rakontoj estas amuza ludo, sed alia amuza ludo, kiu iom helpas kutimigi la menson al bona plena atentemo, estas por du teamoj; iu laŭtlegas tian rakonton, kaj teamano gajnas poonton, ĉiufoje kiam li interrompas la rakonton, por klarigi, kial io estas sensenca. (“Ne povas esti haveno en Lusako, kiu

estas tre malproksima de iu ajn marbordo.”) Sed se li diras, ke io estas neebla, kiam ĝi fakte estas ebla, li perdas tri poentojn. Do, rakonto lerte antaŭpreparita povas kaŭzi multan amuzon.

Novaj Proverboj

Koron de amiko regas ne nur logiko.
Ne duelu, ne kverelu; bonon celu, kaj fidelu.
Ore belas la fazano; blue belas genciano.
Bona estas supo, sed ne sur la jupo.

Versareto – pri du vortoj foje konfuzitaj

Kompromiso estas io saĝa
por matura homo malsovaĝa:
du deziroj iel ne identas;
do du homoj inter si konsentas
sekvi ian preskaŭ mezan vojon,
havi pacon, kaj duonan ĝojon.

Kompromito estas ege ĝena:
io stranga, ŝajne malkonvena,
metas en danĝeron la honoron,
kaŭzas honton, perdojn kaj doloron.
Kompromisojn ofte ni invitu;
kompromitojn tamen ni evitu.

38. MONSTROJ DE NIA FANTAZIO

Kiam iu diras, ekzemple, ke “universala helplingvo estas nur himero”, li kutime intencas aserti nur, ke ĝi estas ‘ne-realigebla’. Ni preskaŭ forgesis, ke, unue, *himer* estis monstro en helena legendo, elpensita antaŭ ĉirkaŭ dudek kvin jarcentoj. Ĝin mortigis Belerofono, rajdante sur utila, bela monstro, *Pegazo*, flugilhava ĉevalo, ankoraŭ foje uzita kiel simbolo de poezia inspiro. Kaj esperantistaj poetoj, sur siaj pegazoj, ja helpis mortigi la ideon, ke universala lingvo estas himero.

La originala himero konsistis el kapo, kolhararo kaj kruroj de leono; korpo de kapro; kaj vosto de drako aŭ serpento. Ekzistas variaĵoj; sed ĉiam ĝi estas miksoforma.

Laŭ niaj ĝisnunaj sciencaj scioj, hibridoj inter tute malsimilaj specioj estas neeblaj; oni sukcesis parigi nur speciojn tre parencajn, kiel azenon kun ĉevalino, leonon kun tigrino, lupon kun hundino; sed la homa fantazio ne estas ligita per rigidaj naturleĝoj. Miksoformaj bestoj sugestas eblecojn de kreado ekster teraj scioj; liberigon de la leĝoj de la konata kosmo; la praan ĥaoson; aŭ la timigajn aspektojn de la naturo.

Bone konataj estas la hom-kapa, leon-korpa *sfinkso* de Egiptujo, pro la ofte fotografita kolosa statuo en El-Giza, Egiptujo; kaj la leon-korpa, virin-kapa kaj virin-brusta *sfinkso* de Tebo, kies enigmon solvis Edipo. Ekzistas ankaŭ, en legendoj, *sfinkso kvarparta*, el homo, taŭro, leono kaj aglo, simbolanta la kvar ‘elementojn’ de la fruaj epokoj, akvon, teron, fajron kaj aeron; *sfinkso silenta*, kun kapo de virŝafo; *sfinkso de la suno*, kun kapo de falko; kaj kelkaj aliaj.

La *centaŭro*, kun homa brusto sur ĉevala korpo, originis en la helena mitologio, sed pruntis sian nomon al aŭstrala konstelacio, kaj estas la arkapfisto, Sagitario, de la zodiako. Por la helenoj la centaŭro estis plejparte nobla kaj saĝa, eĉ instruema; aliaj traktas ĝin kiel simbolon de nia besta naturo ligita al nia spirita kaj intelekta naturoj, aŭ de la konflikto inter la du naturoj.

Eble estis la manato, reala akva mamulo, kiu sugestis la ankoraŭ tre konatan fantazion pri la *marviro* aŭ *triton*, la *marvirino* aŭ *sireno*, homo supre, fiŝo malsupre. (*Sireno* estas foje birdo kun virina kapo.) La ideo de edzino aŭ, malpli ofte, de edzo el la maro, ofte aperas en folkloro. Ni ankoraŭ trovas la fantazion ofte en la ŝercoj de karikaturistoj.

Ni ankoraŭ konas ankaŭ la *Kaprikornon*, kiu estas supre kapro, sube fiŝo. Li esti signo de la zodiako, aŭstrala konstelacio kaj emblemo de la vintra solstico, kaj ni nomas unu el niaj tropikoj je li. Nuntempe li ŝajnas tiel firme enoficigita en la scienca mondo, ke ŝajnas strange, ke iam li estis formo de la babilona dio Ea, mistera, saĝa, patrono de metiistoj, dio de akvo, 'Lordo de la Abismo'.

Kelkaj aliaj eŭropaj monstroj vivas nun ĉefe en heraldiko: la *grifo*, mikso de aglo kaj leono, kiu aperas sur la blazono de Londono, devenas de helena legendo, sed troviĝas ankaŭ en orienta arto. Ĝi rilatas al la scio kaj saĝo. La helenoj elpensis la *mantikoron** kun vira kapo, trivica dentaro, ruĝa vizaĝo, leona korpo, kaj skorpia vosto, el kiu ĝi pafas pikilojn. Pli simpatia estas la *ealo**, deveninta el Afriko: ĝi havas la kapon kaj korpon de ĉevalo, sed kun makuloj kaj hartufoj; voston kun fina tufego; kapran barbon, aprajn dentegojn. Unikan talenton ĝi havas: ĝi povas turni siajn longajn kurbajn kornojn antaŭen aŭ malantaŭen!

La heraldikan *dukapan aglon* oni ofte vidas sur la blazonoj de Usono, de kelkaj eŭropaj dinastioj kaj aliaj familioj. La ordinara 'mar-hundo' estas foko, sed la *heraldika mar-hundo* estas hundo (de reala sed nun malaperinta subspecio) kun aldonitaj naĝhaŭto surpieda, naĝilo dorsa, kaj padeleca vosto kiel tiu de kastoro. Inter aliaj heraldikaj miksoformaj bestoj, la plej ekstravaganca estas la *tajgro**; lupa kapo, kies supra makzelo longiĝis por krei aŭ kork-tiril-forman kornon, aŭ aglan beksupron; leonaj korpo, vosto kaj kruroj; kaj ĉevala kol-hararo. Iom ironie, la tajgro kredas sin tre bela; se vi volas kapti tajgridojn, nur metu spegulon en la vojon de la patrino. Ŝi tiel sinprobe admiras sian propran formon, ke vi povos facile ŝteli la idojn. Kion vi faros per ili, vi mem devos decidi.

* Steleto distingas kelkajn fak-terminojn, ankoraŭ ne en PIV.

Oni fantaziis monstrojn pli komikajn ol terurajn. La *nasnas** de Jemeno estas duonhomo, kun duona kapo, duona korpo, unu brako, kaj unu kruro, sur kiu tamen ĝi povas salti. La *katoblepo* — ‘malsupren-rigardanto’ — de Etiopujo mortigas, se oni rigardas ĝiajn okulojn; sed moviĝas malrapidege, apenaŭ povas porti sian propran pezan kapon kaj ne povas levi ĝin por rigardi iun. Ĝi estas tiel miopa, ke iam ĝi erare manĝis siajn antaŭajn kruojn. Fakulo iam sugestis, ke ĝi kreiĝis el konfuza raporto pri gnuo! En Usono la *skvonko** estas arbora monstro, kovrita per verukoj kaj vilaj nevoj; ĝi konstante ploras pro propra malbeleco kaj oni sekvas ĝin laŭ la larmtrempitaj spuroj.

La *gaja borulo* aŭ *snoligostro** iom similas al kanguruo, sed havas longan, pezan korktirilforman voston. Kiam ĝi eksidas, ĝi rotacias kaj ŝraŭbas sin komforte en la teron. La birdo *bekopugo** kutime sidis sur barilo kun la kapo ĉe unu flanko, la postaĵo ĉe la alia; ĝi ofte ne certis, kiu finaĵo estas kiu, kaj penis forflugi norden kaj suden samtempe; la rezultaj angoroj kontribuis al ĝia pereco, sed ankaŭ ĝia dieto de pego-truoj ne estis tre fortiga.

La japanoj fantaziis la eksterordinaran *kapaon**¹: ĝia korpo plimalpli similas tiun de testudo; ĝiaj ranecaj manoj kaj piedoj havas naĝ-membranojn kaj akrajn ungojn; ĝia kapo estas iom simieca. Malgranda, laŭ kelkaj nur 8 cm longa, ĝi estas pezega. Ĝia supernatura forto, kiu ebligas al ĝi tiri homojn aŭ ĉevalojn en la akvon, devenas de la fluido, en telerforma kavaĵo sur ĝia verto. Sed oni povas facile savi sin de kapao. Ĵetu al ĝi kukumojn, kiun ĝi speciale frandas; aŭ kliniĝu profunde antaŭ ĝi. La kapao tre atentis etiketon, reciproke kliniĝos, kaj elverŝos la kapan fluidon.

Ĉiuj aŭdis almenaŭ ion pri *drakoj*, sed ne ĉiuj scias ke por okcidentanoj drakoj estas kutime (ne senescepte) malbonaj, detruemaj, parencaj al la serpento de la hebrea-kristana Edeno, dum por orientanoj drakoj estas ofte (ne senescepte) bonaj kaj helpemaj. Drakoj reaperos en alia ĉapitro.

Homoj foje fantaziis monstrojn grandskale detruajn. *Tienkuo** la «ĉielhundo» de Ĉinujo, ekde la sesa jarcento a.K., eklipsa demono, manĝis infanojn kaj volis formanĝi la sunon. Unufoje li aperis sur la tero, vestite en vastaj flamoj, tiel ke la brilego estis

1. Ankoraŭ ne en *PIV*, sed jam en *Enciklopedieto Japana*.

videbla super granda regiono, kaj ĉiuj kreskaĵoj forbrulis. Dum pli saĝaj dioj prizorgas lin, Tien-kuo estas utila, ĉar li forpelas demonojn. Iu ajn povas pripensi analogion aktualan.

Eble la plej terura monstro de pli naivaj epokoj estas la *bazilisko*, kiun kreis helenaj kaj latinaj verkistoj, sed kiun mezepokaj eŭropanoj evoluigis. La reala bazilisko estas nedanĝera, krestornamita lacerto de centra kaj suda Ameriko; ĝia sola fabeleca trajto estas ĝia kapablo kuri sur akvo, kvankam nur mallongajn distancojn. La mitologia bazilisko naskiĝis kontraŭnature el ovo, kiun koko demetis, serpento aŭ bufo elkovis. La 'serpento-reĝo', kun krona kresto, havis flavan kaj nigran, malsanaspekte krustan korpon; pintajn flugilojn; voston de skorpio; ruĝajn okulojn. Ĝi antaŭeniris, levante sian mezan parton (kiel faras ne serpentoj, sed certaj raŭpoj). Ĝi estis malgranda — ne pli ol 30 cm longa — sed... ĝia venenega spiro mortigis ĉiujn plantojn; frakasis rokojn kaj longdistance forbruligis herbojn. Se ĝi trinkis el rivero, la akvo restis dum jarcentoj venenita. Iam rajdanto frapis baziliskon per lanco; veneno trakuris la lancon kaj mortigis la rajdanton kaj ĉevalon. Sekuraj estis nur musteloj, kaj la kurac-planto ruto, kiu por hebreoj kaj kristanoj signifas penton, la 'herbo de graco'. Ekzistis nur du saviloj. Kokokrio mortigis baziliskon; aŭ, se iu sukcesis meti spegulon en ĝian vojon, la monstro mortigis sin mem per propra rigardo.

Laŭ legendo, dum la dekkvina jarcento baziliskoj tiel plagis Anglujon, ke neniu kuraĝis eliri, ĝis iu heroo vestis sin de verto ĝis plandoj en spegulkovritaj vestaĵoj, kaj promenadis ĝis la baziliskoj pereis. La lasta bazilisko, kiun homoj serioze kredis, mortis en Varsovio en 1587. Du knabinoj kaj vartistino eniris kelon, mortis; kortega kuracisto diagnozis baziliskon; oni vestis mortkondamnitajn krimulon en spegulkovritaj vestaĵoj kaj sendis lin en la kelon. Li elportis mortan serpenteton, kiun la kuracisto identigis kiel baziliskon...

Por mezepokaj teologoj, la bazilisko simbolis la diablon, kiu venenas kaj detruas animojn. Sed ĉu eble fruaj homoj iel antaŭsonĝis nian plej teruran danĝeron? Escepte ke ili indulgas nek ruton nek mustelojn, atombomboj kaj iliaj elfalaĵoj havas frostotremige similajn efikojn eĉ pli grandskale. Kiel ĉiam, plej minacas la hom-

aron la baziliskoj en niaj propraj koroj; kaj eble la savilo ankoraŭ estas spegulo; ni rigardu nin kaj rekonu nin mem, ŝokite.

La *amfisbeno**, dukapa serpento, ofte skulptita en mezepokaj preĝejoj, estas, laŭ unu tradicio, dukapa bazilisko; laŭ alia, nur nedanĝera manĝanto de formikoj. Ĝi kapablas kuri, fulmrapide, malantaŭ unu kapo aŭ la alia.

Ni homoj ankaŭ elpensis noblajn monstrojn. *Garudo**, la homaglo de Hindujo, nun konata ankaŭ en Birmo, Vjetnamujo, Laoso, Kamboĝo, Tajlando kaj Malajzio, havas aglan kapon, flugilojn, ungojn, bekon, kun viraj trunko kaj membroj. La flugiloj estas ruĝaj, la vizaĝo blanka, la korpo brile ora. Por hinduoj, Garudo estas la sankta birdo, sur kiu rajdas la granda dio Viŝnuo, Konservanto de la Mondo. Garudo speciala malamas kaj mortigas serpentojn, kaj rajtas formanĝi grandajn fiulojn. Sed hinduismo kaj budhismo ofte intermiksiĝas; laŭ aldona tradicio, Garudo ĉiutage manĝis unu serpenton, ĝis li renkontis budhistan princon, kiu kompatis ĉion vivantan, eĉ serpentojn.

“Hodiaŭ, ho Garudo,” li petis, “ne manĝu vian serpenton. Mi anstataŭos ĝin; manĝu min.” Tiu perfekta sinofero kortuŝis Garudon, kiu ekde tiam alprenis la budhisman principon, kompati ĉion vivantan.

Kelkaj mitologoj identigas Garudon kun la *fenikso*.

La fenikso estas belega birdo; nur unu ekzistas en la mondo; je longaj intervaloj, ofte jarcento, aŭ jarmilo, aŭ 97 200 jaroj, ĝi mortas per fajro kaj renaskiĝas. Iaspeca fenikso troviĝas, kun rozoj, en diversaj paradizaj ĝardenoj de diversaj religioj. Ĝi estis grava en la malnova ĉina religio kaj ceremoniaro, la «vermiljona birdo», simbolo de dumviva geedza amo, de la imperiestrino, de saĝo, paco kaj bonkora regado. Japana fenikso simbolas la sunon, kaj honestecon, justecon, fidelecon kaj obeemon. En antikva Romo ĝi signifis la imperion, eterne daŭrontan. Por mezepokaj kristanoj la fenikso simbolis Kriston kaj Lian releviĝon post krucumiĝo. En la azteka kaj majaa prareligioj de Centra Ameriko, la sankta birdo, *kvetzalo**, iasence parencis al la fenikso kvankam ĝi estis ankaŭ reala birdo, belege verda kaj flava trogono*, la emblemo de moderna Gvatemalo.

La fenikso de la eŭropa mitologio probable devenas de antikva Egiptujo, kie la dia birdo Bennu estis eble formo de la sun-dio Ra,

kaj adorata en Heliopolo kiel la animo de Oziriso, natur-dio kaj protektanto de mortintoj. (Ankaŭ Oziriso estis dio murdita sed revivigita.) Laŭ eŭropaj tradicioj la fenikso havis plumojn orajn kaj ruĝajn, kun flugiloj ĉielarke multkoloraj kaj purpuraj piedoj, okuloj mar-blauaj; flugante, ĝi trembrilegis en la aero. Forme ĝi similis al granda aglo. Ĝi estis perfekte senmalica; ne premis ion, sur kiu ĝi sidigis; nutris sin nur per aero kaj roso; kaj neniam sentis malamon. Kiam finfine ĝi sentis sin maljuna kaj laca en sia paradiza arbo, ĝi flugis, sur la vojo de la subiranta suno, al Arabio; tie ĝi kolektis cinamon, mirhon kaj aliajn parfumojn kaj spicojn; poste ĝi flugis tra Arabio kaj Sirio al Fenicio², faris neston sur alta palmo, kantis himnon al la leviĝanta suno kaj bruligis sin inter spicoj. Vermo rampis al la cindroj kaj iĝis fenikseto, kiu portis la cindrojn de la 'patro' al Egiptujo. Sekvis ĝin centmiloj da birdoj, pro la riĉa parfumo. Demetinte la cindrojn pie sur la altaron de la suno, la fenikso re-flugis al paradizo.

La fenikso povas simboli perfektecon, aŭ amon, aŭ la unikecon de genio, aŭ tiun oftan situacion, kiam unu el ni trairas krizon kaj sukcesas eliri ne venĝema, sed purigita kaj pli nobla.

Estas ĉarme, legi pri antikvaj fantazioj. Sed estas grave, ke ni ĉiuj penu nuligi en niaj propraj psikoj la baziliskan revon, kaj pli-fortigi en ili la feniksan revon.

GRAVA AVERTO!

En la supra artikolo la leganto trovis kelkajn vortojn, formitajn laŭ normalaj procedoj, sed ankoraŭ ne en la *Plena Ilustrita Vortaro* aŭ aliaj vortaroj.

Neniam uzu tian vorton sen klarigo.

Via leganto dependas de vi por kompreni la signifon.

La vortfarado estu ĉiam afero por vere spertaj esperantistoj, kiuj havas larĝajn konojn. Oni neniam cedu al la tento, kaprice misinventi ian vorton, nur ĉar oni ne konas ĝustan esperantan vorton. La unua paŝo estas serĉadi la vorton en jam ekzistantaj vortaroj. Se ne temas pri vere faka termino oni tre probable trovos ion jam uzeblan.

2. Tio estas: «Feniks-io», nuntempe Libano.

Limeriko

Kapao, en lag' en Tokio,
kun dolor' en la dekstra tempio,
plendis, "Vere, en vintro
premegas ĝi min tro –
kovril' el solida glacio!"

39. FABELO EL IRLANDO

Irlando estas insulo, ne granda (ĉ. 83 400 kvadrataj km), la plej okcidenta parto de Eŭropo. La klimato estas milda kaj pluveca, favora al terkultivado; Irlando eksportas bonajn kremon, fromaĝon, buteron, ŝinkon kaj aliajn viandojn, la faman irlandan viskion (ne samgustan kiel la skota aŭ usona), kaj havas grandan turistan industrion, pro belegaj marbordoj, lagoj, kaj kamparoj, ankaŭ kasteloj kaj aliaj kulture interesaj vidindaĵoj. Preskaŭ kvinono de la lando estas marĉa; sed el la marĉoj oni fosas torfon, valoran hejt-aĵon, ankaŭ uzatan en terkultivado kaj flegado; torfo estas la ĉefa 'minerala' trezoro (kvankam fakte vegetala!) de Irlando.

La insulo estas dividita: 80 % sude, estas la *Irlanda Respubliko*, aŭ *Ejro*, kun ĉefurbo Dublino; Ejro estis preskaŭ sendependa lando ekde 1921, kaj ekde 1949 estas suverena ŝtato, kiu ne apartenas al la Brita Komunumo, kaj restis neŭtrala dum la tuta mondmilito. Ejro estas lando plejparte katolika kaj ĝiaj oficialaj lingvoj estas la irlanda kaj la angla.

20 % de Irlando, en la nordo, restas parto de Britujo, *Norda Irlando*, kun ĉefurbo Belfasto kaj provinca parlamento, kvankam multaj nordirlandaj parlamentanoj ankaŭ sidas kun plenaj rajtoj en la brita parlamento en Londono. Norda Irlando estas plejparte protestanta kaj la oficiala lingvo estas la angla.

La historio de Irlando estas tragika. Dum la deksesa jarcento anglaj reĝoj komencis seriozajn provojn kolonii ĝin, kun la perforto kaj nekomprenemo karakterizaj de tiuepoka koloniado; multaj anglaj protestantoj hejmiĝis en tiu lando katolika kaj malriĉa. En la sekvanta jarcento, la brita intercivitana milito etendiĝis al Irlando; oni mortigis multajn anglojn, kaj la angla diktatoro Cromwell — ŝtatestro pli ofte, laŭ kriterioj de lia epoko, relative humana, saĝa, larĝvida kaj eĉ tolerema — komencis en 1649 venĝokampanjon kaj konfiskadon, kiuj ankoraŭ venenas irlandajn popol-memorojn. Subpremado de britaj katolikoj daŭris multajn jarojn.

Ekde 1801 Irlando estis parto de Britujo; longa historio de plibonigoj kulminis en la plena emancipado de la katolikoj en 1829. La perspektivoj ŝajnis pli bonaj, sed, meze de la jarcento, plantesto, detruanta terpomojn, kaŭzis malsategon, kiu mortigis ĉirkaŭ milionon da irlandanoj. Ĉirkaŭ alia miliono elmigris. Britaj registaroj kaj privataj bonfaremuloj penis helpi, sed helpis tute neadekvate. Baldaŭ irlandanoj rekomencis, politike kaj foje perforte, batali por sendependeco.

La sendependeco de Eŭro ne plene solvis la problemon, ĉar multaj irlandanoj, plejparte katolikaj, deziras, ke ankaŭ Norda Irlando iĝu parto de Eŭro, dum granda plimulto de nord-irlandanoj mem forte deziras, ke Norda Irlando restu parto de Britujo. Norde, katolikoj sentas sin malavantaĝa minoritato, sed protestantoj — kiuj, hejmiĝinte tie antaŭ jarcentoj, same sentas sin indiĝenaj — tre timas iĝi minoritato en katolika lando; ekonomikaj faktoroj komplikigas la problemojn jam ne simplajn; kaj kelkaj teroristoj, fanatikuloj ĉe ambaŭ flankoj, kaŭzas vastajn suferojn, novajn amariĝojn kaj aldonajn komplikaĵojn. Pluraj britaj kaj irlandaj registaroj multe penadis ellabori kompromisan interkonsenton; okazis multaj diskutoj, esploroj, konferencoj; ekleziaj gvidantoj ambaŭ-konfesiaj pledis por karitato; ekster-irlandaj britoj, el siaj impostoj, subvencias Nordan Irlandon per mil milionoj da pundoj jare. Sed en 1980 la tragika problemo restas nesolvita.

Dum ĵurnaloj raportas pri kruelaĵoj kaj malamo, oni povas forgesi, ke la plimulto da irlandanoj restas homoj tradicie gastamaj, amikiĝemaj, gajemaj, kaj varmkoraj, ofte ankaŭ admirinde eltenemaj en malfavoraj cirkonstancoj. Ni ankaŭ ne forgesu, ke ekzistas tre interesa irlanda kulturo. La irlanda lingvo estas unu el la keltaj lingvoj, parenca al la gaela de la skotoj; ĝia literaturo estas la plej malnova en okcidenta Eŭropo.

Irlando havas, iasence, nacian kostumon (nun ne portatan en la ĉiutaga vivo), naciajn sportojn kaj dancojn; vastan stokon da kantoj kaj specialan tradicion de harp-ludado; propran grandiozan mitologion pri irlandaj dioj kaj herooj kaj abundan folkloron pri feoj, koboldoj kaj akvofeoj.

La unua volumo tradukita el la irlanda lingvo en Esperanton estas *La Noktmeza Kortumo* de Brian Merriman; Albert Goodheir tradukis ĝin, kaj ĝi eldoniĝis en 1980.

Fakte, tri el la vere grandaj majstroj de la angla literaturo estis sendube irlandanoj: G.B. Shaw, dramverkisto; James Joyce, avangarda romanisto; kaj W.B. Yeats, poeto. La satiristo Swift havis multajn ligojn kun Irlando; la dramverkistoj Oliver Goldsmith, J.M. Synge kaj Sean O'Casey estis irlandanoj, ankaŭ du sufiĉe gravaj poetoj de nia jarcento, Louis MacNeice kaj Cecil Day Lewis; la nuntempa filozofia romanistino Iris Murdoch estas irlandanino kaj verkis unu romanon pri irlandaj konfliktoj; multaj aliaj irlandanoj kontribuis al la tuthoma kulturo, pere de la angla lingvo.

Jam troviĝas Esperanto-Movado en Irlando: la malgranda Esperanto-Asocio de Irlando (t.e. de Eĵro), fondita en 1970, estas aliĝinta al UEA; esperantistoj en Norda Irlando aniĝas al la brita asocio; sed nia afero ankoraŭ ne brile prosperas en la belega insulo, kiun, pro la brila verdeco de ĝiaj kampoj, oni ofte nomas «La Smeralda Insulo».

Jen ĵrlanda fabelo, pri mar-feino. Similaj fabeloj troviĝas en multaj landoj, sed ĉi tiu rakonto havas karakterizan irlandan etoson.

Edzino el la Maro

Patriko sidis sur roko apud la marbordo, frumatene, kaj fumis sian pipon dum la blanka nebulo malrapide leviĝis el la valo malantaŭ li, kaj antaŭ li la maro malrapide verdiĝis. Li meditis, malgaje, ĉar li longe restis fraŭlo.

“Kio estas viro, sen virino? Botelo sen viskio, terpomoj sen butero, ĵigo sen muziko, unu klingo de tondilo, sen-hoka fiŝfadeno...”

Sed kiu sidis sur roko, tre proksime al la akvo? Belega junulino, kiu metis sian ĉapon sur la sablon malantaŭ sin, kaj kombis sian abundan hararon — sed tiu hararo estis malseka, kaj marverda. Patriko komprenis; li vidas mar-feinon; kaj se li povos ŝteli ŝian sorĉan ĉapon, ŝi ne povos reiri en la akvon. Rapide kaj lerte, li kuris al la roko, kaptis la ĉapon kaj puŝis ĝin en sian poŝon.

La junulino tamen aŭdis lian anheladon, turnis sin kaj vidis, ke la sorĉa ĉapo malaperis.

“Ho, ve, ve, ve, aj ve-ve-ve!” ŝi lamentis. Brilaj belaj larmoj fluis sur ŝiaj belaj vangoj.

Patriko ne volis redoni la ĉapon, sed li ne estis senkora; li ek-sidis apud ŝi kaj prenis ŝian manon. Tion ŝi silente permesis. Li rimarkis, ke la maneto estas glata kaj blanka kiel perlo, nur havis ian delikatan membranon inter la fingroj.

“Ne ploru, belulino; ne ploru, karulino.”

“Ho ve, ve, ve! Aj ve! Ho, tera viro, ĉu vi intencas manĝi min?”

“Mia kara! Kiu aĉa angilo aŭ fia fleso sugestis al vi tian ideon? Mi ne intencas manĝi eĉ unu belan verdan haron de via dolĉa kapeto!”

“Kion vi do intencas, tera viro?”

“Mara ... e ... fiŝinjo ... mankas al mi edzino, kaj mi volas edz-inigi vin.”

“Mankas al mi edzo, do mi konsentas. Nur atendu, dum mi dece aranĝos mian hararon.” Ŝi finis la kombadon kaj aranĝis sian hararon en bela nodo. Poste ŝi klinis sin kaj tenis la buŝon tre proksime al la akvo, kaj murmuris nekompreneblajn vortojn en la ondojn.

“Kial vi parolas al la malplena maro?”

“Mi sendas mesaĝon al mia patro, por ke li ne prokrastu pro mi sian matenmanĝon, kaj ne maltrankviliĝu pri mi.”

“Kiu do estas via patro, fiŝinjo?”

“La reĝo de la irlanda maro.”

“Reĝo! Ho, mi estas pli bonŝanca ol mi sciis... certe li posedas multan monon?”

Sed, kiel ajn li penadis klarigi al ŝi, la mar-feino tute ne povis kompreni ‘mono’ ... Jes ja, se ili deziros ion — konkojn, potojn, lignon, barelon — de la fundo de la maro, la fiŝoj portos ĝin laŭ ŝia ordono; jes ja, ostrojn aŭ krabojn, aŭ perlojn kaj kolorajn ŝtonojn, sed tiu ‘mono’ ŝajnas tre stranga ideo... Patriko decidis, ne turmenti ŝin per insistado, sed tuj aranĝi la geedziĝon. Do, li iris al la pastro, Pastro Flanagan. Sed la pastro ŝokiĝis.

“Vi deziras edziĝi kun fiŝino, filo mia? Hontinde! Nenature! Reĵetu la skvaman monstron en la maron!”

Ŝi tute ne estis skvama, sed Patriko preskaŭ redonis la ĉapon, pro timo antaŭ la pastro.

“Patro, ŝi estas princino, filino de mara reĝo.”

“Sed vi ne rajtas peke edziĝi kun fiŝino!”

“Vidu, kiel bela ŝi estas — bela kiel la luno sur klara ĉielo.”

“Se ŝi estus bela kiel la suno kaj la luno kaj la sep steloj, tamen vi ne rajtus edzinigi fiŝinon, filo mia!”

“Sed aŭskultu, patro; kie en nia regiono mi trovos knabinon tiel mildan, tiel modestan, tiel bone edukitan?”

“Fiŝo mia, ŝi estas filo! Ne – filo mia, ŝi estas fiŝo! Aĉa ne-baptita fiŝo! Estu obeema!”

Patriko serĉis lastan argumenton.

“Tamen, patro, ŝi rajtos alporti ion ajn el la maro, oron kaj perlojn kaj perditajn barelojn... Patro, mi vere povos prince pagi tiun, kiu geedzigos nin.”

“Ha, filo mia! tio tute modifas la kazon... Estos tute dece edziĝi kun ŝi, eĉ se ŝi estus dekfoje fiŝa.”

Do, Patro Flanagan aranĝis ĉion en bona ordo, kaj baldaŭ geedzigis la paron.

La geedzoj estis tre feliĉaj. La verdhara belulino bone kuiris, bone purigis, ĉiam modesta kaj afabla; la fiŝoj alportis multajn valorajn objektojn; kaj Patriko vigle laboris kun kontenta koro. La mar-feino naskis belegan filineton, poste du fortajn filetojn; kaj ŝi estis bonega patrino.

Tamen, Patriko, kiel multaj viroj, ne estis sufiĉe saĝa, por prizorgi ĉion bonan, kion li posedis. Iam li volis viziti la urbon, kaj lasis la edzinon sola en la hejmo, ĉar ŝi havis multajn taskojn por okupi sin.

Dum ŝi ordigis ĉion, ŝi deprenis fiŝ-reton de la muro; kaj malantaŭ ĝi, en truo en la muro, ŝi trovis sian sorĉan ĉapon.

Ŝi tremis, kaj devis eksidi.

Ŝi povos revidi la reĝan patron, la patrinon, la gefratojn, la submaran palacon kun perloj sur ĉiu muro.

Sed ŝi pensis ankaŭ pri Patriko. Li sincere amis ŝin dum jaroj, kaj ŝi amis lin.

Ŝi decidis, ke ŝi ne forlasos la edzon kaj infanojn; ŝi nur kaptos la okazon viziti la familion sub la maro, kaj poste ŝi revenos. Do, ŝi kisis la bebon en la lulilo, kaj diris al la filino, “Katerina, ankaŭ mi devas fari etan viziton. Prizorgu viajn fratetojn kaj estu bona knabino; mi baldaŭ revenos.” Ŝi kuris al la marbordo, surmetis la ĉapon, kaj plonĝis en la akvon.

Kiam Patriko revenis, Katerina povis nur ripeti la diraĵon de la patrino; sed najbarino aldonis, “Mi vidis ŝin kuri al la maro; en la mano ŝi portis ĉapon, kiun mi ne rimarkis antaŭe.” Patriko kuris al la kaŝ-truo, kaj tordis la manojn.

Sed li neniam provis edzinigi alian virinon. “Ŝi revenos,” li insistadis. “Ŝi revenos; ŝi nur vizitas la familion. Mia bona edzino neniam forlasus min kaj la infanojn.” Kaj estis vere, ke ĉiu parolis pri ŝi, kiel pri modela edzino kaj bonega patrino.

Estis ankaŭ vere, ke ŝi amis la edzon kaj la infanojn. Ŝi amegis ilin sur la vojo, ŝi amegis ilin sur la sablo, kaj kiam la malvarma griza maro ektuŝis siajn piedojn. Sed tuj kiam ŝi surmetis sian ĉapon kaj malaperis sub la maron, ŝi forgesis ĉion, kio apartenas al la tero.

Novaj Proverboj

Kiu neniun respektas, propran vidon difektas.

Ĝuu la tutan bazaron, sed pripensu la najbaron.

Edzo tirana – soldato satana; tirana edzino – terura destino; ama paro egala – brilas lampo kristala.

Kiu dungas torturistojn, jam krucumas multajn Kristojn.

Ne pasigu la trimestron, algapante la fenestron.

Lingvaj Bariloj

Antaŭ kelkaj jaroj, turkino vizitis Aŭstralion. Subite dum ŝi turisme rigardis la urbon, grava malsano atakis ŝin. Ŝi sukcesis trovi hospitalon, sed tie ne povis klarigi siajn simptomojn. Kuracisto, pro perplekso, sendis ŝin tuj al alia hospitalo. De tie oni sendis ŝin al alia. Pluraj alte kvalifikitaj fakuloj penadis kompreni, kion ŝi deziras klarigi, ĝis ŝi mortis. Nur dum postmorta esplorado oni diagnozis malsanon, kontraŭ kiu ekzistas efika kuracado — se oni tuj aplikas ĝin. Ŝi mortis nur pro manko de komuna lingvo...

En Usono en 1908, eksplodo en karb-minejo mortigis 154 ministojn. Poste okazis enketo. La fina verdikto senkulpigis la kompanion; la ĉefa kaŭzo de tiu tragedio estis, ke multaj ministoj, novaj enmigrintoj, ne komprenis la anglalingvajn instrukciojn kaj avertojn.

40. REALAJ MONSTROJ DE LA PRATEMPO

La mirinda homa menso povas imagi monstrojn, intermiksante erojn de videblaj, realaj bestoj aŭ objektoj, kaj homajn dezirojn aŭ timojn. Iu ajn enciklopedio pri la natura mondo priskribas multajn bestojn, laŭ homaj konceptoj ege strangajn: ni pensu nur pri, ekzemple, ekinoj en la maro kaj erinacoj sur la tero; loligoj, omaĵoj, hipokampo; tukanoj, pelikanoj, pingvenoj, pavo; testudoj, igvanoj, molokoj — tiuj aŭstraliaj lacertoj kovritaj per grandaj dornoj; ĥameleonoj kaj ĥelonioj; vespertoj, talpoj, manisoj, rinoceroj, orikteropoj, ĝirafoj, fakoĉeroj... la reala mondo foje tre streĉas nian kred-kapablon. Kompreneble, niaj konceptoj pri strangeco devas esti iom subjektivaj. Kredeble rinocero ŝajnas pli gapige eksterordinara al islandano ol al kenjano, moloko al arabo ol al aŭstraliano, kaj tiel plu. Ankaŭ estas amuze kaj pensige, imagi kiel *homo* aspektus al elefanto aŭ pando, kiu kapablu envortigi siajn observojn. Sed la mirkapablo de la homo estas unu el niaj grandaj intelektaj kaj moralaj trezoroj.

Eble eĉ pli miriga ol la nuntempa varieco de la vivanta mondo, laŭ homaj konceptoj, estas la fakto, ke tuta aro de tre diversformaj bestoj ekzistis, kaj tute pereis, antaŭ la apero sur la tero de la Homo.

La 'mondhistorio', kiu temas pri homaj civilizacioj, estas mallonga parto de la historio de la mondo. La tero estas probable aĝa almenaŭ 4 600 milionojn da jaroj; homoj de nia specio aperis antaŭ nur 35 000 jaroj kaj io rekoninda kiel esence homa specio antaŭ nur 800 000 jaroj.

Ni vivas en la erao *kenozoiko* («moderna vivo»), kiu jam daŭris entute ĉirkaŭ 65 milionojn da jaroj; nia nuna parto de la kenozoiko estas la *kvaternaro*, la lastaj du milionoj da jaroj.

La antaŭa erao estis la *mezozoiko*, kiun geologoj subdividas en la *triaso*, *ĵuraso* kaj *kretaceo*. La unuaj mamuloj aperis iam dum la triaso, antaŭ ĉ. 225 000 000 da jaroj; la unuaj veraj birdoj dum la kretaceo antaŭ ĉ. 136 000 000 da jaroj.


Sed dum la ĵuraso kaj la kretaceo regis precipe *reptilioj*, pli populare *rampuloj*; estis la periodo de la dinosaŭroj. La nomo devenas de du grekaj vortoj, kaj signifas «terura lacerto».

Niaj scioj pri dinosaŭroj estas limigitaj, ĉar ili ĉiuj pereis antaŭ ĉ. 70 000 000 da jaroj, en ia tergloba kataklismo, pri kiu ekzistas tre diversaj teorioj. Neniu homo vidis vivantan dinosaŭron. Ni devus ignori tiujn filmojn kaj karikaturojn, kiuj montras prahomojn batalantaj kontraŭ dinosaŭroj aŭ eĉ bakantaj ilin; ni alvenis nur ĉirkaŭ sesdek naŭ milionojn da jaroj malfrue! Almenaŭ laŭ nia ĝis nun konata tempo-skalo.

Mirinda estas la laboro de sciencistoj pri tiuj bestoj. La plej fruaj sciencmetodaj esploroj pri mistere granda fosilia osto estis verŝajne en 1677, sed seriozaj esploroj okazis plejparte dum la deknaŭa kaj la nuna jarcentoj. Nuntempaj sciencistoj disponas pri multaj brile elpensitaj rimedoj por esplori fosiliojn, kaj pli kaj pli detale rekonstruas dinosaŭrojn kaj iliajn viv-manierojn. Sciencistoj kunmetis fragmentajn fosiliajn ostojn kiel grandajn, malfacilegajn puzzleojn kun multaj mankantaj pecoj; zorge atentis tre malgrandajn indikojn pri kia estis ia haŭto, kia estis ia cerbo, kie muskoloj ligiĝis, kaj simile, kaj nun ekzistas tuta fako de mezozoika zoologio — scienco pri bestoj, kiujn neniu vidis! Evoluantaj metodoj ebligas pli kaj pli precizajn rekonstruojn; kvankam multaj misteroj kaj duboj restas: ekzemple, oni ĝenerale opiniis, ke dinosaŭroj, kiel modernaj reptilioj, estis malvarmsangaj, sed en 1975 eminenta brita fakulo, A.J. Desmond, eldonis libron, sugestantan, ke eble ili estis varmsangaj. Sciencistoj ne scias, kiaj estis la koloroj de dinosaŭraj haŭtoj. Ofte restas duboj pri la dieto de iu specio. Ni ankoraŭ ne scias, kiel ili pereis. Oni daŭre esploras. Jen realaj monstroj, ege strangaj.

Tiuj dinosaŭroj, kiuj plej facile kaj forte mirigas nin, estas kelkaj gigantaj bestoj, kies nuraj dimensioj estas senspirigaj. En muzeo en orienta Berlino ekzistas skeleto, trovita en Tanzanio en 1909: skeleto de *brakiosaŭro** («ŝultro-lacerto») 135-165 milionojn da jaroj aĝa. Tiu skeleto estas 22,68 metrojn longa, kaj la vivanta besto probable pezis 77 tunojn. En 1961 oni trovis en Francujo fosiliajn dinosaŭrajn ovojn, 300 mm longajn kun diametro de 255 mm. Ni pensu pri la kutima rilato inter la grandeco de ovo, kaj tiu de plenkreska fiŝo aŭ birdo!

La *diplodoko* («duobla trabo») estis eksterordinare longa dino-
saŭro, kiu manĝis plantojn per siaj krajonformaj dentoj, probable
plejparte en marĉoj aŭ lagoj. Ĝia longega kolo, kun plata kapo,
iom pensigas pri serpento. De la buŝo ĝis la vostopinto ĝi povis esti
27 metrojn longa: ni imagu vadantan beston, longan kiel tri aŭto-
busoj. Ĝi pezis eble 40 tunojn.



La *igvanodonto* («igvano-dento»), longa ĉirkaŭ dek metrojn,
estis alia milda plantmanĝanto, kiu havis nur malgrandajn antaŭajn
krurojn kaj normale piediris sur du piedoj, kiel ni; en tiu pozo ĝi
staris ĉ. kvin metrojn alta; se eblus tia renkontiĝo, besto, eĉ mal-
rapida kaj senmalica, kiu estas trioble pli alta ol homo, estus sufiĉe
hezitiga renkontito.

La *anatosauŭro* («anaso-lacerto») estis proksimume same granda kiel la igvanodonto, sed manĝis akvoplantojn, kaj povis renversi sin kiel anaso, por mordi radikojn en lagoj. Eĉ la makzeloj, eble metron longaj, sugestas la bekon de moderna anaso. Sed ni imagu ion pli altan ol la kiosko en tiu parko, kie ni ridetas je la anasoj!

Eĉ pli kolosa estis la etcerba, senmalica, plantmanĝanta *brontosauŭro* («tondro-lacerto»), longkola kaj longvosta, iom simila al diplodoko, sed kun trunko pli dika kaj peza proporcie al la kolo, vosto kaj kruroj; ĉirkaŭ 20 metrojn longa, brontosauŭro pezis eble sesdek tunojn.

Sed la plej granda dinosaŭro, kiun la scienco esploris ĝis 1980, estas la *supersauŭro*, trovita en Usono en 1972. De la fragmentaj fosiliaj ostoj oni povas dedukti, ke tiu besto, laŭ formo iom simila al brakiosaŭro — longaj kolo kaj vosto, la antaŭaj kruroj pli longaj ol la malantaŭaj, dika trunko — probable estis 22,8 metrojn alta de plando ĝis la verto, do pli alta ol sepetaĝa apartamentaro. Ĝi probable pezis 255 tunojn. La plej granda afrika elefanto iam ajn pesita pezis 11,96 tunojn...

Malpli granda, sed pli terura, estis la plej granda el la karnmanĝantaj dinosaŭroj, la *tiranosaŭro* («tirana lacerto») kiu iris sur du piedoj, staris 5,63 metrojn alta kaj pezis preskaŭ sep tunojn; kaj la *alosaŭro**¹ («saltanta lacerto»), kiu staris iom malpli alta, eble 4,87 metrojn, sed estis pli dika. Tiuj bestoj havis malgrandajn antaŭajn krurojn, kiuj utilis kiel forkoj pli ol kiel armiloj; ili verŝajne mortigis sian predon per la dentoj kaj per ungegoj sur la malantaŭaj piedoj, poste helpis sin per la antaŭaj piedoj, dum ili disŝiris la karnon. Muzeo en Nov-Jorko posedas skeleton de brontosauŭro, kies voston alosaŭro maĉis, kaj kelkajn el la maĉintaj dentoj.

Jen la aŭtentikaj drakoj de la pratempo, bestoj kiuj verë povus krakmaĉi vilaĝanojn kaj virgulinajn kaj tremigi la plej kuraĝajn kavalirojn, se nur ili ekzistus samtempe. Memoroj nepre ne, sed eble naivaj rigardoj al fosilioj, iom helpis sugesti la fantazion pri drakoj; sed estis pli probable ke la fantaziantoj nur pligrandigis ekzistantajn, viditajn bestojn — eble krokodilojn, eĉ lacertojn, ser-

1. *alosaŭro* eble ne estos la definitiva nomo; sciencistoj ankoraŭ diskutas pri la nomo de tiu besto. En la latina kelkaj skribas *allosaurus* kaj aliaj preferas *antrodemus*.

pentojn aŭ tritojn... Nur jarcentojn poste, sciencistoj trovis ke praa naturo paralelis niajn artojn.

Tiu praa naturo enhavis ankaŭ marajn monstrojn: *ihťiosaŭrojn* («fiŝlacertojn»), ĝis dek metrojn longajn, fiŝosimilajn, kvankam ili estis naĝantaj reptilioj; *plesiosaŭrojn* («proksimajn-lacertojn»), kun longaj serpentsimilaj koloj, dikaj trunkoj, kaj grandaj padelformaj naĝiloj anstataŭ kruroj; *mozosaŭrojn** («lacertoj de la rivero Mozo»), similajn al kolosaj krokodiloj ĝis 11 metrojn longaj, sed kun padelformaj naĝiloj.

Iam ekzistis ankaŭ monstroj de la aero: flugantaj reptilioj, *pterosaŭroj** («flugilo-lacertoj»), kiuj probable glisis en la aero kaj ne flugis laŭ birda maniero. La *pteranodonto** («flugilo-dento») estis preskaŭ ok metrojn larĝa de flugilpinto al flugilpinto, do granda kiel eta aeroplano, kun bekego, kaj speco de krona kresto preskaŭ same longa, kiel la beko; la *ramforinko** («hokbek-nazo») estis eble unu metron larĝa, sed kun maldika vosto pli ol duonmetron longa, kun foliforma plata pintornamaĵo; la *pterodaktilo* («flugilo-fingro»), granda kiel nia aglo, havis ne nur fortajn unghavajn piedojn, sed kvazaŭ du unghavajn 'manojn' sur la antaŭa rando de la flugiloj.

Pterosaŭroj ne havis plumojn; sed en 1970 sovetia sciencisto, A.G. Ŝarov, trovis en Kazahlando fosilian pterosaŭron, kiu tre modifis nian ĝistiaman bildon; ĉar estis klare, ke tiu pterosaŭro havis longan, densan, probable molan hararon, kaj ke tiuj bestoj estis varmsangaj. Nun ŝajnas eble, ke la kolosa *pteranodonto* estis kovrita per brile blanka hararo.

Certe sciencistoj en diversaj landoj ankoraŭ malkovros multajn novajn faktojn. Sed ni jam scias, ke tiuj bestoj estis tre diversaj, kvankam ne ĉiuj kunekzistis samtempe, kaj jarmilionoj disigis plurajn grupojn.

La giganta *spinosaŭro** havis sur la dorso dornojn ĝis 1,8 metrojn longajn; ili subtenis kvazaŭ karnan velon. Similan velon, sed multe pli altan proporcie al la besto, havis la *dimetrodonto**, alia prabesto granda, sed ne dinosaŭro. Tiuj bestoj pioniris, per la dorso-veloj, tiun ekspluatadon de suna energio, kiun nia nuntempa teknologio ekevoluigas konscie. La bestoj turnis siajn velojn al la sunradioj, kaj tiel ili sorbis multan varmon; aŭ, se ili sentis sin tro varmaj, ili alfrontis la sunon, tiel ke la veloj ne povis sorbi varmon.

La *stegosaŭro** defendis sin per duobla vico de ostaj platoj, kiuj staris vertikale sur la dorso, kaj kvar grandaj akraj kornoj sur la vosto. La *polakanto** variigis tiun aranĝon; ĝi havis dek ok kornojn sur la dorso, dek kvar plantitajn en du vicoj sur la vosto kaj du kornojn sur la vostopinto. La *triceratopso**, pli ol naŭ metrojn longa kaj tre peza, havis du kornojn preskaŭ unu metron longajn, kaj malgrandan antaŭan kornon. La *ankilosaŭro**, pli ol kvar metrojn longa, havis relative platan korpon iom testudoforman sur kvar dikaj kaj mallongaj kruroj; sur la dorso kuŝis multaj ostaj platoj; ambaŭflanke elstaris dek kvar dikaj pintoj, kurbaj kornegoj; kaj la vosto estis granda osta klabo kun kvar aliaj pintaj kornoj. Kaj la *strutomimo** surprize similis al nuda struto, sed kun du mallongaj antaŭaj kruroj, kiujn ĝi uzis kiel manojn por pluki fruktojn, eble por kapti malgrandajn bestojn.

Eble unu el la plej timigaj dinosaŭroj estas specio, de kiu la homo konas ĝis nun nur la ostojn de du antaŭaj kruroj kun trifingraj, grand-ungaj manoj; oni trovis ilin en Mongolio en 1965. Nur 'brakoj kaj manoj' — sed nur la mano estas ĉ. unu metron longa! Ne mirinde, ke sciencistoj nomis tiun beston *deinokeiro**, kun la signifo «terura mano»! Kia estis la cetero? Ekzistis tamen dinosaŭroj, kiujn ni preskaŭ dezirus porti hejmen kiel dombestojn. La *nanosaŭro** estis granda nur kiel kato; la *kompsognato**, kiu kuris sur du piedoj, kaj kies aspekto iom sugestas lacerton, kiu sopiras iĝi kanguruo, estis nur 66 cm longa; kaj en Argentino, en 1977, sciencistoj trovis fosiliajn ostojn de nova dinosaŭro ne pli granda ol turdo, kun kranio 32 mm longa. Eble ĝi estis neplenkreskinta, sed apenaŭ povus kreski al granda besto.

Ĉu estas absolute certe, ke neniu dinosaŭro nun ekzistas? Laŭ nunaj sciencaj scioj, jes; kvankam pluraj sciencistoj asertas, ke iasence niaj nunaj birdoj estas pli parencaj al ili, ol oni pli frue opiniis. Sed...

→ En 1938 sciencistoj trovis vivantan *celakanton*, grandan fiŝon, kiun ĝis tiam oni kredis malaperinta antaŭ 70 000 000 da jaroj; poste, oni kaptis multajn aliajn.

→ En Usono trifoje okazis en 1973 misteraj atakoj kontraŭ knaboj, kaj forporto de bovido; laŭ seriozaj asertoj, la atakanto estis birdeca estaĵo, larĝa ĉirkaŭ kvar metrojn inter la flugilpintoj. En 1890, du maturaj viroj pretendis, ke ili vidis ion similan. Ja

ekzistas indiana tradicio pri “la Tondrobirdo, kiu mallumigas la Sunon, kiam ĝi superflugas”. Unu el la hipotezoj pri la neniam solvita mistero estas, ke ia prabirdo aŭ eĉ vera pterodaktilo malmultnombre ekzistas ankoraŭ!

Multaj pretendis, ke ili iam vidis gigantajn marserpentojn, kaj multaj tiaj aferoj restas misteraj; ni ankoraŭ ne scias, precize kio povas troviĝi en la plej profundaj oceanopartoj. Ekde 565 p.K. ĝis nun, multaj homoj ofte kleraj kaj respektindaj asertis, ke ili vidis ian monstron en la lago Ness en Skotlando. Oni ankoraŭ ne sukcesis aŭ identigi la beston, aŭ pruvi ĝian ne-ekziston. Simila enigmo restas pri la lago Okanagano en Kanado. En 1980 oni raportis pri ia lagomonstro ankaŭ en Tibeto, kie io eliris la lagon Ŭenbuo kaj formangiĝis unu bovinon kaj unu homon; lokaj farmistoj kaj administrantoj atestis, ke ili vidis ion. Kelkaj sciencistoj inklinas kredi, ke ankoraŭ vivas, en kelkaj profundaj akvoj, kelkaj plesiosaŭroj!

Ni konstata, ke ni ankoraŭ ne scias ĉion. Kaj ne nur pri dinoŝaŭroj...

Pensiga Diro

“La plej subevoluinta teritorio en la mondo troviĝas — sub niaj ĉapeloj.”
Ŝajne anonima

Statistika Strangajo

Iu kalkulis, ke homo, kiu vivas sepdek jarojn, kaj piediris dum nur dudek minutoj ĉiutage, iris distancon egalan al la ekvatoro. La plimulto el ni probable piediras, dum la vivo, ĉirkaŭ 400 000 kilometrojn.

Novaj Proverboj

Li laŭte sin laŭdas; nur eĥoj aplaŭdas.
Ne punu la hundon per bato, ĉar kolbason ŝtelis la kato.
Prirevu diamantojn, sed ne forgesu viajn gantojn.
Virinaro subigita — popolduono rubigita.

41. FABELOJ EL RUMANUJO

Rumanujo estas lando de orienta Eŭropo, kun marbordo ĉe la Nigra Maro. En Rumanujo troviĝas granda tereno por tre sukcesa gren-kultivado, rapide kreskanta industrio, multa petrolo, natura gaso, karbo, uranio kaj multaj aliaj valoraj mineraloj, inter ili unu el la plej riĉaj sal-minejaroj de la mondo. Troviĝas ankaŭ belega montaro, grandaj arbaroj, kaj granda natur-rezervejo sur la delto de Danubo. Inter la interesa faŭno de la lando oni ankoraŭ povas foje vidi eŭropajn vulturojn, ursojn, ĉamojn kaj linkojn. Preskaŭ la tuta granda agrikulturo de la lando estas en kolektivoj. Rumanujo havis ŝtorman, suferigan historion, kaj iĝis plene aŭtonoma nur en 1878. Lastatempe okazis granda progreso. Analfabeteco preskaŭ ne ekzistas plu; la provizo de elektro tre pligrandiĝis; enlanda transportado multe pliboniĝis kaj granda fer-kaj-ŝtala industrio evoluis. La ĉefurbo estas Bukareŝto.

Estas multaj vidindaĵoj en la lando, kaj turismo nuntempe rapide evoluas; en 1978 aperis oficiala turisma prospekto en Esperanto.

La rumana lingvo ne estas slava, kiel oni eble atendus, sed latinida lingvo kiel la hispana, franca aŭ itala — kvankam ĝi enhavas multajn slavajn vortojn.

Oni pioniris Esperanton en Rumanujo tre frue; vortareto aperis jam en 1889; en 1909 okazis la unua rumana landa Esperanto-kongreso; en 1910 oni fondis gazeton (tiutempe komunan al rumanaĵ kaj bulgaraj esperantistoj). Sed Esperanton en Rumanujo terure batis la du mondmilitoj, la ekonomia krizo inter la militoj; kaj persekutoj dum la intermilitaj jaroj, kiam la registaroj kredis, ke la Esperanto-movado estas kaŝa komunista organizo. Post 1956 la movado komencis denove iom progresi en Rumanujo, malgraŭ granda malhelpo de fama rumana lingvisto, kiu malaprobis Esperanton, kaj kies sintenon sekvis diversaj ĵurnalistoj. Ekde 1978 montriĝis signoj de pli granda progreso.

Kvankam la ne malmultaj, ofte fervoraj, rumanaj esperantistoj suferadis pro miskomprenoj, kalumnioj kaj multaj materiaj kaj spiritalaj malhelpoj, Rumanujo kontribuis al la tutmonda esperantistaro tri elstarajn pionirojn.

Andreo Cseh [ĉe] elpensis, multe uzis, kaj brile instruis, unikan instru-metodon, la konatan *Ĉe-metodon*; tre detale elpensitan rektmetodan kurson, per kiu oni povas instrui Esperanton sen lernolibroj kaj aliaj kostaj helpiloj, al homoj, kiuj ne jam regas gramatikajn terminojn kaj konceptojn. Ĝi tre taŭgas por amasa lernado. Ĉe-instruistoj, inter ili Lidja Zamenhof kaj Julio Baghy, faris tre valoran laboron en multaj landoj; kaj multaj alispecaj instruistoj lernis utilajn ideojn por klarigi apartajn punktojn, de tiu metodo. Cseh estis ankaŭ la fondinto de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago, kaj de la gazeto *La Praktiko*.

Ekzistas iom da dubo, ĉu Cseh estis pli 'rumana' ol 'hungara', ĉar li naskiĝis, en 1895, en urbo kiu tiutempe estis en Aŭstrio-Hungarujo, kaj post 1919 situas en Rumanujo. Sed liaj laboroj estis plejparte en Rumanujo; li fondis la Esperanto-Centron Rumanan k.t.p. Verŝajne li mem kaj liaj admirantoj kredis lin unue 'mond-civitano'.

Tiberio Morariu, naskita en 1901, estis Ĉe-instruisto, tradukisto, verkisto, redaktoro en Esperanto, en Rumanujo ĝis 1928, poste en Svedujo. Li instruis milojn da kursanoj, kuraĝigis aliajn esperantistojn, estis tre kapabla esperanta redaktoro kaj sukcesis samtempe trakti Esperanton kiel lingvon por la amasoj, amikigilon por ĉiuj, kaj konstante penadi altigi la kulturnivelon de la esperantistoj. Inter liaj valoraj tradukoj el la rumana, *Niĉjo Mensogulo* de Ion Alexandra Brătescu-Voinești restas elstare bela, kortuŝa verko nepre leginda.

Sigismund Pragano, rumana judo, naskita en 1907, eldonis la rumanan «ŝlosilon» kaj multe helpis en la rumana movado ĝis 1931, kiam li migris al Nederlando, kie li daŭrigis valorajn laborojn, notinde kiel docento pri Esperanto dum multaj jaroj en la universitato de Amsterdamo. Ankaŭ li tradukis kelkajn rumanajn verkojn.

Pluraj aliaj rumanoj faris valorajn kontribuadojn al Esperanto internacie: menciindaj estas, ekzemple, Mișu Beraru, minora sed meritplena verkisto, kaj Henriko Harabagiu, organizanto.

La rumanoj havas riĉan folkloron, kun multaj fabeloj. Jen specimenoj.

La Abelo kaj la Araneo

En la frua tempo, vidvino havis filon kaj filinon. Ŝi estis tre malriĉa, kaj kiam la geknaboj estis plenkreskaj, ili devis tuj foriri al la urbo kaj serĉi laboron. La junulino trovis lokon, kie oni konstruis multajn domojn, kaj oni dungis ŝin kiel portistinon de brikoj. Ŝi pene portis brikojn en leda antaŭtuko, kaj morteron sur kvadrata tabulo. La junulo dungigis ĉe teksisto, kaj lernis teksti.

Venis la tempo, kiam la multe suferinta patrino grave malsaniĝis. Kiam ŝi konstatis, ke ŝi baldaŭ mortos, ŝi petis najbaron, sciigi la gefilojn.

Li atingis la konstruatajn domojn, kie li vidis la filinon kun brikoj en la antaŭtuko. Tuj ŝi faligis la brikojn kaj ekkuris al la vilaĝo. "Povra panjo! Ŝi ne mortu sola!"

La najbaro atingis la filon, kiu tekstis. "Mi ne povas veni. Vidu, mi havas laboron. Ŝi devos morti sen mia helpo; mi devos resti tie ĉi."

La najbaro reiris al la vilaĝo; la filo staradis antaŭ sia teksilo, grumblante al si mem pri senkonsideraj entruduloj, kiuj neniam komprenos, ke viroj havas siajn laborojn.

La filino, anhelante, kun piedoj sangantaj, venis tra la pordo de la mizera dometo; kaj la patrino leviĝis sur la lito kaj etendis la brakojn al ŝi.

Ĉirkaŭprenante kaj kisante la filinon, ŝi pene flustris, "Kara, vi estas tiel dolĉa, kaj nun vi dolĉigas mian lastan tagon. Estu benata. Estu ĉiam dolĉa kaj faru por la mondo dolĉaĵojn."

Venis la najbaro, kaj kontraŭvole klarigis al la agonianta patrino, kion diris la filo.

"Okazu al li laŭ lia propra volo!" ŝi diris, plorante. "Li ja teksadu konstante, kaj ne havu ĝojon pro ĝi. Aliaj detruu tion, kion li pene faris. Li restu izolita en angulo!"

Kaj baldaŭ la malpeza, blankhara vidvino mortis, kun la kapo sur la brusto de la filino.

La junulino iĝis abelo. Ekde tiam la abelo estas aktiva, laborema, utila. Ĝi preparas por ni homoj mielon, kiu dolĉigas niajn

kukojn kaj kompotojn, bongustigas nian panon kaj donas al ni medon. Ĝi preparas por ni la bonodoran vakson, el kiu ni faras kandelojn, kiujn ni starigas antaŭ la ikonoj en la preĝejo, aŭ bruligas apud la mortantoj kaj mortintoj. Feliĉa kaj benata estas la abelo.!

Sed la filo iĝis araneo. Kaj ekde tiam la araneo nur sidas en anguloj, kaj teksas siajn retojn; sed homo tuj forbalaas la reton, kiam li rimarkas ĝin.

Perdrikino kaj Perdrikidoj

Perdrikino nestis en grenkampo ĵus plugita, kaj sekure prizorgis siajn ovojn, kaj poste siajn idojn, inter la tritiko verda kaj poste flaveta.

Sed kiam la tritiko estis seka kaj orkolora, venis la falcistoj, kaj post ili ĉasistoj kun bojantaj hundoj. La perdrikidoj ankoraŭ ne estis sufiĉe fortaj por forflugi.

La perdrikino memoris pri monto, trans la maro; tie ŝi iam havis sekuran lokon tre trankvilan. Ŝi decidis porti la idojn tien.

Ŝi do metis la plej aĝan idon sub sian flugilon, kaj forflugis. Ŝi flugis ĝis la marbordo, kaj tie eksidis, por ripozi, sur branĉo de arbo, kiu super-elstaris la maron. “Ho, kara mia,” ŝi diris, “nun vi komprenas patrinan amon; jen mi lacigas min, kaj riskas mian vivon, por savi vin.”

La unua perdrikido respondis, “Kaj kiam ni estos plenaĝaj, patrino, kaj vi estos malforta, ni same prizorgos vin.”

La perdrikino sentis pezan malĝojon, kaj la ido iĝis ege peza; ŝi movis la flugilon tiel, ke la perdrikido falis en la maron kaj dronis.

Laca kaj deprimita, ŝi revenis al la grenkampo, kaj metis la duan idon sub la flugilon. Denove ŝi forflugis; denove, por ripozi antaŭ la flugado super la maro, ŝi eksidis sur la sama arbo.

“Ho, kara, nun vi komprenas patrinan amon! Mi lacigas min kaj riskas mian vivon, por porti vin en sekuran lokon.”

“Ne timu, patrino; kiam ni estos fortaj, kaj vi estos maljuna kaj malforta, ni same bone prizorgos vin.”

Subite tiu ido ŝajnis plumbe peza, kaj la perdrikino lasis ĝin fali en la maron.

Mortlaca, ege malfeliĉa, ŝi refluĝis al la grenkampo, prenis la plej junan idon sub la flugilo, kaj por ĉiam forlasis la neston, dum hundoj bojis sub ŝi.

Iel ŝi atingis la arbon apud la maro, kaj eksidis sur la sama branĉo.

“Ho, kara etulo, nun vi komprenas patrinan amon! Mi lacigas min, mi riskas mian vivon, miaj flugiloj doloregas; sed nenia laboro estas tro peza por patrino, se ŝi havas idojn.”

La eta perdrikino respondis: “Ne estu malgaja, panjo dolĉa! Kiam ni estos plenkreskaj, ni prizorgos niajn etajn idojn same ame, same sinofere.”

La perdrikino sentis grandan, vigligan ĝojon. Kaj ree ekflugis, kaj portis la idon al sekura loko sur la monto. Ĉar jen, la tria ido diris la sinceran veron.



Post tiuj du fabeletoj iom melankolie pensigaj, nia lasta rumana fabeleto estas pli amuza, kaj nepre plaĉos al ĉiuj, kiujn iam ĝenis tro scivolemaj najbaroj.

Kiel Kreiĝis la Pego

Iam la bona Dio, rigardante el la ĉielo, rimarkis maljunulinon, kies nazo estis tre longa. Nu, longa beko ne estas peko! sed tiu maljunulino emis konstante ŝovi tiun nazon en fremdan vazon. Ŝi ĉiam volis sciiĝi kies hejmo ne estas perfekte pura, kiu havas ŝuldojn, kies pano ne bone bakiĝis, kiu kisis kiun malantaŭ la stalo, kiun vizitis policano, kaj pri mil aferoj, kiuj devus ne koncerni ŝin. Kaj kiam ŝi metis la longan nazon en ies domon, kaj spionis pri privataj problemoj, ŝi samtempe klaĉis pri la faroj de aliaj, kaj aldonis ion al tiu rakonto, kaj deprenis detalon de alia rakonto, tiel ke ŝi prezentis ĉion kiel eble plej malice kaj malfavore. Tial ŝi ĉiam plimalbonigis ĉion malbonan, kaj eĉ bonajn aferojn iel nigrigis, tiel ke ŝi kaŭzis multajn suferojn kaj nenecesajn malfacilaĵojn.

La bona Dio prenis grandan sakon, kaj plenigis ĝin per vespoj, formikoj, kuloj, skaraboj, tabanoj, muŝoj kaj aliaj insektoj. Poste Li tre bone ligis la buŝon de la sako, kaj ordonis al anĝelo venigi la longnazan maljunulinon.

Kiam ŝi staris antaŭ Dio, kaj tre atente ĉirkaŭrigardis, esperante vidi ian interesan mankon aŭ misfaron en la ĉielo, Dio donis al ŝi la zumantan sakon.

“Prenu ĉi tiun sakon. Portu ĝin hejmen kaj gardu ĝin por mi. Obeu min, kaj vi estos benata. Sed, se vi pro scivolemo ŝovos vian nazon en ĉi tiun sakon, vi ne ĝojos pro la enhavo.”

“Ho, nepre ne, Disinjoro!” kriis la maljunulino. “Mi ja ne malobeos al la volo de Dio!” kaj ŝi forportis la sakon; facile, ĉar peza ĝi ne estis; ĝi nur zumis.

La maljunulino, denove sur nia meza mondo, trairis du kampojn, kaj tiam ŝia scivolemo venkis ŝin.

“Mi vere devas sciiĝi, ĝuste KIO estas en ĉi tiu sako!”

Ŝi malligis la buŝon de la sako, kaj miloj da insektoj ĝoje elflugis. Multaj koliziis survoje kontraŭ ŝian longan nazon, kaj kelkaj pikis ĝin; sed post nur unu minuto la sako estis malplena, kaj la insektoj estis ĉie: sub la tero, inter herberoj kaj folioj, sub arboŝeloj, super lagetoj, ĉie.

Konsternite, timegante, la maljunulino penis rekapti la insektojn; sed ŝi sukcesis ŝovi nur kelkajn en la sakon. La plimulto estis jam tute for.

Sonis el nubo la voĉo de Dio:

“Kial vi malobeis min? Kie estas miaj tabanoj kaj kuloj, vespoj kaj muŝoj, kiujn mi konfidis al vi? Nun vi iĝos birdo, por ke vi povu repreni la insektojn. Kiam vi estos repleniginta mian sakon, mi redonos al vi vian homan formon.”

“Ve al mi!” kriis la maljunulino. “Mi estas malinda de la dia gra-grak! grak! grak!”

Ŝi estis jam pegoj; pegoj, kun longa beko; kaj ŝi komencis serĉi la insektojn, kaj senĉese trapikis la arboŝelojn por elfosi ilin: frap! frap! frap!

Ŝi vere penadis replenigi tiun sakon; sed ŝi ankoraŭ ne finis la laboron, kaj tial ni ankoraŭ povas vidi la pegon sur la arbotrunko, kaj rimarki ĝian longan bekon.

Novaj Proverboj

Ĉiun sur tero tuŝas sufero: ne plisuferigu, teron ne inferigu.

Ĉiu havas mismemon, kiu bezonas subpremon.

Pafilon ni obeas, sed interne akre neas.

42. KIO ESTAS NIA PLEJ GRANDA MALŜPARO?

Ni homoj plejparte sentas, tra la mondo, ke avareco estas malbona; ke estas pli saĝe, vivi komforte, ol morti milionulo; ke montri helpeman intereson pri aliaj estas pli bele, ol enspezi multan interezon. Sed ni ankaŭ sentas, ke malsaĝa, senproportia malŝparo estas malbona. Multaj popoloj havas proverbojn laŭ la senco, “Ne malŝparu sendanke, por ne suferi manke.”

Nuntempe ni ankaŭ ekkonscias pri la malsaĝo de kolektiva malŝparado: ke ni tro senpripense foruzas la mondajn stokojn da petrolo, fiŝoj, akvo, arboj kaj aliaj materialoj; aŭ ni detruas malpurigas teron, maron, eĉ aeron. Eble ni bezonas iom relerni tiun tradicion de kelkaj orient-eŭropaj regionoj, ke tiu, kiu faligas panpecon, petas ĝian pardonon: ian estimon al utilaj objektoj.

Per modernaj komunikiloj, ni ankaŭ pli kaj pli konscias, kiel suferoplena ankoraŭ restas la mondo: kiom da homoj malsatadas, eĉ mortas pro malsato; ne havas taŭgajn hejmojn; estas turmentataj de malsanoj eviteblaj, kaj ne ricevas kuracadon; laboradas penege, eĉ sen bonaj iloj; neniel kleriĝas, neniam ferias, preskaŭ nenion elektas laŭ prefero. Ĉiuj el ni, kiuj disponas pri mono por io krom necesajoj, havas ian devon, pripensi kiom ni rajtas elspezi por propraj plezuroj, kiom ni devas dediĉi al ia altruisma celo.

Niaj difinoj de neceso estas tre diversaj, laŭ niaj kutimaj vivniveloj; kaj preskaŭ ĉiu deziras foje regali sin per ia luksaĵo — malriĉulo same kiel riĉulo. La plimulto el ni sentas, ke etaj regaloj igas la vivon tolerebla. Ni bezonas niajn festojn, niajn belajn momentojn, kiuj igas nin pli bonhumoraj, kompensas kaj konsolas nin, gajigas familian vivon, cementas amikecon. Unu kredas siajn festotagajn ŝaf-femuron kaj mielkukojn princa regalo, post semajnoj kun pano kaj lentoj; alia, kies ĉiutagaj manĝoj estas variaj kaj bonaj, deziras eble kaviaron, rarajn fruktojn, likvorojn; sed ambaŭ volas foje festi.

Ambaŭ ankaŭ probable sentas, ke ĉiu homo bezonas kelkajn plezurojn; tamen estas malsaĝe, iom maldece, stulte kaj ekscese malŝpari.

Karesante siajn trem-brilantajn, dens-kolorajn juvelojn, Lidia ĝojas, sed sentas etan malaprobbon, ĉar Edmundo tiel idoligas sian poluritan aŭtomobilon ronronante rapidan; dum Edmundo, ĝoja pro la prestiĝa grandeco kaj glata preterpasemo de sia aŭtomobilo, iom malestimas Lidian, ĉar ŝi tiel amas siajn senutilajn ornamaĵojn. Unu deziras modajn vestojn; alia, malnovajn librojn; alia, gramofondiskojn. La pene enspezanta patro malfacile kaŝas sian agaciĝon, ĉar la infanoj malŝparas sian poŝmonon kaprice por ĉokolado, nuksoj, pilkoj, kajtoj, kaŭĉuka simio sur stango; dum la infanoj miras, ĉar paĉjo aĉetas ĵurnalojn, kiuj igas lin eĉ pli grumblema, tabakon, kiu igas lin tusadi, kaj malnovan teleron sen interesa bildo.

Multaj deziras plezurojn de la sensoj; aliaj, plezurojn de la menso. Oni ne povas tute diferencigi tiujn du: kio estas bona muziko? eĉ gastronomio havas kulturen flankon. Multaj trovas grandan plezuron en kolektoj: povas temi pri poŝtmarkoj, jadaj artobjektoj, bildkartoj, fosilioj, boteletoj, diverslingvaj vortaretoj, etmodelaj vagonaroj, esperantaj insignoj, sekigitaj floroj, antikvaj poŝhorloĝoj (kiuj ne plu funkcias), arĝentaj kuleretoj (nepre ne por kirli ion), veneciaj glasoj (el kiuj oni neniam trinkas, por ke ili ne frakasiĝu akcidente...)

Ekzistas homoj, kiuj grandskale elspezas kaj klopodas, por havigi al siaj aŭtomobiloj numeroplatojn kun ia ekstra signifo, kva-zaŭ Zamenhof dezirus LLZ 1 aŭ fruktovendisto dezirus POM 123. Alia posedas pli da ornamaj paĝindikiloj ol da libroj. Iu alia kolektas laktokruĉetojn en la formo de bovinoj. Ni homoj havas strangajn kapricojn.

Tamen, ĉu iu ajn ŝatokupo aŭ alia plezuro estas vere ridinda, se al iu ĝi donas multan ĝojon? Ni apenaŭ rajtas diri, ke iu plene aŭ hontinde malŝparas sian monon, se la elspezado, eĉ ŝajne kaprica, vere ĝojigas tiun personon? Veraj plezuroj helpas nian mensan sanon, kaj kutime igas nin pli agrablaj, toleremaj kaj tolereblaj.

Ĉu la plej malsaĝa malŝparo okazas, kiam ni aĉetas ion, kio fakte malbonfaras al ni? Tiu daŭre fumas, kvankam nur en Britujo ĉirkaŭ 50 000 mortas ĉiujare pro malsanoj plene aŭ parte kaŭzitaj

per fumado. Tiu grasulino daŭre aĉetas ĉokoladojn kaj tortojn, kvankam ŝia graseco estas la ĉefa minaco kontraŭ ŝia sano. Tiu alia ĉiam uzas taksiojn, kiam li ege bezonas korpan ekzercadon. Knabino aĉetas modajn ŝuojn, kies altaj kalkanumoj mislokigas diversajn ostojn dolorige. Tro da multekosta malnova brando detruas ties hepaton kaj cerbon...

Tamen, eĉ tiaj malŝparoj ne estas centprocente malsaĝaj, ĉar ili donas ian portempan plezuron.

Ĉu do la plej hontinda malŝparo okazas, en la relative malmultaj okazoj, kiam ni aĉetas ion, kio kaŭzos suferon al iu alia, senintence aŭ intence? Drinkemulo venas hejmen ebria kaj kruele batas sian edzinon. Aĉetinto de portebla radioaparato (utila objekto) laŭtigas ĝin en idilie bela arbaro, kiun aliaj vizitas ĝuste por ĝui la trankvilon kaj kvieton. Homoj foje multe elspezas por disvastigi kalumniojn, aranĝi kruelajn tielnomitajn ŝercojn, eĉ vere persekuti malamatojn. Certe estus pli bone, ke tiaj homoj ne elspezus sian monon tiamaniere.

Sed ni supozu, ke homoj, ne nur riĉuloj kiuj povas permesi al si kelkajn kapricojn, sed malriĉuloj, kiuj malfacile nutras siajn familiojn kaj apenaŭ konas pli mildajn, moderajn luksaĵojn, konstante elspezadus grandan parton de sia pene akirita enspezo por aĉeti ilojn, kiuj ne donas sensajn plezurojn, ne amuzas aŭ distras ilin, ne utilas por lernado aŭ sporto, ne ornamas la hejmon aŭ transportas la familion aŭ forgesigas pri suferoj; ilojn, kies sola funkcio estas, kaŭzi al aliaj familioj la plej ekstremajn suferojn: rubigi hejmojn, steriligi landojn, bruligi teatrojn kaj magazenojn kaj bibliotekojn kaj kolegiojn kaj laboratoriojn kaj hospitalojn; detrui karierojn, malebligi la plej modestajn dezirojn de nekonatoj, krei malordon, nuligi evoluon; kaj grandskale rompi ostojn, forbruligi haŭtojn, deŝiri muskolojn, tranĉi nervojn, dehaki membrojn, elfandi okulojn; disdonaci fruajn mortojn kaj dekmilopan funebradon.

Tia malŝparo ŝajnus ebla nur por freneza krimulo. Sed preskaŭ ĉiuj el ni tra la mondo, per parto de niaj impostoj, helpas aĉeti mitralojn, kanonojn, tankojn, bomb-aviadilojn, interkontinentajn raketojn, ordinarajn bombetojn (kiuj nur povas malaperigi urbegojn en fajroŝtormoj...), ofte eĉ atombombojn kaj hidrogenbombojn, kiuj povas malaperigi tutajn popolojn. Ni elspezegas, por

aĉeti suferigilojn, sciante, ke se ni ekuzos ilin, aliaj malŝparuloj torturos kaj eble neniigos nin per similaj luksaĵoj.

Denove ni supozu: ni supozu, ke iu senespera, freneza familiestro decidus mortigi la tutan familion kaj sin mem; do li aĉetas revolveron kun sufiĉaj kugloj por ĉiuj; sed li venas hejmen ankaŭ kun dek akraj tranĉiloj, dudek grenadoj, tri boteloj da diversaj venenoj kaj provtubo da pesto-bakterioj. Ĉu ni ne sentus, ke ĉi tiu butikumado pruvas lian superfrenezecon kaj trovus lin iom pli proksima al sano se, aĉetinte la revolveron kaj kuglojn, li elspezus sian restantan monon por frandaĵoj kaj ludiloj, kaj preparus por la familio lastan regalon?

Sur nia terglobo, kie regas nia unu unika homa specio, jam estas pretaj tri tunoj nur da eksplodaĵoj, organizitaj por mortigi, por ĉiu homo. Unu kartoĉo sufiĉus. Ekzistas nun atomkernaj raketoj sufiĉaj por detruiri sur la terglobo milionon da urbegoj, kiel iam pereis Hiroŝimo. La homa specio en 1979 elspezis po milionon da dolaroj por militiloj kaj militpreparoj en malpli ol du minutoj — dume, en la sama jaro, 15 milionoj da infanoj mortis pro malsato; oni atendis, ke en 1980 minimume 13 milionoj da infanoj mortos pro malpura akvo...

Fakuloj kalkulis, ke:

→ la mono elspezita por armiloj dum unu tago kaj kvin horoj sufiĉus por ĉio necesa, por plene venki analfabetecon ĉie en la mondo antaŭ 2000 p.K.;

→ nur per la kosto de 14 horoj de armado, oni povus inokuli ĉiujn infanojn de la mondo kontraŭ la plej danĝeraj infektaj malsanoj;

→ la mono elspezita dum kvar tagoj por aĉeti mortigilojn pagus la jaran koston de ĉiuj help-organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj – UNESKO, Monda San-Organizaĵo, kaj similaj;

→ kaj se ni dum 10 jaroj elspezadus tiun sumon, kiun ni malŝparas dum nur 125 tagoj por aĉeti mortigilojn, por aĉeti vivhelpilojn, ni povus havigi al la plej mizeraj milionoj de la mondo adekvatajn nutraĵojn, domojn, san-servojn, bazan klerigadon kaj labor-eblecojn.

Se ĉiuj nacioj sukcesus interkonsenti pri plena malarmado, ni homoj povus rapide atingi plibonigojn de la mondo, kiujn niaj nunaj fantazioj apenaŭ konceptas. Ni memoru, ke tia interkonsento ne nur liberigus milionojn da dolaroj en tre multaj valutoj.

Ĝi liberigus valorajn krudmaterialojn kaj energio-fontojn, kaj grandajn bonkvalitajn konstruaĵojn. Ĝi liberigus la tempon de homoj: ne nur ĉesigus ĉie devigan soldatservon, tre malagrablan por la plimulto, sed liberigus brilajn teknikistojn kaj sciencistojn por utilaj taskoj.

Se ni deturnus la monon kaj materialojn, laboron kaj intelekton, ankaŭ multan sindediĉon, kuraĝon, malegoismon, al celoj utilaj! Kiom da hospitaloj, klinikoj, gekuracistoj, geflegistoj, medicinaj esplorlaboratorioj; kiom da helpo por maljunaj, kriplaj, blindaj homoj ĉie; kiom da helpejoj kaj helpantoj por evoluigi agrikulturon; kiom da novaj lernejoj, universitatoj, politeknikoj, bibliotekoj, muzeoj; kiom da irigacio, elektro, akvotuboj, telefonaj retoj, transportiloj; kiom da domoj por ŝirmi ĉiujn, vestoj por kovri ĉiujn, nutraĵoj por satigi ĉiujn, iĝus ne nur revaĵoj, sed eblaĵoj.

Jen, supre, kelkaj sugestoj pri saĝa elspezado; sed eĉ se ni havus absurdan universalan karnavalon, kaj la jara kosto de armiloj malaperus kontraŭ ĉokoladoj kaj cigaredoj, biero kaj braceletoj, cirkoj kaj baloj, ludiloj kaj amuzaĵoj, florbataloj kaj kabaredoj... ĉu ne estus pli saĝa, malpli malŝparema elspezado, ol por aĉeti suferigilojn? Se ni homoj nepre devas esti malsaĝaj, ni elektu malsaĝaĵojn pli agrablajn kaj amuzajn ol amasa pereoj.

La problemoj pri malarmado ne estas simplaj; ni ne havos tagon de naiva ekstazo, post kiu ne plu ekzistos bomboj kaj tankoj. Ni devos solvi multajn problemojn, kiuj postulas la plej bonajn kapablojn de diplomatoj, ekonomikistoj, sciencistoj, eĉ soldatoj mem, por organizi la pacon. Ni timas unu la alian; preskaŭ ĉiuj en ĉiuj landoj kredas, ke la nacia armilaro estas nur por defendi nin kontraŭ alilandaj agresemuloj. Ni devos iel kompreni, ke vivostiloj kaj ideologioj neeviteble varias, ĉar ĉiuj landoj havis diversajn historiojn; ke multe pli da homoj timas agreson de aliaj, ol mem plenkonscie planas agreson; ke iel ni devos kune ekzisti iom kompreneme, iom tolereme, iom interhelpeme... aŭ kune malŝparegi, timegi kaj tre eble pereji. Trosimpligoj ne helpas, sed malhelpas; precipe tiuj trosimpligoj, kiuj sugestas, ke nur unu nacio aŭ ideologio kulpas pri streĉitecoj.

Sed ni ĉiuj helpu laŭ niaj kapabloj, por ke baldaŭ ni ne plu malŝparu nian monon, kaj ne malŝparu nian mirindan, unikan specion.

Novaj Proverboj

Ne atendu perfekton; sed evitu neglekton.
Surda al admono eble krios pro bastono.
Kisoj vere trompaj estas kor-rompaj.
Al tiu, kiu nin tedas, malfacile ni kredas.

Kelkaj Kuriozaj Vidindaĵoj

En *Hot Springs* (“Varmaj Fontoj”), en Arizono, Usono, psikologistino, d-rino Marian Bailey, kun sia stabo, dresas bestojn por amuzi. Oni ne punas la lernantojn, nur rekompencas ilin kiam ili faras la deziratan agon. Anaso ludas etan melodion sur miniatura fortepiano. Papago kuras sur etaj rul-ŝuoj. Kelkaj procionoj ludas korbo-pilkon antaŭ la publiko. Kokino piediras sur streĉita ŝnuro; alia kokino dancas kiam ŝia miniatura diskogurdo muzikas; poste ŝi iras al miniatura vend-maŝino kaj ricevas manĝeton. Tria kokino lernas la simplan infanan ludon de «nuloj-kaj-krucoj».

Ivan Makarov, en Blagoveŝĉensk, Sovetio, konstruis imponan etmodelon de la moskva katedralo de Sankta Bazilo, teksitan eksterordinare lerte el ... telefondratoj.

Eta muzeo en Estavayer-le-Lac, Svislando, montras kelkajn scenojn, kreitajn ĉirkaŭ 1860 sed ankoraŭ freŝaspektajn, kie remburitaj ranoj ludas homajn rolojn. Kvar ranoj kartludas dum du rigardas ilin; sep ranoj ludas bilardon; ok ranoj ĝuas familian vespermanĝon; rano konsultas ranan juĝiston pri dokumenta problemo; tri ranaj razistoj prizorgas siajn klientojn; pli ol 20 ranoj ĉeestas balotan feston kaj aŭskultas ranan oratoron; eble plej amuza estas la rana klasĉambro, kie sever-aspekta ranego instruas dek du lernantojn; dek atentis siajn ardezojn kaj grifelojn; unu genuas honteme, sendube misfarinta. La miniaturaj mebloj ĉarme taŭgas al la ranaj civilizuloj!

Malgranda muzeo en Arundel, Anglujo, posedas grandan serion da scenoj, kun remburitaj bufoj (kiuj amuzas sin en parko, sur balanciloj kaj baskuloj); kobajoj (kiuj ludas kriketon, kuraĝigite per vilaĝa blovorkestro kobaja); kunikloj (48, kiuj en vilaĝa lernejo adicias, laŭtlegas, kudras, trikas aŭ miskondutas); sciuroj (kiuj, en eleganta, luksa klubejo, amuzas sin laŭ la iama stilo de

riĉaj, rafinitaj sinjoroj) kaj ratoj (kiuj, en malluksa klubejo, amuzas sin malpli ĝentile). 37 elegantaj katidoj ĝuas festan ĝardenan tagmanĝon, kaj la plej populara sceno estas verŝajne la geedziĝa ceremonio por du katidoj, kun pastro kaj multaj ĉeestantoj. Ĉiuj bestaj bildoj kaj multaj aliaj miniaturaj scenoj estis artverkoj de Walter Potter (1835–1918), bestremburisto. Li estis konata kiel malkruela, kaj neniam mortigis besteton por la muzeo; nur akiris bestetojn, mortintajn pro aliaj kaŭzoj. Potter ne nur remburis la specimenojn mirinde lerte, sed kreis, kelkcentope, brile detalajn, fantazioplenajn miniaturajn meblojn kaj objektojn. La katidoj en la preĝejo tenas ĉiu sian preĝlibreton, en kiu oni povas legi la vortojn de la diservo.

Kiu iam kreos ian vere eminentan esperantistan miniaturan vidindaĵon?

En la Granda Kontoro

**PRO HIGIENAJ MOTIVOJ
NI ORDONAS
AL ĈIUJ GEOFIGISTOJ
NE MANĜI ION*
DUM ILI LABORAS**

La Estraro

*escepte la deĵorantan telefonistinon

43. LA AINOJ KAJ ILIAJ FABELOJ

La ainoj estas anoj de la indiĝena raso de Japanujo. Iam ili loĝis precipe en la norda parto de Honŝuo, poste en Hokajdo, Saĥaleno (en Sovetio) kaj la Kuriloj (insularo); post la dua mondmilito ili troviĝis nur en Hokajdo. Ili estas popolo kaŭkaza, do al japanoj aspektas eŭropecaj; eŭropanoj mem malpli sentas similecon. Iam estis kutimo nomi ilin “ainoj vilaj”, ĉar iliaj korpoj estis pli harkovritaj ol tiuj de multaj rasoj; sed nuntempaj etnologoj scias, ke inter la multaj rasoj kaj popoloj de la mondo, la ainoj ne estas tiel escepte har-abundaj, kiel oni pli frue kredis.

Jam antaŭ la komenco de nia jarcento, estis granda risko, ke tiu interesa popolo pereos; la ainoj iel malfortiĝis; la enkonduko de alkoholo multe malutilis al iliaj sano kaj trankvileco. Estas eble, ke ili saviĝis parte ĉar nek la ainoj nek la japanoj havis fortajn rasismajn sentojn. Ni foje vidis, ke iu reĝa aŭ aristokrata familio degeneris, pro tro ekskluziva endogamio; mallarĝaj mensoj ofte punas sin mem. La ainoj komencis inter-geedziĝi kun japanoj, kaj eble la aldono de novaj genoj helpis revigligi kaj savi la rason. Ĉar la ainoj ne pereis; nun restas eble dek tri aŭ dek kvin miloj. Plejparte ili propravole estas asimilitaj en la japanajn vivon kaj kulturon; sed grupoj de ainoj konservas malnovajn morojn kaj metiojn en la kadro de la turisma industrio.

Malfrue en la deknaŭa jarcento, inteligenta brita misiisto kristana (anglikana) longe vivadis inter la ainoj kaj lernis ami kaj estimi ilin. Kvankam ilia tiam primitiva vivostilo ne estis ĉiurilate al li agrabla — ekzemple, laodoro de la sekigitaj fiŝoj, kiuj grave rolis en ilia dieto, vere afliktis lian nazon — li trovis la ainojn ĝenerale bonkoraj, afablaj, mildaj, kompatemaj kaj ankaŭ kuraĝaj. Tre impresis lin ilia religio; ekzemple, ili diris dankpreĝon antaŭ ĉiu manĝo, kaj multe oferis al siaj dioj. Kvankam ili adoris multajn diversajn minorajn diojn, kaj tre timis demonojn kaj fantomojn, ili kredis je unu granda Dio supera al ĉiuj aliaj. Sed laŭ liaj observoj tiutempaj, la tuta religio estis afero de la viroj, kiuj estis ĉasistoj kaj

tre lerte rajdis ĉevalojn; la virinoj faris la pezajn laborojn, kiel fosadon en la ĝardenoj, kaj ne zorgis pri la religiaj ceremonioj. Kolera virino tamen foje utiligis la religiemon de la edzo por turmenti lin, eble, ekzemple, detruante liajn ofer-bastonojn. La ainoj kredis je postmorta vivo, kiu por la plimulto estos pli agrabla ol la surtera vivo; sed por vere fiaj homoj Dio rezervas subteran mondon mizere malsekan.

La misiisto notis kelkajn ĉarmajn detalojn pri iliaj lingvo kaj lingvokutimoj. La ĉefa esprimo por kontento estis, "Mi estas en tia stato, ke mi scias, ke mi manĝis." Amika ĝisrevida frazo estis, "Ke ĉiam estu al vi varme!" Ili kredis, ke lutroj estas aparte forgesemaj, kaj nomis forgesemulon «lutrokapulo». Nomoj ege gravas al ili kaj ili observis diversajn regulojn rilate al nomado. Ili ne uzis nomon, kiun mortinto estis jam uzinta: lia fantomo kolerus. Ili foje renomis malbonŝanculon, esperante, ke la freŝa nomo ŝanĝos la ŝancojn. Ili ne alprenus nomon de vivanta najbaro: tio estus ŝtelo! Do ainoj ne uzis nomojn ripete, kaj devis por ĉiu infano elpensi novan nomon. Ili nomis infanon nur post du aŭ tri jaroj. Foje ili elektis nomon, laŭ eŭropaj kriterioj malbelan aŭ eĉ obscenan, sed la observanto notis kelkajn ĉarmajn nomojn, ekzemple «Brileco», «Konsolanto», «Cervokaptanto» aŭ «Birda buŝo». Estis nedece, ke virino menciu la nomon de sia edzo al aliaj.

Li admiris ilian lertecon en iliaj primitivaj metioj: ili preparis vestojn el la subŝeloj de ulmoj, kaj la festajn vestojn ili brodis laŭ kompleksaj tradiciaj desegnoj; ili ankaŭ lerte tegmentis siajn dometojn. Ili skulptis kulerojn, teksilo-partojn, piptenilojn, kaj etajn levilojn, kiujn ili uzis por teni siajn longajn lipharojn el taso. Ili havis proprajn dancojn, kantojn kaj ludojn, kaj ludis krudajn muzikilojn: bambuan muzikilon similan al zumfero, kaj arĉ-instrumenton kun du aŭ tri kordoj.

La ofer-bastono, *inao*, estis tre grava en ilia kulturo. Ili preparis bastonojn, kreante divers-stilajn kvastojn kaj rubandojn per raboteca tranĉado de la bastonoj mem. La stiloj variis laŭ la dio tiel servata. Ĉi tiujn ornamitajn bastonojn la aino fiksas en la teron ĉe la orienta fino, la sankta parto, de la domo. Ili ankaŭ oferis arte formitajn rabotaĵojn kiam ili preĝis sur la maro. Apud sankta *nusa* (grupo de *inaoj*) ĉasisto ofte ankaŭ fiksas la kraniojn de kaptitaj bestoj sur bastonojn, por honori la diojn.

Pluraj antropologoj skribis pri la speciala rilato de la neasimilitaj ainoj al ursoj. Ili ĉasis ursojn, montrante grandan kuraĝon. Sed foje la ĉasistoj portis hejmen ursidon. Ĉiuj traktis la etan ursidon tre amike: la infanoj ludis kun ĝi, la plenkreskuloj nutris ĝin mane; foje la aininoj eĉ ame mamnutris ĝin. Kiam la ursido iĝis tro forta kaj eble danĝera, la ainoj metis ĝin en kaĝon, sed daŭre traktis ĝin kiel amikon, bone nutris ĝin, parolis al ĝi k.t.p., dum du aŭ tri jaroj. Finfine ili mortigis ĝin, kiel tre sanktan oferaĵon, kun multaj ceremonioj. Ili metis antaŭ ĝin multajn *inaojn*, kaj respektata viro sidis antaŭ ĝi kaj oratoris: li pardonpetis, ĉar ili mortigos la amikon, sed ili sendos ĝin al la prapatroj, kun abunda provizo de *inaoj* kaj vino. Ili mortigis la urson iom kruele, kredeble pro rito, ne pro malico, finfine sufokante ĝin per premado de la kolo inter du stangoj.

Kvankam iliaj hejmoj estis simplaj, ili havis komplikajn etiketon, kiu helpis homajn rilatojn kaj prizorgis privatecon. Viroj havis kodon de salutado, plejparte per kunfrotado de la propraj manoj. Estis malpermesite kuri subite en domon, aŭ eĉ kuri el ĝi; rigardi tra fenestro; kaŝaŭskulti; eniri domon sen averta brueto. Ne-familiano devis atendi ekster la domo ĝis iu invitis lin eniri. Tiel ili respektis privatajn vivojn – pli ĝentile ol kelkaj, kiuj en aliaj landoj kredus sin alte civilizitaj.

Ĝis la nuna jarcento, la ainoj estis plejparte analfabetaj, do ne havis skribitan literaturon; sed oni nun konas ian literaturon ainan, precipe ilian epopeon *Jukaro*. Unurilate ili estas pli saĝaj ol multaj el ni: same kiel ĉe la ciganoj, ili nomas sin, en la propra lingvo, simple «homo», kiu estas la signifo de *ainu*.

Ili havas multajn fabelojn, kiuj ofte rilatas al bestoj kaj birdoj. Por ili multaj animaloj estis sanktaj: ne nur ursoj, sed serpentoj, strigoj, leporoj; ili ankaŭ foje adoris sanktajn arbojn. Multaj el iliaj fabeloj celis ian moralan instruon; jen, ekzemple, fabeleto, kiu konsilas ainajn infanojn kontraŭ troa avideco:

Panambo kaj Penambo

Panambo kaj Penambo estis du gigantaj vulpoj. Panambo elpensis ruzon, por riĉiĝi. Li streĉis sian voston super la maro, ĝis la urbo Matsumo trans la maro. Kiam la lordo de Matsumo vidis tiun

voston, li diris, “Ha, la dioj sendis al ni stangeĝon; pendigu miajn vestojn sur ĝi.”

Liaj servantoj pendigis sur la vosto ĉiujn belajn vestojn el silko kaj brodaĵo, la plej luksajn kimonojn, la plej ornamatajn haorojn, kaj riĉe broditajn obiojn, por aerumi ilin. Panambo atendis pacience, tenis sian voston rigida, ĝis ĝi estis tute kovrita per valoraj vestoj. Tiam li subite fortiris la voston, kaj tiel kaptis ĉiujn vestojn el la transmara palaco. Li iĝis riĉa kaj vivis bele.

La alia giganta vulpo, Penambo, enviis lian fortunon, kaj demandis al li, kiel li akiris tiujn vestojn. Panambo afable invitis lin manĝi ion, kaj rakontis al li pri la ruzo.

“Ĝuste tion mi mem intencis fari! Estis hontinde fari ĝin kaŝe antaŭ ol mi povis fari!” diris Penambo sendanke. “Aĉ! Malnobla Panambo!”

Penambo trotis al la marbordo, kaj streĉis sian voston super la maro ĝis Matsumo. Denove la lordo de Matsumo diris, “La dioj sendis al ni tiun stangeĝon. Surmetu miajn belajn vestojn, por aerumi ilin.” Liaj servantoj komencis tion fari; sed Penambo senpacience deziris kapti la riĉajn vestojn, kaj tro frue ekmovis sian voston. La lordo kriis, “Jen! tiel okazis antaŭe! La dioj sendis stangon, sed ŝtelisto transmara ŝtelis la stangon kaj forprenis miajn vestojn! Ĉi-foje, tranĉu jam la senditan stangon!” Liaj gardistoj elingigis siajn glavojn kaj tuj duonigis la voston. Penambo devis iri hejmen sen iu ajn riĉa vesto kaj kun nur duono de vosto; li aspektis ridinda kaj la vundo doloris.

Li restis malriĉa, ĉar li tro senpacience deziris riĉiĝi, kaj ne bone atentis amikajn konsilojn.



Ainoj rakontas fabelon, kiu instruas al infanoj obei, kaj, post ia malobeo, ne rezoni, sed pardonpeti.

La Alaŭdo

Iam la alaŭdo loĝis en la ĉielo. Venis tago, kiam la granda Dio en la ĉielo sendis lin al la tero, kun mesaĝo por kelkaj teraj dioj, kaj ordonis al li, ke li tuj revenu, la saman tagon.

Sed la tero ŝajnis bela kaj interesa; la alaŭdo restis por amuzi sin, kaj jam mallumiĝis; li decidis pasigi la nokton sur la tero kaj reiri morgaŭ.

Kiam la ĉielo estis denove blua, nia alaŭdo flugis supren; sed, kiam li estis eble dudek kvin metrojn super la tero, Dio renkontis lin, kaj riproĉis lin.

“Ho ve, alaŭdeto! Kial vi ne obeis min? Nun vi ne rajtas reveni al la ĉielo; vi tro amis la teron, kaj sur la tero vi devos resti. Vi ofte penos reflugi al la ĉielo; sed vi neniam flugos pli alten ol dudek kvin metrojn aŭ eble kvindek metrojn.” La alaŭdo ne pardonpetis, sed ekkoleris, protestis, rezonis.

“Ho granda ĉefa Dio, vi kreis la teron tiel bela, ke mi ne povis ne satrigardi ĝin. Nur pro tio mi revenas malfrue. Nu, kaj kiom ajn vi min riproĉas, mi ja revenos al la ĉielo!”

Sed vane li flirtigadis la flugiletojn; iel li ne povis iri pli alten.

Ĉiutage la alaŭdo flugis kiel eble plej alten, sed io haltigis lin meze de la aero; kaj tie li elverŝis novajn protestadojn kaj rezonadojn. Sed Dio ne enlasis lin; do finfine li revenis al la tero por amuzi sin. Sed eĉ hodiaŭ la alaŭdo faras same, kaj Dio ne enlasis lin.

Laŭ la misiisto, la ainoj uzas tri vortojn, kiuj povas signifi ‘alaŭdo’: la preciza senco de unu estas «la eta birdo»; de la dua, «leviĝi-tre-alten» kaj la tria «la rezonanta birdo»!



Jen specimeno de la originala humuro de relative moderna aino. Eŭropa vojaĝanto pafis lupon, kiu ĵus kaptis leporon kaj komencis manĝi ĝin. Lia gvidanto, ne ema perdi senpagan bonegan manĝon, poste forportis la parton de la leporo, ankoraŭ uzeblan. Kiam la japana gastejestro estis (kontraŭ la aina etiketo) iom sci-volema, li ricevis respondojn ne tiel naivajn, kiel ili ŝajnis:

- “Kion vi havas?”
- “Duonon de leporo.”
- “Kion vi faras pri ĝi?”
- “Mi senhaŭtigas ĝin por kuiri ĝin.”
- “Kial vi havas nur duonon?”
- “Mia mastro pafis ĝin.”
- “Kiel?”

— “Unue li celis, poste li tiris.”

— “Sed kiel li pafis nur duonon de leporo?”

— “Aŭskultu. Vi scias, ke leporoj kuras tre rapide; kaj ĉi tiu leporo estis superrapidega inter rapidaj leporoj. Sed ankaŭ mia mastro estas ege traf-kapabla pafisto. Li neniam maltrafas.”

— “Do, kio okazis?”

— “Nu, la leporo estis lerta leporo, majstro pri forkurado. Estis neeble, ke ĝi ne eskapu. Sed mia mastro estas perfekta pafisto, kiu neniam maltrafas. Estis neeble, ke li maltrafu la leporon. Do, duono eskapis, kaj duono estis pafita.”

Novaj Proverboj

Dum iu skribas sloganon — atentu ties alian manon.

Beligas ornamo, sed pli beligas amo.

Ni plendus senbaze, ke ni ne vidas pernaze.

Li oratoris pri libero; nun miloj kuŝas en karcerio.

Limeriko

Ho truoj! detruoj! Ho ve!
Mia robo el lan', ho tine',
pro la aĉaj insidoj
de viaj fiidoj
nun ŝajnas kribrilo por te'!

Ĉe la Landlimo

— “Nu, sinjoro, via pasporto ŝajnas esti en ordo; sed ĉu vi povas prui, ke la sinjorino estas via edzino?”

— (*Flustre*) “Mi donos al vi cent dolarojn, se vi povos prui, ke ŝi ne estas!”

44. PLI FORTAJ OL FORTUNO

La vivo postulas multon eĉ de feliĉuloj, rigore provas eĉ tiujn, kiuj estas plene ekipitaj per viviloj kiel ekzemple okuloj kaj kruroj. Unu el la malgajigaj faktoj pri la homaro estas, kiom da homoj suferas pro ia grava korpa difekto aŭ malsano, kiu plipezigas la ŝarĝojn, sufiĉe pezajn eĉ sur sanegaj ŝultroj...

Sed unu el la fortigaj, inspiraj faktoj estas, kiom da homoj vivis noble, eĉ foje atingis ion grandiozan, spite kruelajn malhelpojn.

Inter ili estis pluraj mondfamaj geniuloj. Betoveno (van Beethoven), la plej granda germana komponisto kaj probable la plej granda komponisto en la mondhistorio, surdiĝis ankoraŭ juna, neniam aŭdis siajn plej belajn majstroverkojn, mortis nur 56-jara. Surdeco ne estis lia sola malhelpo: li trabataladis sian vivon, malbelega kun vizaĝo abunde variolmarkita; filo de ebrulo, fizike malforta, malfeliĉa en amo, turmentita de gravaj psikologiaj problemoj, plejparte malriĉa. Sed li heroe dediĉis sin al muziko ĝis la vivofino. Kiam li kuŝis sur sia mortolito, surdega kaj torturata de pneŭmonio, iktero, hidropso kaj hepata cirozo, li ankoraŭ penis verki dekan simfonion.

Alia nevenkebla surdulo estis la usona inventisto Tomaso Edison, al kiu la homaro ŝuldas, inter aliaj utilaj objektoj, la fonografon (plej fruan formon de gramofono), la mikrofonon kiu ebligis longdistancan telefonadon, la lumigan ampolon, la stencilon, la tipopresan telegrafon uzatan ekzemple en borsoj, parafinvakspaperon por volvi sukeraĵojn, novajn teknikojn metalurgiajn; li mortis, patentiginte pli ol mil diversfakajn inventaĵojn. Edison iam diris, ke lia surdeco eĉ utilis al li, helpante lin koncentri sian atenton.

Dostojevski, unu el la plej grandaj romanistoj de Rusujo kaj de la tergloba, estis epilepsiulo, obsedita vetisto, turmentata de multaj gravaj psikologiaj problemoj. Inter la grandaj anglaj poetoj, Johano Milton verkis siajn plej grandajn verkojn estante jam blinda, kaj devis ĉion pene krei en la kapo, memori kaj dikti;

Aleksandro Pope, preskaŭ nana, kurbita pro tuberkuloza spino, diris, ke lia vivo estis “longa malsano”, sed postlasis grandan kolekton da satiroj kaj aliaj poemoj, brile precizaj kaj poluritaj; Bajron (Byron) estis lama kaj mense turmentata pro bulpiedo, kaj heredis psikologiajn problemojn.

Mikel-Anĝelo, italo, unu el la plej grandaj skulptistoj, arkitektoj kaj pentristoj de la mondhistorio, estis konsterne malbela, kaj post siaj laboroj en dolorigaj pozoj, dum li pentris la faman plafonon de la Sistina Kapelo, li dum siaj restantaj 52 jaroj estis tiel tordita de artrito, ke li povis legi, nur tenante la legaĵon super la kapo. Li tamen daŭrigis sian artan laboron ĝismorte. Mondfama nederlanda pentristo Vincento van Gogh ne ĝuis sukceson dum sia ege malfeliĉa vivo — vendis nur unu bildon — kaj estis turmentato, sporade freneza, kiu finfine mortpafis sin; sed spite suferojn li postlasis pli ol 800 pentraĵojn, kaj pli ol 700 desegnaĵojn!

Julio Cezaro, ankoraŭ mondfama post pli ol du mil jaroj, kiel brila generalo, ŝtatiso kaj verkisto (kaj, laŭ la kriterioj de sia epoko, relative humana kaj eĉ pardonkapabla) estis epilepsiulo. Franklin Roosevelt, unu el la plej humanaj prezidentoj de Usono, estis kriplulo pro poliomjelito, kiu paralizis liajn krurojn.

Tuberkulozo afliktis la grandan rusan verkiston Gorkij; la anglan poeton Keats; la polan komponiston Chopin; la ĉeĥan (aŭ aŭstran — ankaŭ judan) avangardan romaniston Kafka; la grandan nederlandan filozofon Spinoza. Kaj ekzistas forta tradicio, kvankam ni ne havas fidindajn faktojn, ke la helena poeto Homero, la kolosa epopeisto kiu estis unu el la fondintoj de la granda eŭropa literaturo, estis blinda.

Multaj aliaj herooj de sinvenkado, ne tiel nedubable sur la nivelo de universala renomo, sed laŭdindaj pro belaj atingoj, troviĝas tra la mondo. Fama nuntempa poeto de Nikaragvo, Ciro Molina, paralizigis pro poliomjelito estante nur dujara, kaj pasigis la vivon en radseĝo. Angla romanisto Joyce Cary daŭre verkadis ĝismorte, spite progresantan paralizon; lia lasta romano havis titolon, kiu povus esti por li paradoksa epitafio: *La Kaptita kaj la Libera*. Franca artisto Cezaro Ducornet naskiĝis sen brakoj, kaj lernis pentri, tenante penikon inter du piedfingroj. La brila usona novelisto kaj poeto E.A. Poe estis viktimo de alkoholismo. La franca aktorino Sarah Bernhardt daŭrigis brilan aktoradon sur la

scenejo dum pluraj jaroj, post amputiĝo de kruro. La itala poeto Leopardi estis ĝibulo, konstante malsana; la franca romanisto Proust, mirinde sentema kaj observema, estis ege neŭroza astmulo. Aŭstra skiistino Lea Solkner, kiu gajnis olimpikan or-medalon, havas unu kruron pli mallongan ol la alia kaj portas specialan boton por egaligi la krurojn.

Sed eble la plej inspira kaj eksterordinara ekzemplo de venko super korpaj difektoj estas la usonanino Helen Keller (1880–1968). Kiam ŝi estis unujara, malsano detruis ŝian vidkapablon kaj aŭdkapablon. Fermite en mallumo kaj silento, plejparte ne povante komuniki kun aliaj, ŝi restis izolita, kun multaj furiozoj kaj multaj brogaj larmoj, ĝis venis neordinara instruistino, Anne Sullivan, kiu sukcesis instrui ŝin ‘paroli’ per fingra alfabeto, kiun ŝi devis senti sur la mano, dum surduloj kutime povas ĝin vidi; poste Helen lernis brajlon kaj tajpadon, kaj finfine eĉ lernis manskribi multe pli legeble ol multaj vidantoj. Iel ŝi lernis la latinan, francan, germanan, helenan, kaj studis matematikon, geografion, romian historion, modernan historion, filozofion kaj religion; ŝi ankaŭ lernis triki, kaj ĝoje rajdis sur tandemo. Kiam ŝi deziris iĝi universitata studento, Helen skribis leteron al kolegiestro, en kiu ŝi deklaris siajn problemojn, sed insistis: “Mi konstatas, ke la obstakloj estos grandegaj; al aliaj ili eble ŝajnos nevenkeblaj sed, kara sinjoro, vera soldato ne konfesas sin venkita antaŭ la batalo.” Ŝi fakte ne nur iĝis studentino ĉe porvirina kolegio filia al la universitato de Harvard, sed en 1904 diplomitiĝis «kun laŭdo».

Helen Keller montris mirindan entuziasmon pri la vivo, sciamon, kaj ĝojan dankemon pro helpo kaj komplezoj; ŝi amis hejmbestojn, amikiĝis kun multaj homoj, inter ili multaj eminentuloj, kaj vigle kampanjadis por helpi blindulojn kaj surdulojn; preskaŭ mirakle, ŝi finfine lernis iel paroli — angle, france kaj germane! kaj prelegis ne nur en Usono, sed en multaj eŭropaj landoj, Afriko, Hindujo, Aŭstralio, Japanujo, kaj — 72-jara — en Israelo. Ŝi kolektis grandajn sumojn por blinduloj kaj surduloj; skribis multajn artikolojn, aperis ofte en varieteoj kaj unufoje en filmo, kaj parolis kuraĝe kontraŭ pluraj sociaj maljustaĵoj, eĉ defendante nasklimigadon kiam ĝi estis ankoraŭ kontraŭleĝa en Usono.

Pri siaj historiaj studoj ŝi iam skribis, “Mi ne komprenis, kia bono povus rezulti de la senkompata detruado, kiun faris Aleksan-

droj, Cezaroj, Napoleonoj; sed mia fantazio ekardis, kiam mi vidis Sokraton, kiu sentime instruis la atenan junularon pri la vero, kaj trinkis el la mortiga pokalo, prefere ol cedi.”

Ĉi tiu virino, al kiu ĉiu atingo kostis penadon kaj paciencon, kiujn la plimulto el ni ne povas imagi, skribis kiel sian devizon: “Laboro devus esti ĝoja.”

Nuntempe oni multe helpas tiajn homojn helpi sin mem. Ĉiun kvaran jaron, okazas speciala olimpiko por atletoj en radseĝoj. Ekzistas sukcesa societo de artistoj, kiuj pentras per peniko en la buŝo aŭ inter piedfingroj, kaj kiuj subtenas sin kaj siajn familiojn per siaj pentraĵoj. Inter multaj diverslandaj societoj, kiuj helpas homojn difektitajn, ekzistas eĉ societo (en Britujo) kiu evoluigas muzikajn kapablojn de surdaj infanoj. Jam delonge, oni dresis grandajn hundojn, kiuj helpas blindulojn; nun oni dresas hundetojn, kiuj helpas surdulojn, ekzemple atentigante ilin, ke iu sonorigas ĉe la pordo, aŭ la kaldrono bolas; en Usono sciencistoj pioniras pri dresado de simioj, kiuj eble povos helpi paralizitojn. La Esperanto-Movado havas sian Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj, kun brajla revuo *La Ligilo*, fondita jam en 1904, kaj multaj landaj asocioj, ofte kun propraj revuoj; kaj Universalan Invalidan Esperanto-Asocion. Esperantistoj ankaŭ subtenas kampanjon por helpi afrikajn blindulojn per la «Zamenhofa Vojaĝanta Okulkliniko» de «Lumo por Kamerunio»¹.

Ann Armstrong, anglino, paraliziĝis pro poliomjelito en 1955, de la kolo ĝis la piedoj, escepte ke ŝi povas iom movi unu piedon; ŝia vivo dependas de spiriga maŝino kaj konstanta flegado, kvankam oni aranĝis helpilojn, kiuj permesas al ŝi kelkajn agojn: per pieda premo ŝi povas ŝalti lampon, televidilon, radioaparaton, alarmilon; kaj, povante paroli, ŝi povas dikti al sekretariino. Dum siaj dudek kvin jaroj en spiriga kiraso, ŝi sendis centojn da konsolaj leteroj al aliaj paralizitoj kaj similaj pacientoj. Ŝi fondis, kaj ankorau redaktas, gazeton, *Responaut* (analogie al *astronaŭto*, kvazaŭ ‘spirmaŝin-vojaĝanto’) por tiuj, kiuj dependas de spirigaj maŝinoj, vivas en radseĝoj, kaj similaj suferantoj. La gazeto estas preskaŭ nekredeble optimisma, ne nur atentigante pri multaj helpiloj kaj helpmetodoj, sed emfazante la atingojn de la pacientoj kaj insist-

1. Adreso: Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando.

ante, ke ili restas plenrajtaj homoj. Ekzemple, iu skribis en 1974, "Neniam parolu pri «viktimo» de poliomjelito; ĉar «viktimo» supozigas, ke la malsano triumfis."

La historio de Esperanto enhavas plurajn nomojn de homoj, kiuj servadis la aferon spite grandajn malhelpojn. Zamenhof mem apenaŭ konis vere bonan sanon. Hector Hodler, sviso, kunfondinto kaj unua direktoro de UEA, iam redaktoro de *Esperanto*, tre aktiva esperantista ĵurnalisto, tradukanto, porpaca laboranto, mortis nur 33-jara, post multaj suferoj, pro tuberkulozo. Richard Geoghegan, irlandano, la unua pioniro de Esperanto inter angleparolantoj, iĝis brila filologo kaj poligloto parte ĉar akcidento kripligis lin, trijaran, kaj, forbarite de sportoj kaj fizike aktiva vivo, li profunde studadis. Henri Vallienne, franco, tradukinto de multaj verkoj, inter ili la *Eneido* de Virgilio, kaj siatempe grava pioniro de la esperanta romano originala, faris la plej grandan parton de sia grandskala laboro kiam, post preskaŭ mortiga kor-atako, li estis kondamnita al vivo en apog-seĝo, en unu ĉambro.

Vasilij Eroŝenko, ruso, blinda ekde la kvara jaro, vizitis Anglujon, Japanujon, Tajlandon, Birmon, Hindujon, Ĉinujon por fari diversajn laborojn, ĉeestis esperantajn kongresojn en multaj landoj, multe propagandis Esperanton kaj verkis interesajn librojn. Multaj mezaĝaj esperantistoj memoras kiel Edmond Privat, sviso, siatempe grava pioniro de Esperanto kaj eminenta sur aliaj kampoj, daŭre tenis sin ĉirkaŭ kongresejoj, prelegis kaj restis afabla kaj helpopreta, kiam dum liaj lastaj jaroj severa artrito kripligis kaj torturis lin. Ekde siaj suferoplenaj jaroj kiel militkaptito, nia elstara verkisto, instruisto kaj organizanto Julio Baghy, hungaro, neniam ĝuis vere bonan sanon, kaj dum siaj lastaj jaroj sindediĉe laboradis en senĉesaj doloroj pro astmo kaj kormalsano. Vasta kaj brila estas la atingo de Gaston Waringhien, franco, sur la kampoj de leksikologio, beletristiko kaj esperantologio; ne ĉiuj scias, ke dum lia epokfara laborado super la monumenta *Plena Ilustrita Vortaro*, malhelpis lin du gravaj operacioj, unu el ili pro grava okulmalsano. Kaj la jaroj finfine afliktas ĉiujn, kiuj longe vivas; sed Waringhien daŭrigas siajn altnivelajn kulturajn laborojn por Esperanto en la naŭa jardeko de la vivo. Nikolaj Rytjkov, ruso, malliberigite nur pro sia esperantisteco, suferadis dum ok jaroj en punlaborejoj, dek jarojn poste kiel ekzilito en Siberio; kaj ankoraŭ

estis fervora esperantisto, kiam li liberiĝis kaj estis oficiale deklarita senkulpa. Oni rabis de li la plej bonajn jarojn de la vivo, kaj brilan aktoran karieron; sed, mezaĝa, mirinde libera de amareco aŭ memkompato, li eminente kontribuis al la esperanta kulturo; kaj, tre suferante, du tagojn antaŭ sia morto pro kancero, li diris al d-ro J.C. Wells, “Ĉiu esperantisto devas kontribui al la celo, per tio, kion li kapablas.”

Armand Su, ĉino, spite turmentajn okulmalsanojn kaj malbonan sanstaton, lernis plurajn lingvojn, verkis esperantajn kaj alilingvajn poemojn kaj multe instruadis, ĝis, dum la tragika tielnomita «Tempesto» en Ĉinio, en 1968, li estis kondamnita al 20 jaroj en malliberejo. Dum dek jaroj li suferegadis tie, tamen sekrete instruis Esperanton kaj verkis poemojn, ĝis nova reĝimo liberigis lin kaj deklaris lin senkulpa. Sed li estis jam parte paralizita post hemiplegio. Nun respektata, honorata, sed konstante suferante pro malsano, Armand Su daŭre servas Esperanton.

Kaj ni pensu estime, kaj eble iom honte, pri miloj, kiuj ne havas elstarajn talentojn, ne famiĝos, sed kiuj vivadis tre kuraĝe kaj digne spite terurajn afliktojn. Antaŭ nelonge mortis brita esperantistino, f-ino E.A. Ballance, kiu pro aparte kruela speco de artrito perdis la uzeblecon de ambaŭ kruroj kaj unu mano, vivis en radseĝo, sed havis grandan internacian korespondadon, multe legadis, entuziasme lojalis en nia lingvo. En 1979, studentigis en la universitato de Kentukio, Usono, Sam Early, junulo nur 84 cm alta, ĉar ambaŭ kruroj estis amputitaj kiam li estis 13-jara. Li veturigas speciale adaptitan aŭtomobilon, ‘sidas’ sur seĝo ne nur por studi sed eĉ por ludi bilardon, kaj vigle ‘piediras’ ĉirkaŭ la universitato sur la manplatoj. Li komentis al ĵurnalisto: “Oni devas fidi al si mem; oni ne povas nur sidaĉi kaj diri ‘povra mi, mi estas difektita’”.

Homoj de la antikva mondo kaj de la mezepoko parolis pri diino Fortuno, diino ege kapricema, al kelkaj tre kruela. Kaj, almenaŭ laŭ niaj homaj kompren-kapabloj, Fortuno ankoraŭ ŝajnas maljusta kaj kruela. Sed lumas por ni ĉiuj tiuj grandaj animoj, kiuj estas pli fortaj ol Fortuno.



Novaj Proverboj

Pli bone violetoj al persono, ol orkideoj al tomoŝtono.

Al poto malpura estu indulga almenaŭ dua poto fulga.

Trude pruda ŝajnas aĉe kruda.

Scivola Anna priesploras najbaran amaferon, dum scivola Sara, kiel venki kanceron.

Helpema Regulo

La 46-a regulo en la regularo de la plej granda studenta klubo en Oksfordo tekstas:

“Membro, kiu enkondukos hundon en la klubejon estos punita per monpuno de £ 1. Besto, kiu gvidas blindulon, estas difinita kiel kato.”

La Nedetruebla Kuniklito

Laŭ ĵurnala raporto, ĉ. 1970, angla kuniklido, kiu loĝis en ŝtonminejo, hazarde falis en betonmiksmaŝinon. Unue ĝi kaptiĝis meze de tridek tunoj da sablo. La maŝino faligis ĉion en funelegon, el kiu brua bendego portis la kuniklidon en mikspelvegion, kie ĝi miksiĝis kun multaj litroj da akvo; post longa bruega kirliĝado, la miksaĵo suĉiĝis en maŝinon, kies funkcio estis fari el ĝi malsekajn betonblokojn per premego de 84 kg sur kvadratan centimetron. Tiu premmaŝino pakis la kuniklidon en betonblokon ĉirkaŭ 46 cm longa, 23 cm larĝa kaj 15 cm alta. Fine la maŝino elmetis la blokojn sur la plankon de la laborejo, kie ili devis sekiĝi.

Tiam la maŝinisto vidis kuniklidon, frostotremantan, malsekan, ege malpuran, sidantan sur betonbloko apud la truo, kiun ĝi elgratis. Ŝokite, kompateme, li forlavis la malsekan betonon de ĝia felo kaj metis la kuniklidon antaŭ elektra radiatoro por sekiĝi.

Sekiĝinte, tiu kuniklido foriris per serenaj saltetoj.

45. FABELO EL ZANZIBARO

Zanzibaro estas malgranda insulo apud la orienta marbordo de Tanzanio, Afriko. Dum la imperiaj epokoj, ĝin avidis araboj, persoj, portugaloj, britoj; ĝi iĝis brita protektorato en 1890 kaj sendependiĝis en 1963; en 1964 aniĝis al la malriĉa, sed progresanta, respubliko de Tanzanio. Ĝia ĉefurbo estas ankaŭ nomita Zanzibaro. Ĉirkaŭ 360 000 homoj loĝas sur la insulo; la plimulto estas islamanoj. Analfabeteco restas grava problemo.

Iam, Zanzibaro estis centro de la orient-afrika komerco pri sklavo — sangoplena, terura ĉapitro en la libro pri homa krueleco al homoj; kaj komerco pri eburo, ne tre bela ĉapitro en la libro pri homa krueleco al bestoj. Nun ĝia ekonomio dependas grandparte de unu planto: la kariofilo.

Zanzibaro produktas preskaŭ la tutan provizon da kariofiloj por la tuta mondo. Ili estas la florburĝonoj de la kariofil-arbo, parenca al la mirto, kaj, sekigitaj, aspektas kiel etaj brunaj najloj. Iam, riĉuloj bruligis ilin por bonodorigi ĉambrojn. Nun ni uzas ilin iom en medikamentoj, plej ofte kiel spicon. Tutajn kariofilojn oni povas, ekzemple, puŝi en bakotajn ŝinkojn aŭ kandizotajn juglandojn; aŭ meti en pomtortojn aŭ piklojn; kariofila pulvoro estas tre utila spico. Ĝi estas ingredienco en la multe uzata orienta spicmiksaĵo *garam-masala*, kaj en multaj pladoj de Hindujo, Pakistano, Malajzio; oni uzas ĝin ankaŭ en diversaj saŭcoj, legomaj aŭ viandaj pladoj, kukoj, tortoj, desertoj kaj eĉ fromaĝaj preparaĵoj. Kariofiloj, ĝenerale, pli helpas ol malhelpas la digeston; kaj kariofila oleo helpas kontraŭ dentodoloro — provizore, ĝis oni povas viziti dentiston.

Do, kvankam la kariofiloj de Zanzibaro ne gravas por la homa feliĉo kiel ekzemple rizo, tritiko, terpomoj aŭ daktiloj, ili vere kontribuas ion al niaj plezuroj.

La oficiala lingvo de Zanzibaro estas la svahila, kiu per unu trajto similas al Esperanto; la akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo. Tial ni povas facile elparoli la besto-nomojn en la jena fabelo.

Leono, Hieno kaj Kuniklo

Iam Simba, la leono, Fisi, la hieno, kaj Kititi, la kuniklo, volis kultivi la teron kaj eble gajni multan monon. Ili esploradis, trovis bonan terpecon, kiu apartenis al neniu. Ili fosis kaj ordigis ĝin kaj plantis plantojn kaj semis semojn, esperante, ke baldaŭ ili havos kariofilojn, kokosojn, kafon, anakardion kaj maniokon.

Poste ili ripozis multajn tagojn; kaj Simba ĉasis antilopojn, kaj Fisi manĝis post Simba, kaj Kititi vizitis la homojn por ŝteli legomojn. Sed post tempo ili interkonsentis, ke ili iros al la ter-peco kaj kontrolos, ĉu la plantoj bone kreskas.

Ili ekiris frumatene, ĉar la terpeco estis malproksima. Kititi diris, “Por ke ni ne malŝparu tempon, ni interkonsentu, ke ni ne haltu por ripozi survoje. Se iu haltos por ripozi, la du aliaj rajtos manĝi lin.”

“Boooone!” muĝis Simba, kiu sciis, ke li povas pli longe piediri, ol eta kuniklo.

“Boj-oj-ojn-e!” bojis Fisi, kiu same sciis, ke li estas pli forta ol kuniklo eta.

Sed kiam Kititi deziris ripozi, li haltis.

“Ha, ha,” kriis Fisi, “Ni rajtas manĝi Kititi’n! Li haltis!”

“Doooo!” muĝis Simba, “ek al!”

“Mi ne haltis por ripozi,” protestis Kititi, “mi nur vidis ion interesan, kaj paŭzis por observi ĝin.”

“Kion vi rimarkis?”

“Jen, vidu; jen sidas du ŝtonoj. La bruna estas granda, kaj la flava estas malgranda; kaj vidu, vere la eta ŝtono tute ne saltas supren, kaj la granda ŝtono tute ne penas tuneli malsupren.” Tion Kititi diris kun tre serioza mieno kvazaŭ de urba klerulo.

Simba kaj Fisi haltis kaj longe fiksrigardis la ŝtonojn. Ili povis nur konstati, ke Kititi diris la veron: “Jes ja, vi pravas; estas strange, sed vi observis tute ĝuste.” Do, ĉiuj denove ekiris, kaj Kititi estis ripozinta...

Baldaŭ li haltis denove.

“Ha ha!” bojis Fisi. “Vidu, Kititi denove haltis! Nun ni nepre rajtas manĝi lin!”

“Veeere jeeees!” muĝis Simba.

“Sed mi haltis nur por serioze pripensi problemon!” diris Kititi.

“Kio estas la problemo?” Simba demandis.

“Nu, en la ĝusta sezono ni ĉiuj ricevas novajn hararojn, ĉu ne?” demandis Kititi.

“Jes, tio estas vera...” Simba konsentis.

“Sed kio prezentas problemon?” demandis Fisi, kiu salivumis.

“Nu, kiam ni ricevas niajn novajn hararojn — kien iras la malnovaj?”

Simba kaj Fisi eksidis kaj iom pripensis tiun grandan misteron. Ili ja neniam havis eĉ unu minuton kiam ili staris senharaj, inter la malnova kaj nova hararo... Post diskutado, kiu ebligis al Kititi belan ripozon, ili povis nur diri, “Strange! Eble neniu scias!” Kaj ĉiuj tri plueniris.

Baldaŭ Fisi deziris paŭzon, kaj decidis montri sian kapablon paroli serioze, kiel urba klerulo. Do li subite eksidis.

“Nuuuu,” muĝis Simba, “kion vi faras? Nun ni rajtas manĝi vin!”

“Ho ne,” diris Fisi, “mi pripensas ion interesan.”

“Kion?” samtempe demandis Simba kaj Kititi.

Sed la hieno ne povis elpensi imponan respondon, kaj nur penis ŝajni sprita, dirante, “Mi pensas pri Tute-nenio!”

“Ta ta ta” diris Kititi, “nenia estas scio pri Tute-nenio!” Simba mortigis Fisi’n; kaj Simba kaj Kititi formanĝis lin. Poste ili plueniris.

Ili venis al loko, kie ili trovis kavernon, iom mallarĝan. Kititi haltis.

“Hoooo!” muĝis Simba, “Nuuuu, mi ne plu havas mian maturan apetiton, sed ŝajnas, ke tamen vi devos sekvi Fisi’n en mian ventron.”

“Ne laŭ nia interkonsento,” protestis Kititi. “Mi ne haltis por ripozigi; mi volis serioze pripensi ion interesan.”

“Kion?”

“Mi rekonis tiun kavernon, kaj pripensas ĝin. Antaŭ cent jaroj, miaj praavoj kutimis eniri ĉi tie, kaj mi volas provi, ĉu ankaŭ mi en la nuntempo povas same fari.”

Kititi eniris la kavernon kaj eliris ĝin, kaj tion faris plurfoje.

“Vidu! mi ja povas. Simba, amiĉjo, nun ankaŭ vi provu!”

Simba eniris la kavernon, sed ĉe la alia fino li fiksiĝis kaj ne povis elpuŝi sin.

Kititi saltis sur lian dorson kaj komencis mordi lin.

“Ho, frateto!” kriis Simba, “estu almenaŭ senpartia kaj manĝu mian dorson kaj mian vizaĝon egale! Venu ĉirkaŭ la kaverno al la elirejo kaj mordu mian vizaĝon.”

Sed Kititi, glutinte bonan pecon da leonviando, respondis, “Ho ne! mi tiel trompis vin, ke mi hontas rigardi vin rekte en la okulojn!”

Kiam Kititi estis manĝinta ĝissate, li lasis la kadavron de Simba en la kaverno, kaj piediris sola al la terpeco, kiun la tri bestoj fosis kaj ekkultivis.

Kaj Kititi la eta kuniklo vendis multajn kariofilojn, kaj kokosojn, kaj kafoberojn, kaj kasavon, kaj iĝis la plej riĉa kuniklo inter la Hinda Oceano kaj Tanganjika Lago.

Novaj Proverboj

Pri hontigito diskretu, falinton ne tretu.

Ne tre helpe tiu gvidas, kiu mem ne bone vidas.

Ne forgesu afranki, kaj ne forgesu danki.

Esploru la kavernon, sed portu lanternon.

Pensigaj Vortoj

“Se ni povus legi la sekretajn historiojn pri niaj malamikoj, ni trovus en ĉies vivo sufiĉan doloron kaj suferadon, por senarmigi ĉiun malamamon.”

H.W. Longfellow, usona poeto

Iu demandis la helenan filozofon Aristotelon, “Kiel la kleruloj diferencas de la malkleruloj?” Li respondis, “Same multe, kiel vivantoj de mortintoj.” Alia demandis, “Kial ni pasigas tiom da tempo, rigardante belajojn?” Aristotelo respondis, “Jen demando de blindulo.”

Takto

Sinjoro en malbona hotelo iam kurbigis sian forkon, penante manĝi tre malmolan kokaĵon. Li apenaŭ komencis mildan plendon, kiam la dommastrino komencis kolereksplodi: “Vi ĉiam plendaĉas! Ne estas eble plaĉi al kelkaj du-pizaj markizoj!” k.t.p., k.t.p. Do la sinjoro diris nur, “Mi intencis nur mencii, kiel science interesan fakton, ke ĉi tiu koko certe naskiĝis el ovo malmole kuirita.”

Rimareto — pri la utila vorto ‘je’

Kelkfoje ni dubas pri prepozicio;
por frazon aranĝi, necesas ja io,
sed ne temas pri sur (ĉar ne temas pri spaco),
kaj super ne taŭgas (ĉar mankas surfaco),
kaj al sonas strange, kaj de nelogike,
kaj pro proskribinde, sed kun nur komike;
ni gratas la kapon kaj siblas, “ho ve!”
En tiaj okazoj nin helpas nur je.
“Li estas tre riĉa je oro, juveloj.”
“Ŝi estas graveda, kaj eĉ je ĝemeloj.”
“Mi lin kredas krimulo, kapabla je ĉio.”
“Li estas bonul’, sed ne kredas je Dio.”
“Li tenis la knabon je ties orelo.”
“Je la deka matene aperis anĝelo.”
Sed la vorton utilan modere ni uzu —
kaj ne per je-ado cerbumi rifuzu,
ĉar je, kiel -um, oni uzu ne vaste,
kaj nur post pensado elektu plej laste.

Virinoj kaj Musoj

Oni preskaŭ atendas, ke virinoj timu musojn. La timo estas neracia; en normalaj cirkonstancoj, musoj sur la planko ne estas danĝeraj; la ĉefa danĝero estas, se, kiam ili ne estas videblaj, ili morde difektas ion gravan — gastubeton, subtenan lignaĵon, ion, kio izolas elektran draton... Se ni rigardas musojn atente, ili estas

eĉ belaj bestetoj, kaj interese inteligentaj, kaj estas iom bedaŭrinde, ke pro higienaj kialoj, aŭ ĉar ili estas damaĝbestoj, ni ofte devas mortigi ilin. Multaj virinoj senĝene tenas musojn en la manoj aŭ lasas ilin promeni sur la ŝultro aŭ la genuoj. Multaj avinoj ja scias, ke monstro en poŝo de la nepo estas nur besteto kun pep-pepo. Kaj tamen — en 1980 dana dancistino, favoratino en noktoklubo, tiel panikis, kiam ŝi trovis plurajn musojn en sia tualetejo, ke ŝi forkuris en la straton; nur kiam preterpasantoj penis kapti ŝin, ŝi rimarkis, ke ŝi forkuris portante nur kalsoneton.

Eĉ pli sensacia estis la kazo de meritplena sed musotima japana juĝistino. En 1977 ŝi deĵoris, kiam la akuzito estis viro, kiu ofendis, gvatante virinojn lascive. Kelkaj ĉeestantoj komencis stulte ridaĉi, kaj la juĝistino laŭdirinde atentigis pri la digno de la japana tribunalo: “Sinjoroj, ne kredu, ke vi povos nedece konduti, ĉar mi estas virino. Se necese, mi forsendos ĉiujn spektantojn!” En tiu momento, iu petolulo malfermis skatolon kaj ellasis plurajn blankajn musojn.

La juĝistino saltis sur sian tablon kaj levis la talaron super la genuojn. Oni finfine sukcesis aresti la musojn, sed la klerulino devis prokrasti la proceson ĝis la sekvanta tago.

Pli ĉarma estas historio, verŝajne el Britujo, ĉirkaŭ 1967, pri bela juna teatra ĥoranino, kiun teatra kur-knabo volis turmenteti. Unue li lerte kaŝis muson en ŝia mansaketo dum ŝi estis sur la scenejo. Kiam ŝi revenis, la bubo — por ke li havu la plezuron vidi ŝin, kiam ŝi malfermos la saketon — kun ŝajna ĝentileco demandis, “Ĉu eble vi povos doni al mi cigaredon?”

“Certe,” respondis la afabla junulino, kaj malfermis la mansaketon; la muso elsaltis. Pro la surprizo, ŝi ellasis unu laŭtan krion; poste ŝi vidis la malican ridetaĉon de la knabo.

Nu, ĥoranino, kiu konstante prezentas antaŭ la publiko malfacilajn dancojn, laŭ taktoj strikte identaj kun tiuj de tuta ĥoro, kaj kantas por la publiko, havas pulmojn kaj muskolojn disciplinitajn. Ŝi tuj funkciigis ambaŭ.

“Vi fia bubo!” (*Klak!* – eminenta vangofrapo). “Vi devus vere honti!” (*Aŭ-aŭ-aŭ!* – ŝi tiris liajn harojn). “Vi kruela, aĉa, abomena knabo!” (*Frap!* – eleganta sed malmolpinta danco-ŝuo regalis lian tibion per piedbato inda je futbalisto). “Mi... mi... mi denuncos vin al la inspektoro pri krueleco al bestoj!” (*Fffff!* – kvar bele manikur-

itaj ungoj lasis identigilon sur la vango de la bubo). “Vi kruela knabo! Tiel nekonsiderema! *Tiu kompatinda, eta, senkulpa kara museto! Ĝi povus sufokiĝi en mia mansako!*”



Kiam ekindignas mildo, venu vi kun ŝtala ŝildo!

Niaj Infanoj

Ne tute malracie, malgranda knabo, antaŭ nelonge akirinte fratineton, demandis sian patrinon, “Kial vi konstante instigas ŝin piediri kaj ekparoli, dum vi konstante ordonas al mi, residiĝi kaj silenti?”

Knabeto sugestis al sia instruistino, ke ŝi vizitu la hejmon por vidi la novnaskiton. “Nu, tre ĉarme; sed mi devos iom atendi, ĝis via panjo fartos pli bone”. — “Ho, ne timu... ne estas infekte!”

“Se Dio prizorgas nin ĉiujn, kion faras Sinjorino Dio?”

46. FAKTOJ IĜAS FANTAZIOJ, FANTAZIOJ IĜAS FAKTOJ

Kredeble unu el la plej ĝenerale konataj popularaj fikciaj personoj estas la detektivo Sherlock Holmes, kiun kreis skota romanisto kaj novelisto, Arturo Conan Doyle (1859–1930). Holmes rolis en kvar romanoj kaj kvindek ses noveloj. Conan Doyle verkis multajn aliajn librojn: historiajn romanojn, sciencfikciajn romanojn kaj novelojn, sensaciajn novelojn pri medicino, maristoj kaj aliaj temoj; li ankaŭ verkis pri politiko, kaj pri spiritismo, kiu iĝis unu el liaj grandaj interesoj. Liaj fikciaj verkoj estas ĝenerale plezurigaj, inteligentaj distraj verkoj; sed estis Sherlock Holmes, kiu plaĉis al vasta publiko kaj restis konata. Ĝis 1968 aperis tradukoj en 38 landoj; inter la traduklingvoj estis ne nur eŭropaj lingvoj, sed la araba, eskima, afrikansa kaj basuta. Kaj foje en Suda Ameriko malgrandaj lertaj deduktoj estas «Sherlockholmitos»!, hispana neologismo.

Oni diras, ke Holmes estas la sola fikcia persono, pri kiu ekzistas kvazaŭ fakta biografio. Multaj verkistoj serioze imitis aŭ ŝerce parodiis la Holmes-novelojn; li multe influis la ĝeneralan arton de la detektiv-romano; oni dramigis plurajn el liaj aventuroj aŭ faris filmojn el ili; ankaŭ ekzistas serio da filmoj pri novaj aventuroj liaj. Ni povas do diri, ke ekster la aŭtentikaj, originalaj libroj ekzistas granda apokrifaj Holmes-literaturo.

Kial Sherlock Holmes iĝis kaj restas tiel amata? Conan Doyle estis verkisto inteligenta, inventema, teknike kompetenta; sed neniu pretendus, ke liaj verkoj estas inter la gravaj fikciaj majstroverkoj kiel ekzemple tiuj de Tolstoj, Balzak, Dickens.

Tamen, li sciis, kiel meti sian detektivon meze de streĉaj historioj, plenaj de misteroj, eventoj, surprizaj sed konsekvencaj solvoj, lastmomentaj savoj, situacioj neordinaraj sed ne tute maleblaj, kaj prezentitaj kun bone elektitaj kredigaj detaloj; do li sciis tre bone kiel stimuli nian scivolemon kaj bone distri nin. Li ankaŭ kreis du verajn karakterojn: Sherlock Holmes, la vaste informitan, ege

observeman, scienceman, logikeman detektivon, maldikan fraŭlon vivantan plejparte intelekto; kaj lian admirantan amikon kaj kontrastulon, bonkoran, lojalan kaj bonintencan, doktoron Watson, kies relativa stulteco necesigas, ke Holmes klarigu al li siajn pensprocedojn, interesajn por la leganto. Kvankam tiuj karakteroj ne estas profundaj psikologiaj kreitaĵoj, ili estas, supraĵe, sufiĉe vivoplenaj kaj kredeblaj.

Sherlock Holmes estas ankaŭ karaktero sufiĉe aprobinda. Li estas foje iom malmodesta, foje cedanta al enuo kaj eĉ al kokaino; sed sen pekoj li estus malpli kredebla. Ĝenerale li laboras por malhelpi krimulojn kaj savi iliajn viktimojn; liberigi senkulpajn akuzitojn; servi veron kaj justecon; kaj li egale helpas riĉulon aŭ malriĉulon. Kvankam li foje estas sarkasma aŭ aroganta, plej ofte li kondukas ĝentile kaj konsidereme, kaj montras kompaton al viktimoj, foje eĉ al tiuj misfarintoj, por kiuj oni povas trovi iajn ekskuzojn. Kvankam li venkas plejparte per scio kaj rezonado, li estas kuraĝa, aktiva kaj iniciatema, kiam estas necese. Ni povus nutri niajn fantaziojn per herooj multe malpli sanaj kaj inteligentaj.

Eble Sherlock Holmes ŝajnas tiel reala, ĉar Conan Doyle fakte bazis sin sur du realaj homoj, si mem kaj skota kirurgo, Jozefo Bell.

Conan Doyle ne nur havis kelkajn negravajn kutimojn de Sherlock Holmes, ekzemple fumis argilan pipon kaj multe uzis lupon, sed vere montris valoran detektivan talenton. Policanoj kaj krimologoj foje konsultis lin; li foje helpe konsilis policanojn; kaj li dufoje laboris sindediĉe por savi homojn erare kondamnitajn. Unu el ili estis hinda studento, kiu estis viktimo parte de ŝovinismaj kaj rasismaj antaŭjuĝoj. Conan Doyle ankaŭ defendis afrikajn viktimojn de kruelaj mon-aviduloj en Kongo Belga.

Jozefo Bell, kiun pluraj rekonis, kaj kiu rekonis sin mem, kiel modelon por Holmes, instruis en la universitata medicina fakto en Edinburgo. Inter liaj studentoj estis ne nur Conan Doyle, sed ankaŭ R.L. Stevenson. Bell insistis pri observado de signifaj detaloj; ekzemple, li povis ofte identigi la precizan metion de paciento, per la loko de kaloj aŭ aliaj markoj sur la manoj; kaj li klarigis sian rezonadon al studentoj kun stilo tre simila al tiu de Holmes. La modelo por d-ro Watson estis la sekretario de Conan Doyle, iu majoro Wood.

Do, Conan Doyle, kiel multaj verkistoj, kolektis faktojn, el kiuj li teksis siajn ĝindajn fantaziojn. Tio estas ofta procedo; ĉi-foje ĝi portis al la aŭtoro mond-famon.

Sed Conan Doyle, kiu deziris gajni renomon per pli seriozaj verkoj, finfine tediĝis de sia detektivo, kaj en 1892 'mortigis' lin en lasta aventuro. Poste, sed ne ĝis 1904, Conan Doyle 'revivigis' lin en lasta romano kaj lasta novelaro.

Ankoraŭ ekzistas societoj por tiuj, kiuj amas la romanojn kaj novelojn; ili amuzas sin per tre detalaj studoj, erudiciaĵoj kaj mistifikaj, parodiaj erudiciaĵoj, kolektoj, klarigoj de aludoj, imitaĵoj, k.t.p. Ekzemple, en Usono ekzistas societo, «La Gerilanoj de Bakista Strato», laŭ la titolo, kiun Holmes, loĝante en 221B Bakista¹ Strato, Londono, donis al kelkaj strat-buboj, kiuj kolektis informojn por li. Tiu societo eldonis gazetojn, diskon, aliajn memorigojn; Franklin Roosevelt iam estis ano kaj eĉ kontribuis al la gazeto. Aliaj similcelaj societoj ekzistas ne nur en Britujo, sed en Francujo, Nederlando, Danlando, Japanujo... Ankaŭ aperis multaj sendependaj verkoj rilataj al Holmes. Daŭras la sorĉo de la deduktema detektivo.

La anoj de tiaj societoj celas intelektajn ekzercojn, beletristikajn amuzojn, klerajn frivolaĵojn; ili ja scias, ke Sherlock Holmes ekzistis nur en fantazioj.

Dum kelkaj monatoj, dum «Festivalo de Britujo» en 1951, almenaŭ la apartamento de Holmes kaj Watson ekzistis. Kelkaj fakuloj rekreis ĝin, kun mebloj de la originala Holmes-epoko, kun multaj objektoj menciitaj en la noveloj kaj memoriloj pri konataj kazoj, en 221B Bakista Strato, kiel apartan malgrandan ekspozicion. Multaj vizitis ĝin kaj ofte montris grandan entuziasmon; la prezentado estis tiel detala, ke oni preskaŭ atendis, ke la renoma detektivo tuj envenos kaj eksidos por fumi sian pipon aŭ ludi sian violonon. Kompreneble tiuj, kiuj kun perfekta atentemo kaj videbla amo preparis la ekspozicion, ja sciis, ke ili nur materiigis amantan fantazion.

Sed pri Sherlock Holmes okazis io vere stranga: la fantazio iĝis, en multaj mensoj, realaĵo.

1. Angle: *Baker*.

Kiam Holmes 'mortis' en 1892, multaj britoj sincere priploris tiun morton, kaj multaj plenkreskaj viroj, eĉ en la londona borso, surmetis funebrajn nigrajn brak-rubandojn. Dum Conan Doyle vivis, li ofte ricevis leterojn skribitajn al Holmes, petantajn lian helpon pri problemoj. Pli strange, surprize multaj homoj nuntempaj verŝajne kredas, ne nur ke Holmes iam vere vivis, sed ke li ankoraŭ vere vivas kaj daŭre aktivas, kvankam en 1980 li devus esti ĉirkaŭ 110-jara.

Nuntempe «Abbey National», unu el pluraj grandaj britaj hipotekekaj bankoj², havas sian ĉefsidejon en 221B Bakista Strato. Ĝi iomete ekspluatis la renomon de la adreso, filmante novan epizodon pri Sherlock Holmes, "La Kazo de la Eksterordinara Banklibro", en kiu Holmes serĉas la posedanton de banklibro trovita surstrate; kompreneble, la filmo estas amuza, originala reklamo por «Abbey National».

Sed unu el la stabo, redaktoro de la gazeto de la hipoteka banko, estas ankaŭ la "sekretario de Sherlock Holmes" kaj en tiu stranga ofico ankoraŭ respondas al pli ol dudek leteroj el multaj landoj, ĉiusemajne. Lia tasko estas, respondi saĝe kaj takte al miloj, kiuj skribas al neniam ekzistinta detektivo, kvazaŭ li estus vivanta homo. Kredeble pluraj el la semajna literaro estas ŝercoj aŭ eksperimentoj, sed multaj ŝajnas tute sinceraj kaj foje petegas helpon pri gravaj problemoj. Ekzemple, letero el Usono petis Holmes tuj alflugi por esplori misteron: "Ni pagos viajn vojaĝokostojn kaj ĉiujn aliajn kostojn; vi povos helpi nin, se iu povos; ni aŭdis tiel multe pri viaj talentoj."

Al iu, kiu montras ian dubon pri la ekzisto de Holmes, la sekretario ĉiam skribas la veron: "Li neniam ekzistis; li estis fikcia karaktero." Li povas ĝentile rifuzi petojn pri fotoĵoj "pro sekureco" kaj respondi simple al simplaj demandoj biografiaj. Sed ĉiam, kiam iu, ofte suferanta, petas helpon, li devas elpensi decan respondon. Kutime li esprimas sian bedaŭron, ke s-ro Holmes ne povas helpi: li forestas pro alia kazo; aŭ li emeritiĝis kaj nun prizorgas siajn abelojn en sud-angla vilaĝo. Se la mistero ŝajnas vere grava, li konsilas, ke oni konsultu la policon. Kaj la leteroj daŭre alvenadas.

2. Financa institucio grava en Britujo; speco de ŝparbanko, kiu aranĝas hipotekojn per investitaj ŝparaĵoj, tiel ke multaj homoj povas aĉeti proprajn hejmojn, kaj ŝparantoj ricevas interezon.

Kvankam tiu cirkla evoluado de faktoj al fantazioj, kiujn multaj kredas faktoj, ŝajnas kurioza, iom komika fenomeno, io tia okazas multe pli ofte, ol ni tuj konstatas.

Ni pensu ekzemple, pri mitoj, kiujn iu homa menso elpensis por klarigi natur-fenomenojn, kaj kiuj poste iĝis religiaj kredoj. Diversaj kredeblaj blagoj iĝis vaste kredataj, kvazaŭ ili estus veraj. Grava faktoro en la homa vivo estas nia emo, krei niajn proprajn fantaziajn bildojn pri realaj personoj, precipe pri tiuj, kiujn ni amas aŭ malamas; kaj poste ni eraras, foje grave kaj suferige, ĉar ni kredas niajn proprajn fantaziojn; eĉ ni foje koleras, kaj sentas nin perfiditaj, ĉar realaj homoj ne akordiĝas kun niaj fantazioj pri ili.

Dum la jarcentoj, multaj ŝtatestroj kaj aliaj potenculoj aŭ potenc-aviduloj kreis fantaziojn propagand-intence, mensogajn aŭ almenaŭ naive trosimpligajn kaj verŝajne ofte kredigas al si mem la proprajn mensogojn. Ĵurnalistoj ofte raportas misinformite, unuflanke, aŭ eĉ parte fantazie ĉar ili ne povas elfosi aŭtentikajn faktojn. Eble ni ĉiuj konsterniĝus, se ni vere scius, kiom da populara 'historio' estas pli fantazia ol fakta.

Do, se ni almenaŭ deziras pensi honeste, ni trovos, ke ni ĉiuj foje miskomprenis la mondon, preskaŭ same konfuze, kiel tiuj, kiuj urĝe petegas la helpon de neekzistanta detektivo.

Novaj Proverboj

Ni kredas mensoginton malsincera, kiam la diro estas tute vera.
Ne dungu ezokon por varti salikokon.
Ĉiuj el ni devias; sed saĝulo tion scias.
Jaroj por verkista ago; por recenzo, duontago.

Noblaj Mensoj de Sciencistoj

Meze de la deknaŭa jarcento, kleruloj multe diskutis pri la teorioj de la natursciencisto Darvino [Darwin] pri evoluismo. Tiu-tempe multaj kristanoj kredis liajn teoriojn kontraŭreligiaj — kiaj ili ne necese estas.

En 1860, biologo T.H. Huxley ĉeestis debaton, kie episkopo Wilberforce (ne tiu Wilberforce, kiu pli frue kampanjis kontraŭ la kruela sklav-komercio) paroladis kontraŭ la neĉeestanta Darvino, longe, elokvente, misprezente kaj maljuste; finfine la episkopo turnis sin al Huxley kaj demandis, “Ĉu vi pretendas vian devenon de simio, tra via avo aŭ via avino?”

Huxley leviĝis kaj respondis: “Se vi demandas min, ĉu mi preferas havi kiel avon mizeran simion, aŭ viron, riĉe dotitan per la naturo, posedantan multan monon kaj influon, kiu tamen uzas sian talenton kaj influon nur por enkonduki mokadon en seriozan sciencon diskuton — mi senhezite asertas, ke mi preferas la simion.”

Modela sinteno pri intelekta honesteco!

George Washington Carver estis fama usona negra sciencisto. Liaj fakaj esploroj en agronomia kemio tiel multe helpis sudusonajn arakid-kultivistojn, ke ili ofte donacis al li valorajn objektojn, kiujn li, fervore sin dediĉinte al sia scienco, preskaŭ ignoris. Iam tre riĉa kultivisto demandis lin, “Ĉu estas io, kio vere plaĉus al vi!” – “Jes,” respondis Carver, “diamanto”. La riĉulo aĉetis belan diamanton, muntigis ĝin en plateno kaj donacis la juvelon al Carver, kiu varme dankis lin.

Tamen, li neniam vidis la diamanton plu, kaj ĉagreniĝis, ĉar Carver ne portis ĝin, ĝis finfine li petis komunan amikon, diskrete esplori la aferon. Ĉi tiu amiko vizitis Carver, kaj takte demandis, kie estas la diamanto. Carver, videble fieraj kaj ĝoja, kondukis lin al sia science aranĝita vitrino; kaj tie, en la ĝusta loko laŭ klasifikaj principoj, meze de mineralaj specimenoj, sidis la belega juvelo, kun sia etikedo «Diamanto».

Lingvaj Bariloj

Granda kargo de usona hordeo kaj meksikia tritiko, destinitaj por semado, alvenis Irakon en septembro 1971. Por protekti la semon kontraŭ fungaj infektoj, la eksportantoj estis ŝprucigintaj sur ĝin hidrorgan kombinaĵon, kaj ankaŭ rozkoloran tinkturon, por distingi ĝin de grenoj por manĝi. Sur la etiketoj estis klaraj avertoj en la angla kaj la hispana — sed ne en la araba.

La ŝtelisto, kiu ŝtelis tiun kargon, estis mon-avida fripono, sed ne planus amas-murdon. Li pakis la grenojn en malgrandajn pak-aĵojn, kaj vendis ilin kiel nutraĵojn. Li ne atentis misterajn vortojn en nekonataj lingvoj, en fremda alfabeto.

Miloj da senkulpaj dommastrinoj kuiris tritikon aŭ hordeon. La bela koloro eĉ donis ian senton pri lukso, pri io iom speciala, inda por gastoj.

La efikoj de venenado per tiu hidrarga kombinaĵo ne montriĝas tuj, do unu tragedio ne tuj avertis homojn, eviti aliajn. Dum la sekvantaj monatoj, 6 350 venenitoj iĝis pacientoj en irakaj hospitaloj; 459 mortis; miloj restis kriplaj, blindaj, surdaj aŭ kun difektitaj cerboj. Infanoj pereis per venenita patrina lakto; manĝado de viando el bestoj manĝintaj tiun grenon venenis multajn, kiuj ne manĝis la grenon mem. Ne ĉiuj iris en hospitalojn, kaj unu enketanto kalkulis, ke tra la lando eble 6 000 mortis kaj 100 000 pli-malpli difektiĝis — ĉar kelkaj gravaj vortoj ne estis tradukitaj...

Sur Officeja Aviz-Tabulo

SE OKAZOS INCENDIO ĉiuj demetu ĉion, ne paŭzu por atenti ion ajn, kaj tuj eliru, precize same kiel je la kvina horo ĉiutage.
--

Lingva Kuriozaĵo

Inter la aztekoj, la frutempaj meksikiaj indiĝenoj, oni adoris diinojn, kiuj donis manĝaĵojn, sed virajn diojn, kiuj donis trinkaĵojn. La dio de drinkado estis Ometoĉtli, kies nomo signifas “du kunikloj”. La aztekoj kredis, ke kunikloj estas speciale senprudentaj. Ili do mezuris gradojn de ebrieco per kunikloj; ebrieta persono estis “unukunikla”; iom ebria persono, “dukunikla”, kaj tiel progrese, ĝis la vorto por ekstrema, senhelpa ebriego estis “kvarcentkunikla”.

47. FABELO DE LA JUDOJ

La judoj, kiel la ciganoj, sed eĉ duoble, instruas nin, ke internacia lingvo estas tute praktika: ili ĉiam uzis la hebrean, la lingvon de la Malnova Testamento, por religiaj studoj kaj ritoj, kaj nun denove uzas ĝin por ĉiutagaj aferoj en Israelo; kaj multaj judoj en diversaj landoj uzas la jidan en la ĉiutaga vivo; ankaŭ la jida, judgermana dialekto kun slavaj kaj hebreaj vortoj, nun havas riĉan literaturon.

Judaj pensantoj ankaŭ instruis la homaron pri du el la plej epokfaraj, grandiozaj konceptoj en la frua historio de religio kaj kulturo: monoteismo, kaj respekto al la vivo.

La centra, ŝlosila juda preĝo, kiun juda infano lernas unue kaj juda mortanto murmuretas lastmomente, estas, "Aŭdu, ho Israelo, la Sinjoro nia Dio, la Sinjoro estas unu." Dikredantoj kaj ateistoj povas same bone kompreni, kiel la koncepto pri unu Dio, kreinto de la kosmo, bona, justa, aganta laŭ propraj nekapricaj leĝoj, amanta la homaron, estis vasta intelekta, psikologia, spirita progreso post diversaj fetiĉismoj, totemismoj, idolaj kultoj aŭ diigoj de ŝtatestroj. Kaj, kvankam ortodoksa judismo enhavas multajn tre detalajn regulojn pri dieto, sabata ripozo, higieno k.t.p., la leĝaro emfazas, male al multaj primitivaj religioj kun rigidaj tabuoj, ke "nenio estas pli valora, ol savo de homa vivo"; por savi homan vivon, judo rajtas rompi preskaŭ ĉiujn regulojn. Judismo ankaŭ emfazas la devon de pozitiva bonfarado; la antikvaj rabenoj listigis 613 rekomenditajn bonajn farojn, kiel, ekzemple, vizitojn al malsanuloj.

Tiu popolo ankaŭ donis al la homaro plurajn el niaj vere grandaj homoj, kiuj modifis la historion de nia pensado kaj kulturo. Verŝajne la judo, kiu plej ŝanĝis la mondhistorion, estis Jesuo. Sed Judoj estis ankaŭ: Sigmund Freud (Freŭdo), ĉefa pioniro de psikoanalizo, kies filino Anna iĝis eminenta fakulino pri infanpsikologio; Karl Marx (Markso) kiu influis politikajn konceptojn tra la tuta mondo; Albert Einstein (Ejnstejno), kiu tre modifis nian tutan pen-

sadon pri fiziko; Ludwig Wittgenstein (Vitgenstejno), ekstreme ver-ama, sincera filozofo; Jacob Epstein (Epstejno), elstare granda kaj originala skulptisto.

Tiaj titanoj sufiĉus por la gloro de unu popolo; sed inter aliaj elstaraj judoj troviĝis: filozofoj Buber, Spinoza (pri kiu malgranda libro, *Fondita sur Roko*, estas havebla en Esperanto), Husserl; sciencistoj Lombroso, fondinto de krimologio kiel serioza scienco, kaj Salk, kiu eltrovis la faman vakcinon kontraŭ poliomjelito. Inter eminentaj judaj verkistoj troviĝas: Disraeli, brita romanisto (kaj ĉefministro); Hofmannstal, aŭstra poeto; Halevi, hispana poeto; Heine, germana poeto, kies *Kantoj kaj Romancoj* estas haveblaj en belega esperanta traduko; Kafka, aŭstra — aŭ ĉeĥa —, romanverkisto; Toller, germana poeto kaj dramverkisto; Schnitzler, aŭstra verkisto de romanoj kaj dramoj; Zangwill, brita romanisto; Arnold Zweig, germana romanisto, kaj Stefan Zweig, aŭstra romanisto kaj biografo, kies speciala merito estas granda psikologia perceptemo.

Hispana judo Suarez estis pioniro de modernaj konceptoj pri internacia juro; la familio Rothschild, ekde la dekoka jarcento, estis familio de brilaj financistoj kaj bankieroj; Oppenheimer, sudafrika grandskala komercisto, riĉeigiĝis per diamantoj, sed poste faris vastajn filantropajn laborojn. Inter famaj judinoj estis la franca aktorino Éliŝa Rachel kaj la usona aktorino Adah Menken.

Unu el la plej influhavaj judaj verkistoj de nia jarcento estis tamen nura knabino, Anne Frank, kies naiva sed tre inteligenta *Taglibro*, havebla en Esperanto, iĝis mondfama dokumento pri la krueleco de persekutado kaj la valoro de homa digno.

Judaj estis la komponistoj Bloch, Mahler (kiu multe suferis pro malicaj aludoj al lia judeco), Mendelssohn-Bartholdy, Meyerbeer kaj Offenbach. Minora juda komponisto kaj fama instruisto, Ignaz Moscheles, estis la patro de Felix Moscheles, amiko de Zamenhof, aktiva kampanjanto por paco, kaj pioniro de Esperanto en Britujo.

Kaj, kompreneble, Zamenhof mem estis judo.

Liaj tri gefiloj, Adamo, Sofia kaj Lidja, ĉiuj esperantistoj, ĉiuj virtaj, utilaj homoj, estis murditaj dum la dua mondmilito, inter ĉirkaŭ kvin milionoj da judoj, kiujn antisemitistoj ekstermis tiuepoke. Antisemitismo ekzistis ekde la unua jarcento antaŭ Kristo; en diversaj epokoj kaj diversaj landoj, oni kruele insultis, izolis en get-

toj, malprivilegiis, viktimitis, ekzilis aŭ eĉ masakris judojn. Malmultaj popoloj tiel multe suferis.

Ortodoksaj judoj kredas, ke ili devenas de la nobla patriarko Abrahamo, kiu vivis inter 2300–2000 a.K. en Ĥaldeujo (nuntempe, parto de Irako); konkeris Kanaanon, poste migris al Egiptujo kie, post relative prospera periodo, ili estis peze subpremitaj; la juda nacio kutime datas sian historion de la «Eliro» el Egiptujo, ĉ. 1300 a.K. Ĉirkaŭ 1250 a.K. la popolo konkeris Palestinon (teritorion nuntempe parte en Israelo kaj parte en Jordanio); sed unue la asiria, poste la romia, imperioj detruis ĝian sendependecon kaj la judoj iĝis popolo diserigita kaj ekzilita, vivanta, ofte kun malhelpoj, en multaj fremdaj landoj. Plene sendependan hejmlandon ili denove havis nur post 1948: Israelon, kiu situas proksimume kie iam situis la lando Kanaano; ĝiaj oficialaj lingvoj estas la hebrea (modeŝnigita) kaj la araba, sed multaj israelanoj parolas la diversajn lingvojn de siaj iamaj loĝlandoj.

La israelanoj ege evoluigis sian hejmlandon agrikulture kaj industrie; sed ili ne enhejmiĝis en teritorio malplena, kaj tragikaj problemoj pri arabaj viktimoj de diversaj konfliktoj, kaj ofte malbonaj rilatoj kun najbaraj arabaj landoj, kaŭzis grandajn suferojn. Espereble, du rasoj, kiuj etnologie kaj lingve estas proksime parencaj, kaj kiuj ambaŭ kolose kontribuis al la mondaj kulturo, progreso kaj civilizacio, solvos siajn restantajn problemojn, kaj tiel pliriĉigos kaj plifeliĉigos ne nur sin mem, sed la tutan homaron, ĉar malpaco ie ajn endanĝerigas nin ĉiujn kaj tentas fimotivajn enmiksigantojn. Kompreneble, ne estas spaco en malgranda Israelo por ĉiuj judoj; do multaj restos dise tra la mondo.

Israelo havas propran nacian Esperanto-asocion, Esperanto-Ligo en Israelo, kaj kulture valoran gazeton, *Israela Esperantisto*. Pluraj israelanoj, aŭ judoj aliloke, valore kontribuis al esperantologiaj studoj.

La jena fabelo, malnova kaj naiva, iom ĉarme miksas mirindaĵojn, humuron kaj piecon.

La Magia Ringo

Iam, pia kaj klera rabeno, kiu loĝis en granda urbo, havis edzinon malindan; ŝi estis egoisma kaj kverelema, kaj ofte riproĉis lin,

ĉar li disdonis almozojn kaj senpage instruis ĉiujn, kiuj volis lerni. Li ĉiam penis respondi milde kaj nur atentigi ŝin, ke almozado estas devo.

Sed ili iĝis malriĉaj; kaj tiam la edzino eĉ pli laŭte kaj akre riproĉadis la rabenon, ĝis li decidis forlasi la hejmon, kaj serĉi fortunon aliloke. Kun kelkaj lojalaj disĉiploj, unu nokton li diskrete foriris, lasante al la edzino la domon kaj la pli grandan parton de sia restanta mono. Kiam la edzino vekiĝis, ŝi nek ploris nek pentis, nur zorgis, ke la pordo estu ekde tiam ĉiam barita kontraŭ ĉiuj almozpetantoj.

Dum tempo la rabeno kaj liaj disĉiploj bone vivis en alia urbo, kie la urbanoj sentis, ke estas honoro, gastigi tian klerulon; sed li ne volis tro ŝarĝi ilin, do baldaŭ iris al alia urbo; kaj faris simile plurfoje, ĝis la vestoj de la grupo estis preskaŭ eluzitaj, la ŝuoj estis truitaj, kaj la rabeno ankoraŭ ne trovis sekuran lokon. Finfine la disĉiploj ekplendis, kvankam dece kaj ĝentile.

“Kara rabeno, pardonu nin! sed ni volas reiri al niaj familioj. Ni konstante vagadis; ni estas neniam sataj; niaj vestoj kaj ŝuoj estas eluzitaj. En tia mizero ni ne povas diligente studi.”

La bona rabeno respondis same milde.

“Karaj lernantoj, pardonu min, ke mi ne sukcesis aranĝi nian vivon pli agrable. Longe vi estis lojalaj kaj senplendaj, kaj estas tute nature, ke vi deziras hejmeniri. Tamen, mi petas vin esti paciencaj nur unu lastan semajnon. Se dum tiu ĉi semajno Dio, kies nomon ĉiuj laŭdu ĝis la fino de la tempo, volos helpi nin, ni iros hejmen kune en bona stato. Sed se Dio, alimaniere amante nin, volas provi nin plu, vi rajtos iri hejmen sen mi, kaj mi benos vin kaj ne riproĉos vin.” La junaj disĉiploj konsentis.

La rabeno iris, sola, en arbaron, por mediti kaj preĝi.

En la arbaro, li subite vidis malgrandan mustelon; kaj tiu mustelo portis ion brilan en la buŝo. Li sekvis la beston, kaj konstatis, ke ĝi portas oran ringon.

“Se nur mi havus tiun ringon!” li kriis. “Ora ringo estas senutila al mustelo; sed mi povus vendi ĝin, kaj miaj disĉiploj kaj mi povus almenaŭ nutri nin dum kelkaj tagoj”.

Li komencis kuri; la mustelo forkuris, sed pro timo faligis la ringon. La rabeno prenis ĝin: grandan ringon, pezan, el vera oro. Sur la interno estis gravuritaj la vortoj:

MI VENDIĜIS MALKARE
MI VALORAS ELSTARE

“Eble ĝi estas ringo magia,” pensis la rabeno. Li surmetis ĝin, kaj preĝis, “Kara Dio, bonvolu helpi min malriĉan, kaj donu al mi modestan monujon kun iom da mono.”

Antaŭ liaj piedoj kuŝis malgranda, sed ronde ŝvela, monujo; li malfermis ĝin, kaj ĝi estis plena de ormoneroj. Post dankpreĝo, li kuris al siaj disĉiploj.

“Karegaj disĉiploj! Dio nin benis; mi trovis helpon por ni; venu kun mi al la apuda vilaĝo, kaj mi povos aĉeti por ni ĉiuj novajn vestojn, fortajn ŝuojn, kaj abundan manĝon”.

La ĝojaj disĉiploj kredis, ke la rabeno trovis noblan mecenaton; kaj li ne volis tro paroli pri magiaj ringoj al novicoj. Ĉiuj revestis sin bone, satmanĝis, kaj baldaŭ reiris al la hejma urbo, kie amikoj, parencoj kaj urbaj kleruloj ĝoje kaj estime bonvenigis ilin. Malgajá estis nur la edzino, kiu sentis, ke ŝia trankvila tempo estas finita.

La rabeno rekomencis siajn antaŭajn viv-kutimojn, kaj malavare donis almozojn al ĉiuj mizeruloj. La edzino vidis, ke mono nun abundas, ke ili vivas tre komforte, sed ne komprenis la kialon, kaj komencis tedi la edzon per persista demandado.

“Kara edzino,” li diris milde, “Dio donis al mi trezoron.”

“Kiam?”

“Kiam mi estis for.”

“Kie?”

“En arbaro, kiam mi preĝis.”

“Sed kia ĝi estas?”

“Kara mia, fidu al mi; ni havas trezoron; ĝis la fino de niaj tagoj ni povos vivadi komforte kaj helpi aliajn. Estas pli bone, ne tro scivoli pri strangaj aferoj. Ĉio estas bona kaj deca; do, mi petas vin, ne demandu persiste pri aferoj ne facile kompreneblaj.”

Sed la edzino persistis, kaj persistis, kaj tiel turmentadis la rabenon per siaj demandoj, ke finfine li rakontis al ŝi pri la mustelo. Tiam ŝi ne kontentiĝis, sed koleris.

“Neniu saĝa virino kredus tian sensencaĵon! Montru al mi la ringon!”

Li rifuzis; sed denove ŝi persistis kaj persistis; sed ĉi-foje li rezistis kaj rezistis, komprenante, ke ŝi ne estas inda, por posedi

tian scion. Sed venis tago, kiam li estis laca post diligenta studado, kaj post la ĉiutaga teda petado ŝi mokis, "Mi tute ne kredas, ke vi havas ian ajn ringon!" Tio incitis lin; li montris la ringon; ŝi insistadis, laŭtvoĉe kaj kun larmoj, ke li lasu ŝin rigardi ĝin kaj teni ĝin; tiam ŝi enpuŝis sian fingron kaj diris: "*Mia edzo iĝu lupoj, kaj forkuru en la arbaron.*" Jen staris granda griza lupoj, kiu saltis tra la fenestro kaj kuris en la arbaron. Kiam la disĉiploj venis, la edzino diris, ke la rabeno forvojaĝis kaj revenos nur post jaro.

La lupoj devis manĝi ŝafojn, por vivi; sed sukcesis amikiĝi kun braĝisto en la arbaro; por tiu afabla homo, la lupoj svingis la voston kiel hundo, kaj dormis protekte antaŭ lia pordo.

La ŝafgardistoj plendis al siaj nobeloj, kaj la nobeloj konsultis la reĝon, pri la danĝera lupoj, kiu atakas ŝafojn kaj timigas homojn. La reĝo promesis edzinigi sian filinon al tiu bravulo, kiu mortigos aŭ kaptos la lupojn.

Kuraĝa kavaliro ekiris por ĉasi la lupojn, kaj, en la arbaro, renkontis la braĝiston.

"Ĉu vi povas informi min, kie mi trovos la grandan lupojn?" li demandis.

"Jes, sinjoro kavaliro, sed — kun la plej alta estimo al via kuraĝo kaj respekto al via rango — mi permesas al mi konsili, ke vi ne ĉasu ĝin; ĝi estas eksterordinare granda kaj inteligenta, kaj tre danĝera."

"Do, kiel vi sukcesas resti vivanta, ĉi tie en la arbaro?"

"Mi ne minacas la lupojn — kaj ĝi estas lupoj tre saĝa; ni eĉ interamikiĝis. Kun respekto al via rango, sinjoro, mi suspektas, ke la lupoj estas homo sorĉita."

"Ĉu vere? Nu, mi do ne mortigos ĝin. Sed ĉiuj korteganoj mokos min, se mi nur hejmeniros, fanfaroninte kaj nenion farinte! Gvidu min al la lupoj, kaj mi penos kapti ĝin."

La braĝisto gvidis lin al sia kabano, kaj tie la lupoj sidis, gardante la pordon. Ĝi tuj kuris al la kavaliro, montrante la dentojn.

"Ne!" kriis la braĝisto. "Bona lupoj, ne faru!" Kaj la lupoj tuj haltis, kaj staris svingante la voston.

"Sed ankaŭ vi ne faru!" protestis la braĝisto, kiam la kavaliro subite elingigis sian glavon.

Kiam la kavaliro ekatakis la lupojn, la bestoj saltis sur lin, faligis lin, kaj staris sur li, preta ŝiri lian gorĝon.

“Dio helpu min!” kriis la kavaliro.

Tuj, aŭdante la nomon de Dio, la lupo liberigis lin, kaj lekis lian manon, kaj svingis la voston. La kavaliro metis ŝtalan ĉenon ĉirkaŭ la kolon, kaj forkondukis la lupon, kiu ŝajnis eĉ ĝoja, kaj volonte ekiris kun sia kaptinto. En la kortego la lupo komencis vivi kiel dombesto, neniam minacis iun, neniam ŝtelis ion, svingis la voston kiam iu karesis ĝin. La kavaliro edziĝis kun la princino, kaj baldaŭ heredis la regnon.

Venis la vintro; neĝo kovris la teron. La nova reĝo rajdis por ĉasi, kaj, kiel kutime, la lupo akompanis lin. Baldaŭ la reĝo rimarkis, ke la lupo ne sekvas; li iom reiris, kaj vidis ion strangan; la lupo skribis literojn, en nekonata lingvo, en la neĝo.

La reĝo sendis kavalirojn tuj al la urbo, por venigi kelkajn klerulojn, kiuj scipovas diversajn lingvojn. Ili identigis la skribaĵon kiel en la hebrea, kaj unu el ili tradukis ĝin:

“Kara reĝo! En via ĉefurbo loĝas mia edzino. Ŝi sorĉis min per ora ringo. Savu min. Trovu la ringon kaj ebligu, ke mi iĝu homo denove. Interne la ringo havas devizon: «MI VENDIĜIS MALKARE, MI VALORAS ELSTARE». Ho reĝo, memoru, ke mi ne mortigis vin. Memoru nian amikecon.”

La miranta reĝo karesis la grizan kapon, reiris al la palaco, kaj venigis la ĉefgvidantojn de la ĉefurbaj judoj.

“Mi deziras kolekti neordinarajn aŭ antikvajn ringojn,” li diris. “Mi petas vin, vizitu ĉiujn riĉulojn de via komunumo, kaj aĉetu, kontraŭ justa prezo, neordinarajn ringojn. Mi tuj repagos vin.”

Unu el la ĉefaj judoj respondis. “Reĝa Moŝto, malmultaj el ni estas riĉaj, kaj ĝenerale ni ne aĉetas juvelojn; sed inter ni estas riĉulino, edzino aŭ vidvino de rabeno. Ŝi aĉetas multajn luksaĵojn, kaj oni diras, ke ŝi posedas multajn rarajn juvelojn.”

“Mi mem vizitos ŝin tuj,” diris la reĝo.

Li vizitis ŝin, kaj klarigis, ke li serĉas neordinarajn ringojn, kiujn li aĉetos kontraŭ bona prezo.

“Estas granda honoro al mi, via Reĝa Moŝto,” ŝi diris. “Mi alportos mian juvelskatolon.” Kaj ŝi montris al li multajn belajn ringojn.

“Ĉu vi havas aliajn?”

“Nur mian fianĉinan ringon kaj mian edzinan ringon, kiujn mi portas sur mia zono.”

Ŝi montris ilin, kaj li vidis la oran ringon, kun la devizo, ankaŭ sur la zono. Li aĉetis kelkajn ringojn, kaj la edzino senhezite kaj senhonte konsentis vendi sian arĝentan fianĉinan ringon. Dum ŝia zono estis malligita, kaj ili aranĝis pri la aĉeto, la reĝo lerte enpoŝigis la magian ringon. Li tuj rajdis al la kortego, kaj metis la ringon sur la piedon de la lupo.

Post momento, antaŭ ĉiuj staris maljuna rabeno.

Li rakontis sian historion, kaj petis permeson, reiri al siaj hejmo kaj libroj. La reĝo konsentis, kaj volis donaci al li multajn trezorojn, sed li ĝentile rifuzis. “Nun, kun mia ringo, mi povos havigi al mi ĉion, kion mi bezonos, kaj superfluan, por almozdoni al mizeruloj. Via Reĝa Moŝto, mi dankegas vin; mi neniam forgesos vin; mi estos dumvive je via dispo, se mi povos iel servi vin.”

La rabeno iris hejmen, sed ne trovis la edzinon, kiu estis ekstere, febre serĉante la perditan ringon. Ankaŭ liaj disĉiploj venis; kaj la rabeno, kun la helpo de la ringo, preparis manĝon por ĉiuj.

Sed kiam li aŭdis sian edzinon en la ĝardeno, li apartigis sin momente, kaj diris al la ringo, “Mia edzino iĝu azenino.” Poste, al la festantoj, “Ĉu unu el vi afable serĉos mian edzinon en la ĝardeno?”

Disĉiplo eliris, rondiris la domon, kaj revenis.

“Rabeno, via edzino ne estas en la ĝardeno; sed azenino vagas inter la legomoj.”

“Ho, bonvolu ligi la beston en la budo, apud la kultiviloj.”

La rabeno prosperis, kaj vivadis virte, kaj instruis multajn disĉiplojn. Sed tio ne sufiĉis por danki Dion, kaj li volis konstrui novan sinagogon. Li pagis la masonistojn kaj ĉarpentistojn, li aĉetis la ŝtonon kaj lignon, kaj li pruntis al la konstruistoj azeninon, kiu portis la lignon kaj foje ricevis vipobatojn. Li neniam rehomigis ŝin, dirante, “Kiam ŝi estis homo, ŝi kondukis kiel azenino, do nun ŝi restu azenino.”

La rabeno mortis ege estimata kaj amata. Poste, lia ringo iel perdiĝis. Eble iam alia bona homo retrovos ĝin.

48. DEVIZOJ

Dum la epokoj, kiam heredaj rangoj, nobelaj familioj, gravis multe pli ol en la nuntempo, ĉiuj aristokratoj eŭropaj aŭ ekseŭropaj havis blazonojn; kaj ofte, kvankam ne ĉiam, sub ies blazono troviĝis ties devizo. Ankaŭ diversaj institucioj, kiel ekzemple universitatoj, urboj, bibliotekoj, kompanioj, filantropaj organizoj, akiris blazonojn, ofte kun devizoj.

La leĝoj pri blazonoj estas striktaj kaj tre komplikaj; neniu rajtas propravole desegni aŭ alproprigi blazonon; sed ni ĉiuj estas tute liberaj, elpensi personajn devizojn laŭ niaj propraj kapricoj, kaj uzi ilin laŭdezire.

Ĝenerale, estas kvar specoj de devizoj: komentoj pri blazono; komento pri blazono kaj nomo; vortludo pri nomo; ia ĝenerala aludo aŭ principo.

Kompreneble, du specoj estas neeblaj, sen blazono. La universitato de Manĉestro, Anglujo, havas sur sia blazono serpenton, kiu levas la kapon al brilanta suno; la latina devizo signifas "Arda al la suno." Do, estas la serpento, kiu estas arda al la suno. La blazono kaj la devizo kune povas simboli la noblan ardadon de indaj universitatanoj al scio kaj vero.

Estas familio Merle, "merlo", sur kies blazono oni vidas merlon; kaj sube la franca devizo signifas, "La merlo amas la libercon." Tia devizo aludas la bildon sur la blazono, kaj la familian nomon.

Devizoj kun vortludoj pro familiaj nomoj estas sufiĉe oftaj kaj ĉarmaj. Franca familio Buisson, "Arbusto," havas blazonon kun tri oraj rozoj kaj devizo franca, "La rozo venas de la arbusto." La devizo de svisa-franca familio Grandson tolereble tradukiĝas en Esperanton kiel "Eta sonorilo, granda son'." Bretona familio Héder de Kerlambert havas, originale latine, "Hederoj sin alkrōčas kaj subtenas." Alia bretona familio, Du Refuge, havas "Rifuĝejo por ĉiuj." Franca familio Tourtoulon, ĉar *tour* signifas "turo", sed *tourtereau* "turto", elpensis devizon signifantan "Turo por mal-

amikoj, turto por amikoj.” Angla familio Frankland, kies nomo signifas “libera tero”, uzas devizon signifantan “libera tero kaj libera animo.” Franca familio Laurès uzis “Laŭroj timas nek malvarmon (aŭ morton, ĉar la latina vorto estas dusenca) nek la fulmon de Jupitero,” kaj familio aŭstra, belga kaj franca, Ligne, “linio”, uzis “Kio ajn pereas, ĉiam restas rekta linio.” Bohema familio Lobkowitz, kiu havis alian nomon Popel, “cindro”, pli humile uzis devizon signifantan “Cindro mi estas, cindro mi estos.” Estona familio Speranski uzis *Sperat in Inversis*, “Li esperas dum sortoturnoj.”

Malmultaj familiaj nomoj ebligus esperantajn vortludajn devizojn; tamen, kelkajn tiajn oni povus elpensi. (Pri la sekvantaj ŝercoj, respondecas nur la aŭtorino). Andreo Cseh, kies nomon oni elparolis *ĉe*, povus do uzi “Ĉe mia posteno”, aŭ Teo Jung “Jungita al verda ĉaro”; Ivo Lapenna, kies atingoj por Esperanto kaj en sia profesia fako estis grandiozaj, rajtus aserti, “La peno atingas celojn.” Reto Rossetti, kreinto de belaj lirikoĵoj sed ankaŭ spritaĵoj kaj satiroj, povus esti “Rozeto kun dornetoj.” Por Edmond Privat, kiu multe laboradis ne nur por Esperanto sed por diversaj pacigaj kaj humanaj aferoj, taŭgus “Private por la publika bono.”

Kelkaj esperantistoj povus vortludi per la familiaj nomoj, se ili tradukus ilin; ekzemple, Samenhof, formo de Zamenhof, en la germana lingvo signifas “sem-korto”, do “Ni semas kaj semas konstante” el lia *La Vojo* duoble taŭgus kiel devizo por li. En la hungara, Tárkony, nomo de tre bona esperanta poeto, signifas “drakunkolo”, valoran kuirherbon, do eble “Drakunkolo bongustigas.” John Wells, unu el niaj plej bonaj fonetikistoj kaj leksikologoj, havas familian nomon signifantan angle “putoj”, do povus uzi devizon, “Ĉerpu el la putoj de scio.” Pioniro de la fruaj jaroj, Trompeter, kies nomo signifas en la germana “trumpetisto”, povus elekti, “Mi trumpetos la veron!”. Sed relative malmultaj nomoj havas facilajn tradukojn, kaj tiaj aludoj restus iom privataj, ĉar malmultaj esperantistoj scius pri la rilataj naciaj lingvoj.

La granda plimulto da devizoj estas tiuj pli ĝeneralaj devizoj, kiuj montras ian principon de konduto aŭ pensmaniero. Tiaj devizoj estas ofte belaj kaj pensigaj. Certe ne ĉiuj, kiuj elektis kaj montradis noblajn devizojn, ĉiam kondukis laŭ tiuj principoj; kiu sukcesas dumvive fideli al siaj propraj plej altaj idealoj? Sed la

konstanta ĉeesto de iu bela devizo antaŭ la okuloj tre eble helpis multajn homojn, atenti siajn idealojn kaj rezisti tentojn.

Devizoj de malnovaj aristokratoj ekzistas en multaj lingvoj: la franca, germana, greka, hispana, itala, sveda, bretona, angla, bohema, kroata, irlanda, k.t.p. Sed plejparte oni uzas la latinan. Kial? ĉar, nesciante, ke iam lingvistoj asertos kontraŭ Esperanto, ke internacia neŭtrala lingvo ne povos funkcii kiel vivanta lingvo, la kleruloj de multaj landoj dum kelkaj jarcentoj uzis la latinan ĝuste tiel, kiel neŭtralan internacian lingvon...

La fruaj aristokratoj ofte elektis devizojn, kiujn ni nun trovas tro arogantaj, tro insistantaj pri la fiero kaj nevenkebleco de la familio; aŭ promesantaj senkondiĉan servadon al la reĝo kaj patrujo, kvankam ekzistas devoj, kiuj superas tiujn.

Sed estas interese, kiom da aristokratoj fakte elektis devizojn, kvazaŭ por averti sin mem, ke nobela sango ne aŭtomate kreas noblan homon. Jen kelkaj devizoj (tradukitaj, kompreneble) de diversaj familioj:

“Nur virto famigas.” — (Alten de Coltern, Germanujo)

“Virto (estas) la sola nobeleco.” — (Hamilton, Irlando)

“Virto (estas) la plej granda glorbriilo de nobeleco.”

— (Löhneysen, Germanujo)

Ofte eĉ malnovaj devizoj temis pri virtoj ne nur de batalantoj:

“Per fido, diligento kaj amo.” — (Braunecker, Hungarujo)

“Kun humileco.” — (Carlyle, Skotlando)

“Sincera kaj sen trompo.” — (Cartier, Kanado)

“Persistado venkas ĉion.” — (Cooper, Aŭstralio)

“Mi fidas al virto, ne al armiloj.” — (Egerton, Anglujo)

“Mi timas nenion, krom hontindaĵoj.” — (Ghislanzoni, Italujo)

“Per honoro kaj amo.” — (Hammersley, Usono)

“Per amo, ne perforte.” — (Heathcote-Amory, Anglujo)

“Libereco pli kara ol vivo.” — (Heyns, Nederlando)

“Diligento kaj malavareco.” — (Jejeebhoy, Hindujo)

“Kontento superas riĉecon.” — (Ledebuhr, Germanujo)

“Bona, justa kaj utila.” — (Lerrier, Ĵersejo)

“Nek misfortuno nek prospero ŝanĝu (min).” — (Aminov,
Finnlando)

“Lojala, sincera, aŭtentika.” — (Bergmüller, Aŭstrujo)

“Per kuraĝo kaj mildeco.” — (Bernard de Lausière, Francujo)

“Per laboro kaj atentemo.” — (Boba, Sardinio)

“Pli fidela en malfeliĉo.” — (Boubers Abbeville-Tune,
Francujo)

“Kara la patrujo, pli kara la libereco.” — (Bouverie, Anglujo)

“Karitato en ĉio.” — (Brossais, Francujo)

“Mi soifas justecon.” — (Coppetiers t’Wallant, Belgujo)

“Rekte kaj afable.” — (Marx, Aŭstrujo)

“Per kuraĝo kaj konstanteco.” — (Orlov, Estonujo)

Multaj devizoj, kiuj estas kvazaŭ maksimumoj, estas vere saĝaj memorigiloj, utile pensigaj, ekzemple:

“La vero venkas.” — (Vera, Hispanujo)

“Mi ne volas timigi, mi ne scias timi.” — (Dyer, Anglujo)

“Kiu vivas kontenta, havas sufiĉon.” — (Bradshaigh, Anglujo)

“Per malfacilaĵoj al altaĵoj.” — (Budwinski, Pollando)

“Oni kalkulas fortunon inter dubindaĵoj, virton inter fidindaĵoj.” — (Catti, Italujo)

“Pacienco venkas forton.” — (Charreton, Belgujo)

“Faru kion vi devas, alvenu kio povas.” — (Foissac, Francujo)

“Se mi povas.” — (Eyre, Skotlando)

“Virto (estas) pli granda ol la sorto.” — (Gripenstjerna,
Svedujo)

“Fidu – sed al kiu, vidu.” — (Korf, Estonujo)

“Silenti aŭ diri bonon.” — (Mazade, Francujo)

“Finfine bona celo triumfas.” — (Möller, Danujo kaj Usono)

“Kiu envas, estas malpli granda.” — (Quarles, Nederlando)

“La morto de libereco estas morto mia.” — (Stjernfels,
Svedujo)

“Ĉiuj virtoj estas en justeco.” — (Sims, Usono)

“Amiko (estas) la konsolo de la vivo.” — (Archer-Burton,
Anglujo)

“Faru bone, lasu ilin paroli.” — (Boissy d’Anglas, Francujo)

“Atestanto en la brusto.” — (Hermansson, Svedujo)

[t.e. konscienco restas kiel gvidanto por ni ĉiuj.]

“Vivi estas pensi.” — (Reepmaker, Nederlando)

“Tiu ne meritas dolĉaĵojn, kiu ne gustumis amaraĵojn.”

— (Wiselius, Nederlando)

Aŭ iom pli frivola, sed ne sen saĝa konsilo, estas la devizo de irlanda familio Keane: “Karesita kato estas milda.”

Ekzistas multaj malnovaj devizoj, kiujn esperantistoj povus taŭge adopti, ekzemple:

“Mi vivas en espero.” — (Affaytadi, Belgujo)

“Kio pli brila ol la steloj?” — (Baillie, Skotlando)

“Ni laboras en espero.” — (Blackett, Anglujo)

“Ankoraŭ mi esperas.” — (Cigogno-Clerici, Italujo)

“Denove ĝi verdiĝas.” — (Estimbrieue, Francujo)

“Verda en ĉiuj tempoj.” — (Kerguelen, Francujo)

“Brilas en mallumo steloj kaj virtoj.” — (Morren, Irlando)

“Espero kondukas al la steloj.” — (Zinzerling, Svisujo)

Kaj la devizo de la blankhaŭtaj raĝoj de Saravako, la familio Brooke, de kiu ekskronprinco Anthony Brooke estas esperantisto kaj vigla kampanjanto por paco kaj internacia komprenemo, taŭge havas la devizon: “Dum mi spiras, mi esperas.”)

Jam ekzistas kelkaj vere specifaj esperantistaj devizoj. Iu, verŝajne la edzino Klara, metis sur la skribmaŝinon de Zamenhof devizon el la *Dua Aldono* (t.e. al la unua libro pri Esperanto): “Ni laboru kaj esperu!” Iasence, la devizo de Zamenhof povus esti simple “Mi estas homo”, laŭ lia iama kaŝnomo latina, “*Homo sum*”, aŭ lia alia kaŝnomo, “Unuel”, signifanta, “Mi estas nur *unu el* la esperantistaro”, kun la sekva implico, “ni ĉiuj laboru laŭ niaj kapabloj kaj neniu arogu dikti al aliaj...”

La pioniro Théophile Cârț uzis la devizon “Ni fosu nian sulkon!” — kiu implicas, “ni faru nian laboron kaj ne lasu nin distriĝi per nenecesaj konfliktoj”, tiutempe, tielnomitaj reform-proponoj pri la lingvo. Teo Jung kutimis difini sin mem kiel “Ĉies servanto, nenies sklavo.” Julio Baghy metis en siajn verkojn sian iom longan devizon:

“AMO KREAS PACON.

PACAMO KONSERVAS HOMECON.

HOMECON ESTAS LA PLEJ ALTA IDEALISMO.”

Juan Régulo Pérez metis en plurajn librojn de la grava kultura eldonejo Stafeto, la devizon, “Helpu pluporti la torĉon!”

En 1972 aŭstralia lernejestro, J.C. Campbell, bezonis devizon por nova lernejo, kaj ne emis uzi la latinan, ĉar “aŭstralia lernejo ne havu devizon fremdlingvan.” Sed li ekpensis, ke ankaŭ la angla estas fremda lingvo por la multaj indiĝenaj geknaboj, kaj ŝajnos malfavori ilin. Li do elektis esperantan devizon, neŭtralan, por ĉiuj egale: “Nenio sen laboro.”

Oni povas facile elpensi kelkajn devizojn por unuopaj esperantistoj aŭ esperantistaj societoj:

“Per saĝo kaj kuraĝo.”

“Altruiste kaj persiste.”

“Ni homiĝu por homigi.”

“Por la beno de kompreno.”

“Esperante!”

“Homarane.”

“Super mi brilas stelo.”

“Konsole aŭ frivole, sed ĉiam bonvole.”

“Por lingva justeco.”

Aŭ oni povas elekti frazon el la *Proverbaro*, la poemoj de Zamenhof aŭ alia taŭga fonto...

Kaj jen bona temo por ekzercoj, konversacioj kaj grupaj kunvenetoj, ĉu ne? Kial ne daŭrigi ĉi tiun studaĵon?

Serpenta Histriono

Ekzistas en Usono serpento, populare la “pork-naza serpento”, kiu aktoras; ĝi ne estas danĝera, sed se iu ĝenas ĝin, ĝi subite ŝveligas sin kaj platigas la kapon, por aspekti kiel kobro.

Pensante pri tiu tre venena azia serpento, la ĝenanto tre eble forkuras. Tiam la serpento malŝveligas sin kaj glitas for. Sed se la ĝenanto restas, tiu serpento provas duan rolon: kiel multaj bestoj en krizoj, ĝi ŝajnigas sin morta.

Ĝi ‘scias’, ke morta serpento kuŝas sur la dorso, do ĝi refalas, ruliĝas sur la dorson kaj kuŝas senmova. Sed se iu prenas ĝin kaj

metas ĝin kun la dorso supre, la serpento insistas, ke ĝi estas ja morta — reruliĝante sur la dorson.

Plumamika Rekordo

Ĉu iam du esperantistoj rompos la ĝisnunan konatan rekordon pri daŭro de plumamikeco? Aŭstralianino kaj anglino en 1980 estis plumamikinoj jam dum 73 jaroj.

Novaj Proverboj

Kredeble al putoro plaĉas propra odoro.

Ne malŝatu vian kontraŭsekson; propran havas ankaŭ ĝi perplekson.

Ne uzu mitralon por mortigi najtingalon.

Ĝenas or' kaj arĝento en maltaŭga momento.

Universala Fabeleto

La sekvanta fabelo estas nun konata kiel fabelo el Kubo, kie oni diras, ke ĝi devenis de la joruba popolo en Afriko. Sed versio de ĝi jam ekzistis inter anekdotoj de minora helena verkisto Ksanto, kiu notis ĝin antaŭ eble 2 500 jaroj.

LANGO

Granda malnova dio de ĉio, Obatalo, havis junan vic-dion, Orulon. Li demandis sin, ĉu Orulo estas jam sufiĉe saĝa, por regi la Teron. Por provi lin, li ordonis al li, “Preparu la plej bonan objekton eblan, por mia manĝo”.

Orulo iris al la bazaro kaj elektis langon de bovo. Li kuiris ĝin lerte, kun herboj kaj spicoj, kaj Obatalo manĝis ĝin kun bona apetito.

“Bonege!” diris Obatalo, viŝante la buŝon. “Sed nun, klarigu al mi, kial vi elektis ĝuste tion.”

“Ĉar la lango tre kapablas por bono. Per lango ni povas laŭdi bonfarintojn, kuraĝigi bonfarontojn, diskonigi bonajn novaĵojn,

fari saĝajn proponojn, montri respekton, instrui bonajn principojn, disdoni scion...”

“Prave!” lin interrompis Obatalo. “Nun montru vian saĝon duan fojon. Preparu por mia manĝo la plej malbonan objekton — manĝeblan, kompreneble!”

Orulo denove iris al la bazaro, elektis langon de bovo kaj kuiris ĝin same lerte. Obatalo manĝis ĝin volonte, sed poste demandis, “Kial vi nun proponas ĉi tion, kiel la plej malbonan objekton?”

“Ĉar la lango tre kapablas por malbono. Per lango ni povas moki valorajn laborojn, klaĉi kaj detrui reputaciojn, kalumnii, insulti, disdoni mensogojn kaj misinformojn, fari maljustajn aŭ malsaĝajn ordonojn, kvereli, perfidi nian patrujon...”

“La plej bona, kaj la plej malbona...” diris Obatalo, “Orulo, vi estas jam tre saĝa. Ekde hodiaŭ, regu la Teron.”

49. L.L. ZAMENHOF

Ĉiu, kiu sin nomas esperantisto, devus scii ion ne nur pri la vivo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kreinto de Esperanto, sed pri liaj verkoj.

Lia vivo estis eksterordinare malegoisma; ankaŭ por neesperantisto ĝi valoras legadon, ĉar ĝi kuraĝige montras, kiom da utila laboro unu homo, nek forta, nek riĉa, nek en ia avantaĝa pozicio, povas fari se li aŭ ŝi tutkore deziras multon fari; kaj ĝi hontige kaj instige montras, kiel servema, modesta, pardonema kaj pacienca unu homo povas restadi en malfacilaj cirkonstancoj, eĉ unu homo sufiĉe nervoza, delikate sentema, kaj konstante streĉita per troa laborado.

Ekzistas pluraj biografioj de Zamenhof, diversaj laŭ longeco kaj emfazoj, en Esperanto kaj en pluraj naciaj lingvoj. Ion tian oni nepre legu. La plej bona por komencantoj estas tiu de Edmond Privat: mallonga kaj simpla frua biografio, ĝi estas ankaŭ stile ekzempla; kaj Privat konis Zamenhof persone. Landa asocio havos (aŭ devus havi) diversajn aliajn verkojn.

Dume, resume: Ludoviko Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro, 1859, infano de tre severa, subpremanta patro, milda amoplena patrino; oni povus diri, ke Zamenhof miksis en ĝustaj proporcioj la raciemon, memdisciplinon kaj precizemon de la patro, la paciencon, toleremon kaj saĝajn intuiciojn de la patrino. Judo en carista rusa Polujo, li ankaŭ lernis tre frue pri viktimiĝo, la antaŭjuĝoj de rasismo, la amareco de la vivo de subpremitoj.

En Bjalistoko, kie li naskiĝis kaj kreskis, li vidis malamikecon, kverelojn kaj foje stratbatalojn inter rusoj, poloj, germanoj kaj judoj; kiel knabo, kredis, ke la diverseco de lingvoj kaŭzas la malamon; kaj dediĉis sin al kreado de universala lingvo. Plenkreska, li ne retenis tiun naive trosimplan sintenon; sed ĝismorte li klopodis helpi la homaron per universala lingvo, kiu solvos almenaŭ kelkajn problemojn kaj kontribuos ion al paco kaj toleremo.

Kiel lerneĵano, li studadis diligente, bone sukcesis, kaj akiris scipovon de pluraj lingvoj. Nur deknaŭ-jara, li estis jam kreinta unuan iom detalan skizon de nova lingvo, kun gramatiko, eta vortaro, eĉ kelkaj provaj tradukoj, kaj kiun Zamenhof kaj kelkaj kamaradoj povis paroli. Sed, pro la severeco kaj suspektemo de la carista reĝimo, la projekto povus esti danĝera; kiam Zamenhof estis for, studante medicinon en Moskvo, lia patro bruligis liajn manuskriptojn. Tiu ago, kiu nun ŝajnas tiel kruela kaj vandala, eble havis motivojn ne malbonajn; sed estis forta bato. Tuj Ludoviko eklaboris denove; reverkis sian lingvoprojekton, poluris, provadis, repoluradis ĝin; kvalifiĝis kiel kuracisto, kaj poste kiel okulisto; edziĝis, feliĉe al tre taŭga kaj ĝismorte lojalega kunulino, Klara; kaj en 1887 eldonis la unuan libron pri Esperanto.

Juna, Zamenhof dediĉis multan tempon kaj riskon al laboroj rilataj al la suferoj de la judoj; mezaĝe, li multe laboris pri sia «Homaranismo», nobla provo krei universalan religion, kiu ne rivalos aŭ forigos la malnovajn, sed kunligos divers-religianojn en fratcaj rilatoj; sed liaj ĉefaj laboroj estis por Esperanto. Ni devas ĉiam memori, ke lia tuta vasta laboro por Esperanto estis la laboro de liaj 'liberaj' horoj; li devis perlabori sian vivrimedon kiel okulisto, kaj kiel okulisto estis tute konsciencia. Dum multaj jaroj li devis barakti kontraŭ malriĉeco (parte, ĉar li oferis grandan sumon por savi sian patron, kiun maliculo endanĝerigis ĉe caristaj burokratoj); kaj kredeble li neniam sciis, kio estas vere agrabla sanstato.

Por evoluigi kaj disvastigi Esperanton, li grandskale korespondadis; faris organizajn laborojn; preparis vortarojn, ekzercaron, antologion; verkis originalajn eseojn kaj poemojn, kaj tiun *Fundamenton*, kiu lasis al ni tiom da libereco, sed sur bazo tiel firma.

Lia traduk-laboro estus en si mem ŝajne sufiĉa tasko por unu vivo: li tradukis la tutan Malnovan Testamenton, *Hamleto* (Ŝekspiro), *La Revizoro* (Gogolo), *Georgo Dandin* (Moliero), *La Rabistoj* (Ŝillero), *Ifigenio en Taŭrido* (Goeto), *La Batalo de la Vivo* (Dikenso), *Fabeloj* de H.C. Andersen, *Marta* (Eliza Orzeskowa), *La Rabeno de Baĥaraĥ* (Heine), *La Gimnazio* (Ŝalom Alejĥem) kaj kelkajn mallongajn poemojn, inter ili la faman studentan kanton *Gaudeamus igitur* el la latina. Andersen li tradukis ne el la dana, sed pere de germana traduko; sed li ja tradukis el ok lingvoj:

la latina, hebrea, jida, angla, rusa, pola, franca kaj germana. Imagu momente, kia tasko estus nur mane kopii tian verkaron; kia laboro estis traduki ĉion konsciencie; kia fido necesis, por traduki tian verkaron en lingvon ankoraŭ tiel malfortan, tiel ofte mokitan!

Li ĉeestis la unuan «Universalan Kongreson» en Bulonjo en 1905, kaj la sekvantaj Kongresojn en Ĝenevo (1906), Kembrigo (1907), Dresdeno (1908), kie li iĝis Honora Prezidanto de UEA; Barcelono (1909), Vaŝingtono (1910), Antverpeno (1911), Krakovo (1912), Berno (1913); kvankam tiaj grandaj manifestacioj tiel ĝojigis lin, ke dum la semajno li montris neordinaran vigecon; li mem diris, private, «Ĉiu Kongreso mallongigas mian vivon per kelkaj jaroj.» Por ĉiu Kongreso li preparis tre elpensitan, daŭre valoran, paroladon, ĝis en Krakovo li insistis, ke li ne plu estos la estro de la juna Movado, por ke ĝi ne havu karakteron tro personan. Kompreneble, en la Universalaj Kongresoj, kaj en la multaj aliaj esperantistaj eventoj, grandskalaj aŭ malgrandskalaj, kiujn li ĉeestis, li havis multajn aliajn lacigajn, nervostreĉajn devojn.

Li konstante, milde sed firme, kun sentemo pri la sentoj de aliaj, kun sinofera pacienco, strebadis por estigi kaj konservi konkordon, unuecon, inter-toleremon, interne de la Esperanto-Movado, kiun la konfliktoj de homoj plejparte bonintencaj, sed ne tiel neordinare grandanimaj, ofte malhelpis. Diversaj kvereloj de aliaj, kun la sekvaj suspektoj, akuzoj, polemikoj, tempo-perdoj, kaŭzis al li suferojn; precipe la siatempe grava «Ido-skismo» de 1907–1908, kiam vere perfidaj intrigoj pri rivala lingvo (modifita sed ne plibonigita Esperanto) ne nur kaŭzis konfliktojn, kiuj tragike malŝparis tempon kaj energion, sed eĉ estigis kalumniojn kontraŭ Zamenhof mem.

Kiam la unua mondmilito komenciĝis, Zamenhof estis jam survoje al la neokazonta Universala Kongreso en Parizo; post suferiga dusemajna vojaĝo hejmen al Varsovio, Zamenhof pasigis preskaŭ tri jarojn en urbo diversmaniere turmentita per militaj timoj, streĉitecoj, bruo, mankoj kaj malfacilaĵoj; la suferegoj de la popoloj kaj mortoj de amikoj tre vundis lian kompatoplenan animon. Lia korpo, neniam fortika, dum tiuj lastaj jaroj estis doloroplana.

Sed karakteriza estis lia lasta grava laboro; en 1915 li, iom riske, eldonigis eksterlande sian artikolon *Post la Granda Milito – Alvoko al la Diplomatoj*. Tie li petegis la diplomatojn, ne nur

modifi la mapon post la milito, sed celi la forigon de ĉiuj minoritataj problemoj kaj rasaj malamikecoj laŭ la principo ke “Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj.” La rimedo por atingi daŭran pacon estis “forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj”.

Farinte dum malfacila vivo sian eblon por interpacigi la homojn, Ludoviko Zamenhof mortis la 14-an de aprilo, 1917, dum granda milito — ŝajne venkita, grandioze venkinta.

Estas bone, foje pripensi tiun altruisman vivon. Tiaj vivoj helpas nin venki la amaron, cinikismon aŭ senesperemon, kiujn povas kaŭzi la ekzisto de friponoj, maliculoj aŭ tiranoj; kaj helpas nin venki friponecon, malicon kaj tiranemon en ni mem.

Sed esperantistoj ne nur estimu la unuan esperantiston. Estas valore, legi pri lia vivo kaj admiri lin; sed ni ne forgesu studi liajn verkojn. Ĉiuj liaj verkoj liveras al ni bonegajn ekzemplojn de esperanta stilo; ne nur de gramatiko kaj semantiko, sed de modela klareco. Kompari unu el liaj tradukoj kun la originala teksto en lingvo, kiun ni konas, multe instruas nin pri stiloj en Esperanto, pri la eblecoj de Esperanto, eĉ en tiu frua stadio, por interpreti la kompleksajn esprimojn de altnivelaj literaturaj verkoj; kaj pri kriterioj por la traduka arto.

La *Originala Verkaro* de Zamenhof estas ege havinda libro, kiun oni povas profite legi kaj relegi. Oni studu precipe la sekciojn “Antaŭparoloj”, “Paroladoj”, almenaŭ la ok grandajn kongresajn paroladojn; “Originalaj Poemoj”; kaj, inter la “Traktaĵoj”, minimume la ŝlosilan verkon “Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia” kaj poste “Gento kaj Lingvo Internacia” kaj “Post la Granda Milito”. Sed ĉio en tiu volumo estas pro ia kialo leginda, se oni havas tempon kaj inklinon.

En 1960, la Plenuma Komitato de UNESKO deklaris Ludovikon Zamenhof unu el la grandaj personecoj de la homaro. Ĝuste kiel granda, la homaro ankoraŭ ne scias; kaj eble ankoraŭ ne plene scias ni, malpli grandaj esperantistoj.



Novaj Proverboj

Plej grandioza laboro ĝermas en unu koro.
Kiu tro akaparas, finfine ne tre karas.
Kiu neniam miras, lame tra la vivo iras.
Pro nur unu viktimo, mil vivas en timo.

Pensigaj Vortoj

“La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la esperantaj kongresoj, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton.”

L.L. Zamenhof, en sia Kongresa Parolado, Krakovo, 1912

Iom pri Krokodiloj

Golfluda klubo en Kenjo dekretis en sia regularo: “Se la pilko de ludanto falas sur krokodilon, la ludanto rajtas elekti: aŭ movi la pilkon golfbastono-longan distancon, aŭ movi la krokodilon”.

En Aŭstralio, unu krokodilo, Ĉonki, en la rivero Adelaido, sufiĉe malsovaĝiĝis, por ĉiutage veni al la boato de amiko, kaj preni porcion da viando el lia mano, starante vertikale en la akvo por kapti ĝin.

Iam en Meksikio, la aztekoj, kiuj havis kalendaron kun dek tri cikloj de po dudek tagoj, nomis unu el la tagoj “la tago de la krokodilo”, kaj krokodiloj havis patronan diĝon, Tonacatecutli.

En Sovetio tre ŝatata satira gazeto, ankaŭ ofte citita eksterlande, estas la gazeto *Krokodilo* — kredeble la nomo aludas ĝian ‘mordemon’.

En antikva Egiptujo, oni adoris, inter la multaj dioj, Petesukon, dian krokodilon, en templa lago en la urbo Krokodilopolo. Petesuko estis vera krokodilo, maljuna, kiu portis orajn orelringojn kaj braceletojn. Vizitantoj nutris ĝin per viando, pano, eĉ vino, kaj mielo.

Laŭ mezepoka legendo, sankta Pakomio, abato en Tabenizo, Egiptujo, mortinta ĉirkaŭ 405 p.K., organizis specon de krokodila taksia servo. Li amikiĝis kun la krokodiloj de la Nilo, kaj, kiam li deziris transiri la riveron por fari ian viziton, li vokis krokodilon. Tuj venis unu el ili, respekteme, kaj portis lin surdorse al tiu parto de la alia flanko, kie li volis viziti iun.

Kelkaj afrikaj triboj havas kulton de sankta krokodilo eĉ hodiaŭ, en Angolo, Nigerio, Ugando, Tanzanio kaj Kongolo. Dum multaj jaroj patriarka krokodilo, nomita Lutembi, estis fama en Tanzanio; ĝi loĝis en la lago Viktorio, kaj pluraj homaj generacioj nutris ĝin per fiŝoj matene kaj vespere.

Modernaj homoj ĉasis krokodilojn por fari elegantajn ŝuojn, mansakojn kaj aliajn led-varojn el la haŭtoj; ni mortigis ilin tiel senpripense, ke ĉiuj 21 specioj nun estas endanĝerigitaj. Sed nun en Papuo-Novgvineo, kie multaj vilaĝanoj longe dependadis de la krokodiloj por vivteni sin, oni komencis samtempe savi speciojn kaj helpi tiujn vilaĝanojn, bredante krokodilojn en grandaj kultur-bienoj. Baldaŭ cent mil krokodiloj troviĝos en tiuj kulturejoj.

Tiu, kiu volas renkonti interesan krokodilon afrikan, sed el Nov-Zelando, trovos ĝin en "La Butiko de la Krokodilo" en la poemaro de Bertram Potts, *Poezia Bukedo*.¹

Kiam en 1961 la unua usona astronauto flugis en la spacon de la kabo Kanaveralo, en Florido, la granda spacraketo muĝegis, suprenirante. Subite, el la proksimaj marĉoj, respondis muĝoj de la lokaj aligatoroj. Aligatoroj muĝas responde ankaŭ al laŭtaj motoroj, segmaŝinoj aŭ ŝtonminejaj eksplodoj.

Kvankam modernaj krokodiloj estas iom pli evoluintaj, ekzistis krokodiloj jam antaŭ 230 000 000 da jaroj, en la epoko *triaso*. Ili estis parencaj al la dinosaŭroj; pli surprize, ili nun estas la plej proksimaj parencoj ankoraŭ vivantaj de la birdoj.

Ekzistas multaj specioj de krokodiloj kaj krokodiluloj: inter ili, la *gavialo*, longnaza, nedanĝera, fiŝmanĝanta hinda krokodilo; la *aligatoro* de Usono; la *kajmano* de Suda Ameriko; multaj afrikaj krokodiloj; kaj fakuloj trovis multajn intereseĝajn fosiliojn de estintaj krokodiloj, ekzemple la anasbekan krokodilon 18 metrojn

1. Eld. Amo-Akademio, Japanujo 1978.

longan, kaj usonan krokodilon almenaŭ 16 metrojn longan; tiuj kolosaj bestoj verŝajne manĝis dinosaŭrojn!

Krokodilo estas la sola reptilio, kiu posedas diafragmon; ĝi havas travideblajn ekstrajn palpebrojn, kiuj permesas subakvan vidadon, kaj valvaj nazotruojn utilajn dum subakviĝo. Ili povas iom grimpi kaj eĉ salti. Aligatoroj esprimas intereson per gruntoj; ili estas tiel konversaciemaj, ke ili gruntas eĉ en la ovo. Kiel birdoj, krokodiloj englutas ŝtonetojn por helpi la digestadon.

La plimulto de la aktualaj krokodiloj ne estas tre danĝeraj al la homoj, kaj ilia proverba hipokrita plorado estas nur fabelo; sed kelkaj, precipe estuaraj krokodiloj, foje atakas homojn; en terura epizodo de la dua mondmilito, birmaj krokodiloj, allogitaj per sango en marĉakvo, manĝis preskaŭ mil japanajn soldatojn.

Sed jen simpatia eco: se krokodilido krie petas helpon, matura krokodilo tuj alkuras — sed ne nur al la propra ido. Ŝajnas, ke ĉiuj sentas ian respondecon pri ĉiuj krokodiletoj, kiuj bezonas helpon.

Sciencistoj ankoraŭ bezonas multajn esplorojn pri ĉi tiuj interesaj bestoj; estos tragedio, se ni mon-avidaj homoj senpripense ekstermos ilin.

Sed ni ne tro dorlotu krokodilojn ĝuste en la Esperanto-Movado. En nia slango, *krokodilo* parolas nacian lingvon tie, kie oni devus paroli Esperanton: en internacia aŭ nacia kongreso de Esperanto, en la loka grupo, kaj simile. Oni nun ankaŭ distingas *aligatoron*, kiu parolas ne sian nacian lingvon, sed alian — pli ĝentile kaj peneme, sed ne taŭge. Do, tiajn esperantistajn krokodilojn oni ja ekstermu, kvankam nur per spiritaj rimedoj.

50. SERĈANTE LA VERDSTELAN DIINON

Esperanto apartenas al la tuta homaro. Ĉiu unuopulo, grupo aŭ registaro rajtas fari ian taskon per Esperanto; donaco al la tuta homaro ne estas utila, ĝis iu utiligas ĝin. Sed laboro por Esperanto, kaj precipe la oficiala tutmonda poresperanta organizo Universala Esperanto-Asocio, devas esti kiel eble plej perfekte neŭtrala, pro honesteco, justeco, universaleco, ekvilibro, kunlabora harmonio, kaj eĉ la sekureco de esperantistoj sub diversaj reĝimoj. Iu ajn provo ligi UEA al iu partio, eklezio, bloko da ŝtatoj, nur malgrandigus ĝin.

Tiun neŭtralecon ni ĉiuj respektu kaj gardu.

Estas ankaŭ grave, ke esperantistoj ne malgrandigu la glorajn kaj grandiozajn eblecojn de Esperanto, donante al eksteruloj la impreson, ke temas pri ia stranga sekto, ia minoritata kulto. Ni ne estas rondo de ŝat-okupuloj; ni proponas al la mondo provitan ekipaĵon tre valoran ekonomike, sociologie, psikologie kaj altkulture. Al eksteruloj, precipe al gravaj publikaj instancoj, ni ĉiam konduitu laŭ tiu koncepto.

Tamen, ni jam estas ankaŭ difinebla popolo, kun nia propra lingvo kaj propra internacia kulturo, kaj inter ni ni rajtas evoluigi, se ni volas, nian propran folkloron por nia propra plezuro, amuzo, kuraĝigo aŭ eĉ inspiro. Ekzemple, la belege altruisma vivo de L.L. Zamenhof ne gravas al iu ministro pri popola klerigado, kies demando estas pri la praktika nuntempa uzado de Esperanto; sed al ĉiu serioza konvinkita esperantisto tiu nobla animo povas esti helpa ekzemplo.

Ĉu ekzistas iu figuro aŭ iuj figuroj en la mitologio aŭ religio, kiu(j) ŝajnus speciale simpatiaj por esperantistoj?

En antikva Egiptujo la diino Seŝeta portis stelon sur la kapo, kaj okupis sin pri libroj kaj skribaj taskoj.

En la helena panteono troviĝas la diino Atena (aŭ Palasa), diino de inteligento, kiu en antikva Romo iĝis Minerva, kaj la dio Apolono, aŭ Febo, dio de la suno, poezio kaj la artoj, amiko de la

Muzoj. Do tiuj povus esti patronoj de lingvaj aferoj, sed nur implice.

Estas dube, ĉu ni povas pruntepreni patronon de la antikva teŭtona mitologio. Eble figuroj plej similaj al esperantistoj estis Hugino kaj Munino, la du kornikoj, kiuj sidis sur la ŝultroj de la ĉefa dio, Odino: ili vojaĝadis tra la tuta mondo, faris multajn demandojn, kaj revenis kun novaĵoj. Ili estis «Penso» kaj «Memoro».

En la mitologio de antikva Ĉinujo ni povus elekti inter la dio de la literaturo, Ŭen Ĉang, kiu ankaŭ prizorgis kvar stelojn (en la konstelacio de la Plugilo), lia helpanto Kuei-hsing, la dio de ekzamenoj, aŭ Tsang Ĉieh, kiu eltrovis la arton de skribado.

Iom pli taŭga estus la hindua diino, kiun multaj vivantoj adoras, Sarasvati, kiu elpensis la sanskritajn alfabeton kaj lingvon, do vere estis lingvo-kreanto, kaj kiu estas la hindua patronino de lingvoj, klerecoj, kaj parolado. En unu el siaj kvar manoj ŝi tenas libron el palm-folioj.

La katolikaj esperantistoj, kiuj havas sian propran organizon, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, havas tri oficialajn Patronojn. Unu el la multaj titoloj de Sankta Maria, la Virgulino, patrino de Jesuo, estas «Nia Sinjorino de la Espero»; kaj la kvara IKUE-Kongreso, en Romo, 1913, proklamis Nian Sinjorinon de la Espero Patronino de la Esperantistoj. Katolikoj konsideras patrono ankaŭ Sanktan Franciskon el Asizo, kiu preĝis “Disinjoro, igu min instrumento de Via paco...” kaj montris grandan amon al ĉiuj kreitaĵoj. Dum la 23-a IKUE-Kongreso en Munkeno en 1951 oni proklamis patrono de la katolikaj esperantistoj la papon Pio la Deko, kiu montris varman simpatian al Esperanto.

Inter aliaj sanktuloj, kiuj povus simpatii speciale kun katolikaj esperantistoj, kredeble estas Sankta Johano de Nepomuko, ĉeĥa martiro, patrono de tiuj, kiuj konstruas pontojn; la apostolo Barnabo, patrono de la pacigemuloj; aŭ eĉ la majstra teologo Sankta Tomaso la Akvinano, kiu instruis, predikis, verkis, kiun oni nomis “la universala instruisto”, kiu jam estas konata kiel patrono de universitatoj, kolegioj, lernejoj kaj librovendistoj — kaj kies tradicia emblemo estas stelo.

Sed estas en la mikso de budhismo kaj hinduismo, kiu estas la multe varianta populara religio de Tibeto kaj Nepalo, ke ni trovas



Statuo de Harita Tara aŭ Verda Stelo

Fotajo de la Naciaj Muzeoj, Parizo

diinon, kies nomo estas *Verda Stelo*. Ŝin ni renkontas en *Nepalo Malfermas la Pordon*, de Tibor Sekelj¹. Tie nia fama esploristo prikskribas, kiel li vizitis budhanan sanktejon sur la monteto Svajambunath apud Katmanduo, kaj tie trovis du graciajn bronzaĵajn virinajn figurojn, kies nomoj signifas «Blanka Stelo» kaj «Verda Stelo». La nepala nomo de «Verda Stelo» estas *Harita Tara*.

Sekelj klarigas, ke komence de la sepa jarcento p.K., la tibeta imperiestro, Srong Bcan Sgam-po, volante plifirmigi sian politikan pozicion rilate al najbaraj landoj, edziĝis al princino, Bhrikuti, el Nepalo, kaj al dua princino, Ŭen-ĉeng, el Ĉinujo, budhaninoj, kiuj fine konvertis la edzon kaj, pere de li, Tibeton; poste ili iĝis «Blanka Stelo» kaj «Verda Stelo».

Do, temis parte pri reala, historia persono. Ŝajnas, ke tiu historia persono iom miksiĝis, en la hindua-budhana panteono, kun la diino Tara, «Stelo», kiu naskiĝis el la larmoj de la granda bodhisatvo Avalokiteŝvaro, al kiu neniu suferanto vokas vane, kaj kiu en ĉina budhismo iĝis la diino Kŭanjino; kiu, ĉu en vira aŭ virina formo, estas grandioza, nobla, inspira personigo de senfina kompatato. La larmnaskita Tara estas kvazaŭ edzino de Avalokiteŝvaro, lia *ŝaktio* aŭ ina duoblaĵo². Tiu Tara povas esti ruĝa, flava aŭ blua, eĉ aspekti kiel minacanta ogrino, devenanta de pli primitiva hinda tradicio; sed la Verda Tara, aŭ la Blanka, estas ĉiam milda, amoplena, kompatema.

Nepalaj adorantoj foje identigas ŝin kun Kalia aŭ Durga, ŝaktio de la detrua dio Ŝivao; kun Taleĵu, familia diino de la nepala dinastio; kun Sarasvati, jam menciita kiel taŭga orienta patronino de Esperanto; kaj kun tiu kompatinda knabino apartigita, la sankta Kumari, «vivanta diino», kiun Sekelj vidis en Nepalo³. Kvankam Kalia ofte aperas kun ege timiga aspekto, ŝajnas ke Harita Tara kun ŝiaj parencaj diinoj estas por la nepalanoj esence figuro de granda patrino: kompatema, pardonema, protektema, kvankam ŝi postulas oferojn dum sia aŭtuna festo. Dum ŝia festsezono okazas oferoj de bestoj, kun multa rita sang-elverŝado; sed okazas ankaŭ kvin-taga periodo, kiam oni devas forgesi ĉiujn disputojn, kverelojn, mal-

1. Stafeto, La Laguna, 1959, pp. 26-7.

2. Alia Tara ekzistas en la hindua mitologio: la edzino de Brihaspati, instruisto de la dioj; sed ĉi tiu Tara ne rilatas al nia Verda Tara.

3. Saina libro, pp. 159-161; 165-166.

amojn. La lasta preĝo de la granda festo de la diino tekstas: “*Donu al ni pacon, Diino, konservu la pacon, kaj donu pacon al la terĝlobo kaj la tuta universo.*”

En Nepalo oni konas ankaŭ statuojn de Blanka Tara kaj Verda Tara kiel kunulinoj de la dio en Nepalo nomita Maĉhendro, dio de kompatato senlima, “La Oceano de Kompatato”, kredeble parenca al Avalokiteŝvaro. Hinduaj-budhanaj dioj ege komplike interfandiĝis kaj interŝanĝiĝis. Dum la festo de Maĉhendro la pastroj montras la du ‘Stelojn’ al la popolo, kaj refarbas la statuojn.

Do, tiu mitologia Verda Stelo, diino de kompatato, amo kaj universala paco, ŝajnas sufiĉe taŭga por esperantistoj; sed la historia virino ŝajne estis ne malpli taŭga. La tibeta imperiestro, Srong-bcan-sgam-po, estis ekspansiema, potenc-avida. Kiam liaj senditoj peris al reĝoj en Nepalo kaj Ĉinujo liajn petojn, ke princinoj edziniĝu al li, ĉi tiuj petoj havis la tonon pli de ultimatoj, ol de amikaj proponoj.

Ni imagu do la sorton de la nepala princino, Bhrikuti. Kredeble la knabino edukiĝis en hejmo ne nur luksa, sed kun milda, paca etoso. Ŝia patro, Amŝuvarmano, estis reĝo konscienca, diligenta, kaj vere zorgis pri la bonstato kaj progreso de sia popolo. Ŝajne li kuraĝigis kleriĝon; li enkondukis novan gramatikon. Li volis plifaciligi kaj sistemigi la ekonomikajn aranĝojn; li enkondukis en Nepalon metal-monon. El tiu kortego, kie regis modero, helpemo kaj pacamo, li tamen devis sendi sian filinon, nur deksesjaran.

Laŭ malnovaj kronikoj, la knabino estis belega kaj “ŝia buŝo elspiris parfumon de la blua lotuso”; laŭ tiamaj observoj, “ŝiaj trajtoj indikis destinon neordinaran”, kaj ŝi estis same virta, kiel bela. “Plene regis ŝin ŝiaj propraj seriozeco kaj gracio.”

Tiun junulinon, ĝis tiam ŝirmitan en palaco, oni sendis, el Katmanduo, eskortatan de kelkaj nepalaj nobeloj, per la malvarma kaj danĝera montara vojo al la montpasejo Kjerongo; kaj tie, meze de malmolaj rokoj kaj montaj ventoj, la eskortantoj devis transdoni ŝin al tibetaj nobeloj nekonataj, kiuj kondukos ŝin al Lasso.

Eĉ Esperanton ŝi ne povis havi tiutempe. Juna, sensperta Bhrikuti devis komenci novan vivon, inter korteganoj, kies lingvon ŝi ne scipovis, kun edzo, kiu edzinigis ŝin pro politikaj motivoj, kies kriterioj kaj kulturo estis al ŝi fremdaj. Li eĉ deprenis de ŝi la nomon, per kiu ŝia patro tiel ofte ame vokis ŝin; ekde sia edziniĝo, ŝi devis

havi tibetan nomon, Bri-Bcun. Nepalo estas alta lando; sed Tibeto estas multe pli alta; kredeble la aero kaj la klimato longe suferigis deksex-jaran Bri-Bcun. Ŝia princina kaj reĝina devo postulis de ŝi adaptiĝadon, kiu certe necesigis konstantan takton, ege malfacilan sinregadon, malfacilan lernadon, senĉesan sinoferadon.

Kiam en Katmanduo ŝi devis decidi, kion ŝi forportos al sia timiga destino, ŝi elektis ne nur robojn kaj juvelojn, sed, pli grave, tri budhismajn statuetojn kaj kompletan kolekton de la budhismaj verkoj, tiam konataj en Nepalo. Dum du jaroj ŝi penadis fideli al iliaj idealoj, ege sola, sendube konstante penante rideti al la imperiema edzo, sendube ofte plorante sekrete. Poste alvenis la dua edzino, ĉina princino Ŭen-ĉeng; kaj finfine, kiam ili iel venkis siajn lingvaj malfacilaĵojn, Bri-Bcun havis simpatian kunulinon; ĉar la simile ekzilita, simile suferanta ĉinino estis alia fervora budhanino.

Kaj iel, tiuj du elradikigitaj floroj, taŭzigitaj per la ventoj de la tibeta altebenaĵo, tenataj en fremda malmola mano, difuzis tra la tuta lando la lotusan parfumon de sia religio pacama, tolerema kaj kompatoplena. Ili konvertis Srong Bcan Sgam-po; Tibeto iĝis budhana lando; kaj la imperiestro turnis sin pli al utilaj progresigaj laboroj por sia popolo. Li venigis saĝulojn kaj metiistojn el Ĉinujo, Nepalo kaj Hindujo, lernis multon kaj pli bone instruis sian popolon.

Ne estas do tre mirinde, ke iom post la morto de la du noblaj reĝinoj, la lamaoj diinigis ilin, dirante, ke ili estis novaj enkarniĝoj de Tara, la Sinjorino de la Kompato; kaj Bri-Bcun iĝis *Harita Tara*, la Verda Stelo, sidanta sur lotusa trono, kun lotusfloro en la mano kaj florgirlandoj sur la brakoj.

Unu el ŝiaj nomoj estas «Ŝi, kiu igas nin transiri»... Por nepalaj budhanoj, ŝi estas helpantino, kies kompato subtenas la homojn, kiuj transiras la maron de suferoj, kiu estas la vivo. Por tutmonda esperantistaro, tiu nomo povas pensigi pri la verda stelo kiel simbolo de nia punta lingvo, kiu ebligas al ni transiri multajn barilojn inter popoloj.

Religioj povas degeneri en superstiĉarojn; historio povas miksi kun legendoj; sed se ni esperantistoj deziras trovi universalan simblan patronon, parte ŝercete, sed eble ankaŭ uzonte la inspiran flankon troveblan en multaj legendoj, eble ni plej taŭge elektos *Haritan Taran*, kiu estas samtempe diino de kompato kaj paco, kaj

memoro pri sindona junulino, kiu instruis kompateman kredon al konkerema ŝtatestro, kaj bonfaris al lando, kie ŝi sentis sin fremda kaj sola.

Novaj Proverboj

Nur mi aferon ne tre progresigos; sed multaj mioj ĝin ja sukcesigos.

Peto postula — rezulto nula; peto ĝentila, eble utila.

Ne arogante diktu, aliajn ne afliktu.

Morti devas la plej justaj; ni mortu lacaj, ne nur rustaj.

Simio kun Ŝparkaso

Usona sciencisto aranĝis, en 1936, eksperimenton kun du malgrandaj maŝinoj. Unu maŝino liveris sekvinberon, kontraŭ eta metala disko, puŝita en fendon. La alia liveris tiuspecan diskon, se oni tiris la ĝustan levilon.

Ĉimpanzo rapide lernis profiti de la maŝinoj. Baldaŭ ĝi rutinigis sian taskon; ĝi iris al la diskmaŝino, tiris la levilon, prenis diskon, portis ĝin al la sekvinber-maŝino, puŝis ĝin en la fendon, prenis sian sekvinberon kaj plezure manĝis ĝin.

La sciencisto volis provi, ĉu la ĉimpanzo estas sufiĉe inteligenta, por kompreni la situacion iom pli ĝenerale, kvazaŭ abstrakte. Li do modifis la maŝinojn tiel, ke ili ne plu funkciis samhore. Kiam la sekvinber-maŝino estis funkcia, la diskmaŝino ne liveris diskojn, sed kiam diskoj estis elprenblaj, la sekvinber-maŝino ne liveris sekvinberojn.

Sed la ĉimpanzo rapide solvis la problemon. Kiam la diskmaŝino funkciis, ĝi multfoje tiris la levilon, kaj amasigis en sia kaĝo grandan diskaron. Tiam ĝi atendis la momenton, kiam la vinbermaŝino denove ekfunkcios, kaj tiam entuziasme enpuŝis siajn diskojn, unu post la alia, por ricevi multajn sekvinberojn.

La ĉimpanzo kapablis atendi eĉ horojn; do, ĝi surprize bone komprenis, kvankam sen vortaj difinoj, kio estas mono!

Lingvaj Bariloj

Unu el la plej grandaj katastrofoj en usona haveno estis tiu incendio, kiu detruis grandan ekskursan ŝipon, *Generalo Slocum*,

apud Nov-Jorko en 1904. El ĉirkaŭ 1 500 ekskursantoj, plejparte germanaj enmigrintoj, 1 021, plejparte virinoj kaj infanoj, pereis en la flamoj, aŭ dronis en la rivero, penante savi sin.

La tragedio kaŭzis, siatempe, skandalon, ĉar ĝi rezultis parte de eraroj kaj neglektoj. Sed unu grava faktoro de tiel grandnombra pereo estis, ke multaj el la germanaj enmigrintoj ankoraŭ ne bone scipovis la anglan, kaj tial ne komprenis ordonojn kaj konsilojn kiuj, komprenitaj, kredeble estus savintaj multajn vivojn.

Pensigaj Vortoj

“Malmolesteco estas stranga malsano. Ĝi naŭzas ĉiujn — nur ne la malsanulon.”

Verŝajne anonima

Valoro de la Vero

Antaŭ kelkaj jaroj, fraŭlino en Ĉeĥoslovakio metis anonceton en ĵurnalon: “BELEGA, JUNA BLONDULINO, talenta por muziko kaj pentrado, serĉas indan edzon”. La sola letero, kiu rezultis, estis la fakturo de la reklama fako de la ĵurnalo.

La fraŭlino decidis forgesi la mensogon, al kiu senespera soleco tentis ŝin, kaj metis alian anonceton en la ĵurnalon: “FRAŬLINO, 57-jara, grizhara, ne bela, kiu bonege kuiras, serĉas afablan edzon”.

Alvenis amaso da edziĝproponoj, plejparte tute decaj kaj seriozaj, kaj Magda finfine elektis prosperan komerciston.

Avizo en Banko en Nov-Jorko

(en kiu urbego loĝas multaj hispandevenaj homoj)

BANK-RABISTOJ, ATENTU!
TIU ĈI BANKO ESTAS HISPANLINGVA
Se vi deziras prirabi nin,
bonvolu esti paciencaj.
Ni eble bezonos interpretiston.
Dankon.
La Estraro

51. DIVERSAJ STILOJ

Ĉiu lingvolernanto trairas fruan stadion, kiam la problemo estas, diri aŭ skribi ion, iel ajn, tiel ke ĝi estu komprenebla. Kaj eĉ tiu stumblanta novico, kiu balbute kaj fuŝe komunikas sian koncepton al alia persono, jam iasence uzas la lingvon. Se necesas diri ion, pli utile balbuti, ol muti!

Iom poste, nia novico ekakiras, per al kutimiĝado, ian senton pri ĝustaj esprimrimedoj: observas gramatikajn regulojn; disponas sufiĉan vortaron, por siaj ĉiutagaj bezonoj; kunmetas frazojn, pli-malpli laŭ la procedoj, kiujn uzas spertuloj, kvankam malrapide kaj pene; nun ĉi tiu postkomencanto ne plu uzas ian primitivan dialekton de la nebuloplena Eklerna Valo, sed iom regas la lingvon mem.

Vere inteligenta kaj persiste diligenta lernanto je nacia lingvo, kaj preskaŭ iu ajn serioza, iom penema lernanto je Esperanto, povas atingi trian stadion, kiam li aŭ ŝi ne nur scias, kio estas ĝusta uzado de la lingvo, laŭ reguloj kaj kutimoj, sed perceptas multajn diferencajn metodojn, uzi ĝin ĝuste.

Kiam ni povas distingi diversajn stilojn, ni povas multe pli ĝui nian legadon kaj aŭskultadon, kaj mem skribi aŭ paroli pli taŭge kaj takte.

Detaloj de stilo dependas de la temo, la uzanto, kaj la ricevanto.

Ni ĉiuj iom komprenas, ke nia skribmaniero aŭ dirmaniero dependas parte de la temo. Neniu uzus torenton de lastmodaj slangaĵoj, oratorante dum la enteriga ceremonio de prezidento de la regno, aŭ skribus avizon, avertante maristojn pri danĝero, uzante arkaikajn vortojn de nacia poeto, kiu mortis en 1400. Estus ĉarme, fari salutparoladon ĉe naskiĝdatrevena festo, uzante multajn vortludojn, amuzajn aludojn kaj sprite originalajn komplimentojn; sed tiaj ornamaĵoj tute ne taŭgas, kiam la sama persono devus instrukcii metilernanton, precize kiel manipuli komplikan, iom danĝeran maŝinon. La tuta tono de letero gratula malsamas al tiu de

letero kondolencna; kaj skribi pri masakro tiel, kiel oni priskribus ian komikan, bagatelan kuirejan fiaskon, estus maldece.

Stilo rilatas ankaŭ al la uzanto de la lingvo. Multaj el ni havas favoratajn frazojn — aŭ eĉ karakterizajn eraretojn. Ekzistas homoj, temperamente multvortaj, aŭ lakonaj; iuj ege amas simplacon kaj preferas uzi minimuman vortaron, eble eĉ kredante, ke tiuj, kiuj “englutis la grandan vortaron” nur afektas kaj paradas; dum aliaj amas precizecon kaj volas uzi grandan vortaron por kiel eble plej delikate nuanci siajn pensojn. Iu ŝtatestro, diplomato, juĝisto, episkopo, normale devas en la profesia vivo montri ian dignon, paroli iom formale; tia stilo tute ne taŭgus por vartistino aŭ trejnisto. Reklamisto elektas vortojn, por atentigi; sciencisto, por kiel eble plej klare kaj precize komuniki tion, kion li aŭ ŝi kredas vera; kuracisto eble uzas fakterminojn, kiujn kolegoj komprenos sed la paciento ne komprenos.

Saĝaj homoj ankaŭ rilatigas sian stilon al la ricevanto — al tiu, kiu legas aŭ aŭskultas. Universitata profesoro ne parolas sammaniere al siaj samfakaj kolegoj, siaj novaj studentoj, kaj sia kvinjara filineto. Esperantisto, kiu prelegas en la kadro de la Internacia Kongresa Universitato, dum Universala Kongreso, rajtas atendi aŭdantaron, kiu komprenos kelkajn fakajn vortojn, kaj povas sekvi serion de argumentoj, prezentitaj laŭ normala prelega rapideco. Se tiu sama fakulo prelegos pri la sama temo al urba Esperanto-klubo, kies anoj montros tre diversajn nivelojn de lingvoscio kaj de ĝenerala klereco, li ne povos uzi tute saman stilon, kiel en IKU. Necesos simpligi la frazojn, klarigi vortojn ne ĉiutagajn, iom pli dilui kaj sukuri la kaĉon, por ke infanoj povu gluti ĝin.

Ĝenerale, estas konsilinde, laŭeble elekti nian stilon tiel ke: ni ne ŝokas aliajn (almenaŭ ne senintence); ni ne vunde sentigas al aliaj malsuperecon; ni ne malfaciligas komprenon por aliaj; ĝenerale, ke ni adaptiĝas al la tuta situacio.

Sed iun ajn situacion diversaj homoj rigardos de diversaj vidpunktoj, kaj tial priskribos laŭ diversaj stiloj.

Jen baza situacio. Roza Lip, esperantistino en la eŭropa urbo Centimetropolo, atendas en la ĉefstacidomo sian azian plum-amiknon. Sed Fla Va Vang ne alvenas. Finfine, laŭtparolilo vokas Rozan al la oficejo de la staciestro. En la stacidomo de Salikoj-sur-Rivero, kie Fla devis ŝanĝi la vagonaron, rabisto atakis ŝin en

atendejo, nigrigis ŝian okulon, ĵetis ŝin sur la plankon kaj ŝtelis ŝian mansakon. Roza tuj iras al Salikoj-sur-Rivero, konsolas kaj prizorgas sian amikino kaj veturigas ŝin hejmen, kie komforta gastĉambro atendas ŝin.

Roza mem, en letero al intima amikino, probable priskribas la aferon subjektive, kaj multe montros siajn emociojn: “Do, mi staris tie antaŭ la perona elirejo, tute maltrankvila, kiam mi aŭdis — kia ŝoko! — mian propran nomon el la grakanta laŭtparolilo. La staciestro estis sufiĉe afabla — li devis tuj ŝovi seĝon sub min, ĉar mi estis momente svenopreta... tiu povra, senkulpa Fla, tiel malproksima de la hejmo, ne parolante nian lingvon, sen alia amiko en nia lando, estis en Salikoj-sur-Rivero, kovrita per kontuzoj, senigita je mono, pasporto, bileto, ĉiuj etaj personaj valoraĵoj... povis nur skribi mian nomon. Mi dezirus meti miajn manojn, jes kaj miajn ungojn kaj miajn dentojn kaj miajn piedojn, sur tiun ankoraŭ ne kaptitan kanajlon, tiun speciale senkoran krimulon, kiu pri-rabis fremdulino en fremda lando. Ve al tiuj, kiuj tiel facilanime suferigas, kaj neniam paŭzas por imagi, kion ili faras al aliaj!

Tiu staciestro telefonis al Salikoj... sed, eĉ veturante pli rapide ol iam ajn antaŭe, mi bezonis kvardek minutojn por atingi la stacidomon tie. Mi volis ekplorigi, kiam mi vidis povran Flan, ankoraŭ tute konfuzitan, tremantan, sen eĉ tuketo por viŝi la okulojn, kvankam iu bonkorulo portis al ŝi tason da teo. Sed mi ne rajtis elverŝi larmojn; mi devis tuj prizorgi ŝin. Nun Fla estas ĉe mi; mi kontaktis ŝian ambasadorejon kaj ili preparas dokumentojn por ŝi; la policanoj faras siajn eblojn; la loka societo kaj mi iel trovos monon por ŝiaj bezonoj; kaj nun mi vere intencegas, ke ŝi ĝuu sian viziton.

Sed mi terure hontas, ke en nia lando, kiun mi kredas alte evoluinta, alilanda vizitanto povas esti prirabita, kaj en mezgranda stacidomo! Abomene! Kian impreson pri Eŭropo ŝi forportos? Kaj ŝi kuraĝis vojaĝi sola, tiujn milojn da kilometroj — kaj nun mi vidas, ke ŝi timas, sur la ordinara trotuaro...”

La policano en Salikoj-sur-Rivero, kiu raportas pri la krimo, skribos koncize, fakte, senemocie. Tio ne signifas, ke li ne kompatus la senkulpan viktimo; sed lia tasko estas, noti la detalojn utilajn por serĉi la krimulon kaj ŝtelitajn objektojn.

“11:02. La staciestro, s-ro Stefano Ŝunt, vokis min al la stacidomo. Rabisto atakis junan azianino, Fla Va Vang, kaj forprenis

ŝian mansakon. La viktimo havis plurajn grandajn kontuzojn, inkl. nigran okulon, kaj estis tre ŝokita. Estas neeble, tuj noti detalojn, ĉar ŝi ne parolas nian lingvon. Mi revenis 12:15, kiam ĉeestis interpretistino, f-ino Roza Lip el Centimetropolo (Platanostrato 176). F-ino Lip estas persona amikino kaj alprenis plenan respondecon por la viktimo, konfirmis ŝian identon kaj veturigis ŝin al sia hejmo. (Telefono: Centimetropolo 228807.)

La atakinto estas blankulo, mezalta, ne dika; pale rufa hararo mallonge tondita, longa grizflava mantelo.

La mansako estas el bruna ledo, iom granda, kun unu latuna agrafio; duobla mallonga tenilo el la sama ledo. Enhavo: pasporto; aviadila revenbileto; fervojaj biletoj; monujo kun iom da mono; vojaĝoĉekoj por mil ducent dolaroj; pluraj diverscelaj identigiloj; emajlita pudrujo, lipruĝo en emajlita ingo; tri poŝtukoj, pingloj, harpingloj, malgranda notlibro, du globkrajonoj, speguleto, eble aliaj forgesitaj malgrandaj objektoj.”

La kuracisto, kiu ekzamenis la viktimon, notos tre mallonge, uzante proprajn fakterminojn: “11:15. Vokita al la stacidomo, kie junulino, Fla Va Vang, estis negrave vundita dum rab-atako. Azianino, ne parolanta nian lingvon. Rabisto verŝajne frapis ŝin kaj ĵetis ŝin tre forte al la planko.

Difektoj: granda ekimozo ĉirkaŭ la dekstra okulo, supraĵaj etaj lezoj sur la dekstraj tempio kaj vango; severaj kontuzoj sur maldekstra ŝultro, brako, kokso, flanke de maldekstra genuo; lezetoj nur epidermaj ĉe artikoj de la maldekstra mano, kiu frapiĝis kontraŭ meblo. La pacientino estis ege skuita, terurita kaj konfuzita, sed ne en danĝera ŝoko-stato.

Estis nek ostoj rompitaĵaj, nek indikoj de cerba skuo; tial mi permesis ke, post taso da teo kaj aspirino 600 mg, la pacientino foriru kun amikino, kun kiu ŝi povas paroli; kun strikta instrukcio, konsulti kuraciston se dubigaj simptomoj poste aperus.”

Se la rabisto mem skribas al alia malnoblulo, menciante sian hontindan sukceson, li eble uzos ŝtelistan slangon, kaj lia stilo senkonscie montros lian senkorecon kaj ekstreman egoismon: “Hieraŭ mi donacigis oldegan anserinon, kiu ĵus ricevis sian semajnan pensiopagon, kaj mi liberigis la monujon de ulo leganta afiŝon. Sed ĉu vi konas ian premeblan inkŝprucigiston, kiu scias kiel kuiraj vojaĝoĉekojn, se li havas ankaŭ la pasporton? Mi iris al la staci-

domo por serĉi bonŝancon, kaj jen sola en la atendejo staris kokidino — jes, kaj malblanka infestantino, do des pli bone malpezigi ŝin, mi malamas ilin — tre stulta, mi nur unufoje pugnis ŝian lampoplaton, estis facile preni ŝian anson kaj bati per ŝi la tapiŝon; kaj nun mi havas ŝian misterujon — vendeblan, kaj kelkajn bonajn aĵojn, sed malmultajn uzeblajn bombonojn — la diablo prenu tiajn ĉekojn, mi jukas tutkorpe vidante tiom da bombonoj ne tuj suĉeblaj — mi esperas ke la flavaĉa kokidino rompis ambaŭ stilzaĉojn...”

Fla Va Vang mem, skribante al siaj gepatroj ĉe la piedoj de Matenruĝa Monto, volas malgravigi la aferon, por ne malkvietigi ilin: “Kvankam mi tre ĝuas mian viziton, mi petas vin, ne lasu la gefratojn revii, pri multaj donacoj el Eŭropo. Ne maltrankviliĝu; sed dum eta incidento en stacidomo mi perdis parton de mia mono, ankaŭ mian pasporton. Iu en nia ambasadorejo ordigos ĉion pri la dokumentoj, kaj Roza kaj la lokaj samideanoj plej amike zorgas, ke nenio manku al mi. Mi falis iom malagrabla, sed ne rompis ian oston, kaj mi jam denove fartas preskaŭ tute bone...”


Kaj eble, dum Fla stoice penas pro amo bagateliĝi sian sufiĉe gravan malbonŝancon, ĵurnalisto ĉe *La Salikfolio* penas kiel eble plej sensaciigi la eventon, kaj ne tre kontrolas pri la faktoj:

APAĈOJ ATENCAS AZIAN BELULINON

Bela Fla Va Vang, enigma kaj silentema vojaĝantino el la Oriento, estis trovita senkonscia sur la sangmakulita tapiŝo de atendejo en la Salika stacidomo hieraŭ, tagmeze. Fervojaj banditoj atakis ŝin, batadis ŝin kaj eskapis kun ŝia mono kaj multaj gravaj dokumentoj. La policianoj serĉas la banditojn kaj petas la helpon de la publiko.

Ĉu vi vidis grandan viron kun rufa hararo, en aŭ apud la stacidomo? Se vi trovos ie grandan mansakon el bruna ledo, eĉ sen mono aŭ dokumentoj, tuj telefonu nin, aŭ informu la Salikan policon aŭ la staciestron.

La portisto, kiu trovis la terure vunditan belulinon, vokis kuraciston, kiu savis ŝian vivon. Samlingvanino veturigis ŝin al adreso ne rivelita, kie ŝia ambasadoro vizitos ŝin por konsultiĝo pri la malaperintaj dokumentoj...



Rakonti ion laŭ pluraj diversaj stiloj estas tre bona (kaj ofte amuza) ekzerco por pensigi nin pri la nuancoj de vortoj kaj la preciza efiko de diversaj lingvaj rimedoj.

Novaj Proverboj

Ne postulu de paruo saltojn de kanguruo.

Kiu neniam estimas, lia spirito ŝlimas.

Ne ĉiu falo sendas al hospitalo.

Tre laŭta krio, ĉar mordis kanario.

Versareto, helpa pri 'po'

— VESPERMANĜO —

La familio sidis table.
Paĉjo ridetis tre afable,
kaj tuj aranĝis distribuon
por ŝtopi ĉies nutro-truon.
Ĉion li faris laŭsisteme,
sed ĉu justeme?

Al Anko, Bonko kaj al Cinko,
Po tri tranĉaĵojn de la ŝinko
li donis, kaj po kvar terpomojn;
ankaŭ la saŭcon kaj legomojn;
al Ĉila, Duĉjo, ne eksceson —
po unu pecon.

Po du terpomojn, li disdonis,
kaj tie kie Erko tronis,
nek ŝinkon, nek terpomo-mason,
nur verŝis lakton en la tason;
kaj manĝo iris, eta, kruda,
al par' apuda.

Se mi mensogas, do, min punu!
Al Fudo, Gudo, nur po unu
telero kun grenajŝo seka —
ĉu ne avara, aĉa, peka? —
nur osto al honesta Hanko,
kaj sur la planko.

Sed ne troviĝis justo-manko!
Ĉar Cinko, Bonko, ankaŭ Anko
estis plenkreskaj filoj tri
kiuj per granda energi'
karbon pioĉis ĉiutage,
ne paŝis vage.

Dum Duĉjo, Ĉila, same karaj,
estis ĝemeloj nur naŭjaraj;
kaj Erko tronis, eta reĝo,
nur bebo en la alta seĝo;
kaj Fudo, Gudo, kiuj restis,
nur hamstroj estis.

Honesta kaj lojala Hanko
prenis la oston ja kun danko,
senplende restis sur la grundo,
estante la amata hundo;
do ĉiuj sidis, maĉe, morde,
tute plenorde!

52. KIEL IRI PLUEN?

Kiel iri pluen? jen la demando konsekvenca, en la lasta ĉapitro de progresiga legolibro.

Sed eble leganto demandos, **Kial iri pluen?** ĉar iu, kiu vere tralegis ĉi tiun volumon, jam ne estas balbutanta komencanto, ne plu legas kun langopinto elpuŝita, konas multajn vortojn. Tiu leginto ja staras sur pinto...

...sed pinto de malalta monteto, de kiu videbliĝas montaraj panoramoj, kiujn vera komencanto tute ne vidas. Pri vivanta lingvo oni ĉiam povas lerni plu.

Ju pli ni scipovas Esperanton, des pli ni povas utiligi ĝin, profiti de ĝi. Ni povas pli bone komuniki pri la aferoj kaj fakoj, kiuj nin interesas; ĝui pli interesan socian vivon, kaj pli intimajn amikecojn; riĉigi niajn vivojn per multaj kulturaj plezuroj — nia literaturo, prelegoj, diskoj, turismaj aranĝoj, kongresoj k.t.p.

Ni ankaŭ ne forgesu, ke ju pli bone ni regas la lingvon, des malpli ni riskas tedi kaj ĝeni aliajn. Ĉiu sperta esperantisto devas esti pacienca, indulgema kaj eĉ pozitive helpema al komencantoj; ĉiu devis iam komenci; sed povas esti malfacile, paciencadi kun la sama komencanto dum kvin jaroj de komencado!

Trie, ni ne pensu nur pri nia utiligo de Esperanto. Ju pli bone ni scipovas Esperanton, des pli ni povas ankaŭ utili al ĝi. Ne ĉiuj povas verki — kaj sentalentuloj pli bone detenu sin de verkado! — kaj ne ĉiuj povas prelegi, redakti, grandskale organizi; sed ĉiu iam havas okazon propagandi Esperanton, plikonatigi nian vere valoran instrumenton por facilaj internaciaj kontaktoj, paco, progreso, interhelpo kaj mondkulturo. Ju pli ni scias, des pli inteligente ni povas elekti ĝustajn informojn, taŭgajn ekzemplojn, por iu situacio; des pli ni povas respondi al diversaj demandoj. Kaj des pli ni povas helpi al aliaj esperantistoj, ekzemple kiel delegitoj de UEA, aŭ funkciuloj de esperantaj societoj.

Tial valoras iri pluen; do, kiel ni iru pluen? Ekzistas, esence, kvin rimedoj:

Legado estas ofte la plej facile aranĝebla studado; ni povas legi en soleco; libroj tre malrapide konsumiĝas materie; kaj tial ni povas relegi ilin, pruntedoni aŭ pruntepreni, interŝanĝi legitajn librojn. Abunda legado ege helpas nin plene pensi en Esperanto kiam ni volas — ĉar ĝis ni ĉesas mense traduki ĉion, ni ne bone sciopovas lingvon; pligrandigas nian vortostokon; prezentas al ni diversajn esprimrimedojn; kaj ankaŭ ekipas nin por multe pli bone propagandi Esperanton kiel ilon de monda kulturo. Escepte en landoj, kie per valutaj reguloj oni malfaciligas normalan internacian librokomercon, aŭ kie ekzistas eksterordinare scio-limigaj cenzuroj, oni povas aĉeti grandan sortimenton de esperantaj libroj.

Sed oni tre malofte, ankoraŭ, povas aĉeti ilin en ordinaraĵ librovendejoj. Landa Esperanto-asocio kutime havas (aŭ devus havi) libroservon. UEA havas tre ampleksan kaj bonan libroservon, kiu eĉ inkluzivas fotokopiadon de libroj longe elĉerpitaj; kaj eldonas katalogon, senditan al ĉiuj membroj, kiu estas ege utila, detala konsultlibro pri aktualaj libroj. Ekzistas diversaj valoraj Esperanto-fakoj en gravaj bibliotekoj; kaj loka societo ofte havas propran malgrandan bibliotekon — eĉ se ĉio troviĝas en unu kesto.

Ia ajn legado — la plej duonata, la plej facila, la plej frivola — estas, por ellerni lingvon, multe pli utila ol nenia legado. Ĉia legado iom plialkutimigas la lernanton al la vortoj kaj sintakso de la lingvo.

Tamen, leganto, kiu serioze deziras progresi, povas iom sistemigi sian legadon, por pli bone lerni per ĝi. Estas utile, konsulti vortarojn pri nekonataj vortoj, kaj eĉ noti tiujn vortojn por parkerigi ilin; aŭ noti frazojn, kiuj ŝajnas aparte trafaj, aŭ utilaj por propraj konversacioj kaj leteroj. Ofte malgranda grupo, kiu kune studas bonan libron, lernas multon novan pri la lingvo, kaj pli inteligente ŝatas la libron, pro la kunfrotado de pluraj intelektoj.

Parenteze kaj pedagogie — por ellerni lingvon, estas pli helpe, legi dek paĝojn ĉiutage, ol sepdek paĝojn semajnfine, ĉar tiel ni pli konstante funkciigas la ĝustan parton de la 'komputero en la kapo'.

Estas konsilinde, legi bonstilajn librojn. Sed estas ankaŭ konsilinde, elekti librojn, kiuj interesas nin; homoj havas tre diversajn interesojn, kaj la plej bonstila, kulture valora verko ne multe

instruos tiun, kiu ĵus endormiĝis super ĝi. Multaj el la plej elstare bonaj esperantaj libroj estas poeziaj; sed ne ĉiuj kapablas ĝui la poezion, kaj ankaŭ la poetoj ofte intence elpensas neordinarajn, surprizajn dirmanierojn, tre laŭdindajn kiel literatur-ornamaĵojn, ravantajn spertulojn, sed eble perpleksigajn al legantoj ankoraŭ nespertaj. Tiu, kiu ne speciale amas jam la poezion, do komencu seriozan legado-programon per kelkaj bonaj prozaĵoj.

Instruistoj, konsultlibroj kaj antologioj povas sugesti al ni legindajn verkojn kaj aŭtorojn. Dume, jen la nomoj de kvindek el niaj originalaj aŭtoroj aŭ elstaraj tradukintoj, kies verkoj estas tre legindaj por legemuloj, kiujn iliaj (tre diversaj) ĝenroj kaj temoj interesa; kaj ankaŭ kies verkoj ne *misinstruos* pri lingvouzoj:

A.D. Atanasov (aŭ ADA), W. Auld, J. Baghy, L. Beaucaire, R. Bernard, K. Bodó, H.J. Bulthuis, M. Carlsson, P. Daŝgupto, H. Dresen, Emba (I. Baranyai), S. Engholm, J. Forge, J. Francis, A. Goodheir, A. Grabowski, D.B. Gregor, E.A. Haugen, Kabe (K. Bein), K. Kalocsay, N. Kurzens, E. Lanti, I. Lapenna, I. Lejzerowicz, G.E. Maura¹, M. Miyamoto, E. Miĥalski, T. Morariu, P. Neergaard, C. Piron, B. Potts, E. Privat, T. Pumpr, J. Ribillard, J.H. Rosbach, C. Rossetti, R. Rossetti, I. Rotkvić, S. Rublov, R. Schwartz, T. Sekelj, S. Szathmári, F. Szilágyi, L. Tárkony, P. Thorsen, J. Valano, V. Varankin, G. Waringhien, J.C. Wells kaj L.L. Zamenhof.

Sed estas necese tre emfazi, ke ĉi tiu listo estas nur unu listo (kiu, fakte, ellasas almenaŭ kvar aŭtorojn, kiujn la listiginto ege ŝatas, sed kiuj ne tre taŭgas por nespertaj legantoj); ĝi sugestas deirejon, ne konstruas finstacion, celas nur provizore iom helpi embarasiton, kiu havas katalogon sed ne konsilanton.

Unu libro kiu estas tute speciale rekomendinda al postkomencantoj estas: William AULD, *Paŝoj al Plena Posedo*, Bruselo, 1968. Ĝi enhavas ne nur antologion de interesaj kaj variaj bonstilaj prozaĵoj, sed multajn bonegajn, neordinare interesajn kaj stimolajn ekzercojn.

Parolado estas necesa, por lerni kiel paroli, same kiel ni lernas naĝi, nur en akvo. Oni pretigu sin por renkontiĝoj kun alilandaj esperantistoj, per multaj konversacioj en kursoj, grupoj kaj malgrandskalaj hejmlandaj renkontiĝoj.

1. «Maura» estas fakte kaŝnomo de Waringhien.

Estas tre dezirinde, aktive partopreni la vivon de iu loka grupo. Se ne ekzistas loka grupo, ĉu eble vi povas iĝi la pioniro, kiu fondos novan grupon? Se — kiel povas okazi — loka grupo seniluziigas vin per mizere malalta nivelo, eble eĉ per svarmantaj krokodiloj — ĝi urĝe bezonas iun, kiu plibonigos ĝin. Eble vi estas la homo por la horo!

Eĉ malgranda, malriĉa grupo povas multe eduki sin mem per regulaj, iom elpensitaj, ekzercoj: diskuto pri difinita temo, laŭlegado de skeĉo, vespero kiam ĉiu ano parolas dek minutojn pri antaŭe elektita temo; lingvaj ludoj kaj konkursoj, komunaj traduklaboroj, improvizitaj konversacioj pri imagitaj ĉiutagaj situacioj (butikumado, vojaĝado, laboro, lernejo, familia vivo...); ŝaradoj, parolaj recenzetoj k.t.p.

En nia nuna epoko de la relative portebla kaj malmultekosta kaseto magnetofono, ni povas multe helpi niajn konversaciajn kapablojn per sonbendoj. (Ni ne forgesu, ke duono de konversacio estas *aŭskultado*!) Ekzistas ne nur tre riĉa kolekto de sonbendoj kulturaj de la Magnetofona Servo de UEA, sed instru-kursaj sonbendoj. Ankaŭ grupoj aŭ unuopuloj povas interŝanĝi sonbendojn; kaj la devo, paroli tre klare por malproksima aŭskultonto povas vere plibonigi nian parolmanieron.

Aŭskultado de sonbendoj, diskoj aŭ radioelsendaĵoj el eksterlando estas valora, ĉar ĝi helpas nin alkutimiĝi al pli larĝa varieco de parolmanieroj, kaj samtempe pli internaciigi, pli normigi, niajn proprajn parolmanierojn.

Estas dezirinde, paroli Esperanton kiel eble plej aŭtentike internacie, tiel ke niaj fonetikaj kutimoj ne tuj proklamas al perceptema orelo, el kiuj landoj ni venas. Ni povas dumvive strebi al tia perfekteco, al kiu kiel eble plej multaj parolaj internaciaj kontaktoj multe helpos. Tamen, ni ne tro turmentu nin — kaj des malpli ni turmentu aliajn — ĉar tra la tutmonda esperantistaro ne regas tute ideala, absoluta, ĉiudetala sameco de elparolado. Ĉu ĝi ekzistas ĉiuloke kaj ĉiuklase en iu ajn nacia lingvo? Laŭ la spertoj de la aŭtoro, ekzemple, ankoraŭ ekzistas multe pli fortaj diferencoj inter la elparolado de angloj, precipe nekleraj, en diversaj regionoj de Anglujo, ol inter la esperanta elparolado de esperantistoj el ĉiuj mondopartoj, en Universala Kongreso. Kaj, dum radio, televizio kaj lernejoj konstante emas normigi naciajn lingvojn, esperantistoj

plejparte renkontas alilandajn esperantistojn sufiĉe malofte. Ni do daŭre strebado, pliinternaciigi nian propran elparoladon, sed restu iom toleremaj pri ĉiuj, kiujn ni renkontos. Kondiĉe ke ni komprenas unu la alian, *malgrandaj* variaĵoj malhelpas agrablajn homajn rilatojn nur kiam iu laŭ tro maltakta, malafable supereca maniero atentigas pri ili!

Estas vere grave, distingi nedubeble inter *rato* kaj *roto*, *anglo* kaj *angilo*, *pulo* kaj *bulo*, *maso* kaj *maŝo*, *steko* kaj *sterko*; sed ke la preciza vokalsono en *ne* ofte ne estas tute sama por, ni diru, franco, dano, ĉino kaj italo, ne povas miskomprenigi.

Jen averto. Kiam vi, simpatia samideano, progresanto el frosta Rosmarlando, por la unua fojo renkontos samideanon el tropika Lemurujo, vi preskaŭ certe sentos, ke li aŭ ŝi parolas iom malsame al vi mem. Ne tuj riproĉu al tiu nekonato, "Vi havas tre fortan lemuran dialekton!" Ne nur ĉar estas ege malĝentile. Sed estas preskaŭ centprocente certe, ke vi elparolos tiun riproĉon kun tuj identigeblaj rosmaraj trajtoj, pri kiuj la aliaj rosmaroj, kun kiuj vi ekzercadis vin en konversacioj, ne konsciis! Estas eĉ eble, ke la elparolado de la lemuro estas pli proksima al perfekta internacieco, ol la via...

Skribado tre helpas nin aktive regi lingvon. Ne necesas ĉi tie ripeti la konsilojn pri plum-amikoj, trovitajn jam en ĉapitroj 8 kaj 10. Sed estas ankaŭ valore, foje fari skribajn ekzercojn, precipe se iu pli sperta esperantisto konsentos korekti ilin.

Pluraj landaj asocioj ofertas ne nur elementajn korespondajn kursojn, sed korespondajn kursojn por progresantoj kaj eĉ altgradajn kursojn, kiuj preparas lernantojn por vere altnivelaj ekzamenoj. Tiaj kursoj estas tre valoraj. Ankaŭ ekzamenoj mem multe helpas nin progresi; ili donas al ni portempajn celojn, kaj prezentas al ni kriteriojn.

Kontrolado estas pli grava faktoro en nia progreso, ol ni tuj konstatas. Ju pli ofte ni permesas al ni ripeti iun eraron, des pli profunde ni enradikigas ĝin en la propran cerbon.

Ni 'lernis' tiun gramatikan punkton. Bone; sed post pli da legado, iom pli matura kompreno pri la strukturo de nia lingvo — ni tre eble pli plene komprenos tiun saman punkton, se ni iom restudos ĝin. Ni frue lernas utilan vorton; sed ĉu ni jam perfekte kom-

prenas ĝian precizan nuancon, kompare kun aliaj vortoj, kiujn ni poste lernis? Ni *kredas*, ke ni lernis la vorton por tiu besto aŭ frukto; kial ne rigardi en vortaro por certiĝi, ke estas la ĝusta vorto? Plej ofte ĝi estos, sed kelkfoje ni ricevos surprizon!

Post la plej fruaj stadioj de nia lernado, nia plej valora progresilo estas *internacia vortaro*. La nivelo de nacilingvaj-esperantaj vortaroj tre varias, de nacio al nacio kaj de vortaro al vortaro; kaj nur internacia vortaro estas internacie plene fidinda.

Apenaŭ supertakseble havinda, multekosta sed senfine instrua, valoranta verajn oferojn kaj klopodojn, estas tiu monumento de scio, scienca kunlaborado kaj sindediĉa servado, la *Plena Ilustrita Vortaro*. Serioza esperantisto ne bedaŭros ĝenan ŝparadon por akiri ĝin; ĝi povas tute modifi la kvaliton de nia esperantismo. Se estas vere neeble akiri tiun epokfaran verkon — oni akiru almenaŭ la malgrandan sed tre bonan antaŭverkon, la *Plenan Vortaron*, kun ĝia *Suplemento*.

La granda valoro de tiuj du vortaroj estas ne nur, ke ili liveras fidindajn vortostokojn kun internacie fidindaj difinoj; kiuj ne nur klarigas, sed helpe limigas ilin; sed ankaŭ ke ili prezentas multajn precedencojn, kiuj montras al ni jam nepre akcepteblajn uzojn de la vortoj.

Pri Esperanto, kiel pri io ajn studinda, ni neniam scias tiom, ke ni ne povas pligrandigi nian scion; kaj ni neniam havos scion tiel perfektan ĉiudetale, ke iom da kontrolado ne povos utili.

Mi, kiu verkis ĉi tiun legolibron, penis ĝis nun kiel eble plej ne montri en ĝi mian individuan vizaĝon; sed nun mi faros al ĉiuj lernantoj etan aŭtoran konfesion.

Mi eklernis Esperanton en 1949, kaj la nuna libro estas mia dekdua eldonita libro en Esperanto. En 1967 mi iĝis (iom surprizita) akademiano. Mi multe studadis, instruis, ekzameniĝis, ekzamenis, prelegis, recenzis.

Sed, preparante legolibron por esperantistoj ankoraŭ ne tre spertaj, mi rekonis specialan devon, ne *misinstrui* ilin; eraremaj estas ni homoj ĉiuj, sed ni penu almenaŭ ne elsputi erarojn, kie ili infektos novicojn.

Ĉi tiu legolibro enhavas proksimume 100 000 vortojn. Dum la verkado, mi kontrolis, en *PIV*, *Plena Gramatiko*, fakaj terminaroj kaj foje anglalingvaj konsultlibroj pri detaloj de scienca nomenkla-

turo, verŝajne ĉirkaŭ 5 000 vortojn aŭ dirmanierojn, preferante tiel konfirmi, ol fidi nur mian memoron aŭ lingvosenton. Mi kredas, ke per tiu kontrolado mi evitis eble 500 dubindaĵojn, kaj almenaŭ 50 vere vangruĝigajn, infektkapablajn erarojn.

Esperanto estas, kvazaŭ mirakle, pli facila ol nacia lingvo; ankaŭ, pro ĝia simpleco kaj klareco, kelkaj eraretoj en ĝi estas ofte pli porteblaj, malpli katastrofaj, ol en nacia lingvo. Sed ĝi ja estas riĉa *lingvo*, ne turista poŝfrazaro; ĝi do indas kaj postulas seriozan studadon.

Kaj jen dua aŭtoro konfeso: ĉiuj miaj profesiaj kvalifikoj, ekster Esperanto, estas pri la angla, mia denaska nacia lingvo; sed kiam mi verkas angle, mi ankoraŭ ofte konsultas unu el miaj sep grandaj anglaj vortaroj.

Per kontrolado ni ne nur evitas erarojn, sed ni konstante lernas.

Ni memoru: *“Jen iu kontenta pri jama scio: por tiu, morgaŭ, nur sama scio. — Jen iu, al sia scio ne fidas: malfido al plua scio gvidas.”*

Servado al Esperanto estas parto de la progreso de multaj esperantistoj. Kompreneble, tiu, kiu eklernis Esperanton, nur por interŝanĝi bildkartojn, rajtas elekti tiun limigitan uzmanieron. Esperanto estas komunikilo por la tuta homaro; ĉiu rajtas utiligi ĝin por iu ajn celo ne mem fia; kaj tiu, kiu rilatas al Esperanto nur egoisme, tre eble al io aŭ iu alia rilatas malpli egoisme.

Tamen, pli aktiva esperantisto, kiu aniĝis al la esperantista organizo taŭga al personaj intereso kaj eblecoj, abonas kelkajn gazetojn, partoprenas la propagandajn kaj aliajn laborojn de iu grupo, se eble vizitas foje ian internacian esperantistan eventon, do iom oferas tempon, monon kaj talentojn por esti ne nur ‘esperantisto’ sed ‘movadano’, kutime trovos en tiuj laboroj rimedojn por intelekta progreso.

La agado de serioza Movadano ne estas vivo de sportoj kaj tortoj; foje farena laboro estas teda, grandaj sinoferoj atingas malmulton, abundas mankoj, malestas dankoj; ni esperantistoj, ne estante anĝeloj, ne ĉiam sukcesas konstante kondukti amike unu al la alia; neniu el ni senescepte ĉiam aprobos ĉion, kion ĉiuj aliaj

faras. Iu ajn, kiu longe penados servi, ne nur Esperanton, sed iun ajn valoran celon, spertos kelkajn amarajn seniluziigojn, devos foje vere venki sin mem. Jen la vivo.

Kaj tamen, tiu, kiu penas vere servi Esperanton, ricevos multajn specialajn sciojn, vivon pli interesan, novajn konceptojn pri homaj eblecoj. Tiu persono vidos malgrandskalan sed jam eksterordinare larĝan kaj multfakan tutmondan kulturon; pli kaj pli bone komprenos, kion kaj kiom neŭtrala internacia lingvo povas fari por la homaro; havos eksterordinare realan, intiman, senperan komprenon pri la mirindaj diversecoj de landoj kaj gentoj kaj unuopuloj, kaj samtempe pri la same mirindaj similecoj de ni homoj ĉiulandaj, ĉiugentaj, ĉiunomaj. Esperanto estas utila lingvo, inda je lernado; sed plena esperantismo povas iĝi vivostilo, vivostilo inda por avangardanoj de la homaro. La lernado de nia lingvo ebligas senfinan animkreskigan lernadon per nia lingvo.

Lastaj Novaj Proverboj

Longe rampanta larvo boris; nun brila papili' eksoris.

Ne valoras principoj nur sur la lipoj.

Al fina gloro — per teda laboro.

Pli facile krei proverbojn krajone, ol mem konduki saĝe kaj bone!

Lastaj Versoj

Leginte tiun ĉi volumon,
legu aliajn, kaj pli bonajn;
neniu tenos scio-sumon,
ĉiu kapablas kreskojn konajn.

Aliaj bestoj vivas per
instinktoj kaj per apetito;
homo sopiras al la Ver',
konceptas pri la infinito.

Progresu daŭre, daŭre lernu.

De pinto grimpu ĉiam al pinto;
la Verda Stel' sur voj' lanternu:
estu feliĉa, ho leginto!

GLOSARO

Vortaro estas libro nepre necesa por ĉiu serioza lingvolernanto. Sed ne ĉiu esperantisto povas frue akiri bonan grandan vortaron. Tial mi decidis provizi la leganton per glosoj pri vortoj kiuj, kvankam jam akceptitaj esperantaj vortoj, eble ne troviĝas en tiu esperanta-nacilingva vortaro, kiun la leganto jam disponas. Mi aldonas kelkajn aliajn klarigetojn.

Ĉiuj vortoj, escepte de tiuj distingitaj per *, troviĝas en *PIV*. Ĝenerale, mi ne glosas vorton, kiun mi detale difinis en la teksto. Mi uzas simplajn, foje iom trosimpligitajn, difinojn, ĉar pli sciencaj difinoj per eĉ pli maloftaj vortoj ne tre helpas ĉi tie.

afrikansa, la — Sud-afrika lingvo, parenca al la nederlanda.

agutio — Amerika mamulo, kiu moviĝas per rapidaj saltoj. (*Dasyprocta aguti*)

alo — Ĉiu el la du flankaj partoj — de nazo, aviadilo, konstruaĵo, armeo; havas kelkajn aliajn parencajn sencojn.

albino — Homo aŭ besto, denaske sen kutimaj pigmentoj en la haŭto kaj haroj.

alfo — Nord-afrika herbo, uzata en paper-fabrikado.

alĥemisto — Praktikanto de frua pseŭdoscienco, kiu celis ŝanĝi metalojn en oron, trovi viv-eliksiron k.t.p. Alĥemion oni ankaŭ foje komprenis alegorie.

anakardio — Manĝebla frukto de tropika arbo, kun tre bongusta nukseca kerno.

anakondo — Grandega sufokserpento el Sud-Ameriko.

anatemo — Solena malbeno apartiga (en kelkaj kristanaj eklezioj).

Ankaro — Ĉefurbo de Turkujo.

apaĉo — 1. Ano de indiana tribo; 2. Grandurba bandito.

apokrifa — Ne akceptita kiel aprobata libro de la Biblio; ne aŭtentika.

- ardeo** — Granda, longkrura, longkola vad-birdo. (*Ardea*)
- arkaika** — Malnoviĝinta, ne plu uzata.
- ateliero** — Laborejo de artisto.
- aŭdienco** — Oficiala akcepto ĉe reĝo aŭ simila altrangulo.
- aŭguri** — Diveni estontaĵon per observo de birdoflugo k.t.p. Ĝenerale antaŭvidi, antaŭdiri.
- aŭko** — Nord-amerika naĝ-birdo. (*Alca*)
- aŭstrala** — Rilata al la suda hemisfero.
- aŭtonoma** — Politike aŭ ekonomie sendependa.
- azteko** — Ano de indiana popolo, iam loĝinta en Meksikio.
- balustrado** — Vico de balustroj (t.e. kolonetoj), kun supra, transversa breto, ĉe la rando de teraso, la flanko de ŝtuparo k.t.p.
- banjano** — Hinda figujo, kies branĉoj reenradikiĝas. (*Ficus Indica*)
- basuto** — Ano el popolo de Lesoto (Afriko), kiu parolas la basutan lingvon.
- bedueno** — Ano el nomada araba gento.
- bejo** — Turka guberniestro.
- bizara** — Strang-efika, malharmonie originala.
- bikŝuo** — Almozpetanta budhana monaĥo.
- bodhisatvo** — Budhisma sanktulo de la plej alta grado.
- bradipo** — Sud-amerika mamulo, arbogrimpanta, kiu moviĝas tre malrapide. (*Bradypus*)
- brago** — Parte bruligita ligno aŭ karbo, poste uzota kiel bruligaĵo.
- bumerango** — Revenema ĵetbastono de aŭstraliaj indiĝenoj.
- cirozo** — Grava inflama malsano de organo, ofte de la hepato.
- damao** — Besto simila al cervo, sed la virbesto havas platajn kornojn.
- *defrosnii** — Vorto tute ne ekzistanta!
- dido** — Granda, ne flugkapabla, birdo de Maŭrcio; ekstermita en la 17-a jarcento. (*Dido*)
- didelfo** — Malgranda amerika mamulo arbogrimpanta. (*Didelphis*)

dinastio — Sinsekvo de regnestroj, el sama familio, heredantaj la tronon.

dinornito — Granda birdo de Nov-Zelando, jam ekstermita. (*Dinornis*)

drakunkolo — Herbo uzata kiel spicaĵo. (*Artemisia dracunculus*)

ekimozo — Makulo de la haŭto, pro kontuzo.

emuo — Brunkolora aŭstralia birdo. (*Dromiceus*)

eno — Japana mon-unuo.

epidermo — La supraĵa, ŝima tavolo de la haŭto.

epopeo — Longa poemo pri aventuroj de herooj.

eposo — Rakonta poezio.

erudicio — Granda scio pri detaloj en iu faka scienco.

etnologo — Specialisto pri la evoluo de civilizacioj, kaj la historio de la moroj, kulturoj kaj folkloroj de diversaj hom-grupoj.

eŭkalipto — Granda arbo, kun aromaj folioj. Oleo el kelkaj specioj estas uzata en farmacio. (*Eucalyptus*)

fakoĉero — Afrika mamulo, parenca al porko, eksterordinare malbela laŭ homaj konceptoj, kun verukformaj svelaĵoj en la vizaĝo. (*Phacocerus*)

fakultato — Ĉiu el la diversaj fakoj de universitato, aŭ la profesorado de aparta fako.

fanatika — Blinde fervora kaj ne tolerema.

fantio — Ano de afrika tribo en Ganao; parolas la fantian lingvon.

fetiĉismo — Primitiva religio, en kiu fetiĉoj, objektoj rigardataj kiel loĝejoj de supernaturaj fortoj aŭ estaĵoj, estas adorataj.

fibulo — Longa osto inter genuo kaj maleolo.

fluoro — Elemento (atomnumero 9); gaso, tre atakema, kiu kombiniĝas kun ĉiuj aliaj elementoj, escepte oksigenon.

Fortuno (kun majusklo) — Personigita sorto, kaprica disdonanto ne nur de bona ŝanco (fortuno) sed ankaŭ de malbona ŝanco.

fosfato — Salo de fosfata acido, t.e. acida kombinaĵo de fosforo.

fragila — Facile rompebla.

frugilego — Specio de korvo. (*Corvus frugilegus*)

fumaji — Prepari viandon aŭ fiŝon per fumo, por igi ĝin konservebla.

fuzeo — La eksplodigilo de bombo, obuso aŭ malnovstila pafilo.

galinulo — Malgranda vad-birdo, «akvokoko». (*Gallinula*)

gepardo — «Ĉasleopardo», la plej rapida mamulo. (*Acinonyx*)

getto — Kvartalo en urbo, kie oni devigis judojn loĝi aparte.

gilotino — Maŝino por senkapigi kondamnitojn.

glicerolo — Populare «glicerino». [$C_3H_8O_3$]

glikolo — Unu el la alkoholoj (ne tiu, kiu troviĝas en drinkaĵoj). [CH_2OHCH_2OH]

gondolo — Pitoreska barketo, longa, karakteriza de Venecio.

grenato — Bela ruĝa gemo, formo de silikata mineralo.

grifelo — Speciala skribilo aŭ gravurilo, inter aliaj tiu speco de krajono, per kiu oni skribis sur ardezo en lernejo.

ĝainismo — Asketa religio hinda

ĝinno — En islamo, spirito el flama naturo, pli malaltranga ol anĝelo, kapabla aperi en homa aŭ besta formo. (*PIV* uzas «ĝino»; *La Nobla Korano* «ĝinno» — La dua formo evitas konfuzon kun la grenbrando.)

***haoro** — Japana vesto aperta, portata super kimono.

harpuno — Lanco kun ŝnuro, uzata por kapti balenojn kaj grandajn fiŝojn.

hidropso — Akvoplena svelaĵo en la korpo; fluido en korpa kavaĵo, precipe en la abdomeno.

hipokampo — Fiŝo, kies formo similas al tiu de ŝakluda ĉevaleto. (*Hippocampus*)

histriono — Malbona aktoro, kiu uzas troigitajn gestojn k.t.p.

holdo — Parto de ŝipo, en kiun oni metas la kargon.

hameleono — Rampulo, kiu ŝanĝas la koloron por simili al la fono.

iglo — Eskima neĝodomo, kupol-forma.

ignamo — Manĝebla radiko aŭ tubero, grava nutraĵo en Afriko. (*Dioscorea sativa*)

iktero — Flaviĝo de la haŭto kaj okuloj, simptomo de pluraj malsanoj.

imamo — Kult-oficanto de moskeo. (Ankaŭ titolo de Kalifo.)

inkao — La reĝo de Peruo antaŭ la hispana invado; aŭ ano de la reĝa klano.

inkrusti — Ornamo la surfacon de objekto per enigitaj pecoj de alia materialo.

Jamajko — Granda insulo en la Antiloj, sude de Kubo.

jelpi — Krii kiel vundita hundo.

***jorubo** — Ano de lingvokomunumo de okcidenta Afriko, kies lingvo estas la *yoruba*.

jigo — Vigla danco, irlanda aŭ angla.

kadio — Islama ŝtatoficisto

kajako — Eskima boato el fokfejoj, movata per pagajo.

kandizi — Envolvi ion, ekzemple frukton, en *kando*, preparaĵo el sukero.

kanuo — Indiana boato el arboŝelo, movata per pagajo.

karibuo — Kanada boaco.

kasavo — Faruno el la tuberoj de la manioko, aŭ plata pano bakita el tiu faruno.

kataluno — Ano de la ĉefgento de Katalunujo, regiono en la nord-oriento de Hispanujo.

***Katerhorno** — Ŝerca vorto, ŝanĝanta la nomon de la svis-itala monto pro kialo memevidenta en la teksto.

Katulo — Granda lirika poeto de antikva Romo.

kavio — Malgranda amerika mamulo. (*Cavia*)

kepo — Militista aŭ lerneja ĉapo, kun viziero.

kiraso — Metala armaĵo ŝirmanta la bruston kaj la dorson.

klaviceno — Muzik-instrumento kun klavaro, nun arkaika.

- kmero** — Ano de la ĉefa popolo de Kamboĝo.
- knokaŭto** — Bato, per kiu boksisto senkonsciigas sian kontraŭulon.
- koalo** — Aŭstralia arbgrimpanta mamulo, simila al malgranda urso. (*Phascolarctos cinereus*)
- kolokasio** — Genro de herboj, de kiu unu, *Colocasia antiquorum*, estas valora legomo en pluraj tropikaj landoj pro amel-riĉaj tuberoj.
- koloraturo** — Ornamado de kanto per triloj.
- konsekri** — Per rito apartigi ion por religia uzo.
- kopro** — Sekigitaj kernoj de kokosnuksoj.
- korodi** — Kemie difekti la surfacon de io.
- koŝmaro** — Preme malagrabra sonĝo.
- kropo** — Organo, en kiu birdo dum tempo konservas kaj ekdigestas nutraĵon.
- krotalo** — Tre venena nord-amerika serpento, kiu havas klakantan aparaton en la vosto. (*Crotalus*)
- kulinara** — Rilata al la kuirejaj artoj.
- lamo** — Sud-amerika granda mamulo, parenca al kamelo kaj uzata kiel ŝarĝbesto. (*Lama glama*)
- lamao** — Budhana pastro, ĉefe en Tibeto aŭ Mongolio.
- lezo** — Difektiĝo de histo aŭ organo. (Medicina termino)
- likva** — En stato inter la solida kaj la gasa.
- lirli** — Fari la brueton de akvo sur ŝtonoj.
- loligo** — Marbesto, unu el la cefalopodoj, kun dek brakoj.
- lopi** — Pri aviadilo, fari kompletan turniĝon, en vertikala ebena, en la aero.
- lorio** — Aŭstralia birdeto, parenca al papago.
- lotuso** — Nomo donita al pluraj plantoj. En orientaj religioj kaj artoj, kutime temas pri nimfeo («akvolilio»), *Nymphaea lotus*, kiu en budhismo estas sankta signo.
- madrigalo** — Speco de plurvoĉa kanto.
- mahuto** — Prizorganto kaj kondukisto de elefanto.

***majno** — Azia birdo, parenca al sturno. La monta majno de Hindujo, *Gracula religiosa*, nigra kun oranĝflava beko, estas ŝatata kiel kaĝ-birdo.

mamuto — Praelefanto de la arktaj regionoj.

maniso — Skvam-kovrita mamulo de Azio kaj Afriko.

marasmo — Ekstrema malgraseco kaj senvigleco, pro malsano.

mecenato — Malavara riĉulo kiu helpas artistojn k.t.p.

mediumo — Laŭ spiritisma doktrino, peranto inter teraj vivantoj kaj spiritoj de mortintoj.

melduo — Surplanta ŝimkovraĵo kaj malsano, kaŭzata de fungo.

menueto — Danco (aŭ muzikpeco) de la 17-a jarcento.

metalografio — Scienco pri la metaloj.

mirho — Bonodora gumrezino el la trunkŝelo de arbo.

Mitraismo — Antikva religio, ĉefe de la romia imperio, kultanta Mitraon, genion originale el Mazdaismo, la antikva irana religio.

moskeo — Preĝejo de islamanoj.

mungoto — Mamulo de Hindujo kaj Afriko, ŝatata ĉar ĝi mortigas serpentojn. (*Mungo*)

nacelo — La pasaĝerujo sub granda balono (*aerostato*); parto de aerveturilo, entenanta personaron aŭ motoron.

nomado — Membro de tribo, kiu konstante migras.

obio — Japana zono, uzata ĉe kimono.

***okogamio** — Ŝerca vorto, analogia al *bigamio*, *poligamio*; have de ok edzinoj samtempe.

olda — Maljuna.

olimpiko — Iama helena sportkonkurso; nuntempa altprestiga internacia sportkonkurso.

oratorio — Muzika verko, kutime religia, simila al opero, sed sen agado, scenaĵo kaj kostumo.

orikteropo — Afrika mamulo kun longaj kapo kaj oreloj, kaj dentoj kvazaŭ kunmetitaj en tubetoj. Ĝi manĝas termitojn. (*Orycteropus*)

panteono — Templo por ĉiuj dioj; monumento dediĉita al tiuj, kiuj aparte glorigis sian patrujon; tuto de la dioj de unu popolo aŭ religio.

pario — Hindo senkasta; mizerulo elĵetita el la societo.

partituro — Tuto de la partoj de plurinstrumenta aŭ plurvoĉa komponaĵo, rigardataj kiel unu komplekso.

piktogramo — Bildo de konkreta objekto aŭ ago, uzata anstataŭ vortoj, ekz. kiam trafiksigno montras bildon de infanoj, por averti pri proksimeco de lernejo.

pilafo — Boligita rizo miksitita kun spicoj kaj viando aŭ fiŝaĵo.

pluvio — Vad-birdo, mezgranda; ekzistas pluraj specioj.

poefago — La longhara gruntbovo de Tibeto. (*Poephagus grunniens*)

poliomjelito — Epidemia malsano, kiu ofte kaŭzas partan kripliĝon; «infana paralizo».

popo — Grek-ortodoksa pastro en la slavaj landoj.

poplito — Parto de la gambo malantaŭ la genuo.

precepto — Obeenda religia ordono aŭ regulo.

proceduro — Kutima maniero konduki la aferojn, ekzemple en kortumo, parlamento.

prociono — Nord-amerika rabobesto, simila al malgranda urso, kun longa vosto markita de koloraj ringoj. Foje nomita «lav-urso» ĉar ĝi lavas sian manĝaĵon antaŭ ol manĝi ĝin. (*Procyon*)

pterodaktilo — Fluganta reptilio de la pratempo.

raŭpo — Larvo de papilio, kaj de kelkaj aliaj insektoj.

refuti — Venke rebati per trafaj argumentoj.

Romio — Vorto ofte uzata, precipe en la adjektiva formo *romia*, por distingi la romanan imperion, kun ĝia grava civilizacio, de *Romo* ĝenerale, la urbego iam centro de la antikva imperio, sed ankoraŭ grava kiel ĉefurbo de Italujo kaj sidejo de la Papo.

ruldomo — Domo, kiu ruliĝas, t.e. veturilo, aranĝita por servi kiel dometo.

- sanskrita, la** — La antikva, sankta lingvo de norda Hindujo.
- seanco** — Ĉi tie, kunveno de spiritistoj. La vorto havas aliajn sencojn.
- sekrecio** — Organika substanco produktata de glando, ekz. larmoj, salivo.
- sireno** — Herbomanĝanta mamulo, kun balensimila vosto, vivanta en akvo. (La vorto havas aliajn sencojn.)
- sistro** — Antikva egipta instrumento, konsistanta el metalaj vergetoj, kiujn oni sonigis per skuoj.
- skalpo** — Forŝiro de la krania haŭto; tiu krania haŭto, kun la haroj, kiun nord-amerikaj indianoj forŝiris kiel trofeon.
- skolopendro** — Granda sud-amerika venena *miriapodo* (mult-membrulo). (*Scolopendra*)
- solstico** — Ĉiu el la du tempoj (en junio kaj decembro) kiam la suno estas plej malproksima de la ekvatoro.
- sorgo** — Grava grenspecio en varmaj, sekaj regionoj.
- *spunera** — Por-okaza adjektivo el persona nomo, ne akceptita esperanta vorto.
- stamfi** — Peze, kolere aŭ senpacience bati la grundon per la piedoj.
- stelario** — Herbo (*Stellaria*) de arbaroj kaj malsekaj herbejoj, kun kvinpetalaj blankaj floroj.
- stencilo** — Membrano, kiun oni traboras per skribilo aŭ tajpilo, tiel ke poste oni povas per inko-transŝvito prepari multajn kopiojn de la surstencila teksto.
- strangoli** — Sufokpremi al iu la gorĝon.
- surogato** — Produkto, kiun ni povas uzi anstataŭ iu alia.
- tabuo** — Speciala moro, ĉe neevoluintaj civilizacioj, laŭ kiu iaj personoj aŭ objektoj estas netuŝeblaj sen ia socia aŭ magia puno.
- taro** — La ĉefa manĝebla kolokasio.
- teraplano** — Veturilo, portata de aerkuseno, kapabla iri sur tero kaj akvo.
- termoso** — Termobotelo, varm-izola botelo.
- tibio** — Longa ostoj inter la genuo kaj la maleolo.

timiano — Spice odora arbusteto, kies foliojn oni uzas kiel spicaĵojn. (*Thymus vulgaris*, kaj aliaj specioj)

tinunkolo — «Tur-falko», rabobirdo, kiu kutime manĝas malgrandajn bestojn. (*Falco tinnunculus*)

torporo — Stato de korpa kaj mensa malvigleco.

totemismo — Primitiva socia-religia sistemo, bazita parte sur kredo je parenceco inter unu homgrupo kaj unu besto aŭ planto, de kiu sekvas diversaj tabuoj.

***trogono** — Unu el la familio de brile koloraj tropikaj birdoj, kiun karakterizas tre maldikaj haŭtoj kaj neordinara formo de la piedoj.

ultimato — Kondiĉoj de interkonsento prezentitaj kun averto, ke malakcepto kaŭzos komencon de milito.

uro — Specio de bovo, formortinta antaŭ kelkcent jaroj. (*Bos urus*)

uzuro — La misfaro de tiu, kiu pruntedonas monon kun interezo ekscesa.

vampiro — 1. specio de vesperto; 2. fabela fantomo elirante nokte por suĉi sangon de dormantoj.

vermiljono — La ruĝa koloro de *cinabro*, sulfido de hidrargo.

vikingo — Unu el sovaĝa skandinavia gento, kiu en la 9-a kaj 10-a jarcentoj vizitis Rusujon, Anglujon kaj Francujon por rabi kaj detruj. Foje oni hodiaŭ ŝerce nomas tiel la modernajn mildajn, bonkondutajn skandinavianojn.

***zumfero** — Kruda muzikilo, plejparte infana ludilo: lirforma, el metalo; oni ludas ĝin kontraŭ la dentoj, fingre plukante metalan langon.

SOLVOJ AL ENIGMOJ

ĈAPITRO 2 KAŜITAJ URBOJ

Milano, Pekino, Panamo, Ateno, Tripolo, Karako, Tokio, Santiago, Hobarto, Kievo.

ĈAPITRO 5 KUKOLOJ EN LA NESTOJ

Komato estas malsana stato. | *Ardezo* estas rokospeco. | *Gerilo* (ne *gorilo*!) estas partizan-milito. | *Miogalo* estas besto. | *Rubuso* (ne *rubeno*!) estas bero. | *Orgio* estas diboĉo, ne muzika instrumento. | *Episkopo* estas persono. | *Tiroido* estas grava glando. | *Mopso* estas specio de hundo, ne birdo; kaj neniam okazis esperanta mondkongreso en *Kairo*.

ĈAPITRO 17 ENIGMOJ

1. Di-amanto | 2. For-mulo! | 3. Dek-retoj | 4. Karot-ido |
5. Mit-ulo | 6. Tur-isto | 7. Pat-ano | 8. Pek-ario | 9. Kata-strofo |
10. Tro-pikaj.

ĈAPITRO 30 AKROSTIKO

H istriko
O kulisto
D elfeno
L oterio
E kstermi
R ecenzo

DUOBLA AKROSTIKO

L onicer O
U niversal A
N ervo Z
O kcident O

KRUCVORTENIGMO

C I V I L I Z A C I O
I ● ● N ● N ● G ● ● F
T A J D ● K ● L E K I
R ● ● A G A T O ● ● C
O B E ● R ● A ● I Ĝ I
N O B L A ● N E N I A
F A L ● T ● A ● G A L
L ● ● D I E S O ● ● I
A R D I ● B ● F L A G
V ● ● K ● U ● I ● ● I
A L I T E R A C I A S



Marjorie Boulton naskiĝis en 1924 kaj edukiĝis i.a. en la Universitato de Oksfordo, Britio, kie ŝi doktoriĝis pri literatura scienco. Nun profesia verkisto, ŝi dum multaj jaroj estis la direktoro de pedagogia kolegio. En 1949 ŝi lernis Esperanton, kaj debutis sur la kampo de la Esperanta literaturo en la Belartaj Konkursoj de UEA. Ŝia unua poemaro, *Kontralte*, aperis ĉe Stafeto en 1955. Baldaŭ sekvis *Kvarpieda kamarado* (1956),

Cent ĝojkantoj (1957), *Eroj* (1959), *Virino ĉe la landlimo* (dramoj kaj skeĉoj, 1959). En 1960 oni publikigis ŝian gravan anglalingvan biografion *Zamenhof, Creator of Esperanto* (represitan en 1980). En 1962 oni eldonis ties Esperantan version: *Zamenhof*. Inter ŝia aro da noveloj aperis libre *Dek du piedetoj* (1964) kaj *Okuloj* (1967). En 1976 venis *Rimletoj* (poemaro, kun William Auld). En 1983 oni publikigis ŝian literatursciencan esploron pri la verkaro de Julio Baghy: *Poeto fajrakora*. En la angla oni eldonis de Marjorie Boulton serion de enkondukaj libroj por la studo de la beletro. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto.

Marjorie Boulton estas matura, socie engaĝita literaturisto — unu el la plej produktivaj kaj ŝatataj en Esperanto. Ŝian verkaron trapenetas varma tono, sincero kaj profunda humanismo. Ŝi scias instrui kaj amuzi kaj havas senton pri humuro.

Faktoj kaj fantazioj estas legolibro, komisiita de UEA, speciale por tiuj, kiuj apartenas al la kategorio *progresantoj*. Kvankam ne eblas difini tiun kategorion kun zoologia precizeco, ĝi certe inkluzivas tiujn, kiuj finis elementan kurson de Esperanto kaj deziras daŭrigi. Tial la gvidantoj de progresigaj kursoj trovas la legolibron aparte utila, sed la aŭtorino celis ankaŭ la multajn memlernantojn.

Faktoj kaj fantazioj ekzercigas pri frazkonstruado, por kreskigi la kapablon legi, skribi kaj paroli. Ĝi pligrandigas la vortostokon de la leganto. Uzante simplan stilon, Marjorie Boulton sisteme enkondukas utilajn esprimrimedojn, kiujn progresintoj ofte ankoraŭ ne tute regas.

Bona lernilo devas esti interesa. Tion Marjorie Boulton lerte atingis en 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo. Ili igas la leganton streĉe atenti, miri, kortuŝigi kaj ridi.

Per plezuro **Faktoj kaj fantazioj** portas al progreso.